


Historio de la Esperanto-movado inter la blinduloj 1888–2015

Ligo Internacia de Blindaj Esperantistoj (LIBE)



Historio de la Esperanto-movado inter la blinduloj 1888–2015

En kvar volumoj

Redaktis I – II Joseph Kreitz, 1972, 1981
III Raymond Gonin kaj Rudolf Krchňák,
finredaktis Attila Varró, 1990
IV Ritva Sabelli, 2016

Eldonis Ligo Internacia de Blindaj Esperantistoj (LIBE)
kun financa subteno de s-ino Ritva Sabelli

Presejo: Keuruskopio Oy, 2016

TABELO DE ENHAVO

Al leganto, Arvo Karvinen	7
Postskribo, Ritva Sabelli	8
Unua volumo (1972) Titolpaĝo de la originalo	10
Dediĉo	11
Antaŭparolo, Joseph Kreitz	12
Unua parto	
1 La komencoj	14
2 Esperanta Ligilo ekde 1904 ĝis 1915	18
3 Kongresoj ĝis 1914.....	20
4 Vojaĝoj de blinduloj efektivigitaj per Esperanto.....	21
5 Eldonado de brajle presitaj libroj en kaj pri Esperanto.....	22
6 Resuma raporto	23
Dua parto	
7 La blindulesperantista movado dum la unua mondmilito	27
8 Esperanta Ligilo ekde la jaro 1919 ĝis 1940	27
9 La movado ĝis 1923.....	31
10 La naciaj blindulesperantistaj societoj ĝis la jaro 1939.....	33
11 La "Universala Asocio de Blindaj esperantistoj" (UABE)	42
12 La "Universala asocio de blindulorganizaĵoj" (UABO).....	58
13 Diversaj internaciaj blindulesperantistaj organizaĵoj.....	66
14 La unua internacia kongreso de blindaj esperantistoj en Praha 1921	67
15 La internaciaj kongresoj de blindaj esperantistoj ĝis la jaro 1939.....	70
16 La "dua" en Helsinki 1922.....	70
17 La "tria" en Nürnberg 1923	72
18 La "kvara" en Vieno 1924.....	74
19 La "kvina" en Edinburgo 1926.....	76
20 La "sesa" en Danzig 1927	77
21 La "sepa" en Antverpeno 1928.....	80
22 La "oka" en Budapest 1929	81
23 La "naŭa" en Oxford 1930	82
24 La "deka" en Krakovo 1931.....	83
25 La "dekunua" en Parizo 1932.....	84
26 La "dekdua" en Kolonjo 1933.....	86
27 La "dektria" en Stockholm 1934.....	88
28 Antaŭparoleto al la "dekkvara" 1937	93
29 La "dekkvara" en Varsovio 1937.....	94
30 La "dekkvina" en Londono 1938.....	101

31 La "deksesa" en Bern 1939	102
32 Indekso de gravaj dokumentoj en brajla preso	105
33 Epilogo, J. Kreitz	108
Dua volumo (1981) Titolpaĝo de la originalo	109
Eminentaj pioniroj de la Blindulesperantista movado	109
Antaŭparolo, Joseph Kreitz	109
Listo de la biografioj:.....	110
Harald Thilander [Svedio]	111
Théophile Cart [Francio].....	124
William Percy Merrick [Britio]	126
Karel Emanuel Macan [Ĉeĥio]	128
Johan Wulff [Danio]	130
Agnes Melchior [Danio]	131
Paul Ketterer [Svislando]	132
Edvard Imsdahl [Norvegio].....	133
Henriette Zapater [Nederlando/Germanio].....	134
Anna Friman [Finnlando].....	136
Baldomero Zapater [Hispanio/Germanio].....	137
José Ezquerro Berges [Hispanio]	138
Angelo Raffaele Tancredi [Italio]	140
Vasilij Jakovlevič Eroŝenko [Rusio]	142
Julius Hasselbach [Germanio]	150
Kapitano Jan Silhan [Ukrainio/Pollando]	151
Halvdan Karterud [Norvegio].....	153
Miklos Bano [Hungario]	155
Constanze Zapater [Germanio]	159
Vincenzo Musella [Italio]	160
Edgar Guilbeau [Francio].....	161
Charles Hedqvist [Svedio]	163
Joseph Kreitz [Germanio]	165
Tria volumo (1990) Titolpaĝo de la originalo	169
Antaŭparolo, Gerda van der Sijde (Nederlando)	169
Eminentaj pioniroj de la blindulesperantista movado (daŭrigo).....	170
Anglio Eunice Hughes.....	170
Aŭstralio Matilda (Tilly) Ann Aston	172
Harold Charles Dickinson	173
Finnlando Einar Juvonen	174
Francio Albert Masselier	175

	Serge Gyors	176
	Pierre Chaillet.....	177
FR Germanio	Hans Breitenbach.....	179
	Fritz Karow	180
Italio	Guglielmo Vassio	181
Jugoslavio	Veljko Ramadanoviĉ.....	183
	Vladislav Stefanoviĉ.....	184
Nederlando	Rafael Israëls	185
Pollando	Jozefo Smietanko.....	186
Sovetunio	Pjotr Vasiljeviĉ Gorĉakov.....	190
	Mihail Ivanoviĉ Verbickij.....	191
	Zinaida Ivanovna Ŝamina	192
[Finnlando]/Svedio	Varma Thilander	194
Postparolo, R. Krchňák kaj A. Varró		195

Kvara volumo (2016)

Historio de la Esperanto-movado inter la blinduloj 1948–2015	200
Superrigardo pri blindulesperantista movado 1948–1989.....	200
Viddifektitoj organiziĝas.....	201
Esperantokongresoj daŭre progresigas disvolviĝon de porblindulaj aferoj ..	202
Internaciaj Kongresoj de Blindaj Esperantistoj (IKBE)	
kaj aliaj internaciaj renkontiĝoj 1948–1989	202
Kunlaborkomitato de nordlandaj blindulorganizaĵoj (1951).....	206
Esperanto deviga en jugoslava blindul-instituto (1952).....	207
Internacia kongreso de instruistoj de blinduloj (1962)	214
Fakkunsido de blinduloj kaj blindulamikoj en Tokio (1965)	215
Internacia Esperanto-kurso en Helsingør (Danio 1968).....	217
Agado de Ligo Internacia de Blindaj Esperantoj (LIBE)	
kaj internaciaj okazaĵoj 1990–2015	228
Internacia lingvo – bazo al interpretado (1997).....	235
Nova jarmilo.....	238
Internacia konferenco ”Profesia klerigo de viddifektitoj”	242
Eŭropa Unio informas esperante.....	246
Seminario en Tokio pri enlaborigo de vidhandikapitoj.....	248
Strategio por LIBE en la jaroj 2009–2013.....	257
Tutmonda KER-ekzameno pri Esperanto	266
Esperanto-komunumo de vidhandikapitoj.....	273
Tendencoj	275
Misio de LIBE (2011)	276
Defioj.....	276

Biografioj (daŭrigo 2014)	278
Britio	William Phillimore 278
	John Wells 278
Bulgario	Stefan Nenkov 279
	Todor Ŝosev 280
Ĉeĥio	Vuk Echtner 280
	Rudolf Krchňák 281
	Stanislav Stejskal 282
Ĉinio	Huang Nai 283
Finnlando	Arvo Karvinen 284
	Oskari Lehtivaara 287
Francio	Raymond Gonin 288
Germanio	Adolf Selten 292
Hispanio	Ángel Figuerola 292
Italio	Luigi Tola 295
Japanio	IWAHASI Takeo 295
	KUMAGAI Tetutarô 297
	TORII Tokuzirô 298
Jugoslavio/Kroatio	Tomislav Karloviĉ 299
	Dušan Maruzzi 300
Nederlando	Nora Moerbeek-Bartels 301
	Dirk Engel Schipper 303
Norvegio	Alf Arnesen 304
Pollando	Adam Goralski 304
Svedio	Göte Linghede 305
Svislando	Giovanni-Antonio Pellanda 308
 Aldonoj	
1	Prezidantoj kaj honorigitoj de Ligo Internacia de Blindaj 310
	Esperantistoj kaj redaktoroj de Esperanta Ligilo
2	Listo de internaciaj kongresoj de Esperanto 312
3	Eseo de TANABE Kunio: Edukista dimensio de Eroŝenko 315
4	Brajla skribo portas informojn al vidhandikapitoj 319
5	Vidanto instruas vidhandikapulojn 321
6	Fontoj 323
 Fotoj 325	

AL LEGANTO

Joseph Kreitz verkis en la jaroj 1972 kaj 1981 la du unuajn volumojn pri la historio de blindulesperantista movado. La trian volumon kompilis Raymond Gonin kaj Rudolf Krchňák, kaj ĝin finredaktis Attila Varro en 1990. Tiuj ĉi volumoj aperis en la brajla skribo kaj kovras la agadon ĝis 1939. La brajla eldono kuŝas ĉe homoj sub miloj da fingroj kaj en kelkaj porblindulaj bibliotekoj.

Por ke la pere de Esperanto starigita internacia kunlaboro inter blinduloj iĝu konata pli vaste, la Ligo Internacia de Blindaj Esperantistoj (LIBE) decidis eldoni la historian verkon ankaŭ platskribe. La originala verko enhavas kelkajn korektojn kaj kompletigon de kvara volumo pri la postmilita tempo kaj kelkdekon da biografioj.

Dezirinde estas, ke la libro aperu nacilingven por atingi la grandan publikon. Pere de tradukoj de historia verko nacilingven LIBE celas disvastigi konon de la kulturo de Esperanto inter viddifektitoj.

Vidhandikapuloj kuraĝe partoprenis kune kun vidantaj amikoj en ĉiujaraj Universalaj Kongresoj de Esperanto ekde la komenco de la dudeka jarcento. Tiu virinoj kaj viroj, kiuj en la Esperanto-kongreso en Prago 1921 decidis fondi internacian Esperanto-organizaĵon de vidhandikapitoj, ne povis antaŭsenti kiel gravan kunlabor-unuiĝon ili kreis por progresigi akireblon de informoj kaj plibonigi socialajn cirkonstancojn de vidhandikapitoj en la nacia kampo en Eŭropo, Japanio kaj nord-Ameriko. La sekvan jaron oni ankoraŭ finpoluris la proponon en Helsinki. La statuto de la Universala Asocio de Blindaj Esperantistoj (UABE) estis akceptita en Nürnberg 1923. En la jaro 1931 oni ŝanĝis la nomon al Universala asocio de blindulorganiaĵoj (UABO), ĉar en ĝi aliĝis krom Esperanto-asocioj ankaŭ naciaj blindulorganizaĵoj. Dum la kongreso en Munkeno 1951 la nomo estis ŝanĝita al Ligo Internacia de Blindaj Esperantistoj (LIBE). Pluraj blindulorganizaĵoj subtenis LIBEn kaj sialandan Esperanto-asocieton.

La dua mondmilito interrompis regulajn renkontiĝojn por dek jaroj. La Internacia Kongreso de Blindaj Esperantistoj (IKBE) okazis en Svislando (Bern) en 1939 kaj sekvan fojon en Anglio (Bournemouth) 1949. Intertempe dudeko da blindaj esperantistoj kunvenis en 1948 dum la Universala Kongreso de Esperanto en Svedio (Malmö).

La nuna historia verko estas rezulto de internacia volontula kunlaboro: Jiří Jelínek (Ĉeĥio) prilaboris la brajlan tekston en komputilon. La skanitan tekston de la unua volumo kontrolis Anatolij Masenko (Rusio), la duan volumon Martin Meyer (Svislando) kaj la trian Attila Varró (Hungario).

La kvaran volumon kune kun biografioj kompilis Ritva Sabelli (Finnlando).
La kvarvoluman libron ŝi pretigis por presejo helpe de Harri Laine (Finnlando).

Dankojn – –

(skizo) Helsinki la 10-an de junio 2011

Ligo Internacia de Blindaj Esperantistoj
Arvo Karvinen
prezidanto

POSTSKRIBO

Laŭ iniciato de Arvo Karvinen la projekto de platskriba versio de la ”Historio de la Esperanto-Movado Inter la Blinduloj” komenciĝis en 2009. Dekoj da geamikoj diverslande afable helpis en kolektado de biografioj kaj fotoj.

La faritaj korektoj aŭ enmetitaj kompletigaj scioj en la tri unuajn volumojn aperas en rektaj krampoj. La plej gravaj ŝanĝoj temas la duan parton de la unua volumo. La tekston pri Japanio (ĉapitro 10) afable korektis s-ino KIKUSIMA Kazuko. Raporto pri la kongreso en Londono 1930 enhavas kompletigajn informojn.

La biografio de Vasilij J. Eroŝenko enhavas multegon da korektoj kaj kompletigoj pro kiuj mi elkore dankas al s-ino KIKUSIMA Kazuko.

Laboro pri daŭrigo de blindulesperantista historio progresis en 2012. Grandegan dankon mi ŝuldas al Anatolij Masenko, kiu provizis per informoj el jarkolektoj de ”Esperanta Ligilo”, kiuj kuŝas en lia kelo. Sen lia afabla, sencesa asistado mi ne estus kuraĝinta daŭrigi la projekton.

Trovaĵoj

Utilaj materialoj troveblas ankaŭ en la blindulmuzeo en Helsinki. Foliumante tie jarkolektojn de ”Esperanta Ligilo” de la 1950-aj jaroj evidentiĝis malordo en numerado de kongresoj. La oficiala raporto de la kongreso en 1950 konstatas, ke en Parizo okazis la dudeka Internacia Kongreso de Blindaj Esperantistoj (IKBE). Verŝajne antaŭ la jaro 1950 okazis du renkontiĝoj, kiuj pli poste estis konsiderataj

kiel kongresoj, ekz. kunveno de blinduloj okazinta dum la 33-a Universala Kongreso de Esperanto en Svedio (Malmö) 1948. En la "Antaŭparolo" kaj "Epilogo" de la unua volumo Joseph Kreitz aludas pri daŭrigo "de nia Historio ekde la jaro 1946". Ĉu en 1946 aŭ 1947 okazis internacia renkontiĝo de blindaj esperantistoj? En la nuna eldono la malordo estas ignorata.

La plej nova trovaĵo estas de la jaro 2015 kaj temas pri la oficiala stato de LIBE. Anatolij Masenko, prezidanto de LIBE ricevis neatenditan demandon de s-ino Veronika Poór, UEA-konsilanto. Ŝi demandis: Ĉu LIBE estas oficiale registrita?" S-ro Masenko esploris la aferon helpe de s-roj Theodor Speckmann kaj Aldo Grassini, kiuj opinias, ke LIBE neniam estis oficiale registrita. La oficiala sekretaria raporto en "Esperanta Ligilo" Nro 8 oktobro 1951 konstata la aprobon de la statutpropono kaj la estraron de LIBE. Ankaŭ en la sekvantaj numeroj de EL mi ne trovis ion pri oficiala registriĝo.

Restas malfermaj demandoj. Kie troviĝu la sidejo de LIBE? En kiu lando LIBE estu registrita, do sekvi la leĝon de registriĝo. Temas inter alie pri sciigo de statutŝanĝoj, ŝanĝoj de estraranoj kaj funkciuloj.

La statuto de LIBE ne parolas pri sidejo. Anstataŭ tio la statuto konstata jene: "La oficiala adreso de la Ligo estas tiu de la ĝenerala sekretario (vidu la Internan Regularon 1." kaj la Interna Regularo: "1. (vidu la Statuton 2.). Ĝenerala blindulinformejo laŭbezone povas funkcii ĉe la ĝenerala sekretario."

Elkore mi dankas Harri Laine, kiu finpoluris mian tekston, konsilis kaj asistis min multflanke. Koran dankon ankaŭ al Keith Uber pro la helpo en komputilaj problemoj. En la aldono "Fontoj" troviĝas nomoj de kunlaborantoj kaj personoj, kiuj provizis biografiojn, fotojn kaj kompletigajn informojn. Koran dankon al ĉiuj.

La grava malsano de Arvo Karvinen (1934–2013) ombris la projekton, kaj mi sopiris liajn konsilojn. Pasis jaroj, nur nun lia celo de platskriba verko realiĝis. Arvo Karvinen diris: "Imagu, jam antaŭ cent jaroj niaj pioniroj kreis per Esperanto internacian komunumon de viddifektitoj. Per la nova eldono de la historia verko ni respektas la laboron de niaj pioniroj."

Helsinki junio 2016

Ritva Sabelli

Asistantino de Arvo Karvinen 1993–2013

Sekretario de Steleto, Esperanto-Asocio de viddifektitoj en Finnlando

Titolpaĝo de la originalo

Historio de la Esperanto-movado inter la blinduloj

Joseph Kreitz

En tri volumoj

Unua Volumo

Imprenta Braille de la
Organización Nacional de Ciegos
General Primo de Rivera, 2
Barcelona 1972

Obra en dos Volumenenes

Volumen Primero

Eldonis
Esperanto-Blindulligo de Germanujo (EBLOGO)

Kun financa subteno de Sinjorino Constanze Zapater
al ŝia karmemora edzo Baldomero Zapater

Favore al
"Ligo Internacia de Blindaj Esperantistoj" (LIBE)

Presigis
Organización Nacional de Ciegos de España (O. N. C. E)

Memore al sia forpasinta Estro José Ezquerro

Dediĉo

Al miaj karmemoraj amikoj
Baldomero Zapater kaj José Ezquerria

Neforgeseble en mia vivo restos memorinda tago dum la monato marto en la jaro 1919, kiam mi plenatende kaj scivole havis la grandan plezuron la unuan fojon interrenkontiĝi kun mia hispana amiko Baldomero Zapater [1883–1961], kiu loĝis jam dek jarojn en Kolonjo, kie li profesie instruis pri gitarludado, sed tiu tago ankaŭ estis memorinda pro tio, ke la unuan fojon mi havis okazon paroli la internacian lingvon kun iu. Mi, junulo esperis renkonti fieran kaj grandstaturan hispanon, sed kia seniluziĝo! Antaŭ mi staris malgrandstatura amiko kun mallaŭta, sed treege agrabla kaj simpatia voĉo.

Poste, kiam ankaŭ mi loĝis en Kolonjo, ofte ni kunvenis pridiskutante blindulesperantistajn aferojn; interalie li proponis, ke mi verku kaj eldonu en brajla preso "Historion de la Esperantomovado inter la Blinduloj" sub la aŭspicioj de EBLOGO, al kiu li donis la nomon kaj eĉ li firme promesis min subteni finance. Dum la "Dektria" en Stockholm en 1934 Giovanni Valiani (Italujo) sendis proponon pri verkado de historia libreto pri la Esperantomovado inter la blinduloj. Oni decidis peti samideanon Valiani, ke li mem verku la "Historion". Mi korespondis pri tiu ĉi afero kun li; tamen... Li mortis... Regis la bruna reĝimo en Germanujo... Eksplodis la dua mondmilito... Venis mizera tempo post ĝi... kaj... forpasis mia kara amiko Baldomero!

Dank' al konsiderinda financa helpo de s-rino Constanze Zapater [1890–1973] mi povas plenumi la promeson de mia amiko Baldomero Zapater, al kiu nun iras en amo miaj dankemaj rememoroj, kun profunda dankemo ankaŭ al vi, kara amikino Constanze, en la nomo de la tutmonda blindulesperantistaro, ke vi plenumis la promeson de via karmemora edzo Mero.

Dum la "Dekdua" en Kolonjo mi esperis renkonti mian amikon José Ezquerria [1880–1965], kun kiu mi korespondis jam multajn jarojn; tamen diversspecaj obstakloj malebligis lian partoprenon al la kongreso, sed oni elektis lin kiel anon de komitato, kiu havis la taskon esplori la laboreblecojn por blinduloj en la industrio. Nur kelkajn jarojn post la milito, dum la kongreso en Munĥeno, mi havis la grandan plezuron la unuan fojon renkonti mian amikon José Ezquerria. Ne estas eble per malmultaj vortoj skizi la reciprokan ĝojon de nia interrenkontiĝo. Li estis vigla kaj el lia animo elŝprucis kvazaŭ fonto de energio kun la intensa volo plibonigi la sorton de la nevidantoj ne nur en Hispanujo, sed en la tuta mondo dank' al la helpilo Esperanto. Bedaŭrinde kongresorganizaj laboroj min retenis dediĉi multan tempon

al mia hispana amiko, sed dum komuna vespermanĝo kun mi kaj Baldomero Zapater nia ŝatata temo pri eldonado de historia libreto pri la Esperantomovado interblindula okupis nin preskaŭ la tutan vesperon. Ankaŭ li, mia kara amiko José Ezquerra forpasis intertempe, sed vivas lia grandioza ONCE, la organizaĵo de hispanaj blinduloj, kiun li estris sukcese dum multaj jaroj. Ni, la tutmonda blindulesperantistaro esprimas tutkoran dankon al ONCE pro tio, ke ĝi, memore al sia eminenta estro ankaŭ ebligis la eldonon de tiu ĉi verko.

Pli detale vi legos pri niaj pioniroj José Ezquerra kaj Baldomero Zapater en la tria parto [Dua volumo], kiu raportos pri la vivo kaj agado de tiuj eminentaj samideanoj vivintaj antaŭ ni, kiuj metis la fundamenton de la Esperantomovado inter la blinduloj.

LA AŬTORO [JOSEPH KREITZ 1897–1977]

Antaŭparolo

Kiam oni parolas aŭ korespondas kun nevidantaj samideanoj junaj kaj nejunaj, kiuj ĵus finstudis la internacian lingvon, ofte ili faras la demandojn: ”Kiu estis la unuaj nevidantaj esperantistoj?” ”Kie kaj en kiuj landoj unue disvastiĝis Esperanto inter la blinduloj?” ”Kiam aperis la unuaj lernolibroj pri la internacia lingvo kaj la unuaj libroj en brajla preso en tiu ĉi lingvo?”. Ĉi tiuj certe pravaj demandoj kaj la deziro forigi la mankon de taŭga libro donanta la bezonatajn informojn, instigis min pripensi la kompiladon de laŭeble iom kompleta historio de la Esperantomovado inter la blinduloj en kvar partoj.

La unua parto skizas la komencojn de la movado, la fondiĝon de la gazeto ”Esperanta Ligilo” kaj donas informojn pri aliaj sciindaĵoj el tiu ĉi unua periodo ekde la jaro 1901 ĝis 1915, kiam ”Esperanta Ligilo” devis ĉesigi sian aperadon.

En la dua parto la leganto trovas atentindajn historiajn notojn pri la renaskiĝo kaj evolado de la Esperantomovado inter nevidantoj ekde la jaro 1919 ĝis 1940. La ĉefa karakterizaĵo de la dua periodo estis eventoj tiom gravaj, ke ili formis la fundamenton de la movado por estontaj jaroj. Okazis ja la organizado de la unua internacia kongreso de blindaj esperantistoj kaj postaj kongresoj, la fondiĝo de la unuaj naciaj societoj blindulesperantistaj kaj fine la naskiĝo de ”Universala Asocio de Blindaj Esperantistoj” (UABE) en la jaro 1923.

En la tria parto [dua volumo] ni publikigas biografiojn de elstaraj kaj eminentaj pioniroj de nia movado: Thilander, Cart, Merrick k.a.

La kvara parto [volumo] pritraktas la periodon ekde 1946 ĝis la nuna tempo, raportante pri klopodoj kaj agado por rekonstrui la internacian organizaĵon kaj la naciajn suborganizaĵojn de blindaj esperantistoj.

Dank' al bonŝanca hazardo mi trovis bonegan historian skizon pri la komenco de la movado ĝis la jaro 1915 verkitan de mia karmemora kaj neforgesebla amiko W. P. Merrick [William Percy Merrick 1868–1956] en la jaro 1922 por la "Blindula numero" de la gazeto "EsperantoTriumfonta" (poste "Heroldo de Esperanto"), en kiu li petis komune kun la subskribinto la vidantajn samideanojn per donacoj finance subteni la gazeton "Esperanta Ligilo" por eviti ĝian pereon minacantan pro diverslandaj ekonomiaj krizoj kaj monsenvaloriĝoj. Feliĉe ni sukcesis savi nian karan gazeton ĉefe dank' al altruisma propaganda agado de nia pioniro W. P. Merrick. Ĉi tiun historian skizon kun kelkaj kompletigoj vi trovas en la unua parto.

Mi konscias, ke ne estas facila tasko kompili kompletan historion de la Esperantomovado interblindula kaj ankaŭ mi konscias, ke sen la aktiva helpado kaj kunlaborado fare de kelkaj el miaj samideanoj diverslandaj mi ne estus sukcesinta plenumi mian taskon kontentige. Al ĉiuj kunlaborantoj mian tutkoran dankon!

Nenia homa faraĵo estas perfekta. Ankaŭ mia laboraĵo ne pretendas perfektecon; tamen mi esperas, ke post mi eble pli kompetentaj samideanoj sukcesos verki pli bonan kaj pli kompletan historion pri nia movado.

Estu la libro konstanta fonto kaj utila trezorejo, el kiuj multaj blindaj esperantistoj ĉerpos kaj trovos novan kuraĝon kaj fortajn impulsojn por daŭrigi la agadon de sinoferaj pioniroj vivintaj en tempo, kiam la vivkondiĉoj de niaj sortofratoj en ĉiuj landoj estis kompare malfavoraj. Jen la celo de tiu ĉi libreto!

JOSEPH KREITZ

UNUA PARTO

1 La komencoj

Antaŭ ol vi legos la raporton de nia karmemora samideano W. P. Merrick pri la komenco de la Esperantomovado inter la blinduloj ekde la jaro 1901, certe estas interese ekscii, ke kredinde la nederlanda samsortano N. Schildt en Amsterdam estis la unua nevidanto, kiu eklernis Esperanton jam en la jaro 1888, sed li ne sukcesis interesigi siajn samsortanojn pri ĝi kaj praktike uzadi la novan lingvon.

La unua persono, kiu havis la ideon feliĉigi la blindulojn per Esperanto, estis f-ino Zabilon d' Her en Lyon, kiu dum la somero de la jaro 1895 instruis pri Esperanto f-inon Hélène Giroud, naskiĝintan en Svislando, kiu unue estis nevidanta instruistino kaj poste eĉ direktorino de la privata blindullernejo Villeurbanne apud Lyon. Poste ŝi komune kun f-ino Zabilon d' Her instruis kelkajn lernantojn de la nomita instituto sen lernolibroj, ĉar tiaj jam ne ekzistis kaj eĉ mankis brajla alfabeto por Esperanto tiutempe.

Hélène Giroud naskiĝis en decembro 1864 en Chamoson, vilaĝo de la svisa kantono Wallis, kaj en 1871 ŝi ekblindiĝis kaŭze de varioloj. En 1874 ŝi eniris la blindullernejon en Lausanne, kie ŝi lastklasa lernantino jam instruis pri aritmetiko la junajn gelernantojn. Poste, kiel instruistino ŝi deĵoris en la sama lernejo ĝis la jaro 1887, kiam ŝi pro nekonata motivo reiris en sian vilaĝon, sed ekde la jaro 1890 ŝi ree aktive deĵoris kiel instruistino kaj poste kiel direktorino ĉe la blindullernejo Villeurbanne ĝis septembro de la jaro 1907, kiam malbona sanstato ŝin devigis retiriĝi en sian hejman vilaĝon, tamen, en la jaro 1911 ŝi estis inter tiuj samsortanoj, kiuj fondis la svisan blindulligon, kiu meritas nian dankon pro konstante donitaj subvencioj moralaj kaj financaj al nia movado antaŭ kaj post la dua mondmilito. Hélène Giroud estis verkistino, kiu verkis franclingve rakontojn kaj novelojn ĉefe pri la vivo malfacila de la svisaj montaranoj. Kelkajn rakontojn ŝi verkis originale por EL. La 19-an de junio en la jaro 1950 post aktiva vivo forpasis Hélène Giroud, tiu samsortanino, kiu unue pripensis utiligi Esperanton al la blinduloj.

Estis Harald Thilander [1877–1958], blinda, surdeta, kripla junulo loĝanta en hejmo por malfortuloj en Stockholm, kiu unue perceptis, kiajn grandajn servojn Esperanto povas fari al la tuta blindularo.

Tio okazis en 1901, kiam nenia dulingva vortaro estis brajle presita, tiel ke estis preskaŭ neeble por blindulo lerni ian lingvon krom la nacia. Thilander, kiu ĉiam revis pri internacia kunlaboro inter blinduloj, por kontraŭstari komunajn obstaklojn

pro vidmanko, estis dediĉinta jam naŭ jarojn al tasko terura: kopiadi en brajlan skribon pere de diktado svedajn vortarojn de angla, franca kaj germana lingvoj. Tamen, post tiu laboro li havis nur unu ekzempleron de la libro.

Sed Esperanto povus alporti novan epokon. Oni povus, tiel konkludis Thilander, sen tro grava elspezo, multobligi per presado la malgrandajn lernolibrojn kaj radikarojn bezonatajn de tiu simpla lingvo, por ke ĉiu blindulo povu lerni kaj uzi ĝin. Jam en fino de 1901, laŭ prof. Cart [1855–1931], troviĝas aludo al tiu temo en korespondado de Thilander kun f-ino Zabilon d' Her, poste s-rino Ranfaing. En tiu jaro li verkis propagandajn artikolojn por svedaj kaj anglaj revuoj, kaj influis la preparadon de gravega artikolo, kiun s-ro Ahlberg publikigis en la revuo "Lingvo Internacia" (januaro 1902), kiu altiris la atenton de multaj bonkoraj esperantistoj al la graveco de Esperanto por la blinduloj. Inter ĉi tiuj sin trovis la blinda d-ro Javal kaj d-ro Dor, kiuj priparolis la aferon ĉe kelkaj porblindulaj kongresoj; Pastro Richardson kaj fratero Isidoro, kiu laste nomita tiel sukcese instruis la blindajn knabojn en la brusela blindulinstituto, kaj precipe prof. Cart, al kies konstanta, energia, praktika laboregado la blinduloj ŝuldas multe pli ol al iu alia.

En 1902, tre kuraĝigita de rektoro Boirac, kun kiu li rilatis, Thilander fervore propagandis inter blinduloj. Li faris per Esperanto tiajn servojn al ĉiuj siaj blindaj amikoj, ke ili konvinkiĝis pri ĝia utileco, kaj ili fariĝis rondeto de pioniroj en multaj landoj. Thilander kaj liaj amikoj kune verkis artikolojn por blindulaj gazetoj, kaj la rondeto kreskis konstante. Pri la varbmaniero de Thilander mi altrudas la rakonton de mia propra sperto. En junio 1902 mi sciigis lin, ke mi amas folkloron kaj volonte deziras sciigon pri svedaj popolrakontoj kaj kutimoj. Kvankam li povis tiam jam skribi eĉ bonegan leteron en angla lingvo, li tute ne fidis sian kapablon traduki anglan la bezonatajn informojn. Senprokraste li kopiis en brajlan skribon la Esperantan-anglan ŝlosilon kaj sendis ĝin al mi kun kvanto da svedaj legendoj, kiujn li mem esperantigis. Ĉio estis nekontraŭstarebla. Rapide mi lernis Esperanton kaj kun ĝojego legis la legendojn, kiuj, laŭ mia surprizo, estis tiel klare esprimitaj, tiel videble fidelaj al la originalo, ke mi povis kompreni eĉ delikatajn nuancojn pli bone ol per ia angla traduko. Jen nur unu ekzemplo de la komplezemo de nia kara Thilander.

En 1902 prof. Théophile Cart, jam fame konata franca lingvisto, sin turnis al la blindula problemo pro la okula malsano de sia fileto. Leginte la jam aluditan artikolon en "Lingvo Internacia", li decidis alporti sian plenan energion al la efektivigo de tiu nobla ideo. Li pasigis la septembran libertempon apud Lausanne kaj diktis esperantan lernolibron al kelkaj junulinoj ĉe la "Asile Recordon", kiujn li hazarde renkontis dum boatveturo. Kuraĝigita de iliaj fervoro kaj progresado, li

tuj klopodis la aranĝon de la brajla alfabeto por Esperanto. Unue li starigis brajlan alfabeton, en kiu li montris la literojn "ĉ, ŝ" ktp. per literoj, kiuj ne ekzistas en Esperanto: "q, w, y" ktp. Tiamaniere liaj lernantinoj f-inoj Fanny Ducret, Hélène Gal kaj Rosa Vogt skribis mane la unuajn ekzemplerojn de la gramatiko kaj ekzercaro. Veturante al Ĝenevo, li portis unu ekzempleron al prof. Jean Jacques Monnier, kiu tute malaprobis la alfabeton. Por li tio estis terura baro; ĉio ŝajnis al li perdita. Sed li rememoris, ke Thilander estis proponinta al li alian alfabeton, la nunan: indiki la supersignojn de la kvin konsonantoj per la sesa punkto, kaj tiun de "u" per la kvara anstataŭ per la unua punkto. Li do ree ekzamenis la demandon kaj vizitante denove prof-ron Monnier, li prezentis al li la solvon de Thilander. Ĝin li plene aprobis.

"Bone", diris prof. Cart, "sed eble aliaj blinduloj opinias malsame, kaj ni perdos kelkajn jarojn en la serĉado de la plej bona sistemo. Nu, vi estas svisa, Thilander estas sveda, mi estas franca, vere "internacia konferenco!" Unuvorte, tial, ke mi konas la opinion de Thilander, ni povas decidi kaj deklari, ke en "internacia konferenco" oni akceptis esperantan brajlan alfabeton uzotan en la lernolibroj kaj en la estonta gazeto por blinduloj."

Kelkajn tagojn poste aperis en "Lingvo Internacia", centra organo por vidantaj esperantistoj, la deklaro decidita de "internacia konferenco" kun desegno de ĉiuj literoj de nia nuna alfabeto, de kiu prof. Cart dissendis 5 000 ekzemplerojn en preskaŭ ĉiujn landojn eŭropajn kaj eĉ ekstereŭropajn. D-ro Javal kaj malmultaj aliaj blinduloj postulis ŝanĝojn – diversajn kompreneble, ĉiuj – sed prof. Cart diris responde al ili, ke li ne povas ree kunvoki internacian konferencon! Kaj ili silentis. Pri tio prof. Cart skribis poste en artikolo:

"Eble tia energia agado malplaĉos al kelkaj. Sed ili pripensu: se ni ne estus agintaj tiamaniere, oni verŝajne ankoraŭ hodiaŭ diskutus pri la plej bona alfabeto kaj ni havus nenian brajlan libron, nenian gazeton kaj la blinduloj atendus ankoraŭ la aperon de la unua kajero de "Esperanta Ligilo".

Dum la sekvintaj monatoj prof. Cart interkontaktis kun kelkaj eminentaj blinduloj en Francujo: s-ro E. Guilbeau [Edgar Guilbeau 1850–1930], profesoro en la plej grava franca blindullernejo en Parizo; ges-roj Poittevin, la edzo blinda, la edzino tre helpema pri preparado de lernolibraj tekstoj; s-ro Couillard, kiu poste fariĝis brajla presisto de esperantaĵoj en Amiens kaj aliaj. Dank' al ilia kunlaboro la manskribita lernolibro estis baldaŭ preta por la presado. Ĝi konsistis el malgranda kvankam sufiĉe plena gramatiko kun ekzercaro kaj vortareto kun preskaŭ 4.000 radikoj, tiel aranĝita, ke oni povas utiligi la esperantan parton pri ia lingvo por eviti la elspezon de represado.

Laŭ propaganda artikolo en "Le Louis Braille" (majo 1901) de s-ro E. Guilbeau, la libro jam estis presita en la brajla presejo de l' fraterinoj de Saint Paul en Parizo, kune kun la germana parto. La angla parto tuj sekvis.

Sed la plej malfacila problemo, kiun prof. Cart devis solvi, estis la kolektado de mono, ĉar la blindularo tiutempe estis tre malriĉa. Tial estis necese peti helpon de bonkoraj viduloj, tasko, kiun blinduloj mem tute malŝatas pro la kutima popola kunigo de blinduleco kun almozuleco. Sed la energio de prof. Cart superis ĉiun obstaklon. La pariza grupo bonkore pagis la unuan eldonon de la lernolibro. Aliaj privataj bonkoruloj donacis, ofte plej malavare, kaj fine f-ino Zablon d' Her, la bona feino de la movado, starigis loterion, kiu kun la helpo de ŝiaj amikoj en Lyon rezultis pli ol du mil frankojn. Granda estis la laboro, sed grandega la ĝojego pri la rezulto! Ĝi ebligis al prof. Cart certigi la sukceson de la apero de tutmonda gazeto, la sola ilo, per kiu la kunlaboro de ĉiuj nacioj povus esti inspirata kaj daŭrigata. Por akiri taŭgan nomon por la gazeto, prof. Cart aranĝis konkurson inter la blindaj esperantistoj; interalie ankaŭ f-ino Karin Höjer [1864–1927] (poste edzino de Thilander) partoprenis kaj proponis: "Esperanta Ligilo", kiun prof. Cart trovis la plej bona. Unue li intencis presigi la novan gazeton en la brajla presejo de la fraterinoj de Saint Paul en Parizo. Oni diris al li, ke li devas plenumi unu kondiĉon: doni al ili, antaŭ ĉiu kajero, la franclingvan tradukon de la artikoloj, por ke ilin tralegu antaŭ la presado ilia "supera patrino", ĉar religia domo havas specialan respondecon kaj ne povas ĉion (precipe ne malmoralan) presi kaj eldoni. Terura, tempoperda komplikaĵo! Neebla fariĝis la eldono de esperanta gazeto por blinduloj! Prof. Cart priparolis la aferon kun prof. Guilbeau, kiu respondis, ke lia iama lernanto Couillard, nova esperantisto, posedas malgrandan brajlan presejon en Amiens. Tuj li skribis al Couillard kaj ankaŭ poste vizitis lin. Li povis aĉeti la bezonatan materialon por kompletigi la materialon de la presisto kaj... la unua kajero de "Esperanta Ligilo" povis aperi.

Prof. Th. Cart mem legis aŭ verkis nigre la tekstojn kaj gesinjoroj Poittevin brajligis ilin. La adresojn skribis la edzino de prof. Cart kaj la presisto Couillard regule ricevis la manuskriptojn kaj ĉion ĝustatempe. Cetere li konservis la plej interesajn novelojn el la gazeto sur apartaj kliŝaĵoj kaj poste eldonis ilin kiel volumetojn: "Janko muzikanto", "Perdita kaj retrovita", "Srul el Lubartov" ktp. Plie la radikaron kun la ŝlosilo li presis. Bedaŭrinde ĉiuj kliŝaĵoj estis detruitaj en la unua mondmilito.

Certe la "plena energio" de prof. Cart produktis preskaŭ ne atenditan frukton.

2 Esperanta Ligilo ekde 1904 ĝis 1915

Esperanta Ligilo, lingvo internacia por blinduloj.

Direktoro prof. Th. Cart, 12 rue Soufflot, Paris.

Patronaro: s-roj Falius (Hamburg), Guilbeau (Paris), Grienberger (Linz), Landriani (Firenze), Lutmer (Hagenau), Lladó (Palma Mallorca), Mehlich (Berlin), Merrick (Shepperton), Monnier (Genève), Thilander (Stockholm), presisto eldonisto prof. Couillard, Amiens, Francujo.

Jen estas la transskribo de la titolo kaj la kovrila rubriko de la unuaj numeroj de nia karega brajla gazeto, kiu aperis ĝis la fino de la jaro 1905 ĉiun duan monaton kun po 32 paĝoj; sed jam ekde la jaro 1906 la abonintoj havis la grandan ĝojon ricevi dek numerojn kun po 24 paĝoj. Tre interese estas ankaŭ sciigi, ke la unuaj numeroj aperis presitaj sur unu flanko de la folioj.

Kun kiaj ĝojoj kaj fervora espero la "patronoj" kaj abonantoj malfermis ĉi tiujn kajerojn kaj palpe legis la enhavon! Mi citu: numero 1: Enhavo, majo 1904.

1. Al niaj legantoj, Cart.
2. Grava avizo, Guilbeau.
3. Esperanto kaj naturo, Thilander.
4. Tri blindulinoj, Caetano Coutinho.
5. Al la fratoj, Zamenhof.
6. Gramatikaĵo, Fruictier.
7. Kroniko, Cart.
8. Humoraĵo, problemo.
9. La karaj braceletoj.
10. Historio de la blinduloj, Guilbeau.

Kun la tria, julia numero, prof. Cart disdonis adresaron de la legantoj, por ke ili laŭeble interrilatiĝu. Tion li faris ankaŭ en 1908 kaj lastfoje en 1914, kiam li aldonis tre gravan antaŭparolon kun historiaj notoj.

La multokupata homo, kiu timtremas je la frapo de la leterportisto alportanta pli da laboro, ol ordinara homo povas plenumi, tute ne povas kompreni la senton de esploro, kiu igas izolan blindulon sin turni al nekonata kaj fremda samsortano por iom da konsilo aŭ por intelekta refreŝigo. Kiel zorge oni ellaboras la unuan eksterlandan leteron, kiel ekscitite oni atendas la respondon! "Ĉu vere mi, ĉeĥo, franco, anglo povas korespondi kun sudamerikano, italo, ruso, aŭstro?" Jes, certe! Ĉar eĉ la unua adresaro enhavis loĝantojn el ĉiuj ĉi landoj! Kiom la rondeto kreskis kaj disvastiĝis en kelkaj landoj! Cent, ducent, tricent, ĝis en la 1913-a jarlibro

eldonita de Thilander troviĝas la nomoj de pli ol okcent blindaj esperantistoj el dudek nacioj.

Prof. Cart elektis tre interesan kaj bonan legaĵon por "Esperanta Ligilo". Li aldonis kiel felietonojn bonstilajn verketojn.

Dum naŭ jaroj li laboris kiel direktoro kaj redaktoro de nia kara "Ligilo". Ĉiam li estis la sama fervora, komplezema, bonhumora, energia kuraĝigulo! Komence ses numeroj aperis en la jaro, sed kun pli granda legantaro dek numeroj estis publikigitaj dum la tria kaj postaj jaroj. Kuraĝigitaj de la ekzemplo de Guilbeau kaj Thilander, aliaj blindaj legantoj verkis raportojn, kronikojn, poemetojn kaj fieriĝis, kiam ili estis akceptitaj kaj presitaj. Prof. Cart verkis raportojn pri la internaciaj kongresoj kaj donis la plenajn tekstojn de la paroladoj de d-ro Zamenhof en Boulogne, Cambridge kaj aliaj.

Kiam post naŭ jaroj, en 1912, Harald Thilander petis permeson aldoni du "libertempajn numerojn" al la dek eldonitaj de prof. Cart, ĉiuj, eĉ prof. Couillard, akceptis kun sincera ĝojo. La numeroj estis precipe dediĉitaj al blindulaj problemoj, kaj tiel plaĉis al prof. Cart, ke li petis, ke Thilander fariĝu redaktoro kaj eldonisto de la gazeto. Thilander entreprenis la taskon kaj daŭrigis "fakajn numerojn" ĝis la fino de la jaro kaj en la jaro 1913 li transprenis la tutan respondecon pri la gazeto. Tamen, prof. Cart daŭrigis siajn ĉiumonatajn leterojn al siaj blindaj amikoj kaj alimaniere multe helpis.

Sub Thilander "Ligilo" pli kaj pli grandiĝis kaj disvastiĝis. Lia vasta konatularo (tiu vorto signifas "amikaron" koncerne lin) kuraĝis informi lin pri ĉio rilate al blindulaj aferoj. Unu leganto starigis ŝakpaĝon, aliaj klopodis verki universalajn notadojn por muziko kaj matematiko. Aliaj priskribis novajn ilojn metiajn kaj ĉiuspecajn eltrovaĵojn porblindulajn. Per korespondado oni interŝanĝis valorajn spertojn. Spacon li ankaŭ trovis por bonaj literaturaĵoj: artikoloj, romanetoj, poemoj. Inter la kunlaborantoj troviĝis redaktoroj de naciaj blindulaj gazetoj kiel [Edvard] Imsdahl kaj [Johan] Wulff kaj aliaj tro multaj por nomi. Estis ankaŭ Thilander, kiu trovis riĉan, malavaran svedan subtenanton.

Neniu povas scii, per kiaj heroaj laboroj Thilander kaj lia edzino Karin daŭrigis la "Ligilon" ĝis oktobro en 1915! Nur tiam, kun preskaŭ rompita koro, ili cedis al la tiamaj malfacilaĵoj. Dum tri jaroj "Ligilo" ne aperis, ne ĝojigis la suferantajn blindulojn ĉiulandajn.

3 Kongresoj ĝis 1914

En Ĝenevo, dum la dua universala kongreso de Esperanto prof. Cart proponis, ke oni venigu blindulojn al la kongresoj, kaj per tutaj siaj fortoj li kolektis monon por tiu celo. Tial oni vidis en Cambridge en 1907 pli ol dudek kvin blindulojn el sep landoj. Eĉ venis Thilander kaj f-ino [Karin] Höjer (poste s-rino Thilander) el Svedujo, s-ro [Karel Emanuel] Macan [1858–1926] el Bohemujo kaj tri usonanoj. Kelkaj sindonemaj francinoj prizorgis la kondukadon de la plimulto el la blindaj kongresanoj, kaj la afero estis grandega sukceso. Komprenoble la "Ligilo" ludis grandan rolon en la preparado kaj aranĝado de la kunveno, kaj la sprita, bonhumora raporto pri ĝi, kiun verkis prof. Cart por la oktobra kaj sekvintaj numeroj detale revokis la ĝojigan semajnon al la memoro de la ĉeestintoj. Oni babilis, ŝercis, interŝanĝis sciigojn pri la hejmaj vivo kaj okupado, pri edukado. Oni ludis muzikaĵojn kaj kantis naciajn kaj esperantajn kantojn. Oni parolis kun multaj personoj el diversaj landoj kaj, ho ĝojo neatendita! Oni premis la manon de la kara majstro mem, d-ro Zamenhof, la elpensinto de la lingvo, al kiu la blinduloj tiom ŝuldas. Al salutvortoj kaj dankesprimoj de Harald Thilander la majstro respondis: "Dankon pro tiu ĉi neatendita kuraĝigo! Jes, prof. Cart rakontis al mi pri via intensa uzado de Esperanto. Nenio ĝojigas tiom mian koron, kiel tiu scio. Esperanto estas farita por laborilo. Tial nenio alia tiom ĝojigas min, kiel la scio, ke la ilo estas utila kaj "intense uzata". Estu benata via laboro per Esperanto, la laboro de niaj senvidaj fratoj!"

Mi dubas, ke sub alia preteksto tiom da diversnaciaj blinduloj iam antaŭe kunvenis. Certe nenia grupo de kunvenintoj pli ĝuis la kuneston. Espriminte la sentojn de siaj samsortanoj, s-ro [Paul] Ketterer el Lausanne, parolante en unu el la kongresaj kunvenoj, diris:

"Esperanto estas la plej granda progreso efektivigita por ni blinduloj dum tiuj ĉi lastaj jaroj. La lernado kaj scipovo de Esperanto plilarĝigas nian horizonton kaj permesas al ni partopreni pli plene je la vivo de la homa socio; Esperanto estas niaj kondukanto kaj espero".

Post la kongreso en Cambridge blinduloj ĉeestis preskaŭ ĉiun kongreson. Naŭ partoprenis la kongreson en Dresdeno (1908), deksep ĉeestis tiun en Antverpeno (1911), kie ili per muziko gajigis siajn vidantajn geamikojn. Kelkaj estis en la krakova kongreso (1912), dum kiu nia blinda samideano Prezenti Levy transdonis al d-ro Zamenhof foton de Ŝia Reĝina Moŝto Elizabet de Rumanujo, bonkonata sub la pseŭdonimo Carmen Sylva, parolante poste pri siaj samsortanoj, montrante per ekzemploj la grandegan utilon, kiu donis al ili la lingvo internacia.

La blindaj samideanoj dum la kongreso en Bern (1913) direktis peton pri internacia poŝtrabato por brajlaj skribaĵoj al la kompetenta instanco, kaj mi ne scias, kiom nombre ili aliĝis al la kongreso en Parizo (1914), kie niaj francaj amikoj dank' al la giganta laboro de prof. Cart estis aranĝintaj grandegan kunvenon blindul-esperantistan jam preparinte ĉion por malavare gastigi alilandajn samideanojn, sed ĝi ne povis okazi pro la eksplodo de la unua mondmilito.

4 Vojaĝoj de blinduloj efektivigitaj per Esperanto

El la vojaĝoj de blinduloj efektivigitaj per Esperanto, la plej rimarkinda estis tiu de samideano V. [Vasilij] Eroŝenko [1890–1952], juna rusa muzikisto, kiu en februaro de la jaro 1912 ekiris el Moskvo kaj atingis Londonon. Li vojaĝis fervoje kaj ĉe ĉiu stacidomo, kie li devis eliri el la trajno, lin akceptis kaj kondukis UEA-delegito de la koncerna urbo. En Köln estis gesinjoroj Zapater, blindaj geedzoj, kiuj bonvenigis kaj gastigis lin dum kelkaj tagoj. Poste en Londono li estis akceptita de ges-roj Blaise, kun kiuj li gaste restis unu semajnon. Poste s-ro [William] Phillimore [1844–1934], treege sindonema amiko de la blinduloj, prizorgis lin kiel patro. Li trovis por Eroŝenko loĝejon apud sia domo, promenis kun li, instruis lin pri la angla lingvo, de kiu li komprenis neniun vorton, kaj fine kondukis lin al la fama kolegio por blinduloj en Norwood, kie la estrino Lady Campbell, akceptis lin kiel lernanton komence de majo. Tie li restis ĝis la aŭgusta libertempo, kiam s-ro Phillimore denove prizorgis lian bonfarton, ĝis li revenis Rusujon perŝipe en septembro. Poste li vojaĝis al Japanujo, al Birmo, aparte en Japanujo propagandante Esperanton inter blinduloj kaj viduloj.

En la antverpena kongreso s-ro Phillimore renkontis alian blindan vojaĝanton, John Bergh, el Finnlando, kiu ankaŭ venis al Anglujo en la fino de 1911 por studi la anglan lingvon. Tre bonkore s-ro Phillimore prizorgis lin dum lia restado en Londono. Tiel bone progresis lia studo de la angla lingvo, ke post okmonata restado en la lando li konkuris por literatura premio en la angla porblindula revuo "Progress" kaj atingis "Honoran Mencion". S-ro Bergh estis fame konata finna aŭtoro, kies romanoj estas tradukitaj en multajn lingvojn.

Mi ne rajtas trudi miajn spertojn pri vojaĝado kun esperantistoj kaj pri la ĝojo kiun ili donis al mi; sed la memoro pri la landoj, kiujn mi vizitis kun s-ro A. J. Adams, senĉesa laboranto por blinduloj, restos viva. Dum tiuj ekskursoj eksterlanden (al Tirolo en 1910, al Antverpeno 1911, al Berno 1913 kaj alilanden), mi konatiĝis kun multaj bonkoraj kaj famaj esperantistoj: s-roj H. B. Mudie, Bicknell, Joseph Rhodes kaj aliaj, kiuj treege helpis la movadon inter blinduloj. Dufoje ni vizitis Bruselon kaj miris pri la lerta parolado de la lernantoj de fratero Isidoro en la Reĝa Instituto

apude, kaj pri la bonkora laboro de nia fratero kiel brajla presisto! Ŝajnis, ke la tuta lernantaro, eble cent kvindek knaboj, povis bone babiladi en la internacia lingvo.

5 Eldonado de brajle presitaj libroj en kaj pri Esperanto

Ĉar anoncoj en "Ligilo" atingis la tutan blindan esperantistaron ĉiulandan, aliaj brajlaj presistoj de tempo al tempo povis eldoni esperantajn librojn. Ĉefe el tiuj estis Thilander, kiu eldonis bonegajn svedajn lernolibron kaj vortarojn por Esperanto. Ankaŭ li presis literaturaĵojn kiel: "Blinda rozo" de Conscience; "Johannisborg" de Starbäck; partojn el la Biblio kaj aliajn. Krome aperis en lia presejo kantoj kun esperantaj tekstoj kaj muziko de Karin Höjer; la esperanta-angla vortaro de Motteau kaj la grandega angla-esperanta vortaro de Joseph Rhodes, verko, kiu havas amplekson en brajlo de dekkvin grandaj kajeroj, kaj estas tre utila al blindaj studentoj de la angla lingvo per la internacia lingvo.

En Germanujo en la jaro 1911 aperis, krom bona lernolibro, ankaŭ "Kantareto" kun dekkvin kantotekstoj kaj muziko de Franz Döring kaj politika libro sub la titolo: "La venonta milito" de Francis Delaisi. La lastajn du librojn eldonis la brajla presejo de Arthur Wendt en Berlin, dum en Aŭstrio aperis la unua esperanta-germana vortaro de Jürgensen en brajla preso eldonita de la blindulinstituto en Vieno.

En Belgujo fratero Isidoro en brajla preso eldonis lernolibrojn por flandroj kaj kelkajn literaturaĵojn.

En Anglujo "The Royal National Institute for the Blind" (la reĝa nacia instituto por la blinduloj) en Londono eldonis per donacoj la unuan parton de la "Unua legolibro" de Kabe kaj memelspeze la lernolibron de H. Froyer.

En Francujo krom la presejo de Couillard s-rino Bastoul brajle multobligis per la ilaro Vaughan la Zamenhofan tradukon de "Marta" de Eliza Orzeszko inter aliaj malgrandaj libretoj.

Niaj samideanoj Edvard Imsdahl [1886–1951] (Norvegujo), Johan Wulff [1850–1935] (Danujo), Linars (Hispanujo) kaj Paul Ketterer [1870–1936] (Svislando) ankaŭ presigis tre utilajn lernolibrojn por blinduloj.

Kelkaj bibliotekoj porblindulaj posedis manskribitajn librojn esperantajn krom la presitaj. Jam en 1910, ĉefe dank' al la varbado de samideano A. J. Adams, sindonemaj esperantistoj vidantaj komencis brajligi manskribe esperantajn librojn por blinduloj kaj la amplekso de ili en la nacia biblioteko por blinduloj en Londono

kreskis de jaro al jaro dank' al la dekduo da kopiantoj, kiuj dediĉis tiom da tempo senpage al tiu laboro.

W. P. MERRICK

6 Resuma raporto pri la stato de la Esperantomovado inter la blinduloj ekde 1904 ĝis 1915

Per la kvina ĉapitro finiĝis la historia skizo verkita de W. P. Merrick. Ĝin ni kompletigis per faktoj ne aluditaj. Por ke la unua parto laŭhistorie estu tute kompleta, ni sekvigos koncizan superrigardon pri la stato de la Esperanto-movado inter la blinduloj en diversaj landoj laŭalfabete.

Anglujo

Sen ia dubo nia Esperanto-pioniro inter la blinduloj, W. P. Merrick, antaŭenpuŝis nian movadon inter sialandaj samsortanoj. La brajla gazeto "Progress" per priesperantaj artikoloj kaj sciigoj verkitaj de W. P. Merrick jam en la jaro 1904 subtenis kaj akcelis la interesiĝon pri la internacia lingvo ĉe sia legantaro. Dank' al la gramatiko kaj ekzercaro de prof. Cart, kiujn tradukis J. Rhodes, kelkaj blindaj angloj sukcesis ellerni Esperanton. Samjare en la blindulinstituto en Nottingham okazis Esperanto-kursoj en du klasoj: unu por knaboj, alia por knabinoj. La organiza komitato de la kvara internacia konferenco por blinduloj okazinta 1914 en Londono presigis sian invitilon ne nur en angla, franca kaj germana lingvoj, sed ankaŭ en Esperanto. En tiu konferenco W. P. Merrick faris atentindan referaton pri la utileco de Esperanto por la blinduloj kun granda aplaŭdo eĉ fare de la neesperantistaj partoprenintoj.

Belgujo

Vere grandioza estis la instrua agado farita de fratero Isidoro, profesoro en la Reĝa Instituto por blindaj knaboj en Woluwe apud Bruselo. La nombro de liaj lernantoj pri Esperanto jam en la jaro 1907 atingis la imponan nombron 50, sed ĝi kreskis de jaro al jaro tiel, ke en 1907 la lernantoj de la nomita instituto povis fondi esperantistan grupon kun fiksita regularo.

Bohemujo

En la jaro 1904 Esperanto estis enkondukita en la bohema-germana instituto por blinduloj en Praha. Karel Emanuel Macan, pioniro de Esperanto inter bohemaj blinduloj, instruisto en tiu ĉi instituto, gvidis la kurson, kiun fervore partoprenis 20 gelernantoj. La instruisto Macan mem verkis ĉeĥan brajlan lernolibron priesperantan. Ĝuste en tiu ĉi instituto ekzistis grava lingva problemo, ĉar la ĉeĥoj, pro naciaj motivoj, ne volonte parolis germane kaj la germanoj ankaŭ ne ŝatis paroli ĉeĥe. Esperanto solvis la problemon, kion ĝoje rekonis la direkcio de la lernejo.

Bulgarujo

En 1914 la internacia lingvo estis fervore lernita de gelernantoj en la blindulinstituto de la bulgara ĉefurbo Sofio.

Danujo

Johan Wulff, blindiĝinta redaktoro kaj verkisto, fervore propagandis la internacian lingvon inter sialanda blindularo kaj lin subtenis fervore la nevidanta blindulinstruistino Agnes Melchior [1883–1945], fratino de la bonkonata koncertkantisto Laŭritz Melchior tiel, ke en 1912 la lingvo unuafoje estis instruita en la "laborhejmo" por blindulinoj en Kopenhago.

Finnlando

Yrjö Nummi, la unua nevidanta samideano inter la finna blindularo en la jaro 1913 komencis du Esperanto-kursojn: unu por svede, alia por finne parolantaj infanoj de la blindulinstituto en Helsinko. Poste daŭrigis la kursojn la iame konata Esperanto-pioniro Vilho Setälä [1892–1985] tiel bone, ke 15 partoprenintoj ellernis perfekte la lingvon. Samjare la kongreso de finnaj blinduloj laŭ propono de John Bergh, finna blinda verkisto kaj fervora samideano, akceptis rezolucion, kiu esprimis la deziron, ke Esperanto estu deviga studobjekto en la finnaj blindulaj lernejoj. En 1914 aperis esperanta-finna vortaro kaj lernolibro por finnoj en brajla preso.

Francujo

Tuj post la apero de la gazeto "Esperanta Ligilo" dank' al la lernolibro kaj radikaro en brajla preso eldonitaj de prof. Cart multaj francaj samideanoj lernis la novan lingvon kun granda fervoro. Sendube prof. Edgard Guilbeau verkis la plej multajn artikolojn pri Esperanto por la brajla gazeto "Le Louis Braille" kaj la porvidula revuo "Revue de Pédagogie" kun la rezultato, ke li entuziasmigis kune kun iamaj lernintoj sialandajn samsortanojn por la internacia lingvo. Jam en 1905 okazis kursoj por blinduloj en Parizo, Saint-Mandé (apud Parizo), Lyon kaj Montpellier.

Germanujo

Certe la unua blinda esperantisto estis la lingvoinstruisto Emil Falius el Hamburgo, kvankam krom li la samideanoj Mehlisch el Berlino kaj Lutmer el Hagenau (la laste nomita urbo tiutempe estis germana) estis titolitaj kiel patronoj sur la unua paĝo de la unua numero de "Esperanta Ligilo", tamen nur li estis tiu, kiu propagandis por la internacia lingvo inter la germanaj samsortanoj per publikigo de artikoloj en la tiutempe sola blindulfaka gazeto "Mitteilungen des Vereins der deutschredenden Blinden" kun la rezulto, ke multaj samsortanoj aliĝis al nia movado. Estis la blindulinstruistino Wigand, kiu unue instruis Esperanton al 15 knabinoj de la blindula instituto en Berlin-Steglitz en la jaro 1908, sed jam antaŭe kelkaj knaboj

de la sama instituto estis lernintaj la lingvon aŭtodidakte tiel, ke poste tie fondiĝis blindulesperantista grupo de la gelernantoj. En januaro de la jaro 1913 aperis la unua numero de la brajla gazeto por esperanta propagando inter germanaj blinduloj sub la titolo: "Lingvo Internacia". Ĝi havis 120 abonantojn kaj enhavis artikolojn de s-rino Zapater, Eduard Jercke, Gustav Probst, Franz Döring, Wilhelm Münnich, interalie. Kun ĉiu numero aperis parto de la bonega lernolibro por Esperanto de J. Borel eldonita en brajla preso de la blindulinstituto en Paderborn. Kvankam la gazeto aperis nur kvaronjare, je la fino de la jaro ĉiu aboninto posedis la kompletan lernolibron kaj jam samjare la bonkonata samideano Franz Döring laŭ tiu lernolibro komencis instrui 12 membrojn de la berlina blindula klubo "Bildung" kun bona sukceso. En aprilo de la jaro 1915 jam komenciĝis en Breslaŭ la dua Esperanto-kurso porblindula, kiun gvidis la prezidanto de la loka esperantista grupo de vidantoj kaj sekvis la fondiĝo de la blindulesperantista grupo "Interna Lumo" sub la prezido de Adolf Selten [1879–1942] kun la celo disvastigi ne nur la lingvon, sed ankaŭ literaturaĵojn en tiu lingvo inter la blinduloj.

Italujo

Ni povis sciigi nur pri Esperanto-kurso en la blindulinstituto de Torino en la jaro 1914.

Rumanujo

Ses monatojn post la fondiĝo de "Vatra Luminoasa" (luma hejmo), instituto por rumanaj blinduloj), la reĝ-edzino Elisaveta donis permeson al d-ro Robin instrui Esperanton en la instituto de ŝi protektata. Tio estis en 1908, sed poste daŭrigis la kursojn la blinda samideano Prezenti Levy.

Norvegujo

La unua blinda esperantisto en Norvegujo supozeble estis Andreas Pedersen, sekretario de la helpasocio por norvegaj blinduloj, kiu en 1900 jam lernis Esperanton buŝe de sia amiko Tellef Davidson. Post apero de la lernolibro de prof. Cart, kiun tradukis J. Wulff en la danan lingvon, kelkaj eminentaj blinduloj: Geburg Aasland, Alf Arnesen [1878–1962], Edvard Imsdahl, Halvdan Karterud [1894–1972] inter aliaj lernis la internacian lingvon. Edvard Imsdahl, la redaktoro de la brajla gazeto "Norges Blinde" publikigis multajn priesperantajn artikolojn. Li ankaŭ en 1913 komencis kursojn por blinduloj en Bergen.

Svedujo

La poresperanta propagando inter blinduloj komenciĝis en 1902. Tiam "De Blindas Veckoblad" (la ĉiusemajna gazeto de la svedaj blinduloj) aperigis serion da artikoloj pri la internacia lingvo, kiujn verkis Harald Thilander. Unu post la

alia eklernis Esperanton kaj estis jam pli ol dudek samideanoj. En 1903 Valdemar Langlet malfermis Esperanto-kurson en la reĝa porblindula instituto en Tomteboda, kie la interesiĝo estis tre vigla. En la sama jaro la svedaj blinduloj ricevis, dank' al la redaktoro D. Kjelin kaj la direktoro de la nomita instituto, brajle presitan gramatikon de Th. Cart kaj vortaron sufiĉe kompletan. Samtempe Esperanto estis private instruita en la privata porblindula lernejo de fraŭlino Anna Wikström en Uppsala. En la komenco de la jaro 1908, kiam f-inoj Höjer kaj Öhman invitis la svedajn blindajn esperantistojn, kiuj loĝis en Stockholm kaj Tomteboda, por agrable pasigi kelkajn vesperajn horojn, tiuvespere fondiĝis la "Asocio de Svedaj Blindaj Esperantistoj". Post unu jaro la nova societo jam havis 26 membrojn. Do, la svedaj samideanoj povas prave fieri, ke ili fondis la unuan nacian blindulesperantistan societon en la mondo. Je la fino de la jaro 1913 en ĉiuj kvar blindulinstitutoj de la lando la internacia lingvo estis nedevige instruita.

Usono

Komence de la jaro 1905 dekdu blindaj lernantoj en la aĝo sub 18 jaroj de la "Perkins Institution" en Boston fondis esperantistan klubon sub gvido de la instruisto E. M. Harvey. Ili lernis la lingvon ekster la lerneja kadro de la studobjektoj. Vespere, la 2-an de februaro samjare la junaj nevidantaj samideanoj donis koncerton al siaj amikoj loĝantaj proksime al la urbo. La tre sukcesinta programo entenis kantojn, paroladojn, muzikon kaj eĉ du komedietojn en Esperanto.

DUA PARTO

7 La blindulesperantista movado dum la unua mondmilito

Kuntiriĝis malhelaj nuboj sur la horizonto de la maljuna Eŭropo: aperis la fajroruĝa fantomo, la milito, parolis la kanonoj kaj devis silenti la voĉo de Esperanta Ligilo en la jaro 1915. Tamen, en kelkaj landoj, kie ne furiozis la milito, la blindaj esperantistoj ne forlasis nian movadon; male ili interkorespondis, esperantaj libroj iris de mano al mano, entuziasme oni legis malnovajn jarkolektojn aŭ nur unuopajn numerojn de EL; en multaj brajlaj gazetoj diverslandaj aperis artikoloj pri la utileco de Esperanto por la blinduloj kun la rezulto, ke pliiĝis la nombro de tiuj samsortanoj, kiuj lernis la internacian lingvon aŭtodidakte.

En Germanujo la blindaj geedzoj Zapater estigis rondiran leteraron kun 14 partoprenantoj. Ĉiu el ili devis aldoni leteron, fari kaj respondi demandojn, proponi pridiskutotajn temojn kaj sendi la rondiran leteraron al la posteulo en la rondo, kiu agis same. Tiamaniere la samideanoj, precipe la komencantoj, havis okazon ekzerciĝadi en la internacia lingvo favore al tiu tempo, kiam post la milito ree aperos esperanta gazeto kaj oni havos denove la bonŝancon korespondi kun alilandaj gesamideanoj. Simile oni agis en aliaj landoj. En Svedujo eĉ daŭris kursoj pri Esperanto tiel, ke en la jaro 1919 estis tuta internacia aro preta por labori aktive en la internacia movado.

8 Esperanta Ligilo ekde la jaro 1919 ĝis 1940

Tuj post kiam ĉesis la milito, ree estis nia brava pioniro Harald Thilander, kiu kun siaj amikoj energie laboris por reeldoni nian internacian gazeton. Jam en 1919 povis aperi tri "okazaj numeroj" kun salutoj de tri nacioj al la tutmonda blindularo. La unua el Skandinavio pagita de la tieaj blindulorganizaĵoj venis en januaro; la dua el Anglujo aperis en majo kaj la tria el Finnlando estis eldonita en septembro. Dume la skandinavaj blinduloj kolektis monon, por ke "Ligilo" aperu denove ĉiumonate kaj en Anglujo estis nia eminenta, fervora kaj ĉiam agema pioniro William Percy Merrick, kiu verkis kaj publikigis alvokon je la sama celo. Estis ankaŭ li, kiu montris la "okazajn numerojn" al la angla blindiĝinta "gazetreĝo" kaj blindulamiko Sir Arthur Pearson kaj rakontis al li pri nia internacia gazeto. Alimaniere oni ne povas klarigi tion, kio okazis: laŭ propono de Sir Arthur Pearson la "Royal National Institute for the Blind" en Londono, unu el la plej gravaj, plej grandiozaj blindulinstitucioj en la mondo, kies prezidanto li estis, decidis restarigi Esperanta'n Ligilo'n, kion ĝi ankaŭ faris. Dum du jaroj la institucio sola pagis ĉiujn elspezojn por la gazeto, proksimume kvincent pundojn sterlingajn. Kian ĝojegon kaŭzis ĉi

tiu malavara decido al la legantoj, neniu povas konstati krom tiuj, kiuj tralegis la centojn da dankleteroj de la legantaro tutmonda.

Liberiĝite de financaj zorgoj EL reviviĝis kaj depost januaro de la jaro 1920 ĝi denove aperis regule ĉiumonate kun 45 paĝoj. La unua, januara numero enhavis, krom kelkaj tre interesaj popularsciencaj kaj blindulfakaj artikoloj, ankaŭ rimarkindajn biografiajn notojn pri prof. Th. Cart, la fondinto, kaj Sir Arthur Pearson, la reviviginto de nia internacia gazeto. La enhavo estas tiel elektita, ke ĉiu leganto trovas en ĉiu numero ion speciale interesan, kaj nia kara Thilander, la redaktoro, estis en vera senco de la vorto la ĝusta homo sur la ĝusta loko.

Blindulfakaj kaj popularsciencaj artikoloj alternis kun literaturaĵoj, rakontoj kaj specialaĵoj ofte verkitaj de blinduloj mem, kaj ĉio estis tiel facile komprenebla, ke la interesiĝo por la gazeto kreskis konstante inter la blinduloj. Antaŭ la milito "Ligilo" neniam havis pli ol 360 legantojn, kvankam pli multaj samsortanoj scipovis nian lingvon, sed nun la legantaro en 26 landoj atingis la nombron 600. Precipe la blindulfakaj artikoloj el EL estis ŝatataj tiel, ke multaj, se ne ĉiuj, estis tradukitaj en la naciajn lingvojn kaj represitaj en diverslandaj gazetoj porblindulaj. Tiamaniere ankaŭ la neesperantistaj samsortanoj havis bonvenan okazon informiĝi pri la stato de la blindula afero en aliaj landoj, kaj samtempe per tio ili estas instigitaj lerni la internacian lingvon. Dank' al la konsula sistemo la redaktoro de "Ligilo" facile povis informiĝi pri la blindul-aferoj en ĉiuj landoj. Estis pli ol 25 konsuloj de la blindaj esperantistoj, kiuj kunlaboris kun la redaktoro. Ili havis la taskon, unue, kiel eble plej aktive propagandi Esperanton inter sialandaj blinduloj; due, kolekti la monon de la abonintoj de EL en sia lando, t.e. la abonantoj anstataŭ sendi la monon al la eldonanto de la gazeto ĝin sendas al la konsulo de sia lando; trie, ili devas doni sciigojn pri diversaj aferoj, kiuj koncernas blindulojn de sia lando, al fremdaj samsortanoj petantaj informojn de ili. Ili do estas la ligiloj, kiuj internacie kunligas la popolon de la blinduloj.

Ankaŭ la ŝakpaĝoj de EL estis restarigitaj. Multan plezuron kaŭzis al la legantoj la konkursoj diversspecaj. S-rino Annie Mudie, la patrino de la eminenta angla Esperanto-propagandisto Mudie, kiu mortis dum la milito kaŭze de fervoja akcidento, promesis je memoro de sia filo doni ĉiujare dek pundojn sterlingajn por premioj, kion ŝi ankaŭ plenumis ĝis sia morto. Dank' al ĉi tiu malavara donaco "Ligilo" povis aranĝi dufoje en la jaro tri diversajn konkursojn kun premioj: unue literaturan, due blindulfakan kaj trie problemsolvan. Krome iom da mono estis rezervita por specialaj konkursoj. La interesiĝo estis tre vigla pri ĉiuj konkursoj inter la legantaro.

Laŭ propono de la franca samideano Eugène Barrier ”Ligilo” malfermis novan sekcion sub la rubriko ”Liberaj korespondetoj”. En ĉi tiu sekcio la legantoj povis prezenti demandojn, rimarkojn aŭ respondi demandojn ne bezonante doni nomon, nek adreson, nur ian ajn markon kaj estas kompreneble, ke multaj legantoj profitis el tiu ĉi aranĝo.

Sub la rubriko ”Nia afero” la gazeto regule raportis pri la progreso de la Esperantomovado inter la blinduloj tra la tuta mondo.

La granda ĝojo por la legantoj de EL sendube estis la publikigo de landkartoj pri multaj landoj laŭ naturgeografia kaj laŭ politika situacio kun detalaj klarigoj, kiuj ebligis al la legantoj formi klaran imagon pri la situacio de riveroj, maroj, lagoj, montoj kaj urboj de la koncerna lando, pri kiu samtempe ankaŭ aperis detala artikolo laŭeble eĉ kun raporto pri la blindula afero.

Poste Thilander eltrovis vojon por prezenti al la legantoj tutan serion da naciaj flagoj tiel bone desegnitaj, ke tiuj, kiuj vidis iam, ne nur povis imagi la formojn, sed eĉ havis klaran bildon pri iliaj koloroj.

Ĉiam novaj ideoj inspiris nian redaktoron por ĝojigi la internacian legantaron. Tial li publikigis reliefajn tuŝbildojn ne nur pri monumentoj kaj pontoj, sed ankaŭ pri multaj bestoj konataj kaj nekonataj al nevidantoj kun klarigaj tekstoj kaj artikoloj, en kiuj oni legis pli detale pri ili. En unu desegnaĵo li montris eĉ zigzagan fulmon kaj eksterordinare bela estis la desegnaĵo pri la domo de Esperanta Ligilo en Stocksund laŭ la ekstera formo kaj la internaj unuopaj ĉambroj kaj la lokoj, kie staras la maŝinoj por stereotipi kaj presi ”Ligilon” kaj multajn aliajn gazetojn. Tio nur estis ebla dank’ al la komplezemo de la profesia desegnisto de la ”Royal National Institute for the Blind” en Londono, nia karmemora blindulamiko William Holmes en Shepperton, kiu faris la desegnaĵojn per speciala maŝino tute senpage por EL kaj ne nur tion: li eĉ lernis Esperanton por povi aldoni klarigajn tekstojn. Post lia forpaso en la jaro 1929 nur kelkajn jarojn poste la dana desegnisto Daniel Hvidt desegnis duan serion da ”tuŝbildoj” kun klarigaj tekstoj de Karl Bjarnhof.

Ne kompleta estus la raporto, se ni ne menciis la fakton, ke sub la rubriko ”Korespondado” samsortanoj el multaj landoj koncize raportis pri eventoj kaj atingajoj en la blindulafero diverslanda.

Nia gazeto EL prosperis bone ĉiurilate dum preskaŭ du jaroj, sed en la jaro 1921 malbonega komerco pro diverslandaj inflacioj kaj la eŭropa krizo ĝenerale tiom malpliiĝis la enspezoj de la ”Royal National Institute for the Blind”, ke ĝi devis

plialtigi la prezon por brajle presitaj libroj. Tial la komitato anoncis kun profunda bedaŭro, ke ekde junio 1921 ĝi nur pagos la kostojn de la ekzempleroj de EL por britaj legantoj, ĝi limigis la sumon je "ne pli ol 40 pundoj sterlingaj". Efektive "Ligilo" ŝuldas multon al la institucio, kiu ebligis ĝian eldonon dum preskaŭ du jaroj kaj eĉ en ĝia malbona stato malŝparis sumon, kiu atestis ne nur simpatian kun nia entrepreno, sed fortan deziron por nia celo.

Nun estis nia vico sperti la malprosperon ĉiam postlasitan de granda milito. La abonantoj aŭ pli bone la legantoj de "Ligilo" ĝenerale estis neriĉaj kaj krom tio la samideanoj loĝantaj en malbonvalutaj landoj ne povis pagi la saman abonprezon kiel tiuj en landoj kun bona valuto. Tamen, niaj plej fervoraj samideanoj agis tuj. Preskaŭ en ĉiuj porvidulaj Esperanto-gazetoj aperis artikoloj pri nia EL kun la peto ĝin monhelpi. La ĉiusemajna gazeto "Esperanto Triumfonta" redaktata de Theo Jung eldonis "blindulan numeron" kun detala historia skizo pri la Esperantomovado inter la blinduloj de W. P. Merrick, raporto pri la stato de la movado post la milito de J. Kreitz, fotoj de Harald Thilander kaj lia presejo kaj Baldomero Zapater, fama blinda gitarvirtuozo, rakontoj verkita de blindaj samideanoj ktp. kun la celo peti monhelpon por nia "Ligilo".

La monkolekto aranĝita de "Esperanto Triumfonta" havis vere kontentigan rezulton tiele, ke ĝia redaktoro Theo Jung povis transdoni grandegan sumon al Harald Thilander por EL. El ĉiuj landoj oni sendis monon al la redakcio de la nomita gazeto, eĉ s-rino Klara Zamenhof, la vidvino de nia majstro, ne hezitis pagi sian kontribuon kaj ges-roj Ferez en Strasburgo, por citi nur unu ekzemplon inter multaj, donacis al "Ligilo" konsiderindan sumon ricevitan okaze de sia geedziĝa festo. En multaj landoj okazis blindulkoncertoj kaj Esperantogrupoj diverslandaj okazigis Esperanta-Ligilo-vesperojn kun monkolektoj profite al EL. Ĉefe kiel kuriozaĵon ni menciuj la fakton, ke skotaj kaj anglaj blindulinoj mem faris kaj disvendis sukeraĵojn profite al EL tiel, ke ili povis transdoni kompare grandan sumon al la kasisto de la gazeto. Ke EL ne bezonis ĉesigi sian aperadon, unuavice ni dankŝuldas al nia karmemora angla blindulamiko J. Adams en Hastings, kiu ne nur ĉiam kolektis monon, sed donis el propra poŝo kompare grandajn sumojn por savi ĝin, ĉar ĉiam, kiam la kaso de EL estis malplena, li aperis kiel savanta anĝelo.

Dum la unua internacia kongreso de blindaj esperantistoj okazinta en Praha en la kadro de la 13-a Universala Kongreso, oni kolektis monon ne nur inter blindaj kaj vidantaj kongresanoj, sed plej grava estis la starigo de konstanta financa komitato konsistanta el prof. Th. Cart, Theo Jung, prof. Stanislav Stejskal [1887–1929], W. P. Merrick kaj H. Thilander, kies tasko estis la okazigo de monkolektoj en ĉiuj landoj. Post la "Royal National Institute for the Blind" en Londono intertempe

ankaŭ alilandaj blindulorganizaĵoj imitis ĝian ekzemplon kaj finance subvenciis nian gazeton. Inter la unuaj estis "Norges Blindeforbund", Norvegujo; "L'amié des Aveugles de France" kaj "Association Valentin Haüy", ambaŭ en Francujo. Poste sekvis danaj, finnaj, hispanaj kaj svedaj blindulorganizaĵoj tiel, ke je la fino de la jaro 1922 jam ok blindulorganizaĵoj troviĝis inter la konstantaj subvenciantoj de EL, sed tiu nombro da subvenciantoj kreskis de jaro al jaro tiel rapide, ke en 1934, kiam nia "Ligilo" ekzistis tridek jarojn, 23 blindulaj kaj porblindulaj organizaĵoj en 15 nacioj finance subvenciis nian gazeton. La pliboniĝo de la financoj de EL permesis al la redaktoro Harald Thilander pliampleksigi la gazeton aldonante al ĝi ne nur la tuŝbildojn, naciajn flagojn kaj landkartojn kun klarigaj tekstoj, pri kiuj ni jam raportis, sed ankaŭ kelkajn interesajn antologiojn kaj aliajn literaturaĵojn ĉefe kun la celo plifaciligi la lernadon de la esperanta stenografio intertempe plivastigita.

Estus maljuste, se ni ne menciis la fakton, ke Harald Thilander ne nur mem stereotipis senpage la gazeton dum multaj jaroj, sed ankaŭ tre ofte, kiam ne estis sufiĉe da mono en la kaso por pagi la elspezojn, li mem aldonis monon el sia propra poŝo por ebligi la regulan aperadon de la gazeto, kaj fakte ĝi aperis regule ĝis la monato aprilo en la jaro 1940, kiam denove nia amiko Harald Thilander kun sanganta koro devis ĉesigi la eldonadon. Ne estas eble menci en ĉi tiu raporto la altruismajn oferojn de vidantaj kaj nevidantaj samideanoj ĉiulandaj por la unusola brajla gazeto internacia kaj la ĝojojn kaj la utilecon kaŭzitaĵn al la samsortanaro tra la tuta mondo.

9 La Esperantomovado inter blinduloj post la unua mondmilito ĝis la fondiĝo de "Universala Asocio de Blindaj Esperantistoj" en 1923

Post la unua mondmilito kaj la reldono de "Esperanta ligilo" konsiderinde kreskis la intereso por Esperanto inter la blinduloj ĉiulandaj. Multaj gazetoj blindulaj kaj porblindulaj publikigis entuziasmajn artikolojn pri la internacia lingvo kaj ĝia utileco precipe por la nevidantoj. Ĉefe estis la angla gazeto "Progress", kiu ofte akceptis valorajn artikolojn verkitajn de nia pioniro W. P. Merrick, sed ankaŭ alilandaj gazetoj volonte publikigis tiajn propagandajn artikolojn, kiuj altiris la atenton de la samsortanoj al nia internacia lingvo. Aliaj brajlaj gazetoj eĉ havis Esperanto-fakon: "The blind citizen" (Blinda civitano), irlanda gazeto kvaronjara, la ĉeĥa ĉiumonata gazeto "Ora" publikigis Esperanto-gramatikon kun daŭrigoj. "Norges blinde" (La blinduloj de Norvegujo) ĉiumonate enhavis originalan novelon kun norvega traduko kaj hispana gazeto agis simile.

Kelkaj blindulinstitutaj direktoroj multe interesiĝis pri Esperanto. Grava venko de nia lingvo inter blinduloj tiutempe estis la decido de la 4-a aŭstra "Blindenfürsorgetag" (kunveno de blindulinstruistoj kaj -pedagogoj) okazinta en Vieno de la 24 ĝis la 27 de septembro en 1920, kiu kun ĉiuj voĉoj kaj fortaplaŭde akceptis proponon de la vidanta blindulinstruisto prof. O. Vanecek devige enkonduki la instruadon de Esperanto en la aŭstrajn blindulinstitutojn. Laŭ alia propono de prof. Vanecek en la statuton pri ekzamenado de novaj blindulinstruistoj estis enmetita paragrafo postulanta, ke ĉiu blindulinstruisto nepre devas scipovi Esperanton kaj ne plu la francan kaj anglan lingvojn. La koncerna ministerio pri instruado en Vieno konsentis ke Esperanto estu devige enkondukata en la blindullernejojn kondiĉe ke tio alportos neniamajn kostojn. En la monato aprilo de la jaro 1921 fakte jam okazis la unua Esperanto-kurso en la blindulinstituto en Purkersdorf kun 25 gelernantoj en la aĝo de 15 ĝis 18 jaroj kaj jam la 16-an de julio samjare okazis publika ekzameno de la ellernita lingvo. Ĝin ĉeestis ne nur la gepatroj kaj parencoj de la gelernantoj, sed ankaŭ urbaj kaj landaŭtoritataj reprezentantoj. La raporto ne estus kompleta, se ni ne menciis la fakton, ke kelkaj blindulinstitutoj en Aŭstrujo daŭrigis la instruadon de la internacia lingvo dum kelkaj jaroj, sed ke poste oni ĉesigis ĝin laŭdire pro manko de taŭgaj instruistoj, alivorte oni ne realigis la akceptitan proponon. La blinda muzikinstruisto Ignaz Krieger, la aŭstra konsulo de EL, multe propagandis pri Esperanto kaj instruis multajn samsortanojn en Vieno pri la lingvo.

Ankaŭ en aliaj landoj okazis Esperanto-kursoj en blindulinstitutoj, sed mankas fidindaj informoj kaj statistikaj nombroj escepte pri Germanujo, kie laŭ statistiko kunmetita de Wilhelm Reiner, direktoro de la blindulinstituto en Nürnberg ekde 1920 ĝis 1923 Esperanto estis instruita fakultative en la blindullernejoj: Düren, Hamburg kaj Nürnberg kun 61 gelernantoj, devige en Frankfurt am Main kun 16 gelernantoj. Plie okazis kursoj en jenaj blindullernejoj: Berlin-Steglitz, Breslau, Chemnitz, Halle, Königsberg, Paderborn kaj Stettin. En la belga blindullernejo Woluwe oni instruis multajn knabojn pri nia lingvo, sed certe estas, ke okazis instruado pri Esperanto en la blindullernejoj en Bergen (Norvegujo), Budapeŝto (Hungarujo), Edinburgo (Skotlando), Helsinko kaj alia finna blindulejo, Genova kaj Milano (Italujo) kaj Tomteboda (Svedujo). Tamen, ni supozas, ke okazis kursoj en multaj blindulejoj diverslandaj, pri kiuj mankas fidindaj informoj. Samtempe en multaj diverslandaj urboj okazis Esperanto-kursoj por plenkreskaj nevidantoj kun bona sukceso, kaj multaj, tre multaj samsortanoj studis aŭtodidakte la internacian lingvon.

Nemirinde, ke en kelkaj urboj fondiĝis Esperanto-klubo de nevidantoj; en Petrograd, Sovetunio [nun Sankt-Peterburgo, Rusio] sub la prezido de la

militblinda kapitano V. Prejs aktive laboris la blindulesperantista klubo "Amikaro"; tiutempe fondiĝis en Erfurt, Germanujo, "Steletto de Erfurt" sub la prezido de Kurt Filss; la blindulesperantista grupo en Frankfurt am Main sub la prezido de la vidanta blindulinstruisto Karl Urban jam ĉe la fondiĝo havis 14 anojn. Dank' al ilia aktiva laborado povis aperi en brajla preso la trivoluma vortaro germana-esperanta de Christaller, kiu ege helpis al multaj studentoj de la germana lingvo. Kompare multajn anojn ankaŭ havis la blindulesperantista grupo en Berlin sub la prezido de Julius Hasselbach [1874–1936], kaj en Breslau Adolf Selten [1879–1942] fondis blindulesperantistan klubon.

En la jaro 1920 kaj sekvantaj jaroj niaj rusaj samsortanoj trapasis tempon de terura mizero, mankis ĉio kaj multaj mortis pro malsato. La blindaj samideanoj de la klubo "Amikaro" en Petrograd sendis helpkrion al ĉiulandaj blindaj esperantistoj per nia gazeto EL kun la rezulto, ke en ĉiuj landoj bonvalutaj kaj malbonvalutaj la blindaj samideanoj aranĝis monkolektojn profite al niaj rusaj suferantaj samsortanoj tiel, ke oni povis sendi ne nur konsinerindajn monsumojn, sed ankaŭ multajn donacpakaĵojn kun nutraĵoj pere de la Ruĝa Kruco en Anglujo.

Dank' al la agado de la blindaj esperantistoj diverslandaj ankaŭ multaj blindulaj organizaĵoj partoprenis en la helpado. Montriĝis, ke niaj blindaj samideanoj tiutempe ne nur estis idealistoj, sed ankaŭ veraj realistoj. Malgraŭ ekonomiaj krizoj kaj inflacioj en multaj landoj nia movado marŝis antaŭen senhalte. La blindulesperantistaj kluboj jam ekzistantaj poste metis la fundamenton por la naciaj societoj de blindaj esperantistoj, pri kiuj ni raportos en la deka ĉapitro.

10 La naciaj blindulesperantistaj societoj ĝis la jaro 1939

Aŭstrujo

En la jaro 1921 Ignaz Krieger fondis en Vieno societon de blindaj esperantistoj loĝantaj en Aŭstrujo, sed bedaŭrinde pro diversaj motivoj ĝi jam ĉesigis sian agadon post mallonga tempo.

Bulgarujo

Estis en la jaro 1914, kiam okazis la unua Esperanto-kurso en la blindulinstituto en Sofio. Tuj post la milito reviviĝis nia movado en la lando de la rozoj ne nur inter la viduloj, sed ankaŭ inter la blinduloj. Okazis kursoj ankaŭ por plenkreskaj blinduloj kaj ili decidis en 1921 fondi la blindulesperantistan societon kun la nomo "Balkana stelo" sub la prezido de St. Nenkov [1880–1967]. La organizaĵo fakte fariĝis helporganizaĵo por la bulgaraj blinduloj, ĉar ĝi aranĝis koncertojn por enspezi monon. Krom kotizoj de la membroj ĝi ankaŭ ricevis privatajn donacojn.

Tiamaniere estis eble instrui la brajlan skribon al blinduloj, kiuj ankoraŭ ne sciis legi ĝin. Plie ĝi starigis malgrandan bibliotekon kaj kune kun la protektanta asocio ĝi malfermis ankaŭ legejon por blinduloj en la legosalonoj de la urbo Sofio, kie ili povis mem legi brajlajn librojn aŭ aŭskulti gazetojn legatajn de viduloj. Estas kompreneble, ke la societo aranĝis multajn esperantajn kursojn por plenkreskaj blinduloj tiel, ke jam en 1929 ĝi havis 80 anojn, sed ankaŭ menciinda estas la fakto, ke "Balkana stelo" dum multaj jaroj apartenis al tiuj organizaĵoj, kiuj monsubtenis nian gazeton EL. En 1928, kiam Bulgarujo suferis pro tertrema katastrofo, ree estis la blindaj esperantistoj, kiuj kune kun neesperantistaj organizaĵoj blindulaj monkollektis por helpi al bulgaraj samsortanoj.

Ĉeĥoslovakio

La 17-n de septembro en la jaro 1921 laŭ iniciato de Karel Emanuel Macan, unu el la pioniroj de Esperanto inter la blinduloj, estis fondita en Praha, la ĉefurbo de la juna ĉeĥoslovaka respubliko, la "Societo de ĉeĥoslovakaj nevidantaj esperantistoj" (SOĈNE). Unua prezidanto estis Karel Emanuel Macan kaj kiel sekretario funkciis prof. Stanislav Stejskal, vidanta blindul-amiko fervore laboranta por la disvastigo de Esperanto inter blinduloj. La societo progresis tiel, ke post mallonga tempo ĝi jam havis 63 anojn. Krom lernolibroj kaj vortaroj ĝi eldonis sian oficialan organon sub la titolo "Aŭroro" aperanta komence nur sur kvar paĝoj dumonate, sed poste oni pliampleksigis la gazeton tiom, ke en multaj landoj oni legis ĝin kun granda intereso, ĉar ĝi enhavis ne nur informojn el la ĝenerala Esperantomovado, sed ankaŭ bonstilajn literaturaĵojn. SOĈNE aranĝis esperantokursojn kaj ĝi ankaŭ estis tiu societo, kiu modele administris la internacian blindulinformejon kaj statistikejon, pri kiu vi legos poste. Vigle kaj sukcese ĝi laboris ĝis la jaro 1939, kiam la germana armeo invadis la Ĉeĥoslovakian respublikon kaj Esperanto estis malpermesita.

Danujo

La blindiĝinta redaktoro kaj verkisto Johan Wulff estis la unua dana blinda esperantisto, kiu eldonis la unuan lernolibron por Esperanto en brajla preso kaj propagandis la internacian lingvon inter sialandaj samsortanoj. De la 30-a de junio ĝis la 2-a de julio en la jaro 1931 okazis en Kopenhago kunveno de la dana tutlanda blindulunuiĝo. Inter multaj fakkunvenoj ankaŭ okazis kunveno de danaj blindaj esperantistoj. Dum tiu ĉi kunveno komitato konsistanta el kvin samideanoj prezentis statutproponon por starigo de "Dana asocio de blindaj esperantistoj" kun la mallongigo: DABE, kaj la ĉeestantaro unuanime decidis la fondon de la proponita unuiĝo aprobante la statuton. Jam dum la kunveno multaj samideanoj kaj interesuloj membriĝis kaj decidis aliĝi al UABE. Unuanime oni elektis kvin proponitajn personojn kiel estraron de la novnaskita organizaĵo, kies membraro jam

proksimiĝis al kvindeko. La unua estraro konsistis el: Agnes Melchior, prezidanto; redaktoro V. Ommerbo, sekretario; Jens Ahler, kasisto K. Laurids Lauridsen kaj Karl Bjarnhof.

Dum sama tutlanda kunveno la reprezentantaro unuanime decidis, ke en la gazeto de "Dansk Blindesamfund", kiu havas la saman nomon kiel la societo mem, estos kvarpaĝa aldono ĉiumonate kun Esperantoteksto kaj danlingva traduko por tiel doni al memstudantoj eblecon lerni kaj ekzerci ĝi. DABE jam starigis kongresvojaĝan fondon kaj metis la fundamenton por estonta sukcesa movado de nia lingvo inter la danaj blinduloj.

Finnlando

Jam antaŭ 1914 la Esperantomovado inter la finnaj blinduloj estis kompare vigla. Yrjö Nummi estis la unua finna nevidanta esperantisto, kiu laboris aktive por disvastigi la internacian lingvon inter la finnaj blinduloj. Estis s-ino Anna Friman [1878–1937], Wolmar Sjöholm [1891–1974], John Bergh, la bonkonata verkisto, s-ino Laina Nieminen [1890–1975], s-ino Hilja Oksanen k.a., kiuj en la jaro 1919 fondis la societon de finnaj blindaj esperantistoj sub la nomo "Steleto", kiu bonege progresis. "Steleto" regule aranĝis jarkunvenojn, eldonis kompare multajn studlibrojn por Esperanto kaj kantlibron kun melodioj en brajla preso kaj multe propagandis nian lingvon inter nevidantoj. Prave oni povas diri, ke estis niaj finnaj samideanoj, kiuj fondis la unuan nacian societon de blindaj esperantistoj postmilite.

Francujo

En Francujo, la lulilo de la Esperantomovado inter blinduloj, kompare malfrue oni fondis organizaĵon blindulesperantistan. Instruado de Esperanto inter ambaŭ militoj okazis en la Nacia Instituto por Junaj Blinduloj en Parizo sub gvidado de Pimoule, blinda instruisto en la menciita lernejo, kaj certe ankaŭ ĝi okazis en la porblindulaj lernejoj en Clermont-Ferrand sub gvidado de Jean Pascal, tiam lernanto de masaĝo en tiu lernejo, kaj en Ronchin apud Lille. En Villeurbanne 4-5 knaboj mem lernis la lingvon. Albert Masselier [1886–1976], militblindulo, kiu tuj post lamilito multe propagandis nian aferon inter francaj blinduloj, kune kun la vidanta blindulamiko Belsola en la jaro 1928 fondis la "Francan Asocion de Blindaj Esperantistoj" (FABE). La provizora komitato konsistis el la samideanoj: Pimoule, la blindulinstruisto jam menciita, Caudmont, bibliotekisto de "Association Valentin Haüy", Belsola, vidanta kasisto kaj Albert Masselier mem. La asocio havis sian sidejon en la "Institution Nationale des Jeunes Aveugles". Dum la kongreso de la francaj esperantistoj en Nancy okazis profite al la naskiĝanta FABE kurioza vendado de verdaj flagetoj donacitaj de s-rino Farges el Lyon. La saman flageton akiris unu post la alia ĉiuj partoprenantoj; akiris ĝin nur momente, ĉar ĉiu aldonis

malgrandan sumon kaj tiel iĝis posedanto de la flageto ĝis kiam alia mondonanto iĝis siavice nova posedanto. La vendado rezultigis 264 frankojn, la baza kapitalo de FABE. Komence FABE aliĝis al UABE, sed poste ĝi ekŝiĝis kaj aliĝis al la franca civilblindula federacio, kio kaŭzis skismon.

Post la 11-a internacia kongreso de blindaj esperantistoj organizata de FABE 1932 en Parizo la asocio fariĝis oficiala kun nova statuto. Prezidanto de la nova estraro fariĝis Emmanuel Robert, vidanta profesoro ĉe la komercaj lernejoj, aŭtoro de lernolibroj kaj vortaroj en kunlaborado kun prof. Th. Cart, kaj tradukinto de diversaj verkoj el la franca lingvo. Li mem transskribis kelkajn librojn en brajlan skribon. René Curnelle, vidanta samideano en Lille, konata Esperanto-parolanto de la loka radio, funkciis kiel kasisto. La aliaj estraranoj estis blindaj. Sub la titolo "La Bonvolemlulo" la asocio eldonis bultenon ĝis eksplodo de la milito, sed kun permeso de Masselier kaj Robert, Raymond Gonin [1913–2002] cirkuligis en la "suda teritorio" de Francujo dispartigita fare de la germana okupanta armeo manskriban bultenon "Provizora ligilo". Eble aperis dek numeroj kun la celo daŭrigi la kontakton inter la iamaj membroj. La oficiala FABE eldonigis de "Association Valentin Haüy" Esperantan-francan vortaron unuvoluman, prilaboritan de Albert Masselier; de "American Braille Press" (tiam nomo de la sekcio de "American Foundation for Overseas Blind") duvoluman vortaron francan-esperantan de L. Bastion, kaj de H. Thilander-presejo duvoluman lernolibron de Cart kaj Robert. Poste ĝi ankaŭ eldonigis ekzercaron de la duagrada kurso de Cart kaj Robert kaj la "Klasikan Legolibron" de la laste nomita aŭtoro. Profite al la kaso FABE disvendis librojn de Robert kaj Masselier en nigra preso.

Germanujo

La germanaj partoprenantoj de la unua blindulesperantista kongreso en Praha decidis fondi germanan blindulesperantistan organizaĵon, tamen nur post la kongreso la samideanoj Julius Hasselbach, Joseph Kreitz kaj Adolf Selten kunvenis en Köln en la loĝejo de la blindaj geedzoj Zapater ne nur por pridiskuti kaj fiksi statutproponon, sed ankaŭ por interkonsenti pri provizora estraro konsistanta el: Adolf Selten, unua prezidanto; Julius Hasselbach, dua prezidanto; Joseph Kreitz, unua sekretario kaj afergvidanto; Kurt Filss, dua sekretario kaj Henriette Zapater [1867–1928], naskita baronino de Chalmot, kasistino. La gitarvirtuozo Baldomero Zapater donis la nomon EBLOGO al la "Esperanto-blindulligo de Germanujo".

La unua prezidanto Adolf Selten en Breslau propraelspeze eldonis en brajla preso la unuajn ne ampleksajn numerojn de la oficiala organo sub la titolo "La blinda esperantisto". Jam en la jaro 1920 Joseph Kreitz eldonis manskribitan gazeton samnoman, kiu enhavis rakontojn, novelojn, poemojn ktp., sed post la fondiĝo de

EBLOGO li, kiel unua sekretario transprenis la redakcion de la oficiala organo, kiu post la inflacia tempo povis aperi kvaronjare kun literatura felietono titolita "La bona amiko".

Krom tre efika propagando por la internacia lingvo inter la germanaj samsortanoj EBLOGO ankaŭ eldonis en brajla preso kelkajn tre utilajn studlibrojn, i.a. la bonegan vortaron de Esperanto de Kabe aperintan en la presejo de H. Thilander kaj lernolibreton pri la germana mallongiga skribo ĉefe por studentoj de la germana lingvo. En la jaro 1931 laŭ propono de EBLOGO aperis en Marburg la trivoluma vortaro germana-esperanta de Bennemann kaj samjare ankaŭ aperis nova, ampleksa lernolibro de Eugen Reiche por meminstruado de Esperanto, kiun antaŭis dekkvinpaĝa propaganda kajero germanlingva aldonita al preskaŭ ĉiuj brajlaj gazetoj en Germanujo kaj Aŭstrujo kun la rezulto, ke multaj samsortanoj aŭtodidakte eklernis Esperanton tiele, ke kreskis konstante la membraro de EBLOGO, kies lasta adresaro eldonita en komenco de la jaro 1931 enhavis 150 adresojn de membroj. Tiam venis la bruna reĝimo! Ĉiam pli da anoj forlasis la organizaĵon, ĉu pro timo, ĉu pro ekonomiaj motivoj. Fine, en la jaro 1937, kiam jam ne ekzistis esperantista organizaĵo en Germanujo, ankaŭ EBLOGO devis ĉesigi sian agadon pro la malpermeso de Esperanto fare de la nacisocialistoj, sed ili ne sukcesis akiri la kapitalon de la organizaĵo, kiun oni uzis sufiĉe frutempe por eldoni ampleksajn numerojn de "La blinda esperantisto" por tiuj membroj, kiuj restis fidelaj al nia movado ĝis la lasta momento.

Grandbritujo

Nur dank' al la energia kaj aktiva propagando de W. P. Merrick, nia brava pioniro, disvastiĝis Esperanto inter la britaj blinduloj. Tamen, nur en la jaro 1935 estis fondita la "Brita asocio de blindaj esperantistoj" kun la mallongigo BABE. La unua estraro konsistis el W. P. Merrick, prezidanto, Lionel Anwell, sekretario, kaj Thomas Forster, kasisto. Dum la unua jaro jam aliĝis al la asocio preskaŭ 50 samideanoj. Eĉ dum la milito BABE ankoraŭ ekzistis kaj, dank' al la sindonemo de Percy Merrick la anoj ricevis de tempo al tempo ĉiujare raporton kaj sciigojn por kunligi ilin kaj malgraŭ la malfacilaj tempoj BABE disdonis informojn pri Esperanto kaj helpis al komencantoj. Nur en la lastaj militjaroj ankaŭ BABE devis ĉesigi sian agadon.

Hungarujo

Jam blinda esperantisto estas menciata el Hungarujo en la unuaj jarkolektoj de EL. Nur en la jaro 1920 tie estiĝis nia movado dank' al klopodoj de d-ro Bano Miklos [1890–1973], kiam li presigis en brajlo la koncizan, sed tre bonan Esperanto-gramatikon por hungarlingvanoj de Paŭlo Robicsek [1892–1931], redaktoro de la "Verda standardo". Aldone al la gramatiko aperis ankaŭ la ambaŭflankaj vortaretoj.

Tiutempe fondiĝis la federacio de hungaraj blinduloj kaj oni klopodis kolekti inteligentajn samsortanojn, kiujn oni sukcesis kapti ankaŭ por Esperanto. En la jaro 1922 preskaŭ kvindek blindaj samideanoj organiziĝis sub la nomo "Belhor", mallongigo por: "Blindaj esperantistoj loĝantaj en hungara reĝlando". Belhor fariĝis membro de la hungarlanda Esperanto-societo. Animo de la nova organizaĵo estis kaj restis la blindiĝinta inĝeniero d-ro Bano Miklos, kiu multe propagandis por la internacia lingvo inter la hungaraj nevidantoj ĉefe per tio, ke li faris al ili multajn servojn per Esperanto. Laŭbezone Belhor aranĝis kunvenojn kaj festojn ĉefe en la datreveno de la naskiĝo de d-ro Zamenhof. Tamen ĝia plej grava tasko estis starigi konsiderindan brajlan bibliotekon kun tre valoraj esperantaj verkoj presitaj kaj manskribitaj en la kadro de la hungarlanda biblioteko porblindula. La organizaĵo aranĝis kursojn pri nia lingvo por plenkreskaj blinduloj kaj dank' al ĝiaj klopodoj ankaŭ okazis Esperantokursoj por lernantoj en la blindulinstituto en Budapest.

Italujo

Jam en la unua numero de EL aperinta en la jaro 1904 troviĝas inter la patronoj de la gazeto la nomo Landriani en Firenze kiel unua itala blinda samideano, kio pruvas, ke jam frutempe naskiĝis nia movado inter la italaj blinduloj precipe, kiam la itala pioniro Armando Masciotta, notario, aktive laboris. El tiu ĝermo baldaŭ venis aliaj, inter ili d-ro [Vincenzo] Musella [1894–1973] kaj, en 1912, la tiama aro de blindaj esperantistoj nomis d-ron [Angelo Raffaele] Tancredi [1878–1955] sia reprezentanto. Ekde 1922 li partoprenis en multaj kongresoj, ĉiam kiel reprezentanto de la italaj blindaj samideanoj. En 1923 inĝ. Tancredi fondis, kune kun Masciotta kaj aliaj veteranoj, grupon de blindaj esperantistoj kun la celo progresigi la lingvon internacian inter la italaj nevidantoj. Tiu "grupo" esence konsistigis la kernon de tio, kio en 1933 fariĝos la "Itala asocio de blindaj esperantistoj" (IABE), sin inspirante al la statuto de UABE. Dum la faŝisma reĝimo IABE preskaŭ stagnis; tamen nia pioniro Tancredi restis konsulo de la italaj blindaj esperantistoj. Kiel tia, li propagandis Esperanton inter la italaj samsortanoj, kaj en 1930 li verkis kaj presigis en brajlo Radikaron, kiu ankoraŭ nun estas uzata. Ne estis facila la laborado de Tancredi en la faŝista lando, sed tio ne timigis lin. Kontraŭe, li fojfoje spitis la instancojn kaj ne ŝparis konsilojn kaj instigojn al tiuj, kiuj sin turnis al li. Alia tre fervora kunlaboranto antaŭmilita, menciinda precipe pro artikoloj blindulfakaj publikigitaj en EL, estis la tro frue forpasinta G. Valiani. Rilate instruadon en lernejoj, citinda estas tio, ke en la fruaj jaroj tridekaj Esperanto estis kelkan tempon instruita en la porblindula instituto en Torino de ties sekretario, G. Giani, vidanta aŭtoro de lernolibroj kaj vortaroj.

Japanujo

[La originala raporto anstataŭigita per la suba teksto de s-ino KIKUSIMA Kazuko: En 1906 la unua lernado de Esperanto estis farita de KUMAGAI Tetutarô [1883–1979], kiu memlernetis per la anglalingva enkonduk-libro, kiun en tiujara somero eksterlandano donacis al la ŝtata blindul-surdul-lernejo de Tôkyô [esp-e: Tokio]. Li tamen nur lernetis. Poste en 1918 en Ôsaka, kiam aktiva esperantisto invitis blindulojn al lernado li rekomencis lerni. Tiam ankaŭ IWAHASI Takeo [1898–1954] eklernis. Aparte de ili en Tokio en 1914 TORII Tokuzirô [1894–1970] lernis Esperanton de la rusa blinda gastlernanto Vasilij EROŜENKO, dum ambaŭ estis en la ŝtata Blindullernejo de Tôkyô. Tiuj tri graveguloj en la japana blindula mondo samtempe estis la tri gvidantoj de la Esperanto-movado inter japanaj blinduloj.

Jam en la jaro 1919 la blinda samideano KUMAGAI en la urbo Ôsaka fariĝis konsulo de EL por Japanujo. KUMAGAI en 1919 por blinduloj en Ôsaka organizis la prelegkursidon de EROŜENKO, ĵus reveninta de Sud-Azio. En tiu tempo aranĝiĝis Esperanto-kurso en multaj el kelkdekoj da blindullernejoj.

En 1923 enkadre de la 11a Japana Esperanto-Kongreso, de 31 aŭgusto ĝis 2 septembro en la urbo Okayama, blindaj esperantistoj havis la unuan fakkursidon. Poste ankaŭ en 1925 kaj 1927 ili havis fakkursidon. Kaj finfine en 1928, en la antaŭa vespero de la 16a Japana Esperanto-Kongreso 13 blinduloj kunsidis en la blindullernejo de la urbo Ôsaka. Tiel en 6 aprilo 1928 ili decidis la fondon de JABE (Japana Asocio de Blindaj Esperantistoj) kaj ĝian aliĝon al UABE. Tial JABE-membroj devis legi la gazeton "Esperanta Ligilo", kiu havigis al ili novaĵojn el Eŭropo. Oni elektis IWAHASI kiel prezidanton, kaj jam en septembro eldoniĝis la unua numero de la organo de JABE "Orienta Blindularo". Sed poste la blindula Esperanto-movado tute stagnis.]

Jugoslavio

En la jaro 1926 d-ro Dušan Maruzzi [1833–1956] instruis Esperanton en du jugoslavaj blindulinstitutoj kun bona sukceso. Fine de la jaro 1927 la jugoslavaj blindaj samideanoj fondis klubon sub la nomo "Nova lumo" kun la celo disvastigi la internacian lingvon inter jugoslavaj nevidantoj. Pli vigla ankoraŭ fariĝis nia movado en Jugoslavio, kiam direktoro Velkjo Ramadanoviĉ, unu el la konsilantaj anoj de UABO, ne nur enkondukis la instruadon de la internacia lingvo en la instituton por blinduloj en Zemun, sed ankaŭ presigis multajn valorajn kaj utilajn esperantajn librojn en brajla preso; tamen, tre bedaŭrinde, preskaŭ ĉiuj kliŝaĵoj estis detruitaj dum la dua mondmilito kaj direktoro Ramadanoviĉ mem fariĝis viktimo de la invadintaj ss-trupoj samkiel nia klera, inteligenta jugoslava samideano Simon Roth, kiu dum la lasta antaŭmilita blindulesperantista kongreso en Bern 1939 funkciis kiel

kongresa sekretario kaj kiu kompilis enhavtabelaron de EL ekde majo 1937 ĝis majo 1940 pri artikoloj pritraktantaj la blindulprizorgadon en preskaŭ ĉiuj landoj eŭropaj kaj neeŭropaj kun aldono de registro, pro kiu ni dankŝuldas kelkajn informojn uzatajn en ĉi tiu "Historio".

Nederlando

Nur post la unuaj jaroj de la reldono de EL oni sciigis ion pri la Esperanto-movado inter nederlandaj samsortanoj. Dank' al la vigla agado de W. J. A. P. Créman, nederlanda konsulo de EL, malgraŭ gravaj malfacilaĵoj la movado progresis. La blindulinstituto en Grave eldonis en brajla preso kvarvoluman lernolibron por Esperanto. En Grave, en la blindulinstitutoj "De Wijnberg" kaj "St. Henricus" oni instruis nian internacian lingvon al inaj kaj viraj lernantoj komence de la dudekaj jaroj. En la instituto en Bussum instruis multajn lernantojn la blindulinstruisto Roosdorp, kiu verkis mem bonegan Esperanto-lernolibron. Same en la instituto "Bartimeus" en Zeist la instruisto Laansma, la posta direktoro, instruadis ĝin. Rimarkinde estas, ke en Amsterdam iuj samsortanoj, inter ili la unua nederlanda konsulo Créman, ekstudis Esperanton pro bezono, ĉar ili intencis reorganizi la tiean lokan blindulligon kaj bezonis informojn el la eksterlando, kiujn ili efektive akiris per la internacia lingvo. En tiu tempo la nederlanda ekzamena komitato donis du diplomojn: "a" por komencantoj kaj "b" por instruantoj. Jam kelkaj blindaj samideanoj ricevis la unuan kaj laŭ nia scio du eĉ la duan diplomojn.

Tre aktiva kaj vigla fariĝis nia movado inter la nederlandaj samideanoj, kiam la ekblindiĝinta instruisto Raff Israëls [1887–1975] en la jaro 1926 eklernis Esperanton kaj laŭ peto de samideano Créman akceptis la konsulan oficon de EL. Li serĉis kontakton kun proksimume dekkvino da abonantoj de EL kaj en 1928 laŭ peto de Thilander li fondis la "Nederlandan societon de blindaj esperantistoj" (NOSOBE). La nomon proponis J. Kreitz, laŭ sciigo de Raff Israëls. Prezidanto de la organizaĵo fariĝis samideano Créman, kaj R. Israëls funkciis du jarojn kiel sekretario, sed en 1930 la laste nomita akceptis la prezidan oficon. Komenciĝis vigla propagando de NOSOBE inter la nederlandaj samsortanoj interalie kun la rezulto, ke la bibliotekoj en Amsterdam, Grave kaj Hago starigis esperantan fakon, tiel ke ili poste pruntedonis multajn esperantajn librojn alilanden kaj nun ankoraŭ la tutmonda blindulesperantistaro rikoltas la fruktojn semitajn de NOSOBE. Komence la intermembran kontakton prizorgis NOSOBE per malgranda interkontaktilo, kiun prezidanto Israëls verkis mem kaj aliaj ĝin multobligis permane. Nur multajn jarojn poste NOSOBE komencis eldoni la oficialan organon sub la titolo "La kontakto". Krome la organizaĵo eldonis en brajla preso trivoluman vortaron esperantan-nederlandan kaj dekvoluman vortaron nederlandan-esperantan. Por akiri la bezonatan monon NOSOBE starigis loterion, en kies vendado de lotoj vigle

partoprenis vidantaj samideanoj. Ĉiujare okazis plej ofte tuttaga jarkunveno, en kiu post pritraktado de organizaj aferoj eminenta samideano vidanta prelegis pri iu interesa temo, dum vespere okazis altnivela festa kunestado. En la daŭro de la jaroj agema prezidanto Israëls instruis perletere multajn el la membroj de Nosobe por "a" - kaj "b"diplomoj. Plej bone atestas la viglan kaj aktivan laboron de la organizaĵo, ke ĝi havis 107 membrojn jam antaŭ la milito, sed post la invado de la germana armeo en la jaro 1940 ankaŭ ĝi devis ĉesigi sian agadon tiom fruktodonan.

Norvegujo

Edvard Imsdahl, redaktoro de la gazeto "Norges blinde" kaj prezidanto de la norvega tutlanda blindulasocio, estis la unua samsortano, kiu jam frutempe propagandis Esperanton inter sialandaj nevidantoj kaj eldonis la unuan Esperanto-lernolibron en brajla preso. Tamen, nur en la jaro 1934, kiam dekduo da blindaj esperantistoj norvegaj partoprenis la 13-an internacian blindulesperantistan kongreson en Stokholmo, ili fondis la "Norvegan asocion de esperantistoj" kun la mallongigo NABE. Ĉar la ampleksa kongresprogramo okupis la tutan tempon dumtage, niaj norvegaj samideanoj aranĝis noktan kunvenon dum la unua horo de la 10-a de aŭgusto. Aprobinte la statutproponon de Didrik Didriksen, ili elektis estraron konsistantan el redaktoro Edvard Imsdahl, prezidanto; Kristian Haugness, sekretario; Alf Arnesen, kasisto kaj la anstataŭantoj. Oni decidis interalie, ke la Esperanto-sekcio de la norvega ĉiusemajna gazeto "Norges Blinde" aperu kvaronjare kiel organo de NABE. NABE eldonis interalie kelkajn valorajn literaturajn librojn en brajla preso kaj vigle laboris la nova organizaĵo por la disvastigo de la internacia lingvo inter la norvegaj samsortanoj ĝis la tempo, kiam la germana armeo invadis kaj okupis la paceman landon.

Svedujo

Kvankam jam en la jaro 1907 la svedaj samideanoj nevidantaj fondis la unuan blindulesperantistan societeton en la mondo, kiu tamen dum la unua mondmilito ĉesigis sian agadon, nur en la jaro 1923 Harald Thilander ree fondis la "Svedan socion de blindaj esperantistoj" kun la mallongigo SABE. Dum multaj jaroj la fondinto estis la unua prezidanto; same multajn jarojn Verner Ljunggren funkciis kiel unua sekretario kaj Hilding Olsson kiel kasisto. La "Avizoj de SABE" laŭbezone aperis nur por publikigi jarraportojn kun informoj pri estrarelektoj ktp. La ĉefan propagandon inter la svedaj blinduloj faris Thilander mem per eldono de lernolibroj, multvolumaj vortaroj, lego- kaj ekzercaj libroj kaj ne laste per sia persona influo.

11 La "Universala Asocio de Blindaj Esperantistoj" (UABE)

En la jaro 1920 Julius Hasselbach en Berlino kaj Ignaz Krieger en Vieno proponis en EL la fondon de internacia organizaĵo de blindaj esperantistoj. La unua blindulesperantista kongreso, okazinta en Praha komence de aŭgusto en 1921, sin okupis detale pri la propono skribe sendita de Julius Hasselbach kaj starigis kvinmembran komitaton konsistantan el gesamideanoj: Ignaz Krieger, Aŭstrujo; Marie Švecková, Ĉeĥoslovakio; Eugène Barrier, Francujo; Adolf Selten, Germanujo kaj Eric Olsson, Svedujo kun la celo ellabori statutproponon por la kreota universala blindulorganizaĵo esperantista. En speciala kunsido sub la prezido de Adolf Selten la komitatanoj interkonsentis transdoni la statutproponon por decido al la dua blindulesperantista kongreso en Helsinki; tamen la kongreso ne akceptis ĝin post detala pridiskutado kaj rekomendis unue fondi naciajn societojn blindulesperantistajn.

La belga tiflofilo Victor Hendriĉ kune kun Joseph Kreitz, Germanujo, denove pristudis la tutan materialon kune kun bona statutpropono verkita de la rumana samideano Prezenti Levy por la Pariza kongreso ne okazinta en 1914, el kiuj ili kompilis novan, ne tro detalan statutproponon prezentitan per J. Kreitz al la "tria" en Nürnberg por akcepto.

La 3-an de aŭgusto 1923 je la tria horo posttagmeze en la unua laborkunsido de la tria internacia kongreso de blindaj esperantistoj okazinta en la kadro de la 15-a universala kongreso de Esperanto en ĉeesto de 82 kongresanoj oficiale kaj solene okazis la fondiĝo de la unua organizaĵo de nevidantaj esperantistoj sub la nomo "Universala Asocio de Blindaj Esperantistoj" mallongigite UABE, post kiam la statuto estis pridiskutita kaj akceptita paragrafo post paragrafo. Estis ĝojiga fakto kaj samtempe notinda sukceso, ke la "tria" solvis definitive tiun ĉi gravegan problemon. Fortaplaŭde oni nomis profesoron Th. Cart honora prezidanto de UABE.

Jena provizora komitato estis elektita: prezidanto: Joseph Kreitz, Kreuzau (Germanujo), vicprezidantino: Hermine Gotthardt, Braunschweig (Germanujo); ĉefsekretario: Ints Ĉaĉe, Riga (Latvio); helpsekretariino: Anna Friman, Helsinki (Finnlando); kasisto: W. P. Merrick, Shepperton (Anglujo); redaktoro: d-ro Bano Miklos, Budapeŝt (Hungarujo) kaj konsilanta komitatano: prof. Stanislav Stejskal, Praha (Ĉeĥoslovakio). Tri el la komitatanoj: Ĉaĉe, Gotthardt kaj Stejskal estis normalvidaj.

Estis la deziro de la provizora komitato, ke UABE havu vere demokratian bazon. Tial ĉiuj legantoj de EL rajtis proponi kandidatojn por la nova definitiva estraro. Konsiderante averton, oni petis proponi laŭeble prezidanton en lando nemilitinta. La legantoj de EL havis trimonatan voĉdonan tempon, por ke ankaŭ povu voĉdoni neeŭropaj samideanoj. Kun permeso de Harald Thilander EL fariĝis la oficiala organo de UABE. Ĉiuj legantoj ricevis senpage ne nur la akceptitan statuton, sed ankaŭ aliĝilon subskribotan kun plena adreso por fariĝi membro de UABE. Estas historie interese sciigi, al kiuj landoj apartenis la unuaj membroj, pro kio ni jen publikigis la unuan liston aperintan en EL

Aliĝis al UABE ĝis la 1-a de majo en la jaro 1924 el:

Afriko 1 (en Alĝerio);

Ameriko: 4 (en Argentino 2, Ĉilio 1 kaj Meksiko 1);

Eŭropo: Anglujo 13, Aŭstrujo 9, Belgujo 5, Bulgarujo 2, Ĉeĥoslovakio 15, Danujo 3,

Finnlando: ordinaraj membroj 10; grupaj 16; Francujo 5, Germanujo 43, Hispanujo

13, Hungarujo 34, Italujo 3, Jugoslavio 10, Nederlando 1, Norvegujo 4, Polujo 4,

Rumanujo 1, Skotlando 1, Sovjetunio 1 kaj Svedujo 19. Sume 217.

Ĉiu aliĝinta membro, kiu pagis la fiksitajn jarkotizon de unu svisa franko por bonvalutaj landoj kaj malpli por malbonvalutaj landoj laŭ interkonsento de la naciaj delegitoj, ricevis bele presitan membrokarton, kiu sur la unua paĝo montris, krom bele gravurita stelo, latinlitere (reliefe) la vortojn UABE (ambaŭflanke de la stelo) kaj membrokarto (sub ĝi). Sube, en brajlo, oni legas: membrokarto de Universala Asocio de Blindaj Esperantistoj (UABE).

La dua duono de la karto kun la latinlitere presita vorto "membrokarto" estas libera por brajle skribi sur ĝin la membronumeron kaj la plenan adreson de la havanto. Ĝi povis servi kiel propagandilo kaj por varbi vidantajn subtenantojn por UABE kaj ĝenerale por nia internacia lingvo inter blinduloj. Multaj el la membroj de UABE portis la Esperanto-insignon kun la vortoj "Universala Asocio de Blindaj Esperantistoj" en malgrandaj oraj literoj ĉirkaŭ la rando. La insignoj estis tre belaj por la okuloj – verda stelo kun oraj randoj – kaj faritaj laŭ tri modeloj: por uzi kiel broĉo, por porti en butontruo aŭ fiksi sur horloĝa ĉeno aŭ simile.

Sekvos nun detala rezulto de la balotado pri definitiva komitato de UABE. La voĉdonado komenciĝis la 1-an de aprilo kaj finiĝis la 30-an de junio en 1924 kun jena rezulto: prof. Stejskal, la konfidato de UABE, ricevis 224 voĉdonilojn el 26 ŝtatoj, t.e.: el Anglujo 6, Argentino 3, Aŭstralio 1, Aŭstrujo 10, Belgujo 4, Brazilo 1, Bulgarujo 4, Ĉeĥoslovakio 15, Ĉilio 1, Danujo 3, Finnlando 19, Francujo 5,

Germanujo 40, Hispanujo 9, Hungarujo 24, Italujo 2, Japanujo 2, Jugoslavio 2, Latvio 15, Nederlando 1, Norvegujo 2, Polujo 3, Rumanujo 1, Sovjetunio 37, Svedujo 12 kaj Usono 2.

Pri la kandidatoj estis decidite jene: Unua prezidanto: Joseph Kreitz ricevis 205 voĉojn; Paul Rémy 11; Harald Thilander 4; Karel Emanuel Macan 2, Eugène Barrier 1, unu voĉdonilo malplena. Elektita do: Joseph Kreitz.

Dua prezidanto: Paul Rémy ricevis 142; Victor Hendriĉ 33; Adolf Selten 16; Luis de Almeida 19; Joseph Kreitz 6; Harald Thilander 2; W. P. Merrick 2; Hermine Gotthardt, Edvard Imsdahl, K. E. Macan kaj Sigismundo Taladriz po unu; elektita do: Paul Rémy.

Unua sekretario: Victor Hendriĉ 159; Ints Ĉaĉe 58; prof. Stanislav Stejskal 2; kolonelo Franz Zwach 2; Anna Friman, Paul Rémy kaj Verner Ljunggren po unu; elektita do: Victor Hendriĉ.

Dua sekretario: Anna Friman 177; Anastasia Bartuškova 33; Jakobo Bellfort 7; Agnes Melchior 2; Ints Ĉaĉe 2; d-ro Bano Miklos 1; Adolf Selten 1; unu voĉdonilo malplena. Elektita do: Anna Friman.

Kasisto: W. P. Merrick 215; Verner Ljunggren 3; Alma Block, Anna Friman, Lundberg, Taladriz kaj Thilander po unu; unu voĉdonilo malplena. Elektita do: W. P. Merrick.

Redaktoro: Harald Thilander 206; d-ro Bano Miklos 14; Ĉaĉe, Hendriĉ kaj Merrick po unu; unu voĉdonilo malplena. Elektita do: Harald Thilander.

Konsilanta komitatano: prof. St. Stejskal 214; Barrier 2; Bano, Merrick, Krieger kaj Macan po unu; kvar voĉdoniloj malplenaj. Elektita do: prof. Stanislav Stejskal.

Kandidatoj por nedifinitaj funkcioj: Macan 5; Barrier 3; Stachowick 4; Taladriz 2; Sepúlveda 1; Stejskal 1.

Okaze de la kvara internacia blindulesperantista kongreso en Vieno en 1924 UABE aranĝis sian unuan ĝeneralan kunvenon la 9-an de aŭgusto. Per kelkaj enkondukaj vortoj prezidanto J. Kreitz rememorigis pri la utileco de Esperanto por la blinduloj, sed ke io mankis al ni ĝis antaŭ unu jaro, nome organizaĵo, kiu unuigu ĉiujn nevidantajn samideanojn en unu granda rondo familia. Li bedaŭris la neĉeston de prof. Cart, la honora prezidanto de UABE. El la jarraporto legita de Joseph Kreitz ni

citu unue la fakton, ke la intereso por la asocio estas vigla kaj granda preskaŭ en ĉiuj rondoj de la nevidantaj samideanoj tiele, ke UABE jam havas 300 membrojn en 26 landoj, inter ili ankaŭ estas kelkaj subtenantaj, helpantaj kaj amikaj anoj.

Sekvis detalaĵoj pri la laboro de la provizora estraro post la "tria" en Nürnberg kaj la rezulto de la balotado pri la unua definitiva estraro de UABE. Oni provis ĉie vekti interesiĝon pri la nova organizaĵo ne nur en blindulaj rondoj, sed ankaŭ en medioj de vidantaj gesamideanoj kaj ĉe neesperantistaj blindulorganizaĵoj tiel sukcesinte, ke ekzemple la dana blindulasocio "Foreningen dansk blindesamfund" laŭ peto de la UABE-delegito Agnes Melchior konsentis subteni nian organizaĵon per cent danaj kronoj kiel unua neesperantista blindulorganizaĵo. La kunveno aprobis la unuan jarraporton kun ĉiuj voĉoj. En la diskutado pri ĝi la prezidanto klarigis, ke preferinde estas por ĉiuj samsortanoj senpere kaj individue aliĝi al UABE, sed membroj de naciaj societoj grupe aliĝintaj ne bezonas aliĝi individue.

Poste J. Kreitz transiras al la temo: kion celas kaj volas UABE? Post kiam li skizis la evoluon de la blindula movado, li konkludis, ke mankas unuece laboranta internacia blindul-organizaĵo konsistanta el la naciaj organizaĵoj por tiel ekzistigi internacian blindulan parlamenton. Tiuokaze nia asocio sin jam ne nomus "Universala asocio de blindaj esperantistoj", sed "Universala blindul-asocio". Tio estu la unua celo de UABE. Tamen, por atingi ĝin, antaŭ ĉio ni klopodu atingi la duan celon: disvastigi Esperanton kiel unuigilon inter la blindularo, kaj la tria celo estu helpo al ĉiuj blinduloj, ĉu studentoj, ĉu muzikistoj, ĉu metiistoj per eldono de praktikaj libroj, per interveno ĉe naciaj instancoj ktp.

Laŭ propono de la estraro la ĝeneralkunveno nomis s-ron A. J. Adams el Hastings, Anglujo, honora membro de UABE pro liaj multegaj kaj grandegaj servoj faritaj al la blinda esperantistaro.

La plej grava decido de la ĝeneralkunveno sendube estis la eldono de nigre presota organo de UABE, kiu aperu kvaronjare sub la titolo "Ligilo por vidantoj" laŭ propono de d-ro Bano Miklos. Multaj pli-malpli gravaj proponoj estis pridiskutitaj dum tiu unua ĝeneralkunveno de UABE.

En la monato aprilo de la jaro 1925 aperis la unua numero de "Ligilo por vidantoj", la organo de UABE en nigra preso. Ĝin redaktis d-ro Bano Miklos, la redaktoro de la provizora estraro. Kredeble estas interese sciiĝi pri la enhavo de la unua numero, do jene: "Saluto", poemo de Piroska Tabori; "Ŝuldon ni pagas!", redakcia artikolo de d-ro Bano (laŭ paragrafo 10 de UABE-statuto). "La estraro de Universala Asocio de blindaj esperantistoj: UABE"; "Epizodoj dum la "kvara", de Uatamo Bomobe;

”La mortanta flamo”, poemo de Eduard Jercke; ”Printempo venis”, poemeto de Varma Järvenpää; ”Lasta rozo”, poemeto de Rosine Bauer; ”Mi estas junulo”, poemo de Edvard Imsdahl; ”Muziko en la Sunshine House”, de H. C. Warrilow (tradukis Harald Thilander); ”Kelkaj notoj pri la blinduledukado en Japanujo”, de TORII Tokuzirô [1894–1970]; ”Bela danko al sankta Johano”, de Hélène Giroud; ”Naciaj Esperanto-konsuloj”.

Dum la kunsido de UABE okaze de la ”sesa” en Danzig 1927 prezidanto J. Kreitz ege bedaŭris la fakton, ke la organizaĵo ne progresis kontentige ĉefe pro tio, ke nun deklaris kelkaj estraranoj ne disponi pri sufiĉe da tempo por oferi ĝin senpage. Denove la prezidanto sugestis formi el UABE vere internacian organizaĵon, al kiu aliĝu ĉiuj naciaj blindulaj kaj porblindulaj asocioj kaj W. P. Merrick proponis ŝanĝojn de la statuto, kiun oni ne diskutadis en la kongreso, sed publikigos en EL, por ke ĉiuj legantoj povu pridiskuti ĝin objektive.

La tria ĝeneralkunveno de UABE, okazinta dum la ”sepa” en Antverpeno en la jaro 1928, akceptis tri rezoluciojn prezentotajn al la kompetentaj instancoj de la blindula movado. La unua rezolucio pritraktis peton al ĉiuj blindulejoj, ke Esperanto fariĝu instrua fako komence ne deviga, poste deviga. La dua rezolucio konsideris konsilinde, ke almenaŭ unu el la estraranoj de la grandaj naciaj blindulasocioj lernu la internacian lingvon por povi persone intertrakti kun la organizaĵoj de la blindulesperantista movado. Plie oni rekomendis al ĉiuj naciaj blindulorganizaĵoj, ke ili aranĝu esperantan kurson en la asocia gazeto. Fine la tria rezolucio sin direktis al la ”Asocio de blindaj studentoj” en Ĝenevo kun la peto krom la angla, franca kaj germana lingvoj ankaŭ uzi la internacian lingvon dum la projektita kongreso de ĉiuj fakuloj pri la blindulafero. UABE konsentis kunlabori kun la ”Asocio de blindaj studentoj”. Kompreneble ne estas eble publikigi la kompletajn tekstojn de la rezolucioj.

Ne estas facila tasko raporti pri la agado de UABE post la kongreso en Antverpeno, ĉar oni ne povas citi gravajn sukcesojn. Estis granda eraro, ke la anoj de UABE reelektis la saman estraron kiel antaŭ tri jaroj, ĉar kelkaj personoj sciis jam antaŭ, ke ili ne kapablas plenumi la oficaĵajn devojn ĉefe pro manko de tempo. Jam dum la ”sepa” la unua sekretario Victor Hendriĉ deklaris, ke li ne povas dediĉi sin sufiĉe al UABE. Dum tutaj monatoj li faris nenion pozitivan, ĝis li deklaris sian ekziĝon komence de la jaro 1929. Post lia ekziĝo nia pioniro Harald Thilander administris la sekretarian oficon ĝis la ”oka” en Budapeŝto. Tuj oni povis konstati ekeston de nova vivo en la asocio. Li verkis ekzemple proponon de nova statuto por UABE. Laŭ tiu ĉi statuto ĉiu nacia blindula kaj porblindulaunuiĝo povas aliĝi al la federacio kiel asocia ano. Tamen, la statutpropono ne estis aprobita de la ĝeneralkunveno de

UABE okazinta en Budapest. La ĉefa kaŭzo de la malaprobo estis tiu, ke UABE sin nomu "Federacio internacia de blindulunuigoj" kun la nommallongigo "FIBU". Oni opiniis, ke la nomŝanĝo signifus neniigon de UABE kaj ke granda parto de la propaganda laboro jam farita estus vanigita per tio. Ne estas facile detale raporti pri la kunveno pro la subita morto de la protokolinto de la kongreso en Budapest, prof. Stejskal, kies eĉ stenogramon kaj ĉiujn skribaĵojn nigrajn kaj brajlajn oni devis forbruli, ĉar li mortis kaŭze de infekta malsano. Bonvolu do kontentiĝi je kelkaj notoj senditaj de la dua protokolinto, samideano Maetzl.

Prezidanto Kreitz malfermis la kvaran ĝeneralkunvenon de UABE en Budapest la 7-an de aŭgusto matene je la naŭa horo raportante pri la pasintjara kunsido en Antverpeno. Post alparolo de Harald Thilander la prezidanto memorigis pri la 25-jara jubileo de la unua apero de "Esperanta Ligilo" en la jaro 1904 dank' al la klopodoj de la nobla kaj varmkora blindulamiko prof. Th. Cart, kiu ankaŭ redaktis ĝin ĝis la jaro 1912, kiam li metis la redaktadon en la manojn de nia pioniro Harald Thilander. Ambaŭ meritas nian dankon!

Sekvis propono pri ŝanĝo de la statuto de UABE, sed oni konsilis ne ŝanĝi la nomon de UABE al FIBU. Fine oni decidis, ke la estraro mem elektu komitaton, kiu prilaboru la statuton. Estis ankoraŭ pritrakitaj kelkaj problemoj postulantaj solvon, sed ni forlasu la lastan kunvenon de UABE por observi, kio okazis post la kongreso en Budapest rilate la organizaĵon.

Laŭ decido de la ĝeneralkunveno, la estraro de UABE elektu komitaton kun la celo prilabori la statuton kaj studi nomŝanĝon de la organizaĵo. La komitato sub prezido de Harald Thilander konsistis el la germanaj samideanoj Julius Hasselbach kaj Karl Halfmann. Ĝi prezentis sian proponon en Esperanta Ligilo dum julio 1930. En decembro samjare aperis en EL ankoraŭ kelkaj ŝanĝopropoj, kaj kun la januara numero de EL de 1931 voĉdoniloj por la ĝenerala voĉdonado estis alsenditaj al la legantoj de la gazeto. La kalkulado de la voĉdoniloj ĉe la limtempo (junio 1931) rezultigis, ke la nomŝanĝo de UABE al UABO, nommallongigo por "Universala asocio de blindulorganizaĵoj", kaj la revizita statuto estis akceptitaj per 122 voĉoj kontraŭ 9. Per tiu ĉi decido de la membraro la asocio eniris novan epokon de sia evoluado, epokon de praktika laboro.

Pro la menciita ŝanĝo de statuto la organizaĵo ne plu havas individuajn membrojn, sed estas federacio de naciaj blindulorganizaĵoj, kaj je la fino de la jaro 1931 la nombro de membro-organizaĵoj de UABO estis dekdu, inter ili nur unu neesperantista, la "Pola unuiĝo de militblinduloj".

Kvankam la du lastaj jaroj en la vivo de UABE estis dediĉitaj al organizaj aferoj, tamen la organizaĵo dediĉis grandan parton de sia energio al la klopodado disvastigi nian internacian lingvon, kiu ja estas la ĉefa, nepre havenda ilo por nia tuta agado. En aprilo 1931 okazis en New York la ”mondkongreso pri blinduloj” (World Conference of the Blind), kiun partoprenis laborantoj por la blindulafero el 37 landoj. Laŭ la nombro de la reprezentitaj nacioj la kongreso estis certe la plej granda en sia speco ĝis nun kunvokita, kaj laŭ la sama vidpunkto ankaŭ la plej internacia. Tamen la kongresa lingvo estis nur la angla. Kelkaj blindaj esperantistoj partoprenis, kaj du referatoj pri Esperanto estis preparitaj, sed ili estis malakceptitaj pro tio, ke la kongresprogramo – jam kelkajn monatojn antaŭ la kongreso – estis tro plena. La kasisto de UABE, W.P.Merrick, havis interparoladon kun la sekretario de la programa komitato, W. C. G. Eagar, kiu kompleze promesis fari sian eblon por ke mallonga raporto pri Esperanto en servo de la blindulafero estu iel prezentata al la kongreso. La tuta skribaĵo, ampleksanta nur ok brajlajn paĝojn en formato de EL, estis disdonita inter la blindaj kongresanoj, dum la societo de vidantaj esperantistoj de New York disdonis inter la vidantaj kongresanoj fortan alvokon, en kiu oni petis, ke la internacia lingvo estu uzata en internaciaj kongresoj de blinduloj. Jen la teksto de la raporto verkita de W. P. Merrick aŭ pli bone la peto al la kongreso:

”Al la World Conference of the Blind, New York, en aprilo 1931.

La komitato, delegitoj kaj membroj de la asocio de blindaj esperantistoj serioze petas la kongreson konsideri la gravecon de Esperanto kiel helplingvo por blinduloj, kaj konsiderante multajn faktojn, el kiuj kelkaj estas tie ĉi notitaj, bonvolu rekomendi, ke Esperanto estu ĝenerale instruata en la lernejoj por la blinduloj tra la tuta mondo”.

W. P. Merrick skizis en admirindaj frazoj ”utilecon” de Esperanto al la blinduloj sub jenaj rubrikoj: ”Esperanto kiel helplingvo por la blinduloj”, ”Esperanto en lernejoj”, ”la Esperantogazeto kaj la publikigaĵoj”, ”Esperanto jam instruata en lernejoj por blinduloj), ”naciaj societoj de blindaj esperantistoj” kaj ”la socia valoro de Esperanto”.

Kelkaj el la ĉeestantaj blindaj esperantistoj pledis en paroladoj por Esperanto kaj la rezulto de la vastskala agado de UABE en la kongreso. Oni ne akceptis rezolucion; tamen multaj en New York aŭdis la unuan fojon pri Esperanto por la blinduloj.

Plie la sekretarioj de UABE sendis en aŭgusto de la sama jaro cirkuleron al la tutnaciaj blinduluniĝoj en la tuta mondo. La cirkulero, kiu estis ankaŭ enpresita en traduko en kelkajn naciajn gazetojn, finiĝis per peto, ke la blinduluniĝoj

intervenu ĉe la internacia konsilantaro por la blinduloj kaj la internacia oficejo por blindulafera kunlaborado, deciditaj de la blindulkongreso en New York, alprenu kaj uzu Esperanton kiel sian laŭstatute oficialan lingvon; ke la menciitaj institucioj prenu por unu el siaj taskoj la agadon por disvastigi scipovon de Esperanto inter la blinduloj; ke la blindulorganizaĵoj ĝenerale uzu Esperanton por ĉiuj interrilatoj kun samsortanoj en aliaj landoj kaj ke Esperanto estu oficiale instruata en la blindullernejoj de la koncerna lando.

La cirkulero estis ĝenerale akceptita kun granda simpatio, pruvo, ke la antaŭjuĝo komencis cedi al scio, klareco kaj praktika adaptiĝemo. Kune kun la dek blindul-esperantistaj societoj aliĝintaj al UABE dek naciaj blindulorganizaĵoj akceptis kaj bonorde subskribis la deziresprimojn menciitajn en la cirkulero.

Dum la jaroj 1930-31 la internacia lingvo estis instruata [en tri finnlandaj], ok germanaj, kvar nederlandaj, kvar polaj, tri Ĉeĥoslovakaj, tri jugoslavaj, du italaj, unu franca, unu norvega, kelkaj rusaj kaj kelkaj japanaj blindullernejoj. Same okazis Esperanto-kursoj en Anglujo, Danujo kaj Svedujo, sed mankas nombroj.

Laŭ komisiono de UABE estis eldonitaj en brajla preso ĝis la fino de 1931 jenaj verkoj:

Brajla muziknotacio, tri kajeroj. Esperanta stenografio, tri kajeroj. Ĝenerala adresaro de blindaj esperantistoj, du kajeroj. Flagoj de la nacioj, du kajeroj. Naciaj literoj, kvin kajeroj. Tuŝbildoj, unu kajero.

Plie aperis 11 kajeroj de la "Internacia brajla biblioteko" en la presejo de UABE. Ĉi tiujn kajerojn kompilis rektoro Sam Jansson en Stockholm.

Funkciis tridek delegitoj de UABE en 25 nacioj.

La komitato de UABE elektita en la jaro 1931, kiu poste ankaŭ deĵoris kiel komitato de UABO, konsistis el jenaj samideanoj:

Joseph Kreitz, unua prezidanto, Germanujo

Albert Masselier, dua prezidanto, Francujo

Harald Thilander, unua sekretario, Svedujo

Raff Israëls, dua sekretario, Nederlando

W. P. Merrick, kasisto, Anglujo

Direktoro Velko Ramadanoviĉ, unua konsilanto, Jugoslavio

D-ro Bano Miklos, dua konsilanto, Hungarujo.

Ĝis la jaro 1931 aperis dekdu numeroj de la gazeto "Ligilo por vidantoj" ĝenerale en mil ekzempleroj. [En la Aŭstria Nacia Biblioteko troviĝas ĝis la nro 17-18 por 1935.

Sed onidire ĝi aperadis ankoraŭ en 1936, aŭ ĝis la n-ro 20.] [El la arkivaĵoj de "Die Österreichische Nationalbibliothek" (la Aŭstria Nacia Biblioteko), en Vieno, s-ino KIKUSIMA Kazuko faris la enhavtabelon de la "Ligilo por Vidantoj". La mankantan parton, "aparta aldonaĵo de n-ro 13", ŝi trovis en la kolekto de s-ro MINE Yositaka.

La gazetoj estis bele ilustritaj per multaj fotoj. Ĝi ja celis gajni interkomprenemon pri la stato de blinduloj.

"LIGILO POR VIDANTOJ"

OFICIALA INFORMILO DE UNIVERSALA ASOCIO DE BLINDAJ
ESPERANTISTOJ: UABE

LISTO de ENHAVO

NUMERO 1. JARO 1925. (p.1–16 /16pp)

- (p.1) SALUTO – Poemo de Piroska Tábori
p.2–4 ŜULDON NI PAGAS!
p.4 LAŬ §10. DE UABE-STATUTOJ
p.4 ESTRARO DE UNIVERSALA ASOCIO DE BLINDAJ
ESPERANTISTOJ: UABE
p.5–7 EPIZODOJ DUM LA "KVARA"*
* Kvara blindulkongreso, Vieno, 1924.
p.8 LA NEMORTANTA FLAMO [poemo] de Eduard Jercke (Leganto de EL.)
p.8 LASTA ROZO [poemo] de Rosine Bauer
p.9 PRINTEMPO VENIS [poemo] de Varma Järvenpää
p.9 MI ESTAS JUNULO! [poemo] de Edvard Imsdahl.
p.10 MUZIKO EN LA SUNSHINE HOUSE. de H. C. Warrilow
p.-- POŝTA KARTO (por peti sendon de LIGILO POR VIDANTOJ)
p.-- ALIĜILO (dorsa flanko de la poŝtkarto)
P.11–12 KELKAJ NOTOJ PRI LA BLINDULEDUKADO EN JAPANUJO de
Tokuĝiro Torii
p.13–15 BELA DANKO AL SANKTA JOHANO de Helene Giroud
p.16 NACIAJ ESPERANTO-KONSULOJ POR LA BLINDULOJ:

NUMERO 2–3. JARO 1925. (p.17–40 /24pp)

- p.17 SAVU MIN, LABORO!... [poemo] de Ella Korb.
p.18 ŜANĜITAJ ADRESOJ DE NACIAJ ESPERANTO-KONSULOJ POR LA
BLINDULOJ

- p.19–20 KORAN SALUTON AL ĈIUJ NIAJ VIDANTAJ AMIKOJ
 p.20 ??? de Pietsch Melania.
 p.21–22 INSTRUADO PRI MASTRUMAJ LABOROJ, GRAVA KONSISTAĴO DE
 L'EDUKADO DE BLINDAJ KNABINOJ de Dro. G. EK
 p.23–24 BLINDAJ DOMESTRINOJ HAVU LA PAROLON de Eugenia
 Strömberg.
 p.25–27 PRAKTIKA EDUKADO DE LA BLINDULINOJ de M. Schaffer (El
 "Die Frauenwelt", tradukis A. B.)
 p.28–34 INFERO KAJ PARADIZO Skizo de John Bergh
 p.34 EDZINIĜO DE JAPANAJ BLINDULINOJ de T. I.
 p.35 LA BLINDA PATRINO de Mizzi Herejk (Wien.)
 p.35–36 LA BLINDA BRODISTO
 p.36 TEKSITAJ KANTOJ
 p.37–38 RAPORTO PRI LA KVARA INTERNACIA KONGRESO DE
 BLINDULOJ-ESPERANTISTOJ
 p.39 LA DISPUTO [poemo] de Ignaz Krieger.
 p.39 Dolça Puno [poemo] de Eduard Jercke.
 p.39 Al vi, ho Suno! [poemo] de Varma Järvenpää
 p.40 [reklamoj de: UEA; Heroldo de Esperanto; Literatura Mondo; UABE]

NUMERO 4–5. JARO 1926. (p.41–52 /12pp+2pp da fotoj)

- (p.41–, –46–, –52) KARAJ ESTIMATAJ LEGANTOJ! de H. Thilander.
 p.42–43 Blindula laborado en la "Kleinbauwerk" de la Siemens – Schuckertwerke.
 de direktoro Paul Perls. (El la germana lingvo tradukis D-ro Karl Menke,
 Braunschweig.)
 P.-- [2pp da fotoj] BLINDULA LABORO EN LA GRANDINDUSTRIO
 p.43–44 Aldoneto al historio de blindulmovado en Rusujo. de (Mi).
 p.44–45 "Urbeto de Blinduloj" en Leningrad. de V. ANFINOGENOV. (El la rusa
 brajlgazeto "Vivo de la blinduloj" tradukis N. Feodorov.)
 p.45 La Ĥoristo. [poemo] de F.E. Weatherly, Edith Morison.
 p.45 Testamenta donaco por EL de Ida Öhman.
 p.45–46 Laŭlegenda deveno de fama reĝa diamanto de Hélène Giroud.
 p.46 La blinduloj en Serbujo.
 p.47 Sanjeto. [poemo] (Trad. W. G. Hanbury)
 p.47–48 Duonblinduloj kiel terlaboristoj. de Eld.
 p.48–49 Raporto pri la Ĝardenkultura Lernejo por Blinduloj en Temesvar. de
 Ferdinando Keller.
 p.50–52 La Danĝero – Novelo de Oskar Baum. (El la germana lingvo
 esperantigita de Franz Döring.)

NUMERO 6. JARO 1926. (p.53–63 /11pp+8pp da punktaj desegnaĵoj=19pp)

- (p.53) Redakciaj Notoj.
(p.53) Internacia Radio-Revuo.
(p.53)-54 Por "Esperanta Ligilo." de W. Percy Merrick.
p.54 Blindula Biblioteko. de W. Percy Merrick.
p.54-55 Edinburgh kaj nia Kvina.
p.55-56 "NIA KVINA" EN EDINBURGO. – Raporto De La Prezidanto.
p.56-, -61-63 Desegnado por Blinduloj. de Wilhelm Reiner, H. Thilander.
p.-- (8pp post p.56) [punktaj desegnaĵoj]
p.57 [foto] Paul H. Perls
p.57 Blindaj Laboristoj en Servo de la Ford Motor Company, Detroit, Michigan, U.S.A.
p.58 Blindaj Laboristoj en la Fabrikejoj de la Ford Motor Company [fotoj]
p.59 Ĉu Blindeco estas Korpa Malhelpo? (El la German lingvo tradukis D-ro Karl Menke)
p.60 Laboristoj en Siemens-Schuckertwerke. [fotoj]
p.63 Ĉe la Jarfino. [poemo] de Eduard Jercke
p.63 El "Hizakurige" de Ipena Ikku (1) Tradukis T. Iŭahaŝi
p.63 Dankesprimio.

NUMERO 7. JARO 1927. (p.65–76 /12pp+2pp da punktaj desegnaĵoj=14pp)

- p.65 GRAVA AVIZO (de W. Percy Merrick)
p.65 Morto de Karin Thilander de Harald Thilander.
p.66 Jubileo de Harald Thilander. – Kvindeka Naskiĝtago, la 25-an de Oktobro, 1927.
p.66 Jubilea Tago de Harald Thilander. – 27-an de Oktobro, 1927. [poemo] de Varma Järvenpää.
p.67 Blindulo portas "La Naturan Floron."
p.67 Renkontiĝo. [poemo] de Ĝuvi Lovoatan (Represita kun afabla permeso de "Kataluna Esperantisto")
p.67 La Funebro [poemo] de Varma Järvenpää
p.67 Karin Thilander. [poemo] de Anna Friman.
p.68 "NIA SESA."
p.68 Du Herooj Red. de "L.V."
p.68 Blinda Sonorilara Ludanto.
p.68 Ŝanĝo de Adreso.
p.69 TAKEO IŬAHAŜI
p.69 La Domo de "Esperanta Ligilo"
p.70–72 Aŭtobiografia Letero de Harald Thilander. Majorsgatan 12, Stockholm, la 3/9/1920.

- p. -- (2pp da puntaj desegnaĵoj post p.70)
- p.72–74 Pri la Vivo de Karin Thilander. – El letero de Harald Thilander al Agnes Melchior, Aŭgusto la 28-an, 1927.
- p.74 Internacia Brajla Biblioteko.
- p.75–76 Kiel Estiĝas Numero de "Esperanta Ligilo." de Harald Thilander.

NUMERO 8. JARO 1928. (p.77–84 /8pp)

- p.77 GEEDZIĜO [de Harald kaj Varma Thilander] de W.Percy Merrick
- p.78 Al Varma kaj Harald Thilander je la geedziĝa festo la 19-an de Novembro, 1938. Saluto El Finnlando. [poemo] de Anna Friman.
- p.78 Karaj Gemaikoj! de Harald Thilander
- p.78 Ree Senlime Koran Dankon. de Harald Thilander
- p.79 La Dekkvaraj Floraj Ludoj. (Eldonita en "Esperanta Ligilo" oktobro).
- p.79–80 Mi Serĉis Vin, Ho Mia Fratanimo. (Homa Sorto) [poemo] de Varma Järvenpää *Premiita per "LA NATURA FLORO," la plej alta literatura premio en la Esperantista mondo.
- p.80–81 Renkontiĝo de Cindrulino. [poemo] de Antonia Rev. *Premiita de la XIVa Floraj Ludoj,
- p.81 Impresoj Pri "La Sepa." J. Kreitz.
- p.81–82 Resuma Raporto pri la Rezultatoj de la Sepa Internacia Kongreso de Blindaj Esperantistoj en Antverpeno. (3–11 de Aŭgusto 1928) de Joseph Kreitz.
- p.82–83 Instruado kaj ekzercigo al blindaj infanoj, kiel imagi la ĉirkaŭan mondon. de Agnes Melchior.
- p.83–84 LEGOMAŜINOJ POR BLINDULOJ. H. Th.
- p.84 Iom Pri La Produktiva Laboro De La Tutruslanda Blindulligo (Eltiraĵo el artikolo en "Beiträge zum Blindenbildungerseren" de M. Rosenzweig).

NUMERO 9. JARO 1929. (p.85–92/8pp)

- p.85 LA KONGRESO EN CANTERBURY. de La Kasisto.
- p.85 Esperanto Kiel Kongreslingvo
- p.85 GEFIANĈIĜO. [de Anna Klinkhammer kaj Joseph Kreitz]
- p.85 "NIA OKA"
- p.86 HENRIETTE ZAPATER. [nekrologo] de J. Kreitz
- p.86–87 SFINKSO [poemo] de Ĉuvi Lovostan.
- p.87–88 Kampado-semajno por Blinfuloj. R. Israëls.
- p.88 La Blindulafero en Hispanujo.
- p.88–89 NEK EN LA SONĜO. [poemo] de Ĉuvi Lovostan.
- p.89–90 Kiel Blindulo Fabrikas Magnezian Citraton.
- p.90–91 LA BLINDULOJ EN BULGARUJO.

- p.91 VARMAJ MANOJ. [poemo] de Kolos Imban.
 p.91 NOTOJ EL USONO.
 p.91 MEMORO [poemo] de Leslie, trad. M. C. Butler, El "Kantaro Esperanta,
 310.
 p.92 SCIIGOJ PETATAJ. de W. P. Merrick.
 p.92 Esperanta Biblioteko por Blinduloj. de W. P. Merrick.
 p.92 BLINDA ŜIPANARO. (Trad. I. Krieger.)

NUMERO 10. JARO 1930. (p.93–100/8pp)

- p.93 Blindaj Esperantistoj kaj la Kongreso en Oxford
 p.93 Thomas William Holmes. – Artisto por Blinduloj. de W. P. Merrick.
 p.94 La 21-a Brita Kongreso en Nottingham.
 p.94 S-ro J. T. FORBES. [nekrologo] de W. P. Merrick.
 p.94–95 LA EKVATORA BAPTO. – Vojaĝa Memorajo de Julius Hasselbach.
 p.95–96 Kondukistaj Hundoj en Germanujo de Edgar Keil
 p.96 La Ilustraĵa Redaktoro de "Esperanta Ligilo." H. Thilander.
 p.96 ASEKURO KONTRAŬ BLINDECO.
 p.97 LA SKRIBMAŜINOJ DE OSCAR PICHT.
 p.98 FRAŬLINO INKERI. de Eino Leino. (1) [poemo] Tradukis Varma
 Thilander.
 p.99 LETERO EL JUGOSLAVIO. de Svetislav S. Petroviĉ.
 p.99–100 La Oka Kongreso de Blindaj Esperantistoj En Budapest.
 p.100 Alfred John Adams. [nekrologo]
 p.100 Profesoro Stanislav Stejskal. [nekrologo]

NUMERO 11 JARO 1931 (p.101–108/8pp)

- p.101 DANKESPRIMO. La Kasisto.
 p.101–102 BONEGA MALLONGA VOJO de H. Thilander.
 p.102–103 EDGARD GUILBEAU [nekrologo] de Albert Masselier.
 p.103 Vivo kaj Laboro de S-ro Phillip Layton
 p.103 PRINTEMPO VENAS. [poemo] de Varma Thilander.
 p.104 La Dekaj Internacia Kongreso de Blindaj Esperantistoj en Krakovo
 (Polujo) Aŭgusto, 1931. de J. Kreitz.
 p.104 La Naŭa Kongreso de Blindaj Esperantistoj en Oxford
 p.104–105 IMPRESOJ & REMEMOROJ DE LA NAŬA de R. Krchňák,
 Ĉeĥoslovakujo., K. Filss, Germanujo.
 p.105–106 INTERESA KLUBO. de Legantino.
 p.106–107 Blinda Surdulino Bone Parolas Esperanton. de Tiberio Morariu.
 p.107 ADIAŬ GEAMIKOJ!
 p.107–108 Utiligo de Blindula Laborforto en la Sovjetunia Industrio.

- de Konstantin Sobolev.
 p.108 DIVERSAJ NOTOJ
 p.108 NASKIĜO
 p.108 [anonco] Universala Esperanto-Asocio, Genevo, Svislando

NUMERO 12 JARO 1932 (p.109–116/8pp)

- p.109 NIA DEKUNUA EN PARIZO. de W. P. M.
 p.109 KORAN DANKON! de W. P. MERRICK, Kasisto.
 p.109 AŬTUNA KANTETO [poemo] de Varma Thilander
 p.110–111 SEP BLINDAJ PARLAMENTANOJ
 p.111–112 EN KREPUSKO. [poemo] de Markus Rautio. (El la finna lingvo trad. Varma Thilander)
 p.112–113 Instruo de Esperanto en la Blindullernejoj
 p.113 VIVKURAĜO
 p.113–114 NIA DEKA KONGRESO en KRAKOVO de W. P. M.
 p.114 Universala Asocio de Blindul-Organizaĵoj
 p.114 The International Auxiliary Language Association
 p.114 DOKTORO HELEN KELLER de W. P. M.
 p.114–115 HEILIGENBRUNN – Danziga Legendo
 p.115–116 PORTUGALA LERNEJO de M. G. T. (Tradukita el "The New Beacon," Okt., 1931)
 p.116 FRAŬLOJ. de Albert Masselier.

NUMERO 13 JARO 1933 (p.117–124/8pp)

- p.117 ESPERANTA LIGILO. de W. P. M.
 p.117 LA KONGRESO EN KOLONJO. de W. P. M.
 p.117–118 NIA DEKUNUA EN PARIZO. de W. P. M.
 p.118 MAJO [poemo] de Elsa Nordkvist.
 p.118–119 Kion Helen Keller "vidis" de la supro de la Empire State Building. (Trad. el sveda gazeto "Eskilstunakurire.")
 p.119 "HELEN KELLER IN SCOTLAND."
 p.120–121 Blindaj Terkulturistoj en Jugoslavio de Veljko Lj. Ramadanoviĉ (Tradukita laŭ "Outlook for the Blind.")
 p.121–122 F. ŜOEV. – POETO DE LA BLINDULOJ
 p.122–123 TRI POEMOJ – El "La Mondo Sonoras." de F. Ŝojev (Tradukis senrime V. E., rimigis V. T.)
 p.123 UNIVERSALA ASOCIO DE BLINDUL-ORGANIZAĴOJ.
 p.123 NOVAJ GRUPOJ DE BLINDAJ ESPERANTISTOJ.
 p.124 ĈUKĈA ELEGIO de V. Eroŝenko.
 p.124 ESPERANTA DISERVO.

- p.124 BLINDAJ SAPFARISTOJ. (Laŭ "Petit Progrès" Svisa brajlpresita gazeto)
- p.124 HOMAMA MEMORAĴO.
- p.124 BLINDA SCIENCISTINO

aparta aldonajo: 13,6 × 21,0 cm × 4 paĝoj

- (p.1) "Memoraĵo pri la Dek-unua Internacia Kongreso de Blindaj Esperantistoj (PARIZO, 30 JULIO – 6 AŬGUSTO 1932)" [kun tutpaĝa foto]
- (p.2) [kun foto de Théophile Cart]
- (p.3) [fotoj pri la scenoj de la kongreso]
- (p.4) [franclingva poemo]

NUMERO 14 JARO 1934 (p.125–132/8pp)

- p.125 ESPERANTA LIGILO de La Kasisto.
- p.125 BLINDULOJ KAJ LA KONGRESO EN STOCKHOLM
- p.125–126 NIA DEKDUA KONGRESO EN KOLONJO
- p.126 PIERRE VILLEY de Harald Thilander
- p.126 KATOLIKA ASOCIO DE BLINDAJ ESPERANTISTOJ de J. MEYER
- p.127–129–, –132 LA DESTINITA VIVI de V. Eroŝenko
- p.130–132 DEKKVINA DATREVENO EN JUGOSLAVUJO – de Stojan Alčević,
blinda muzikinstruisto
- p.132 NI MARŜAS ANTAŬEN

NUMERO 15–16 JARO 1935 (p.1[=133]–16[=148]/16pp)

- p.1[=133] Grava propagando de Louis Bastien.
- p.2[=134] Noto de la redakcio.
- p.2[=134]–3[=135]–, –4[=136] Zamenhof kaj la blindaj esperantistoj. de Lidja Zamenhof.
- p.4[=136]–5[=137] Internacia Kongreso de Blinduloj – en Stockholm la 4-11 de Aŭgusto 1934.
- p.5[=137]–7[=139] Blinda poeto-fenomeno I. I. Kozlov. de Leo Belmont.
- p.7[=139] Grava leĝo pri masaĝo. de Jan Silhan.
- p.8[=140] Grava sukceso por la ĉeĥoslovakiaj blinduloj. de Minny Miksch.
- p.8[=140]–9[=141] Ŝtatpensioj por blinduloj.
- p.9(=141)–10(=142) Reĝo Aleksandro I – la pacfaranto kaj la blindulamiko.
- p.10(=142)–12(=144) "Esperanta Ligilo" tra tri jardekoj.
- p.13(=145) Komunikoj de UABO – Novaj kuniĝoj
- p.14(–146) Sinjorino Suchardová-Wildmannová. [nekrologo] de Harald Thilander.
- p.14(–146) William Phillimore. [nekrologo] de W. P. Merrick
- p.14(–146) Dankvorto de la kasisto. W. Percy Merrick

- p.15(-147) Atendinda ekspozicio. Harald Thinlander.
 p.15(-147) LIGILO POR VIDANTOJ
 p.16(-148) Nova publikigaĵo. de Jan Silhan.
 p.16(-148) La brajla skribsistemo.

NUMERO 17-18 JARO 1935 (p.1[=149]- 16[=164]/16pp)

- p.1[=149]-2[=150] Epokfaranta invento por blinduloj. – La voĉo ĉiam preta por lautlegado.
 p. 2[=150]-4[=152]-, -5[=153] Kanto de blinda poetino s-ino Varma Thilander "Ĉe la lulilo" de Leo Belmont. (El la pola lingvo esperantigis Jan Silhan.)
 p.5[=153]-6[=154] Blindaj geskoltoj. de W. P. Merrick.
 p.6[=154] Kun plej koraj deziroj pri Ĝoja Kristfestoj kaj Feliĉa jaro 1936
 p.6[=154]-7[=155] Brajla mondekspozicio en Praha. de Kapitano Jan Silhan.
 p.7[=155]-9[=157] PIERRE VILLEY. Biografiaj informoj. de D-ro Nils Juringius.
 p.9[=157] Blindaj agordistoj en Massachusetts plene laborprovizitaj. de Maurice Cintrat.
 p.9[=157] Reelekto de blinda deputito por la pola parlamento.
 p.10[=158] Tro malgranda vi. – Laŭ fama kanto "Le petit Grégoire" de Bretona bardo Théodore Botrel esperantigis A. Masselier dediĉe al F-ino Lidja Zamenhof [poemo]
 p.11[=159] Pri la finna blindeckompenso. de Einar Juvonen.
 p.12[=160]- 13[=161] Vizito ĉe surdblinda samideanino. de Lidja Zamenhof. (Parolado de F-ino Lidja Zamenhof antaŭ la mikrofono de Lyon-la-Doua la 15-an de junio, 1935.)
 p.13[=161] Komunikoj de Universala Asocio de Blindul-Organizaĵoj.
 p.14[=162] Organizaĵoj unuiĝintaj en U. A. B. O.
 p.15[=163] Apogantaj amikoj.
 p.15[=163] LIGILO POR VIDANTOJ.
 p.16[=164] Blindaj stenotipistoj. (el Völkischer Beobachter, num. 219, la 7-an de aŭg. 1935. Trad. Konrektor Eugen Reiche.)
 p.16[=164] La brajla skribsistemo.]

12 La "Universala asocio de blindulorganizaĵoj" (UABO)

En la dekunua ĉapitro ni jam raportis pri la agado de UABO (antaŭe "Universala asocio de blindaj esperantistoj" (UABE) en la jaro 1931, la unua jaro de ĝia ekzisto. Nun estas nia tasko raporti laŭeble detale pri la disvolviĝo, agado kaj la progresoj de la nova asocio.

En la monato julio de la jaro 1933 aperis en la brajla eldonejo de UABO sur 77 paĝoj laŭ formato de EL detala raporto pri la agado de la asocio dum la jaro 1932, kiun kompilis ĝiaj du sekretarioj H. Thilander kaj R. Israëls.

La jaro 1932 estis karakteriza pro tio, ke la interesiĝo por Esperanto inter la blinduloj esprimiĝis per klopodado estigi la necesan materialon por lerni la internacian lingvon.

Aperis en Francujo kaj esperanta-franca kaj franca-esperanta vortaroj. Tie la tutmonde konataj "Association Valentin Haüy" kaj "American Braille Press" donis fortan helpon eldoninte po unu el la menciitaj vortaroj.

La italaj samsortanoj ricevis esperantan-italan vortaron, ege bonan kaj sufiĉe ampleksan verkon kompilitan de la itala konsulo, d-ro A. R. Tancredi, kaj presitan en la nacia brajla presejo en Firenze. En la sama jaro la italaj samsortanoj-samideanoj kuniĝis en "Itala asocio de blindaj esperantistoj" (IABE), kiu ankaŭ aliĝis al UABO.

En Germanujo la studo-instituto porblindula en Marburg eldonis en brajla preso la trivoluman vortaron esperantan-germanan de Bennemann. La Esperanto-blindulligo de Germanujo komencis grandskalan propagandon, eksendinte 3 500 ekzemplerojn de propaganda kajero aldonita al dekkvin germanlingvaj brajlaj gazetoj tiel bonsukcese, ke tuj poste povis aperi la bonega lernolibro de Eugen Reiche.

En tri nederlandaj blindullernejoj Esperanto estis instruata devige kaj en unu libervole.

En Jugoslavio Esperanto estis instruata en ĉiuj blindullernejoj kaj la bezonatajn lernolibrojn prizorgis la brajla presejo de la instituto en Zemun. "Nova lumo", la societo de la blindaj esperantistoj en Jugoslavio, kiu fondiĝis en 1932, kuniĝis kun UABO.

Ankaŭ la polaj samideanoj ricevis sian brajlan lernolibron por Esperanto presitan de la pola sekcio de "American Braille Press".

La norvega tutlanda blindulinstituto en Trondheim instruis pri Esperanto devige kaj en Oslo nia lingvo estis instruata memvole sub gvido de la direktoro Rösseg.

Je la fino de la jaro 1932 estis deksep blindulorganizaĵoj kuniĝintaj kun UABO; inter ili estis dekdu esperantistaj kaj kvin naciaj blindulorganizaĵoj. La naciaj tutlandaj organizaĵoj estis jenaj: federacio de hispanaj blinduloj, irlanda asocio por la blinduloj, federacio de finnlandaj blinduloj, federacio de hungaraj blinduloj, asocio de polaj militblindigitoj.

Dum la jaro 1932 EL aperis en 875 ekzempleroj, sed oni sukcesis limigi la nombron da ekzempleroj al la citita cifero dank' al tio, ke en kelkaj landoj estis legorondo kun komuna ekzemplero; al Hungarujo kun siaj sepdeko da blindaj esperantistoj iris nur kvin ekzempleroj kaj simila estis la fakto pri Bulgarujo. Multaj helpemaj samideanoj sendis siajn legitajn numerojn al samsortanoj, kiuj ne povas aboni la gazeton tiel, ke la legantaro multe superas unu milon.

La "dekdua" okazinta en Parizo ne okupis sin pri aferoj de UABO.

La jarraporto publikigis liston pri titoloj de 38 lernolibroj, vortaroj kaj aliaj libroj eldonitaj en 12 landoj, ne kalkulante 9 librojn eldonitajn de UABO.

Albert Masselier, la dua prezidanto de UABO, eksciĝis el la komitato laŭdire pro malsanemo kaj grava bezono de trankvilo kaj ripozo; tamen, por diri la veron, la kaŭzo estis tute alia, ĉar li apartenis al tiuj malmultaj el ni, kiuj forte kontraŭbatalis la transformigon de UABE al UABO. La komitato per ĉiuj voĉoj elektis por anstataŭanto de la dua prezidanto kapitanon Jan Silhan, unu el la estraranoj de la asocio de polaj militblindigitoj.

La aldono al la jarraporto enhavis sur 20 paĝoj historiajn resumetojn pri la naciaj organizaĵoj kuniĝintaj kun UABO.

La periodo de funkcio de la komitato de UABO finiĝis kun la jaro 1933. La rezulto de la balotado estis, ke oni reelektis la malnovan estraron escepte la duan sekretariojn, R. Israëls, kiu pro privataj cirkonstancoj ne povis akcepti kandidatecon kaj kiun anstataŭis en la nova komitato d-ro A. R. Tancredi por la ofico de la dua sekretario.

En julio de la jaro 1934 aperis en la eldonejo de UABO jarlibro de "Universala asocio de blindulorganizaĵoj" (UABO) por la jaro 1933 sur 93 paĝoj, kiun kompilis la du sekretarioj H. Thilander kaj d-ro A. R. Tancredi.

Dum la jaro priraportata la politikaj cirkonstancoj en kelkaj landoj ne estis favoraj por la evoluado de internaciaj entreprenoj, do ankaŭ ne por la Esperantomovado. Daŭris Esperanto-kursoj en la anglaj brajlaj gazetoj "The tribune" kaj "The school magazine" kun multaj miloj da legantoj kaj en jugoslava, ĉeĥa, pola kaj kelkaj skandinaviaj gazetoj.

El la sekretarioj estis elsendataj en la jaro 1933 preskaŭ 500 leteroj kun informoj diversspecaj pri aferoj koncernantaj blindulaferojn en ĉiuj partoj de la mondo aŭ petojn pri tiaj informoj. La sekretarioj klopodis kolekti pli kaj pli da sciindaĵoj pri la blinduloj en la tuta mondo por povi distribui inter tiuj, kiuj bezonas informojn por sia laboro porblindula. Ankaŭ leĝaj tekstoj koncernantaj la nevidantojn, dokumentoj pri rabatoj kaj senpageco en poŝto, aŭ sur fervojoj, tramoj ktp., atestoj pri kompetente plenumata laboro de samsortanoj ktp. kolektiĝis iom post iom en la sekretarioj de UABO.

La jaro 1933 estis tre grava jaro por UABO, ĉar unue la nova organizaĵo aranĝis sian unuan ĝeneralkunvenon en la kadro de la "dekdua" okazinta en Kolonjo komence de aŭgusto; due pro tio, ke tiu ĝeneralkunveno decidis pri la ekzisto kaj neekzisto de la organizaĵo pro la komuna propono de d-ro Tancredi kaj Albert Masselier pri la restarigo de la iama UABE, la "Universala asocio de blindaj esperantistoj". Por iom pli detale skizi la tiaman situacion, ni sekvigos kelkajn gravajn frazojn el la nomita propono pri restarigo de UABE:

"Pli kaj pli ni konvinkiĝas, ke la blindaj esperantistoj malprave forigis UABE-on, kies restarigo ŝajnas al ni urĝa neceso. Ni unue rimarku, ke apenaŭ kvinono el la tutmonda blindulesperantistaro decidis la faktan disiĝon de UABE kaj devigan enmembrigon de ties naciaj esperantistaroj interne de UABO, t.e. interne de universala asocio, kies komitato estu kvazaŭ la registaro de la tutmonda blindularo. Kredinde la plimulto de la blindaj esperantistoj malŝatas la de UABO proklamitan celon. Ĉu UABO obstine pretendados, ke nur ĝi rajtas kaj kapablas oficiale kaj dece reprezenti la tutmondan blindularon?"

Sur okpaĝa propono ambaŭ proponintoj multvorte provas klarigi la neceson restarigi la iaman UABE-on. En sia parolado prezidanto Kreitz forte kontraŭstaris la proponon dirante interalie:

”Ĉu vi povas imagi, ke jam post du jaroj ni elterigos tiun organizaĵon, kiun ni kvazaŭ enterigis en Budapeŝto, nian UABE-on? Oni pripensu: se oni restarigus nian UABE-on, povus facile okazi, ke multaj el niaj plej fervoraj adeptoj ne plu batalus por nia ideo. Ni scias, ke la plej multaj anoj apogas kaj apogos nian nunan UABO-on. Ni ne volas esti konkurenco al iu ajn simila internacia organizaĵo, ni ja nur celas, ke ĉiuj naciaj blindul-organizaĵoj uzu nian lingvon en internaciaj rilatoj por sia propra profito. Samtempe mi insiste avertas, ke neniu el niaj vicoj provu detrui multjaran laboron de kelkaj fervoruloj, kiuj oferis tempon, energion kaj monon por nia afero. Tiuj semontoj aŭ eĉ semintoj de malakordo sciu, ke perforte ni defendos nian organizaĵon UABO, ili sciu, ke ni ne donos nian manon por detrui tiun belegan konstruaĵon. Ni iros nian vojon!”

Kvankam la prezidanto proponis al tiuj el ni, kiuj deziras unuiĝi en pure esperantista organizaĵo internacia, ke ili povos fondi tian, al kiu apartenos nur individuaj membroj; post lia parolado oni preskaŭ unuanime malakceptis la proponon Masselier-Tancredi.

Jenaj proponoj estis pritrakitaj dum la ĝeneralkunveno:

Propono de kapitano Jan Silhan, (Polujo): UABO eldonu gravajn verkojn pritraktantaj la ĝeneralan blindulaferon, ĝiajn ĉefajn kaj aktualajn problemojn kaj specialfakajn problemojn; UABO eldonu en brajla presado ”kalendaron de la blindaj esperantistoj” kun ĉiuj sciigoj, konsiloj, adresoj kaj informoj.

UABO aranĝu radio-disaŭdigojn en diversaj landoj pere de la membro-organizaĵoj.

Nia itala samideano, G. Valiani proponis starigon de internacia biblioteko por blindaj studentoj, en kiu havu lokon ĉiuj aperintaj kaj aperontaj lernolibroj (gramatikoj kaj vortaroj) de Esperanto en ĉiuj landoj, kiu helpus al ĉiuj lingvo-studentoj.

La ”Nederlanda societo de blindaj esperantistoj” (NOSOB) proponis la eldonon de internacia literatur-scienciga revuo en brajlo sub redaktado de d-ro Bano Miklos.

Albert Masselier prezentis tutan proponaron sendotan per iniciato de UABO al ĉiuj registaroj kaj al ”Ligo de nacioj” pri interŝtata konsento koncerne senpagecon de pasporto por blindulo kaj ties akompananto, de doganoj porblindulaj ilaroj, de vojaĝbileto por akompananto de blindulo ktp. Internacia kaj interŝtata konsento, por ke sendo de brajlaĵoj kaj blindulhelpiloj de lando al lando estu ne pli multekosta ol la sendo en la sama lando. Internacia interkonsento pri trafiksignoj, identeckartoj

ktp. por blinduloj, internacia semajno porblindula kaj fondo de internacia institucio kontraŭ blindeco ktp.

Tre detala propono kelkpaĝa de Einar Juvonen [1898–1979] en Finnlando sin okupis pri la problemo, kiel havigi labormaterialon malmultekoste por niaj manlaboristoj.

Same tre detala referato de Alf Arnesen el Norvegujo pritraktis la demandon, ĉu UABO povas entrepreni ion por provizi la blindulojn en ĉiuj landoj per pli malmultekostaj skribmaŝinoj kaj aliaj aparatoj.

Poste la komitato de UABO interkorespondadis kun la ĉefoficejo de la Remington-kompanio en Usono kaj ricevis kompare kontentigan respondon pri malmultekostaj skribmaŝinoj.

Ankoraŭ aliaj malpli gravaj kaj nerealigeblaj proponoj, kiuj ne meritas mencion, okupis la tagordon de la ĝeneralkunveno.

Kelkaj el la kuniĝintaj en UABO organizaĵoj ankoraŭ ne posedis bonan presilaron kaj tial la presejo de UABO presis hispanan kaj bulgaran gazetojn, kiuj aperis ĉiun duan monaton kun po 24 paĝoj.

Dank' al la klopodoj de la organizaĵoj, kuniĝintaj kun UABO, okazis disaŭdigoj en Esperanto pri blindulaferoj per la radio-stacioj en Varsovio, Vieno kaj Stockholm; sed ankaŭ kelkaj el la "Esperanto-kronikoj" de la radio-stacio Lyon-la-Dua estis dediĉitaj al blindulaj aferoj.

Nova statuto de UABO aperis brajle kaj nigre en la jaro priraportata.

Venis la "dektria" en Stockholm kaj kun ĝi la dua ĝeneralkunveno de UABO, en la tagoj de la 7-a kaj 8-a de aŭgusto en la jaro 1934.

En sia malferma alparolo prezidanto J. Kreitz aludis la fakton, ke UABO laboris sukcese dum la pasinta kriza jaro, kion montris plej klare la jarraporto.

Sendube la ĉefa temo de la ĝeneralkunveno estis la problemo pri la blindeca kompenso (la principo pri kompenso pro malpliiginta laborkapableco kaŭze de blindeco). Post raporto de Neary (Irlando), Anwell (Anglujo) kaj Melchior (Danujo) pri la koncernaj atingiĝoj en la nomitaj landoj, la ĝeneralkunveno komisiis al Neary, Silhan, Ljunggren kaj Melchior la verkadon de rezolucio, el kiu ni jen

citas la ĉefajn frazojn: ”La dua ĝeneralkunveno de UABO, okazinta en Stockholm en aŭgusto de 1934, kiun partoprenis delegitoj el 11 landoj, unuanime esprimas sian admiron por la nobla sveda popolo, por ĝia registaro kaj ĝia parlamento, kiu trafe ekkonis la urĝan bezonon laŭleĝe plifaciligi la malbonan staton de la blinduloj kaŭzitan pro malpliiginta laborkapableco de la nevidantoj. La ĝeneralkunveno de UABO tial instigas ĉiujn blindulorganizaĵojn en la tuta mondo energie batali por efektivigo de sama principo (la principo pri kompenco pro malpliiginta laborkapableco pro blindeco) en tiuj landoj, kie ĝis nun mankas la socia koncepto de tiu ĉi nepra faktoro de moderna sistemo de blindulprizorgado.”

Laŭ la raporto de la komisiono por esplori eblecon havigi malmultekostajn skribmaŝinojn al blinduloj, Remington-maŝinoj ŝajnas esti konsiderindaj. Charles Hedqvist [1910–1975] sciigas, ke ĉiu blindulo en Svedujo senpage ricevas skribmaŝinon, kiam li aŭ ŝi forlasas la lernejon.

La raporto de la konstanta komisiono por serĉi novajn vojojn por la blindula vivnutra laboro priskribis kelkajn novajn laborkampojn en diversaj landoj.

Georg Kuntze el Germanujo transprenis kolekti adresojn de blindaj artistoj kaj fondi artistan societon.

Longdaŭraj diskutadoj pri kunlaboro de brajlaj presejoj kaj pri aranĝo de radio-disaŭdigoj pri blindulaj aferoj en Esperanto rezultigis proponon de Paul Rémy el Francujo pri ricevo de permeso senpage aŭskulti radio-disaŭdigojn, proponon de d-ro Bano Miklos pri eldono de la ”Fundamento” de Zamenhof kaj aliajn malpli gravajn proponojn. Pli detale oni pridiskutis proponon de Albert Masselier, ke UABO kunlaboru kun ”Fédération internationale des aveugles” kun la rezulto, ke la kunveno akceptis tiucelan rezolucion.

Post la propono de Kreitz laŭeble eldoni literaturan gazeton en brajla preso kaj propono de kapitano Jan Silhan pri leĝa registrado de UABO en Stockholm, finiĝis la dua ĝeneralkunveno de UABO.

Post la kongreso en Stockholm pro la politikaj cirkonstancoj kaj malpermeso de Esperanto fare de la germanaj nacisocialistoj komenciĝis por nia organizaĵo kaj ĝenerale por nia internacia movado ege malfavora tempo; tamen kuniĝis kun UABO ankoraŭ multaj naciaj blindulorganizaĵoj tutlandaj kaj distriktaj en Danujo, Svedujo, Norvegujo kaj Finnlando. Oni povis realigi kelkajn proponojn akceptitajn de la dua ĝeneralkunveno en Stockholm. Plenumante la proponon detale prezentitan de la prezidanto de UABO dum la nomita ĝeneralkunveno la

komitato de la federacio decidis eldoni novan gazeton sub la titolo "Nia mondo; kultura aldono al Esperanta Ligilo", kiu aperis ekde la monato majo en la jaro 1936 ĉiun duan monaton kun 70-80 grandformataj paĝoj po numero. La enhavo konsistis el artikoloj pri sciencaj, teknikaj, ekonomiaj kaj socialaj temoj populare prezentitaj. Krome ĝi enhavis recenzojn pri plej gravaj eldonaĵoj en nia lingvo. La redaktoro de la nova gazeto, kies abonprezo estis nur tri svedaj kronoj, estis la vidanta kaj varmkora blindulamiko Maurice Blake en Londono. La presadon prizorgis senpage nia pioniro Harald Thilander kaj la abonprezo kovris nur la kostojn por papero, metalfolioj, fabrikado de landkartaj kaj ilustraĵaj kliŝoj kaj poŝtendaĵoj. Ĉi tiu ĝeneralkleriga, informa revuo kun multaj reliefaj ilustraĵoj intencita ĉefe por la blinduloj en tiuj multaj landoj, kie ĝis nun ne ekzistis simila publikigaĵo nacilingva, estis unu el la unuaj ilustritaj revuoj porblindulaj.

En aŭtuno de la jaro 1936 okazis voĉdonado pri nova komitato de UABO por la jaroj 1937-39. La ĝisnuna prezidanto Joseph Kreitz post dektrijara prezidanteco de UABE kaj UABO pro kontraŭesperantaj registaraj dekretoj en Germanujo devis malakcepti kandidatecon por la nova elektota komitato de UABO. Nur 70 membroj de UABO elektis el 7 proponitaj kandidatoj jenan estraron:

Jan Silhan, unua prezidanto;

d-ro Bano Miklos, vicprezidanto;

Harald Thilander, ĝeneralsekretario;

d-ro A. r. Tancredi, dua sekretario;

W. P. Merrick, kasisto;

direktoro V. Ramadanoviĉ kaj Halvdan Karterud, konsilantoj.

Pro tio, ke en la jaroj 1935-1936 ne okazis blindulesperantistaj kongresoj, UABO povis aranĝi sian trian ĝeneralkunvenon nur en la kadro de la "dekkvara" okazinta en la aŭgustaj tagoj de la jaro 1937. Kapitano Jan Silhan malfermis la trian ĝeneralkunvenon okazintan la 10-an de aŭgusto je la 10-a h. en la salonego de la blindulinstituto en Varsovio en ĉeesto de kvin anoj de la komitato de UABO kaj oficialaj reprezentantoj de dekok membro-organizaĵoj kaj resumis la pozitivajn laborojn faritajn de la federacio, kiu sukcese uzadas Esperanton por sia agado. La kunveno akceptis aplaŭde la sekretarian raporton de UABO legitan de d-ro A. R. Tancredi, unu el la sekretarioj. Post diskutado pri la Esperanto-propagando inter blinduloj la kunveno akceptis rezolucion (estis la dekkvina akceptita de la kongreso) pri enkonduko de Esperanto en la blindullernejojn. Akceptita ankaŭ estis propono de Harald Thilander pri restarigo de IBIS, la internacia blindul-informejo kaj statistikejo.

En la jaro 1939 aperis la lasta jarraporto de UABO, el kiu ni ĉerpas jenajn informojn pri la agado de la asocio:

El la sekretario de UABO estis elsenditaj en la jaro 1938 ĉ. 500 leteroj enhavantaj informojn diversspecajn pri blindulaferoj el ĉiuj partoj de la mondo aŭ petojn al la naciaj blindulorganizajoj pri tiaj informoj.

La demandoj pri muzikaĵoj, kiuj formis grandan parton de la korespondado dum la lastaj jaroj, estis prizorgataj de speciala fako, la "Katalogejo de blindaj muzikistoj" sub gvido de Kaj Pedersen en Kopenhago (Danujo), kun la celo doni informojn pri muzikaĵoj, ĉu ili ekzistas en brajlo, kie ili estas aĉeteblaj kaj kiom ili kostas.

La lasta jaro de la ekzisto de UABO estis por ĝi, kiel por multaj aliaj internaciaj organizaĵoj, tre malfacila periodo. La politika necerteco paralizis ĉiun iniciaton de internacia karaktero.

Dum la "dekkvina" okazinta en Londono en la jaro 1938 same, kiel dum la "deksesa" okazinta en 1939 en la svisa urbo Bern ne okazis ĝeneralkunvenoj de UABO pro neĉeesto de la plimulto el la komitatanoj de la federacio.

Grava evento estis la partopreno de UABO en la internacia kongreso de kuracistaj helpantoj, masaĝistoj kaj malsanulaj gimnastikistoj, okazinta dum aŭtuno de la jaro 1938 en Belgujo. La honorinda patero Agnello Vandenbosch prenis sur sin la reprezentadon de UABO en tiu kongreso, kiu aprobis diversajn rezoluciojn prezentitajn de patero Agnello, kiuj celas helpi blindajn masaĝistojn en plenumo de ilia profesio.

Kuniĝis kun UABO i.a. la "Nederlanda blindulligo", "Amika asocio de blinduloj" (Francujo) kaj la "Svisa federacio de blinduloj" kun siaj pli ol mil individuaj membroj. Je la fino de la jaro 1939 UABO havis delegitojn en 23 landoj eŭropaj kaj neeŭropaj.

La eksplodo de la dua mondmilito ĉesigis la agadon de la asocio.

13 Diversaj internaciaj blindulesperantistaj organizaĵoj

La ”Internacia blindulafera centra informejo kaj statistikejo” (IBIS).

Estas tute nature, ke jam antaŭ multaj jaroj oni pripensis starigon de centra informejo, kie estu kolektataj ĉiaj sciigoj pri la blindula aferaro en la tuta mondo, kiujn oni poste disdonu per Esperanto al ĉiuj bezonantoj.

Estis okaze de la unua blindulesperantista kongreso en Praha (1921), kiam Julius Hasselbach en Berlino proponis starigi tian informejon, sed nur la ”dua” en Helsinki definitive decidis realigi lian proponon. La entrepreno estis des pli provinda, ĉar prof. Stanislav Stejskal en Praha proponis en sia oferemo sensalajre administri la oficejon, kiu ricevis la nomon ”Internacia blindulafera centra informejo kaj statistikejo” (IBIS).

Dum kelkaj jaroj prof. Stejskal kolektadis materialon kaj disdonis multajn valorajn informojn tra la tuta mondo. En 1929 la morto forrabis de ni tiun noblaniman helpanton. Tiam montriĝis, kiel oftege montriĝas koncerne sensalajrajn laborojn, ke estis mankinta tempo por sisteme ordigi la materialon. Ĝi estis grandparte en krajonaj noticoj – amasoj da noticoj elokvente parolantaj pri la oferema diligenteco de la forpasinto, sed ankaŭ pri la malsufiĉeco de la disponebla tempo (prof. Stejskal ja estis instruisto en ŝtata lernejo) – . La tuta agado de la informejo devis esti interrompita. En la stokholma kongreso (1934) la ĉeĥoslovaka delegito proponis al UABO transpreni la informojn internacian, ankoraŭ troviĝantan en Praha. Tiu propono estis hezite akceptita. Tamen la komitato de UABO ne kuraĝis deklari la oficejon oficiale malfermita; unue necesis disponi pri la tempo de persono, kiu povus dediĉi sin al la laboro.

Harald Thilander proponis al la tria ĝeneralkunveno de UABO en Varsovio (1937) enoficigi personon, kiu, ricevante ioman salajron, povos doni al la laboro parton de sia tempo. Laŭplane la materialo de la informejo estu komence dividata laŭ nacioj, sed paralele estu kondukataj kartotekoj ordigitaj laŭ temoj: edukado, labora prizorgo, sociala prizorgo, leĝdonado, pensioj, eventuale kun siaj subfakoj. Jam de komenco la muziko formu specialan fakon, ekzemple sub la nomo de ”Internacia muzika katalogejo por blinduloj”. Pri la financa flanko de la entrepreno Harald Thilander proponis, ke UABO por la jaro 1938 destinu la sumon de 15 anglaj funtoj kiel salajron por la oficisto de IBIS. Fakte nia Harald Thilander efike komencis realigi sian proponitan planon, sed la eksplodo de la dua mondmilito faris finon al ĝi.

Mondunuiĝo de blindaj muzikistoj (MOBOMO)

Laŭ propono de la nederlanda samideano Créman estis fondita la "Mondunuiĝo de blindaj muzikistoj" okaze de la "tria" en Nürnberg (1923) kaj formiĝis estraro sub la prezidanteco de la hungara samideano Bela Holley. La unuiĝo, kiu fariĝis sekcio de UABE, jam post du jaroj havis 13 delegitojn en 12 landoj kaj eldonis en brajla preso du numerojn de informa bulteno. Post la morto de prezidanto Holley (1927) mankis la gvidanta cerbo kun la rezulto, ke jam post kelka tempo MOBOMO apartenis al la pasinteco. Tamen, poste, UABO eldonis tri numerojn de internacia bulteno por blindaj muzikistoj sub la titolo "Echo" kun artikoloj pri muzikaj temoj redaktita de la ĉeĥa samideanino Rosa Drechsler. Krome iu numero enhavis faman kanton: "Kanto de Solveig" de Grieg, "Renkonto" de d'Albert kaj "La veneniga amatino" de Dworák.

En la "dektria" (1934) estis akceptita propono de Georg Kuntze en Dresdono pri revivigo de organizaĵo de blindaj muzikistoj kaj artistoj, sed fakte ĝi restis nur surpapera organizaĵo.

Tutmonda asocio de blindaj metiistoj kaj manlaboristinoj (TABOMO)

Ankaŭ ĉi tiu asocio, fondita okaze de la "tria" kun la ĉefa celo starigi internacian vendejon de materialoj por blindaj metiistoj, ne sukcesis pro tio, ke la germana prezidanto Georg Schröder ne estis la taŭga persono, kaj krome tro multaj obstakloj valutaj, doganaj ktp. malebligis la aspiritan celon; konsekvence, jam post du jaroj neniu plu parolis pri la asocio mortinta, sed nia historio ne estus kompleta, se ni prisilentus ĉi tiun fakton.

14 La unua internacia kongreso de blindaj esperantistoj en Praha 1921

Ŝajnas al ni necese iom pli detale raporti pri la unua internacia kongreso de blindaj esperantistoj okazinta en Praha, la ĉefurbo de la juna Ĉeĥoslovaka respubliko de la 31-a de julio ĝis la 6-a de aŭgusto en la jaro 1921 samtempe kun la 13-a universala kongreso de Esperanto. Estis Karel Emanuel Macan, la bonfama ĉeĥa muzikkomponisto kaj blindulpedagogo, unu el la unuaj pioniroj de Esperanto inter nevidantoj, kiu havis la ideon organizi la unuan kongreson blindulesperantistan kun neimageble bona sukceso. Ĝin partoprenis 58 blinduloj kun 13 vidantaj gvidantoj, sume do 71 personoj el 11 diversaj nacioj, inter ili laŭalfabete 1 anglino, 3 aŭstroj, 51 ĉeĥoslovakoj, 2 danoj, 3 francoj, 6 germanoj, 1 hispano, 1 hungaro, 1 nederlandanino, 1 svedo kaj 1 sviso.

Per sinceraj vortoj nia estimata kaj kara ”paĉjo de neviduloj”, prof. Théophile Cart malfermis la kongreson. En sia parolado li klarigis, ke danĝera okulmalsano de lia infano alkondukis lin al la nevidantoj. Ŝerce li priskribis la unuajn kuraĝajn paĝojn por disvastigi la internacian lingvon inter la blinduloj; ekzemple li intervenis ĉe diverslandaj reĝinoj, el kiuj nur unu sendis vere ”reĝinan” donacon de cent kronoj; alia, la rumana reĝino-poetino Elizabeto, ”Carmen Sylva”, promesis unusolan efikan helpon, dum aliaj kronumitaj kapoj lasis lian ”rekomendite” senditan esperantan gramatikon porblindulan neatentita. Kiam li rememoris sian amegatan filon mortintan sur franca bataalkampo, la subite el okuliĝintaj larmoj surverŝis lian noblan vizaĝon kaj li pro troa emocio preskaŭ ne kapablis paroli. Same kortuŝiga estis la momento, kiam li, parolante pri la meritoj de nia pioniro Macan, kliniĝis al li, ĉirkaŭprenis kaj kisis lin.

En la unua laborkunsido oni elektis laborkomisionon pritraktontan en specialaj kunvenoj gravajn enprogramigitajn temojn. Krom la komisionaj kunvenoj okazis kvar laborkunsidoj de la kongreso, en kiuj estis legitaj atentindaj referatoj kaj faritaj gravaj proponoj, el kiuj ni menciuj jenajn:

1. Pri la stato de la aŭstra blindulafero, de Ignaz Krieger;
2. Raporto pri la stato de la blinduloj en Brazilo, de F. de Almeida;
3. Aranĝo de porblindula prizorgo en la Ĉeĥoslovaka respubliko, de prof. Stanislav Stejskal; la aŭtoro estis vidanta mezlerneja profesoro kaj la plej grava helpanto ĉe la organizo de la kongreso.
4. Mallonga raporto pri la dana blindulafero, de Agnes Melchior, mem blinda blindulinstruistino;
5. Pri la porblindula prizorgo en Francujo, de E. Barrier, blinda muzikinstruisto kaj komponisto;
6. Stato de la blindula movado en Hispanujo, de Jakobo Bellfort;
7. La blindulmovado en Nederlando, de W. J. Créman, sekretario de la blindulligo en Amsterdamo;
8. Raportoj pri hungaraj blindulaferoj, de d-ro inĝ. Bano Miklos;
9. Pri la stato de la blindula afero en Svedujo, de Harald Thilander, kiu ne partoprenis la kongreson;
10. Pri la stato de la porblindula prizorgo en Svisujo, de Josef Liebich.
11. Pri la sorto de la blindulinoj kaj la rimedoj por plibonigi ĝin, de Alma Block, germana lingvoinstruistino;

12. Postuloj de nevidantaj knabinoj pri enkonduko de instruado pri mastrumado kaj hejmlaboroj, de Marie Švecová, Ĉeĥoslovakio;
13. Pri la blindulesperantista movado en Germanujo raportis Henriette Zapater;
14. Proponoj de Julius Hasselbach, Berlino, pri fondiĝo de tutmonda organizaĵo de blindaj esperantistoj, pri starigo de internacia brajla biblioteko kaj starigo de internacia blindula statistikejo kaj informejo;
15. Pri instruado de porvidula skribo en la germanaj blindullernejoj raportis Kurt Filss el Erfurt, Germanujo.

Ne estas eble citi ĉiujn referatojn kaj malpli gravajn proponojn, kiujn post la kongreso eldonis en brajla preso sur 281 paĝoj mezformataj la "Societo de Ĉeĥoslovakaj nevidantaj esperantistoj" en Praha.

Plej elstara okazintaĵo de la kongreso estis la publika koncerto de blindaj virtuozaĵoj, kiun aktive partoprenis la ĉeĥoslovakaj virtuozaĵoj f-ino Pollandová, Bartuška, Hlaty, Nepomucky, Perman, Šulc kaj Toman; el Danujo f-ino Melchior kaj Bjarnhof; el Francujo E. Barrier; el Germanujo Probst kaj Zapater.

La rezolucio akceptita de la kongreso konstatas unuanime,

1. ke en ĉiuj siaj konferencoj la kongreso senescepte uzas nur la internacian lingvon Esperanto;
2. ke sekve de tio la konferencoj entute nur estas eblaj per helpo de la internacia lingvo;
3. la kongreso aprobas la malnovan postulon pri ĝenerala enkonduko de Esperanto en ĉiujn blindullernejojn en la tuta mondo kiel deviga lernobjekto.

La laborkomisiono konsistis el dekdu personoj diverslandaj sub la prezido de Ignaz Krieger el Vieno. Ĝi aranĝis tri kelkhorajn kunsidojn kaj publikigis jenan protokolon:

1. La laborkomisiono decidis krei ekzekutivan komitaton konsistantan el ĉiuj konsuloj de blindaj esperantistoj en la tuta mondo aŭ el aliaj plej kompetentaj kunlaborantoj. Ĝia celo estas: transdoni ĉiujn decidojn, proponojn, rezoluciojn kaj dezirojn de la kongreso al ĉiuj blindullernejaj direktoroj kaj instruistoj en la diversaj landoj;
2. la kongreso publikigos en EL rezolucion pri la enkonduko ĝenerala de Esperanto en la blindullernejojn ĉiulandajn;
3. kreo de "universala blindulorganizaĵo esperantista". Por tiu ĉi celo estis starigita kvinmembra komitato sub la prezido de Adolf Selten, el Breslau, Germanujo;

4. la projekton pri internacia materialvendejo por blinduloj oni ne povas realigi nuntempe.
5. starigo de internacia biblioteko porblindula en Leipzig, Germanujo;
6. oni provos solvi la problemon pri starigo de internacia informejo kaj statistikejo pri blindulaj aferoj iamaniere.

Sen troigo oni povas aserti, ke la unua internacia blindulesperantista kongreso faris gigantan laboron kaj per tio metis la fundamenton por estontaj kongresoj.

15 La internaciaj kongresoj de blindaj esperantistoj ĝis la jaro 1939

Ne estas kaj ne povas esti nia tasko tiel detale raporti pri ĉiu internacia kongreso de blindaj esperantistoj, kiel ni faris pri la unua kongreso okazinta en Praha, kiu ja ne nur metis la fundamenton, sed ankaŭ montris al ni la vojon por la preparo kaj organizado de estontaj kongresoj. Oni konsideru la fakton, ke ne ĉiu internacia interrenkontiĝo de blindaj esperantistoj povis solvi gravajn problemojn kaj povis akcepti tiom gravajn decidojn, kiom estis tiuj de la unuaj kongresoj, sed ili ĉiuj senescepte donis okazon al la partoprenintoj reciproke interkonatiĝi, interŝanĝi ideojn kaj spertojn sur la tereno de la internacia blindula afero kaj tiamaniere instigi multajn samideanojn estonte pli aktive labori por nia komuna movado. Ni provos raporti kronologie pli aŭ malpli detale pri ĉiuj kongresoj ĝis la jaro 1939 donante kiel titolon la nombron de ĉiu kongreso.

16 La "dua" en Helsinki 1922

La "dua" okazis en la finnlanda ĉefurbo Helsinki de la 8-a ĝis la 16-a de aŭgusto en la jaro 1922 kun 37 blindaj kaj 16 vidantaj partoprenintoj el 12 nacioj laŭalfabete: Anglujo, Belgujo, Ĉeĥoslovakio, Danujo, Finnlando, Germanujo, Hispanujo, Hungarujo, Ĥindujo, Jugoslavio, Latvio kaj Sovjetunio. Stranga fakto estis, ke ne ĉeestis eĉ unu reprezentanto el la najbaraj landoj Svedujo kaj Norvegujo.

John Bergh, finna verkisto kaj prezidanto de la prepara komitato, malfermis la kongreson, kiu elektis jenan komitaton:
 prezidanto John Bergh; vicprezidantoj prof. Stejskal (vidanta) kaj W. P. Merrick; sekretarioj Bergroth, Finnlando, V. Hendriĉ (vidanta), Belgujo; kiel protokolistinoj funkciis fraŭlinoj Sandström kaj Nieminen, Finnlando. Ree nia "amata paĉjo" prof. Th. Cart fariĝis honora prezidanto de la kongreso. Prof. Stejskal salutis oficiale en la nomo de la ĉeĥoslovaka ministerio pri publika instruado.

Okazis kvin laborkunsidoj, en kiuj oni pritraktis jenajn temojn: fondiĝo de internacia asocio de blindaj esperantistoj; internacia materialvendejo por blindaj metiistoj; internacia informejo kaj statistikejo; internacia biblioteko; internacia komuna muzikskribo; rusaj proponoj pri ŝanĝo de kongrestitoloj kaj reguloj por la kongresoj kaj kelkaj germanaj proponoj pri vojaĝgrabatoj por blinduloj, kunlaborado de blinduloj por fakvortaroj ktp. Inter la faritaj referatoj estas citindaj tiu de prof. Stejskal pri blinduloj kaj alkoholismo; pri instruado de duonvidaj infanoj de Agnes Melchior, kiu mem instruas blindajn infanetojn en la aĝo de kvar ĝis ses jaroj, kaj fine ree referato de prof. Stejskal pri interblindula geedziĝo.

D-ro Edmond Privat alparolis la kongreson dirante interalie, ke neniu pli bone komprenis d-ron Zamenhof inter la homaro ol la blinduloj. En la jaro 1906 nia majstro vizitis en Vevey, Svislando, la blindajn samideaninojn. Li kisis ilin kaj babiladis kun ili dum tuta tempo kaj poste li diris: "Vere, ili tiel bone komprenas min!"

La kongreso decidis nenion pri la fondiĝo de internacia asocio de blindaj esperantistoj, sed rekomendis unue fondi naciajn blindulesperantistajn societojn.

La komisiono pri starigo de internacia materialvendejo por blindaj metiistoj konkludis, ke ĉi tiu problemo ne estas solvebla pro valutaj malfacilaĵoj.

Prof. Stejskal akceptis organizi en Praha la internacian informejon kaj statistikejon por blindulaj demandoj kaj petis aktivan kunlaboradon.

Oni informis la kongreson pri tio, ke la internacia biblioteko porblindula jam estas fondita en Leipzig kaj bone funkcias dank' al la sindona kunlaborado de la vidanta bibliotekistino s-rino Lomnitz-Klamroth. Fakte ĉi tiu biblioteko kopiigis kaj envicigis multajn esperantajn verkojn, sed bedaŭrinde ili ĉiuj forbrulis en la dua mondmilito.

La kongreso tute ne aprobis la rusajn proponojn pri ŝanĝo de kongrestitolo, forigo de la vorto "esperantisto" por fariĝi la kongresojn vere internaciaj blindulaj kongresoj kaj same ankaŭ nur parto el la proponitaj reguloj estis aprobita. Ankaŭ dum tiu ĉi kongreso oni konigis multajn spertojn kaj sukcesojn sur la tereno de la blindula afero.

17 La "tria" en Nürnberg 1923

Al la kongreso okazinta en la germana urbo Nürnberg de la 1-a ĝis la 8-a de aŭgusto en 1923 aliĝis 164 personoj el 21 landoj, sed pro la malfacilaj politikaj kaj ekonomiaj kondiĉoj partoprenis 93 blindaj samideanoj kaj 27 viduloj el 13 landoj laŭalfabete: Anglujo 4; Aŭstrio 3; Bulgarujo 1; Ĉeĥoslovakio 16; Danujo 1; Finnlando 9; Germanujo 60; Hispanujo 1; Hungarujo 16; Latvio 2; Nederlando 3; Svedujo 3 kaj Sovjetunio 1.

Wilhelm Reiner, direktoro de la blindulinstituto, mem esperantisto, salutis kaj malfermis la kongreson per varmkoraj vortoj. Li estis la prezidanto de la prepara komitato kaj loĝigis la kongresanojn en la tiea blindulinstituto, kie ankaŭ okazis ĉiuj kunsidoj. Jena kongreskomitato estis elektita:

Joseph Kreitz, prezidanto; prof. Stanislav Stejskal kaj Adolf Selten, Germanujo, vicprezidantoj; Ints Ĉaĉe (vidanta), Latvio, kaj Hermine Gotthardt (vidanta), Germanujo, sekretarioj kaj ses kunlaborantoj el Anglujo, Finnlando, Hungarujo kaj Svedujo. Preskaŭ ĉiulandaj pli grandaj blindulorganizaĵoj oficiale salutis la kongreson. Same prof. Stanislav Stejskal en la nomo de la Ĉeĥoslovaka registaro kaj Ints Ĉaĉe laŭ komisio de la latvia ministerio por laboro oficiale salutis la kongreson.

Okazis kvar laborkunsidoj, en kiuj estis pritraktitaj tre gravaj proponoj kaj faritaj atentindaj referatoj. Jam en la unua laborkunsido la kongreso pritraktis la proponitan statuton por la "Universala asocio de blindaj esperantistoj", kiu estis akceptita fortaplaŭde. Oni esprimis veran ĝojon pro la fakto, ke la "tria" definitive solvis tiun gravan problemon. Kun forta kaj longdaŭra aplaŭdo nia "amegata paĉjo", prof. Th. Cart unuanime estis elektita kiel honora prezidanto de la nova organizaĵo, post kio jam ĉe la malfermo de la kongreso oni elektis lin kiel honoran kongresprezidanton.

Sekvis du referatoj: la unua pri la stato de la blindula afero en Bulgarujo legita de la vidanta samideano Kolev kaj raporto de prof. Stejskal pri la progreso de la blindula movado en la Ĉeĥoslovaka respubliko en la du lastaj jaroj.

En la dua laborkunsido estis legitaj propono de la nederlanda samideano Créman pri fondiĝo de internacia asocio de blindaj muzikistoj (MOBOMO) kaj alia propono pri unueca muzikskribsistemo. Por solvi la unuan demandon, la kongreso elektis 12-membran komisionon, kiu en aparta kunsido pritraktu la statuton proponitan de Ignaz Krieger, Vieno. Post referato de Theresie Krackova, Aŭstrio, pri "Kunvivado de nevidantaj geamikoj kaj geedzoj" sekvis kelkaj proponoj pri instruado de nia internacia lingvo en blindullernejoj kaj eldono de brajla libro pri blindulhelpiloj ktp.

Pri la propono rilate interŝanĝon de blinduloj studentaj teorie fremdajn lingvojn, la kongreso opiniis, ke tiu propono ne estas realigebla jam pro tio, ke la statuto de la plej multaj blindulinstitutoj ne permesas akcepton de alilandaj lernantoj.

Ege interesa estis la legita referato de Krueger el Berlin-Siemensstadt sub la titolo "Solvita problemo", en kiu la verkinto raportis, kiel en Germanujo dum la milito aperis la ideo okupigi la blindulojn en diversaj industriaj branĉoj kaj ke ĉi tiu okupado estas pli enspeziga ol ĉiuj ĝenerale konataj kaj tipaj blindulprofesioj. Por klare demonstracii la laborojn de blinduloj en la industrio, la 8-an de aŭgusto la kongreso en du grupoj aranĝis sciencan ekskurson al Siemens-Schuckert-Werke en Nürnberg, kie oni okupigis 25 blindulojn. Ĉefinĝeniero Eduard Stieber informis la kongresanojn kaj montris al ili la laborojn faratajn de blinduloj disdonante tiajn objektojn por elektra energio-mezurilaparatoj.

En la tria laborkunsido Baldomero Zapater el Köln detale raportis pri la laboroj de la 12-membra muzikkomisiono, kiu pritraktis la statutproponon de Ignaz Krieger por la monduiĝo de blindaj muzikistoj (Mobomo). La statuto legita de samideano Holley el Hungarujo estis akceptita kaj provizora estraro estis elektita samtempe.

"La kondukista hundo kaj ĝia dresado" estis la temo de referato de Hermine Gotthardt el Braunschweig, Germanujo, kiu kaŭzis viglan diskutadon kaj multajn demandojn pri la utileco de la kvarpiedulo por la blinduloj.

Same longan kaj interesan diskutadon elvokis la propono de Ignaz Krieger pri fremdlingvaj literoj en Esperanto-tekstoj. La proponinto deziris la eldonon de libro enhavanta la parolmanierojn de kiel eble plej multaj lingvoj kaj literoj uzataj en ili kaj ne apartenantaj al la esperantaj alfabetoj. Zapater opiniis, ke la plej bona solvo estus la eldono de libro enhavanta brajle kaj nigre la fremdlingvajn aŭ pli bone la naciajn literojn ne aperantajn en la esperanta alfabeto, sed estus tre komplike klarigi en malgranda broŝuro ankaŭ la diversnaciajn elparolmanierojn, opinio, kiun oni aprobis ĝenerale. Post kiam d-ro Bano sciigis, ke Thilander intencas eldoni tian liblon proponitan de Zapater, finiĝis tiu debato pri tiu afero.

Post legado de iom tro longa raporto de Victor Hendriĉ pri la internacia ekspozicio por militinvalidoj (blindulsekcio) en Gent, Belgujo, vespere la blindulkongresanoj en la urba teatro ĝuis la Esperantlingvan prezentadon de la bonega dramo "Nathan la saĝulo" de Lessing.

En la kvara kaj lasta laborkunsido oni pritraktis kelkajn malpli interesajn kaj nerealigeblajn proponojn kaj elektis komisionon, kies tasko estos verki statuton por internacia asocio de blindaj metiistoj.

En la ferma kunsido oni elektis konstantan blindulkongresan komitaton konsistantan el jenaj samideanoj: prof. Th. Cart; W. P. Merrick; d-ro Bano kaj Joseph Kreitz.

Mencion ankaŭ meritas la ege bonsukcesa koncerto de blindaj virtuozi en la Katharina-preĝejo. Kunagis la kongresanoj: Mizzi Holzberger, pianistino; Margit Riedel, koloratursoprano, ambaŭ el Budapeŝto; Klara Neldner, kantistino, Breslau, kaj Fritz Bunge, soloviolonisto el Leipzig; Thoman kaj Vaclav Bartuška, la unua pianisto kaj la dua arbarkornisto, ambaŭ el Ĉeĥoslovakio; Walter Bauer, pianisto el Weimar, kaj Baldomero Zapater, gitarvirtuozo el Köln.

18 La "kvara" en Vieno 1924

122 blindaj samideanoj kun vidantaj gvidantoj aliĝis al la kvara internacia kongreso de blindaj esperantistoj okazinta de la 6-a ĝis la 13-a de aŭgusto en 1924, samtempe kun la 16-a universala kongreso de Esperanto en la aŭstra ĉefurbo Vieno; sed fakte partoprenis nur 96 geblinduloj kun akompanantoj el 13 nacioj. Ĉiuj blindulkongresanoj loĝis kaj manĝis en la granda blindul-instituto fondita de Johann Wilhelm Klein jam en la jaro 1804. En ĝia festsalono ankaŭ okazis la kunvenoj kaj ĉiuj ceteraj kongresaj aranĝaĵoj.

Ĵaŭdon, la 7-an de aŭgusto, je la tria h. Posttagmeze, f-ino Steffi Zehetner en la nomo de la prepara komitato proponis Joseph Kreitz kiel kongresprezidanton. Formiĝis jena kongresa komitato: s-ro Figerl, direktoro de la blindulinstituto: honora prezidanto; J. Kreitz: prezidanto; Karel Emanuel Macan: unua vicprezidanto; prof-roj Stanislav Stejskal kaj Anton Krtsmary: duaj vicprezidantoj; Victor Hendriĉ: unua sekretario kaj f-ino Rosine Bauer, dua sekretariino. Kiel konsilantoj: Agnes Melchior, d-ro Bano Miklos kaj W. P. Merrick. Inter la legitaj salutleteroj kaj alvenintaj telegramoj ni citu tiujn de la aŭstra respublika prezidanto d-ro Hainisch; vickanceliero d-ro Franck; urbestro de Vieno, s-ro Peitz kaj la germanregna prezidanto Friedrich Ebert, kio, kompreneble, kaŭzis longdaŭran aplaŭdadon fare de la kongresanoj. Krom reprezentanto de ministerio de sociala prizorgo salutis la kongreson la direktoroj aŭ reprezentantoj de tri blindulinstitutoj en Aŭstrujo, ĉiuj prezidantoj de la aŭstraj blindulaj kaj porblindulaj organizaĵoj kaj la eksterlandaj reprezentantoj.

Vendredon, en la unua laborkunsido prof. Stejskal detale raportis pri la ĝisnunaj atingiĝoj de IBIS, la internacia blindulinformejo kaj statistikejo en Praha. Sekvis tre interesa raporto de samideano Koleff pri la situacio de la bulgaraj blinduloj, kie fondiĝis la unua blindulorganizaĵo nur en 1921, kiu estas esperantema kaj helpas la

eldonon de esperanta lernolibro por meminstruado. Tre interesis liaj informoj pri la rondvojaĝanta blindula orkestro, kiu koncertas en multaj urboj.

Samideano Aaron Cohen el Anglujo post kelkaj klarigaj vortoj submetas jenan proponon je la aprobo de la "kvara": "Estus dezirinde fondi internacian asocion de blindaj diplomitaj masaĝistoj havantan similajn statuton kaj aliĝkondiĉojn je tiuj aprobitaj de la anglaj masaĝistaj unuiĝoj: "Chartered society of massage and medical gymnastics" kaj "Association of certificated blind masseurs". La societa lingvo estos Esperanto. La parolinto donis kelkajn interesajn informojn pri la anglaj masaĝistaj societoj kaj kun aprobo de la "kvara" li prezentis la rezolucion posttagmeze al la kuracista kaj ruĝkruca fakkunsidoj de la ĉefkongreso, kiuj ambaŭ akceptis la tekston per jena deklaro: "La Ruĝkruca fakkunveno akceptas la ĝi-supran rezolucion kaj konsentas, ke blindaj diplomitaj masaĝistoj, membroj de la internacia asocio aŭ de naciaj aprobitaj asocioj de masaĝistoj, rajtas funkcii ĉe Ruĝkrucaj malsanulejoj kaj klinikoj, kie ili estos enoficigataj kiel eble plej ofte".

Tagmeze okazis la metiista fakkunsido kaj tiu de la muzikistoj.

Sabaton, la 9-an de aŭgusto UABE okazigis sian unuan ĝeneralkunvenon, pri kiu ni raportis detale en la deka ĉapitro.

Posttagmeze la blindulkongresanoj partoprenis la oficialan inaŭguron de memortabulo pri nia majstro ĉe la hotelo Hammerand, Florianigasse, kie loĝis d-ro Zamenhof dum okulkuracista studado en Vieno.

Vespere okazis la tradicia koncerto de blindaj virtuozaĵoj antaŭ la ĉefkongreso kun bona sukceso. Kunagis en ĝi kvar ĉeĥaj; tri germanaj, po unu jugoslava kaj hungara nevidantaj gevirtuozoj. Kun granda plezuro la esperantista publiko aŭskultis ĝis la fino de la programo, kiu daŭris preskaŭ kvar horojn.

La 11-an de aŭgusto la "kvara" aranĝis sian amuzvesperon kun vere artistaj programoj. Menciindaj estas la bela ĥora kantado de la vienaj samsortanoj kaj ilia orkestra ludado. Kantado, deklamado kaj ludado fare de la kongresanoj Bauer, Breiner, Sonntag kaj Peters kaŭzis ĉarmoplenan ĝuon. Ni ne forgesu pianludadon de la 15-jara Imre Ungar [1909–1972].

London, la 11-an de aŭgusto komence de la tria laborkunsido estis legita letero de pola blindulinstruisto, kiu prezentis rezolucion pri deviga instruado de Esperanto en la blindulinstitutoj. La kongreso decidis transdoni la kompletigitan rezolucion al UABE, kiu ĝin sendu al kompetentaj instancoj ĉiulandaj.

Post legita raporto de patero Agnello pri la blindulafera situacio en Belgujo Adolf Selten enkondukis gravan diskutadon pri la temo: "La blindul-insigno", kiu ne rezultigis decidon fare de la kongreso; estis tro multaj proponoj. Sekvis pridiskutado pri jenaj temoj: "internacia supera lernejo helpe de korespondado kaj Esperanto"; "komerco kaj blinduloj"; "fremdaj vortoj en Esperanto-tekstoj"; tamen ne estas eble citi ĉiujn pridiskutitajn temojn.

Mardon, la 12-an de aŭgusto okazis laŭprograme la ferma kunsido, kiun tamen oni daŭrigis la sekvantan tagon per mallongdaŭra kunsido. Post referato de prof. Stejskal pri la ekspozicio de blindulkondukistaj hundoj en Praha, Victor Hendriĉ raportis pri la societo "Tiflos" ĵus fondita en Bruselo, societo komerca kaj industria por kaj per blinduloj. La kongreso respondis kvar gravajn demandojn pri blindulaj aferoj de patero Agnello el la blindulinstituto en Bruselo.

D-ro Bano donis tre koncizan raporton pri la laboroj kaj decidoj de la alfabeto-subkomisiono. La decidoj de la fakkomisiono pri litersignoj en Esperanto-tekstoj estis akceptitaj de 35 kontraŭ 8 voĉoj. En akceptita rezolucio la kongreso rekomendis al ĉiulandaj blindulorganizaĵoj uzi internacian insignon: flavan rubandon kun nigraj punktoj laŭ tiu senco, ke ĝi ne devigu la portadon de tiu insigno, sed nur la kreadon de tia internacia insigno por uzi laŭbezone. La konstanta kongresa komitato estis reelektita.

Vespere multaj kongresanoj ĉeestis la prezentadon de la teatraĵo "La malŝparulo" de Ferdinand Rajmund en bonega traduko de kolonelo Franz Zwach.

Merkredon, la 13-an de aŭgusto posttagmeze kolektiĝis la kongresanoj je mallonga kunsido kun jena tagordo: resuma raporto pri la muzikista kunveno; resuma rezulto pri la metiista kunveno; resumaj rezultoj de la "kvara"; rezultato de la monkoklekto por EL; adiaŭa parolo de la prezidanto.

19 La "kvina" en Edinburgo 1926

La jaron post la bonsukcesa kongreso en Vieno ne ekzistis ŝanco organizi blindulesperantistan kongreson en Ĝenevo, la urbo de la 16 universala kongreso, pro tio, ke tie ne nur mankis blindaj samideanoj por prepari la kongreson, sed ankaŭ konvenaj ejoj por aranĝi ĝin.

La kvinan internacian kongreson de blindaj esperantistoj okazintan en la skota ĉefurbo Edinburgo de la 2 ĝis la 9 de aŭgusto 1926 ĉeestis 27 nevidantaj samideanoj el 7 landoj, inter ili 9 gelernantoj de f-ino Holden, instruistino en la

reĝa blindullernejo en Bradford. La kongreskomitato konsistis el W. P. Merrick, prezidanto kaj organizinto de la kongreso; Aaron Cohen, vicprezidanto kaj s-rino L. Merrick, protokolistino.

Okazis kvar kunsidoj. En la dua kunsido Agnes Melchior informis la kongresanojn pri nova invalidpensa leĝo en Danujo, la plej bona en Eŭropo por blinduloj. Post raporto de samideano Theyrer el Vieno pri la agado de la aŭstra blindulunuiĝo vicprezidanto Cohen sciigis, ke en Britujo kaj la kolonioj nun ekzistas asocio de blindaj masaĝistoj havanta preskaŭ 200 membrojn. Armeo da honoraj vicprezidantoj estas kuracistoj kun bonaj spertoj pri blindaj masaĝistoj. La asocio disponas pri biblioteko kun 800 priprofesiaj volumoj brajlaj, kaj ĉiumonate aperanta gazeto redaktata de kuracisto informas la legantojn pri novaj kuracmetodoj. La kursoj pri masaĝo daŭras ĝis du jaroj kaj la gelernantoj devas plenumi la ekzamenojn sub la samaj kondiĉoj kiel vidantoj.

En la vendreda kunsido la honora prezidanto prof. Cart interese rakontis interalie, kiel li, Monnier kaj Thilander fiksas "internacie" la brajlan Esperanto-alfabeton kaj kiel li fondis nian gazeton Esperanta Ligilo.

Ses anoj de UABE petis la estraron eldoni plenan kaj koncizan raporton pri la agado de la asocio por la kongreso en Danzig.

En unu kunsido Julius Hasselbach atentigis pri tio, ke dum la "kvara" en Vieno oni proponis, ke blinduloj portu brakrubandon flavan kun nigraj punktoj por eviti akcidentojn pro la trafiko. Kun aprobo de la polico en Berlino jam multaj blinduloj portas la rubandon, sed almozpetaj blinduloj ne rajtas porti ĉin. Estus dezirinde enkonduki ĝin internacie.

20 La "sesa" en Danzig 1927

La sesan internacian kongreson de blindaj esperantistoj, okazintan en la libera urbo Danzig de la 28 de julio ĝis la 5 de aŭgusto 1927, partoprenis 38 personoj el 7 landoj: Anglujo 8; Ĉeĥoslovakio 6; Danujo 1; Finnlando 6; Germanujo 10; Hungarujo 3; Norvegujo 2 kaj Skotlando 2. La blindulkongresanoj loĝis, manĝis kaj kunsidis en la blindulinstituto dank' al komplezemo de ĝia direktoro Walter Neumann, kiu kune kun Joseph Kreitz faris la tutajn preparajn laborojn, kvankam la direktoro mem ne estis esperantisto.

La malferma kunsido de la "sesa" okazis en granda salono de la urbdomo de Danzig en ĉeesto de vidantaj samideanoj. Jena kongreskomitato estis elektita:

J. Kreitz, prezidanto; W. P. Merrick kaj A. Selten, vicprezidantoj; samideanino V. Järvenpää kaj L. Ulmer, sekretarioj; prof. Stejskal, konsilanta komitatano.
La kongreso akceptis novan kongresordon kun kelkaj ŝanĝoj.

Samideanino Minny Miksch el Praha interese prelegis pri la temo "Praktika instruado al blindulinoj pri dommastrumado". "Radio kaj blinduloj" estis la titolo de referato de J. Kreitz, kiu sciigis interalie, ke jam en 1925 la germana poŝtadministracio dekrete, ke nevidantoj kaj institucioj por korpe difektitaj personoj ne bezonas pagi ĉiumonatan abonprezon por radio-aŭskultado kaj ke blinduloj ricevu laŭeble senpage radio-aparaton. Same en Anglujo la blinduloj ĝuas senpagajn radio-disaŭdigojn.

Pri "Porblindula pensio" prelegis finna blindulamiko A. Heliä kun la rezulto, ke la kongreso akceptis rezolucion pri ŝtatpensio por blinduloj.

Pri la kunsido de UABE ni jam detale raportis en la ĉapitro pri tiu organizaĵo.

Dimanĉon, la 30-an de julio posttagmeze je la tria h. oni vidis la blindulkongresanojn en Zopot, antaŭurbo de Danzig kaj fama banloko, kie la esperantistaro el multaj landoj plantis kverkon omaĝe pri la kvardekjara ekzisto de Esperanto. La loko estis nomita "Esperanto-placo". El multaj landoj oni portis teron por ĵeti sur la radikojn de la kverko. Bedaŭrinde, post kelkaj monatoj bubaĉoj detruis la kverkon plantitan de la esperantistoj, forseginte ĝin ĉe la trunko. Vespere niaj samideanoj nevidantaj ĉeestis la kvardekjaran jubilean feston de Esperanto en la ĉefkongresejo belege ornamita.

La lunda mateno estis libera por doni okazon al la blindulkongresanoj ĉeesti la prelegojn de la "Somera universitato", kie parolis eminentaj samideanoj pri interesaj temoj.

Posttagmeze, en la tria laborkunsido prezidanto Kreitz varmkore salutis ĉeestantan gaston, Felikso Zamenhof, kiu respondis per jena poemo:

Al blinduloj

Feliĉa estas ofte vi, blindulo,
ho, kiel ofte vin envias mi!
kiam oreloj aŭdas, la okulo
via ne vidas, kion aŭdis vi.

Vi lumon, sunon havas en interno.
Malvarman nokton ĉirkaŭ vi,
dum ni, vidantoj, lumon en ekstero
kaj nokton havas ni en ni.

Do vi ne plendu sorton, ho blindulo,
malgajan penson pelu ĉiam for,
kian valoron havas la okulo,
se surda, blinda estas nia kor'.

Poste samideanino [Laina] Nieminen parolis pri MOBOMO kaj samideanino Bartuškova raportis pri TABOMO, asocioj tiam jam preskaŭ mortintaj. Post referato de Agnes Melchior pri "Ekzercado de imagkapablo de blindaj infanoj", prof. Stejskal parolis pri "Memorkapablo de blindaj infanoj". Jam la saman tagon okazis adiaŭa vespero en la blindulinstituta salono kun bela programo kune kun la blinduloj el Danzig, ĉar la finnaj gesamideanoj en la sama nokto jam devis perŝipe vojaĝi hejmen, kaj postan tagon kelkaj kongresanoj el Germanujo vojaĝis al Königsberg por tie partopreni la germanan kongreson pri blindulbonfarto.

La 2-an de aŭgusto matene la restintaj blindulkongresanoj vizitis la "Someran universitaton" por tie ĝui bonegan paroladon de d-ro Privat "Pri elparolado de Esperanto". Ĉiu kongresano ricevis senpage gramofondiskon kun la citita parolado. Posttagmeze multaj el ni vizitis la ferman kunsidon de la ĉefkongreso kaj ĝuis belegan koncerton.

Estis vere memorinda kongreso.

21 La "sepa" en Antverpeno 1928

La sepa internacia kongreso de blindaj esperantistoj okazis en Antverpeno de la 3-a ĝis la 11-a de aŭgusto 1928. Aliĝis 65 gesamideanoj, el kiuj efektive partoprenis la kongreson 43 personoj (29 blinduloj kaj 14 vidantoj) el 6 landoj: Anglujo 22; Belgujo 7; Germanujo 10; Hungarujo 1; Irlando 1; Skotlando 2. Ĝenerale la kondiĉoj estis malfavoraj pro tio, ke la viroj devis loĝi en orfejo por knaboj kaj la blindulinoj en orfejo por knabinoj, kio grave malfaciligis la kondukadon. Krome oni devis manĝi en restoracioj kaj tial pasigi la tempon en la urbo. Ĉiuj blindulkongresaj kunsidoj okazis en kunvenejo de la ĉefkongreso, kio havis la avantaĝon, ke multnombraj vidantoj ĉeestis ilin.

Vendredon, la 3-an de aŭgusto, la alvenintaj "sepanoj" ĉeestis la internacian vesperon kun muziko kaj dancado.

Matene, la 4-an de aŭgusto, oni preparis la laboron de la kongreso kaj posttagmeze multaj ĉeestis la koncerton en la zoologia ĝardeno, kie ĉiuj kongresanoj ĝuis senpagan enirrajton. Vespere okazis la solena malfermo de la Universala Kongreso kun la kutimaj alparoloj kaj salutoj.

Dimanĉe, post Diservoj kaj promenado kvazaŭ procesia kun muzikistaroj kaj standardoj, Joseph Kreitz kaj Victor Hendriĉ kiel reprezentantoj de UABE estis ankaŭ invititaj al kunveno ĉe la urbestro kaj ili profitis la okazon por danki la urbestron Van Gau Welaers.

Lundon matene okazis la malferma kunsido de la "sepa", bone vizitita ankaŭ de vidantaj amikoj. D-ro Feliks Zamenhof estis elektita kiel honora prezidanto kaj li, dankante, diris interalie: "Unu peton mi havas al vi: bonvolu enigi min en via koro, kiel plej sincera kaj vera kaj daŭra amiko". Jena estraro estis elektita: Joseph Kreitz, prezidanto; W. P. Merrick, vicprezidanto; Victor Hendriĉ, sekretario kaj Julia Molnar, vicsekretariino. Post alparolo de la prezidanto Aaron Cohen parolis pri la temo: "Radio kaj blinduloj" kaj poste la parolinto sciigis, ke li intencas fari frenologiajn eksperimentojn dum la kongreso profite de EL. Vespere oni vidis la blindulkongresanojn en la franca operdomo por ĉeesti koncertfeston.

Mardon ne okazis kunsidoj kaj estis libera tago por la kongresanoj.

Merkredon matene en la ĉambro B de la "Cercle Artistique" (ejo de la arta societo), kiu estis rezervita por la blindulkongresaj kunvenoj, okazis la unua laborkunsido. J. Kreitz faris retrorigardon pri la farita laboro post la kongreso en Danzig kaj skizis

la situacion de blinduloj en diversaj landoj. Interese Anna Friman raportis letere pri la blindulmovado en Finnlando. Poste Aaron Cohen, nia masaĝafera pioniro, raportis pri sia laboro en tiu kampo depost nia kongreso en Vieno. Por starigo de la tiam decidita asocio de blindaj masaĝistoj li vojaĝis al Praha, Budapest, Danzig, Krakow, Lwow kaj Varsovio. Jam ekestos asocioj en Pollando kaj Finnlando. Li promesis daŭrigi sian laboron en Belgujo kaj Hispanujo.

Pri industria laboro por blinduloj oni raportis pri la stato en Anglujo, Belgujo, Ĉeĥoslovakio, Hungarujo ktp. Sekvis diskutado pri aliaj malpli gravaj temoj. Posttagmeze la blindulkongresanoj ĉeestis la jubilean kunsidon de UEK kaj ili pasigis neforgeseblan vesperon en la flandra operdomo, kie la Hamleto-tragedio estis prezentita en Esperanto de profesiaj geaktoroj.

Ĵaŭdon matene okazis la ĝeneralkunveno de UABE, pri kiu ni jam raportis en la ĉapitro pri UABE. Vespere kelkaj ĉeestis la kostumbalon.

Vendredon je la naŭa h. okazis la ferma kunsido kun la kutimaj dankesprimoj kaj legado de kvar rezolucioj akceptitaj. Samideanino Julia Molnar invitis ĉiujn partopreni venontjare nian "okan" en Budapest.

22 La "oka" en Budapest 1929

Kiel ni jam menciis en la deka ĉapitro, pro subita morto de prof. Stejskal, la sekretario kaj protokolinto de la "oka", perdiĝis ĉiuj liaj protokoloj pro tio, ke li mortis kaŭze de infekta malsano, kaj oni forbruligis ĉiujn liajn dokumentojn interalie. Niaj legantoj do devas kontentiĝi je tiuj informoj, kiujn ni sukcesis akiri.

La oka internacia kongreso de blindaj esperantistoj okazis en la hungara ĉefurbo Budapest de la 2 ĝis 9 de aŭgusto 1929. La plej multaj blindulkongresanoj loĝis en la "landa reĝa instituto por blinduloj Palateno Jozefo". El 180 aliĝintoj partoprenis 114 el 14 landoj. Granda honoro por la kongreso estis la persona ĉeesto de nia amata H. Thilander kun edzino [Varma Järvenpää 1899–1986] kaj multaj eminentuloj el la blindularo. La blindulinstituto loĝigis senpage la plej multajn kongresanojn kaj zorgis pri senpaga matenmanĝo, pri lokoj por la kunsidoj kaj aliaj aranĝaĵoj, sed ĝi ne povis doni tag- kaj vespermanĝojn. Senpage aŭtobusoj portis la karavanon alvenintan per vaporŝipo al la kongresejo. La vaporŝipa veturado de Vieno ĝis Budapest kostis preskaŭ neniom. Por grupaj veturadoj de blindulkongresanoj ĉiam servis senpage aŭtobusoj ankaŭ okaze de la bonsukcesinta koncerto de blindaj virtuzoj, kiu eĉ estis disaŭdigita per radio.

Kiel prezidanto funkciis d-ro Bano Miklos kaj honora prezidanto estis H. Thilander. Krom la kvara ĝeneralkunveno de UABE, pri kiu ni detale raportis en la dekunua ĉapitro, okazis tri laborkunsidoj, sed la aranĝo mem de la kunsidoj estis nova: mallonga laborkunsido disigis la anoncittajn temojn al fakaj kunsidoj, en kiuj – unu post alia – oni traktis la temojn samspecajn. Ties rezultojn konfirmis la dua laborkunsido, kiu zorgis pri raporto kaj rezolucioj por la ĉefkongreso

Samideanino Koller el Aŭstrujo proponis vendi manlaboraĵojn faritajn de blindulinoj dum la ĉefkongreso profite al EL. Post referato de Kreitz pri la temo: "La blindulo kiel komercisto", Agnes Melchior raportis, kiel oni devas uzi siajn kapablojn instruante blindajn infanojn. Pridiskutitaj estis interalie jenaj temoj: instruado de malforte vidantaj infanoj; instruado de surdmutaj blindaj infanoj; instruista ekzameno pri la lingvo Esperanto kaj instruado. Ĉi tiujn diskutojn kaŭzis la referatoj de direktoro Herodek kaj direktoro Adler. Menciindaj ankoraŭ estas la referatoj de direktoro d-ro Toth pri la rezultoj de la tri kuracpedagogiaj kongresoj; Kuchar pri agado de subtena societo de ĉeĥoslovakaj memstaraj blinduloj kaj Verner Lundgren pri la blindulaferoj en Svedujo.

23 La "naŭa" en Oxford 1930

Pri nia "naŭa" okazinta en Oxford de la 2 ĝis la 9 de aŭgusto 1930 mankas ankoraŭ gravaj informoj; tamen ni klopodos sciiĝi detalaĵojn pri ĝi. Ni nur scias, ke niaj karmemoraj gesamideanoj Merrick estis la solaj aranĝintoj de la blindulkongreso, kiun partoprenis 74 personoj, el kiuj 47 estis blinduloj el Britujo, Ĉeĥoslovakio, Francujo, Germanujo, Irlando, Nederlando kaj Polujo. Ĉar en Oxford ne ekzistas institucio porblindula, la kongresanoj loĝis en privataj loĝejoj tre komfortaj kaj la kunvenoj okazis en kolegio Christ Church. Oportunan manĝejon oni trovis en la ĉefkongresejo. La ĉefaj temoj pritraktitaj estis: "blindul-emancipo", "blinduloj kiel masaĝistoj", "blinduloj en industrio", "gvidhundoj", "metia hejmlaboro" kaj raportoj pri blindula kaj esperanta movadoj en diversaj landoj.

Speciale interesa kaj instrua estis ekspozicio de porblindulaj helpiloj.

[Eltiraĵo el New Beacon, 1930, Thomas Forster

La distra programo enhavis i.a. koncertojn, teatraĵon kaj balon en naciaj kostumoj. Teatraĵon "Charley's Aunt" en Esperanto produktis Julio Baghy. En ĝi aktoritis reprezentantoj de ses landoj. La unuan kaj la duan dimanĉon okazis Diservo en Esperanto. Ekskursoj en Londono okazis al la nacia blindulorganizo NIB (National Institute for the Blind), brajla biblioteko, teksejo de blinduloj kaj zooparko.]

24 La "deka" en Krakovo 1931

Ankaŭ pri tiu ĉi kongreso, okazinta de la 1 ĝis la 8 de aŭgusto 1931 en la bela pola urbo Krakovo, ne estas multe por raporti, ĉar ĝin partoprenis nur 13 personoj el 5 landoj. W. P. Merrick, la sola reprezentanto de UABE, malfermis la kongreson memorante en sia parolado la morton de nia amata "paĉjo" prof. Th. Cart, kiun la kongreso memoris per ekstaro.

Tiam li transdonis la parolvicon al Julius Hasselbach el Berlino, kiu estis la organizinto de la kongreso. Li bonvenigis la kongresanojn kaj la vidantajn gastojn, inter kiuj troviĝis ankaŭ d-ro Feliks Zamenhof, kiu diris interalie: "Ekzistas en la mondo multaj homoj, kiuj ne estas blinduloj kaj tamen ne vidas, ili estas pli kompatindaj ol la blinduloj mem!" Salutis reprezentantoj el Anglujo, Ĉeĥoslovakio, Finnlando, Francujo, Germanujo kaj Polujo. Estis elektita jena kongresestraro: J. Hasselbach (Germanujo), unua prezidanto; Arno Kichel (Polujo), dua prezidanto; Gizela Masarova (Ĉeĥoslovakio), sekretariino. Kiel honoraj prezidantoj estis elektitaj du polaj gesamideanoj vidantaj.

En la unua laborkunsido oni legis raporton de J. Kreitz pri la agado de UABE. Li menciis la fakton, ke la plejmulto el la Uabeanoj voĉdonis por nomŝanĝo. Sekvis referato de samideanino Masarova pri la asocio "Ĉeĥa blindulprezo".

En la dua laborkunsido oni pridiskutis la proponon de J. Kreitz pri konstanta blindulkongresa komitato, kiu decidu pri aranĝo de blindulkongresoj esperantistaj. Post pridiskutado de kelkaj proponoj samideano Epstein el Francujo parolis pri masaĝo kiel blindulprofesio, dirante interalie, ke tiu ĉi profesio estas nuntempe la plej bona vivrimedo por blinduloj kaj ke en Francujo ekzistas faka lernejo, kie ankaŭ alilandaj masaĝostudentoj estas akceptataj.

En la ferma kunsido samideanino Drechsler parolis pri la edukado de blindaj knabinoj en Ĉeĥoslovakio.

La blindulkongresanoj partoprenis du ekskursojn de la ĉefkongreso. Ĝojige estis, ke blindaj kaj vidantaj samideanoj intermiksiĝis.

25 La "dekunua" en Parizo 1932

En la kadro de la 24 universala kongreso de Esperanto en Parizo samtempe okazis la dekunua internacia kongreso de blindaj esperantistoj de la 30 de julio ĝis la 6 de aŭgusto 1932. La aranĝado kaj preparado plejparte kuŝis sur la ŝultroj de nia agema samideano Albert Masselier kune kun la vidantaj helpantaj samideanoj Robert kaj Belsola, kiuj devis venki gravajn malfacilaĵojn ĉefe pro tio, ke la franca registaro rifuzis disponigi la blindul-instituton por enloĝigo de la kongresanoj, tiel ke ili devis loĝi en luitaj hoteloj, sed feliĉe bonegan helpon proponis la franca blindulasocio "Association Valentin Haüy". Ĝi havigis senpagan kongresejon kaj malmultekostajn manĝojn en sia hejmo. Aliĝis 59 kongresanoj el 12 nacioj: Anglujo 8; Ĉeĥoslovakio 5; Francujo 22; Germanujo 5; Hispanujo 1; Irlando 2; Italujo 2; Nederlando 7; Norvegujo 1; Polujo 1 kaj Svedujo 2.

La dimanĉon komencis multaj per ĉeesto en unu el du esperantlingvaj Diservoj. Je la deka h. okazis en amfiteatro de la Sorbonne la solena malfermo de la ĉefkongreso. Posttagmeze okazis ĉe "Amitiés des Aveugles de France" (amikeco de francujaj blinduloj) internacia mitingo de blinduloj kun alparoloj kaj salutoj de la naciaj delegitoj.

La 1-an de aŭgusto okazis la malferma kunsido de la "dekunua" per alparolo de prezidanto Masselier. Laŭ lia opinio la ĉefa tasko de niaj kongresoj estas konvinki la blindulojn kaj blindulamikojn pri la taŭgeco de Esperanto por solvi blindulaferajn problemojn kun internacia signifo. Por kongresa estraro estis elektitaj: A. Masselier, prezidanto; d-ro Tancredi, dua prezidanto; R. Israëls, sekretario; Minny Miksch, dua sekretariino; Ilse Haberland, protokolistino; W. P. Merrick kaj samideanino Maitrejean, konsilantoj. Posttagmeze la kongresanoj vizitis la konatan de la 13-a jarcento jam ekzistantan blindulejon "Quinze-Vingts". Tie ree salutoj kaj alparoloj.

La 2-an de aŭgusto la programo de la unua laborkunsido estis multampla: propono de Masselier pri fondo de internacia instituto por socia adaptiĝo de nevidantoj; referato de Ilse Haberland pri la blindulo kiel stenotipisto, projekto de Masselier pri asocio de blindaj artistoj kaj propono pri fondo de internacia ligo Braille por pliriĉigi la brajlan literaturon; referato de Masier pri maloportuno de grandformataj brajlaĵoj; proponoj de Gonin pri la blanka bastono kaj pri fondo de sindikato de brajlopresistoj; propono de Haugness pri UABO; proponoj de Israëls pri aranĝo de estontaj kongresoj kaj pri eldonado de literatura gazeto. Esceptinte la aldoniĝojn la referatoj kaj la plene ellaboritaj proponoj antaŭe estis presitaj kaj dissenditaj al la aliĝintoj. La vigla pritraktado kaj interdiskutado pri la fondo de ligo Braille plenigis la tutan antaŭtagmezon, kaj fine oni decidis starigi komitaton

por plene ellabori la planon. Jen la membroj de la komitato: Masselier, prezidanto; Israëls, sekretario; kaj membroj konsilantaj: Tancredi, Karterud kaj Minny Miksch.

Posttagmeze la kongresanoj vizitis la hejmon de la militblindigitoj, kie oni ĝuis la gastame prezentitan ĉampanon post salutoj kaj alparoloj. Poste la kongresanaro pilgrimis al la tombo de paĉjo Cart. En la konata tombejo "Père Lachaise" kondukis longa aleo al la ripozejo de nia mortinta amiko, kie la blindaj samideanoj impresite viciĝis ĉirkaŭ la monumento, metante marmoran per bronza palmo ornamitan memorŝtonon kun la (nur franclingva) surskribo:

"Al sia kara paĉjo Th. Cart, la partoprenantoj de la dekunua kongreso de blindaj esperantistoj. Parizo, 30-an de julio – 6-an de aŭgusto 1932". Dum emocio regis nin kaj la ĉeestantojn, prezidanto Masselier parolis: "Jen apud vi estas viaj gefiloj, ho paĉjo! Ĉar vi ne estas mortinta. En ni ĉiuj revivos via nobla spirito. Kaj niavice ni naskos al vi aregon da spiritaj gefiloj en la tuta mondo."

Merkredon la blindulkongresanoj vizitis la muzeon Valentin Haüy, kiu entenas abundajn kolektojn da dokumentoj kaj oni rakontis pri la multaj klopodoj kaj malfacilaĵoj por solvi la fingrolegan problemon tiel de francoj kiel de alilandanoj.

Posttagmeze la blindaj samideanoj veturis al Coupvray, la naskiĝloko de nia antaŭulo Louis Braille. Sur placo, kie staras sur relief-ornamita kolono bronza busto de Braille, la kongresanojn akceptis la komunumaj estro kaj konsilantaro, dum ĉirkaŭstaris preskaŭ la tuta vilaĝanaro. Post bonveniga alparolo de la vilaĝestro, prezidanto Masselier respondis per parolado, en kiu li honoras la grandan filon de Coupvray, kiu malfermis al tutmonda blindularo la vojon al lumo. Sinsekve atestis la delegitoj de 12 reprezentitaj nacioj pri sia estimo al la rememoro de Braille. Same kiel antaŭan tagon ĉe la tombo de paĉjo Cart, ankaŭ marmora memorŝtono kun franclingva surskribo rememorigas pri la pilgrima vizito de la dekunuanoj. Poste, en la pariza antaŭurbo Saint-Mandé la kongresanaro vizitis la departementan instituton Braille. Tre interesa vizito.

Ĵaŭdon matene la tagordo anoncis laborkunsidon je la naŭa kaj duono ĝis la dekdua h., sed kiam je la deka fine komenciĝis la kunsido, la prezidanto anoncis, ke jam je la dekunua h., ĝi finiĝos por ree viziti la muzeon. Kontraŭ tio arde protestis Israëls kaj malmultaj aliaj, dirante, ke oni nur parolas, paroladas, parolegadas, sed ne laboras. Tamen oni kunsidis nur unu horon, dum kiu oni nur aludis la demandon de ges-roj Thilander pri interŝanĝo inter nacioj de blindaj lernejoj sciantaj Esperanton dum feria tempo, sed la prezidanto ne diskutigis la temon konkludante, ke estas dezirinde. Sekvis mallonga diskutado pri enkonduko de mallongigoj en EL-on, ĉefe por kelkaj oftaj vortoj.

Posttagmeze estis vizitoj al la biblioteko, presejo kaj laborejo de "Association Valentin Haüy". Poste ree vizito al "American Braille Press", grandioza presejo.

Vendredon matene ree nur unu horo estis disponebla por laborkunsido pri la ĉefa temo: fondo de asocio de blindaj artistoj kaj por diskutado de proponoj jam aluditaj. Tamen ankoraŭ kelkaj proponoj ne estis diskutitaj pro manko de tempo.

En la ferma kunsido posttagmeze oni alprenis sendiskute rezoluciaron pri la traktitaj kaj ne traktitaj proponoj kaj per dankvortoj de la delegitoj finiĝis la kongreso.

26 La "dekdua" en Kolonjo 1933

Kvankam multaj eksterlandaj ĵurnaloj avertis, ke oni ne vojaĝu Germanujon pro la nacisocialista reĝimo, kiu kaŭzos neantaŭvideblajn malfacilaĵojn, tamen la dekduan internacian kongreson de blindaj esperantistoj, okazintan en Kolonjo de la 29 de julio ĝis la 5 de aŭgusto en la jaro 1933, partoprenis 52 personoj (27 blinduloj kaj 25 vidantoj) el 10 landoj: 4 angloj, 2 ĉeĥoj, 3 francoj, 33 germanoj, 2 irlandanoj, 1 italo, 1 japano, 4 nederlandanoj, 1 norvego kaj 1 svedo. Preskaŭ ĉiuj blindulkongresanoj kaj iliaj gvidantoj loĝis, manĝis kaj ankaŭ kunvenis en mezranga hotelrestoracio kun la stranga kaj dialekta nomo "Emm decke Tomes" (en la dika Tomaso).

Dimanĉe, la 30-an de julio, post matena Diservo la blindulkongresanoj partoprenis la solenan malfermon de la ĉefkongreso kaj samdimanĉe okazis la malfermo de la "dekdua" en salono de la ĉefkongresejo. Joseph Kreitz, la organizinto de la kongreso kaj membro de la Loka Kongresa Komitato, malfermis la kongreson dezirante al ĝi bonvenon en Kolonjo. Jena kongresestraro estis elektita: prof. d-ro Raffaele Tancredi (Italujo), honora prezidanto; J. Kreitz, prezidanto; Etienne Bouquin (Francujo) kaj W. P. Merrick, vicprezidantoj; Ch. Hedqvist (Svedujo), sekretario kaj protokolanto; M. Miksch (Ĉeĥoslovakio), dua sekretariino; Alf Arnesen (Norvegujo) kaj Dirk Schipper (Nederlando), konsilantoj.

Post alparolo de la prezidanto oni voĉlegis alvenintajn telegramojn kaj salutis la diverslandaj reprezentantoj.

En la unua laborkunsido, la 30-an de julio Minny Miksch el Praha prezentis interesan referaton pri la historio, evoluo kaj nuna stato de la blindulmovado en Ĉeĥoslovakio kun serio da deziroj kaj postuloj al kompetentaj instancoj kaj la publiko. La prezidanto rekomendis transdoni la referaton al la projektita mondkongreso de blinduloj okazonta en Amsterdam venontan jaron.

Sekvis diskutado pri laboroj de blinduloj en la industrio, pri bonŝancoj de blindaj muzikistoj kiel privatinstruistoj kaj kiel instruistoj en blindulinstitutoj.

Propono de la komitato de UABO pri kongresordo post diskutado pri kelkaj nepre necesaj ŝanĝoj estis akceptita.

La unua ĝeneralkunveno de "Universala asocio de blindulorganizaĵoj" (UABO) okazis la 1-an de aŭgusto. Pri ĝi ni detale raportis en la 12 ĉapitro.

La ĉefa temo de la dua laborkunsido okazinta merkrede, la 2-an de aŭgusto, estis la projektita porblindula kongreso okazonta en Amsterdam 1934 kun la rezulto, ke la "dekdua" komisiis al prof. d-ro Tancredi elverki rezolucion al la aludita kongreso postulante allasi Esperanton kiel kongresan lingvon same kiel kelkajn naciajn lingvojn.

Harald Thilander kaj Charles Hedqvist prezentis referaton legitan de Ch. Hedqvist mem sub la titolo "Novaj vojoj por la blindula vivnutra laboro", en kiu ili proponis starigon de trimembra komisiono kun la celo esplori la eblecojn por blindula laboro en la ĝenerala industrio, parte en fabrikoj por viduloj, parte en fabrikoj speciale starigitaj por blinduloj. Kiel anojn de la komisiono la kongreso elektis la samideanojn Arnesen, Ezquerra (Hispanujo) kaj Kreitz.

Sekvis referato de Alf Arnesen pri ebleco havigi al blinduloj kompare malmultekostajn skribmaŝinojn kaj aliajn aparatojn, tiamaniere ebligante al pli multaj samsortanoj akiri tiajn helpilojn tiel necesajn, precipe al inteligentaj blinduloj. La parolanto proponis starigon de trimembra komitato por esplori la aferon, sed la kongreso decidis transdoni ĉi tiun taskon al la komitato de UABO.

En la ferma kunsido, okazinta la 4-an de aŭgusto, unue oni pritraktis kelkajn malpli gravajn proponojn ne realigeblajn dum la nuna maltrankvila politika situacio, kaj poste estis elektitaj kiel anoj de internacia blindulkongresa komitato H. Thilander, prof. d-ro R. Tancredi kaj J. Kreitz.

Post kelkaj klarigoj de W. P. Merrick pri masaĝo kiel blindullaboro en Anglujo, Ch. Hedqvist varmkore invitis la "dektrian" okazontan en Stockholm de la 4 ĝis la 11 de aŭgusto venontan jaron.

La "dekdua" estis aranĝita plenakorde kun la ĉefkongreso, por ke blindaj samideanoj povu senĝene partopreni ankaŭ ĉiuspeciajn kunvenojn porvidulajn, la prelegojn de la "Somera universitato" kaj ĉiun programitan amuzaĵon kune kun la vidantaj

kongresanoj. Blindulkongresanoj do partoprenis la interkonan vesperon, la ekskurson, la "amuzan rejnlandan vesperon" laŭ kolonja maniero kaj la internacian balon de la ĉefkongreso.

Menciinda ankoraŭ estas la koncerto de la blindulkongreso okazinta la lastan tagon. La kolonja miksitaj ĥoro (blindulĥoro) unue kantis la "Preĝon sub la verda standardo" de Zamenhof, komponitan por la kongreso de nia samideano Schönewolf el Berlino. Poste la ĥoro kaj duobla kvarteto sub direktado de Friedrich Donner brile kantis belajn germanajn popolkantojn en Esperanto. Ege plaĉis la fortepiana ludo de Dirk Schipper (Nederlando), la arta gitara ludado de Baldomero Zapater, sed ankaŭ grandan aplaŭdon elvokis la kantoj de la koncertkantistinoj Josefiak kaj Sauer el Kolonjo samkiel la eminenta koncertkantisto Georg Kuntze el Dreseno, kiu bedaŭrinde mortis dum milite kaŭze de bombatako.

27 La "dektria" en Stockholm 1934

La dektrian internacian kongreson de blindaj esperantistoj, okazintan en Stockholm de la 4 ĝis la 11 de aŭgusto en la jaro 1934, ĉeestis 106 personoj el dekunu landoj: 57 alilandanoj kaj 49 svedoj, 80 blinduloj kaj 26 vidantoj. La "dektria" ne alportis malbonon spite de la malbonfama kaj popolsuperstiĉa nombro, sed male feliĉon, sukceson kaj harmonian kunlaboradon de diversnaciaj samsortanoj-samideanoj. Certan garantion pri la sukceso de la kongreso jam antaŭ donis tiu cirkonstanco, ke ĝi estis kunvokita de unu el la plej gravaj blindulorganizaĵoj de la nordaj landoj, kaj ankaŭ, ne malpli la fakto, ke ĝin preparis eminentaj svedaj blindulkondukantoj: direktoro Alarik Lundberg, prezidanto de la invitinta organizaĵo "De blindas förening", rektoro Gustaf Ek, estro de la reĝa blindulinstituto en Tomteboda, jur. kand. Ernst Retsler, "Blindvårdskonsulent", t.e. konsilanto de la tutsveda blindularo, kaj niaj karaj Gethilander.

La blindulinstituto en Tomteboda gastigis la kongreson dum tuta semajno.

Jam sabate post partopreno en la malferma kunsido de la 26 universala kongreso de Esperanto en la koncerta domo en Stockholm, interkona vespero kunigis ĉiujn blindulkongresanojn en la gimnastika halo nun ŝanĝita en festsalonon de la blindulinstituto. Ĝin malfermis nia Varma Thilander deklamante sian mirinde verkitan dektristrofanan poemon "Bonvenon al ni Dektria!" kaj poste Harald Thilander per kelkaj vortoj salutis aparte ĉiujn alvenintajn alilandajn samideanojn tiele, ke oni sin sentis hejme en la internacia kunloĝejo.

Dimanĉmatene nia norvega samideano pastoro Overvoll predikis en la preĝosalono de la instituto pri Esperanto kaj mondharmonio. Poste busoj portis la kongresanojn al la haveno por fari ekskurson tra la fama stockholma arkipelago. Fine, en plena sunbrilo la ŝipo atingis la idilian insuleton Tynningö en la Balta Maro. Sur tiu ĉi ĉarma insuleto troviĝas Phosphoros, malgranda ripozhejmo de la svedaj blinduloj. Post salutoj kaj resalutoj oni promenadas eĉ sin banas en la Balta Maro. Ĉar en Svedujo oni tagmanĝas vespere, post ĉi tiu belega ekskurso la tagmanĝo bonege gustis al ĉiuj. Multaj kongresanoj poste ĉeestis koncerton en la koncerta domo, kie konata sveda ĥoraro bone prezentis svedajn popolkantojn, parte esperante, parte svedlingve.

Lunde, la 6-an de aŭgusto je la naŭa h. direktoro Alarik Lundberg, prezidanto de la invitinta organizaĵo "De blindas förening" per forte aplaŭdita bonveniga parolado en Esperanto salutis kaj malfermis la "dektrian", dirante interalie:

"Kiam mi dum la "Tago de la blinduloj" pasintan aŭtunon per radio disaŭdigis miajn bonvenigajn vortojn al la gesamsortanoj en ĉiuj landoj, petante ilin kolektiĝi en la ĉefurbo de Svedujo, mi apenaŭ kuraĝis esperi, ke mian inviton sekvos tiom da samideanaj geamikoj, kiel nun okazis. Ĉie en la mondo la blindulafero ĉiujare faras novajn paŝojn antaŭen; la socia kaj la humaneca justeco konstante kreas al ĝi novajn konkerojn. Nia tempo neniel neas la signifon de la internacia kunlaborado kiel levilo en la evoluo, nek la valoron de la internacia lingvo Esperanto, kiu eĉ sur blindulmovada tereno certe povas unuigi la popolojn en valoro por la komunaj celoj. Kun certeco ni supozas, ke la ŝtata blindulpensio, unuanime akceptita kiel leĝo, altiras vian specialan atenton, kiam ĝi nun inter aliaj gravaj demandoj estas eniĝita en la kongresa programo. La sveda blindulmondo kore ĝojas pro sia ĵusgajnita granda sukceso kaj volas en la pritrakto de la kongreso pri tiu ĉi gravega afero vidi rimedon efektiviĝi ĝian definitivan venkon en ĉiuj landoj. Do, nia kunigita celkonscia laboro helpu produkti rezultojn de daŭra valoro en nia komuna afero. Tio estas mia sincera deziro kaj jen mi deklaras la dektrian mondkongreson de blindaj esperantistoj malfermita".

Laŭ propono de la prepara komitato, la kongreso elektis jenan estraron: prezidanto: Joseph Kreitz; vicprezidantoj: kapitano Jan Silhan, Polujo kaj redaktoro Edvard Imsdahl, Norvegujo; sekretario: Charles Hedqvist kaj dua sekretario: Ilse Haberland. La prezidanto dankis pro la konfido montrita al li, uzante la okazon por atentigi, ke la Esperanto-movado inter la blinduloj nunjare povas festi sian tridekjaran jubileon, memorigante pri niaj grandaj pioniroj prof. Cart, Harald Thilander, W. Percy Merrick, d-ro Bano k.a. Poste li gratulis la svedajn samsortanojn pro tio, ke ili posedas inter si tian viron, kia estas direktoro Lundberg, kaj li

proponis, ke la kongreso montru sian grandan estimon kaj koran dankon al la blindulkondukanto pro lia grava laboro por la blinduloj, elektante lin honora prezidanto. Membroj de la honora komitato fariĝis unue rektoro Gustaf Ek, kiu donis tiom valoregan helpon al la kongreso, due Ernst Retsler kaj trie nia pioniro Harald Thilander.

Dum la kutimaj salutoj de la naciaj reprezentantoj Einar Juvonen, prezidanto de la finna centra ligo de blinduloj komunikis, ke la blindulpensia afero nun estas en sufiĉe progresinta stadio, ĉar la finna registaro promesis fari proponon pri tiukoncerna leĝo al la parlamento jam kunvenonta tiun ĉi aŭtunon. La prezidanto petis interrompi la salutojn kaj aŭskulti prelegon de jur. kand. Ernst Retsler pri la blindeca kompenso en Svedujo. La preleginto skizis la tridekjaran laboron, kies rezulto estas la nunjare alprenita leĝo pri blindeca kompenso, laŭ kiu ĉiu sveda blindulo, kiu plenumas la kondiĉojn fiksitajn en la leĝo, ricevas 500 kronojn ĉiujare. Laŭ propono de Agnes Melchior, la kongreso sendis dankotelegramon al la sveda socialministro pro la grava helpo, donita al la svedaj blinduloj, kio certe ankaŭ influos la evoluon de la blindulpensia afero en aliaj landoj.

Posttagmeze la blindulkongresanoj partoprenis en la akcepta festo, kiun aranĝis la urbo Stockholm por la tuta universala kongreso.

En Tomteboda, je la kvara h. okazis la malfermo de ekspozicio, en kiu oni montris al la diversnaciaj samideanoj multajn blindulhelpilojn ne nur produktitajn en Svedujo, sed ankaŭ anglajn, germanajn kaj alilandajn.

La 7-an de aŭgusto je la 9 h. post la malfermo de la unua laborkunsido direktoro Alarik Lundberg skizis dum vere interesa prelego la disvolviĝon de la sveda blindulafero. Li mem aktive partoprenis la movadon kaj tial li plej bone povis konstati la grandiozan evoluon dum tiu ĉi periodo. Ne estas eble en la kadro de nia "Historio" ripeti la enhavon de prelegoj, sed ni atentigas, ke multaj el ili ekzistas en brajla preso. La prezidanto dankis al direktoro Lundberg pro lia interesege prelego dezirante, ke la progresoj de la blindulafero en Svedujo servu kiel ekzemplo kaj modelo por aliaj landoj, kie oni ankoraŭ ne atingis tiom, kiom en la ĉi-jara kongresa lando.

Posttagmeze la kongresanoj sekvis la inviton de direktoro Lundberg por viziti la instituciojn de "De blindas förening" en Majorsgatan. Oni rigardis la bibliotekon kun 12 000 volumoj, la laborejojn: korb- kaj brosfarejojn por sepdeko da viroj. En la teretaĝo per elektromotoraj maŝinoj estas pretigataj la lignoj de ĉiuspecaj brosoj. En alia domo troviĝas la loĝejoj por multaj nevidantaj fraŭloj kaj edziĝintoj. Nuntempe

la institucioj de la organizaĵo kun oficejoj, propra brajla presejo kaj sonbendstudio ktp. troviĝas en Gotlandsgatan en multe pli grandioza amplekso.

Dum la muzikvespero la kongresanoj havis la plezuron ekkapti iom da muzikaj perloj de kelkaj el la reprezentitaj nacioj. Post tio surprizo! En alia salono de la instituto estis aranĝita scenejo; la aktorinoj ludis malantaŭ kurteno. Sed kion ili ludis? Fabelludon verkitan kaj ankaŭ gviditan de Varma Thilander sub la titolo "Ĉe la lulilo; ludo pri feinoj, kiuj dotas ĵusnaskiton." Ravite oni sekvis la kantojn kaj la paroladojn de la feinoj en fabela lando. Jen sin prezentis belstila, modela Esperanto-poemo, brile, flue parolata de belsonaj voĉoj.

La 8-an de aŭgusto UABO havis du kunsidojn de la dua ĝeneralkunveno, pri kiuj ni raportis detale en nia dekdua ĉapitro.

La 9-an de aŭgusto je la naŭa h. dum la dua laborkunsido rektoro Ek prelegis pri la blindulinstruado en Svedujo raportante, ke la instruado de blinduloj estas deviga depost la jaro 1897 kaj ke ĉiuj blindullernejoj estas ŝtataj. Plue li emfazis la fakton, ke oni penas fari la edukadon de blinduloj kiel la plej racia kaj efika, por ke la nevidantoj estu utilaj socioj. Interese estis sciigi, ke fakultativa instruado estas donata pri esperanta, angla kaj germana lingvoj. La prezidanto dankis la preleginton kaj transdonis la parolvicon al Agnes Melchior, kiu prelegis pri ilustraĵoj en la instruado de blindaj infanoj, pri kio en Danujo oni eksperimentis kun kontentigaj rezultoj dum la lastaj jaroj. Finante la prelegon, ŝi petis tiujn, kiuj interesiĝas pri la afero, esplori ĉi-koncernajn objektojn en la ekspozicio kaj poste diri siajn opiniojn kaj ankaŭ kritikojn. Sekvis mallonga diskuto, dum kiu oni demandis pri diversaj detaloj. Redaktoro Imsdahl esprimis la deziron, ke oni povu publikigi la bildojn uzatajn en Danujo, por ke ili utilu ankaŭ al alilandanoj.

Direktoro Lundberg prezentis al la kongresanoj s-rinon Julia af Burén, kiu promesis prelegi pri "Kronprinsessan Margaretas arbetsnämnd för de blinda" (porblindula laborkomisiono de kronprincino Margareta). S-rino af Burén prelegis pri sia organizaĵo svedlingve interpretite de Varma Thilander. La prelegintino rakontis pri granda interesiĝo por blinduloj, kiun montris la forpasinta kronprincino Margareta, kaj kies rezulto estas la antaŭe nomita organizaĵo, kiu nun havas komitatojn de vidantaj blindulamikoj en ĉiuj gubernioj kaj en ĉiuj iom grandaj urboj. La bonege organizita unuiĝo de blindulamikoj estas, laŭgubernie gvidata de la edzinoj de guberniestroj. La organizaĵo helpas laŭpove kaj ĉiujare disdonas konsiderindajn financajn subvenciojn kaj ĉefe estas, ke ĝi vendas grandajn kvantojn da laboraĵoj produktitaj de blinduloj. Honora prezidanto (sed tre aktiva honora prezidanto) estas la kronprinco de Svedujo.

En Esperanto kaj germane la prezidanto dankis s-rinon af Burén pro ŝia interesa prelego, sed precipe pro ŝia valorega laboro farata por la svedaj blinduloj. Laŭ propono de kapitano Silhan, la kongreso sendis danktelegramon al Lia Kronprinca Moŝto.

Samtage je la unua h. posttagmeze dum la tria laborkunsido d-ro Nils Juringius raportis interese pri matematikaj skribsistemoj por blinduloj, aludante la laboron de komisiono, kiu jam dum kvin jaroj aktive sin okupis por estigo de internacia matematika brajlosistemo. Por demonstracii la sistemon, la brajla prelego enhavas 4 ilustritajn tabelojn. Kelkaj kongresanoj dankas d-ron Juringius kaj esprimas sian konvinkon, ke la laboro de la matematika komisiono estos akceptita kun kontento kaj dankemo de la samsortanoj en ĉiuj progresemaj landoj.

Post raporto de Eduard Güterbock pri lingvaj skribsistemoj legita de la prezidanto, W. P. Merrick raportis pri la stato de la laboro por estigi internacian fonetikan skribsistemon, kio estas parto de la agado de la menciita skribsistema komisiono. Post mallonga diskuto la kunveno decidis peti la komitaton de UABO eldoni la fonetikan alfabeton en brajla preso.

Poste Agnes Melchior raportis pri la blindulpensio en Danujo laŭ la nova leĝo. Alvenis telegramo de la sveda kronprinco. Por honori Lian Kronprincan Moŝton ĉiuj kongresanoj stariĝis kantante la svedan nacian himnon.

Post la kunsido la kongresanoj vizitis niajn karajn Gethilander en ilia bela vilao en Stocksund. Tie oni rigardis kortuŝe la presejon, kie estas presata nia "Ligilo", kiu festas ĉi-jare la tridekan datrevenon de sia fondiĝo. Pro tio, ke la okĉambra domo ne estas sufiĉe granda por gastigi ĉiujn kongresanojn, multaj el ili prenas la kafon en la ĝardeno.

Vespere okazis literatura prezentado de la ĉefkongreso, kie oni povis admiri verajn perlojn de nia Esperanto-literaturo.

Post malfermo de la kvara laborkunsido la 10-an de aŭgusto je la naŭa h. la parolvicon ricevis Minny Miksch, kiu raportis pri la "Internacia blindula informejo kaj statistikejo" en Praha, dirante interalie, ke post la forpaso de prof-ro Stejskal mankas laborantoj kaj tial la oficejo ne povas plu plenumi sian gravan taskon. Laŭ sugesto de Harald Thilander, la raportantino proponis, ke oni translokigu "IBIS" al Stocksund, sed dum longdaŭra diskutado kelkaj parolantoj avertas kontraŭ troa ŝarĝado de nia pioniro, kiu jam nun estas tro okupata. Fine la kunsido decidis transdoni la aferon al la komitato de UABO por plua esplorado kaj definitiva solvo.

Giovanni Valiani, Italujo, sendis proponon pri verkado de historia libreto pri la Esperanto-movado inter la blinduloj, skizante la ĉefpunktojn de la verko. Laŭ propono de kapitano Silhan, oni decidis peti samideanon Valiani, ke li mem prizorgu la realigon de la "Historio". La prezidanto promesis laŭpove kunlabori kun li, sed bedaŭrinde Valiani ne povis plenumi la komision, ĉar li mortis dum la milito kaŭze de insida malsano. Alia propono de Valiani pri fondo de "Amikeca societo de lingvostudentoj" estis transdonita al la komitato de UABO kun la peto kiel eble plej bone helpi la blindajn studentojn. La kongreso komisiis al samideano Kreitz reprezenti la blindulan kongreson ĉe la ferma kunsido de la ĉefkongreso. Post kelkaj demandoj kaj respondoj kaj respondoj pri ekzistantaj kantaretoj brajlaj en Esperanto, finiĝis la kunsido.

La 11-an de aŭgusto je la 1.30 h. komenciĝis la ferma kunsido kun reciprokaj dankesprimoj. Agnes Melchior transdonis donacon al la dommastrino kaj monsumon al la geservistoj. La prezidanto transdonis donacon al niaj karaj Gethilander, dankante pro ilia giganta laboro por la Esperanto-movado inter la blinduloj ĝenerale kaj por tiu ĉi kongreso speciale. D-ro Tancredi invitis tre kore nian "dekkvaran" al Romo venontan jaron. Per tio finiĝis unu el la plej sukcesaj kongresoj.

28 Antaŭparoleto al la "dekkvara" 1937

En la ferma kunsido de la "dektria" en Stockholm d-ro prof-ro Angelo Rafaele Tancredi, la itala delegito de UABO, sciigis, ke la "dekkvara" okazos en Romo 1935, tamen la kongreso ne povis okazi pro diversaj kaŭzoj. Miskomprenejoj inter la aranĝantoj de la blindula kongreso kaj la loka ĉefkongresa komitato kaŭzis multe da tempoperdo, tiel ke nur en aprilo de 1935 estis eble publikigi la unuan oficialan komunikon en EL. Dua kaŭzo estis, ke la komitato de UABO decidis, ke ne okazos ĝeneralkunveno dum 1935, sed ke ĝeneralkunvenoj estonte okazos nur ĉiun trian jaron aŭ kiam cirkonstancoj estas precipe favoraj. Plua malfacilaĵo estis, ke la blindulkongresa kaso estis tre malforta kaj atingis nur la sumon de 1.100 italaj liroj. Fine ekiĝis alia malhelpo: la loka kongresa komitato decidis, ke la gvidantoj de la blinduloj, kiuj tradicie ĝuis senpagan kongreskarton, por la 27 kongreso de Esperanto pagu almenaŭ la "familian kotizon" de 60 italaj liroj. Ankaŭ la malkvietoj de la politikaj kondiĉoj ne favoris nian "dekkvaran" tiel, ke nur du angloj aliĝis kaj pagis, sed ne partoprenis la kongreson, kiu cetere estis turisma kongreso, ĉar oni vojaĝis de unu loko al alia kaj ne okazis kunsidoj kun pozitiva rezulto. Tamen, d-ro Tancredi ricevis multajn salutleterojn preskaŭ el ĉiuj kulturaj landoj de la terglobo, kiel li skribis fininte sian raporton per la vortoj: "Al Vieno, do, ĉiuj! Per Esperanto en Esperantujon, ĉiam antaŭen, ĉiam fiere alten niaj koroj!"

Fakte aperis en EL mallongaj sciigoj pri la "dekkvara" en Vieno, sed poste montriĝis, ke unue mankis sufiĉe da spertaj samideanoj taŭgaj por prepari la kongreson, ke due ne estis eble trovi blindulkongresejon kaj trie la ĉefkongresa komitato ne donis helpon pro tio, ke ĝi mem havis kaj devis venki gravajn malfacilaĵojn pro la malfavoraj politikaj cirkonstancoj, kiuj jam tiutempe maltrankviligis Aŭstrujon. Tial ne estis mirige, ke jam frutempe en la jaro 1936 aperis en EL oficiala komuniko, ke ne povos okazi la "dekkvara" en Vieno, sed ke ĝi certe okazos en Varsovio dum aŭgusto de la jaro 1937. Ĉi tiuj informoj estis necesaj por klarigi, pro kio ne okazis blindulesperantistaj kongresoj dum du jaroj.

29 La "dekkvara" en Varsovio 1937

Ĉiuj partoprenintoj de la "dekkvara" kaj de la tria ĝeneralkunveno de UABO, okazintaj en Varsovio de la 7 ĝis la 15 de aŭgusto 1937, estis samopiniaj, ke ĉiufoje, sub la signo de la Esperanto-jubileo okazis vera internacia blindulkongreso de granda signifo por la internacia blindulmovado. Ne mirige, ĉar 23 organizaĵoj el 16 landoj, kunigitaj en UABO, ja povis estigi kongreson, kiu rajtis pretendi pri la supre menciita respondeca nomo.

114 personoj el dek kvar landoj: 66 alilandanoj kaj 48 poloj, 74 blinduloj kaj 40 vidantoj partoprenis la "dekkvaran", kiun organizis kaj gvidis kun nelacigebla sinoferado kaj diplomata talento kapitano Jan Silhan kaj lia brava kaj senlaca edzino. La plej multaj kongresanoj loĝis en la antikva blindulinstituto, en kies salonoj okazis la kunsidoj. La ekspozicio apude aranĝita prezentis multegon da interesaj presaĵoj, produktaĵoj, skribiloj, instruiloj ktp. Ni menciuj la jugoslavajn "topanka"-ŝuojn, la ĉeĥan skribmaŝinon kaj diversajn librobindajn novaĵojn, la japanan, por ni strangan kalkulilon kaj specialajn danajn instruilojn por infanoj.

Pro la favora vetero la kongresanoj povis konsumi ĉiam ĉe la ĝardenaj tabloj siajn manĝaĵojn ĉiam bongustajn kaj abundajn je moderaj prezoj, afabla servado kaj bonvola helpemo. Aro da servemaj skoltoj, senpagaj aŭtobusoj kaj trambiletoj multe helpis, kiam la kongresanoj partoprenis aranĝojn ekster la instituto.

Teatro kaj amuzaj vesperoj ne mankis. La radio-stacio en Varsovio disaŭdigis prezentadon de kvar blindaj diverslandaj virtuozaĵoj.

Post la sabata interkona vespero nia belga samsortano-samideano honorinda patero Agnello dediĉis dimanĉmatene sanktan meson favore al la kongreso.

Delegitaro el ĉiuj nacioj vizitis en Belvedère, iama loĝoloko de marŝalo Pilsutski,

la memorŝtonon de la "nekonata soldato" oferante florojn ankaŭ de la blindula kongreso. Dum la solena malfermo de la jubilea Esperanto-kongreso kapitano Silhan salutis kaj invitis la ĉefkongresanojn viziti la malfermon kaj kunsidojn de la blindula kongreso.

La saman dimanĉon posttagmeze je la 17 h. okazis la malfermo de la "dekkvara" en la festa salonego de la blindulinstituto, en kiu ĉeestis proksimume 300 personoj, inter kiuj estis oficialaj reprezentantoj de polaj ministerioj kaj la estraro de la ĉefurbo Varsovio, sed ankaŭ ĉeestis la elito de la tutmonda Esperanto-movado kolektiĝinta en Varsovio okaze de la ora jubileo de Esperanto, inter kiuj oni vidis d-ron Adamon Zamenhof kun familio, f-inon Lidia Zamenhof, la verkiston Julio Baghy kaj multajn eminentajn esperantistojn. Konsilanto Klimecki salutis la kongreson proponante la elekton de jena estraro: honora prezidanto: militblinda deputito de la pola parlamento majoro E. Wagner; prezidanto: kapitano Jan Silhan; vicprezidantoj: honorinda patero Agnello Vandenbosch; W. P. Merrick kaj Alf Arnesen; sekretarioj: d-ro M. Geffner (Aŭstrujo); Petar Pesiĉ (Jugoslavio) kaj Charles Hedqvist.

La prezidanto Jan Silhan salutis kaj bonvenigis la kongreson, dirante i.a.: "Ni scias, ke ankaŭ la forestantoj ĉi-momente per varme batantaj koroj partoprenas nian feston, feston okazantan en Varsovio, en la urbo, el kiu antaŭ duona jarcento eliris en la vastan mondon la elokventa broŝureto de d-ro Esperanto por donaci al la homaro valoregan interhoman ligilon, kies grandioza kultura rolo montriĝos en sia plena, luma signifo estonte!" Poste li skizis detale la evoluon de la Esperanto-movado inter la blinduloj. Post la kutimaj salutparoloj nepriskribebla estis la jubila aplaŭdo pro la surprize ĝojiga sciigo de majoro Wagner, ke la ŝtatprezidento de la pola respubliko decidis honorigi la sekretarion de UABO, redaktoron Harald Thilander pro lia multjara grandioza kultura laboro por la blinduloj de la tuta mondo, donante al li la altan ordenon "Polonia restituta". Thilander, kiu mem ne ĉeestis, poste skribis: "Ni ĉiuj scias, ke per tiu ĉi distingo la pola ŝtatestro honorigis la bravegan laboron de blindulo por ĉiuj blinduloj".

Vespere la ĉefkongreso aranĝis feston de "veteranoj", honorante per "Ora stelo" tiujn, kiuj eklaboris por Esperanto antaŭ la unua de aŭgusto 1905 kaj per "Arĝenta stelo" tiujn, kiuj depost la unua de aŭgusto 1912 laboris por nia kara lingvo. Dek kvin blinduloj ricevis oran kaj multaj aliaj arĝentan stelon.

Lundan matenon inter aliaj parolintoj Varma Thilander per efika poemo plorige kortuŝa esprimis senfinan dankon de la blindularo ĉe la tombo de nia kara majstro Zamenhof akcentante, ke Esperanto kaj ĝia ideo tiom servas al la blinduloj kaj

faciligas ilian vivon en mallumo. En la nomo de la "dekvara" oni metis florkronon. Ĉiu preteriranto ĉe la tombo klinis la kapon kaj metis floron aŭ florbukedon. Kreskis la amaso da diantoj kaj lilioj. Kelkaj el la preterpasantoj haltis por momento, volis paroli, sed... anstataŭ vortoj el ilia buŝo...larmoj fluis el iliaj okuloj! Proksime al la hebrea situas la katolika tombejo, kie ripozas Antoni Grabowski, la plej intima kunlaborinto de nia majstro Zamenhof. Tie parolis prof. Bujwid kaj la germana samideano Glück, kies parolado estis la plena esprimo de la korsentoj, kiuj nun travivis la multlandaj disĉiploj pilgrim-alvenintaj al la tomboj de la majstro kaj Grabowski. Estis neeble reteni la larmojn, kiam la blankbarbula prof. Bujwid kisis la parolinton pro lia tiom profunda kaj tiom sento- kaj esprimoplena parolado.

Sed nun ni vizitu posttagmeze je la 16 h. la unuan laborkunsidon de la "dekkvara", kiun la prezidanto malfermis per la sciigo, ke preskaŭ tridek prelegoj kaj raportoj estas anoncitaj por la kongreso kaj ĝeneralkunveno de UABO. Pro tio, ke la kongreso ne havos sufiĉe da tempo por pritraktado de ĉiuj prelegoj kaj raportoj laŭeble UABO presas la tutan materialon por disponigi ĝin al ĉiuj, sed fakte nur la plej gravaj prelegoj kaj la rezolucioj aperis en brajla preso pro tio, ke la presigo de ĉio ampleksus kelkajn brajlovolumojn. Post prelego pri la ŝtata blindulinstituto en Varsovio la prezidanto prelegis pri la evoluo kaj nuna stato de la blindulafero en Polujo, kiu elvokis demandojn kaj respondojn pri la edukado de polaj nevidantaj masaĝistoj. Same okazis post la prelego pri la porblindula muziklernejo ĉe la ŝtata blindulinstituto, verkita de direktoro J. Niwinski. La prezidanto proponis, ke elektota redakcia komitato ellaboru la precizajn tekstojn de ĉiuj rezolucioj kaj prezentu ilin ĉe la ferma kunsido por definitiva decido. Petar Pesiĉ raportis pri la blindulafero en Jugoslavio speciale menciante la eksperimentojn kun militblinduloj en terkulturista laboro en Veternik. Sekvis sufiĉe longa diskutado pri ĉi tiu temo.

La 7-an de aŭgusto en la dua laborkunsido Charles Hedqvist prezentis detalan raporton pri la "Parolanta libro" kun posta diskutado pri ĉi tiu temo. Estas necese klarigi al niaj junaj legantoj, ke "parolanta libro" estis gramofonaj diskoj, kiuj povis surhavi tekstojn por 25-minuta legado sur ĉiu flanko. Estis multekosta procedo kaj oni investis milojn da dolaroj aŭ anglaj pundoj sterlingaj. Post la dua milito en ĉiuj landoj oni profitis la magnetofonan sonbendan sistemon kiel "parolanta libro" por blinduloj; tamen estas tre interese legi la referaton de Charles Hedqvist pri ĉi tiu temo.

La 11-an de aŭgusto je la 9.30 h. post la malfermo de la tria laborkunsido la prezidanto sciigis, ke tiu ĉi kunsido estos dediĉata al diskutoj pri blindeckompenso kaj aliaj al ĝi ligitaj blindulaferaj problemoj. Post raporto de patero Agnello pri la invalidpensio en Belgio kaj pri penadoj havigi blindeckompencon al belgaj

blinduloj sekvis longa diskuto pri ĉi tiu temo, kiun partoprenis kongresanoj el Finnlando, la skandinaviaj landoj k.a. Oni pritraktis la temon: Kiu estas blinda laŭ la leĝo pri blindekompensoj? Patero Agnello informis, ke en Belgujo 1/50 de vidpovo estas la ĝenerale aprobata limo de blindeco, dum en Svedujo ĝi estas 2/60 laŭ sciigo de Eric Olsson, sed blindekompenson ankaŭ povas ricevi tiu, kiu ne havas sufiĉan vidpovon por orientiĝi en fremda loko. En Norvegujo la kompenson ricevas tiu, kiu ne havas sufiĉan vidpovon por gvidi sin mem aŭ ne povas kalkuli fingrojn en distanco de unu metro. Poste okazis diskutado pri "bezonprincipo" kaj la laborproblemo de blindulo koncerne blindekompenson.

Post prelego pri masaĝo en Anglujo, verkita de Aaron Cohen, la prezidanto informis pri masaĝo en Polujo kiel profesio por blinduloj, kio elvokis diskutadon. Alf Arnesen proponis, ke IBIS kolektu ĉiajn materialojn pri ĉi tiu grava afero.

La 12-an de aŭgusto je la 9.30 h. la prezidanto en la kvara laborkunsido donis la parolvicon al kolonelo Klobukowski, kiu prezentis referaton pri la "Pola asocio de laborantaj blinduloj" kun la peto, ke la kongreso apogu kelkajn proponojn de tiu asocio.

La prelego pri la temo "La blindul-instruisto kaj ties preparo", verkita de d-rino M. Gregorzewska, direktorino de la instituto por speciala pedagogio en Varsovio, elvokis viglan diskuton, en kiu partoprenis multaj kongresanoj, interalie Agnes Melchior kaj Halvdan Karterud, kiuj mem estas geinstruistoj de blinduloj.

Nakahara Siuzi, japana samideano, prezentis raporton pri la blindulafero en Japanujo petante, ke oni sendu kontribuaĵojn al porblindula ekspozicio aranĝota en Kioto dum oktobro nunjare. Per aplaŭdoj la kongreso manifestis sian simpatian al la japanaj samsortanoj.

D-ro Nils Juringius prelegis pri la temo "La blinduloj kaj matematiko". En la posta diskutado oni postulis, ke en la brajla matematikografio estu efektivigota internacia unueco.

Agnes Melchior raportis interese pri novaĵoj el la dana blindulafero, interalie, ke oni instaligis brajlan presejon en ŝtata malliberejo kaj ke kvar malliberuloj presas librojn por blinduloj.

Per cirkulero hispanaj instruistoj de blindullernejo petis sendi instruilojn al ili pro tio, ke la civila milito en la lando malfaciligas la produktadon de tiaj lerniloj en la lando mem.

La saman tagon la kongresanoj vizitis la blindulejon Laski kun ĉ. 300 gelernantoj en ĉiuj aĝoj, multaj fakoj pri instruado kaj zorga studado pri la blindulafero. Post raporto de inĝeniero Wionskowski pri la agado de Laski, okazis koncerto de blindaj artistoj en la salonego de la instituto.

La 13-an de aŭgusto je la naŭa h. la prezidanto dum la kvina laborkunsido mallonge skizis la vivon de d-ro Dolanski, la verkinto de la prezentota prelego pri "La sesa sento de blinduloj". La prelego mem kaŭzis viglan diskutadon, kiun partoprenis ankaŭ la prezidanto, kiu diris interalie: la psikologoj kaj fakuloj en ĉiuj landoj kun granda interesiĝo akceptis la eksperimentojn kaj la hipotezon de d-ro Dolanski. Ĝi prezentas teorie kaj eksperimente bone bazitan solvon de la problemo, pri kiu la vasta publiko juĝas kutime malĝuste, atribuante al la nevidantoj ian misteran kapablon.

Sekvis prelego pri sterilizado, verkita de fama okulkuracisto d-ro A. Zahor, Praha. Dum la diskutado estis akcentata la graveco de la problemo, sed samtempe oni substrekis la danĝeron de troigo dum la nuna neperfekta stato de la ĉi-koncernaj sciencoj. Kelkaj el la parolantoj ankaŭ apogas la ideojn opiniojn kontraŭ sterilizado, prezentitajn de d-ro Zahor.

Post raporto pri blinduloj kaj skoltismo de H. M. Lochhead kaj W. P. Merrick la kongreso komisiis al IBIS speciale kolekti materialojn pri tio en diversaj landoj.

Raportis d-ro Bano Miklos pri la "Ruĝkruca movado" kaj la blinduloj en Hungarujo, Einar Juvonen parolis pri la nuna stato de la blindulafero en Finnlando kaj fine samideanino Pollandová informis pri la blindulafero en Ĉeĥoslovakio.

Samtage la kongresanoj vizitis la polan porblindulan asocion "Lanterno", en kies brajla presejo patero Agnello dediĉis belan paroladon al la centjara jubileo de la brajla libro.

Dum la ferma kunsido de la 14 de aŭgusto je la 15 h. Post multaj dankesprimoj W. P. Merrick invitis la kongresanojn partopreni la "dekkvinan" okazontan en Londono venontjare. Agnes Melchior transdonis florojn al s-rino Margit Silhan kore dankante ŝin. Vere ŝi meritis dankojn, ĉar ŝi voĉlegis ses longajn prelegojn. Fine Varma Thilander deklamis poemon, per kiu ŝi esprimis la sentojn de la kongresanoj forlasante Varsovion.

Pri la tria ĝeneralkunveno de UABO ni raportis en la 12 ĉapitro.


Dum la "dekkvara" dek blindulinoj el sep landoj kunvenis por pridiskuti proprajn aferojn. Ili prezentis al UABO rezolucion pri la problemoj de blindaj virinoj. Plue oni rekomendis aranĝi ekspoziciojn de manlaboraĵoj de blindulinoj kaj ankaŭ estus utile havigi konsilantojn pri manlaboro, por ke novaĵojn pri modeloj, koloroj ktp. oni povu enkonduki kiel eble plej baldaŭ. Agnes Melchior, kiu prezidis la kunvenon, akcentis la neceson havi pli da blindaj virinoj inter la gvidantoj de blindulorganizaĵoj kaj ŝi petis la ĉeestantinojn ĉiuj en sia hejmlando energie labori por tiu celo. Fine oni konstatis, ke blinda edzino plej ofte bonege kapablas prizorgi hejmon kaj infanojn.

La "dekkvara" pridiskutinte surbaze de 23 referatoj la ĉefproblemojn de la blindulafero, alprenis unuanime dekkvin rezoluciojn, redaktitajn de patero Agnello Vandebosch, d-roj Bano Miklos kaj Nils Juringius. Tamen ni ne povas publikigi ĉiun rezolucion laŭvorte, sed nur koncize aludi la enhavon.

La rezolucioj mem sen mallongigoj ekzistas en brajla preso. Jen do ili estas:

- 1: La kongreso emfazis la neceson de energia, multflanka kontraŭbatalado de blindeco per leĝoj de popolhigieno, vasta aplikado de profilaktikaj rimedoj kontraŭ okulmalsanoj kaj akcidentaj blindiĝoj en industrio.
- 2: La kongreso subtenas la rezolucion de "Ligo de Nacioj" en la jaro 1932 pri ĝenerala, deviga kaj senpaga instruado de blindaj infanoj substrekante krom tio la neceson de prizorgo de blinduloj kaj spiritmalsanaj infanoj.
- 3: La tria rezolucio rekomendas la edukadon de inteligentaj blinduloj por la profesio de blindulinstruistoj.
- 4: La kongreso esprimas la deziron, ke en la brajla matematikografio estu kreata unueca sistemo.
- 5: La kvina rezolucio rekomendas la kreadon de specialaj, racie organizitaj muziklernejoj por blinduloj en ĉiuj landoj.
- 6: Instruado pri masaĝo al blinduloj, posedantaj la necesajn kvalitojn por ĉi tiu profesio, estas la temo de la sesa rezolucio.
- 7: La sepa rezolucio pritraktas la problemon de agrikultura instruado al vilaĝaj blinduloj ankoraŭ iom vidantaj.
- 8: Ĉi tiu rezolucio sin okupas pri la ĝenerala laborprizorgo, unu el la plej gravaj branĉoj de blindulprizorgo kun helpo de la ŝtato.

- 9: Per la naŭa rezolucio la kongreso emfazas unuanime, ke la enkondukado de blindekompensoj en la socialan porblindulan leĝaron en ĉiuj ŝtatoj prezentas necesigan integran parton de la moderna blindulprizorgo.
- 10: La deka rezolucio emfazas la neceson de ĉiuspecaj socialaj avantaĝoj porblindulaj, kiel fervojaj, tramvojoj kaj aŭtobusaj rabatoj ktp. kaj specialaj aranĝoj de sanflegado.
- 11: La kongreso rekomendas speciale la maljunajn kaj ne laborkapablajn geblindulojn al sociala protekto.
- 12: La 12 rezolucio ampleksas apartajn rezultojn de la virina sekcio de la kongreso interalie postulantajn, ke oni donu al ĉiuj blindaj knabinoj mastruman edukon en la blindullernejoj, kaj por plenkreskintaj blindulinoj oni aranĝu specialajn kursojn pri mastrumado.
- 13: Ĉi tiu rezolucio rekomendas la skoltan kaj ruĝkrucan movadojn al la blinda junularo.
- 14: La kongreso emfazas la utilecon de gvidhundoj por blinduloj.
- 15: La lasta rezolucio pritraktas la raporton de UABO.



30 La "dekkvina" en Londono 1938

Jam trifoje niaj karmemoraj gesamideanoj Merrick preparis kaj organizis blindulesperantistan kongreson: la "kvinan" en Edinburgo, la "naŭan" en Oxford kaj la "dekkvinan" okazintan en Londono de la 30 de julio ĝis la 6 de aŭgusto 1938 enkadre de la 30 "Universala kongreso de Esperanto", sed bedaŭrinde mankas detalaj informoj pri ĝi, ĉar oni ne trovis tempon por kolekti kaj aranĝi ekzaktan protokolon pro tio, ke la programo estis malpli afereca ol ordinare, kvankam estis plenumita kvanto da utila laboro por konigi al alilandanoj kaj eĉ britoj tion, kio estas farata en la brita metropolo por la blinduloj.

Partoprenis proksimume cent personoj, inter ili ĉ. 80 el Grand-Britujo kaj malmultaj el Ĉeĥoslovakio, Finnlando, Francujo, Italujo, Nederlando, Svedujo kaj Norvegujo. Ne nur la plej gravaj organizaĵoj porblindulaj subvenciis finance la kongreson, sed ankaŭ multaj blindulamikoj kaj vidantaj esperantistoj tiele, ke la blindulkongresanoj senpage povis loĝi kaj manĝi en du hoteloj.

Post la malferma kunsido, dum kiu generalo Bastien, prezidanto de la ĉefkongreso, rakontis pri kelkaj interesaj blinduloj, kiujn li konis. Leonard Harding el Portsmouth aranĝis koncerton de blindaj artistoj, en kiu partoprenis kaj britaj kaj alilandaj muzikistoj, kelkaj ĉe piano, aliaj per kantado kaj Pluchon el Parizo per violonludado.

Mardon, posttagmeze du blindulinoj kun gvidhundoj vekis multan intereson, sed la tempo ne permesis diskutadon pri ĉi tiu temo. La kongresanoj tre ŝatis la viziton al la ĝeneralaj blindullaborejoj kaj al "Rosedale House" merkrede. Sapfabrikado estis speciala altiraĵo, kaj samideanino Pollandová el Ĉeĥoslovakio trovis en "Rosedale House" kelkajn bonajn ideojn, kiujn ŝi esperas realigi en la blindullaborejoj en Praha.

Sed la vizito al la "National Institute for the blind", okazinta vendredon posttagmeze, altiris la plej vastan partoprenon, ĉar ĉiuj interesiĝis kaj volis rigardi la brajlopresajn metodojn, novajn aparatojn haveblajn ktp. Vere, ne nur la alilandaj gesamideanoj, sed eĉ el la anglaj, jes, eĉ multaj el Londono, miris pro la varieco de utilaj objektoj kaj helpiloj akireblaj el la institucio. Kelkaj kongresanoj interesiĝis pri specialaj maŝinoj. Fine estis vizito al la nacia biblioteko por blinduloj, kie la kongresanoj renkontis la asistantojn, kiuj sendas al ili regule prunte Esperanto-librojn por ĝojigi ilin, ĉar en neniu alia lando ekzistas tiom da brajlaj libroj en nia lingvo.

Kelkaj kongresanoj fervore atentis la grandan valoron de simplaj eltrovaĵoj por protekti blindajn maŝinlaboristojn montritajn en "Home office industrial museum", ĉar tiu ĉi vizito eble povas kunporti vastigon de la okupadoj por blinduloj en Grand-Britujo kaj alilande.

Ne mankis nombro da valoraj kaj interesaj prelegoj, plejparte havigitaj de spertaj verkintoj el Grand-Britujo pri novaj okupoj porblindulaj; la instruo de blinduloj en iliaj hejmoj kaj laboro donata al ili; spertoj de blindaj ĵurnalistoj; pri stenografado. Inter la referatoj de alilandaj kongresanoj eble la plej rimarkinda estis unu pri laboro farita de blindulinoj en Ĉeĥoslovakio prezentita de samideanino Pollandová el Praha. Kiel pri antaŭaj kongresoj ankaŭ tiuj ĉi referatoj povas esti konsiderataj kiel disŝutantoj de bonaj semoj; povas okazi, ke kelkaj falos sur fruktodonan teron kaj iniciatos aŭ kuraĝigos valoran kunlaboradon de kaj por ĉiuj blinduloj.

Nia pioniro Harald Thilander estis elektita kiel unu el la tri vicprezidantoj de la ĉefkongreso. La blindulkongresanoj kaj iliaj gvidantoj ne bezonis pagi kongreskotizon.

La plej multajn informojn por tiu ĉi raporto ni ĉerpis el artikolo verkita de W. P. Merrick por la anglaj blindulfakaj gazetoj "New Beacon" kaj "Progress", sed bedaŭrinde neniu el la prelegoj kaj referatoj aperis en brajla preso.

31 La "dekseza" en Bern 1939

Dum nia vojaĝo tra niaj 15 internaciaj kongresoj ni alvenis ĉe la lasta stacio, la "dekseza", la lasta antaŭmilita kongreso okazinta en Bern, en Svislando, centro de la paco, sidejo de Ligo de Nacioj. Estis interese observi, kiamaniere iom post iom pliboniĝis la sorto de la blinduloj en kompare multaj landoj dum tiu ĉi epoko, kiam Esperanto disvastiĝis inter la blinduloj kaj neniu povas kontesti, ke niaj kongresoj donis multajn konsilojn kaj impulsojn al gvidantoj de la blindul-afero tiele, ke jam antaŭ 1939 estis metita la fundamento, sur kiu post la milito estis konstruata la moderna sociala blindulprizorgado nun aplikata preskaŭ en ĉiuj kulturaj landoj de nia terglobo.

La "deksezan", okazintan en Bern de la 29 de julio ĝis la 5 de aŭgusto en la jaro 1939, partoprenis 54 personoj (35 blinduloj kun 19 vidantoj) el dek nacioj: 13 britoj, 1 finno, 9 francoj, 8 nederlandanoj, 2 hungaroj, 1 italo, 1 jugoslavo, 1 norvego, 7 svedoj kaj 11 svisoj. Kiel gastoj de la svisa blindulligo la kongresanoj ĝuis senpagan loĝadon kaj manĝadon en la gastejo "Zur Heimat", en kiu okazis la interkona vespero kaj kunsidoj de la kongreso.

Dimanĉmatene, la 30-an de julio dum la malferma kunsido de la ĉefkongreso nia pioniro Harald Thilander estis elektita vicprezidanto kaj d-ro Bano Miklos salutis la kongreson en la nomo de la "dekseca" kun dankesprimo al la svisa blindulligo. Posttagmeze okazis Diservo sur la monto Hurten.

Lundon, posttagmeze d-ro Emil Spahr, prezidanto de la svisa blindulligo, malfermis la "dekseca" per bonveniga paroladeto. Formiĝis jena kongreskomitato: honora prezidanto: Harald Thilander; aktiva prezidanto: d-ro Emil Spahr; vicprezidantoj: d-ro Tancredi kaj Merrick; konsilantoj: d-ro Bano kaj Masselier; unua sekretario: Simon Roth (Jugoslavio); dua sekretario: J. H. Meyer (Nederlando). D-ro Tancredi prenis sur sin la gvidadon de la kunsidoj. Post forte aplaŭdita alparolo de la honora prezidanto Thilander sekvis salutparoloj de 14 reprezentantoj de naciaj blindulorganizajoj kaj fine oni legis salutleteron de kapitano Jan Silhan, prezidanto de UABO. Poste d-ro Spahr prezentis interesan prelegon pri la temo "Nia ĉiutaga pano", per kiu li skizis la evoluon de la blindulprizorgado dirante interalie: "Ni profitas de la maŝino kiel konsumantoj, sed aliflanke, kiel produktantoj ni malnecesigas; la maŝino laboras tie, kie antaŭe ni laboris, kaj fine tamen estas konsolo memori la diraĵon de la grand-industriulo Henry Ford, ke en specialigita industrio troviĝas pli multe da laborlokoj por blinduloj ol ekzistas blinduloj. Tiu deklaro de kompetentulo konsolas la blindulojn kaj indikas al iliaj kondukantoj la direkton de iliaj penadoj. Jen la vidpunkto, kiun mi volis klarigi per mia referato pri la ĉiutaga pano!" Oni decidis prokrasti la pridiskutadon de la temo.

Mardon, la 1-an de aŭgusto, matene je la deka h. dum la unua laborkunsido Albert Masselier en longa parolado postulis kelkajn ŝanĝojn en la esperanta stenografio, kiujn li priskribis detale en specialaj brajlaj kajeretoj distribuitaj al la kongresanoj. D-ro Tancredi forte defendis la malnovan sistemon kaj kontraŭstaris ĝian ŝanĝon, dum d-ro Bano proponis, ke por eviti akriĝantan diskutadon kaj diferencon de la opinioj oni akceptu simplan, facile lerneblan t.n. unugradan aŭ elementan stenografion por tiuj, kiuj ne deziras lerni la kompletan mallongigaron, kaj oni uzu nur la unuĉelajn mallongigojn, kiuj ne bezonas specialajn klarigojn kaj regulojn. Oni decidis, ke la kongresestraro konigu akceptotan rezolucion pri la stenografia problemo dum la ferma kunveno.

Post vizito al Tierpark (zoologia parko) la kongresanoj partoprenis amuzvesperon en Rosengarten.

La 2-an de agusto je la deka h. en la dua laborkunsido oni pridiskutis la referaton de d-ro Spahr pri la "Ĉiutaga pano". D-ro Bano raportis pri la hungaraj blinduloj laborantaj en fabrikoj, pri farado de kribriiloj, retoj, florkronoj kaj aliaj profesioj

montriĝantaj taŭgaj por blinduloj. Masselier parolis pri la francaj blinduloj laborantaj en fabrikoj, menciante ankaŭ la imitindan danan industrilernejon por blindaj metallaboristoj. Pri jugoslavaj blindulinoj laborantaj en la ŝufabrika Batka raportis Roth, kaj Meyer parolis pri la radio-uzino Philips, en kiu laboras multaj nederlandaj blinduloj. Kompreneble ankaŭ masaĝo kiel enspeziga blindulprofesio estis la ĉefa temo de la diskutado. Interalie Varma Thilander komunikis, ke en Finnlando pli ol cent blinduloj trovas enspezigan laboron kiel masaĝistoj; plue ŝi menciis masaĝistojn en Svedujo kaj blindajn presistojn en Svedujo kaj Norvegujo. W. P. Merrick rakontis pri la lernejo por blindaj masaĝistoj en Anglujo proponante, ke mekaniko estu instruata en ĉiuj blindulinstitutoj. Aliaj kongresanoj raportis pri blinduloj kiel muzikinstruistoj, instruistoj en publikaj lernejoj kaj tajpistoj en oficejoj. Posttagmeze en la hejmo de la blinduloj en Bern kaj ĉirkaŭaĵo oni informis la kongresanojn pri la nuna stato de la blindulprizorgado en Svislando.

Ĵaŭdon, la 3-an de aŭgusto, matene en la tria laborkunsido d-ro Spahr surprizis la kongresanojn per prelego sendita el Germanujo sub la titolo "Kiel la internacia blindularo povas kontraŭbatali la militon?" Ĝi estis kolekto de la opinioj de kelkaj germanoj pri la kaŭzo de milito kaj kiel inteligentaj blinduloj povas batali per parolado kaj skribado kontraŭ la milito. Ne estis eble sciigi, kiuj pli ol strangaj germanaj nevidantaj samideanoj havis la absurdan ideon verki la aluditajn prelegojn por la kongreso dum tempo, kiam la bruna reĝimo, reganta en Germanujo, jam perforte estis okupinta Aŭstrujon kaj Ĉeĥoslovakion kaj ĵus preparis sin por komenci la duan mondmiliton. Post sufiĉe longdaŭra diskutado pri ĉi tiu temo d-ro Bano, Masselier kaj Merrick proponis, ke oni ne daŭrigu la diskutadon, ke esperantistoj evitu politikon. Ĉiu homo povas krei pacon en sia loko farante malgrandajn servojn al siaj kunhomoj tute egale, al kiu nacio aŭ raso ili apartenas.

Vendredon, la 4-an de aŭgusto komence de la ferma kunsido d-ro Bano raportis, ke la du partioj interkonsentis pri starigo de tute simpla, elementa esperanta stenografio aŭ pli bone: mallongigaro, facile lernebla. Oni publikigos la projekton en EL, petante la aprobon fare de la legantoj. En rezolucio oni esprimis la deziron baldaŭ uzi en aldonaĵoj pri ĝeneralinteresaj temoj tiun ĉi mallongigaron, kaj ke "Nia Mondo" uzu nur la vortmallongigojn de tiu ĉi sistemo. Dua rezolucio rekomendis interalie, ke la sesa punkto estonte estu nur la ĉeflitera signo uzota en niaj gazetoj. La gazeto "Nia Mondo" post eksplodo de la milito ĉesigis sian aperadon kaj la plimulto el la legantoj de EL (la lasta numero aperis en marto 1940) malaprobis kaj la proponitan unupunktan ĉefliteran signon kaj la elementan mallongigaron.

Post diskuto pri Esperanto-ekzamenoj por blinduloj, Masselier konigis du pluajn rezoluciojn tuj akceptitajn de la kongreso. La unua rezolucio esprimas la deziron subteni laŭpove ĉiun klopodon, kiu celas plibonigi la sorton de la blinduloj, kaj petas ĉiun blindulorganizajn serĉi novajn laboreblecojn por blinduloj. La dua rezolucio rekomendas al ĉiu blinda esperantisto en sia loko fari sian plejblon por la subteno de la paco, helpante al rifuĝintaj samsortanoj.

Lastmomente alvenis salutletero de patero Agnello en la nomo de "Belga nacia unuigo de blinduloj", kaj dankletero de juda blindulino pro la helpo de blindaj esperantistoj al judaj rifuĝintoj. Post dankesprimo precipe al d-ro Spahr, lia edzino kaj ilia filo sekvis ĉarma sceno: samideano Rosa Vogt, unu el la unuaj disĉiploj de prof. Cart, transdonis vazon kun belaj floroj al ges-roj Spahr, kiu kortuŝe akceptis la memoraĵon. Por inde fini la tagon, oni aranĝis belan svisan vesperon en la gastejo "Zur Heimat" kun muziko kaj kantado.

Sabaton, je 9.30 h. en la ferma kunsido de la ĉefkongreso la blindulkongresa sekretario Simon Roth resumis en mallonga paroladeto la atingaĵojn de la blindula sekcio, kaj Varma Thilander deklamis sian belegan poemon verkitan speciale por la kongreso.

Posttagmeze la kongresanoj disiĝis, esperante renkontiĝi dum la venonta kongreso, tamen... eksplodis la terura dua mondmilito!

32 Indekso de gravaj dokumentoj aperintaj en brajla preso

Ne estis eble en la kadro de la "Historio" citi laŭvorte ĉiujn raportojn de UABE UABO, proponojn, referatojn kaj prelegojn faritajn dum kongresoj, ĉar ili ankaŭ plenigus ampleksan volumon; tamen, kredinde troviĝas inter ni gesamideanoj, kiuj ŝatas ĝisfunde studi ne nur nian historion, sed kunlige kun ĝi la disvolviĝon de la blindulafero en diversaj landoj. Esperanta Ligilo, respektive la estraro de LIBE informos pri tio, kie la dokumentoj estos pruntepreneblaj kondiĉe, ke la prunteprenonto promesos poŝtregistrite resendi ilin por eviti perdiĝon en la poŝto. Jen do la titoloj de la dokumentoj kun koncizaj rimarkigoj:

La jarraporto pri la agado de "Universala Asocio de Blindaj Esperantistoj" (UABE) dum la jaro 1931 sur 33 paĝoj ĉefe sin okupas pri propagando de Esperanto inter blinduloj, i.a. ĉe la "World conference of the blind" (mondkonferenco pri blinduloj) okazinta 1931 en New York kaj ankaŭ inter naciaj blindulorganizaĵoj. Fine vi trovos en ĝi liston de libroj eldonitaj de UABE kaj aliaj brajlaj presejoj vendataj profite al EL.

La unua raporto pri la agado de "Universala Asocio de Blindulorganizaĵoj" (UABO) (antaŭe "Universala Asocio de Blindaj Esperantistoj") dum la jaro 1932 sur 79 paĝoj enhavas interesajn informojn pri propagando kaj novaj libroj en kaj pri Esperanto eldonitaj de diverslandaj brajlaj presejoj kun historiaj resumetoj pri naciaj neesperantistaj blindulorganizaĵoj kuniĝintaj kun UABO.

La jarlibro de UABO por 1933 raportas sur 92 paĝoj pri ĝenerala agado de la organizaĵo. Sekvas interesa artikolo de H. Thilander sub la titolo "Nia vojo". Fine ni legas detalajn raportojn de la kuniĝintaj en UABO naciaj blindul-organizaĵoj, kiuj donas al ni imagon pri la agado de la koncernaj organizaĵoj por la bono de la nevidantoj.

La raportoj de UABO pri la agado dum la jaroj 1935 kaj 1937 sur po 25 respektive 21 paĝoj klare montras, ke la politikaj kondiĉoj malfavoraj al nia internacia lingvo influis ankaŭ la agadon de UABO.

Tre interesa estas enketo de "Internacia Blindulafera Informejo kaj Statistikejo" (IBIS) pri komunikilaj avantaĝoj por la blinduloj eldonita de UABO 1938 sur 28 ĝoj. Delegitoj en 17 landoj pli aŭ malpli detale informas nin pri la avantaĝoj, kiujn blinduloj ĝuas sur publikaj trafikiloj.

En la jaro 1932 UABO eldonis la referatojn kaj proponojn faritajn dum la "dekunua" en Parizo, el kiuj ni citas la plej gravajn.

Haberland Ilse: La blindulo kiel stenotipisto.

Israëls Raff: Konciza raporto pri la stato de la blindulmovado en Nederlando.

Masselier Albert: Internacia instituto por socia adaptiĝo de la nevidantoj.

— Internacia ligo Braille por pliriĉigi reliefliteraturon.

Masier Georges: Projekto por fondi Internacian Asocion de blindaj artistoj.

La ĉefaj referatoj faritaj 1933 dum la "dekdua" en Kolonjo:

Arnesen Alf: Ĉu UABO povas fari ion por provizi la blindulojn en ĉiuj landoj per pli malmultekostaj skribmaŝinoj kaj alia aparataro?

Miksch Minny: La blindulafero en Ĉeĥoslovakio.

Tancredi A. R.: Informoj pri Italujo.

Thilander Harald kaj Hedqvist Charles: Novaj vojoj por la blindula vivnutra laboro.

Dum la unua ĝeneralkunveno de UABO:

Juvonen Einar: Kiel ni havigos labormaterialojn por niaj manlaboristoj?

(Multajn proponojn presitajn en la 75-paĝa kajero ni ne citis).

Prelegoj dum la "dektria" kaj la dua ĝeneralkunveno de UABO en Stockholm 1934.

Unua kajero laŭvice, jur. kand. Retsler Ernst: La blindeckompenso en Svedujo.

Dir. Lundberg Alarik: La sveda blindulmovado.

Rektoro Ek Gustaf: La blindul-instruado en Svedujo.

Melchior Agnes: Sociala helpo al la danaj blinduloj.

— Iomete pri ilustraĵoj kaj desegnaĵoj kiel rimedoĉe instruado de blindaj infanoj en Danujo.

af Burén Julia: La problindula laborkomisiono de kronprincino Margareta.

Juvonen Einar: Mekanterapio kiel blindulprofesio.

Dua kajero: fil. d-ro Juringius Nils: Matematika skribo (kun ilustritaj tabeloj).

Güterbock Eduard: Raporto pri la stato de la internaciaj laboroj pri la unuformigo de la t.n. lingvaj skriboj brajlaj.

Merrick W. P.: Fonetika alfabeto.

Ĉefaj prelegoj kaj referatoj faritaj dum la "dekkvara" kaj la tria ĝeneralkunveno de UABO en Varsovio 1937. Dua parto.

D-rino Gregorzewska Marie: La blindulinstruisto, ties prepara laborvaloro en la blindullernejoj.

D-ro Zahor A.: Sterilizado kiel rimedo kontraŭbatali la blindecon.

Hedqvist Charles: La "parolanta libro".

Juvonen Einar: Konkiza raporto pri la finna blindulmovado.

D-ro Juringius Nils: La blindulo kaj la matematiko.

Tria parto:

Lockhead H. M.: Skoltado por blinduloj.

Cohen Aaron: Blindaj masaĝistoj en Anglujo.

Melchior Agnes: Blindulaferaj novaĵoj el Danujo.

Silhan Jan: La blindulafero en Polujo.

Pollandová E.: La ligo de Ĉeĥoslovakaj blindulorganizajoj.

Arnesen Alf: La blindeckompenso en Norvegujo.

Vandenbosch Agnello (Patero): La blindeckompenso en Belgujo.

D-ro Dolanski W.: La sesa sento de la blinduloj.

Pesic P.: Blindaj terkulturistoj en Jugoslavio.

Aparta kajero.

En ĝi oni trovas laŭvorte ĉiujn rezoluciojn akceptitajn de la kongreso kaj la ĝeneralkunveno de UABO.

33 Epilogo

Finfine do vi havas la "Historion" sub viaj fingroj! Ofte, eĉ tro ofte dum kongresoj kaj dum privataj konversacioj oni debatis pri tio, ke iu intencas verki historian verketon pri nia movado, sed poste... silento! Ne sufiĉas bona intenco, sed same grave estas venki ĉiuspecajn malfacilaĵojn, kolekti el multaj fontoj taŭgajn materialojn, ilin prilabori, disponi pri kunlaborantoj, kiuj sufiĉe rapide povas resendi korektendajn manuskriptojn kaj fine, kara leganto, ne estis facila tasko trovi iun, kiu finance subvenciis la eldonon kaj intertrakti kun blindulorganizaĵo, kiu bonvolis presigi la "Historion" sub ege favoraj kondiĉoj tiele, ke dank' al preskaŭ neimagebla helpemo bonkora ricevos senpagajn ekzemplerojn de tiu ĉi unua volumo ĉiuj porblindulaj bibliotekoj pruntedonantaj esperantaj kaj gesamideanoj laborantaj por la bono de nia afero, sed ankaŭ multaj samideanoj pagos kompare malaltan prezon por la verko.

Kredinde kelkaj aŭ eĉ multaj el niaj legantoj kritikos, ke [en brajlo] la vortoj Esperanto kaj blinduloj kun derivaĵoj aperas sen mallongigoj laŭdezire de multaj el ni kaj, ke la hispana brajla presejo uzis la malferman kaj ferman citilojn por enkadrigi fremdlingvaj vortojn anstataŭ la punktojn 2 kaj 5.

La dua volumo, ankoraŭ ne preta, entenos biografiojn de elstaraj nevidantaj pioniroj jam forpasintaj kaj tiun de nia "paĉjo" prof. Th. Cart, la karmemora fondinto de nia movado kaj... la daŭrigon de nia "Historio" ekde la jaro 1946 ĝis la nuna tempo supoze, ke la terestro donos sufiĉe da tempo al la aŭtoro por plenumi ankaŭ ĉi tiun taskon.

J. KREITZ
[1898–1977]

Titolpaĝo de la originalo (1981)

Joseph Kreitz

Historio de la Esperanto-movado inter la blinduloj

Dua volumo

Tria parto:

Eminentaj pioniroj de la Blindulesperantista movado

kun financa subteno de forpasinta sinjorino Constanze Zapater eldonis en brajla
preso Esperanto-Blindulligo de Germanujo (EBLoGo) 1981

Antaŭparolo

En la antaŭparolo al la "Historio" oni promesis publikigi biografiojn de eminentaj kaj elstaraj pioniroj de nia movado en tria parto. Oni povas plenumi la promeson nur dank' al la fakto, ke restis ankoraŭ sumo de tiu financa subteno ofereme donita de nia karmemora, forpasinta bonfarantino, sinjorino Constanze Zapater, por ebligi la eldonon de la verko.

Al ŝi ni dediĉas ĉi tiun volumeton kun sento de profunda dankemo en la koroj de nia internacia legantaro. Longtempe la aŭtoro meditis pri la laŭvica aranĝo de la biografioj: ĉu ilin ordigi laŭalfabete, laŭlande aŭ alimaniere. Ne trovante kontentigan solvon, ni decidis publikigi la biografiojn unue de tiuj karmemoraj pioniroj, kiuj estis agemaj en la unua periodo de nia movado, kvankam ne estis eble agi korekte laŭ ĉi tiu principo, sed post la antaŭparolo vi trovas kompletan liston de ĉiuj biografioj.

Ni konscias, ke mankas biografioj de kelkaj eminentaj gesamideanoj aktive laborintaj en nia movado, sed estis neeble trovi datojn ekzemple pri profesoro G. Couillard, la unua presisto de EL, Ella Bull, la elpensintino de nia Esperanta Stenografio, i.a. la aŭtoro atentigas, ke li ne verkis ĉiujn biografiojn, sed nur kompilis aŭ kompletigis ilin laŭeble donante la nomojn de la verkintoj, al kiuj li diras tutkoran kaj sinceran dankon.

Dankeme ni memoru niajn forpasintajn pionirojn promesante dum silenta horo imiti ilian ekzemplon, ilian fervoran laboradon por nia sankta afero.

TIO ESTAS LA DEZIRO DE
JOSEPH KREITZ

Listo de la biografioj:


Harald Thilander	[Svedio]
Théophile Cart	[Francio]
William Percy Merrick	[Britio]
Karel Emanuel Macan	[Ĉeĥio]
Johan Wulff	[Danio]
Agnes Melchior	[Danio]
Paul Ketterer	[Svislando]
Edvard Imsdahl	[Norvegio]
Henriette Zapater	[Nederlando/Germanio]
Anna Friman	[Finnlando]
Baldomero Zapater	[Hispanio/Germanio]
José Ezquerro Berges	[Hispanio]
Angelo Raffaele Tancredi	[Italio]
Vasilij Jakovlevič Eroŝenko	[Rusio]
Julius Hasselbach	[Germanio]
Kapitano Jan Silhan	[Ukrainio/Pollando]
Halvdan Karterud	[Norvegio]
Miklos Bano	[Hungario]
Constanze Zapater	[Germanio]
Vincenzo Musella	[Italio]
Edgar Guilbeau	[Francio]
Charles Hedqvist	[Svedio]
Joseph Kreitz	[Germanio]

Harald Thilander (1877–1958)

Pioniro de Esperanto inter la tutmonda blindularo

Dum sia surtera ekzistado ĉiu homo ricevas plenumotan taskon, konforman al la kvalitoj, kiujn li laŭkaraktere esence ekhavas. La granda tasko, per kiu ni estas komisiataj, estas, ke ni en kaj per la propra vivo, en konsidero kun niaj limigoj, evoluigu niajn esencajn talentojn kaj niajn ŝancojn al kiom eble plej alta grado.

Foto Synskadades Museum



La vivo de Harald Thilander, nia granda kaj amata pioniro precipe sur la kampo de la translimaj kontaktoj kaj kunlaborado de la tutmonda blindularo, montras klare, ke la plenumado de tia vivkomisio ne dependas unufoje de fizikaj kapabloj aŭ malkapabloj, sed ĉefe determiniĝas de la karaktero kaj la spirita fortoj. Li estis homo kun rimarkinda inteligenteco, fortaj volo kaj energio, kun profundreligia sento, intensa interesiĝo pri la sorto de siaj kunhomoj kaj super ĉio, kun granda homamo. Certe la homa spirito malofte pli brilante ol ĉe tiu ĉi viro montris tian povon leviĝi al la lumo, spite la plej malfacilajn barojn, kiujn malfavora naturo povas amasigi en ĝia vojo.

Harald Thilander naskiĝis la 25an de oktobro 1877 en la paroĥo de Breared en la sveda provinco Halland, kie lia patro estis paroĥlerneja instruisto, unu el tiuj, kiuj ne nur laboradas por la klereco, sed ankaŭ kun fervoro kaj antaŭenrigardo staras en la fronto de la komunuma reformlaboro.

Pri la edukmetodo de sia patro Harald Thilander mem rakontis jenan epizodon. Iu ŝajnas terura kaj iel nekompreneble stranga: Du buboj en la lernejo luktis, kiel la knaboj ja ofte ankoraŭ faras, unu la alian faligis sur la teron. Tiam la trijara Harald ekkaptis martelon kaj alkuris por helpi la – venkinton. Li batis kapon de la venkito tiel, ke li eksangis. Lia patro alvenis kaj prenis la etan kruelulon sur la brakon kaj devigis lin longe rigardi la sangantan vundon de la kamarado. Estis la sola puno – sed tre efika. Tiun ĉi lecionon Harald neniam forgesis.

Foje vizitis lian hejmon onklo, kiu al Harald ŝajnis laca kaj malgaja. Li volis ĝojigi la onklon – kaj kredeble estis iam aŭdinta iun viron paroli pri bona medikamento en tiaj situacioj. Li turnis sin al sia patro dirante: ”Paĉjo, donu iom da brando al la onklo!” Kaj jam tio helpis, la onklo fariĝis kortuŝita kaj diris: ”Kiu anĝelo tiu knabeto estas!” Li donis moneron al Harald. Alian gaston eble li ne egale ĝojigis: Lia vartistino Maja rigardis tra la fenestro kaj ekdiris: ”Jen la klaĉulino ree venas! Ĉiam ŝi kuras tien ĉi!” Kiam la onklino eniris kaj havis bonan kukon por doni al ili, la knabo malfermis sian buŝon: ”La klaĉulino ja estas bona, ke ŝi ĉiam kuras al ni kaj ekportas bonajn kukojn!” Tiam la onklino prenis sian kukon kaj foriris klake fermante la pordon.

La gepatroj de Harald esperis, ke la filo fariĝos pastro, kio ja tiutempe estis plej alta celo por filo de gepatroj. Li ankaŭ tre admiris pastron kaj konstante ludis pastroludon: Li konstruis predikseĝon el ŝtonoj, kolektis la lerneajn disĉiplojn ĉirkaŭ la predikejon kaj ekpredikis. La aŭskultantoj staris momenton, poste aplaudis kaj ekridis kaj – diskuris. La pastreto postkuris ilin kaj sukcesis atingi du knabinojn. Je ĉiu mano li prenis unu knabinon kaj trenis ilin al la predikejo. Sed kiam li ree staris supre kaj ekpredikis laŭtvoĉe, la knabinoj ekridis kaj forkuris. Ankoraŭ multajn epizodojn ni povus rakonti pri la juna Harald!

La etulo kreskis sana kaj vigla kaj distingiĝis jam frue per nenormala sopiro al sciado. Jam antaŭ sia kvina vivjaro li sciis legi kaj vizitadis libervole la lernejan klason de sia patro por partopreni en la lernado! Kvazaŭ lude la patro donis al li lernotajn taskojn, kaj rimarkante ke li sufiĉe facile solvis ilin, li plipezigadis la taskojn. Ofte, kiam la kolegoj venis en la frua matenhoro por hejti la lernoĉambregon por la lecionoj, li ŝteliris el la lito al la ”hejtisto” por studi kun tiu ĉi geografiajn kartojn kaj bildfoliojn. Estas kompreneble, ke la patro alligis grandajn esperojn al tiu ĉi klarvideblaj naturdotoj de sia fileto. Kaj por la knabo mem estis granda feliĉo, ke li antaŭ sia blindiĝo akiris plurajn pli-malpli klarajn impresojn kaj bildojn.

Sed baldaŭ la sorto ekbatis! En marto de la jaro 1884 li ekmalsaniĝis, pro malboneca skarlatino kaj eble, kiel oni poste supozis, poliomjelito (infana paralizo). Dum monatoj li ŝanceliĝis inter vivo kaj morto, – jes, unu tagon li eĉ estis ŝajnmortinta. Oni jam volis fari la animsonoradon por li, sed la patro, kiu ne povis kredi tian teruran veron, retenis ilin, kaj feliĉe – tiumomente la vivo revenis en tiun ŝajne senvivan korpon. Baldaŭ oni konstatis, ke lia vidpovo estis malpli bona, sed neniu pensis jam pri blindeco. Sekvis ankoraŭ multaj semajnoj de febro kaj deliro; kiam li fine iun tagon vekigis senfebra, ĉio ĉirkaŭ li montriĝis senluma! Tremante pro timo je la nepentrebbla mallumo, kiu ne estis distrata per la kandeloj, kiujn oni laŭ

lia peto metis antaŭ lin, li laste konsciiĝis pri la terura vero. Kaj krome, ankaŭ lia aŭdpovo ne plu estis en plena ordo.

Poste, ĝis ĉirkaŭ sia 30-jara aĝo, li povis aŭdi nur iomete per ia aŭdilo; tiuj aparatoj tiutempe ankoraŭ estis primitivaj. Nun sekvis du jaroj kaj duona de senokupado kaj devigata ripozo. La laŭnaturo vigla knabo tiom sciema suferis pli ol eble estus farinta alia infano dum tiu ĉi senlabora, malluma estado, kaj ofte agonio kaj senkuraĝo atakis lin tiel potence, ke li malespere devis elkrii en tiun malamikan mallumon kaj mortfantazioj, alie tiel nekonataj al infanoj turmentadis lin. Sola konsolo estis lia fratineto, kiu ludis kun li kaj helpis lin. Neniu vidulo ekpensis pri instruado al tia por la vivo perdita estulo; nur ĉe la fino de sia naŭa jaro li lernis trikadon kaj snurfaradon per iu aparateto.

Jam baldaŭ post la blindiĝo de sia fileto la patro malsaniĝis, en kio kredeble la korskua ĉagreno malbone efikis. Antaŭ sia morto li deziris kiomeble prizorgi la estontecon de sia kompatinda filo. Ĉar tiu daŭre estis malsanema, ŝajnis neeble enigi lin en ordinaran blindulinstituton. Tamen, en Stockholm ekzistis la Eugenia-hejmo fondita de bonfarema princino Eugenia por kriplaj kaj nekuraceblaj infanoj; tien Harald venis en novembro de 1886 kaj kelkajn monatojn poste mortis lia patro en 1887. Post la venko de la unua sopiro je la gepatra hejmo komenciĝis por la sciema knabo, kies cerbo nun dum kelkaj jaroj ripozis, vera diboĉado je la frukto de scio. Li konatiĝis kun la brajla skribo, sed ankaŭ tiu ĉi feliĉo ne estis longdaŭra. Estis ankoraŭ alia komplikaĵo de lia malsano: li suferis ian ostoputriĝon, precipe en la maldekstra mano. Transporto al flegejo porinfana montriĝis necesa; tie li kusadis, blinda kaj surdeta, izole kaj malgaje en la lito dum duona jaro, ĝis la kuracisto opiniis necese amputi la manon. Eksciante tion, Harald falis denove en teruron kaj malesperon, kaj pasie plorante li petegis al Dio kaj al la homoj indulgi lin, ne forigi tiun korpoparton. Kiam oni lin enportis en la operaciejon, li ankoraŭ laŭte ploris kaj per tio altiris al si la atenton de la cefkuracisto, profesoro Rudolf Berg, kiu demandis lin afable, kial li ploris. Ekĝemante la knabo ripetis siajn petojn, ke oni ne forigu lian manon. La scienculo klinis sin super la malsanulo atentege ekzamenante la manon. Subite li rapide ekstaris kaj diris ĝoje: "Aŭskultu, mia knabo, ni ne forprenos vian manon; nenecese. Ni provos alie kuraci vin." Ne estas do mirige, ke la knabo eksentis tion kiel senperan helpon de la ĉielo. Kaj efektive li iom post iom resaniĝis, kvankam la mano neniam plene kuraciĝis; baldaŭ li revenis al la Eugenia-hejmo, kie li estis la sola blindulo kun sana menso. Nur pri la Luthera kateĥismo kaj bibliaj rakontoj li ricevis regulajn taskojn, tamen oni permesis al li ĉeesti ankaŭ la ceterajn lecionojn, kvankam neniu pripensis fari lin utila ano de la laboranta socio.

Fine, dekokjara, revekiĝis lia junaga sopiro al sciado. En Svedujo ne ekzistis punktskribaj libroj, nur gazeto por blinduloj, kiu jam en 1888 komencis aperi, tiutempe falis en liajn manojn. En ĝi li legis, ke en Francujo, la lando de Louis Braille, ja ekzistis tiaj libroj kaj li decidis lerni la francan lingvon. Ĉiun ricevitan moneron li ŝparis por pagi al vidanta kamarado, Axel Forslin, kiu konsentis diktadi al li. Senmetode li elektis sescentpaĝan gramatikon. Ne estis facile, pro lia jam malforta aŭdpovo malfacile komprenis ĉiujn diversajn sonojn de la helpanto, kiu ja sciis neniom pri la fremda lingvo, sed pacience ili laboregis kelkajn monatojn. Tiam hazarde la estrino de la hejmo iutage surprizis lin dum tiu ĉi laboro laŭ si tute senvalora. Indigne ŝi eĉ malpermesis ĝin aldonante, ke estus permeseble se li lernus la propran, svedan gramatikon. La junulo komence sentis malĝojon, sed iom kolerete li cedis, faris dum kelka tempo nenion, tamen fine li decidis eklerni la svedan; poste li dankeme pravigis la estrinon: li ja bezonis firman bazon por sia kleriĝo. Li elektis svedan gramatikon, kiun oni studis en mez-gradaj lernejoj. Lia kamarado Axel Forslin, kiu tre ŝatis lin kaj kiu de la direktorino tiucele ricevis liberiĝon de alia laboro, senlace asistis lin, kaj kun seninterrompaj fervoro kaj persistemo Thilander kopiadis kaj studadis monaton post monato, jaron post jaro, almenaŭ dum 12 jaroj. Post la gramatiko sekvis aliaj fakoj de la mezgrada lernejo kaj nur poste angla, franca kaj germana lingvoj. Daŭre kaj ĉiam pli firme kreskis en li la konscio, ke li, por helpi siajn samsortanojn, unue devas prizorgi sian propran kulturan nivelon.

Dume Thilander legis, krom siaj studoj, la gazeton por blinduloj eldonatan de Svedujo. Mirige estas, kiel li per sia pure aŭtodidakta studado funde alproprigis al si tiun vastan spiritan evoluon, kiun ni ĉiuj, kiuj pli poste ekkontaktiĝis kun li, tiom admire konstatis. Dum siaj studoj li ofte ekpensis, ke ne nur li sin klerigu, sed ke tio same necesas por la samsortanaro kaj li komencis konsideri, kiom da laboro povus esti ŝparata kaj kiom plimultiĝus la rezultato de la laboro, se ĉiuj blinduloj komprenus unu saman lingvon. La malgranda sveda gazeto kun siaj malmultaj legantoj povus tiam atingi legantaron de miloj el la tuta mondo. Lia unua kaj facile komprenebla ekpenso estis, ke la angla lingvo kun sia kompare simpla gramatiko estus plej oportuna kiel internacia lingvo por la blinduloj. Li komencis koresponde instrui iujn blindajn samlandanojn pri tiu lingvo, sed baldaŭ li konstatis, ke la rezultatoj estis malkontentigaj pro tio, ke ili bezonus vortaron, kaj kiel akiri ĝin? Lia propra vortaro ampleksis grandformatajn volumojn; preskaŭ neniu el ili havus la tempon, la okazon kaj la paciencon same kopiadi ĝin. Dum iom da tempo li pensis je la latina lingvo, la internacia lingvo de la instruituloj, sed jam baldaŭ konvinkiĝis, ke ĝi estas multe tro malfacila por taŭgi kiel interkontaktilo inter la blinduloj. Ĉu ne ekzistas alia vojo? Ho jes, jen estas Volapuk, kiu lingvo tiam cetere jam malprogresis; ĝia artefariteco neniel plaĉis al la serĉanta Thilander.

Iutage s-rino Amy Segerstedt, direktorino de la surdmutula instituto Stockholm, vizitis lin en la Eugenia-hejmo. Ŝi sciis Esperanton kaj aŭdinte pri la sopiroj de Thilander pri fremdaj lingvoj ŝi rakontis pri tiu nova internacia lingvo kaj por pruvi al li ĝian simplecon, Ŝi montris al li liston de la korelativaj pronomoj, sed ĝuste ĝi faris al li la impreson de plena artefariteco kaj senrezerve li turnis sin for de ĝi.

Pasis monatoj, antaŭ ol la Zamenhofa lingvo duan fojon estis metata en lian vojon, kaj nun de la hazardo aŭ la providenco mem. Estis en la hejmo antaŭ la matenmanĝo. Kamarado, kiu interesiĝis unue pri Volapuk kaj poste pri Esperanto, sciante ke Harald malŝatis tiun lingvon, legis laŭte, por vekti lian atenton:

En la mondon venis nova sento,
Tra la mondo iras forta voko;
Perflugiloj de facila vento
Nun de loko flugu ĝi al loko.

La bonsono de la vortoj tuj kaptis lin kaj li petis la kamaradon, denove legi tiujn vortojn, kiujn li kredis italaj. Kaj mirindaĵo! Li, kiu sciis francan, anglan, germanan kaj iom latinan lingvojn, komprenis ĉiujn vortojn de la nekonata lingvo. "Ho, kiel facile do estas la itala lingvo!", li ekkriis. Sed Bernhard, la kamarado, ekridis: "Esperanto, mia maljunuleto!"

Estis sunbrila tago de la jaro 1901. Thilander iris en laŭbon de la malproksima angulo de la parka ĝardeno, kaj vere, tie sidante sur benko li pasigis la tutan tagon, farante nenion krom pensadi kaj meditadi. Lia emocio estis grandega, solena! Li preĝis, dankante Dion pro tio, kio laŭ lia sento farigos beno por li kaj por la tuta samsortanaro. Sekvis kompreneble nerveca laboro. Sinjorino Amy Segerstedt havigis al li Esperanto-gramatikon kaj vortareton en brajla skribo. Kompare de liaj antaŭaj studoj, tiu ĉi estis ludo, sed li neniel rigardis ĝin kiel ludon, ĉar nun li komprenis ravite, ke li estis trovinta la tiel longtempe serĉitan internacian lingvon de la blinduloj. Sed tiu ĉi penso, kiu ekravis lin, alportis kun si alian, pli personan, kiu ankoraŭ pligrandigis lian feliĉon. Li, la mizerulo de la socio, kiu ŝajne nur estis destinita kiel ŝarĝo de aliaj, estis trovinta vivtaskon. Gravaj propagandaj artikoloj verkitaj de Thilander aperis en diverslandaj brajlaj gazetoj kaj li influis preparadon de gravega artikolo, kiun redaktoro Ahlberg publikigis en "La lingvo internacia" en 1901 kaj kiu altiris atenton de multaj bonkoraj esperantistoj vidantaj kaj blindaj, kiuj ekkonis la gravecon de la nova lingvo por la blinduloj. Kun helpo de la sveda gazeto porblindula li baldaŭ povis prezenti al sialandaj samsortanoj lernolibron pri Esperanto kun vortaro en brajla preso.

Lia unua provo disvastigi la lingvon ankaŭ en Francujo ne sukcesis. La fama franca asocio Valentin Haüy, kiu en tiu lando ĉefis la laboron de la blinduloj kaj kiu nun tiel multe faras por la diskonigado de Esperanto inter la blinduloj, volis unue vidi, kio fariĝos el la unua lingvo, antaŭ ol komenci eksperimenton per ĝi, kio kaŭzis, ke en la lando de Louis Braille, kie la blinduloj ankoraŭ ne uzis siajn alie bonegajn brajlajn gazetojn por interŝanĝi pensojn kaj opiniojn, estis ankoraŭ silento, ĝis fine ankaŭ tie estis aŭdita ”voĉo de vokanto”, la voĉo de prof-ro Th. Cart, kiu estis gajnita por la internacia lingvo.

Li gajnis por sia ideo prof-ron Edgar Guilbeau, kiu okupis eminentan pozicion en la blindula mondo kaj iom post iom disrompis la glacian barilon, kiu malhelpis la disvastigadon de la lingvo. Estis ankaŭ Thilander, kiu proponis la nunan Esperantan alfabeton tiel, ke prof-ro Cart povis eldoni en brajla preso la unuan numeron de Esperanta Ligilo kaj poste kelkajn malgrandajn librojn kaj radikarojn por diversaj lingvanoj.

Pli granda estis la sukceso de Thilander en Anglujo, kie la gazeto ”Progress” kun intereso kaj bonvolo malfermis al li siajn kolonojn kaj baldaŭ okazis vigla interŝanĝo de opinioj inter britaj blinduloj pri la nova ideo.

Eugenia-hejmo komence estis nur eduka kaj lerneja instituto, sed inter la edukitoj estis pluraj, kiuj neniel kapablus memstare vivi en la socio. Pro tio fondiĝis en 1901 aparta azilo por tiaj korpdifektitoj, kie ili povis restadi post la lerneja tempo. Iun vesperon la estrino komunikis al Thilander, ke li dum sia tuta vivo povus restadi en la azilo. Kompreneble estis al li trankviliga penso ke li estonte neniam bezonus havi zorgojn pri nutraĵo aŭ hejmo, sed tamen ...

Profunda melankolio ekkaptis lin pro la penso, ke li dumvive restus senlabora, dependa, sensignifa por si mem kaj por aliaj. Tiu prema ideo ne plu forlasis lin, kaj ju pli li kleriĝis kaj interkontaktiĝis kun la cetera mondo, des pli kreskis en li la sopiro forlasi la azilon, vivi kaj zorgi por si mem kaj ... labori por la samsortanaro.

Multan apogon kaj helpon en ĉi tio li ricevis de la blinda muzikinstruistino f-ino Karin Höjer, ankaŭ esperantistino, kun kiu li konatiĝis jam antaŭ la jaro 1901, sed precipe kun helpo de grafino Amanda Taube kaj s-rino Lotten Folin. Fine en la jaro 1907 li ricevis permeson forlasi la azilon. La estraro de la Eugenia-hejmo decidis subteni lin dum kelka tempo, la unuan jaron per 600, la duan per 300 kronoj. Sed kion fari por la vivnutrado? Li estis lerninta la brosfaradon, sed liaj amikoj opiniis lin tro talenta por tia profesio. Li luis ĉambron en la sama loĝejo, Majorsgatan 12, Stockholm, kie loĝis Karin, sed ĉe alia familio. Poste li

ricevis monsubtenon de onklo, konsulo Hök en Halmstad, kaj kun helpo de la fondaĵo "Lars Hiertas Minne", konsulino Maria Ekman, la Eugenia-hejmo kaj aliaj li sukcesis aĉeti malnovan stereotipmaŝinon kaj same malnovan presilon. Karin disponigis unu el siaj ĉambroj kiel laborejon kaj helpite de sia amikino nia pioniro komencis sian presistan profesion. Unue li eldonis literaturaĵojn en la internacia lingvo, sed dum tio kompreneble li devis batali kontraŭ senhaveco, unu el la plej gravaj baroj en tia batalo, kaj ne sukcesis produkti tiel multe, kiel li en sia brulanta fervoro estus dezirinta. Tial lia situacio grave malboniĝis kaj jam minacis la neceso reiri en la azilon, kiam ree la providenco savis lin. En 1907, post la forpaso de la eldonisto kaj redaktoro de la ĉiusemajna gazeto por la svedaj blinduloj, kiu estas subtenata de ŝtato, oni komisiis al Thilander la redaktadon kaj presadon. Karin kaj la bone konata angla blindulamiko s-ro Adams kaj aliaj ebligis al nia Thilander aĉeti germanan stereotipmaŝinon kaj anglan prespremaŝinon. De nun li havis financan ekzistobazon, kaj post kiam li estis ordiginta la komencajn malfacilaĵojn rilate al la gazeto, lia tasko estis kompare pli facila, kaj li jetis sin kun nova fervoro en la batalon. Li komencis eldoni propagandan gazeton kun parte svedaj, parte Esperantaj tekstoj kaj vortaretoj.

Jam kelkfoje aperis artikoloj de Thilander en "Ligilo", sed post eldonado de kelkaj specimenaj numeroj de la nomita gazeto en la aŭtuno de la jaro 1912, per kiuj li montris sian kapablecon, li akceptis komence de 1913 la redaktadon kaj enigis en ĝin freŝan, personan spiriton. Temoj de diskutado estis proponitaj kaj la enhavo estis elektita kun konsidero de la bezonoj kaj plaĉoj de la legantaro. La amplekso de la gazeto estis pligrandigita ĝis la duoblo kun 28 paĝoj 22-liniaj kaj 41 literoj linie. De ĉiuj lokoj en la mondo la nova redaktoro ricevis leterojn entuziasmajn de dankemo kaj ĝojo. El multaj landoj la legantoj mem kontribuis al la enhavo per valoraj sciigoj aŭ artikoloj, naskiĝis sub lia inspira gvido nia rimarkinda blindulesperantista sfero.

Ankaŭ en vidula medio kreskis la interesiĝo pri nia movado. Iuj influriĉaj personoj instigis kelkajn blindullernejojn instrui Esperanton, pro kio la nombro de samideanoj kreskis konsiderinde.

En 1914 eksplodis la unua mondmilito kaj silentigis dum kvin jaroj nian amatan "Ligilon". Kvankam ni ne havas informojn pri tiu terura periodo, ni povas imagi, kiom Thilander suferis spirite, sed lia volo tiom forta neniel rompiĝis, ĉar tuj post la fino de la milito li ree energiis. La ĝenerala situacio ŝajnis senespera; ĉia kontakto perdiĝis, la homoj estis skeptikaj pri interpopolaj kunlaboroj, la vivbezonaĵoj estis multekostaj, monon oni ne havis. Tamen nia brava pioniro Harald Thilander kun siaj amikoj energie laboris por reeldoni nian internacian gazeton tiel, ke jam en la jaro 1919 povis aperi tri "okazaj numeroj" kun salutoj de Skandinavio, Anglujo kaj Finnlando al la tutmonda blindularo.

Dum la pasintaj jaroj Karin kaj Harald konstante kunlaboradis en plena harmonio. Kvankam ili tre amis sin reciproke, ili ne kuraĝis geedziĝi pro la necerta ekonomia stato, parenca kontraŭstaro kaj aliaj motivoj. Tamen en 1919 ili decidis kunligi sian ekzistadon kaj komencis feliĉan geedzan vivon. Bofrato de Karin, kiu estis ĉefpastro en suda Svedujo, venis por edzigi ilin la 16an de junio.

Estus neeble raporti pri la vivo de nia pioniro, ne samtempe ankaŭ parolante pri lia admirinda edzino Karin. Certe ne ĉiuj scias, kiel ŝi ĉiam staris je lia flanko, partoprenante ĉiujn liajn interesojn kaj laborojn, apogante kaj helpante lin. Foje Thilander mem diris: "Sen Karin mi estus ankoraŭ en la azilo de Eugenia-Hemmet; se Karin ne estus ... Se Karin ne estus, mi nenion povus fari!"

Karin Höjer naskiĝis kiel filino de Gustaf Höjer, ĉefinspektoro de la sveda lumturaro, en la jaro 1866. En la unuaj jaroj de ŝia infanaĝo ne montriĝis difekto en ŝiaj okuloj, sed jam antaŭ ŝia dektria vivjaro ŝi estis perdinta iom post iom sian vidpovon. La vigla, kuraĝa knabino frutempe montris muzikan talenton, kaj sepjara ŝi jam ricevis muziklecionojn kaj kiel okjara knabineto ŝi jam mem komponis malgrandajn, simplajn muzikpecojn admirindajn pro tio, ke ili perfekte kunformiĝis al la leĝoj de harmonio.

Ŝi ankaŭ ofte mirigis siajn ĉirkaŭantojn, kiam ŝi, hejmenveninte el koncerto, ludis longajn fragmentojn el la nur unufoje aŭditaj muzikpecoj. Unu el la unuaj muzikpecoj de la knabineto ŝi nomis "La brueto de la arbaro", kaj poste sekvis multaj belaj komponaĵoj, precipe kantoj. Havante 12 jarojn, dum somero ŝi anstataŭis la lokan orgeniston en la kampara preĝejo, kie ŝia avo estis ĉefpastro, kaj perfekte ŝi plenumis sian oficon esceptinte, ke ŝiaj mallongaj kruroj ne povis atingi la pedalojn de la malnova orgeno. La kamparanoj multe ĝuis, kiam la "malgranda Karin" ludis, kaj ili aparte penis por bone kanti. Post kiam ŝi pasigis kelkajn jarojn kiel taglernantino en la blindulinstituto en Stockholm, ankaŭ lernante je aliaj instruistoj, ŝi estis akceptita, deksepjara, en la muzik-konservatorion, kie ŝi dum sep jaroj studis orgenon, fortepianon, kantadon, kontrapunkton kaj komponadon. Ŝi akiris la diplomon de instruistino pri kantado kaj muziko, pri orgeno kaj preĝeja kantado, kaj ankaŭ ŝi ricevis la medalon de la akademio. Dum postaj jaroj ŝi donis lecionojn pri muziko kaj kantado.

Kiam Karin Höjer interkonatiĝis kun Harald Thilander, tuj ambaŭ eksentis, ke ili havas multajn komunajn interesojn, pro kio ili komencis viglan kaj regulan korespondadon. Poste, kiam Thilander ricevis stereotipmaŝinon, Karin mem lernis uzi ĝin, por ke ŝi povu helpi lin en kazo de bezono.

Dek tagojn post ilia senceremonia geedziĝo venis eksterordinare ĝojiga letero de amiko W. P. Merrick, ke la angla "nacia instituto por la blinduloj" (Royal National Institute for the Blind) estis decidinta la eldonon de "Ligilo" subteni per sufiĉe alta monsumo. Poste aliaj blindulorganizajtoj sekvis la ekzemplon, tiel ke la abonantaro de la gazeto kreskis de jaro al jaro malgraŭ kelkaj krizoj. Pro tio, ke Thilander presis ankoraŭ aliajn gazetojn, inter ili literaturan, porvirinan, porinfanan, religian ktp. en sveda lingvo, li bezonis ĉiam pli da helpantoj en la presejo. Laŭeble li elektis por tio geblindulojn kaj kiam li krome bezonis vidulojn, li prefere dungis iun kun korpa handikapo. Baldaŭ la preseja spaco ne plu sufiĉis, nepre necesis pli vasta ejo. Feliĉe li povis aĉeti belan, por la celo tre oportunan vilaon Älfhem (elfhejmo) en Stocksund, kien translokiĝis la presejo en 1926.

Jam baldaŭ post ilia geedziĝo Karin ne plu povis helpi en la preseja laboro pro kormalsano, tamen ŝi neniel ĉesis asistadi, korektante la presprovaĵojn helpante en la daŭre kreskanta korespondado. Fine do ŝia sanstato treege malpliboniĝis kaj en 1927 trafis lin la terura bato: Karin mortis. Neporteblaj estis lia doloro, lia sento de soleco, kiujn li nur povis regi per streĉa laborado, al kiu li per sia forta volo sin devigis dum la sekvintaj monatoj. En artikolo skribis nia nederlanda samideano R. Israels laŭvorte: "Fine, kiel Joseph Kreitz tiom trafe foje skribis: Venis al li anĝelo el Finnlando, la sindonema, klera, praktika kaj ĉiam ĉarma poetino Varma Järvenpää". Ŝi naskiĝis la 1an de majo 1899, en finnlanda kampara regiono, kie ŝia patro havis terkulturan kaj brutbredan bieneton, elkreskis inter naŭo da gefratoj kaj blindiĝinte fariĝis masaĝistino.

Dum kvin jaroj ŝi praktikis tiun profesion en la vastaj finnlandaj kamparejoj, kie tiu laborado por senviduloj estas sufiĉe malfacila kaj streĉa. La 19an de novembro en la jaro 1928 Harald kaj Varma geedziĝis, kaj en 1929 ili kune vizitis la Esperantokongreson en Budapeŝto. Netakseble grandsignifa por la tutmonda blindularo fakte estis ŝia kunligiĝo kun nia pioniro. Same kiel li ŝi havis la spiritan privilegion dediĉi siajn talentojn al la fratiga idealo de Esperanto. La laboro en la presejo allogis ŝin, tiel ke ŝi dekomence lian agadon partoprenis dum tridek jaroj de komuna kunlaborado en amo kaj harmonio. Kun nova energio li daŭrigis siajn okupojn, konsilante, kuraĝigante, inspirante la tutmondan samsortanaron.

Influriĉaj homoj, precipe en Usono, volonte helpis lin kaj lian verkon; pro tio li kapablis dum kvar jaroj antaŭ la dua mondmilito eldoni grandformatan, eĉ reliefe ilustritan popularsciencan periodaĵon "Nia Mondo" (kun subtitolo: Kultura aldono al Esperanta Ligilo); ĝi estis nova faceto de lia kleriga laboro, tiu laboro sendube kontribuis al la strebado ke ankaŭ la senvidulo trovu sian "lokon en la socia vivo".



*Kovrilpaĝo de "Nia Mondo" kun palpeblaj ornamaĵoj
Foto Synskadades Museum*

Kvankam Thilander en sia alnaskita humileco neniam celis al publika honoro, li, kiun oni jam kiel blindan, surdan, kriplan destinis por sennome vivi kaj morti en azilo, superŝutiĝis per honoraĵoj; multnombraj estis la unuiĝoj, kiuj elektis lin honora membro, i.a. okaze de lia 75-jara naskiĝjubileo la "Mondkonsilantaro por la Bono de la Blinduloj"; kaj ne malpli estis la oficialaj omaĝoj: Okaze de la jubilea kongreso okazinta 1937 en Varsovio li ricevis de la pola registaro la ordenon Polonia Restituta, la plej altan ordenon por civiluloj, pro "lia grandioza kultura laboro inter la blinduloj de la tuta mondo". Kelkajn monatojn poste de la sveda registaro la kavaliran Vasa-ordenon, de la norvega registaro la ordenon de Sankta Olavo; el Finnlando li ricevis medalon "pro benignitate humana" kaj de Stockholma pacunuiĝo medalon kun 840 svedaj kronoj, kiun sumon li metis en la kason de "Ligilo". Saman malavaran geston li estis farinta jaron antaŭe, kiam li heredis mil kronojn post forpaso de onklo.

Aliflanke, bedaŭrinde, de tempo al tempo estis en nia propra rondo homoj, kiuj en si mem ne povis trovi kontentiĝon kaj harmonion kaj pro tio kontraŭstaris, malaprobis, atakis aŭ eĉ ofendis lin. Kun sincera admiro li neniam koleriĝis aŭ sentis sin ofendita, male per kelkaj mildaj vortoj li provis kontentigi la kontraŭulon kaj fari lin denove kunlaboranto.



Harald kaj Varma Thilander en Esperanto-renkontiĝo. Ili sidas meze mano en mano. Harald havas aŭdilon kun tubo kaj funelo. Varma mantenas funelon.

Foto Synskadades Museum

Pri lia agado tiom sukcesa en niaj organizaĵoj UABE-UABO vi legis pli detale en aliaj ĉapitroj de ĉi tiu "Historio". La dua mondmilito akre perturbis ĉian kunlaboron. Svedujo havis la grandan feliĉon denove resti ekster la mondmilito, tiel ke la suferado, la materia mizero, la vivdanĝero, la angoro pro la sorto de proksimuloj, kaj ĉio alia, kio akompanis la hompeladon kaj hombuĉadon en la batalantaj landoj, ne trafis geedzojn Thilander; tamen konante ilin ni scias, ke ne estas priskribebla ilia spirita suferado pro terurasorto, kiu trafis tiom da iliaj plej amataj geamikoj kaj kunlaborantoj. Kaj ni spertis, kiel volonte kaj dediĉeme ili post la milito klopodis materie helpi, kie tio eblis, konsili, konsoli, partopreni en ne rebonigebla doloro kaj mizero.

Kun nova energio Thilander eklaboris, kaj iom post iom restariĝis la perdita kunagado kaj la fido rompiĝinta ankaŭ en nia rondo. Lia centra figuro ludis ankaŭ en tio gravan, pacigan rolon. Sed dum la plialtiĝo de lia aĝo, lia sanstato grade malpliboniĝis; precipe li suferis pro malfortiĝanta koro, kiu ofte malhelpis lin labori konforme al sia ankoraŭ forta menso. Tamen, li laboradis, preskaŭ ne permesante al si ripozon. Kelkfoje dum la lastaj dek vivojaroj li ankoraŭ vizitis niajn kongresojn, faris iafoje malgrandan vojaĝon, sed cetere, dum feria periodo, kiam la asistantoj estis for, li tiom pli forte plenumis la necesajn aŭ dezirindajn taskojn.

Kaj eble plej mirige en tio estas, ke li neniam tion kiel ŝarĝon priplendis, sed kiel feliĉigan okupon aprezis! Enviinda spirita stato! Fakte ĉiam li estis gaja, bonhumora, kontenta, ĝuanta la vivon, la vivon ankoraŭ konsistantan el laboro por la kunhomo. Per speciala aparato li kapablis aŭskulti radion, sed pro sia laboremo li aŭskultis nur diservojn kaj informojn pri novaĵoj. Dum sia lasta vivjaro li plendis ofte, ke tio lacigas lin. Aliflanke li optimisme planis kaj revis pri rotacia presilo por eldoni propran semajngazeton en sveda lingvo, sed Varma, praktika kaj sobra, ja konsciis, ke ĉi tio tamen superus lian forton, bremsis lin en tio, kiom ajn dolorige ŝi sentis tiun neceson.

Laŭ instigo de kelkaj amikoj, Thilander dum kelkaj jaroj serĉis jam kapablan anstataŭanton por la redakcia funkcio de EL. Kiam la unua klopodo malsukcesis, li reprenis la taskon al si, sed kiam li fine, kvar monatojn antaŭ la morto, en plena fido povis transdoni ĝin al nia samideano R. Gonin, li volonte faris tion.

Venis sabato, la 13a de decembro en la jaro 1958. Dum la pasintaj aŭtunaj monatoj li fartis sufiĉe bone kaj laboris energie. Tiun sabatan antaŭtagmezon li ĝojis, ĉar la laboro pri EL nun estis tiom progresinta, ke ĝi certe povos aperi antaŭ kristnasko. Vigle li stereotipis Informilon, la organon de EBLoGo, kiam li vokiĝis al tagmanĝo. Dum la tagmanĝo li partoprenis en iu interesa interparolo. Sed finante la manĝadon, subite li havis atakon de apopleksio, kiu post du minutoj, sen agonio aŭ rimarkebla suferado, finis lian vivon. Ne estas imageble, kiel tiu neatendita batego ektrafis lian amatan kaj amantan edzinon...! Ni ne klopodu priskribi ŝiajn sentojn de doloro kaj de izoleco.

Granda malĝojo kaj funebro ankaŭ regis en la mondo de la blindularo kiam ĝi eksciis pri la forpaso de sia estiminda kaj de ĉiuj amata amiko. La januara numero de "Ligilo" tute al lia omaĝo dediĉita klopodis per vortoj esprimi ĉi tiujn sentojn kaj pensojn.

La enterigo okazis sabaton, la 20an de decembro, en Danderyd, apud Stockholm, al kiu paroĥo apartenas Stocksund. La funebrantoj kolektiĝis en tiea gasthejmo kaj veturis komune al la bela, mezepoka preĝejo. Granda nombro da florkronoj kovris la ĉerkon, inter ili unu de la "Mondkonsilantaro por la Bono de la Blinduloj". En sia funebra parolado teol. d-ro Bellerström skizis la verkon de la forpasinto, kiu tiom efikis pro lia amoplena kaj oferema koro; eminenta kantistino Esther Berggren kantis du himnojn, multaj reprezentantoj el blindulaj kaj vidulaj asocioj kaj rondoj esprimis sian funebbron pro forpaso de unu el la plej famaj blinduloj.

Okaze de la 80-jara naskiĝjubileo de Thilander li ricevis donace de en- kaj

eksterlandaj organizaĵoj kaj individuaj personoj sumon de ĉ. kvin mil kronoj por aĉeti eventualan rotacian presilon, sed ĉar ne efektiviĝis lia plano, li metis tiun sumon en bankon por vidi, kiel li povus poste aranĝi la aferon pri aĉeto de la dezirita presilo, kiu kostis multe pli ol tiu sumo. Post lia morto Varma ankoraŭ aldonis mil kronojn kaj kune kun jam ekzistantaj akcioj kaj konsiderindaj sumoj de la sveda centra organizaĵo por blinduloj "De Blindas Förening" fondiĝis la Thilander-fonduso kun kapitalo de ĉ. 25.000 kronoj, kiun administras la menciita organizaĵo kaj kies interezo estas por "Ligilo" tiel longe kiel aperas la gazeto.

Feliĉe Varma Thilander trovis en si forton kaj energion kontinui la laboron de sia mortinta edzo presante nian karan gazeton ankoraŭ tiom da jaroj ĝis tiu tempo, kiam ŝi pro manko de helpantoj en la presejo kun vera bedaŭro devis peti la estraron de Libe transdoni la presadon al alia presejo. Tamen ŝi ankoraŭ presis poste malgrandajn svedajn gazetojn, cirkulerojn ktp.



Pli aĝa Varma Thilander ĉe presmaŝino en presejo en Stocksund

Foto Synskadades Museum

Harald Thilander ne plu estas en nia rondo, sed lia ideo de "Esperanto inter la blinduloj", kiun li kreis per sia inteligenteco kaj nobla animo, ne malaperis kaj dumlonge ne malaperos, spirite li mem ne malaperis. Lia vivo havis por li mem, por liaj proksimuloj kaj por la blindularo tian benitan signifon, kian homo nur povus deziri.

LAŬ ARTIKOLOJ DE JOHN BERGH, RAFF ISRAELS, AGNES MELCHIOR KAJ JOSEPH KREITZ

Théophile Cart (1855–1931)

Fondinto de Esperanta Ligilo Kreinto de nia movado en la unua tempo

Post la biografio pri Harald Thilander ŝajnas al ni konsilinde sekvi ankaŭ biografion pri prof. Th. Cart, kiu ne nur estis la fondinto de nia "Ligilo", sed ankaŭ la efektiviginto de la ideo pri Esperanto kiel internacia lingvo por la blinduloj. Oni pripensu, ke li kreis – kvazaŭ el nenio – la unuajn lernolibrojn brajlajn, kreis nian "Ligilon", kreis per tio tiun kunlaboradon kaj tiun interamikiĝon de la tuta blindularo, kiu nun ĉirkaŭtenas kvazaŭ per retego ege multajn landojn de nia terglobo. Ne mirige do, ke prof. Cart estis nomita "Paĉjo" de la blindulesperantistaro dum kaj ekster la kongresoj kaj eĉ vidantaj samideanoj diris, ke li estis "La dua patro" post Zamenhof. Depost pli ol unu jaro sur lia skribotablo, ĉe kiu li pasigis laborante tiom da horoj tage kaj nokte, kaj ĉe kiu li ankaŭ mortis, konstante staris la bronza statueto, kiun la modesta dankemo de la tutmonda blindulesperantistaro estis al li oferinta okaze de lia sepdekkvina naskiĝjubileo, kun sur la soklogravurita dediĉo: "Al sia Paĉjo Th. Cart, la tutmonda blinda esperantistaro. La 30an de marto, 1930".



Estis statueto, kiu prezentis "semanton", kaj vere li disemis sian ideon pri unueco de Esperanto tra la tuta mondo per vortoj kaj skribado, ĉar li estis aŭtoro de gravaj verkoj, kritika, vigla kaj sagaca redaktoro de la "vortoj de la blankbarbulo". Tiuj el ni, kiuj atente studis precipe la unuajn ĉapitrojn de la "Historio", certe konstatis kun sento de dankemo, kiom nia "Paĉjo" Cart faris por estigi nian gazeton venkante ĉiujn penseblajn malfacilaĵojn, financajn kaj alispecajn obstaklojn per sia persista laborado. Tial kredinde estos interese sciigi por multaj el ni, kion li skribis en numero 1/1904 en Esperanta Ligilo:

"Karaj legantoj kaj samideanoj! Programon ni ne bezonas: Nia revueto mem estas sufiĉa programo. Sed tion ni devas tamen diri, ke ni uzos nur la Zamenhofan lingvon kaj akceptos nenian ŝanĝon, eĉ plibonigantan, ĉar en la nuna momento ĉia ŝanĝo, ĉu en la alfabeto (por viduloj aŭ por blinduloj), ĉu en la gramatiko povus esti pereiga por nia bela entreprono. Ni ne faru kiel fama kuracisto, kiu, ne trovinte

korpon de infano konforma je proporcioj juĝataj de li normalaj, mallongigis la krurojn, elkurbigis la bruston, rektigis la ŝultrojn, kaj ovaligis la kapon tiel, ke la infano irinte lerte, pro sia perfektigo mortis. Kontraŭe ni vivigu Esperanton tian, kia ĝi estas: Ne venis ankoraŭ la tempo ĝin korekti.”

Nun iom pri la vivo de la bonfarinto de la nevidantoj kaj fondinto de EL.

Théophile Cart naskiĝis la 31an de marto en la jaro 1855 en Saint Antoine (Dordogne), Francujo. Li studadis klasikan kaj modernan filologion en Lausanne, Basel, Berlin, Roma, Paris kaj Uppsala (Svedujo) kaj fariĝis licenciato en beletristiko en 1880 kaj ”agrégé de l’université de France” en 1885 (kun ”La unua loko”). Li estis instruisto en la ”Ecole Alsacienne” en Parizo (1881–1897), en Toulouse (1890–1891), en Uppsala (lektoro), sendita de la franca registaro por studi la svedajn lernmetodojn (1891–1892) kaj fine en Lycée Henri Quatre en Parizo kaj en la alta lernejo por politikaj sciencoj.

Prof. Cart publikigis en 1881 libron pri la restado de Goethe en Italujo (du eldonoj), diversajn eldonojn de germanaj klasikaj verkistoj, multegon da artikoloj pri skandinava literaturo en ”Grande encyclopédie”, lernolibrojn pri Esperanto kaj aliajn librojn. Li estis de multaj jaroj ano kaj poste prezidanto de la esperanta akademio kaj direktoro de la ”Komuna vortaro”.

Prof. Th. Cart edziĝis en 1888 kaj havis kun sia edzino kvar infanojn, el kiuj du mortis ankoraŭ junaj. La du pli aĝaj partoprenis kiel volontuloj en la unua mondmilito. El ili unu estis mortigita ĉe Somme kaj la alia dum longa tempo estis kaptito en Germanujo.

Pro siaj multaj servoj prof. Cart ricevis la krucon de la franca honora legio.

La 20an de majo en 1931 prof. Th. Cart post trankvila vespero, dum kiu li ankoraŭ korektis ĝis la 23a h. novajn presprovaĵojn, post same trankvila nokto li subite iom antaŭ la sesa leviĝis dirante, ke li sufokiĝas kaj sentas malvarmon. Dum lia edzino rapidas prepari ion varman, li forlasis sian dormoĉambron kaj aliras, kvazaŭ puŝite de mistera instinkto, sian laborĉambron sian kutiman apogseĝon antaŭ sia labortablo. Sed, preskaŭ sammomente li ŝanceliĝis kaj subtenate de la brakoj de sia edzino li falegis en la seĝon kaj li estis, ho ve! jam frapita de mortiga, sed sendolora koratako. La bono, kiu de li estis kreita en la mondo, lin rekompencu, rekompencos certege. ”La bono estas sia propra rekompenco” estas certe unu el la leĝoj de la naturo.

ALBERT MASSELIER KAJ JOSEPH KREITZ

William Percy Merrick (1868–1956)

Brita kaj tutmonda pioniro de Esperanto inter la blinduloj

Certe neniu el la legantoj de nia "Historio" kontraŭdiros kaj riproĉos nin, ke ni provos koncize raporti pri la vivo kaj agado de nia karmemora pioniro W. P. Merrick, ĉar li kune kun Harald Thilander kaj prof. Théophile Cart metis la Fundamenton de nia ideala movado, kies avantaĝojn ĝuos multaj el ni kaj ĝuos ankoraŭ pli multaj samideanoj post ni. Bedaŭrinda estas nur la fakto, ke ni scias tro malmulte pri nia pioniro pro tio, ke eĉ al la plej bonaj kaj plej fidelaj geamikoj li neniam rakontis pri sia vivo kaj tute silentis pri tio, kion li faris kaj kiom da mono el propra poŝo li elspezis por nia komuna afero kaj precipe por nia gazeto "Ligilo".

W. P. Merrick naskiĝis la 2an de novembro en la jaro 1868 kiel filo de bienposedanto. Li kaj lia same blinda frato Francis vendis la grandan patran bienon sciante, ke ili mem ne povos administri ĝin, kaj ili ambaŭ ekloĝis ĉiu en sia propra domo kun komuna muro, signo de harmonia kuneco. En la jaro 1905 oni elektis nian pioniron al la administra konsilantaro de Royal National Institute for the Blind, kaj kiam li emeritiĝis en la jaro 1953, oni elektis lin unu el la vicprezidantoj de la nomita instituto. Dum tiu tempo li servis kiel membro de la komitatoj pri sciencaj esploroj. Kvankam li streĉe laboregis por plibonigi la sorton de la blindularo, ĉiam li opiniis, ke edukado estas la plej bona ŝlosilo, per kiu malfermi la pordon de sukceso. Kunlaborante kun ĉiu individuo aŭ asocio, kiuj samopinias kun li, li fariĝis bonkonata kiel fervora blindulĉampiono. Inter la jaroj 1900 kaj 1916 li kvazaŭ pioniris pri la kolektado kaj publikado de britaj popolkantoj, kaj li estis aŭtoro de la broŝuro "La muziknotado de angloj". Merrick fariĝis spertulo pri la fonetikscienca metodo kaj kune kun d-ro W. Potthoff li publikigis verketon "La internacia fonetika alfabeto" en la jaro 1932.

En la unua ĉapitro mem verkita por la "Historio" de nia karmemora Merrick li rakontis interalie, ke estis nia Thilander, kiu iniciatis lin lerni la internacian lingvon, tamen, kion li ne rakontis, estas la fakto, ke kiam Thilander unue proponis al li lerni Esperanton kaj instrui la belan Mondlingvon, pro eta kono de Volapuk li iom malĝentile respondis al Thilander: "Mia tempo vere ne sufiĉas por infana ludilo!" Poste Merrick disvastigis Esperanton en sia propra lando kun bona sukceso, sed nur post multaj jaroj de senlaca laborado li preparis fruktodonan terenon por starigo de brita asocio de blindaj esperantistoj. Jam antaŭ la unua mondmilito li vigle klopodis varbi vidantojn pretajn ellerni brajlan skribon por brajligi librojn Por National Library for the Blind en Londono. Tiamaniere li sukcesis aldoni multajn verkojn al

la libraro. Oni rajtas diri, ke estis nia Merrick, kiu fondis la esperantan fakon en la biblioteko, kiu nun ampleksas pli ol mil verkojn esperantajn.

Nur en la jaro 1916 li edziĝis al unu el siaj Esperanto-transskribistinoj, Lottie. Dum multaj jaroj nia pioniro skribis meznombro 30 leterojn ĉiutage, dum lia edzino mirinde helpis lin dum pli ol 30 jaroj, ĝis ŝi tragike mem blindiĝis kaj forpasis antaŭ li.

W. P. Merrick estis kasisto de nia "Ligilo", sed li estis multe pli ol kasisto. Sir Arthur Pearson trovis nian gazeton tiel utila, ke Royal National Institute for the Blind donis po 240 pundojn sterlingajn dum du jaroj, ĝis la antaŭmilitaj subtenantoj ree povos doni sian subtenon. Kaj poste, dum regis inflacioj en preskaŭ ĉiuj eŭropaj landoj tiel, ke multaj abonantoj ne povis pagi abonprezon, ree estis nia amiko Merrick, kiu savis la gazeton de la malapero, sed pri tio vi ja detale legis en la oka ĉapitro pri Esperanta Ligilo.

Por la esperantaj diservoj okazintaj en Londono la duan dimanĉon ĉiumonate Merrick ĉiam brajligis himnojn por la blindaj partoprenantoj. Tiamaniere li instigis ankaŭ neesperantistajn blindulojn lerni la belan internacian lingvon. Multaj scias pri la verketoj, kiujn li presis per sia presilareto kaj disdonis senpage al siaj blindaj samideanoj. Post la forpaso de lia edzino lia sola, sed granda ĝojo estis helpadi siajn samsortanojn. Ĉiam li aspektis trankvile ĝoja, eĉ dum la tempo, kiam li devis multe suferi pro tio, ke li falis kaj disrompiĝis lia femura osto ne plu resaniĝonta. Nur dum la lasta tempo de sia vivo li kapablis iomete iri per helpo de ia stablo, kio tre ĝojigis lin.

La 7an de novembro en la jaro 1956 nia tim amata pioniro forpasis post mallonga malsano kaŭze de malvarmumo. La forpasinto ne apartenis nur al Britujo, la tuta mondo estis lia paroĥo kaj ni paroĥanoj konstante konservos korvarmigan memoron koncerne la vivon kaj ofereman ekzemplon de nia unika misiisto, kiu preferis cedi personan komforton por dediĉi sin kaj sian proprajon al samsortanoj tra la tuta mondo.

LAŬ KOMPLETIGITAJ INFORMOJ DE HARALD THILANDER

Karel Emanuel Macan (1858–1926)

Fondinto de la Esperanto-movado inter ĉeĥoslovakaj blinduloj kaj iniciatinto de la unua internacia kongreso de blindaj esperantistoj

Karel Emanuel Macan naskiĝis la 25an de decembro 1858 en la ĉeĥa urbeto Pardubice kiel filo de fama fervoja inĝeniero. Kiel lernanto de reala lernejo (duagrada lernejo) en Praha, kien estis transloĝiginta la familio, li perdis unu okulon pro eksplodigo de kapsulo trovita en tirkesto de skribtablo de sia patro. La duan okulon li perdis poste pro ekpuŝo al eĝo de infana kalkulilo en malluma ĉambro, estante studanto de kemio en teknika altlernejo.



Jam de post sia junaĝo Macan treege ŝatis muzikon bonege ludante fortepianon. Tial li decidis studi serioze muzikon en la jaro 1882 ĉe la fama muzikpedagogo kaj artisto Zdenek Skuhersky en trijara orgenista lernejo, kiun li absolvis kun eminenta sukceso kaj jam baldaŭ li vekis atenton pro siaj komponaĵoj. Fininte tiun lernejon, li daŭrigis studojn pri muzikkomponado private ĉe fama ĉeĥa muzikkomponisto Zd. Fibich. Tiucele li eĉ akiris ŝtatan stipendion fare de la registaro en Vieno (nuna Ĉeĥoslovakio estis antaŭ la jaro 1918 parto de la aŭstra-hungara monarkio). Venis la unuaj publikaj sukcesoj de la blinda komponisto Macan. Liaj kantkolektoj ne nur estis eldonitaj, sed ankaŭ kantitaj dum koncertoj de plej eminentaj ĉeĥaj kantistoj, kaj unu lia meso estis kantita pro rekomendo de J. Brahms en viena preĝejo. La arĉinstrumenta kvarteto f-mol apartenis siatempe (ĝi estis komponita en 1889) al la plej bonaj ĉeĥaj komponaĵoj tiuspecaj.

Tamen, kiam subite malboniĝis la materia situacio de lia familio, Macan ne povis vivteni sin kiel komponisto. En tiu tempo proponis al Macan la fama prahaa blindulpedagogo Klar instruistan postenon en blindulinstituto de li direktita sub la kondiĉo, ke Macan por ĉiam forlasu la muzikkomponadon por ne esti pro ĝi ĝenata en sia nova profesio de lerneja (do ne muzika) instruisto. Li sukcese partoprenis blindulinstruistan kurson en Vieno, kaj la 5an de januaro en la jaro 1891 li fariĝis blindulinstruisto de la blindulinstituto de Klar en Praha, kie li ĉefe instruis pri

literaturo, disdonante malavare al nematuraj, eĉ al plenkreskaj lernantoj el riĉaj domoj de sia spirito kaj koro.

Kontraŭvole li devis ĉesigi la muzikkomponadon, des pli fervore li dediĉis sin al sia lerneja laboro kaj al organizado de kultura vivo de ĉeĥaj blinduloj, kies plej gravaj rezultoj estis la fondo de la asocio "Ĉeĥa porblindula Preso" 1916, la ĉeĥa brajlogazeto "Zora" (1917), kiun li mem redaktis ĝis sia morto, kaj la porblindula biblioteko en Praha (1925).

Jam tuj post la apero de la unuaj numeroj de EL en la jaro 1904 li eklernis Esperanton kaj laŭdokumente jam en la jaro 1905 li aranĝis la duan Esperanto-kurson (por knabinoj) en la blindulinstituto de Klar en Praha. Li ankaŭ estis inter tiuj blindaj samideanoj, kiuj en la jaro 1907 partoprenis la unuan kunvenon de blindaj esperantistoj en la kadro de la tria universala kongreso de Esperanto en Cambridge. Kvankam li sukcesis akiri monrimedojn por partopreni kun grupo de ĉeĥaj blindaj samideanoj la unuan jam bonege organizitan blindulesperantistan kongreson en Parizo 1914, la eksplodo de la unua mondmilito malebligis la vojaĝon jam bone preparitan.

Macan mem verkis esperantan lernolibron, kiun li poste eldonis en brajla preso en 1918. En 1920 li fondis la esperantan aldonaĵon "Aŭroro" al la brajla gazeto "Zora" kaj en 1921 li organizis la unuan bonege sukcesintan kongreson de blindaj esperantistoj en la kadro de la dektria universala kongreso de Esperanto en Praha, kiun li mem prezidis. Samjare li fondis "Societon de ĉeĥaj nevidantaj esperantistoj".

Dum la milito Macan fariĝis "pedagogia direktoro" de tiu lernejo, en kiu li estis laborinta dum proksimume kvarona jarcento kaj ankaŭ dum kaj post la milito li instruis ĉeĥajn blindigitajn soldatojn, al kiuj li per sia propra ekzemplo kaj profunda vivrigardo redonis perditan kredon je senco kaj celo de la vivo.

El la muzikverkaro de Macan ni citu nur la kantociklojn "Juna amo", "Malĝoja amo", "5 kantoj", "15 kantoj" kaj "Ruĝaj sunsubiroj", la arĉinstrumentan kvarteton (ankaŭ surdiskigitan), du mesojn, virajn kaj virinajn ĥorverkojn, melodramon "Amarus" (recitaĵo kun orkestra akompano) kaj malgrandajn komponaĵojn por fortepiano kaj por violono kun fortepiana akompano.

De kelkaj jaroj suferante pro diabeto, nia pioniro Karel Emanuel Macan forpasis la 6an de februaro en la jaro 1926 post sukcesplena vivlaborado ne nur por siaj samsortanoj samlandaj, sed ankaŭ tutmondaj.

KOMPILITA LAŬ DIVERSAJ INFORMOJ

Johan Wulff (1850–1935)

Dana blindulafera probatalanto; pioniro de Esperanto inter blinduloj

Johan Wulff, tre agema kaj plej konata probatalanto en la dana blindulmovado, naskiĝis la 30an de novembro 1850 en Kopenhago. Jam dum la lerneja tempo lia vidpovo malboniĝis tiom, ke li devis peti edukadon en blindulinstituto kiel junulo. Li estis edukita kiel muzikisto kaj agordisto. Poste li deĵoris kiel preĝeja kantisto. Tamen, en la jaro 1883 li estis unu el tiuj, kiuj fondis la grandan blindulasocion, kiu unue nomiĝis "De blindes understøttelses-og læse-forening 1883" (subteno-kaj lego-asocio de la blinduloj, fondita 1883) kaj poste ŝanĝis sian nomon al "Foreningen for Danmarks blinde" (asocio por la blinduloj de Danujo), unu el la plej fidelaj subtenantoj de EL. Jam per la unue nomita asocio li metis la fundamenton por brajla presejo kaj biblioteko. En la asocio li havis la postenon de oficejestro kaj presejestro ĝis la jaro 1932, kiam post preskaŭ 50-jara agado li forlasis la estraron, kiu nomis lin honora membro. Johan Wulff laboradis konstante por siaj samsortanoj, kaj meritplene kaj energie li kontribuadis al la disvolvigo de la tuta danuja blindulprizorgado. Li, multflanke talentoplena homo, treege utilis al siaj danaj samsortanoj ankaŭ per diversaj inventaĵoj, elpensante punktskriban tabulon por ambaŭflanka skribado kaj rapidskriban brajlomaŝinon. Kvankam la laste menciita inventaĵo nun estas superita de ankoraŭ pli rapidaj samspecaj maŝinoj inventitaj alilande, ĝi certe ludis gravan rolon por la evoluigoj de tiuj maŝinoj, kaj la skribtabulo estas uzata ankoraŭ.

Sed por ni esperantistoj estas plej grave ekscii, ke Wulff estis sindonema samideano. Jam dum la unuaj jaroj de nia jarcento, kiel redaktoro de la dana, ĉiusemajna brajla gazeto "Budstikke" (la informilo) li enpresigis en sian gazeton esperantajn legaĵojn, eĉ jam antaŭ la estiĝo de EL. Same frue li eldonis la lernolibreton de Cart en danlingva traduko kaj esperantan-danan vortareton. Li kunlaboradis ankaŭ kun vidantaj esperantistoj kaj partoprenis la "provkongreson" 1907 en Cambridge. Ofte li rakontis, ke li renkontis d-ron Zamenhof mem kaj havis okazon pridiskuti kun li lingvajn problemojn. La 25an de februaro en la jaro 1935 forpasis Johan Wulff, unu el la unuaj probatalantoj por Esperanto inter la tutmonda blindularo.

LAŬ INFORMOJ DE POUL GLYGAARD

Agnes Melchior (1883–1945)

Post Johan Wulff certe Agnes Melchior, la fratino de la mondfama kantisto Laurits Melchior, meritas laŭdan mencion en nia historia libreto pro tio, ke ŝi ne nur propagandis sukcese nian internacian lingvon inter sialandaj, sed ankaŭ inter eksterlandaj samsortanoj. Dum multaj kongresoj inter 1921 ĝis 1939 ŝi interese prelegis pri blindulfakaj temoj, prezentante eĉ ilustraĵojn kaj ilojn taŭgajn por instrui ĉefe blindajn infanetojn en la antaŭlerneja aĝo aŭ iom pli laŭbezone. Ankaŭ ŝi estis tiu samideanino kiu petis kiel unua financan subvencion de la "Asocio por la blinduloj de Danujo" por nia ĵus fondita UABE kaj estis Agnes Melchior, kiu apartenis al tiuj, kiuj kolektis multan monon por nia "Ligilo" dum tempo, kiam minacis pereco al ĝi pro tio, ke regis inflacio en multaj landoj kaj ankaŭ "the Royal National Institute for the Blind" en Londono decidis doni monhelpon nur al britaj legantoj de EL kaj ne al la gazeto mem, kiel antaŭe. Kune kun Johan Wulff ŝi iniciatis la fondon de "Dana asocio de blindaj esperantistoj" (DABE), kies prezidantino ŝi restis ĝis eksplodo de la milito.

Agnes Melchior naskiĝis en Kopenhago la 15an de julio 1883. Unue ŝi estis edukita kiel kantistino, sed post ĉiam pliiganta ekblindiĝo ŝi decidis eklerni la profesion de infanflegistino intencante dediĉi sian vivon estonte al blindaj infanetoj suferantaj kun ŝi la saman sorton. En la jaro 1921 ŝi do kiel infanflegistino ekdeĵoris en la blindullernejo en Kalundborg, kie ŝi dum preskaŭ 24 jaroj kun patrino amo ludante edukis la blindajn infanetojn tie, kiuj ŝin nomis "onklino Agge".

Tro frue, la 25n de februaro en la jaro 1945 post insida malsano Agnes Melchior forpasis dum tempo, kiam ni bezonis ŝian helpon por rekonstrui nian Esperanto-movadon interblindulan.

LAŬ INFORMOJ DE P. GLYGAARD

Paul Ketterer (1870–1936)

La svisa Esperanto-pioniro Paul Ketterer estis unu el la unuaj esperantistoj nevidantaj, unu el tiuj, kiuj kun nia Paĉjo prof. Th. Cart revis kaj planis pri utiligo de Esperanto por la blinduloj kaj iliaj specialaj interesoj.

Paul Ketterer naskiĝis la 13an de aprilo en la jaro 1870 en La Ferrière, vilaĝo en la kantono de Bern, kiel filo de terkulturisto deveninta el la Nigra Arbaro. Li estis naŭjara knabo, kiam li ekblindiĝis pro falego sur la glacio. Ekde la jaro 1880 ĝis 1890 li frekventis la blindullernejon en Lausanne, kie li dekomence estis la plej inteligenta lernanto, sed ĉar ne ekzistis ŝanco studi por blinduloj, li eklernis la profesion de lignoskulptisto, kiun profesion li praktikis du jarojn en La Chaux-de-Fonds, kien intertempe estis transloĝinta lia familio. Ĉiam nia pioniro multe legis por kompletigi siajn sciojn. En 1892 oni revokis lin al Lausanne por doni al li tie la bonŝancon por partopreni kursojn en seminario kaj jam en la jaro 1895 li fariĝis instruisto pri matematiko kaj franca lingvo en la tiea blindullernejo. Samjare aperis la unua volumo kun liaj poemoj sub la titolo "Rayons dans la nuit" (radioj en la nokto) kaj jam en 1901 sekvis la dua volumo sub la titolo "Voix et brises" (voĉoj kaj ventetoj).

En 1902 Ketterer fariĝis estro de la brajla presejo ĵus nove instalita en la blindulinstituto. Okaze de la provkongreso de blindaj esperantistoj okazinta en Cambridge 1907, dum unu el la oficialaj kunsidoj sub prezido de nia angla blindulamiko Alfred J. Adams, Paul Ketterer faris sian belan paroladon, pri kiu vi legis en la tria ĉapitro de nia historia libreto. Kvankam liaj vivkondiĉoj ne permesis al li multe labori oficiale por Esperanto, li konservis tra la jaroj sian kredon je ĝia estonto kaj je ĝia forto por bori al si vojon. En 1910 li fondis la brajlan gazeton "Le petit progrès", kiun li redaktis ĝis 1936. 1911 li estis inter tiuj samsortanoj, kiuj fondis la "Svisan blindulligon", kaj 1923 li fariĝis redaktoro de la nigrepresita revuo "Le messenger suisse des aveugles". En tiuj ĉi nomitaj gazetoj de tempo al tempo li aperigis artikolojn kaj notojn pri la Internacia Lingvo kaj ĝia utileco por la blinduloj. Paul Ketterer, patro de sep infanoj, laboris por siaj samsortanoj ĝis la momento, kiam li forpasis la 21an de novembro en la jaro 1936.

Laŭ kompletigitaj informoj de Roger Cosandey

Edvard Imsdahl

(1886–1950)

Pioniro de la blindulesperantista movado en Norvegujo

Edvard Imsdahl naskiĝis la 3an de majo 1886 en Gudbrandsdal. Kiel dekdujarulo li ricevis baton en okulon, kiu post longdaŭra inflamo iom post iom kaŭzis kompletan ekblindiĝon tiel, ke li devis frekventi "Klæbu offentlige blindeskole" apud Trondheim ekde 1899 ĝis 1905, kie li sukcesis tiel bone, ke neniu antaŭlerninto ricevis tiom brilan ateston. Krom la edukaj objektoj li eklernis la ŝuistan kaj ankaŭ iom la lignaŝistan metiojn, tamen, tia laboro estis malbone pagita kaj cetere ne interesis lin. Tial li revenis al la lernejo por en aldona lingvokurso studi la anglan kaj germanan lingvojn, pri kiuj li poste perfektigis aŭtodidakte. Same aŭtodidakte li lernis Esperanton laŭ dana brajla lernolibro.



Jam kiel tiama lernanto en la jaro 1904 nia pioniro Imsdahl estis inter tiuj samsortanoj, kiuj fondis distriktan, okcidentlandan blindulasocion "Vestlandske blindeforbund", en kiu li gvidis multspecajn labortaskojn dum jardekoj. En februaro 1907 la asocio elsendis la unuan numeron de tre malgranda, en kelkaj manskribitaj ekzempleroj cirkulanta dumonata revuo. Ĝi ricevis la elvokan nomon "Norges blinde" kaj estis la modesta origino de la organo de "Norges blindeforbund" (norvega blindulligo). En 1909 Imsdahl troviĝis inter la fondintoj de la tutlanda "Norvega blindulligo" kaj kiam en la konstitucia kunveno oni decidis eldoni brajlan ĉiusemajnan gazeton "Norges blinde", estis Imsdahl la unua elektita redaktoro. Dum la kvar unuaj jaroj li devis ne nur redakti, sed ankaŭ stereotipi kaj per manforto presigi la gazeton. En intima kunlaboro kun Harald Thilander li iom post iom evoluigis modernan brajlan presejon Bergen. Mem li estis eksterordinare lerta kaj taŭga stereotipisto. Depost la jaro 1911 Imsdahl ankaŭ redaktis dum multaj jaroj la porvidulan ĉiumonatan revuon "Blindesaken" (blindulaferoj). Dum lia sperta administrado la brajla presejo multe kreskis: Ĉiam pli multaj gazetoj, ĉiuspecaj lernolibroj, beletristiko, diversfaka literaturo ktp., sed, kio ankaŭ estis tre grava, multaj muzikverkoj eliris el la presejo al la tiamablindularo, kies scivolemo estis neestingebla.

Kiel fervora esperantisto Imsdahl vigle propagandis kaj jam en sia junaĝo prizorgis eldonadon de brajla lernolibro kun la plej necesaj vortaroj por lerni Esperanton. Poste sekvis bonaj libretoj, malgranda propaganda gazeto "Antaŭen" kaj pli ampleksaj verkoj. Dum multaj jaroj li estis konsulo resp. delegito de EL, UABE, UABO kaj LIBE. Kompreneble li ankaŭ estis inter tiuj norvegaj gesamideanoj, kiuj okaze de la "dektria" en Stockholm, dumnokte, 1934, fondis la "Norvegan asocion de blindaj esperantistoj" (NABE), kiun li ame prizorgis ĝis eksplodo de la mondmilito.

Estis neeviteble, ke nia pioniro dum tiom da jaroj devis preni sur sin treege gravajn taskojn en la administracio de "norvega blindulligo". Kun entuziasmo li partoprenis la unuan nordlandan blindulaferan konferencon en 1920, kaj poste fervore laboris por krei pli bonajn kontaktojn translimajn. Imsdahl eluzis ĉiujn siajn fortojn en streĉiga laboro por plibonigi la vivkondiĉojn de la blinduloj. Fidele li restis en siaj gravaj postenoj kiel redaktoro kaj presejestro ĝis la jaro 1948, kiam serioza malsano trafis lin kaj kaŭzis lian forpason la 4an de majo en la jaro 1950.

(Ĉi tiujn biografiajn notojn ni dankas al nia veterano Halvdan Karterud, kiu dum jardekoj kiel ĝeneralsekretario de "Norges Blindeforbund" fidele kunlaboris kun Edvard Imsdahl.)

Henriette Zapater (1867–1928)

Pionirino de la Esperanto-movado inter la blinduloj

Henriette Zapater, naskita baronino de Chalmot, devenis el nederlanda nobela familio kaj naskiĝis la 4an de aŭgusto en la jaro 1867 en Arnhem, Nederlando, kiel filino de supera postadministracia oficisto. Depost ŝia naskiĝo, ŝi jam estis iom malbonvida, kaj en la plej frua infanaĝo ŝi perdis unu okulon per operacio, tamen ŝi povis frekventi privatan normalan lernejon por knabinoj. Specialan intereson ŝi montris por fremdaj lingvoj tiel, ke jam en la aĝo de dekdu jaroj ŝi bone parolis, krom la nederlanda lingvo, la anglan, francan kaj la germanan lingvojn. Poste ŝi lernis aŭtodidakte la italan, latinan, laste Esperanton kaj la hispanan lingvojn.

En 1901 Harald Thilander publikigis bonegan propagandan artikolon pri Esperanto en la angla porblindula gazeto "Progress". Henriette de Chalmot legis ĝin, sed mem posedante tiom da fremdlingvaj scioj, ne vidis unue la valoron de Esperanto kaj tial per alia artikolo publikita en la sama gazeto akre kontraŭbatalis la opinion de

Thilander. Tamen, per privata korespondado Thilander sukcesis konvenki ŝin pri la valoro kaj utileco de Esperanto speciale por blinduloj; karakteriza por ŝia sincera kuraĝa spirito estas tio, ke ŝi tuj publike konfesis, ke ŝi konvinkigis pri la graveco de la internacia lingvo. Depost tiu tempo ŝi laboris fervore por nia afero, ne nur inter blinduloj, sed ankaŭ inter vidantoj, ne nur en Germanujo, kie ŝi jam loĝis kelkajn jarojn, sed ankaŭ en ekstergermanaj landoj. Ĉie ŝi propagandis, laboris kaj skribis por nia lingvo, fariĝante per tio vera pionirino de nia alta ideo, al kiu ŝi restis fidela ĝis la lasta spiro. Ŝi partoprenis la universalajn kongresojn de Esperanto en Cambridge, Dresden kaj Barcelona antaŭ la unua mondmilito kaj post ĝi tiujn en Den Haag, Praha kaj Nürnberg. Dum la kongreso okazinta en Barcelona ŝi interkonatiĝis kun la hispana gitarvirtuozo Baldomero Zapater, kun kiu ŝi edziniĝis poste. De tiu tempo Esperanto estis kaj restis la familia lingvo de la diversnaciaj geedzoj.

En la jaro 1906 nia pionirino faris propagandan paroladon en la aŭlo de la komerca altlernejo (nune universitato) en Köln, kiu tiom bone sukcesis, ke fondiĝis la "Esperanto-societo 1906 en Köln". Alia rezulto de ŝia publika propaganda parolado estis tio, ke ŝi ricevis permeson gvidi Esperanto-kursojn dum tri jaroj en la nomita komerca altlernejo tiel, ke multaj intelektuloj fariĝis esperantistoj.

Kiel konsolino de la blindaj esperantistoj en Germanujo ŝi donis multajn informojn al eksterlandaj gesamideanoj pri la germana blindulafero. Jam antaŭ kaj post la unua mondmilito ŝi publikigis kelkajn propagandajn artikolojn pri la utileco de Esperanto por la blinduloj en la brajla gazeto "Mitteilungen des Vereins der deutschredenden Blinden" (sciigoj de la unuiĝo de la germane parolantaj blinduloj). Depost la fondiĝo de EBLoGo, la Esperanto-blindulligo de Germanujo, kiun ŝi kunfondis, ŝi seninterrompe apartenis al ties estraro kiel kasistino. Kiam en Nürnberg fondiĝis la "Universala Asocio de Blindaj Esperantistoj" (UABE), ŝi fariĝis germana delegitino de la nomita organizaĵo. Post la kongreso en Nürnberg ŝi pasigis kelkajn semajnojn en Hispanujo, sed revenante ŝi jam sentis sin iom malsana kaj de tiu tempo ŝi suferis multe, tamen nian aferon ŝi ne malzorgis ĝis la morto, kaj dekdu horojn antaŭe ŝi eĉ sub-skribis ĉekon de EBLoGo. La duan kristnaskan tagon en la jaro 1928 ŝi forlasis nin por ĉiam. La ĉielo ploris, kiam multaj geamikoj kaj vidantaj esperantistoj postiris ŝian ĉerkon, sur kiu kuŝis la florkrono de EBLoGo kun jena dediĉo en Esperanto: "Lasta adiaŭa saluto al nia kara kasistino kaj fidela animo de EBLoGo, Henriette Zapater." Kvarteto de la Kolonja Blindulunuiĝo kantis ĉe ŝia tombo. Theo Jung, eldonanto kaj redaktoro de la ĉiusemajna Esperanto-gazeto "Esperanto triumfonta", kaj J. Kreitz omaĝis la meritojn de la forpasintino por nia movado.

JOSEPH KREITZ

Anna Friman (1878–1937)

Finna blindulafera probatalantino

Anna Friman naskiĝis la 14an de julio 1878 kaj blindiĝis jam kiel infano. Tre frue jam Esperanto ektrenis ŝin en sian sorĉorondon, kiel skribis pri ŝi finna brajlogazeto. Ŝi partoprenis la fondon de la asocio de finnaj blindaj esperantistoj ”Steletto” en la jaro 1919, kies prezidantino ŝi estis ĝis 1927, kiam ŝi fariĝis sekretariino, kiun oficon ŝi administris konsciencce ĝis la morto. Ankaŭ ŝi estis la unua sekretariino de ”Universala Asocio de Blindaj Esperantistoj” (UABE) kaj partoprenis kelkajn blindulesperantistajn kongresojn, sed ankaŭ en la hejma ĝenerala Esperanto-movado ŝi agis aktive. Ŝi korespondis kun multaj samideanoj diverslandaj cefe pri literaturaj temoj kaj mem ŝi publikigis proprajn kontribuojn en EL.



En 1930 ŝi fondis ”La literaturan asocion por blinduloj”, tre riske-kuraĝan entreprenon en niaj cirkonstancoj. La menciita asocio publikigis du nigrepresajn revuojn: ”Varjojen mailta” (el la mondo de ombroj) kaj ”Finlands Blindorgan” (blindulorgano de Finnlando). La celo de la asocio estas al literature talentaj blinduloj publikigi siajn verkaĵojn kaj doni al la blindaj verkantoj okazon enspezi ankaŭ sur tiu laborkampo. Anna Friman estis respondeca redaktorino de tiuj revuoj ĝis sia morto, sed ankaŭ la brajlan gazeton de la finnaj blinduloj ŝi redaktis dum multaj jaroj kun varma sindonemo. Multaj iniciatoj, poste realigitaj de aliaj, havis sian originon en la ideoriĉa cerbo de Anna Friman kaj ĉiam ŝi estis preta helpi per konsilo kaj ago. Malmultajn monatojn antaŭ sia forpaso la 20an de aprilo en la jaro 1937 ŝi ankoraŭ sendis saluton el la malsanulejo al la legantoj de EL petante, ke ĉiuj kunlaboru fervore por disvastigi nian internacian lingvon inter la tutmonda blindularo.

VARMA THILANDER

Baldomero Zapater (1883–1961)

Probatalinto de la Esperanto-movado inter blinduloj

Nia pioniro Baldomero Zapater naskiĝis la 11an de marto 1883 en Candel, vilaĝo en la provinco Castellon de la Flana, Valencia, kaj ekblindiĝis en la kvina vivjaro. Kaŭze de tio liaj gepatroj transloĝiĝis al Barcelona, kie troviĝis eminentaj okulistoj kaj la Reĝa Instituto porblindula. Jam la ĝojo, kiun la sono de la patra gitaro enportis en lian mallumon, konvinkigis liajn gepatrojn pri la talento de la knabo, des pli multe, kiam li sur malgranda propra instrumento montris konsiderindan lertecon perfektigintan dank' al la instruo per la fama gitarvirtuozo Nogués en la nomita instituto porblindula, kie li post elementa instruado ekde la 13a ĝis la 24a vivjaro studis muzikon, muzikteorion kaj la grandan hispanan gitartradicion de Sor-Aguano kun granda sukceso tiel, ke poste dum du jaroj li mem instruis pri gitaro, muzikteorio kaj literaturo en la Reĝa Instituto porblindula.

En la jaro 1907 li dank' al fama vidanta samideano Sabadell en Barcelona konatiĝis kun Esperanto, kies lernado estis por li tre facila pro lia bona lerneja instruo. Jam en la jaro 1909, okaze de la kvina universala kongreso de Esperanto en Barcelona, li konatiĝis kun la nederlanda samideanino baronino Henriette de Chalmot, kiu ankaŭ ne estis normalvida kaj poste tute blindiĝis. El tiu ĉi interkonatiĝo rezultis ilia geedziĝo. Ŝi loĝis en Kolonjo kaj ĉar la arto de gitarludado tiutempe en Germanujo estis en stato de evoluo, por li estis favore loĝi en granda urbo. Li ne sciis unu vorton germanan kaj lia edzino ne jam sciis la hispanan lingvon; tial al ili estis nur eble kunvivi per Esperanto. Per Esperanto ŝi instruis lin pri la germana lingvo, sed la internacia lingvo restis ilia familia lingvo ĝis la forpaso de lia edzino en la jaro 1928.

En Kolonjo li komencis sukcese sian agadon kiel instruisto pri la gitarludado kaj ne troigante oni povas aserti, ke multaj, eĉ la plej multaj postaj famaj gitarkoncertistoj germanaj estis lernantoj ĉe la gitarvirtuozo Baldomero Zapater. Li koncertis ne nur en preskaŭ ĉiuj pli grandaj germanaj urboj, sed ankaŭ germanaj radiostacioj kaj i.a. tiuj en Londono, Prago kaj Vieno disaŭdigis liajn koncertojn. Ne miro do, ke multaj tag- kaj fakĵurnaloj raportis pri lia sukcesa kariero, sed li konfesis pri si mem, ke ĉiujn sukcesojn li ŝuldas grandparte al Esperanto, ĉar sen tiu ĉi lingvo li malgraŭ eksterordinaraj muzikaj kapabloj estus restinta nekonata ekster Barcelona.

Jam antaŭ kaj dum la unua mondmilito geedzoj Zapater publikigis valorajn artikolojn en du germanaj brajlaj gazetoj pri la utileco de Esperanto por la blinduloj, kaj dank' al ilia varbado kompare multaj germane parolantaj samsortanoj lernis la

internacian lingvon. Baldomero Zapater estis unu el la fondintoj de EBLoGo, kaj estis li, kiu donis la nomon al ĉi tiu organizaĵo. Ne nur hispanajn, sed ankaŭ multajn germanajn kantojn li esperantigis vere modele, ne parolante pri la rakontoj, kiujn li tradukis el la hispana lingvo.

Post sukcesa koncerto disaŭdigita de la radiostacio BBC en Londono nia pioniro decidis geedziĝi kun sia iama lernantino, la poŝtoficistino Constanze Saxer, kiu entreprenis kun li multajn koncertvojaĝojn kaj eĉ kunagis en kelkaj koncertoj kiel kantistino: Sur Ballu-tabulo li desegnis planon, laŭ kiu arkitekto konstruigis ilian domon tute moderne instalitan en Rodenkirchen apud Kolonjo, kie ili pasigis feliĉan tempon ĝis eksplodo de la dua mondmilito.

Estis la ĉefa hobbio de nia pioniro formi el kartono ĉiuspecajn ludojn porblindulajn (damo, paciencludo), kaj eĉ li bindis malgrandajn brajlajn libretojn modele, sed ankaŭ li sin volonte okupis pri matematiko kaj aliaj sciencoj. Ĉio interesis lin.

En la jaro 1943 aviadilaj bomboj ankaŭ difektis lian domon tiel, ke geedzoj Zapater devis forlasi ĝin, sed ĉie ili spertis la sekvojn kaj danĝerojn de la milito, precipe en Königsberg post koncerto en la tiea radiostacio, kiam ili estis enfermitaj en hotela kelo. Post vagado tra kelkaj urboj kaj urbetoj dank' al helpado de usonaj oficiroj ili povis jam reveni hejmen en junio 1945. Post forigo de la ĉefaj damaĝoj ĉe la domo, nia pioniro ree instruadis kaj koncertadis ĝis kormalsano longdaŭra faris finon al la agema vivo de la gitarvirtuozo Baldomero Zapater la 18an de oktobro en la jaro 1961.

J. KREITZ

José Ezquerro Berges (1880–1965)

Hispana blindulafera probatalanto

José Ezquerro Berges naskiĝis la 25an de junio en la jaro 1880 en la vilaĝo Benachite, regiono de Aragon, ekblindiĝis pro okula malsano en la 13a vivjaro kaj en la jaro 1898 li fariĝis lernanto de la blindullernejo Escuela municipal de ciegos en Barcelona, kie li edukiĝis kaj



fariĝis metiisto en 1907. Ekde la jaro 1909 li mem instruis pri manlaboraj metioj kaj brajla presado al blinduloj en la nomita instituto. Eble tiu lia profesio estis la cefa kaŭzo de la granda interesiĝo, kiun li montris pri la problemoj rilataj al la plibonigo de la ekonomiaj kaj moralaj vivkondiĉoj de la hispana blindularo. Sukcese li aranĝis tiucele kaj estris prizorgajn societojn de aŭ por blinduloj, lokajn aŭ provincajn, verkis dekojn da artikoloj por lokaj kaj naciaj ĵurnaloj kaj gazetoj koncerne la blindulproblemojn, kreante la 26an de februaro en la jaro 1931 la unuan federacion de hispanaj blinduloj "Federacion hispanica de ciegos", kiun li prezidis seninterrompe ĝis ĝia nuligo en 1938 kaŭze de la hispana dekreto pri la starigo de la "Nacia organizaĵo de blinduloj de Hispanujo" "Organisacion nacional de ciegos de España" (ONCE), kiu estis fondita en Burgos, urbo tiutempe apartenanta al la faŝisma teritorio hispana, sed José Ezquerro tiam loĝis en Barcelona apartenanta al la respublikana teritorio dum la hispana civilmilito kaj sekve li ne povis ĉeesti la fondiĝon. Ezquerro fondis kaj redaktis la brajlan blindulfakan gazeton "El Tiflofilo", kiun presis nia altŝatata Harald Thilander, kvankam ĝi estis hispanlingva; tio pruvas, ke nia samideano neniam perdis kontakton kun la Esperanto-movado. Tamen, li tute dediĉis siajn energiojn kaj talenton al la organizo kaj envojigo de la blindulmovado por atingi la realigon de la ĝusta kaj homa idealo de la socia renormaligo de la blindularo en Hispanujo. Tial "Tutmonda Konsilantaro por la Bono de la Blinduloj" (TKBB) distingis lin per honora membreco.

Post la starigo de ONCE la tiama estro de tiu asocio, Javier Gutiérrez de Tobar, donis al José Ezquerro la oficon de provinca delegito de Barcelona, kaj tiutempe li fondis kaj redaktis la gazeton "Relieves" (reliefaj), enkondukis en ĝi esperantan paĝon poste fariĝanta aldona esperantista bulteno, kiu finfine malaperis, sed nuntempe ONCE ree ĝin eldonas en la madrida presejo. En 1949 la hispana registaro donis al nia fervora samideano la oficon de nacia estro de ONCE. Per sia oficiala influo kaj persona agado li ege kontribuis al la restarigo de la Esperanto-movado enlanda, kiu travivis malfacilegajn momentojn pro la civilmilito kaj la atmosfero de la dua mondmilito. Konsekvence kelkaj esperantistaj grupoj, i.a. Madrida Esperanto-liceo, Bilbaoa Esperanto-grupo kaj Hispana Esperanto-Aŭroro (HEA) por danki kaj konstatiĝi sian efikan agadon nomis lin honora membro aŭ honora prezidanto.

José Ezquerro faciligis la kreon de HEA, la hispana blindulesperantista asocio, kaj la disvolviĝon de la Esperanto-movado inter blinduloj. Tiucele li havigis monhelpon por la blindaj ĉeestantoj de hispanaj Esperanto-kongresoj, se ili petis ĝin oficiale. Li sendis partoprenanton al la internaciaj kongresoj en Lyon kaj Mainz, kaj li mem ĉeestis la kongreson en München.

En la jaro 1959 li rezignis la altan oficon de estro de ONCE pro sia aĝo. La hispana registaro distingis lin per "Cruz de oro del orden de beneficencia" (ora kruco de la ordeno de bonfarado) por premioj liajn meritojn kaj klopodojn favore al la hispana blindularo.

La 17an de aŭgusto 1965 forpasis nia pioniro José Ezquerro en la ĉeesto de siaj filoj kaj filino, kiuj kun neordinara sindonemo helpis lin en ĉiuj cirkonstancoj, ekde kiam ili estis tre junaj.

ANGEL FIGUEROLA

Angelo Raffaele Tancredi (1878–1955)

Iniciatinto de la Esperanto-movado inter italaj geblinduloj; fondinto de "Itala Asocio de Blindaj Esperantistoj" (IABE)

Filo de malriĉaj gepatroj, Angelo Raffaele Tancredi naskiĝis la 19an de aprilo 1878 en San Marmo in Lamis (suditala provinco Foggia); post normala infanaĝo kaj fruktoriaj studadoj, li, scivola junulo, fariĝis fervoja inĝeniero kaj trovis okupon ĉe la ŝtata fervojaro. Ŝajnis, ke naturo donis al li ĉion plej bonan, kion malriĉa homo povas deziri: Li sukcesis atingi kontentigan laboron, edziĝis kaj havis infanojn; ĉio ja prosperis, ĝis oni komisiis al li taskon ĉe laboro, kies ekstrema humideco igis lin malsana pro reŭmatismo. Estis tagoj teruraj, tiuj en marto de 1910, kiam, vekiĝinte iun matenon, li konstatis, ke li plu ne povis vidi sunlumon. Pripensu, kiel konsternige senespera devas esti kondamno de kuracistoj por klera 32-jarulo, kiu plenan feliĉon povis atendi el la vivo: "Senutila estas espero, ke via vidkapablo renormaliĝos! Vi ĉiam estos blinda."

Kelkaj homoj ĉi tia-cirkonstance freneziĝus; aliaj eĉ rezignaciante, ne trovis en si memkapablon sufiĉan por ŝanĝi kaj rekonstrui sian vivon; li, kontraŭ, ĉerpis el filozofio forton por bataladi kaj volon por venki la obstaklojn enŝovitajn de la malbona sorto.

Jam antaŭ tiu tempo Tancredi aŭdis pri Esperanto kaj ties movado; sed nur tiam li konsciis la utilon kaj neceson de tia granda ideo, ĉar ĝuste per nia internacia lingvo li povis ricevi helpon el eksterlando, kiun la tipaj kondukantoj de blindula intelekta mondo ne sciis oferti en lia lando. Dume li studis, studadis, ĝis en 1914 li doktoriĝis pri filozofio kaj beletro. Por blindulo la instruado en ordinara mezlernejo tiam estis revo, kiun eble nur vidinto povis eĉ konjekti. Fakte, neniu blindulo okupis tian

postenon; eĉ al la plej agemaj kaj progresemaĵoj tio ŝajnas utopia. Nia pioniro, tamen, sukcesis ricevi provizoran katedron, nur poste konfirmitan de la instancoj, por kontentiga deĵoro.

De tiam ĝis en 1944 Tancredi ĉiam instruis en mezlernejoj – komplementa kaj komerc-tipa lernejo – ŝatata de siaj superuloj kaj kolegoj, amata de siaj lernantoj. Apud li, lia edzino ne nur estis la patrino de liaj infanoj, sed ankaŭ la helpantino bona kaj komprenema, ĝis ŝi kormalsaniĝis kaj mortis en 1945, kio lin ĵetis en profundan izolecon. Kvazaŭ tio ne sufiĉus, kelkajn jarojn poste ankaŭ mortis la filino, kun kiu li kunvivis post la forpaso de sia edzino – akra, profunda sortobato, al kiu aldoniĝis pli kaj pli kreskanta surdiĝo. Denove li enprofundiĝis en la studadon – ĉia problemoj nome lin allogis. Tamen, sendube nia Esperanto ĉiam estis lia ĉefa agokampo ĝis la lasta momento. Plene taksante gnan valoron ĉiel li helpis tiujn, kiuj deziris ellerni la lingvon. Jam en 1914 li sukcesis presigi la lernolibron de Cart en itala, sed nur en 1930 li verkis kaj presigis en brajlo radikaron, kiu ankoraŭ nun estas uzata. Ĉi tiuj estas elstarantaj rezultoj en lia laboro rilate al Esperantoinstruo en lia lando. Sed aliajn rezultojn ne malpri trafajn, kvankam eble malpli evidentajn, li atingis tiel en internacia kiel en nacia medioj.

Internacie li estis vere konata ĉe universalaj kaj blindulesperantistaj kongresoj, trovante vastan eĥon en la blindula medio: Li estis ja dua sekretario de UABO ĝis la militeksplozo, altirante al si ĉies simpatiojn. Specialan menciojn meritas tio, ke per ĉiaj rimedoj – ofte uzante propran monon – nia pioniro kapablis starigi, gvidi kaj defendi la italan asocion de blindaj esperantistoj en la plej malfacila periodo de la landa historio.

Ankaŭ en la matematika kampo – precipe en la brajlonotacio – li ellaboris interesan sistemon de li nomatan "Arit", sed menciinda ankaŭ estas la fakto, ke li dum multaj jaroj estis redaktoro de la ŝakfako de EL, ĝis la milito malebligis la aperadon de la gazeto, sed la fundamenton de tiu fakto li konstruis. Li eĉ verkis italan gramatikon en Esperanto por tiuj gesamideanoj, kiuj deziras lerni la italan lingvon. La kialo de tio, ke tiu gramatiko ne estis presita, estas – ha! kiel kutime! – manko de monrimedoj.

La 12an de januaro 1955, matene ĝuste ellitiĝinta, kiam, tre frue kiel kutime, nia pioniro d-ro inĝ. prof-ro A. R. Tancredi intencis komenci sian taglaboron, atakis lin terura paralizo kaj – ho ve! – saman vesperon li forlasis nin por ĉiam.

GUGLIELMO VASSIO

[Inter krampoj estas korektoj kaj kompletigoj provizitaj de s-ino KIKUSIMA Kazuko.]

Vasilij Jakovleviĉ Eroŝenko (1890–1952)

Verkisto, poligloto kaj vojaĝanto

Apenaŭ oni trovas pli konvinkigan pruvon pri praktika utileco de Esperanto ol tiun, kiun al ni prezentas la mirinda vivkariero de tiu ĉi rusa blinda verkisto, poligloto kaj vojaĝanto, kiun ebligis sole Esperanto. La scipovo de lingvo [kaj homrilatoj-homretoj per Esperanto] ebligis al li plenan disvolviĝon de lia inteligento, liajn vojaĝojn kaj ellernon de multaj lingvoj. Certe, ke multaj neordinaraj hazardoj, neordinaraj mondpartoj kaj neordinara epoko helpis formadon de tiu neordinara, preskaŭ nekredinda vivhistorio.

Vasilij Jakovleviĉ Eroŝenko naskiĝis la 12an de januaro en la jaro 1890 kiel filo de [riĉa] kamparano en rusa vilaĝo Obuĥovka en regiono de urbo Bjelgorod. [Ĝis la revolucio la familio estis la plej riĉa en ĉi tiu loko (temas pri "la vilaĝo kaj ĝia ĉirkaŭo") posedanta vastegon da tereno kaj multegojn da ĉevaloj kaj bovoj, kaj plu entreprenanta prosperan drinkejon, sed la revolucio forprenis ĉion de la familio eĉ la loĝdomon pro la fajro. Obuĥovka estis siatempe en la orienta parto de la regiono Kursk, sed poste pro la reordigo de regiondividoj la granda regiono estis dividita, kaj nun la vilaĝo Obuĥovka estas apud la urbo Staryj Oskol, en la nord-orienta fino de la regiono Belgorod. (Laŭ la nuna mapo la urbo Staryj Oskol estas ĉ. 150 km norde de la landlimo de Ukrainio dum Belgorod, la ĉefurbo de la regiono, situas en la norda apudo de la landlimo.)] Kvarjara li blindiĝis pro [febrego de morbilo. Tiun informon s-ro TAKASUGI gajnis de s-ro TORII, kiu



*Fotita en 1917 en Birmo
Kyoto Lighthouse, Kyôto*

aŭdis pri tio de Eroŝenko mem.] Dekjara li fariĝis lernanto de la blindullernejo en Moskvo. [Fininte la lernejon en 1907, 17-jara Eroŝenko aliĝis al blindula orkestro en Moskvo. Tiutempe li renkontis esperantistinon, Anna Ŝarapova (1863–1923, bofratino de Pavel Birjukov, disĉiplo kaj biografo de Lev Tolstoj, de kiu ŝi mem esperantigis kelkajn verketojn). Ŝi parolis pri Esperanto kaj konsilis lin lerni ĝin kaj iri al Anglio por plu studi muzikon. Tio estis la unua turnopunkto en lia vivo. (p. 71 en "Kruĉo de sagêco" el ses-voluma "Elektitaj verkoj de Eroŝenko" kompilita de MINE Yositaka)].

Li ellernis Esperanton, ĉar en februaro 1912 li entreprenis vojaĝon al Londono por perfektigi ankaŭ pri scio de la angla lingvo, kiun li tiam ankaŭ ekstudis. [Lia celo estis plu studi muzikon.] La vojaĝon tra Berlino, Kolonjo, Calais kaj Dover li povis efektiviĝi nur helpe de esperantistoj en la traveturaj urboj kaj ĉefe helpe de esperantistoj londonaj, kiuj akiris por li akcepton por dumonata restado en la "Normala Kolegio por Blinduloj" en la tempo de la 20. de majo ĝis la 23. de julio 1912. [Ĉu tiuj datoj estas nova eltrovaĵo laŭ dokumento de la lernejo? Li estis tro aĝa, jam 22 aŭ 23, por lerni muzikon tie.] En tiujara septembro li revenis Moskvon kaj daŭrigis sian agadon en la dancorkestro. En la sekva tempo li okupiĝis pri la japana lingvo. [Li lernis la japanan lingvon de japana studento (s-ro SIMANO Saburô) en Moskvo unu fojon semajne por 4 horoj, kun honorario. Li deziris iri al Japanio por lerni masaĝarton, ĉar li en Londono de MERRICK aŭdis ke en Japanio blinduloj vivas ekonomie sendepende kiel masaĝistoj.] En aprilo 1914 li forvojaĝis al Tokio. [En 27 aprilo li aperis en la oficejo de d-ro NAKAMURA Kiyoo (2 junio 1855 – 3 januaro 1930), la estro de la Centra Meteologia Observatorio, akademiano, kaj en Esperantio la unua prezidanto (1926–1930) de Japana Esperanto-Asocio, delegito de UEA. S-ro NAKAMURA de tiam zorgegis, ankaŭ finance, la vivon de Eroŝenko en Japanio. Pro la helpo de s-ro NAKAMURA kaj japanaj esperantistoj Eroŝenko vizitis al la ŝtata Blindullernejo de Tokio en 11 majo, kaj la komprenema lernejestro MATIDA Norihumi (22 decembro 1856 – 23 novembro 1929) permesis ke li jam de sekva tago lernu kiel neregula gastlernanto masaĝon kaj aliajn. Sed li ne povis lerni en ordinaraĵoj. Tial la lernejo eĉ nur por li kaj instruiston posedantan la rusan kaj apartan instruiston pri masaĝo. Eroŝenko fervore lernis, kaj ankaŭ ludis-kantis en lernejaj muzikprezentadoj. Li eklernis en la Blindullernejo 11 majo 1914, laŭ "Sesdek-jara historio de la Blindullernejo de Tôkyô", 1935, la ministerio pri edukado.

Ekde la komenco de 1916 per kunlaboro de vidanta esperantisto ASAI Erin (25 marto 1895 – 9 oktobro 1969), studento pri lingvistiko, Eroŝenko komencis organizi Esperanto-kursojn kaj en sia Blindullernejo de Tokio kaj en alia privata blindullernejo. La plej lerta kaj grava lerninto estis lia samlerneĵano TORII Tokuzirô (1888–1970), kiu fariĝis la plej grava japana amiko de Eroŝenko.

En 21 februaro 1915 vespere Eroŝenko vizitis la hejmon de fama dramisto-verkisto AKITA Uzyaku (akita uĵaku, 30 januaro 1883 – 12 majo 1962), loĝanta proksime de la blindullernejo kaj de tiama loĝejo de Eroŝenko. AKITA estis simpatia pri blinduloj, ĉar lia patro estis blinda. Per tiu renkontiĝo AKITA eksciis pri Esperanto, kaj, laŭ la taglibro, jam sekvan tagon li eklernis Esperanton kaj de tiam preskaŭ ĉiutage lernis kaj eĉ komencis ĉeesti en diversaj kunsidoj de Esperanto. AKITA kaj Eroŝenko kune vizitis teatron kaj Eroŝenko pere de AKITA konatiĝis kun diversaj homoj en la artisma/intelektula socio. Eroŝenko ofte prelegis en Esperanto, kun interpreto de AKITA, por informadi pri Esperanto. Ekz. en aprilo 1916 Eroŝenko, kune kun AKITA kaj famega pentristo TAKEHISA Yumezi (16 septembro 1884 – 1 septembro 1934) vojaĝis al la urbo Mito, ĉ. 100 km norde de Tokio, por prelegi en tri lokoj. Tiam Eroŝenko parolis pri rusa popolkanto temanta pri la problemoj de virinoj.]

Onidire li tie kontaktis ankaŭ kun la grandfama hinda poeto Rabindranath Tagore, kiu tiam vivis certan tempon en Tokio. [Eroŝenko, AKITA k.a. nur ĉeestis la prelegkunsidon de Tagore (1861–1941) en 11 junio 1916 en la Universitato de Tokio (kun ĉ. 1500 aŭskultantoj). Tagore neniam "vivis" en Japanio, sed nur "vizitis" 5 fojojn inter 1916 kaj 1929 (plejlonge restadis en 1916 iom pli ol tri monatojn).

Eroŝenko komencis verketi, nome dikti kaj en Esperanto kaj en la japana. AKITA notis kaj poste aŭ esperantan tradukis japanen, aŭ japanlingvan plibonigis, por sendi al gazetoj, en kiuj li mem ofte verkis. AKITA interpretis ankaŭ prelegojn de Eroŝenko. Ankaŭ ĵurnalistino KAMITIKA Itiko (kamiĉika iĉiko, 6 junio 1888 – 1 aŭgusto 1981) per notado kaj plibonigado de buŝe diktita japanlingvaĵo ebligis al Eroŝenko gajni monon. Lia unua originala verko en la japana (diktita) estas "Rakonto pri lanterno" aperinta en la gazeto "Kibō (Espero)" januara numero de 1916, kaj poste en "Por la homaro", 5 oktobro 1924, la tria volumo de lia originala verkaro. La verkaron, tri-voluman (la unua en julio 1921, la dua en decembro 1921, sed la tria nur en oktobro 1924, ĉar pro la tertremego en Tokio en 1 septembro 1923, la ĵus presota materialo komplete perdiĝis kaj lasita estis nur presprovaĵo, de kiu oni nove kompostis). AKITA kaj aliaj projektis por gajni monon kaj sendi al Eroŝenko en Ĉinio senmona. Jes, en 1916 naskiĝis "verkisto Eroŝenko" en Japanio, en la japanlingva medio. Sekve en 1916 lia japanlingva verko "Paskotago" aperis sed nur brajle en la numeroj junia kaj julia de brajla organo ĉiumonata "Mutubosi no hikari (Brilo de ses steloj)" de la finintoj de la Blindullernejo de Tokio. (TAKASUGI sciis nur la titolon, sed ne trovis la verkon.)

Alia speciala afero en Tokio por Eroŝenko estas kontakto kun la Bahaismo, pro la esperantista misiisto bahaa s-ino Agnes ALEXANDER (1875–1971). Ŝi multe

helpadis Eroŝenko ankaŭ finance dum la tuto de lia restado en Sud-Aziaj landoj. Kaj plie en Birmo kaj en Hindio Eroŝenko estis helpita de bahaanoj, ne nur de japanoj kaj esperantistoj. Eroŝenko tamen forlasis la Blindullernejon kaj forveturis cele al Siamo, la nuna Tajlando, per ŝipo de Kôbe, apud Ôsaka, en 10 julio 1916. Tiel finiĝis lia unua restado en Japanio por 2 jaroj kaj 2,5 monatoj. Li iris al la ĉefurbo Bangkok por longa restado, ĉar la celo estis fondi blindulan lernejon.] En Tokio Eroŝenko multe interrilatis kun japanaj esperantistoj. [Sen helpoj de esperantistoj li ne povis travivi diverssence. Li kontaktis esperantistojn ne nur en Tokio. Plie li ankaŭ prelegis, prelegvojaĝis por informi pri Esperanto.] Ĉu tio okazis ankaŭ en Bangkok, tion oni ne scias. [En Bangkoko, la ĉefurbo de Siamo, li ne havis kulturajn kontaktojn kun lokaj intelektuloj. Dum restado helpadis lin juna japano oficdeĵoranta tie.]

Onidire la kaŭzo de lia tajlanda restado estis studoj pri tiea folkloro. [La celo de lia vojaĝo kaj restado en Siamo estis fondi tie porblindulan lernejon. (Tio estas klara el la taglibro de la estro de la Blindullernejo de Tokio, kaj en leteroj de Eroŝenko al TORII kaj aliaj el Bangkoko.) Sed ne trovinte intereson de homoj nek kunlaborantoj/subtenantoj, Eroŝenko decidis iri al Birmo. Li forlasis Bangkoko en 13 januaro 1917 per ŝipo, "Bangkoko – Singapuro – Rangoon (la nuna Yangon)" (laŭ lia letero al TORII.)] Li fariĝis direktoro de novfondita blindullernejo. [Ne. En la fino de lia unua restado, de januaro (verŝajne de la fino de januaro) 1917 ĝis 4 novembro 1917, en la blindullernejo de Moulmein (la nuna Mawlamyain) "La komitato proponis al mi fariĝi lernejestro, proponis preni ĉion en la manoj, sed mi, mi rifuzis...". Kaj la lernejo ne estis nove fondita, ĉar laŭ liaj leteroj la lernejo estis funkcianta jam de antaŭ ol lia alveno. Ĉiuokaze li plaĉis al tieaj homoj kaj lernantoj tiom, ke ili nomis lin "Kokoĝi", kiu signifas "granda frato".] En la samjara novembro li forlasis la postenon. (Pri la komenciĝo de venkoplana socialisma revolucio li certe tiam ankoraŭ ne povis scii.) [Li sciis. En la letero de 27 novembro 1918 el Kalkuto al TORII li skribis, "post la revolucio en Rusujo oni ekparolis pri aresto de ĉiuj rusoj en Hindujo. Miaj rusaj amikoj petegis min reveni kune kun ili Rusujon sur unu Rusa Vaporŝipo, mi rifuzis...".]

Laŭ TAKASUGI, kiu gajnis informojn pri Eroŝenko en Kalkuto ankaŭ de japana esperantisto, kiu helpis Eroŝenko en la komenco de lia vivado en Japanio kaj poste en novembro 1917 renkontis Eroŝenko en Kalkuto, kie li estis ofice, skribis, ke en Kalkuto Eroŝenko loĝis ĉe la estro de tiea blindullernejo, hindo studinta en la Royal Normal College and Academy for the Blind, en Britio, kaj Eroŝenko legadis anglalingvajn librojn en brajlo en la granda librodeponejo de la hinda sinjoro. Verŝajne tiu legado estis la fontoj de la rakontoj de Eroŝenko bazitaj sur hindaj popolrakontoj ktp.]

Li do revenis komence de 1918 al Birmo, sed la direktora ofico estis jam okupita de alia persono kaj Eroŝenko devis akcepti nur oficon de instruisto. [Lia dua restado en Birmo estis de marto ĝis 8 septembro 1918. Li ne estis direktoro en la antaŭa restado en Moulmein.] En septembro 1918 li ree forvojaĝis al Kalkuto. La celo de tiuj vojaĝoj estas nenie konkrete indikita, sed la fakto, ke li estis en la jaro 1919 fare de britaj koloniaj aŭtoritatoj ekzilita al Japanujo, supozigas nin, ke temis pri agado politike revolucia. [En la letero de 27 novembro 1918 li skribis: "la okan de septembro mi lasis la lernejon kaj reiris al Calcutta, por klopodi pri permeso reveni al kara lando de leviĝanta suno...". Li ja deziris reveni al Japanio. Tamen permeso de forvojaĝo ne venis. Ŝipo al Japanio foriris en 15 oktobro. Kaj en 20 oktobro venis la permeso. Tial tiam ne havis sufiĉan monon, sed li ŝanĝis la enhavon de sia peto: "al Francujo". Sed en junio 1919 oni resendis lin al Japanujo, de kie li venis.]

Cetere, iujn anarĥismajn trajtojn oni povas observi en lia rilato al la ideologio reganta en Sovetunio, kun kiu li de tempo al tempo konfliktis. Persona amiko de Eroŝenko, la blinda rusa poeto Ŝojev, diris al mi en jaro 1956 en Moskvo, kun pardonanta rideto: "Homo li estis ege bona, sed politikisto – ege malbona"

[Lia la dua restado en Japanio, de la fino de junio 1919 ĝis 3 junio 1921, iom malpli ol du jarojn, havis tute alian karakteron ol la unua. La unua estis ĉefe "en blindula mondo", kaj tamen enhavis komenciĝon de kontaktoj kun artismaj homoj pere de AKITA. La dua estis ĉefe en la socio ne-blindula. Li loĝis ĉe la apartamento, kie li jam loĝis en la fino de la unua restado. Temas pri apartamento posedata de la prosperanta panejo NAKAMURA-YA, en kies salono kunsidis multaj intelektuloj dum la geedza paro entreprenanta la panejon subtenadis senmonaj artismaj homoj, inter kiuj troviĝis ankaŭ homoj kun socialismeca ideo. Eroŝenko emis diskuti pri diversaj aferoj, ideoj profunde, sed en siatempa Japanio nur tiuj socialismecaj homoj, inkluzive de parto de esperantistoj, emis diskuti pri diversaĵoj insiste. Rezulte Eroŝenko amikiĝis kun ili kaj ofte ĉeestis en iliaj kunsidoj. Lia aspekto, absolute fremdula, estas tro klare evidenta inter japanoj, do liaj ĉeestoj en tiaj kunsidoj estis konata de la polico, kaj antaŭ ĉio en tiu tempo ajnaj rusoj estas suspektataj. En 1920 lian portreton du pentristoj ole-pentris samtempe samloke de malsamaj direktoj. Unu estas NAKAMURA Tune (1887–1924), kies "Portreto de Vasilij Eroŝenko" gajnis premion en prestiĝa ekspozicio kaj nun kiel la ŝtata kultura valorajo estas konservata en la ŝtata Muzeo pri Moderna Arto, en Tokio. La alia estas TURUTA Gorô (1890–1969), kies verko "Blinda Eroŝenko" estas posedata de NAKAMURA-YA.

En 28 majo 1921 noktomeze polico forportis Eroŝenko pro la registara ordono forpeli lin el Japanio pro la ebleco malbonidee influi al la japana socio. Siatempe ne

li aparte sed ĉiuj rusoj kaj eĉ de homoj el aliaj eŭropaj landoj estis suspektataj de la sekreta polico. Kaj en 3 junio li estis forsendita ŝipe al Vladivostok.]

Tiun ĉi fojon tamen ne logas lin Rusujo, sed Ĉinujo. [Ne tiel. Eroŝenko deziregis reiri al Rusio. Tio estas klara pro lia letero al AKITA el Vladivostok de 12 junio 1921, aperinta en tagĵurnalo, en kiu Eroŝenko diras, ke li ekiros en tiu tago al Habarovsk, Ĉita, Irkutsk, kaj plu al laborista Rusio, nome Sovetunio. Sed pro la politika malordo en Siberio ne ebligis al li okcidenten vojaĝi ol Ĉita. Al li restis sola ebleco suden iri, al Ĉinio. Laŭ la esploro de japana prof. HUZII Syôzô de Univ. de Tokio, ne esperantisto sed fakulo pri la ĉina lingvo, Eroŝenko parolis, en la anglalingva prelego ĉe la Esperanto-kunveno tuj post la alveno en Ŝanhajo, ke li ne povis eniri la Sovetan Rusion ĉar li ne estis ano de la komunista partio.

En Harbin lin trovis kaj gastigis monaton japana muzik-esploristo NAKANE Hiroŝi, kiu iam renkontis lin en Japanio.] Tra Harbin li alvenas en oktobro 1921 al Ŝanhajo. En februaro 1922 li venis al Pekino, kie li [estis akceptita kiel docento pri Esperanto (instruis angle) kaj rusa literaturo, kun aparte favorega salajro. La Esperanto-kurso estis malfermita jam en 1921. Kaj pri lia vivo en Pekino kaj liaj laboroj en la Pekina Universitato estas detala esploro fare de japana prof. HUZII Syôzô per atestoj per amaso da ĉinlingvaj dokumentoj. En Pekino Eroŝenko loĝis ĉe la granda domo de Lusin (1881–1936), famega verkisto, kiu jam sciis pri Eroŝenko per japana ĵurnalo, kaj antaŭ ol la alveno en Ĉinion de Eroŝenko jam tradukis el la japana en la ĉinan "Malvasta kaĝo" kaj publikigis en gazeto. Poste li tradukis verkojn de Eroŝenko el la japana en la ĉinan, ĉar Eroŝenko verkis japane ankaŭ en sia restado en Ĉinio. Sed poste Eroŝenko verkis en Esperanto (kompreneble neniom en la ĉina). Plijuna frato de Lusin, s-ro ZHOU Zuoren [esp-e prononcu ĝou zŭojen] (1885–1967), esperantisto, verkisto, tiam profesoro de Pekina Universitato, loĝanta en la sama tereno kun Lusin, multe helpis. Dum la restado en Pekino 3 studentoj esperantistaj funkciis kiel kvazaŭ sekretario-helpanto de Eroŝenko. Oni multe parolis pri li, havigis multajn okazojn prelegi, sed li sentadis solecon kaj sopiris al sia 'rusa panjo' kaj en 1922 julio li forveturis al Helsinki por 14a UK, kaj poste vizitis propran familion, post 8 jaroj de la ekiro al Japanio en 1914. La vojaĝon al la hejmloko akompanis japano s-ro WADA Kiitirô, tiam instruisto de la japana lingvo en lingva lernejo en Moskvo, kies raportoj en gazeto kaj en lia libro "Migrado en Rusio" 1928, aparte la ĉapitro "Vojaĝis kun Eroŝenko en la Malgranda Rusio" (tiu "Malgranda Rusio" temas pri siatempa, en 1922, ne-ĉefa parto de Rusio, kaj WADA uzis por montri Ukrainion), multe helpis la verkadon de TAKASUGI pri Eroŝenko en Rusio.]

Sed tiun postenon li ne okupas longe. Eroŝenko [senanonce monaton pli malfrue ol la promeso] revenis al Pekino en 4 novembro 1922. Nun logis lin Eŭropo. En aprilo

1923, tra Moskvo, li vojaĝis al Germanujo, kie li fariĝis gasto de germana blinda violonisto samideano Fritz Bunge. Lia celo estis partopreno en la 15. universala kongreso de Esperanto kaj la tria blindulesperantista kongreso en Nürnberg, okazintaj en aŭgusto 1923. [En tiu UK, kiun Eroŝenko partoprenis kiel esperantisto el Ĉinio, kaj li gajnis laŭdon de la kongreso deklaminte sian poemon "Antaŭdiro de la ciganino". En la kongresa adresaro troviĝas "Eroŝenko Bazilo, Gekino" (Gekino estas prezeraro de Pekino).]

Tuj post la kongreso li forveturis al Parizo, kie li interrilatis kun la rusaj elmigrintoj, verkistoj, artistoj, kaj li aŭskultis prelegojn en la pariza universitato. Volonte li pli poste rakontis al siaj lernantoj pri siaj rilatoj al la mondfama rusa ŝakmajstro Aljeĥin. Tie li ankaŭ interrilatis kun G. Raverat, sekretario de la pariza brajla presejo de la amerika organizaĵo "The American Braille Press".

[En 1923 la ŝanhaja Esperanto-organizaĵo eldonis] la esperantlingvan kolekton de prozaĵoj de Eroŝenko: "Ĝemo de unu soleca animo".

Komence de la jaro 1924 li revenas al Germanujo. Li aŭskultas kelkajn universitatajn prelegojn en Göttingen kaj pli poste li vivas en Leipzig, kie li paroladas pri Ĉinujo kaj Sovetunio en kunveno de laboristaj esperantistoj.

De la 6a ĝis la 13a de aŭgusto 1924 li partoprenas [en Vieno] la 16an universalan kongreson kaj la kvaran blindulesperantistan kongreson. Tie mi persone konatiĝis kun li. Li iradis ĉie sola, sen akompananto. Li portis la tipan rusan ĉemizon (ne ĉiam tute puran), kiun oni ne metas en la pantalonon. Vienaj tag-jurnaloj alportis lian foton kaj intervjuojn kun li. Ŝajnas, ke li sciis por si fari reklamon. Li estis tre vigla, parolis per alta tenora voĉo kun tipe rusa mola prononcado. Mi multe babilis kun li pri rusa literaturo. Eta okazintaĵo el unu laborkunsido de la ĉefkongreso restis klare en mia memoro. Reprezentanto de la internacia ligo de policanoj-esperantistoj komencis raporti pri ties agado. Eroŝenko ekstaris, frapis per pugno forte la tablon kaj kriis: "Hontu paroli pri polico! Mi ne povas ĉeesti kunsidon, kie oni parolas pri polico!" kaj li foriris frapante kolereme la plankon per sia bastono. Mi rememoras, ke mi aŭdis lin ĉiam diskuti en la koridoroj, en la ĝardeno de la viena blindulinstituto, kie ni loĝis, sed pri lia partopreno en la diskutoj de "nia kvara" mi ne rememoras. Li havis neniun referaton.

En la jaro 1924 li forvojaĝis al Moskvo kaj jam ne forlasis Sovetunion. En la jaroj 1924–1927 li laboras kiel interpretisto de la japana sekcio de la komunista universitato por la studentoj de la malproksima oriento en Moskvo. Li ankaŭ instruas Esperanton kaj en la jaro 1926 li partoprenas internacian kongreson de

laboristaj esperantistoj en [la nuna Sankt-Peterburgo.] Dum la jaroj 1929–1930 li entreprenas vojaĝon al la duoninsulo Ĉukotka, [la nordorienta ekstremo de Siberio, frontanta la Alasko, Usono, trans la malkolo Bering, nur 86 m larĝa. Kaj la celokialo de la vojaĝo estis kaj studi la vivkondiĉojn de tieaj blinduloj, kaj por revidi sian pliaĝan fraton Aleksandr, kiu estis bestkuracisto, esploranta tie pri cervoj.]

Lia literatura rezulto estis [kvar] esperantlingvaj rakontoj: "La blindaj ĉukĉoj. Ili estis verkita en 1929 kaj aperis en "Esperanta Ligilo": ["La ĉukĉa elegio" en n-ro 3, 1933 (kaj varianta "Ĉukĉa elegio" en "Ligilo por vidantoj" n-ro 12, en 1933); "Ĉukĉa idilio" en n-ro 4, 1933; "Blindaj Ĉukĉoj" en n-roj 5–8, 1933. ("Blindaj Ĉukĉoj" estas dividitaj en pecoj; enkonduko al "Blindaj ĉukĉoj" en EL; "Filip Onkudimov" en EL, kaj verkita unue en la rusa lingvo kaj publikigita en rusa revuo "Vivo de Blinduloj", n-roj 7–8, 1930; "La destinita vivi" en EL kaj varianta en "Ligilo por Vidantoj", n-ro 14, 1934.) Ankaŭ longa "La trimova ŝakproblemo" havis subtitolon "-- Tri skizoj el la ĉukĉa vivo --", kaj aperis en "Aldono" al EL, decembro 1947.] Dum la jaroj 1930–1932 li instruas matematikon kaj rusan lingvon en profesia blindullernejo en Niĵnij Novgorod. La sekvajn du jarojn li laboras kiel korektisto de moskva brajla presejo.

En novembro de la jaro 1934 li forveturas al Aŝĥabad en la turkmena respubliko kiel gvidanto de grupo, kies celo estis la "likvido de brajla analfabetismo" inter la turkmenaj blinduloj. Li [laboris komence kiel estro sed poste kiel simpla instruisto de la blindul-lernejo en Kuŝka, proksime de la ŝtata limo al [Afganio. (ĉ.100 km pli orienta de la punkto, kie la limoj de Irano, Afganio kaj Turkumenio renkontas.)] Tie li pasigis plenajn dek jarojn (1935–1945), kio estis sendube la plej longa tempo, kiun Eroŝenko en sia vivo pasigis samprofesie kaj samloke.

Sed eĉ la 48-jarulon ree logis la malproksima mondo. Laŭ rakontado de Ŝojev (en la oficialaj materialoj mi ne trovis tiun fakton) Eroŝenko volis sekrete transpaŝi la ŝtatan limon, kion li tamen ne sukcesis. Kompreneble li ne povis plue okupi la instruistan postenon, sed oni ebligis al li pluajn okupo-ŝancojn.

Li revenis al Moskvo. En 1945–1946 li instruis matematikon kaj rusan lingvon en muziklernejo por militblindiĝintoj en Zagorsk apud Moskvo. Dum sekvaj du jaroj li instruis la anglan lingvon en moskva blindullernejo. Fine de 1949 li venis al uzbeka ĉefurbo Taŝkento por lernigi tie blindajn plenkreskulojn. En la jaro 1951 li ankoraŭ entreprenas vojaĝon al la orientsiberia urbo Jakutsk, sed baldaŭ li revenas al Moskvo.

Malsana, sola, forgesita, li revenas al sia naskiĝvilaĝo Obuĥovka, kie li mortis la 23an de decembro en la jaro 1952. Li kunportis tien eĉ sian arĥivon, kiun oni post

lia forpaso volis dediĉi al la plej proksima filio de la tutrusia blindulasocio, sed tiu tute ne interesiĝis pri la afero. Oni do forbruligis la amason da papero.

En la lastaj 15 jaroj de la vivo de Eroŝenko ni jam malmulton ekscias pri la esperantista agado. Ankoraŭ en 1935 li serĉas en "Esperanta Ligilo" blindan muzikinstruiston-esperantiston por sia blindullernejo en Kuŝka.

Jen la vivhistorio de Vasilij Jakovleviĉ Eroŝenko, la blinda vojaĝanto, servanta ne nur per vortoj, sed per agoj al Esperanto kaj al blinduloj.

Por tiu ĉi skizo mi utiligis la faktojn publikigitajn en antaŭparolo al la ruslingva libro "Koro de aglo", ankaŭ la novelplorojn pri Eroŝenko de Pankov kaj Masenko.

RUDOLF KRCHŇÁK

[La libro "Koro de Aglo", la tradukaro en la rusa, estis eldonita en 1962 kaj represita en 1977. En Japanio en 1959 TAKAZUGI Itirô (17 julio 1908 – 9 januaro 2008), kiu jam en 1956 eldonis la unuan biografion de Eroŝenko, eldonis trivoluman verkaron de Eroŝenko. La ĉefa enhavo de la tria volumo estis la novelea biografio de Eroŝenko verkita de TAKASUGI kaj aldone estis diversaj dokumentoj inkluzive de ĉinaj. Li sendis la kompletojn al Rusio, kaj pro tio rusoj eksciis la verkojn de Eroŝenko. Laŭ la artikolo japanlingva de Sergej ANIKEEV, siatempe instruisto en la branĉa lernejo en Hakodate, en Hokkaidô, de la Rusa Ekstremorienta Univ., 2004, la rusa eldono enhavis 15 verkojn kaj el ili 7 estis tradukita el la japana, sed kelkaj estis duoble tradukita el la ĉina traduko, kaj iuj estis tradukita el Esperanto. La rusa antaŭparolo povus esti verkita surbaze de la verko de TAKASUGI, verkita laŭ la esploro komenca. Poste TAKASUGI pli kaj pli ĝustigis la enhavon gajninte pliajn informojn per esplorado kaj per vizitoj al Rusio, sed la enhavo de la rusa ŝajnas resti sama.]

Julius Hasselbach

(1874–1936)

Iniciatinto de internacia organizaĵo de blindaj esperantistoj kaj kunfondinto de Esperanto-Blindulligo de Germanujo (EBLoGo)

Julius Hasselbach naskiĝis la 28an de aprilo 1874 en Berlino kiel filo de simpla laboristo. Kiam li estis frekventinta la popollernejon, li eklernis la lignajistan metion kaj kiel migranta metiisto dum kelkaj jaroj li tramigris tutan Germanujon kaj eĉ la najbarajn landojn. Pro tio, ke post lia edziĝo ankoraŭ estis grava manko de laboro en la lignajista metio, li elmigris Brazilon, kie li laboris unu jaron kaj duonon. Mallongtempe post reveno al Berlino, li tute ekblindiĝis dum unu nokto.

Tamen, ankaŭ tiam li ne perdis la kuraĝon kaj la esperon fariĝi utila ano de la homa socio kaj mem perlabori vivnutron por si kaj sia familio. Rapide li lernis la brajlan skribon kaj samtempe li eklernis novan profesion fariĝante agordisto de pianoj, en kiu metio li laboris multajn jarojn. Jam en 1913 li lernis Esperanton aŭtodidakte kaj havis la firman intencon partopreni la blindulesperantistan kongreson en Parizo, 1914, sed intervenis la terura mondmilito, kiu detruis ĉiujn liajn esperojn. Dum milite, li ankaŭ estis unu el la partoprenantoj de la rondira leteraro kaj li vigle pridiskutis aferojn kaj projektojn realigendajn dum venonta paca tempo. Jam en 1920 li konfesis, ke li vivas "nur por Esperanto". Dum la unua blindulesperantista kongreso okazanta en 1921 en Prago, li kun Ignaz Krieger iniciatis fondon de internacia organizaĵo de blindaj esperantistoj, kiu tamen realiĝis nur en la jaro 1923. Kun kelkaj germanaj blindulkongresanoj li fondis la Esperanto-Blindulligon de Germanujo (EBLoGo), kaj li estis inter tiuj, kiuj en la loĝejo de geedzoj Zapater en Kolonjo kunverkis statuton de la nomita organizaĵo, kies dua prezidanto li estis ĝis 1933, kiam la bruna reĝimo kontraŭbatalis nian internacian lingvon.

Pro senvaloriĝo de la germana mono Julius Hasselbach ne povis partopreni "nian duan" en Helsinko, 1922, sed li ne mankis en niaj kongresoj en Nürnberg, Wien, Edinburgh, Danzig (nun: Gdansk [Polujo]), Antwerpen, Budapeŝto, Oxford, Krakovo, Parizo kaj Köln. Certe, ĉiuj nejunaj samideanoj, kiuj havis la bonŝancon interkonatiĝi kun nia "gaja berlina kongresbabilanto", memoras lin. Li estis la ĉefa kunlaboranto de Eugen Reiche, kiu verkis "Instruajn leterojn de Esperanto" eldonitajn en brajla preso. Lia aŭtobiografio finiĝas per la vortoj: "Unu solan deziron mi havas ankoraŭ antaŭ mia morto: Mi ŝatus denove ĉeesti internacian kongreson esperantistan, mi volus renkonti kaj interbabili kun karaj geamikoj el multaj landoj."

La 23an de aŭgusto en la jaro 1936, Julius Hasselbach forpasis post longa kaj suferplena malsano, unu el tiuj, kiuj laboris por niaj idealistaj celoj.

JOSEPH KREITZ

Kapitano Jan Silhan (1889–1971)

Pioniro de Esperanto inter pola blindularo, fondinto de la revuo "Pola Stelo"

Jan Silhan naskiĝis la 1an de novembro 1889 en Kievo, kie lia plene matura vivo ligiĝis kun liaj inĝenieraj studoj en la tiea politeknika lernejo kaj poste – post lia transloĝiĝo – en la politeknika lernejo de Lvovo (tiam Lemberg). Liajn studojn interrompis la enarmeigo. Ankoraŭ dum la soldatservo eksplodis la unua

mondmilito. Sur la militfronto, jam en novembro de la jaro 1914, ege vundita, li perdis la vidpovon. En la hospitalo en Vieno, li ekkonis sian postan edzinon Margit, asistantinon en la kirurgia hospitalo. Pro la blindiĝo, Jan Silhan elektis la profesion de blindulinstruisto, ĉar ne estis eble finstudi politeknikon, kaj helpata de sia vivkamaradino Margit, laŭ alvoko de vienaj aŭtoritatuloj li establis en Lvovo, 1917, rekapabligan centron por milit-blindigitoj, kiun li administris ankaŭ post la transpreno de polaj aŭtoritatuloj ĝis 1926 kun granda sukceso, donante al pli ol 200 militviktimoj multflankan rekapabligon kaj novan vivkuraĝon. Dumtempe li profundigis la filozofiajn studojn. Poste li dum dek jaroj plenumis agrikulturan agadon ne nur en la propra farmo, sed samtempe li gvidis la regionan terkulturistan asocion, samkiel la regionan ligan de la polaj militinvalidoj.

Post la dua mondmilito Jan Silhan ankaŭ apartenis al tiuj, kiuj devis forlasi sian hejmmregionon, perdinte sian tutan havaĵon. Tamen, li ne perdis la kuraĝon, sed male post la milito, kiu alportis al la povra pola nacio tiom da nedireblaj suferoj kaj perdoj, Jan Silhan tuj kunagis, helpante la rekonstruadon de la tutlanda blindulmovado, mem aktive kunlaborante en ĉiuj fakoj. Li redaktis apartajn rubrikojn en la asocia ĉeforgano, en "virina voĉo", "nevidanta kooperativisto", krom sia partopreno en la kunagado kun diversaj asociaj instancoj kaj en la komisiono vojevodia por saneco kaj sociala protekto.

Kapitano Jan Silhan, kiu jam sciis sep lingvojn, fariĝis esperantisto en la jaro 1931, kaj jam en 1933 li fariĝis vicprezidanto de UABO kaj dank' al liaj klopodoj la pola asocio de militblinduloj aliĝis kiel unu el la unuaj neesperantistaj organizaĵoj al UABO. La "dektrian" en Stockholm li ĉeestis persone jam aktive kunlaborante en komisiono, kies grava tasko estis verki rezolucion, kiu instigu la blindulorganizaĵojn tutmondajn energie batali por la principo pri kompenso pro malpliigiinta laborkapablo pro blindeco, pli simple dirite, al ĉiu blindulo doni monhelpon. En la jaro 1936 kapitano Jan Silhan jam fariĝis prezidanto de UABO dum ege malfavora tempo por internaciaj organizaĵoj.

Venis la jaro 1937, la plej brila en la kariero de nia pola pioniro, ĉar li, kune kun sia edzino Margit, modele organizis la "dekkvaran" en Varsovio kaj kiel prezidanto li povis saluti 114 partoprenantojn kaj reprezentantojn de 14 blindulorganizaĵoj el 14 nacioj. (Legu la 29an ĉapitron sur paĝo 185 en la unua volumo de la "Historio" [brajla eldono].)

Estis ankaŭ li, kiu en 1959 organizis en Varsovio sub pli malfavoraj kondiĉoj la "dudeknaŭan", sed en la vivo de nia pioniro la plej brila punkto estis la kreado de tre ampleksa brajla revuo sub la titolo "Pola Stelo", kiu jam de multaj jaroj kiel bonvena

gasto venas al kelkcento da legantoj en multaj landoj, kun sciigoj aktualaj pri la blindula movado tutmonda. Ĉi tiun revuon li redaktis dum 12 jaroj kun ege granda sukceso.

Dank' al liaj klopodoj en la jaro 1957 la pola blindulasocio eldonis en brajlo la unuan lernolibron poresperantan, fundamentan vortaron esperantan-polan kaj fine de la jaro 1971 aperis 9-voluma pola-esperanta vortaro. Dum multaj jaroj nia pioniro ankaŭ estis redaktoro (moderato) de "Anguleto por la nevidantaj esperantistoj" disaŭdigita de Pola Radio unufoje ĉiun monaton.

Dum la ĝeneralkunveno de LIBE, okazinta en 1969 en Helsinki, laŭ propono de la estraro la kunsidantaro decidis per unuanima aplaŭdado nomi kapitanon Jan Silhan honora membro de LIBE, okaze de lia okdekjariĝo. Tamen, li ne nur estis honora membro de LIBE, sed li estis distingita per plej alta ŝtatordeno, kaj la ĉefestraro de Pola Blindulasocio honorigis lin per ora distingo kiel rekonesprimo pro lia vasta laboro. Per similaj distingoj li estis dekoraciita de la Ligo de Polaj Militblinduloj, de Pola Esperanto-Asocio, kaj de la nacia urba konsilantaro en Krakovo.

Ne troigante oni povas diri, ke ĉio, kio en Pollando estis farita sur la kampo "blindulesperantista movado", – preskaŭ ĉio estis farita de kapitano Jan Silhan.

La 29an de junio en la jaro 1971, posttagmeze je la 12 h., forpasis kapitano Jan Silhan, unu semajno post operacio en la aĝo de 81 jaroj. Li ripozas en la krakova tombejo Hakowice. Li persone forpasis unu el niaj plej elstaraj pioniroj de nia movado.

JOZEF ŜMIETANKO

Halvdan Karterud (1894–1972)

Probatalanto de la blindula afero kaj la Esperanto-Movado en Norvegujo

Halvdan Karterud naskiĝis la 4an de decembro 1894 en Løten, kampara distrikto 12 kilometrojn nordoriente de Oslo. Lia patro, iama instruisto, poste estis terkulturisto, kaj lia patrino estis instruistino. Li estis blinda de sia naskiĝo kaj en 1904 fariĝis lernanto de la blindullernejo en Oslo (tiam Kristiania).

Precipe lin interesis muziko kaj lingvoj, kaj fininte la elementan lernadon, li ekstudis pian- kaj orgenludadon ĉe la muzika konservatorio en Oslo. Sian orgenistan

ekzamenon li sukcese plenumis en 1912, kaj poste li komencis studi ĉe instruista lernejo proksime al sia hejmo. Tiutempe la blinduloj devis peti la ministerion pri permeso realigi instruistan edukadon, – permeso kiun li ricevis, sed li mem devis pagi la instruadon.

Laborante en la hejma komunumo kiel orgenisto, li havigis al si la bezonatan monon tiucele. En 1916 li finis siajn studojn en la instruista lernejo kaj poste dum unu jaro i.a. gvidis ĥoron en Løten. Samtempe li preskaŭ tute aŭtodidakte preparis sin por la ekzameno por la mezgrada lernejo, kiun li plenumis brile en la jaro 1917, kaj ekde aŭtuno samjare li deĵoris kiel instruisto ĉe Dalen – Blindullernejo apud Trondheim en la centra parto de Norvegujo, – ĝis en 1965, kiam li emeritiĝis.

Jam en 1912 Karterud havis kontakton kun la relative nova blindulorganizaĵo, kaj en 1916 oni elektis lin membro de la Re prezentantaro, decida instanco de la centra blindulorganizaĵo, de kiu li eĉ estis prezidanto mallongtempe, sed dum 29 jaroj li okupis la prezidantecon de la regiona blindulasocio. Tiu ofico aŭtomate donis al li sidlokon en la estraro de la centra asocio, kies sekretario li estis dum multegaj jaroj. Ankaŭ profesie li plenumis eminentan blindulaferan agadon, instruante blindulojn kaj krome informante la ĝeneralan publikon pri blindulafero.

Do, ne estas mirige, ke en la jaro 1960, okaze de la 60-jara jubileo de "lia" regiona blindulasocio, oni honorigis lin per la Reĝa Ora Medalo pro Merito.

Tamen, la pure blindulafera laboro ne sufiĉis por Karterud. Jam estante lernanto de la elementa lernejo, li legis brajlan danlingvan lernolibron pri Esperanto, sed li konsideris sin vera esperantisto nur ekde la jaro 1909, kiam vidanta esperantisto instruis la lingvon al kelkaj blindullernejoj, inter kiuj ankaŭ estis Karterud. Jam tre frue li kontaktiĝis kun Thilander, kaj li multe kontribuis al la disvastiĝo de la internacia blindulesperantista movado. Precipe lin interesis UABO, kiu estis asocio de blindulorganizaĵoj kaj tial havis internacian karakteron, dum LIBE, laŭ lia opinio, ne havas sufiĉan aŭtoritaton. Nia pioniro faris grandegan klopodon por enkonduki Esperanton en la blindullernejon. Jam frue sporade li instruis la novan lingvon al interesiĝintoj en la blindullernejo, sed nur en 1933 li atingis sian celon: ke Esperanto estu devige instruata en tiu lernejo. Escepte de la militaj jaroj, la instruado daŭris ĝis en 1965. Kiam oni reformis la elementan instruadon, la ceteraj instruistoj sukcesis ĉesigi la devigan instruadon de Esperanto, sed kvankam la decido estis farita antaŭ ol Karterud finis sian laboron, li instruis Esperanton ĝis sia emeritiĝo.

Ankaŭ sur la internacia tereno Karterud batalis por enkonduki Esperanton en la blindullernejojn, kaj nur dank' al lia sindonemega laboro aprobiĝis la tiutempa

rezolucio dum la konferenco de blindulpedagogoj en Hannover, 1961. Poste li fariĝis honora membro de LIBE. Tamen, en la jaro 1952, li sukcese kunorganizis kaj prezidis la 22an internacian kongreson de blindaj esperantistoj en Oslo.

Laŭ lia instigo en kunlaborado kun eminenta vidanta samideano la brajla presejo en Bergen eldonis jam la unuan volumon 140-paĝan de esperanta-norvega radikaro kompilita laŭ la "Plena Ilustrita Vortaro". Post la forpaso de nia pioniro Karterud lia edzino Aslaug daŭrigis lian laboron energie tiel, ke povis aperi tri volumoj de la nomita vortaro. Por ŝi estis vere malfacila, sed dankinda laboro. Tutajn tagojn dum kelkaj monatoj ŝi intense laboris memore al sia edzo forpasinta.

Pri la edzino de Karterud estas menciinde, ke en 1922 li edziĝis kun Borghild Adde, kun kiu li vivis ĝis ŝi forpasis en 1939. Tri jarojn poste li edziĝis kun Aslaug Wiggen, instruistino en la sama blindullernejo, en kiu li mem instruis. Aslaug fariĝis esperantistino dank' al sia edzo. Ambaŭ vivkunulinoj multe helpis grave nian pioniron kaj pro tio ankaŭ meritas laŭdon.

Ankaŭ en la ĝenerala esperantomovado Karterud estis aktiva: li estis prezidanto de Grupo Esperantista en Trondheim, kaj li estis honorigita per diversaj insignoj pro meritplena laboro en la movado. Ne nur en la blindullernejo, sed ankaŭ al vidantoj li instruis pri muziko laborante kiel muzikrecenzisto por ĵurnalo en Trondheim, kaj fine li havis postenon en la estraro de tutlanda asocio de muzikinstruistoj, kies honora membro li estis.

Interalie, li fondis klubon de blindaj ŝakludantoj en Trondheim, do, li laboris sur multaj terenoj.

La 20an de Junio 1972 forpasis Halvdan Karterud, unu el la plej elstaraj pioniroj de nia movado, post laborplena vivo.

OTTO PRYTZ

Miklos Bano (1890–1973)

**Pioniro de la blindulesperantista movado,
fondinto de organizaĵo de hungaraj blindaj esperantistoj
kaj probatalanto de la blindulafero en Hungarujo**

Miklos Bano naskiĝis la 4an de januaro 1890 kiel filo de inĝeniero en la hungara urbo Miskolc, kie li estis lernanto de la popollernejo ĝis la jaro 1898, kiam lia familio transloĝiĝis al la ĉefurbo Budapeŝt. Tie li lernis en gimnazio ĝis 1907. Post

grandsukcesa maturekzameno, li komencis inĝenierajn studojn en la universitato ĝis la jaro 1912, kiam li akiris la inĝenieran diplomon. Poste li laboris en Transsilvanio kiel inĝeniero kaj konstruis pontojn, reguligis riverojn, planis fervojliniojn kaj ferkonstruaĵojn. Jam kiel studento, Miklos Bano konatiĝis kun la brajla skribo kaj eĉ legis franclingvajn brajlaĵojn, ne sciante, ke ankaŭ en Hungarujo li povus trovi tiujn librojn. Tiutempe li ankoraŭ vidis perfekte per unu okulo, tamen, en 1914 li perdis sian vidkapablon kaj kiam li samjare ekpartoprenis universitatan kurson pri ekonomia scienco, li per franca poŝa brajlolibro faris siajn notojn dum la prelegoj, laŭ de li elpensita mallongigara sistemo. En 1917 oni promociis lin doktoro pri ekonomiaj sciencoj. Poste li laboris kiel komercisto. Kiam en 1918 fondiĝis hungara blindulligo, unu el la plej aktivaj fondintoj estis nia d-ro Miklos Bano. Unufoje nia pioniro renkontiĝis kun Esperanto kiel triaklasa gimnaziano, sed tiam li ankoraŭ ne interesiĝis pri la nova lingvo.

En 1911 li eksciis el ĵurnalo, ke ekzistas esperantista kunveno en budapeŝta kafejo. Li vizitis ĝin, kaj post lego de la tiutempe populara gramatiketo – ”Ŝlosilo” – li partoprenis la kunvenojn aŭskultante tie la prelegojn. Ĉar li sciis jam kelkajn fremdajn lingvojn, unue li opiniis, ke tio sufiĉis, sed baldaŭ li spertis, ke li devas lerni la lingvon fundamente. Tiam li ne havis konkretan celon.

Dum la unua mondmilito, nia pioniro instruis pri Esperanto en du laboristaj sindikatoj, laŭ la metodo de Robicsek, kiu redaktis taŭgan kurson en ses lecionoj. La sama lernolibro, kompletigite kaj revizite, poste aperis ankaŭ en brajla preso en la jaro 1920 kun ministra permeso, kaj laŭ ĝi instruis tiam en la instituto porblindula la karmemora samideano Elek Tolnai, lia frato Paŭlo kaj ties edzino Rozinjo Göngör. Tiutempe oni ne permesis, ke blindulo instruu ion, escepte de muziko, al blinduloj. Poste Miklos Bano mem instruis pri Esperanto en la Societo de Blinduloj. Al liaj lernantoj en privata blindulinstituto apartenis Stefano kaj Miĥaelo Lantos, Ludoviko Ulmer, la fama jam forpasinta pianvirtuozo Imre Ungar, kaj – Iren Antal, lia posta edzino.

Nia biografio ne estus kompleta, se ni ne mencius la fakton ke Miklos Bano jam en la jaro 1912 ĉeestis la Universalan kongreson de Esperanto en Krakovo, kiu ege impresis lin donante al li la impulson, estonte agadi kaj varbi por nia movado. Tamen, nur en la jaro 1918 li konatiĝis kun la nevidanta aŭstra samideano Ignaz Krieger, kiu entuziasme rakontis pri Harald Thilander, la eldonanto kaj presisto de ”Esperanta Ligilo”. Lia amikeco kun Thilander efikis tre fekundige por la blindulesperantista movado dum jardekoj. En 1921 Miklos Bano partoprenis la unuan kongreson de blindaj esperantistoj en Prago. La sekvan jaron li fondis la blindulesperantistan grupon ”Belhor”, kiu kun siaj preskaŭ kvindek membroj aliĝis

al Hungara Esperanto-Societo. Miklos Bano sukcesis akiri brajlan presmaŝinon, per kiu li presigis lernilojn, vortaretojn, bulteneton kaj eĉ dum 15 jaroj kalendaron por blinduloj. Kun Harald Thilander nia pioniro renkontiĝis unue post la kongreso en Helsinko en 1922 en lia sveda hejmo.

D-ro Bano kunfondis la unuan internacian organizaĵon de blindaj esperantistoj sub nomo UABE okaze de la tria blindulesperantista kongreso, 1923, en Nürnberg. Li fariĝis redaktoro en la provizora estraro kaj li redaktis kaj presigis en Budapeŝto tri numerojn de la organo de UABE sub la titolo "Ligilo por vidantoj" en nigra preso. Tamen, lia plej granda merito estis la verkado de "Naciaj literoj", kajeroj eldonitaj de Harald Thilander, kiuj montras por la blinduloj la skrib- kaj presliterojn de la diversaj popoloj, sed li ankaŭ kunlaboris plivastigante la nunan esperantan stenografion brajlan.

Koncerne stenografion, estas sciinde ke Miklos Bano post la abiturienta ekzameno jam en la jaro 1907 akiris la rajton instrui stenografion al vidantoj. En 1925 li instruis al eta grupo brajlan stenografion adaptitan de li mem al la hungara brajla skribo.

La adepto de nia movado verkis iom pli ol 200 poemojn hungarlingve kaj en nia internacia lingvo. Liaj poemoj parte estis okazaj versaĵoj, tradukaĵoj, salutpoemoj, modaj kaj klasikaj kantoj, rimaj ludoj, kaj tradukoj el la hungara lingvo presitaj sub diversaj pseŭdonimoj. Kune kun aliaj nevidantoj li partoprenis la literaturajn konkursojn "Floraj ludoj en Katalunujo". Tie lia poemo "Renkontiĝo" en la jaro 1926 gajnis la "Naturan floron". La nomita poemo estis svata poemo al Iren Antal, kun kiu li edziĝis en 1929. Ankaŭ lia filino parolas Esperanton. Ŝi eĉ havas esperantan nomon: Klara Varma Bano. Varma estas laŭ la finna baptopatrino kaj ĝi signifas finne "certeco" aŭ "pruvaĵo".

Ĉeforganizinto kaj prezidanto de la 8a internacia blindulesperantista kongreso, okazinta en 1929, estis d-ro Miklos Bano. La kongreso, en kiu li ankaŭ aktive kunlaboris, estis nia 16a en Bern, 1939, do la lasta kongreso antaŭ eksplodo de la dua mondmilito.

Post tiu terura milito li daŭrigis sian benoplenan agadon ĉefe en Hungarujo donacante la samlandanojn per du tre utilaj libroj: "Reguloj de la hungara brajlouzo" kaj "Brajlouzo en la matematiko kaj kemio". Kun la helpo de la edzino kaj samideano Farkashalmi li pretigis la brajlan presigon de la vortaroj esperanta-hungara kaj hungara-esperanta. Dank' al liaj klopodoj la biblioteko porblindula en Budapeŝto povis envicigi ne nur hungarlingvajn librojn, sed ankaŭ multajn en la

internacia lingvo. Multajn jarojn li instruis brajlan skribon al blinduloj pliaĝaj dum 52 horojn monate kaj zorgis la fremdlingvan korespondadon de la asocio, ĉar li sciis krom Esperanton la lingvojn anglan, germanan, francan kaj iom serban, turkan kaj hebrean.

Ankoraŭ multe ni povus rakonti pri nia pioniro, sed unu aferon ni ne forgesu: Kiam en la jaro 1956 okazis la popola ribelo kontraŭ la tiama registaro, kaj ĝia konsekvenco, regis granda mizero inter la hungaraj blinduloj: Mankisĵoj, mankis ĉio, kaj estis (certe vi devenas) d-ro Miklos Bano, kiu dissendis helpkrion al la blindulesperantistaro tutmonda kun bona sukceso, kaj el Germanujo kaj multaj aliaj landoj venis nutraĵoj, eĉ plektokano, al la suferantaj hungaraj samsortanoj.

En 1958 la hungara registaro rekonis la grandajn meritojn de nia pioniro kaj distingis lin per "honora medalo por socialisma laboro". li estis honora prezidanto de Hungara Blindulligo kaj honora membro de LIBE. Estis granda ĝojo por li, ke li povis helpi per bonaj konsiloj la preparon de "nia tridekkvina" en Budapest en 1966.

Netroigante oni povas diri, ke niaj hungaraj samsortanoj-samideanoj vere amis nian neforgeseblan pioniron, al kiu ili aldonis la nomon "Miklos baci" (onklo Nikolao). La eminenta vidanta hungara samideano Paŭlo Balkanyi, kiu intervjuis nian veteranon okaze de lia 75-jara naskiĝjubileo, finis sian cetere interesan intervjuon per la vortoj: "Oni nomis inter si lian ĉambron "tutmondan plendoficejon", kaj vere li povis plenumi ĉies plendojn, demandojn, donis konsilojn, trankviligis animojn, akiris por ili la deziritajn librojn aŭ aliajn objektojn. Pri si mem li ne pensis, neniam plendis, kaj ĉion eltenis, ĉiam helpante al aliaj."

Dum la lastaj semajnoj li multe suferis pro kormalsono tiel, ke oni devis lin porti en malsanulejon la 12an de aprilo, kie li forpasis la 16an sammonate en la jaro 1973. Kun d-ro Miklos Bano la tutmonda blindulesperantistaro perdis unu el la plej eminentaj, plej fervoraj pioniroj. Nenia miro do, ke ne nur Hungara Radio, sed ankaŭ la budapeŝta gazetaro laŭde akcentis lian sinoferan agadon en la intereso de la blinduloj kaj liajn meritojn por Esperanto. Multnombraj blinduloj, nevidantaj kaj vidantaj esperantistoj ĉeestis lian enterigan ceremonion, dum kiu estis faritaj multaj funebraj paroladoj omaĝe al d-ro Miklos Bano, tre konata persono en Budapest.

LAŬ BIOGRAFIAJ ARTIKOLOJ DE GYULA FARKASHALMI, PAŬLO BALKANYI KAJ
KOMPLETIGOJ DE JOSEPH KREITZ

Constanze Zapater (1890–1973)

Ĝenerale ni ne raportis pri vidantaj samideanoj laborintaj por disvastigo de nia internacia lingvo inter la blinduloj, escepte de prof. Théophile Cart, al kiu ni, nevidantaj esperantistoj tutmondaj, ŝuldas senliman dankon pro tio, ke li fondis la unuan internacian gazeton en brajla preso sub la titolo "Esperanta Ligilo" nun irantan al kvardeko da landoj por ĝojigi multnombrajn gesamideanojn el ĉiuj profesioj. Ni faras duan escepton dediĉante malmultajn biografiajn notojn al kaj pri Constanze Zapater. Al ŝi ni ja ŝuldas koran dankon pro tio, ke ni povis eldoni la unuan volumon de la "Historio" kaj disponigi senpage kompare multajn ekzemplerojn al diverslandaj gesamideanoj post pagado de la modestaj preskostoj al la hispana brajla presejo el ŝia subvencia sumo, kiu sufiĉas por malaltigi la prezon de la dua volumo nun troviĝanta en viaj manoj. Constanze Zapater ankaŭ alimaniere finance helpis nian movadon, kvankam ŝi ne aktive partoprenis en ĝi, sed ŝi meritas nian dankon!

Constanze Zapater, naskita Saxer, naskiĝis la 9an de decembro 1890 en Bonn kiel filino de oficisto. La familio Saxer transloĝiĝis al Kolonjo, kiam Constanze ankoraŭ estis infano. Post plenumo de la mezlerneja finekzameno ŝi deĵoris ĉe la poŝtĉeka oficejo; tamen, post la deĵora tempo ŝi studis kantarton kaj lingvojn en vesperaj kursoj. Post la unua mondmilito ŝi hazarde ĉeestis en la angla frontteatro koncerton de la gitarvirtuozo Baldomero Zapater kun la rezulto, ke ŝi decidis studi gitarludadon ĉe li. Ok jarojn poste, ŝi koncertis kun sia instruisto Zapater komune en la radiostacio en Kolonjo. Ŝi sub pseŭdonimo Else Fröhlich kantis kantojn de Schubert, Brahms k.a., kiujn li akompanis gitare, kaj li ludis hispanajn koncertpecojn.

Post la unua mondmilito komenciĝis la koncertkariero de Baldomero Zapater, kaj post forpaso de lia unua edzino en 1928 estis Constanze Saxer, kiu prizorgis lin kaj ankaŭ estis lia konstanta akompanantino dum koncertvojaĝoj. Post unu el la plej brilaj koncertoj donita en la brita radiostacio BBC en Londono ili decidis geedziĝi. Jam antaŭe, la direkto de la poŝtĉeka oficejo devige eksoficigis ŝin pro malfidindeco, ĉar tro ofte ŝi ne ĉeestis la deĵorajn horojn dum ŝi akompanis la koncertvirtuozon en liaj koncertvojaĝoj.

En la jaro 1943, dum la dua mondmilito, la dometo de geedzoj Zapater estis ege difektita per kelkaj el aeraj bombatakoj tiel, ke la geedzoj devis forlasi ĉion. Por ili komenciĝis vera odiseo tra multaj germanaj urboj, pri kio Constanze emocie rakontis en nigrepresa libreto, en kiu ŝi skizis la vivlaboron de sia edzo. Kiam ili

revenis al Rodenkirchen, estis la unua tasko de Constanze Zapater, helpi en forigo de ĉiuj ĉefaj damaĝoj, sed poste ŝi diktis muziknotojn al nia pioniro, kiujn li adaptis por gitaro. I.a. ŝi verkis multajn ŝercajn kaj seriozajn poemojn en kolonja dialekto por gazeto aperanta en Rodenkirchen.

La 14an de aprilo 1973 Constanze Zapater mortis post longa sufero. Ŝi restas en luma memoro de ĉiuj siaj geamikoj.

JOSEPH KREITZ

Vincenzo Musella (1894–1973)

Pioniro de la itala esperantistaro kaj kunfondinto de Itala Asocio de Blindaj Esperantistoj (IABE)

La veterana esperantisto Vincenzo Musella naskiĝis en Napoli (Italio) la 2an de aprilo en la jaro 1894. Jam en la plej frua infanaĝo, tre grava akcidento blindigis lin. Estante nur kvarjara knabeto, li eniris la blindulinstituton en Napoli por ricevi elementan instruadon.

Kiam li estis dekjara, li havis la bonŝancon eklerni Esperanton sub la sperta gvidado de sia blinda instruisto, kiu ankaŭ estis esperantisto. Sekve tiu feliĉa okazintaĵo ludis gravan rolon dum lia tuta vivo. Ja Esperanto ne nur faciligis al li la ellernadon de diversaj lingvoj, klasikaj kaj modernaj, sed ankaŭ aperigis antaŭ li sukcesplenan vojon. La inteligenta kaj studema knabo Vincenzo, post epizodplena batalo kontraŭ la gepatra volo, kiuj estus dezirintaj por li muzikajn studadojn, sukcesis frekventi publikan gimnazion kaj liceon kune kun vidantoj por sin dediĉi al la plej ŝatataj klasikaj studoj. Poste li daŭrigis sian studadon ĉe universitato kaj brile doktoriĝis pri klasika filologio kaj, poste, pri filozofio, akirante du diplomojn (en pedagogio kaj lingvoj: franca kaj angla). en 1918 li ree eniris la blindulinstituton en Napoli, sed, ĉi-foje, kiel instruisto!

Tie li restis dum naŭ jaroj, precize ĝis la momento, en kiu li atingis katedron por filozofia kaj historia instruado ĉe supera lernejo en Roma, postenon, kiun li gardis dum pluraj jaroj, ĝis li estis nomita ”bibliotekisto ĉe la nacia (porvidula) biblioteko” en Roma.

Tuj post la dua mondmilito li helpis la renaskiĝon de la brajla presejo en Firenze (Florenco) kaj de la nacia brajla biblioteko en Monza, kiel membro de konsulta

komisiono por elekto de transskribendaj kaj presendaj libroj.

Ne estas eble, en mallonga skizo paroli pri ĉio, kio koncernas la intelektan produktadon de profesoro Vincenzo Musella, sed estas grave remarkigi, almenaŭ, ke li aparte kaj profunde studadis pri Dante, mondfama aŭtoro de "la Dia Komedio", kaj, sekve de tio, li verkis gravan komentarion, farante multajn interesajn prelegojn pri Dante. Sur la speciala kampo de Esperanto li akiris naciajn kaj internaciajn diplomojn, kaj en 1950 li gajnis la unuan poezian premion donitan de la Universala Kongreso de Esperanto, estante la sola konkursano nevidanta. Dum multaj jaroj li estis redaktoro de "Itala Ligilo", oficiala organo de IABE, kiun li pliriĉigis per memtradukitaj kaj originale verkitaj artikoloj kaj poemoj. Ankaŭ nia EL publikigis kelkajn el liaj poemoj (aparte karaj al li restis lia "Kanto al la ĝojo", en kiu li prikantis blindecon kiel fonto de interna ĝojo kaj spirita leviĝo). Ankaŭ li estis eksterlande kaj enlande konata publicisto kaj prelegisto. Multajn jarojn Radio Roma havis lin kiel ĉefan kunlaboranton en disaŭdiga Esperanto-programo.

Resume ni povas diri, ke prof. Musella por spertaj malnovaj samideanoj estis aktiva kunlaboranto kaj vigla kamarado dum multaj internaciaj kongresoj, kie liaj paroladoj ĉiam trovis merititan aplaŭdon.

Bedaŭrinde, la lastajn kvin jarojn nia pioniro Musella fariĝis pli kaj pli surda kaj kaduka, kaj la 18an de aŭgusto en la jaro 1973 li serene forpasis post vere aktiva ekzistado.

LAŬ ARTIKOLOJ DE CARLA LA MANNA (S-RINO DA COSTA) KAJ
GUGLIELMO VASSIO

Edgar Guilbeau (1850–1930)

Filantropo, verkisto, esperantisto

Edgar Guilbeau naskiĝis en Angers (ĉefurbo de departemento Maine-et-Loire) la 19an de januaro 1850 kaj perdis la vidpovon, kiam li estis kvarjara. Li eniris la Nacian Instituton por junaj Blinduloj en Parizo (1858) kaj bone lernadis, ĉefe muzikon. En 1872 li estis nomita profesoro en la lernejo, kie li estis edukita. Dum tridek jaroj, helpeme kaj multpacience, li instruis historion kaj geografion. Certa, ke lernado de geografio estas neperfekta sen mapoj, li farigis multe da ili, donante pli da valoro al tiu instruado kaj plibonigante la palpan kaj direktan senton de siaj lernantoj.

Tre agema kaj havante multe da sciaĵoj, Edgar Guilbeau multe partoprenis la filantropian agadon, kiu pli kaj pli kreskis de 50 jaroj favore al blinduloj. Amiko de Maurice de la Sizeranne li estis membro de la administra konsilantaro de Asocio Valentin Haüy tuj de post ĝia fondo. En 1886 li ekstarigis la muzeon Valentin Haüy, la plej abundan kolekton tra la tuta mondo pri la intelekta kaj manuzo ilaro por la blinduloj.

Li konis lingvojn anglan kaj germanan, kaj Esperanton, vige partoprenis multajn kongresojn, multe vojaĝis tra Francujo kaj eksterlande, kaj amikiĝis kun multe da personoj. Li ofte skribis al blinduloj kaj tiflofiloj tra la mondo. Edgar Guilbeau multe verkis. Li skribis multe da artikoloj por brajlaj kaj nigraj ĵurnaloj kaj gazetoj. En 1906 li eldonigis historion de Nacia Instituto ekde ĝiaj devenoj. Ankaŭ li verkis ĉiujn specojn de poezioj, eĉ unuaktan teatraĵon, "Metellus", faritan kvazaŭ dum antikvepoko, kaj longan poemon, "Eugénie" en li priskribis sian programon por blindulin-instruado.

La poema verkaro de Edgar Guilbeau "Kantoj kaj legendoj de la blindulo" havas specialan aspekton: la verkisto forĵetis ĉiun aferon nepercepteblan de blindulo. Tio-ĉi donas al liaj tre malsamaj poezioj sincerecan aspekton, kiu honorigas lin tiom, kiom liaj verkistaj kvalitoj. Muzikigis plurajn el liaj odoj kaj kantoj blindaj majstroj (Lebel, Marty, Syme k.a.).

En 1911 Edgar Guilbeau forlasis instruadon. Li vivis en kamparo, kie li rapide kaj bone alkiutimiĝis, mastrumis vastan bienon, kulturis legomojn kaj vinberujojn, kaj ankaŭ intelekte laboris. Ĉiam sciante la novaĵojn rilate al blinduloj, li restis, preskaŭ ĝis la forpaso, por nia ĵurnaloj utiliga kaj lerta kunlaboranto. Li multe okupis sin pri la surdblinduloj, li nomiĝis ilia "aveto".

Ĉe la fino de septembro 1930, post vojaĝo tra Pireneoj, li suferis la unuajn simptomojn de la malsano, kiu mortigis lin post malpli ol du monatoj. Dank' al sia fido al Dio li toleris kruelegajn dolorojn kaj forpasis la 23an de novembro 1930 en Savennières (Maine-et-Loire).

Dum sia vivo, li tute sindonemis al blinduloj, donante al ili sagacajn konsilojn kaj helpon.

PIERRE CHAILLET

Charles Hedqvist (1910–1975)

**Elstara figuro en internacia, nordlanda,
ĉefe sveda blindulafero, kaj subtenanto
de Esperanto inter blinduloj**

Charles Hedqvist naskiĝis la 14an de marto 1910 en Boden en norda Svedujo kiel filo de la terkulturistoj Petrovia kaj Erik Hedqvist. Estante suĉinfano, li perdis la vidpovon pro okuldifekto kaŭzita de la sunlumo.



Kiel tiom da blinduloj, tiel ankaŭ Charles Hedqvist devis "elekti" inter la malmultaj profesiedukaj eblecoj, kiuj ekzistis ĉe la blindullernejoj.

Li devis dum kvin jaroj lernadi brosfaradon kaj korbfaradon, fakoj, por kiuj li havis tre malmultan interesiĝon. Sed en 1934 li "devojiĝis" kaj ekfrekventis gimnazion. Li faris tre bonan abituriantan ekzamenon en du jaroj.

Kaj Charles Hedqvist tre baldaŭ trovis aplikon de siaj scioj. En la gimnazio li speciale interesiĝis pri lingvoj. Tio utilis al li dum la milito, per tio, ke la ministerio pri eksterlandaj aferoj dungis lin kiel "radio-observiston", t.e.: Li ekhavis la taskon aŭskulti fremdajn radiostaciojn kaj raporti pri aferoj kiuj interesis la ministerion. Li havis tiun laboron ĝis 1947. Poste li fondis kaj mastrumis sian propran firmaon, kiu faris diversajn formojn de sekretaria servado por kunvenoj, kongresoj k.s.

En 1942 Charles Hedqvist fariĝis sekretario de "De blindas förening", (la sveda blindulasocio) kaj en 1957 li elektiĝis prezidanto kaj dungiĝis direktoro de la organizaĵo. La oficojn de prezidanto kaj direktoro li okupigis ĝis sia morto.

Charles Hedqvist lasis daŭrajn postsignojn sur multegaj kampoj de la blindulafero. La spaco ne permesas detalan mencion de ĉiuj entreprenoj, kiujn li iniciatis kaj antaŭenpuŝis. Tamen estu menciita lia pionira laborado por krei modernan sonlibran bibliotekon kun ampleksa priservado de la blinduloj kaj malfortevigantoj de Svedujo. Li estis la ĉefa forto de la granda monokolektado, kiu havigis la ekonomian bazon de revolucio en la biblioteka servo de la sveda blindulorganizaĵo.

Sed Charles Hedqvist ne kontentiĝis, ludante historian rolon en la sveda blindulafero. Li ankaŭ estos memorata kiel centra figuro de la sveda handikapula

movado, kie li havis vicon da honor-oficaj postenoj kaj partoprenis la ellaboradon de multaj gravaj raportoj signifoplenaj por ĉiuj kategorioj de handikapuloj en Svedujo.

En 1969 Charles Hedqvist elektiĝis al la plej alta honor-ofica posteno de la blindulafero, tiu de prezidanto de Tutmonda Konsilantaro por la Bono de la Blinduloj (TKBB). Dum lia prezidanteco, ĝis en aŭgusto 1974, la organizaĵo trapasis preskaŭ kompletan metamorfozon. Antaŭ ĉio, dank' al la personaj laborado kaj lerteco de Charles Hedqvist, TKBB estas forta komuna organizaĵo, kiu ĝuas estimon kaj ĉe naciaj kaj ĉe internaciaj politikaj aŭtoritatoj.

ARNE HUSVEG

Jam frue Charles Hedqvist havis kontakton kun nia pioniro Harald Thilander, kiu kuraĝis lin studi kaj ankaŭ proponis al li loĝejon en sia hejmo. Ne estis do mirige, ke Charles Hedqvist ankaŭ fariĝis esperantisto. Dum lia tuta vivo li montris grandan simpation al la internacia lingvo. Sed por partopreni kongresojn li nur havis malmulte da okazoj. Partoprenante, li faris atentindajn prelegojn pri la blindula afero. Regule li abonis kaj legis nian gazeton "Esperanta Ligilo", kies aperadon li ĉiam apogis, influante je kompare forta financa subtenado de sialandaj organizaĵoj.

Tuj post la forpaso de nia memorinda pioniro Harald Thilander, Charles Hedqvist faris konsiderindajn proponojn pri daŭrigo de nia gazeto EL, kiu laŭ lia opinio estas kanalo de internaciaj informoj. Fakte liaj proponoj multe helpis venki malfacilaĵojn. Dank' al lia propono, TKBB finance subtenis la eldonadon de EL, pro kio li meritas nian dankeman memoron.

JOSEPH KREITZ

La 14an de aprilo 1975 d-ro Charles Hedqvist mortis en malsanulejo. Restas ankoraŭ kelkaj aldonindaj detaloj. En 1971, sveda universitato honordoktorigis lin. Tiun distingon li rigardis distingo al la sveda blindulorganizaĵo, ĉar modesta kaj realisma li ĉiam restis. Du el liaj gvidaj maksimumoj estis, ke "Politiko estas la arto pri tio, kio estas ebla" (certe ne lia inventaĵo, sed ĉiam bona gvidlinio), kaj "Dezirante ion farita, oni prefere faru ĝin mem." Bedaŭrinde ni ne scias ion pri liaj personaj cirkonstancoj, en la de la aŭtoro, Joseph Kreitz, postlasitaj manuskriptaĵoj ni trovis nenion, kaj ni pietate forlasas tiun flankon. Li havis du gvidhundojn, ambaŭ el Anglujo, la unuan helpe de nia angla Esperanto-pioniro William Percy Merrick. Al mi, li impresis tre (se ne tro) paceme, dum ununura oportuno lin renkonti, en Kopenhago, 1970, dum kunsido de Eŭropa Regiona Komitato de TKBB.

HANS BREITENBACH

KAJ NUN, FINFINE, LA AŬTORO MEM:

Joseph* Kreitz
(1897–1977)

**Kunfondinto-sekretario de EBLoGo,
multjara gvidhava ofichavinto en
UABE, UABO kaj LIBE**

La taskon skribi ĉapitron de libro, kies aŭtoro jam estas mortinta, kaj skribi ĝin ĝuste pri li, ja ne akompanas agrablaj sentoj. Tiom pli, ĉar sen kelkaj malhelpoj li mem ankoraŭ estus povinta teni la libron en siaj manoj. Sed eĉ li kelkfoje bremsis esprimante la deziron enlibrigi ankaŭ tiun aŭ tiun biografieton.

Konsolo estas ke li aliflanke rikoltis multe da aplaŭdo pro siaj agadoj, laŭ la cirkonstancoj pli-malpli modestaj. Laŭ eksteraj observoj, li havis nur amikojn.



Li naskiĝis la 29an de januaro 1897, la plej juna el ok gefratoj, en Kreuzau apud Düren (Rejnlando). Lia patro estis ĉarpentisto.

En la unua jaro de sia vivo li jam blindiĝis de morbiloj. Post la tiama kutima okklasa "kuriklo" en blindullernejo, li lernis seĝplektadon kaj brosfaradon. Tiujn laborojn li poste faris en Kreuzau. Esperanton li lernis estante adoleskulo, kaj ĝi baldaŭ ekŝovis sin en lian sorton. En la domo de Baldomero Zapater, li renkontis fraŭlinon Anna Eversheim. El renkontiĝo fariĝis gefianĉiĝo kaj, finfine, en somero 1929, geedziĝo. La nupta paro vojaĝis Budapeŝton por tie, interalie, partopreni la kongreson.

Esperanto trovis duan vojon por enŝovi sin en la sorton de nia "Joĉjo en feliĉo": kun helpo de bonaj (transbaltmaraj) amikoj li sukcesis eskapi la tristan mondon de seĝplektado kaj brosfarado, kaj malfermi propran vendejon de nutraĵoj en Ehrenfeld, antaŭurbo de Kolonjo.

Nu, kion faras blindulo en sia vendejo? Hodiaŭ iu tia apenaŭ ekzistas. Sed ni ja troviĝas ĉi tie en la tempo de antaŭ kvindek jaroj. Tre, tre frumatene, li povis, prefere kun vidanta helpanto, marŝi al grandmerkato, aĉeti kaj surĉarigi tomatojn, bananojn, terpomojn, brasikojn k.a., kaj poste ŝovi la plenplenan ĉaron hejmen.

Matenmanĝi, kaj poste porciumi ĉiujn varojn en plej ofte bezonatajn kvantojn...
Kaj poste fari Esperanto-laboron.

Sed, ho ve, la historio ne iras plu tiel glate supren. Dum la milito: tri – foje elbombite! Ĉio for! Vestaĵoj for! Ĉambroj kun ĉiu enhavo – for! Eble nur kofreto kun plej gravaj dokumentoj, iom da mono, nutraĵkuponoj... ”Loĝado” en bunkro kun densigita amaso da homoj; malbona aero, pedikoj...

Post la milito: laborado en fabriko. Malgranda pensio pro militdamaĝoj. Aktiva kunlaboro en la estraro de la kolonja blindulunuiĝo. Kaj antaŭ ĉio: Esperanto.

Subite: argenta strio ĉe horizonto. Adopta filo, fajrobrigadisto, konstru(ig)as domon iom for de la granda urbo, kun aldonaĵo por Gekreitz. Sed ho ve, la feliĉo ne estis por longe: Post grava malsano Anna mortis la 13an de decembro 1968, kaj Joseph restis sola, zorgate de la adopta filo kaj ties familio. Ankaŭ lia sanstato pli kaj pli malboniĝis.

La 29an de januaro 1977, oni festis kun li, en bone aranĝita kadro, la 80an datrevenon de lia naskiĝo (li bone sciis, kaj ankaŭ publike diris, ke estis lasta fojo ke li povis festi sian naskiĝtagon). Iom pli ol tri monatojn poste, la 7an de majo, li mortis en malsanulejo.

HANS BREITENBACH

* Kiel montriĝis ĉe la rutinaj postmortaj formalajoj, en la registrejoj aktoj estis skribite: ”Josef”.

Datoj kaj faktoj el la esperantistaj vivo kaj agado de Joseph Kreitz

En la unua volumo de "Historio" oni povas legi la jenajn citaĵojn skizajn pri la blindulesperantista pioniro Joseph Kreitz: [koncernas paĝojn de la brajla eldono.]

Neforgesebla en mia vivo restos memorinda tago dum la monato marto en la jaro 1919, kiam mi plen-atende kaj scivole havis la grandan plezuron la unuan fojon interkonatiĝi kun mia hispana amiko Baldomero Zapater... (p. I – dediĉo – 1. frazo)

La germanaj partoprenantoj de la unua blindulesperantista kongreso en Prago decidis fondi germanan blindulesperantistan organizaĵon, tamen nur poste la samideanoj Julius Hasselbach, Joseph Kreitz kaj Adolf Selten kunvenis en Köln en la loĝejo de la blindaj geedzoj Zapater ne nur por pridiskuti kaj fiksi statutproponon, sed ankaŭ por interkonsenti pri provizora estraro konsistanta el: Adolf Selten, unua prezidanto, Julius Hasselbach, dua prezidanto, Joseph Kreitz, unua sekretario kaj afergvidanto, Kurt Filss, dua sekretario, kaj Henriette Zapater, naskita baronino de Chalmot, kasistino... (p. 61 malsupre, daŭrigo p. 67)

Jam en la jaro 1920, Joseph Kreitz eldonis manskribitan gazeton ("La Blinda Esperantisto"), kiu enhavas rakontojn, novelojn, poemojn k.t.p., sed post la fondiĝo de EBLoGo li kiel unua sekretario transprenis la redakcion de la oficiala organo, kiu post la inflacia tempo povis aperi kvaronjare kun literatura felietono titolita "La bona amiko" ... (p. 64 lasta triono, kaj komenco de p. 65)

Pro malpermeso de Esperanto en Germanujo fare de la nacionalsocialisma reĝimo, ankaŭ EBLoGo en 1937 devis ĉesigi sian agadon. Do ĝis refondo post la dua mondmilito, ĉiuj aktivecoj de J. Kreitz haltis (pp. 65-67).

La sekvantaj citaĵoj el la unua volumo montras la rolon de Joseph Kreitz en UABE-UABO.

Belga tiflofilo Victor Hendrick kune kun Joseph Kreitz denove pristudis la tutan materialon pri la intencita fondiĝo de UABE inkluzive de bona statutpropono verkita de rumana samideano Prezenti Levy por la pariza kongreso (ja ne okazinta) en 1914. Ili kompilis novan, ne tro ampleksan statutproponon prezentotan de Joseph Kreitz al "nia tria" en Nürnberg. (ekde la mezo de p. 78)

La 3an de aŭgusto, 1923, posttagmeze, estis akceptita la statuto de UABE, okaze de "nia tria" en Nürnberg. Prezidanto fariĝis Joseph Kreitz. (pp. 78-79)

En 1931 ŝanĝiĝis la nomo de UABE al UABO. Joseph Kreitz fariĝis denove unua prezidanto de la organizaĵo kun ŝanĝita statuto. (p. 97, malsupre)

En 1936, Joseph Kreitz demetis la oficon de prezidanto de UABO, pro malpermeso de Esperanto en Germanujo. Lin anstataŭis Jan Silhan (Polujo). (p. 113, supre)

Dum la tempo de la "tria regno" Joseph Kreitz kelkfoje havis malfacilaĵojn fare de la lokaj aŭtoritatoj pro esperantoaktivecoj, sed li neniam perdis la esperon pri fino de nacisocialismo kaj milito kaj pri renaskiĝo de la Esperanto-movado en Germanujo. Kompreneble li apartenis al la novfondintoj de EBLoGo post la milito kaj restis unua sekretario kaj afergvidanto ĝis la jaro 1969. Dum multaj jaroj li redaktis la oficialan organon de EBLoGo, kiu kvaronjare aperis sub titolo "Informilo". Kaj en ĝi kaj en EL Joseph Kreitz ofte publikigis memtradukitajn literaturaĵojn kaj poemojn propreverkitajn.

En 1951 okazis la Internacia Kongreso de Blindaj Esperantistoj en Munkeno, kie fondiĝis LIBE. Dum kelkaj jaroj Joseph Kreitz estis prezidanto de ĉi tiu organizaĵo. En 1969, la ĝeneralkunveno de LIBE faris lin honora prezidanto. Tiam lia sanstato jam malboniĝis tiom, ke li, kiu partoprenis la plej multajn postmilitajn kongresojn, jam ne prenis sur sin streĉajn vojaĝojn al kongreslokoj. Dum siaj lastaj vivjaroj li multe laboris por finigi la "Historion de la Esperanto-movado inter la blinduloj", kies unua volumo aperis en [1972].

Joseph Kreitz dum sufiĉe longa tempo estis la motoro de la Esperanto-movado inter germanaj blinduloj. Granda nombro el la germanaj blindaj esperantistoj hodiaŭ vivantaj de li ricevis la motivacion por lerni la internacian lingvon. Agante tiamaniere, li neforgeseble eniris la historion de la Esperanto-movado inter la blinduloj.

THEODOR SPECKMANN KAJ KARL-HEINZ HOFFMANN

Historio de la Esperanto-movado inter la blinduloj

Tria volumo [1990]

Eminentaj pioniroj de la blindulesperantista movado (daŭrigo)

Redaktis: Raymond Gonin kaj Rudolf Krchňák

Finredaktis: Attila Varró

Komisiite de Ligo Internacia de Blindaj Esperantistoj

Brajle eldonas: Pola Asocio de Nevidantoj Esperanto-Sekcio 1990

Skribis: I. Stankiewicz

Korektis: D. Jagiello kaj St. Makowski

Antaŭparolo

Verkante la antaŭparolon por ĉi tiu volumo, mi havis la pezan taskon, sekvi la modelan ekzemplon de la eminentulo Joseph Kreitz, kiu enkondukis la unuan kaj la duan volumojn de la Historio de Esperantomovado inter la blinduloj. Ĉar mi certe ne sukcesis kompili tian altkvalitan tekston, mi nur modeste povas klopodi vekti intereson en la legantoj pri la enhavo de tiu ĉi jubilea eldonaĵo.

Okaze de la 54-a Internacia Kongreso de Blindaj Esperantistoj inter la 2-a kaj la 9-a de aŭgusto 1986 en Stubenberg (Aŭstrio) la ĝeneral-kunveno de LIBE esprimis la deziron, ke dum la grava jaro 1987, kiam la tuta Esperantistaro festos la centjaran jubileon de nia altkvalita internacia lingvo, aperu la tria volumo. Pri la koncepto, laŭ kiu la libro estu kompilita, du ideoj sin prezentis: ĝi – same kiel la unua volumo – enhavu ĝeneralajn detalojn pri la historio de la pasintaj jardekoj kaj mallongajn raportojn pri la kongresoj okazintaj post 1939, aŭ ĝi konsistu el biografioj pri elstaraj blinduloj, kiuj daŭrigis la laboron de la eminentuloj menciitaj en la dua volumo, donante siajn tutajn fortojn kaj kapablojn por disvastigi Esperanton inter la samsortanoj kaj por pligrandigi la influon de nia agado en la universala esperantomovado. Estis malfacile elekti, sed la kunveno la duan ideon opiniis pli oportuna.

La verkintoj, s-roj R. Gonin kaj R. Krchňák konstatis, ke ili ne sukcesis doni detalojn pri ĉiuj, kiuj laŭ ilia opinio meritis okupi lokon inter la altranguloj. Povas

do esti, ke ili – malgraŭ akurata, konsciencia laboro – ne menciis kelkajn personojn, kiuj nepre ne devus esti forgesitaj. Bonvolu kompreni kaj akcepti tion.

En ĉi tiu volumo vi trovos biografiojn pri konataj blinduloj, kiuj ludis elstaran rolon en nia movado, kaj ankaŭ pri personoj, kiuj laboris en la fono. Certe vi samopinios kun la verkintoj kaj kun mi mem, ke en ĉiu kazo temas pri kuraĝaj, sindonemaj homoj, kiuj plene meritas resti en nia memoro kaj en nia koro.

GERDA VAN DER SIJDE (NEDERLANDO)

EMINENTAJ PIONIROJ DE LA BLINDULESPERANTISTA MOVADO

ANGLIO

Eunice Hughes (1926–1985)

Ŝi estis unu el la gvidantaj personoj de la Esperantomovado inter la anglaj geblinduloj dum la lastaj 30 jaroj de ŝia vivo. En la jaro 1956 ŝi fariĝis sekretariino de BABE (Brita Asocio de Blindaj Esperantistoj) sub la kondiĉo, ke tio ne daŭros longe. Tamen ŝi plenumis tiun postenon ĝis 1972, kiam ŝi fariĝis prezidantino ĝis sia morto.

Eunice Hughes naskiĝis la 29-an de julio 1926 kiel Eŭnice Woodget. En la sesa vivjaro ŝi malsaniĝis je meningito kaj ne nur blindiĝis, sed ankaŭ ŝia aŭdpovo iĝis parte difektita.

Ŝi vizitis lernejojn por blinduloj, por malfortevidantoj kaj viduloj. Finfine ŝi troviĝis en Kolegio de la Reĝa Instituto por Blinduloj. Post ĝenerala edukado tie ŝi brile sukcesis en la stenotajpista fako.

Dum kelkaj jaroj ŝi laboris ĉe industria entrepreno kiel stenotajpistino. Ĉirkaŭ la jaro 1949 ŝi komencis instrui brajlan stenografion ĉe la komerca kolegio administrata de la Reĝa Instituto por Blinduloj. Tiu kolegio celis ellernigi la stenotajpadon dum unu jaro, anstataŭ dum kvar jaroj aliloke. Ke tio sukcesis, oni dankŝuldas nemalgrandparte al Eunice. Estante membro de komisiono, kiu en 1955-59 reviziis la brajlan stenografion, Eunice (kiel kutime) havis ege tedan laboron.

Dum kelkaj jaroj ŝi estis talenta en grupo de blindaj geaktoroj, ricevante apartan mencion pro pluraj siaj plenumoj. Bedaŭrinde la kreskanta surdiĝo trudis al ŝi rezignon pri tiu hobbio.

La interesiĝo pri Esperanto vekigis en ŝi, kiam ŝi – ankoraŭ lernantino – legis tiulingvan flugfolion de interinstituta gazeto. Instruisto tiam klarigis, kio estas tiu stranga lingvo, kaj Eunice persvadis lin instrui ĝin al grupeto da lernantoj. Ŝia intereso reviviĝis kelkajn jarojn poste, kiam ŝi legis en anglalingva gazeto referaĵon pri la Internacia Kongreso de Blindaj Esperantistoj en Parizo en 1950. Ekde tiam Esperanto kaj ŝi fariĝis nedisigeblaj. Ŝi ĉiam denove pruvis sin inda postsekvantino de sia iama amiko W. Percy Merrick.

Al BABE estas neeble esprimi kiom ĝi ŝuldas pro la sennombraj servoj, nelaciĝemo kaj prudento de Eunice. Ŝi fondis la unuan porblindulan sonbendan servon. Certe multaj partoprenintoj kaj aŭskultintoj memoros la du ”internaciajn sonbendojn”, kiujn ŝi iniciatis – tiun en 1959, omaĝe al la centa datreveno de la naskiĝo de Zamenhof kaj tiun en 1961, okaze de la 31-a IKBE en Harrogate. Tiu kongreso, kiel ankaŭ la 39-a en Londono 1971, ne estus okazinta sen ŝia diligentega laboro. BABE ankaŭ dankŝuldas al ŝi pro la bonega perkoresponda kurso kaj pro ŝia kelkjara redaktado de ties duonjara bulteno.

Aparte valora ŝi opiniis la esperantobrajlan transskriban servon de BABE por la Nacia Biblioteko de Blinduloj. En 1962 ŝi edziniĝis al unu el la motoroj de tiu servo, John Hughes. Ilian kontenton kruele interrompis lia forpaso en 1974.

Eunice ankaŭ multe klopodis por LIBE, kies estrarano kaj helpsekretario ŝi estis dum multaj jaroj. Ŝi ofte partoprenis niajn kongresojn, ekz. en Rimini, Helsinki, Vieno ktp.

Ŝi ŝatis korespondi, vekante simpatian kaj apartan kortuŝon per siaj leteroj pri ĉies individuaj problemoj. Ŝi ĉiam penadis progresigi Esperanton en sia loĝloko, kaj havis multajn geamikojn inter la vidantaj gesamideanoj. Ŝi kolektadis monon kaj prelegis nome de la societo de gvidhundposedantoj. Ŝi fakte faris multon por helpi al homoj en ŝia komunumo. Eĉ spite al sia lasta malsano, ŝi organizis prizorgan servon por helpi parencojn de mensmalsanuloj, kaj ŝi deziris, ke post ŝia morto oni sendu mondonacojn al tiuj personoj anstataŭ aĉeti florkronojn por ŝi.

Ŝi mortis la 30-an de januaro 1985. Ŝi suferis pro kancero. Kuraĝe sed vane ŝi luktis kontraŭ tiu malsano.

LAŬ NEKROLOGO EN ESPERANTA LIGILO, MAJO 1985

AŬSTRALIO

Matilda (Tilly) Ann Aston (1873–1937)

Tiu verkistino, poetino, instruistino, muzikistino kaj esperantistino naskiĝis la 11-an de decembro 1873 en Carisbrook, ĉe la urbo Toter en la ŝtato Viktorio. Ŝi naskiĝis kun unu malforta okulo, kaj sepjara ŝi tute blindiĝis. Okjara ŝi venis al la blindullernejo en Melburno, kie ŝi poste trovis sian okupon kiel instruistino por multaj jaroj.

En 1892 ŝi komencis en Melburno la universitatajn studojn. Ŝi sukcesis trovi grupon da studentoj, kiuj por ŝi transskribis bezonatajn librojn en brajlon. Tiu ĉi grupo estis la fundamento por la ekesto en 1895 de societo de blindul-amikoj de Viktorio. La societo kreis porblindulan bibliotekon, kiu ekzistas ĝis nun, disponante pri libroj ne nur brajlaj sed ankaŭ sonbendaj kaj grandliteraj. En 1895 ŝi fondis ankaŭ societon por progresigo de la blindulafero, kiun ŝi prezidis ĝis sia morto en la jaro 1937. Ankaŭ ĝi funkcias ĝis nun, kaj havas en sia estraro ankaŭ blindulojn.

Dum la unua milito ŝi organizis grupon el blindaj membrinoj de Ruĝa Kruco, kiuj trikis pulverojn por la soldatoj.

En la jaro 1907 ŝi aliĝis al la Melburna Esperantoklubo. Ŝi instruis Esperanton al blinduloj kaj profitis Esperanton por progresigo de la blindul-afero. Per Esperanto ŝi korespondis brajle tra la tuta mondo.

Per paroladoj kaj solkantado ŝi aktive partoprenis du Esperantistajn kongresojn en Aŭstralio. Dum la unua, en Adelaide (1911), ŝi prelegis pri la temo "Kion signifas Esperanto por la blinduloj?". Ŝi tiam ankaŭ solkantis per sia agrabla voĉo. Simila estis ŝia aktiveco dum la dua kongreso en Melburno (1912).

Ŝi estis sukcesa verkistino, pri kio atestas ŝiaj naŭ volumoj de prozo kaj poezio. Ni menciuj ekzemple: "Memoirs of Tilly Aston" (rememoroj de T. A.) el 1907, "Singable songs" (kanteblaj kantoj), "Old timers" (malnovtempuloj) kaj "Songs of light" (kantoj de lumo) el 1913.

Jen malgranda specimeno de tradukista kapableco de Tilly Aston. Temas pri eta poemo de angla poeto, Robert Herrick (1591–1675), "To Electra":

Mi timas peti kison,
rideton eĉ de vi,
ĉar se mi ilin havus,
fiera iĝus mi!

Ne, jen la sola ĝojo
por mi, ho amatin',
nur kisi la aeron,
ĵus kiu kisis vin.

Harold Charles Dickinson (1909–1983)

Alia elstara esperantisto inter la aŭstraliaj blinduloj estis Harold Charles Dickinson. Li studis Esperanton dum la tridekaj jaroj, verŝajne dank' al Tilly Aston. Li estis lingve talenta, reganta ankaŭ francan kaj germanan lingvojn. Kun Tilly Aston li kontaktis perletere kaj ili eĉ renkontiĝis pere de Esperanto. Li fariĝis ne nur entuziasma studanto, sed poste ankaŭ instruisto de Esperanto. La internacia lingvo pliigis liajn interesojn pri muziko, poezio kaj pri internaciaj aferoj.

H. Ch. Dickinson naskiĝis en 1909 en Londono. Ankaŭ lia pli aĝa frato Eddi estis blinda. La familio transloĝiĝis al Aŭstralio. En 1915 li venis tie en blindullernejon, kie jam estis ankaŭ Eddi. Laŭ lia aŭtobiografia libro "Over the next hill" (malantaŭ la plej proksima monteto), aperinta en 1982, ĝi estis severa, nealloga domo, sed tie li komencis lerni muzikon, lian tutvivan ĝojon. Dum la dudekaj jaroj li migris kun sia frato tra aŭstraliaj regionoj, prezentante koncertojn, kies celo estis vekti intereson en la loĝantaro pri la problemo de blinduloj. Li ludis violonon kaj lia frato fortepianon. Iliaj avo kaj patro estis lertaj lignaĵistoj. Ties manlertecon heredis ambaŭ knaboj. Ili ambaŭ ŝatis fari diversajn lignajn objektojn, precipe boatojn. Ili fondis meblofabrikan entreprenon, kie oni sub ilia gvidado produktis meblojn por butikĉenoj kaj ankaŭ por privataj klientoj. En 1941 H. Ch. Dickinson eldonis volumon da versaĵoj. En 1967 al li estis aljuĝita la titolo "Membro de la brita imperio" pro liaj pioniraj meritoj sur la kampo de laboro de blinduloj kun diversaj instrumentoj kaj maŝinoj en la industrio. Kvankam li funebris pro la morto de Eddi, de ambaŭ gepatroj kaj de la edzino, li daŭrigis la ŝrankfabrikadon. En 1962 li denove edziĝis al nevidanta instruistino de blinduloj, posedanto de universitata diplomo. En 1963 li komencis labori kiel direktoro de la reĝinlanda rekapabligejo por blindaj junuloj kaj plenaĝuloj. Kune kun la nova edzino li gvidis tiun instituton al plena prospero. En 1978 li emeritiĝis kaj dediĉis sin al siaj hobiaj, kiel ekz. al riparado de horloĝoj kaj de muzikskatoloj kaj al legado. Post longa malsano li mortis en 1983.

HERBERT KAJ FAY KOPPEL

FINNLANDO

Einar Juvonen (1898–1979)

Finnlando apartenas al tiuj landoj, kie jam baldaŭ post la fino de la unua mondmilito prosperis la esperanto-movado inter la blinduloj. Ĝi estis la lando, kiu tuj pretis organizi nian duan kongreson de blindaj esperantistoj, post la brila sukceso de la kongreso unua en Prago 1921. Tiu dua okazis en Helsinko en 1922. Ni ne scias ĉu kaj kiom en ĝi aktivis s-ano Einar Juvonen. Ni tamen scias, ke li estis la plej grava reprezentanto de la dua generacio de finnaj blindaj esperantistoj, dediĉante 26 jarojn de sia vivo por la plenumo de la funkcio de prezidanto de "Steletto", societo de blindaj esperantistoj en Finnlando.



Li naskiĝis la 6-an de aprilo 1898 en la komunumo Värtsilä, en la karelia parto de Finnlando. La vidpovon li perdis, kiam dum la civitana milito ĉe la urbo Viipuri en 1918 lin vundis pafila kuglo celinta lian kapon.

Li baldaŭ komencis interesiĝi pri la blindulafero. Diversajn funkciojn li plenumis dum kvindek jaroj. En 1926 oni elektis lin prezidanto de la centra organizaĵo de finnaj blinduloj, kiun funkcion li plenumis dum dek jaroj. 30 jarojn li estis prezidanto de la societo de finnaj blindaj masaĝistoj. Profesie li estis fizioterapiisto. Masaĝo kaj fizioterapio estas la plej oftaj profesioj inter la viddifektitoj en Finnlando. Dum la jaroj 1927–1945 li estis ĉefredaktoro de la brajla gazeto "Sokeain Airut" (heroldo de blinduloj). Tiun taskon li plenumis akurate ankaŭ dum la milito. Helsinko estis ofte bombatakata, sed li restis ĉiam en la urbo kaj zorgis, ke la legantoj ricevu regule sian ŝatatan gazeton. Kiel fakulo kaj spertulo, Juvonen ofte estis invitata en diversajn registarajn komisionojn, kie oni pritraktis aferojn koncerne blindulojn. Tie li ĉiam sukcese agis. Lia tutviva agado estis ĝenerale alte taksata. Tion pruvas plej bone la ordeno de blanka rozo, per kiu lin distingis la prezidento de la finna respubliko en 1953. Kvar jarojn poste li ricevis de la finna registaro la rangon de sociala konsilanto.

La finnaj blinduloj honoras s-ano Einar Juvonen kiel meritplenan kaj ŝatatan veteranon de sia movado.

RUDOLF KRCHŇÁK


FRANCIO

Albert Masselier (1886–1976)

Inter ambaŭ mondmilitoj Albert Masselier estis unu el la plej elstaraj personoj de la blindul-esperantista movado en Francio kaj li fariĝis tre konata ankaŭ sur la internacia kampo.

Naskiĝinte en Rosendaël, apud la belga landlimo, li studis en lernejo por estontaj pastroj, sed li ne sentis altiron por la pastreco, kaj forlasis la lernejon. Antaŭ la unua mondmilito li havis brilan kaj promesplenan situacion en komerca entrepreno.

La sorto frapis lin: sur la batalkampo kuglo trafis liajn okulojn kaj li restis tute blinda. De tiam li dediĉis sin al siaj sortfratoj. Komence li rekuraĝigis kaj revigligis la blindigitajn soldatojn. Poste li aktive partoprenis en la movado por progresigo de la blinduloj. Sed lia vera agadkampo estis blindulesperantista movado.



Oni ne konas la precizan daton de lia esperantistiĝo, sed verŝajne ĝi okazis dum la unua jardeko post la milito. Evidente li baldaŭ fariĝis varma apostolo de internacia lingvo kaj de ĝiaj kvazaŭ-harmonoj: aspiroj al mondpaco kaj universala frateco, same kiel virtualaj eblecoj por kunigi kaj progresigi la tutmondan blindulaferon. Albert Masselier kunlaboris kun Théophile Cart, fariĝis "konsulo" de la Blindaj Esperantistoj (tiel oni nomis tiam la EL-delegitojn). En EL li aperigis multajn artikolojn kaj tradukojn pri blindulaferoj aŭ aliaj temoj; en francaj gazetoj, brajlaj kaj porvidulaj li skribis pri la blinduloj kaj pri Esperanto. En 1932 li estis la ĉefa organizanto de la 11-a IKBE en la kadro de la 24-a universala esperantokongreso. Poste li starigis laŭleĝe nian landan grupon sub la nomo FABE (Franca Asocio de Blindaj Esperantistoj). Prezidanto kaj kasisto de FABE estis du vidantaj blindulamikoj, Em. Robert kaj R. Curnelle; A. Masselier fariĝis sekretario. Aliaj estraranoj estis Et. Bouquin, R. Gonin, f-ino A. Niquet, J. Pascal kaj G. Pluchon. Sed A. Masselier mem faris grandan parton de la laboro: li verkis artikolojn kaj propagandilojn, kontaktis kun multaj organizaĵoj, faris varbprelegojn en diversaj urboj, ktp. Li ankaŭ helpis la novajn FABE-anojn en la lernado de Esperanto. Bedaŭrinde, pro la tiam dividita blindulmovado en Francio, FABE ne povis resti filio de UABO.

Albert Masselier, aliparte, estis talenta homo. Li verkis poemojn kaj kantojn franc-kaj esperantlingve, kaj tradukis al Esperanto multajn popolkantojn, se ne paroli pri artikoloj.

Post la dua mondmilito lia aktiveco iom malvigliĝis, sed li ĉiam konservis sian fidelecon al Esperanto, sian fidon al ĝia estonteco. Verŝajne lia lasta partopreno en kongreso estis en Harrogate (1961). Lia familia vivo estis nefacila: plurfoje li fariĝis vidvo. Iom post iom li perdis la aŭd- kaj la palp-kapablon, kaj dum la lastaj monatoj de sia vivo li estis paraliiziita kaj preskaŭ senkonscia.

Albert Masselier meritas resti en la memoro de la blindaj esperantistoj kiel modelo de homo, kiu ĉion oferis por la progresigo de Esperanto, kaj kiu, malgraŭ la obstakloj, la miskomprenoj, neniam forlasis sian idealon.

Serge Gyors

La 12-an de aŭgusto 1958 mortis Serge Gyors. Li estis unu el tiuj homoj multe konataj kaj ŝatataj en diversaj medioj dank' al sindona, senlaca kaj efika laborado, sed pri kies intima personeco oni scias preskaŭ nenion. Li vivis sola en propra dometo kiel muzikinstruisto.

Vigla defendanto de la rajtoj kaj aspiroj de la blinduloj, li estis eficienta sekretario de la Unuiĝo de Blinduloj de Chaumont kaj regiono dum la dek kvin lastaj jaroj de tiu organizaĵo, kiu malaperis pro la dua mondmilito. Sed post tiuj teruraj jaroj li reprenis la batalon:

i.a. li fondis, redaktis kaj mem presis brajlan gazeton "Le réveil des aveugles" (la vekigo de la blinduloj), kies ĉefa celo estis lukti kontraŭ ĉiuspecaj kaj ĉiuflankaj antaŭjuĝoj suferataj de la nevidantoj. Tiu batalemo devigis lin multfoje interveni ĉe oficialaj instancoj kaj publikaj administracioj.

Sed la aktiveco, interesiĝo kaj helpemo de Serge Gyors ne limiĝis je tio. Li krome presadis tri franclingvajn periodaĵojn – poezian, katolikan, ŝakan. Post lia morto oni eksciis, ke li mem verkis poemojn sub pseŭdonimoj.

En 1950, okaze de la parizaj UK kaj IKBE, la nevidantaj esperantistoj en nia lando decidis revivigi la iaman grupon FABE (Franca Asocio de Blindaj Esperantistoj).



Serge Gyors estis inter la fondintoj de la nova organizaĵo: SBEF (Societo de Blindaj Esperantistoj en Francujo), kiu poste fariĝis FUBE (Franca Unuiĝo de Blindaj Esperantistoj). Ĝis sia morto li plenumis la taskon de ĉefsekretario de FUBE, kaj li redaktis kaj presis la trimonatan organon de tiu grupo: "Nia voĉo". Dum pluraj jaroj li ankaŭ prizorgis la perkorespondajn kursojn de FUBE: li ja perfekte regis la internacian lingvon.

Internaciskale li estis tre konata, ne nur ĉar li korespondadis kun multaj landoj kaj partoprenis en pluraj internaciaj kongresoj, sed precipe ĉar li estis la iniciatinto, fondinto, administranto kaj gastiganto en propra domo de IEBB, la "Internacia Esperanta Brajla Biblioteko". Tiu kreaĵo fariĝis lia ĉefa zorgo, lia plej granda merito. Por ĝi li mem kopiis multajn volumojn kaj kolektis monon en vidulaj medioj. Ĉe lia morto, interkonsente kun LIBE, la plej granda parto de la trezoroj de IEBB estis sendita al la Nacia Librarejo por Blinduloj en Londono (nun en Stockport), kiu daŭre pruntedonas al eksterlando.

Laŭ lia propra konfeso Serge Gyors ofte laboris de la kvina matene ĝis la oka vespere. Kredeble por li la laboro kompensis la solecon. Tamen ni povas supozi, ke tio okazis je la kosto de lia sano, kaj ke lian subitan forpason kaŭzis tiom da penado dediĉata al la kunhomoj.

Pierre Chaillet (1923–1980)

Pierre Chaillet naskiĝis la 22-an de januaro en Audincourt (departemento Doubs). Jam kiel naŭjara knabo li perdis sian patron, tiel ke la patrino, energia virino, ludis tre gravan rolon en lia vivo. Estante 14-jara li tute blindiĝis pro okulnerva malsano. Sed li ne senesperigis; li lernis brajlon kaj readaptiĝis. En 1945 li iris al Parizo, kie li studis dum du jaroj en la profesia reeduka Centro de Asocio Valentin Haüy, post kio li ricevis la ŝtatan diplomon de masaĝisto-kineziterapeŭto. Tiun profesion laboron li plenumis unu jaron en Villard-de-Lans (Isère), poste en sia naskiĝa urbo, kaj fine, ekde 1959, en Chalon-sur-Saône (Saône-et-Loire). Homo ĝentila, diskreta, afabla, bonkora, li rapide adaptiĝis al la nova urbo kaj akiris abundan klientaron. Baldaŭ li fariĝis tipa silueto por la enloĝantoj. En 1972 mortis lia patrino, lia ĉiama helpantino. Li tamen spitis la sorton kaj daŭrigis sian profesion laboron dank' al la kuraĝiga helpo de bonaj najbaroj kaj de sindona parenfino. Sed ĉi tiu ankaŭ mortis post kelka tempo, kaj tiam Pierre Chaillet decidis emeritiĝi.

Sed por homo kiel Pierre Chaillet la profesia retiriĝo neniel signifis la ĉesigon de ĉia aktiveco. Male, li dediĉis sin al multaj taskoj kaj hobiaj, kiuj faris lian vivon plena kaj utila. En 1975 li ricevis gvidhondon de la Flandra Klubo en Wasquehal. Tio

estis por li grava liberiga helpo, tiel ke du jarojn poste, kiam la hundo mortis pro gorgkancero, P. Chaillet tuj ricevis novan de la sama fondaĵo.

Je la granda miro de sia ĉirkaŭantaro, Pierre Chaillet estis filatelisto: kun la helpo de vidanto kaj dank' al brajlaj slipoj kaj simplaj procedoj li ordigis sian belan, mondampleksan kolekton de poŝtmarkoj. Li multe interesiĝis ankaŭ pri muziko kaj registris multajn kasetojn. Por li brajla skribo estis ĉiam objekto de zorga priatento: li havis bonan personan bibliotekon kaj ricevis multajn revuojn, tiel ke li grandkvante legis. Li ankaŭ abunde kopiis, ne nur por si mem, sed por bibliotekoj kaj asocioj, kun kiuj li kunlaboris: li deziris, ke blinduloj, precipe la junaj, ne neglektu brajlon, tiun plej valoran liberigilon. Ŝatante tiflogian agadon, li vigle kunlaboris kun organizaĵoj kiel la loka sekcio de AVH, al kiu li havigis i.a. multajn librojn.

Sed en la vivo de Pierre Chaillet tute apartan lokon havis la internacia lingvo, kiun li lernis dum sia profesia tempo en Audincourt. Li rapide atingis bonan nivelon almenaŭ en la skribado de Esperanto, dank' al diligenta kaj racia studado. Ĉar li ne havis oftajn okazojn paroli, li aĉetis la kasetojn de la metodo Assimil, kaj li eĉ brajligis la koncernan ampleksan libron. La avantaĝoj de Esperanto kaj la idealo al ĝi ligita tuj kaptis la menson de la scivolema kaj komunikigema Pierre Chaillet. Kvankam li partoprenis nur unu internacian kongreson, tiun de Lyon en 1957, li estis multlande konata dank' al intensa korespondado.

Por FUBE li estis efika kunlaboranto. Kiam nia asocio fondis en 1978 sian kulturen bibliotekon, li tuj kaj entuziasme akceptis prizorgi ĝin; li ne nur bone konsilis la uzantojn, sed konstante klopodis pliriĉigi la librokolekton.

Sur la plano de LIBE li ankaŭ estis multvalora aktivulo. Li unue helpis kiel landa delegito de la malnov-gazeta servo, tiam vigla. Sed lia plej ŝatata kaj plej sukcesa agado koncernis la malnov-libran servon. Kiam la fondinto de tiu servo, nia nederlanda amiko Albertus Baerveldt petis landajn kunlaborantojn, Pierre Chaillet senhezite proponis sin kaj baldaŭ fariĝis unu el la plej agemaj malnovlibro-servaj delegitoj. Sekve, kiam kelkajn jarojn poste pro malbona sanstato A. Baerveldt devis rezigni pri la gvidado de tiu grava, temporaba kaj spacpostula fako, li tute nature konfidis ĝin al Pierre Chaillet, kiu daŭrigis la taskon en la sama sindona spirito. Ĉiujare la nova servestro prezentis modele redaktitan raporton, kiu prilumis ĉiun faceton de la rezultoj de tiu agado vere utila al tiom da personoj kaj bibliotekoj kaj trafa rimedo por pruvi la praktikan valoron de Esperanto eĉ por neesperantistoj. Sed la raportoj ne menciis, ke tre ofte, kiam petita libro ne estis disponebla en la rezervo, Pierre Chaillet mem, propramone, aĉetis ĝin por kontentigi la petinton.

La 6-an de novembro 1980, akompanate de 76-jara helpantino, Pierre Chaillet transiris trafikplenan straton, kaj subite peza kamiono mort-renversis ambaŭ personojn. Tiel do, tragike finiĝis la vivo kaj la agado de tiu neordinara, multflanka kaj helpema pioniro.

RAYMOND GONIN

FEDERACIA RESPUBLIKO GERMANIO

Hans Breitenbach (1924–1980)

Al la plej elstaraj agantoj por disvastigado de la internacia lingvo en okcidenta Germanio sendube apartenis post la dua mondmilito Hans Breitenbach. Dum 20 jaroj li gvidis la Esperanto-Blindul-Ligon de Germanio (EBLOGO), kaj li aktive laboris en la estraro de LIBE i.a. kiel ĝeneral-sekretario.

Li naskiĝis la 27-an de januaro 1924 en Erfurt (Turingio). Blindiĝinte en frua junaĝo li ricevis lernejan kaj profesion (stenotajpistan) edukadon en la blindullernejo en Halle-Saale. Tie oni certe rimarkis ankaŭ lian muziktalenton, kaj instruis al li pianludon kaj agordadon. Laboron li trovis post la militfino en Berlino ĉe la radiostacio. Post transloĝiĝo al la okcidenta parto de la urbo li estis dungita de la Berlina Banko, kie li laboris ĝis la morto.

Kvankam ni precize ne scias, kiam li esperantistiĝis, estas certe, ke li apartenis al la unuaj membroj de EBLOGO post ĝia refondiĝo. Ankaŭ en la ĝenerala movado li aktivis kiel vicprezidanto de la berlina esperantouniĝo kaj eldonanto de ties informilo. Inter 1959 kaj 1979 li estis unua prezidanto de EBLOGO. La organizaĵo multe profitis de liaj ideoj kaj kapabloj. De la pioniro de la germana blindulesperantista movado, Joseph Kreitz, li transprenis la eldonadon de la brajla revuo de EBLOGO. Sub la nomo "Panoramo" ĝi estis ankaŭ internacie konata kaj ŝatata. Breitenbach ne nur estis ĝia redaktoro, ĉefa kontribuanto kaj tradukanto, sed dum libertempo kaj semajnfinoj, li mem produktis la kliŝojn per malnova presmaŝino de la berlina blindulpresejo. Ne ĉiuj ŝatis lian kelkfoje iom akran skribstilon, sed ĉiuj respektis lian laboron, kiun li faris tiel perfekte kiel eble.

Veki interesiĝon pri la internacia lingvo Breitenbach konsideris kiel ĉefan taskon de esperantouniĝo. Varbofolioj de li verkitaĵ aperis en rimarkinda kvanto. Alte li taksis integriĝon de la blindaj esperantistoj en la ĝeneralan movadon. Li mem kunlaboris en la germana esperanto-asocio, kaj en la tiama "Germana Esperanto-Revuo) ofte aperis liaj kritikaj observoj pri radioelsendoj.

Multajn internaciajn kongresojn li vizitis. Li organizis seminariojn de blindaj esperantistoj en Rheinbreitbach 1967 kaj la 42-an IKBE en Hamburg 1974.

Post pli ol 20 jaroj de aktiva laboro por disvastigo de Esperanto en la jaro 1979 kancermalsano devigis lin demisii de ĉiu posteno, ĉesigi la laboron. La internacia kongreso en Lucerno 1979 estis por li la lasta okazo renkontiĝi kun multaj gesamideanoj. Tro frue, la 19-an de februaro 1980 li mortis en Berlino.

Hans Breitenbach estis homo kun multaj talentoj. Li kapablis gvidi kunsidon kaj poste amuzi la ĉeestantojn per pianludo aŭ per spritaj kabaredaĵoj memverkitaj. Al diskonigo kaj disvastigo de Esperanto li dediĉis multe da tempo kaj laborforto. Kvankam la kunlaboro ne ĉiam estis facila, restas fakto, ke Hans Breitenbach ludis gravegan rolon en la esperantomovado de germanaj blinduloj.

Fritz Karow (1913–1987)

Li sendube apartenis al la plej konataj aktivuloj de la blindulesperantista movado post la dua mondmilito. Dum pli ol 40 jaroj li estis membro de la blindulesperantista ligo de Germanujo (EBLOGO), kies financojn li majstris inter la jaroj 1959–87. En 1978 oni elektis lin estrarano de LIBE. Komence li estis vicprezidanto, kaj inter 1980-83 prezidanto. Al liaj tiutempaj klopodoj ni dankŝuldas la brajlan dekvoluman eldonon "Plena Analiza Gramatiko de Esperanto". Inter 1951-85 li partoprenis la plej multajn "niajn" kaj ankaŭ multajn universalajn kongresojn. Tie li interkonatiĝis kaj -amikiĝis kun multaj gesamideanoj. Alte taksata estis lia societemo kaj helpemo. Li estis kunorganizanto de la renkontiĝo en Rheinbreitbach 1967, poste de kongresoj en Hamburg 1974 kaj en Augsburg 1985. Li ĉiam estis garantio por glata traktado de financaj aferoj. Ekde 1983 oreldifekto malhelpis lin partopreni en multpersonaj kunvenoj. Fritz Karow estis homo, kiu preferis praktikan laboron al iluzioj kaj belsonaj paroladoj.

Li naskiĝis la 16-an de februaro 1913 en la tiam germana, baltmara havenurbo Stettin, kiu de post la dua mondmilito apartenas al Pollando kaj nomiĝas Szczecin. Blindiĝinte kiel dekjarulo li vizitis la blindullernejon de sia hejmurbo. Tie la lernejoj havis la eblecon lerni ankaŭ Esperanton. Post studado de eklezia muziko en la mezgermania urbo Aschersleben, li ricevis postenon de orgenisto en Stettin. Kiel milionoj el liaj samlandanoj, post la militfino li devis forlasi sian hejmon. Unue li venis al Timmendorfer Strand, ĉemara banloko proksime al la okcident-germana urbo Lübeck. Post kelkaj jaroj en Hannover li transprenis agentejon, kiu peris koncertojn de blindaj artistoj sur la tuta teritorio de FR Germanujo. Ĝis 1966 li mem vojaĝadis kiel koncertpianisto kaj akompananto de gekantistoj. Ekde la jaro

1958 li loĝis en Kolonjo, kie li en 1966 transprenis orgenistan postenon ĉe granda tombejo. Du jarojn antaŭe li geedziĝis kun lia dua edzino Christa. Lia unua edzino Lucie mortis en 1962. Post la emeritiĝo en 1982 li transloĝiĝis al la banloko Hoon-Bad Meinberg, kie li travivis tro malmultajn jarojn sen profesia laboro en bela ĉirkaŭaĵo.

Pli ol 50 jarojn F. Karow aktive partoprenis en la blindulmovado. Jam en Stettin li aliĝis al la blindulunuiĝo de sia regiono kaj post la milito li apartenis al grupo de la fondantoj de la nova blindul-unuiĝo de la federacia ŝtato Schleswig-Holstein. En Kolonjo li dum multaj jaroj estis estrarano de la loka blindul-unuiĝo, kiun li prezidis inter 1973–76. Ĝis sia morto li estis vicprezidanto de la germana komisiono por brajla muzikskribo. Li mortis la 16-an de aprilo 1987. En la ferma kunsido de la augsburga kongreso, en kies preparon li investis multe el sia energio, li deziris plane akompani kantadon de la himno, bone sciante, ke por li tio estas la lasta okazo.

Li estis agema kaj helpema homo, fidinda amiko, parolanta bonegan Esperanton.

THEODOR SPECKMANN

ITALIO

Guglielmo Vassio (1914–1985)

La 27-an de januaro 1914, en Biella, li naskiĝis sana kaj vigla, sed post 15 monatoj perdis la vidpovon pro meningito. La elementan lernejon li vizitis ĉe la blindulinstituto en Torino, kie li okjara komencis lerni violonludadon. La postajn studojn li havis inter vidantoj, en klasika liceo. En 1928 li eniris muzikan konservatorion kiel la unua blindulo. Altkvalitan diplomon pri violono li ricevis en 1934, gajnante la unuan premion "Antonio Brasso" kiel la plej lerta studanto el la tuta violonkurso. Intertempe li studis ankaŭ komponadon kaj ĥorkantadon. Kiel privata studento en 1938 li akiris ankaŭ diplomon pri fortepianludo. Tiam li dediĉis sin al privata instruado.

En 1939 li edzinigis sian dumvivan kunulinon, Dina. Ilia unua filo, naskiĝinta en 1943, pro bedaŭrinda akcidento vivis nur 22 monatojn. Dua filo naskiĝis en 1947.

En 1966 li ekgvidis muzikan edukadon en la blindulinstituto en Torino. De 1969 ĝis sia emeritiĝo en 1984 li instruis samfaze en tieaj ŝtataj mezlernejoj, ĝuante ĉie grandan estimon flanke de la gekolegoj kaj gelernantoj.

Jam en 1946 li estis elektita estrarano de la torina sekcio de la itala blindulunuiĝo,

kiun taskon li plenumis dum multaj jaroj. En 1967 li fariĝis prezidanto de la brajla muzikskriba komisiono ĉe la Tutmonda Konsilantaro por la Bono de Blinduloj. Li partoprenis la ĝeneralkunvenon en Hindujo (1969) kaj kunvenojn de la subkomisiono en Parizo, dufoje en Kolonjo, krome en Madrido, Moskvo kaj lastfoje, en aprilo 1985, en Ĉeĥoslovakio. Tiu agado tamen ne ĝojigis lin plene, ĉar, malgraŭ ĉiuj liaj streboj, oni ne atingis la deziratan unuecigon. Li mortis la 26-an de oktobro 1985.

G. Vassio esperantistiĝis kiel dekkvinjara knabo en 1929, kaj jam samjare li travivis sian unuan blindulesperantistan kongreson en Budapeŝto. Li havis nur 19 jarojn, kiam – kun profesoro Tancredi kaj aliaj pioniroj de la itala blindulesperantista movado – li partoprenis en la fondo de IABE (Itala Asocio de Blindaj Esperantistoj), kies gvidadon post la milito transprenis li mem. Dum kelkaj jaroj li sukcesis transformi ĝin el malgranda grupo de blinduloj, ligitaj de komuna entuziasmo al Esperanto, en veran asocion. Ĝi kunigis rimarkinde grandan membraron el la tuta lando, kreante grupon da fervoraj kunlaborantoj. Atinginte finanĉan solidecon, ĝi komencis aperigi sian bultenon "Itala Ligilo" kaj eldoni brajlajn studlibrojn. En ĝia kadro baldaŭ ekfunkciis perkoresponda lernejo, regule okazis fakkunvenoj. Dum la gvidperiodo de G. Vassio IABE akiris veran prestiĝon en la itala blindulmovado. Li estis en la centro de ĉiuj iniciativoj, li estis la motoro kaj direktilo, la menso kaj koro de IABE.

Paralele li aktivis en la ĝenerala esperantomovado de Italio. Li partoprenis ĉiujn kunvenojn de la torinaj samideanoj, gvidis multajn esperantokursojn. En 1937 oni elektis lin en la estraron de Itala Esperanto-Federacio, kie li deĵoris multajn jarojn.

Se granda estis la agado de Guglielmo Vassio inter la italaj esperantistoj, verŝajne ĝi eĉ pli imponis sur la internacia kampo. Li estis unu el la ĉefaj elstaruloj de la blindulesperantista movado. Li fondis Ligon Internacian de Blindaj Esperantistoj, kaj estis ĝia prezidanto ĝis la jaro 1958. Tiam, por la bono de nia organizaĵo, li surpronis la administran taskon, modele plenumatan dum 19 jaroj. Li estis la ĉeforganizanto de du IKBE-oj (Bolonjo 1955 kaj Rimini 1972).

Li estis ĉiam preta helpi per konsiloj kaj per laboro. Ĉu iam okazis, ke letero de iu samideano estis nerispondita? Certe ne! Same ne eblas forgesi la konvinkiĝon kaj la persiston, kun kiu li ĉiam penadis gardi la kompletan unuecon de nia movado malgraŭ la diversaj opinioj kaj politikaj sistemoj, por ke burokrataĵoj kaj pagteknikaj malfacilaĵoj ne dividu nian mondon en orienton kaj okcidenton.

Apenaŭ 20 tagojn antaŭ lia forpaso, la 26-an de oktobro 1985 en hospitala lito li

diris al s-ano Aldo Grassini: "Mi plenumis mian taskon, nun IABE estas konfidita al vi, junaj fortoj, kiuj estas la kolonoj de nia kara asocio". Tio estis transmanigo de torĉo. Ne tiom longe antaŭe, al la partoprenantoj de la 54-a IKBE en Tirrenia li donacis la lastan perlon de sia juvelaro: primuzikan prelegon, elegantan kaj interesan, kiel kutime. Ĝi estis lia "cigna kanto" en nia movado.

LAŬ DU ARTIKOLOJ DE D-RO ALDO GRASSINI

JUGOSLAVIO

Veljko Ramadanoviĉ (1874–1943)

En la historion de la blindulesperantista movado enskribis sian nomon ankaŭ kelkaj personoj vidantaj. La plej grava el tiuj sendube estis T. Cart, pri kiu estas troveblaj materialoj en la du antaŭaj volumoj. La situacio kun la persono, pri kiu temas ĉi-sube, estas ankoraŭ pli specifa.

Veljko Ramadanoviĉ nek estis blinda nek li parolis Esperanton, sed – precipe por la jugoslaviaj blindaj esperantistoj – lia nomo restas karmemora. Kiu li estis?

Li naskiĝis en Korbovo (nord-orienta Serbio) kiel filo de instruisto. Tiun profesion ankaŭ li konsideris vivdestino por si. Li specialiĝis por eduki handikapitojn, inter ili ankaŭ blindulojn. Li ellaboris la unuan serban brajlo-alfabeton.

Ramadanoviĉ fondis tutan aron da diversaj institucioj por blinduloj kaj aliaj handikapuloj.

Ramadanoviĉ morale kaj eĉ materie apogis la disvastigon de Esperanto inter la jugoslaviaj blinduloj. La blindullernejo en Zemun (nun kvartalo en Beogrado), fondita de li, inter la du mondmilitoj estis vera semanto de Esperanto. Tie Ramadanoviĉ Esperanton faris deviga lernobjekto por ĉiuj lernantoj. La lerneja presejo tiutempe eldonis 26 brajlajn kaj tri nigrapresajn librojn en la internacia lingvo. Ili tre malmultekoste aŭ tute senpage venis al multaj blindaj esperantistoj ankaŭ eksterlande. En 1927, kun aprobo de Ramadanoviĉ, oni fondis tie societon de blindaj esperantistoj kun la nomo "Nova Lumo". Kiel reprezentanto de la jugoslaviaj blinduloj, en 1932 ĝi aliĝis al UABO, kies estrarano samjare fariĝis ankaŭ Ramadanoviĉ.

La blindullernejo en Beogrado nun portas la nomon de ĝia fondinto, Veljko Ramadanoviĉ.

LAŬ VLADISLAV STEFANOVIĈ

Vladislav Stefanoviĉ (1915–1987)

Li estis unu el la ĉefaj agantoj en la blindulesperantista movado de Jugoslavio. Favorajn kondiĉojn por tiu agado kreis por li la fakto, ke li estis instruisto pri Esperanto en la blindullernejo Veljko Ramadanoviĉ en Beogrado. Lia tiflopedagogia profesio kondukis lin al diversspeca aktivado en la jugoslavia blindulmovado.

Li naskiĝis la 25-an de marto 1915 en Dolovo (Vojvodina, nun parto de Jugoslavio) en terkulturista familio. La familio baldaŭ transloĝiĝis al urbeto proksima al Beogrado. Tie li vizitis la bazan lernejon la gimnazion kaj en la tria klaso de la instruista lernejo li blindiĝis pro okulvundiĝo. Tiam (1932) li venis al la blindullernejo en Zemun (nun Beogrado), kie li post rekapablo estis enlaborigita en la blindulpresejo. En 1940 li forlasis tiun postenon kaj vivtenis sin kiel tabakvendisto. Nur en 1949 li revenis al la zemuna blindullernejo kiel tiflopedagogo, plenuminte intertempe la necesajn ekzamenojn. Tie li laboris ĝis sia emeritiĝo, instruante la germanan lingvon kaj Esperanton, kiu estis tiam deviga fako por ĉiuj gelernantoj tie.

Post la dua mondmilito Stefanoviĉ aktiviĝis en Popolliberiga Fronto de Jugoslaviaj Blinduloj, fariĝinte unu el la kunfondintoj de la blindulorganizaĵoj por Serbio kaj por Beogrado. Li estis ankaŭ pioniro de blindulŝako en Jugoslavio. Li apartenas al la fondintoj de JUBE (Jugoslavia Unuiĝo de Blindaj Esperantistoj), kiun li prezidis dum multaj jaroj. En 1973 li estis la ĉeforganizanto de IKBE en Beogrado. Li kontribuis speciale al la kulturpolitika edukado de blinduloj per prilaborado de tiufakaj enlandaj kaj eksterlandaj spertoj kaj per senlaca tradukado. Dum sia tuta vivo li ĉiam laboris kun kaj por la blinduloj. Pro siaj grandaj meritoj li estis multfoje distingita. Inter tiuj distingoj eble la plej grava estis la premio "Filip Višnjiĉ" (de Blindul-Asocio de Serbio).

Plej multe li okupis sin pri disvastigo de Esperanto inter la blinduloj, ĉiam emfazante la grandan signifon de tiu lingvo por ili cele al kontaktoj kun eksterlandanoj, interŝanĝo de spertoj kaj pli facila solvado de specifaj problemoj. Ĝis la lasta momento li regule vizitadis kunvenojn de nia esperantista sekcio. Li ĉiam vigle partoprenis en ĉiuj niaj aktivaĵoj. Li vizitis kelkajn internaciajn kongresojn de blindaj esperantistoj kaj ofte gastigis eksterlandanojn en sia hejmo.

Sekve de nekurablebla malsano li subite mortis la 25-an de marto 1987 en aĝo de 73 jaroj. Lia amiko Duŝan Anĝelkoviĉ pri li diras, ke li estis sincera kamarado, pacienca kunlaboranto, saĝa konsilanto, prudenta patro, delikata edzo, ĉiam aŭskultema avo. Tion povas konfirmi ĉiu, kiu Vladislavon Stefanoviĉ konis intime.

DUŜAN ANĜELKOVIĈ KAJ NEDELJKA LOĴAJIĈ

NEDERLANDO

Rafael Israëls [1887–1975]

La nomo de Rafael Israëls inter la blindaj esperantistoj internacie estas konata ĉefe pro la lernolibro de la brajla esperantostenografio, kiun li verkis tiel majstre.

Okaze de lia okdeka naskiĝtago en 1967 vizitis lin s-ano Jan Verheule [1930–2000] por transdoni bondezirojn de NOSOBE (Nederlanda Societo de Blindaj Esperantistoj). Ĉe tiu okazo s-ano Israëls rakontis pri sia partopreno en la esperantista movado de la nederlandaj blinduloj. S-ano Verheule raportis pri tiu vizito en memorlibro, kiun NOSOBE eldonis okaze de sia 45-jara ekzistado en 1974. El ĝi ni ĉerpis la jenon:

Inter la jaroj 1920 kaj 1930 en Nederlando plivigliĝis la interesiĝo pri Esperanto kaj en la vidula kaj en la blindula medio. En la blindulinstituto de Bussum tio okazis sub entuziasma gvidado de la instruisto Roosdorp; en la katolikaj blindullernejoj en Grave tion faris fratulino Kaspara por knabinoj kaj fratulo – kies nomo estas jam forgesita – por knaboj La direktoro de la protestant-kristana blindulinstituto en Zeist, s-ro Laansma estis sperta esperantisto, sed li neniam oficiale instruis Esperanton.

Leginte artikolon de s-ano Roosdorp en nederlanda brajlogazeto pri la valoro de Esperanto, s-ano Israëls komencis lerni la lingvon. El la blindulbiblioteko de Hago li pruntis modestan lernolibron de Esperanto. Kontaktis perletere kun H. Thilander kaj eksciis, ke tiu eldonas internacian brajlogazeton (Esperanta Ligilo), abonatan jam de 15 nederlandanoj, kies reprezentanto estas Jaap Créman (posta sonorilaristo de Zwolle). En 1928 Israëls plenumis ekzamenon por akiri B-diplomon, kiu rajtigis lin instrui Esperanton. La necesajn brajlajn librojn por sin prepari al tiu ekzameno li pruntis el la blindulbibliotekoj en Londono kaj en Hamburgo.

La unuan de julio 1929 li kaj Créman kunvokis la fandan kunvenon de Nederlanda Societo de Blindaj Esperantistoj, kiun ĉeestis 30 personoj. Créman elektiĝis la prezidanto kaj Israëls la sekretario. Tiutempe la geblinduloj en Nederlando estis organizitaj en laŭ konfesaj grupiĝoj: katolikaj, protestantaj kaj neŭtralaj. NOSOBE estis la unua, kies anoj varbiĝis el ĉiuj tri grupoj. Baldaŭ post la fondiĝo NOSOBE komencis eldoni la unue manskribitan kaj poste presitan "Interkontaktilon", redaktitan de Israëls.

Ankoraŭ en 1929 Israëls fariĝis la nederlanda reprezentanto en la Universala Asocio de Blindaj Esperantistoj (kiu poste ŝanĝiĝis al Universala Asocio de Blindul-

Organizaĵoj) kaj post jaro ties dua sekretario, dum Thilander deĵoris kiel sekretario unua.

Laŭ iniciato de NOSOBE jam antaŭ la dua mondmilito ĉe ĉiuj nederlandaj blindulbibliotekoj ekestis Esperantfakoj, kiuj pruntis ankaŭ al eksterlando. (Nuntempe tio validas ankaŭ por sonlibroj.) Granda atingo de NOSOBE estis en 1934 eldono de la 13-voluma granda Esperanta-nederlanda vortaro de Van Straaten. La necesan monon al tiu granda entrepreno oni akiris organizante loterion. Helpe de alia loterio estis eldonita de NOSOBE ankaŭ "Fundamenta Krestomatio" por ebligi al multaj blindaj esperantistoj plenumi ekzamenon de A-diplomo. Por kontaktoj kun vidantaj esperantistoj NOSOBE komencis publikigi nigrapresan bultenon dufoje en jaro kun la titolo "El nia medio". Dum multaj jaroj ĝin redaktis R. Israëls. En 1940 la germanaj okupantoj ordonis konfiski la posedaĵojn de ĉiuj nederlandaj esperanto-asocioj. La estraro de NOSOBE tiam sukcesis ŝajnigi, ke la kaso estas malplena, tiumaniere la mono estis savita por la postmilita agado.

Post la militfino NOSOBE – sub la prezido de Israëls (poste Verlinde) – rekomencis sian agadon kun pli ol cent membroj. La vaste konata revuo "La Kontakto" ekaperis en 1946, redaktita de Israëls. En ĝi li publikigis societajn sciigojn, raportojn pri gravaj okazintaĵoj de la ĝenerala nederlanda esperanto- movado, popular-sciencajn, kulturajn kaj etikajn artikolojn. Tiun stilon transprenis ankaŭ la posteuloj de Israëls, kiu en 1955 estis elektita honora prezidanto de NOSOBE.

POLLANDO

Vivo kaj agado de Jozefo Smietanko (1913–1984)

La elstara pola esperantisto Józef Smietanko naskiĝis la 7-an de decembro 1913, en malnova fervojista familio. Same kiel la avo kaj la patro, ankaŭ li kaj liaj tri gefratoj estis destinitaj kontinui la familian profesion, do la juna Jozefo finis fervojistan faklernejon. Poste li studis en supera militlernejo, ĉar multe pli allogis lin la militistaj uniformo kaj servo.

Komenciĝis la dua mondmilito. La gefratoj de Jozefo daŭrigis sian fervojistan servon, kaj li mem komencis batali kontraŭ la hitlerana atako. La aktivan militservon li finis, kiam internigita de la soveta armeo li fuĝis al sia naskiĝloko, proksime al Varsovio. Ĝuste tie la simplan sed militaspektan civilulon kaptis la germanoj kaj ekzilis al Hannover, sekve Smietanko devis eklabori ĉe la tiea fervoja nodo. En 1942, pro sabotaĵo, oni arestis kaj sendis lin al la koncentrejo Lübbenau. Tie, multfoje kruele turmentata kaj batata de la faŝistoj, li perdis la vidpovon,

sed perfidis neniun el siaj kamaradoj. Feliĉe, lian vivon savis nekutime humana mallibereja kuracisto. Okazis, ke la duonblindigita Smietanko faris desegnaĵon per kreto sur nigran tabulon pri ĉevalo transsaltanta barilon. La bonkora kuracisto, certe ravita de la figuro kaj kompata al pereanta talento, resendis la desegninton kiel tifmalsanulon al Pollando.

En Varsovio plej bonaj okulkirurgoj operaciis lin kelkfoje – sed senefike. Post la lasta operacio, dum la varsovia insurekcio, li definitive perdis eĉ la lumsenton. En tiu momento la sanga vivlinio dispartigis la vivon de Jozefo Smietanko. Ĉiuj liaj junecaj revoj, planoj, aspiroj kaj ĝenerale la tuta vivo ŝanĝiĝis. La iama sportisto, fervora ĉasisto, brava ĉevalrajdanto kaj samtempe poeto, iom desegnisto, subite fariĝis analfabeto. Dolore seniluziiginta li devis moviĝi mallerte en la lin ĉirkaŭanta senlumeco. Kaj en tiu griza nebulo Jozefon trovis helpema mano de Maria. Ili interkonatiĝis ankoraŭ en hanovra stacidomo, kie ankaŭ ŝi laboris devigite, kaj Maria nun fariĝis lia fidela, helpopreta, amanta edzino kaj kunulino de lia malfacila vivo.

La geedzaj Smietanko ekloĝis en malgranda urbeto, kie la edzino laboris kiel kasistino ĉe la stacidomo, dum li komencis aŭtodidakte lerni la skribadon de la brajla sistemo. Tiu scipovo ebligis al li verki poeziaĵojn (lirike tristajn – skribitajn al "tirkesto"), artikolojn por la nacilingva blindulgazeto kaj leterojn, per kiuj li povis kontaktiĝi kun la ekstera mondo. Ĝuste tiuj artikoloj kaŭzis, ke konata nevidanta aganto pri blindulgazetoj, la esperantisto Jan Silhan ekinteresiĝis pri la juna, talenta blindula. Leterinterŝanĝo kaj eĉ persona vizito de tiu eminenta homo ĉe Smietanko instigis lin al esperantolernado.

En 1954 geedzaj Smietanko transloĝiĝis al Varsovio. Tie li komencis labori kiel presisto en la brajla presejo ĉe la novkreita organizaĵo, Pola Asocio de Nevidantoj. Li ankaŭ partoprenis kelkajn rekapabligajn kursojn. Poste li fariĝis la estro de la Varsovia Filio de la blindul-asocio.

Jozefo Smietanko ĉiam laboris kaj agis fervore, solide kaj perfekte, neniam serĉis materiajn aŭ honorajn profitojn. Senĉese evoluigante sin en Esperanto, li helpis al Jan Silhan redakti la revuon "Pola Stelo": li kolektis materialojn, tradukis malgrandajn artikolojn kaj zorgeme kontrolis ĝian presadon. Tiu agado ebligis al li profundigi la lingvokonon kaj fariĝi sperta esperantisto. Jan Silhan, vera patro de la pola blindulesperantistaro, en la persono de Jozefo Smietanko trovis sian anstataŭnton. La posteulo rajte estas nomata kreinto de la memstara, tutlanda sekcio de nevidantaj esperantistoj. Tamen pasis ankoraŭ longa tempo, ĝis li atingis tiun celon.

En la jaro 1969 la fondinto kaj ĝistiam redaktoro de "Pola stelo" Jan Silhan, pro grava malsano transdonis la redaktoradon al Jozefo Smietanko. Tuj montriĝis liaj ĵurnalistaj kaj literaturaj kapabloj. Komenciĝis dekkvinjara periodo, kiun Smietanko dediĉis senreste al persista, longperspektive planita poresperanta laboro. Tiutempe la estraranoj de PAN Esperanton ne opiniis utila por nevidantoj kaj neglektis tiurilatajn penojn. En tiel malfacila situacio la nova redaktoro starigis konkretajn taskojn kaj celojn por si mem. Unue li devis konvinki la PAN-estraranojn, ke Esperanto estas ne nur privata hobio por li kaj aliaj blindaj samideanoj, sed ĝia lernado estas la plej aplikinda formo de vere intelekta rekapabligo. Laŭ lia instigo ĉiuj blindaj esperantistoj komencis forte emfazi la nepran bezonon disvastigi la ideon de Esperanto en la blindulmedio. Iumomente la ĉefa estraro de PAN povis konstati, ke inter la nevidantoj, precipe intelektuloj, estas rimarkinde multaj esperantistoj. Nur tiam, post seĝjara strebado, individuaj interparoloj, konferencoj, artikoloj, finfine J. Smietanko atingis la unuan gravan sukceson: jen en la jaro 1976 la prezidumo de la ĉefa estraro de PAN aprobis kaj jure konfirmis la statuton de Tutlanda Sekcio de Blindaj Esperantistoj, kies prezidanto fariĝis ĝia kreinto.

La unua sukceso ne haltigis la strebadon. La sekcio deziris ĉiujaran kursoferiadan, por ke la nevidantaj polaj esperantistoj povu profundigi sian lingvokonon. PAN akceptis tion kaj konsentis financi dusemajnan feriadon (komence du-, poste ĉiujare). Pli poste Smietanko akiris ankaŭ financadon de trisemajna pedagogia kurso por prepari nevidantajn esperantoinstruistojn. Estis plene agnoskita la kultura kaj kleriga funkcio de la esperantomovado kiel formo de la plej konvena rekapabligo de nevidantoj. Kun tio ligiĝas konstanta permeso organizi senpagajn esperantokursojn.

Por vigligi la esperantoagadon, en 1979 Smietanko fondis en Varsovio la unuan esperantoklubon ĉe la filio de PAN. Li postulis, ke ĉiuj vojevodiaj kaj kooperativaj grupoj aranĝu similajn klubojn kaj tiuj tenu vivajn kontaktojn inter si.

La integriĝon de blindaj al vidantaj esperantistoj Smietanko konsideris grava elemento por pligrandigi la valorsenton en la samsortanoj. Li mem neniam neglektis kultivi la kontaktojn kun vidantaj samideanoj, partoprenante ĉiujn oficialajn kunvenojn, kongresojn kaj simplajn klubajn renkontiĝojn. Akorde kun tio, dum deko da jaroj li pretigis por la esperantosekcio de Radio Polonia dekkelkminutajn mesaĝojn pri la vivo, laboro kaj atingoj de la polaj nevidantoj.

Estas lia merito, ke oni surbendigis gravajn verkojn esperantigitajn ("La Faraono", "Quo vadis").

Ekde la momento kiam Smietanko fariĝis la redaktoro de "Pola Stelo", lin gvidis la ideo transformi la revuon el soci-politika en soci-kulturan. Tiu modifo ebligis plivalorigi, pliriĉigi la enhavon. Li evitis la strikte politikajn informojn, anstataŭigante ilin per artikoloj prezentantaj kulturajn kaj sciencajn novaĵojn. Rezulte rapide kvarobliĝis la nombro de la legantoj, la revuo fariĝis legata en 41 landoj, en kvin kontinentoj. Necesas substreki, ke J. Smietanko ne estis aligita al la ĝenerala redakcio de la pola brajlogazetaro. Li laboris sen aldonaj privilegioj, redaktis la revuon en sia propra, unuĉambra loĝejeto, kiu servis ankaŭ kiel loko por renkontiĝoj kun landaj kaj eksterlandaj samideanoj, multaj amikoj kaj eĉ oficialaj gastoj.

Sed la plej ambicia revo, por kies realigo J. Smietanko dediĉis multe da pripensoj, leteroj kaj interparoloj, estis aliĝo de la polaj nevidantaj samideanoj al la internacia organizo de blindaj esperantistoj, LIBE. Surbaze de konsiloj kaj apogo de eksterlandaj amikoj, li fine solvis la problemon. La ĉeestantoj de la 51-a, budapeŝta kongreso de blindaj esperantistoj vidis lin grave malsana, sed ĉiumomente preta batali kaj argumenti, ke tiu aliĝo profitigos ne nur polajn kaj diversnaciajn esperantistojn, sed eĉ LIBE mem. Dum tiu, por Pollando historia, budapeŝta IKBE en 1983, la LIBE-anoj decidis agnoski la senpagan havigadon de "Pola Stelo" kiel financan kontribuon al la blindulesperantista movado. Per la aliĝo de Pollando kiel la unua orienta asocio, LIBE pligrandiĝis je 150 fervoraj, aktivaj, al la esperantoideo sincere sindonaj polaj membroj. La supre priskribita evento estis la lasta sukceso de Jozefo Smietanko. Ĝi fierigis lin kaj pribrilis lian lastan jaron.

Kiel blindulo, li dediĉis la tutan duan parton de sia vivo por plibonigi kaj plinobligi la ekzistadon de siaj samsortanoj, uzante tiucele Esperanton. La 5-an de novembro 1984 mortis la homo, kies historian signifon por la esperanto-movado perceptas ankoraŭ ne ĉiuj el liaj multaj posteuloj. Jozefo Smietanko, la patrioto, homo modesta kaj dignoplena, prezentis humane pacan vivsintenon, konforman al la esperanto-idealo. Liajn atingojn surkampe de la esperanto-movado Pola Esperanto-Asocio aprezis, aljuĝante al li la dignon de Honora Membro de PEA, samtempe honorigante lin per la distingilo "Merita esperantisto". Liajn meritojn por la polaj samsortanoj la ŝtataj kaj asociaj aŭtoritatoj rekonis per Kavalira Kruco de la Ordeno de Renaskiĝo de Pollando.

ZOFIA SOROKA

SOVETUNIO

Pjotr Vasiljeviĉ Gorĉakov (1915–1979)

Tiu rusa esperantomovadano, ŝakisto, muzikisto, radioamatoro, blindul-asocia aktivulo, gvidinto de multaj esperantokursoj por blinduloj, estis naskita la 10-an de januaro 1915 en Siberio, proksime al la fama lago Bajkal. Okjara, pro meningito li preskaŭ tute perdis la vidpovon. Li fariĝis radioamatoro jam 12-jara, mem konstruanta siajn aparatojn.

Nur en la jaro 1931 li venis en la blindullernejon de la ekstremorienta urbo Svobodnij. La Internacian Lingvon li ekkonis tie, en 1932. Al sia amiko, Masenko, pri tio li skribis pli poste, rememorante: "Mia instruisto estis Ivan Kiriloviĉ Kalaŝnikov. Li estis esperanto-entuziasmulo kaj ofte konversaciis kun ni. Li ebligis al ni legadon de Esperanta Ligilo kaj baldaŭ mi korespondadis kun samideanoj el dek landoj."

En 1933 li estis akceptita en la leningradan blindulprofesian lernejon, kaj en 1937 sekvis sukcesa eniro al la fama Pedagogia Instituto de Gercen. Dum du jaroj (1936–1937) li estis prezidanto de la organizaĵo de la leningradaj blindaj studentoj.

Esperanto interesis lin pli kaj pli. Tion montras, ke en tiu tempo li havis jam ĉ. 30 korespondantojn, estis regula leganto de esperantogazetoj, fervora aŭskultanto de esperanto-elsendoj de la leningrada radio, kaj viglajn kontaktojn li havis ankaŭ kun vidantaj samideanoj. Ĉiam volonte li akceptis esperantistojn el aliaj urboj, zorge preparante la renkontiĝojn inter ili kaj la leningradanoj. Signifaj estis por li ekzemple renkontiĝoj kun Eroŝenko (ĉe ŝaktabulo) en Leningrado (1938) kaj en Moskvo (1948). En 1958, okaze de leningrada leĝeratletika konkurso por blindaj junuloj el socialismaj landoj, formiĝis vera esperantorenkontiĝo kun la pola Jan Silhan, la ĉina Huang Nai kaj la rumana Dumitrescu.

Dum longaj jaroj la soveta reĝimo konsideris Esperanton suspektinda, burĝe kosmopolita, malamika al la proletara internaciismo (kvankam Lenin mem aliopiniis siatempe), sed en la kvindekaj jaroj la situacio pliboniĝis. Tiam s-anoj Verbickij, Gorĉakov kaj Ŝiŝa fondis grupon, kies celo estis reaktivigi la esperango-agadon. Ili publikigis artikolojn en porblindulaj revuoj, serĉis malnovajn blindajn esperantistojn kaj klopodis varbi novajn. Rezulto estis, ke oni eldonis en brajlo esperantolernolibron de Devjatnin, poste tiun de Sergejev.

Dum la lastaj jaroj de sia vivo s-ano Gorĉakov, pro malsano kaj pro familiaj malfacilaĵoj, malpliaktiviĝis en la movado, sed li ĉiam restis fidela esperantisto kaj bonkora amiko. Li mortis pro kormalsano, en la jaro 1979.

Miĥail Ivanoviĉ Verbickij (1904–1986)

Perdinte la vidpovon en sia 16-a vivjaro, li venis en la blindullernejon de Saratov. Ekde 1926 li estis studanto en la porblindula muziklernejo en Leningrado.

Verbickij konatiĝis kun Esperanto jam en la saratova blindullernejo, en 1922, dank'al la vidanta N. Ĵimskij, kiu organizis tie esperantorondeton. Tiel la blinda junulo tuj havis kontakton ankaŭ kun vidantaj esperantomovadanoj.

Veninte al la leningrada muziklernejo – kie li renkontis junan blindan esperantistinon, Zinajda Jakovleva (poste Ŝamina) – li aliĝis al la esperantoasocieto de blinduloj kaj ankaŭ al tiu de vidantoj. Baldaŭ li fariĝis membro de la leningrada urba esperantokomitato, kadre de kiu li plenumis propagandan agadon inter la blinduloj, ĝis organizi esperantokursojn.

La vidantaj amikoj helpis al Verbickij akiri adresojn de eksterlandaj blindaj esperantistoj. Lia koresponda rilataro fariĝis vere vasta. Letera amikeco ligis lin i.a. al la itala G. Valiani, al la angla P. Merrick kaj, kompreneble, al la sveda H. Thilander. Li ege bedaŭris, kiam tiuj kontaktoj devis interrompiĝi dum la dua mondmilito.

Post la milito Verbickij, kune kun s-anoj Gorĉakov kaj Ŝiŝa, daŭrigis la esperantoaktivadon. En la jaro 1956 ili sukcesis brajle aperigi la libron "Internacia Helplingvo Esperanto" de Andrejev.

La helpema, sperta Verbickij ĉiam entuziasme apogis la unuajn paŝojn de la komencantoj, kiuj turnis sin al li. Tiel Esperanto al multaj sovetiaj geblinduloj donis la eblecon plivastigi sian spiritan vivon kaj pliriĉigi la kontaktojn kun la ekstera mondo. Kiam en 1979 komencantaj blindaj esperantistoj estis organizantaj esperantoklubon ĉe la leningrada porblindula kulturdomo, la veterano Verbickij proponis nomi ĝin "Amikaro", omaĝe al la iama leningrada blindulesperantista asocio, ekzistinta dum la tempo de lia juneco.

Miĥail Verbickij dum multaj jaroj estis la soveta delegito por EL. Tiun funkcion li havis ĝis la jaro 1972, kiam en lian lokon paŝis A. Masenko.

Verbickij estis laboristo, sed dum multaj jaroj li gvidis blovinstrumentan orkestron, prelegis pri Esperanto, kaj ĉiam havis multflankan interesiĝon. Laŭ lia propono oni produktis en Sovetunio interpunktan brajlan skribtabulon. Li estis korespondanto de diversaj brajlaj revuoj. Pro siaj meritoj li estis distingita per multaj medaloj kaj nomumita Honora membro de Tutrusia Blindul-Asocio.

Li mortis pro kormalsano la 12-an de julio 1986.

NADJA ĴUKOVA [1928–2012]

Zinajda Ivanovna Ŝamina: Kiel mi esperantistiĝis (iom mallongigita)

En la jaro 1919 mia familio loĝis en Saratovo. Tiam mi estis 14-jara. Foje mia frato aĉetis ie la libron de Saĥarov "Plena Kurso de la Lingvo Internacia Esperanto". La frato rakontis al mi pri Esperanto kaj proponis, ke ni okupiĝu kune pri ĝi. Mi meditis: kion donos al mi artefarita lingvo? Neniu ja presos en Esperanto librojn por blinduloj, kaj vojaĝi, ĉu mi povos? Certe ne! Kaj mi respondis al la frato: "Anstataŭ okupiĝi pri artefarita lingvo, helpu al mi laŭeble ellerni aŭ almenaŭ konatiĝi kun franca aŭ germana lingvo!". La frato ne diskutis kaj plenumis mian peton. Dum unu jaro mi havis tre malgrandajn sukcesojn. Mi povis eldiri nur kelkajn frazojn kaj memoris nur du-tri gramatikajn regulojn.

En 1921 mi venis Moskvon al infanlernejo, kaj niaj okupiĝoj kun la frato interrompiĝis. Dum unu novembra dimanĉo venis en nian lernejon aktiva vidanta esperantisto V. F. Ĵavoronkov. Li tre interese rakontis al ni pri V. Eroŝenko, kiu nian lernejon forlasis kelkajn jarojn antaŭ mia alveno. Dank' al Esperanto Eroŝenko plenigis sian vivon per interesa enhavo kaj donis grandan utilon al la homaro. Ni volis imiti lin kaj petis, ke Ĵavoronkov dediĉu al ni iom da tempo. Li konsentis. Ĉiun dimanĉon matene ni lernis diligente Esperanton, malgraŭ multaj malhelpoj (malfavoro de la lernejestro, moko de edukistoj, malsato kaj malvarmo). La dimanĉaj matenoj fariĝis por ni veraj festoj. Malsame ol la franca kaj la germana, la esperantogramatiko estis komprenebla kaj memorebla preskaŭ senstreĉe. La vortoj firme kuŝis en la memoro kaj la prononco ne kaŭzis embarason. La temperaturo en la klasĉambro faladis ĝis nulo, iam eĉ pli malalten, do ni estis vestitaj en peltoj. Dum ni kantis, aŭ la instruisto rakontis, ni kaŝis niajn manojn en la manikojn. Tamen ni devis multe skribi, ĉar ni havis nek lernolibrojn, nek vortarojn. En majo 1922 ni sukcese ekzameniĝis.

La 26-an de marto 1926 Ĵavoronkov organizis por ni la unuan aŭskultan de moskva radioelsendo en Esperanto por eksterlando. Post la koncerto oni anoncis, ke la 4-an de majo lernantoj de la moskva blindullernejo rakontos pri sia vivo, pianludos, kaj kantos en Esperanto. Tiam ni komencis fervoran laboron: ni instruis al aliaj infanoj prononci kaj kanti en Esperanto. Niaj instruistoj kontentis pri la junaj helpantoj, kaj la esperantokomisiono kun plezuro atestis, ke la prononco de la tuta koruso estas sufiĉe bona.

Dum la lernojaro 1924–25 mi jam estis studentino de la moskva muziklernejo de blinduloj. S-ano Ĵavoronkov ankaŭ tie organizis esperantorondeton. Mi vizitis la lecionojn por komencantoj kaj helpis al ili. Oni elektis min grupestrino. La

instruistoj de la muziklernejo certe ne kredis pri la utilo de niaj okupoj, sed ne malhelpis nin. Nian kunvenejon, la koncertejon ĉiutage vizitis ankaŭ vidantaj esperantistoj.

En 1925 restadis en Moskvo blinda esperantistino el Ĉeĥoslovakio, Emilie Suchardová, por partopreni la kongreson de Komunisto Internaciano. Ŝi kelkfoje vizitis ankaŭ nian lernejon. Tiam la unuan fojon mi parolis kun iu el eksterlando sen tradukisto, kaj eĉ mi mem servis al ŝi per tradukado. Suchardová ĉeestis ankaŭ la unuan tutrusan kongreson de blinduloj en aprilo 1925 (tiam eble tradukis por ŝi Eroŝenko). Tiutempe mi ricevis donace de Eroŝenko la lernolibron de prof. Devjatnin, brajle eldonitan de "Amikaro", la leningrada asocio de blindaj esperantistoj.

Aŭtune 1925 nia muziklernejo translokiĝis al Leningrado. Kiel posteajon de "Amikaro" oni organizis tie esperantofakon ĉe la leningrada provinca organizaĵo de blinduloj. (Tiam mi aliĝis al Soveta Esperanto-unuiĝo kaj al SAT (Sennacia Asocio Tutmonda".) Nia aktivado efektiviĝis per eldonado en brajlo de esperantaj lernolibroj, vortaroj kaj permana transskribado de beletraĵoj. Tiutempe mi komencis korespondi en Esperanto. La stenografion mi ellernis dank' al la pola Edmund Sobota, kiu neatendite sendis al mi leteron skribitan en tiu sistemo. Sobota do instruis min simile, kiel oni ofte instruas naĝadon, ĵetante la lernanton tuj en profundan akvon.

En 1928 mi revenis Moskvon. La vivo tie estis pli kaj pli streĉa. Kun unu kamarado mi lernis en la laborista fakultato viduloj – sen brajlaj libroj kaj sen mono por povi pripagi voĉleganton. Ni estis submetataj al helpo de komplezemaj volontuloj. En tiaj kondiĉoj mi ne povis esti aktiva esperantisto; mi nur legis nemultekostajn eldonaĵojn, traduketis EL por nia ruslingva revuo kaj korespondis iomete.

En 1933 mi finis la muziklernadon kaj ĝenerale la studadon. Mi komencis labori por nia blindul-organizaĵo, okupiĝante pri analfabetuloj kaj pri unuecigo de la brajla muziknotacio. Krom tio mi devis "perlabori panon", ĉar tiam ni havis nenian pension. Tamen neniam mi forgesis, ke mi estas esperantistino. Mi provis organizi esperantorondeton por oficistoj de la tutrusa centra blindulestraro, sed ĝi ekzistis nelonge.

LAŬ REMEMORO EL 1978

SVEDIO

Varma Thilander Honora Prezidantino de LIBE (1899–1986)

Ŝi estis ne nur fidela edzino kaj utila helpanto de Harald Thilander, sed elstara personeco, kiu per siaj kvalitoj okupas gravan lokon en la historio de la esperantomovado inter la blinduloj.

Varma Elisabet Järvenpää naskiĝis la 1-an de majo 1899 en sudokcidenta Finnlando. Perdinte la vidpovon en frua infanaĝo, ŝi venis al la blindullernejo en Helsinko. Ŝi elektis la masaĝistan profesion kaj laboris en ĝi kelkajn jarojn.



Foto Synskadades Museum

Frue ŝi venis al kontakto kun Esperanto, kiun ŝi vere alproprigis al si. Ekde 1922 ŝi verkis inaŭgurajn paroladojn al pluraj internaciaj kongresoj. Ŝi tre volonte sin esprimis en Esperanto per poema formo. En 1929 aperis ŝia brajle eldonita poemaro "El mia kantelo" sub la fraŭlina nomo Varma Järvenpää (Kantelo estas finna popola kordinstrumento). Eble ne temas pri granda poezio, sed pri amplene esprimitaj pensoj pri naturo, amo, sopiro kaj internaciismo.

Kiam Harald Thilander subite perdis sian unuan edzinon, Karin [Höjer 1864–1927], kiel helpo en la hejmo kaj presejo en Stocksund venis Varma. Baldaŭ ŝi tute transprenis la lokon de s-ino Thilander. Pro la kreskanta aŭdodifekto de Harald Thilander Varma pli kaj pli fariĝis la necesa kontaktpersono kun la ĉirkaŭmondo. Ŝi skribis per fingroj brajlajn signojn en lian manon.

Mi kun granda plezuro memoras mian tempon kiel dungito en Stocksund (la dungitoj loĝis en la hejmo de gesinjoroj Thilander). Precipe mi memoras dummanĝajn interparolojn, en kiuj plene partoprenis redaktoro Thilander, pere

de la rapidaj fingroj de Varma. Ŝia ĉiutaga laboro disvolviĝis jen ĉe la stereotip-
aŭ presmaŝino, jen en la kuirejo aŭ ĉe la telefono. Ŝi estis tiu, kiu devis akcepti la
puŝojn, kiujn ĉiu entrepreno kelkfoje devas toleri. Ŝi estis granda idealisto, sed ĉe la
flanko de Thilander eble ŝia realismo devis ludi pli grandan rolon.

En la relative vigla esperantomovado dum la tridekaj kaj kvardekaj jaroj Varma (kio
en la finna lingvo signifas "certa") estis certa centro de la blindaj esperantistoj. Ŝi
verkis etajn teatraĵojn por la klubaj vesperoj, kiuj ofte okazis en la unu-nura ĉambro
en ŝia hejmo neokupita de la presejo.

Post la morto de Harald Thilander en 1958 Varma daŭrigis lian verkon, kiu nun
fariĝis ankaŭ ŝia vivoverko. Ĝis la mezo de la sepdekaj jaroj ŝi daŭre sidis, fine tute
sola ĉe sia maŝino. En 1978 ŝi vendis la grandan domon kaj transloĝiĝis al duĉambra
loĝejo. Tie ŝi loĝis nur dum du monatoj, kiam apopleksio subite transformis ŝiajn
lastajn sep jarojn. Ŝi tamen konservis sian plenan konscion ĝis la fino.

Varma Thilander mortis la 6-an de januaro 1986. Je la enteriga ceremonio la ĉerko
estis kovrita per pluraj florbukedoj, unu kun la teksto: "De amikoj ĉirkaŭ la tero
pere de Ligo Internacia de Blindaj Esperantistoj". La bukedon ornamis verdaj
rubandoj.

BIRGER VIGGEN [1930–2000]
(ESPERANTA LIGILO 2/1989)

Postparolo

La ideo pri la aperigo de ĉi tiu, tria volumo naskiĝis lige kun la centjariĝo de
Esperanto (1987). Pro diversaj, ĉefe teknikaj kialoj, ni tamen notas jam la jaron
1990. Sed la historio de la Esperantomovado inter la blinduloj eĉ nun, kompreneble,
ne finiĝas, eĉ se ĉe tiu ĉi punkto la kronikon ni lasas nun nedaŭrigita. La sperta
kuntempulo ĉiuokaze povas havi iom da mankosento, kaj eble prave.

Esperantujo ja ne estas nur tombejo de iamaj meritplenaj batalantoj por nia
afero. Ĝi estas lando viva, plena de ordinaraj homoj, kiuj utiligas Esperanton por
plenumado de siaj ĉiutagaj taskoj aŭ por realigado de siaj personaj interesoj aŭ
hobioj. Inter ili vivas homoj, kiuj ankaŭ sentas la devon iom antaŭenpuŝi nian
aferon. Ili klopodas konvinki siajn konatojn pri avantaĝoj de la Lingvo Internacia,
pri eblecoj de ĝia praktikado en la civila vivo, pri ĝia Interna Ideo, celanta al
forigo de la baroj inter la popoloj. Ili tamen estas personoj, kies agado ne estas
ankoraŭ finita. Ili ankoraŭ povas malsukcesi, ili povas ne plenumi tion, kion oni

de ili atendas, ili ankoraŭ povas eĉ forlasi niajn vicojn. Ilian nefinitan vivon oni ne povas ankoraŭ taksi kun definitiva valideco. Sed ĉu oni tial silentu pri ili? Sen ilia agado ja estus morta ankaŭ la heredaĵo de la mortintaj eminentuloj, estingiĝus la torĉoj, kiujn la antaŭuloj ekbruligis. La situacion komplikas, ke pri la agado de la nuntempaj aktivuloj intencas raporti ni, kies agadon oni ankaŭ ne povis jam fintaksi ĉe nia tombo. Ni tamen kuraĝu tion entrepreni, kun ĉiuj riskoj de tia klopodo. Kio rajtigas nin? Eble iom pli la amo al nia komuna afero, ol la efektivaj kapabloj. Nin gvidas la estimo kaj admiro ankaŭ al la nuntempaj pioniroj.

Do, kvankam ne laŭ objektivaj mezuriloj nur laŭ niaj nesufiĉaj scioj, ni provu denombri kelkajn karakterizajn personecojn el tiuj, kiuj daŭrigas la vojon kondukantan de la pasinteco al estonteco de la blindulesperantista movado. Senkulpigu nin tiuj, kiujn ni en modesta kadro de ĉi tiu postparolo taksas ne tute laŭ iliaj meritoj, kaj tiuj, kiuj (ne pro malestimo sed pro nescio) eĉ ne eniris en ĉi tiun kvazaŭ fotajon de momento.

Multaj el la blindaj esperantistoj surprenas plurspecajn sociajn taskojn. Temas pri tipo, kiu sentas ĝeneralan respondecon pri la kunhomoj, samsortanoj, samprofesianoj. Unu el tiuj sindonemuloj estas la angla s-ano John Wells. Tiu nun emerita muzikpedagogo dum sia aktiva periodo havis multajn fakajn kaj blindulasociajn funkciojn, sed Esperanton li ĉiam konsideris aparte grava. Tri jarojn (1986-89) li deĵoris kiel vicprezidanto de LIBE. Kiam en 1989 IKBE estis okazonta en la anglia Brajtono, li rekonis, ke en la aktuale ne tro vigla landa blindulesperantista medio lia tasko estas organizi la kongreson. Kun sia edzino, Kay, li tion faris kun vera zorgo.

Al Harald Rader, la fondinto (1962) kaj ĝisnuna prezidanto de ALBE (Aŭstra Ligo de Blindaj Esperantistoj), krome iniciatinto kaj daŭra redaktoro de la songazeto "Heroldo el Aŭstrio", la kongresemuloj dankŝuldas ankaŭ pro organizo de tri Internaciaj Kongresoj de Blindaj Esperantistoj en du jardekoj (Vieno 1970, Stubenberg 1976 kaj 1986).

La bulgaran blindulesperantistan movadon nuntempe plej altnivele reprezentas Todor Ŝoŝev [1918–1991]. Li estas verkanto de esperantlingvaj poemoj, krome fondinto (1985) kaj ĝisnuna redaktoro de la revuo "Esperanta Fajrero". Ĝi donas interesajn informojn precipe pri la vivo de la bulgaraj blinduloj.

En Ĉeĥoslovakio daŭre aperas unu el la plej malnovaj esperantorevuoj, la brajle aldonata "Auroro". Ĝia aktuala redaktoro estas Jiří Vychodil [1940–2012]. Ĉiu jare li pridonacas la legantojn per valora literatura suplemento kaj per plaĉa kalendareto. Laŭ la instruiteco s-ano Vychodil estas muzikinstruisto, kaj ties fruktojn, la ĉiam

subtilajn kaj vere altnivelajn fortepianajn interpretojn oni povis admirari jam dum pluraj blindulesperantistaj kongresoj.

Parolante pri "Aŭroro" ne eblas ne mencii ankaŭ alian nomon, kiun de la vidanta samideano Vuk Echtner [1905–1994] . Ok jarojn post la fondiĝo, en 1928 li transprenis la redaktadon de la revuo, kaj tiun agadon li plenumis dum longega tempo, ĝis 1975. Kiel redaktoro de "Aŭroro" li fariĝis gvida spirito de la ĉeĥa blindulesperantista movado. Li prilaboris duvoluman Esperanto-ĉeĥan brajlan vortaron; dum kelkaj jaroj li eldonis brajle "skriban kurson de Esperanto". Per intensa memstudado li ellernis la lingvojn germanan, anglan, francan, hispanan, rusan kaj eĉ la nederlandan. 50-jara li finis altlernejan pedagogian studon kaj fariĝis instruisto de viddifektitaj gejunuloj. Kiel pensiulo li nun brajligas lernolibrojn pri fremdaj lingvoj por la blindul-biblioteko en Prago. Per sia redaktora laboro li servis ne nur al ĉeĥoslovakiaj blindaj samideanoj, sed al la nevidantaj esperantistoj en la tuta mondo, kie "Aŭroro" estas legata.

La plej elstara figuro inter la nuntempe aktivaj blindaj esperantistoj sendube estas prof. Raymond Gonin [1913–2002] el Francujo. Depost la morto de H. Thilander (1958) li estas la redaktoro de la ĉiam inde altnivela "Esperanta Ligilo". Sed li jam pli frue enskribis sin en nian historion: Li apartenas al la fondintoj de Ligo Internacia de Blindaj Esperantistoj (1951). En ĝi li postenis jam kiel sekretario kaj poste, dum longa periodo kiel prezidanto. Ankaŭ nuntempe li apartenas al la LIBE-estraro. Li estas unu el tiuj, kiuj sentas grandan respondecon pri nia mirinda heredaĵo, pri la brajla sistemo kaj kulturo. Ni menciu almenaŭ, ke – kune kun sia edzino kaj adekvata kunulo, Jacqueline – li esperantigis la gravan libron "La vivo kaj la verko de Louis Braille" de Pierre Henri. R. Gonin estas celkonscia pedagogo, verkinto de pluraj esperanto-lernolibroj.

"La Blinda Esperantisto" estas oficiala organo de EBLOGO (Esperanto-Blindul-Ligo de Germanujo). Depost 1979 ĝin redaktas Karl-Heinz Hoffmann. Li aktive partoprenis la preparadon de Internaciaj Kongresoj de Blindaj Esperantistoj en Rheinbreitbach (1967), en Hamburg (1974, kiam li estis la ĉeforganizanto) kaj en Augsburg (1985; tiam ĉefrolis Theodor Speckmann).

En Italio la esperantomovado inter la blinduloj daŭre prosperas. Dum kongresoj preskaŭ ĉiam la itala grupo estas la plej granda. El la simpatie unueca landa agado eble tamen speciale elstaras du geedzaj paroj: Carla [forpasis en februaro 2009] kaj Pier Luigi Da Costa kaj prof. Aldo Grassini kun Daniela Bottegoni. Inter la esperantobrajlaj revuoj nepre menciindas "Itala Ligilo", per eminenta lingvaĵo redaktata de ges-roj Da Costa.

Unu el la nuntempaj jugoslaviaj aktivuloj en nia movado estas la kroata Tomislav Karlović [1924–2007]. Inter 1983–86 li estis vicprezidanto, dum la tri postaj jaroj prezidanto de LIBE. Ekde 1974 li estas prezidanto de KUNE (Kroata Unuiĝo de Nevidantaj Esperantistoj).

Adam Goralski [1912–2005] nomas sin mem trilandano. Sian vivon li dividas inter Pollando, Venezuelo kaj Kanariaj Insuloj (Hispanio). Jam dum relative mallonga tempo (li ja ellernis la internacian lingvon maturaĝe, en 1977) li akiris famon kaj en la interblindula kaj en la ĝenerala esperantomovado. Por la internacia blindulesperantista amikaro li estas vaste konata per sia songazeto "Inter Ni Blinduloj", kiun li produktas depost 1982, helpe de sia oferema edzino, Krystyna. En la sama jaro s-ano Goralski iniciatis kaj per 15 000 dolaroj kontribuis al la kreiĝo de la esperanto-kulturfondaĵo Antoni Grabowski, por premii verkemajn esperantistojn.

Nederlando apartenas al la plej firmaj fortikaĵoj de la esperantomovado ankaŭ inter ni, blinduloj. La prestiĝan blindulesperantistan revuon "La Kontakto" nun daŭre redaktas Jaap Wieringa.

Al la ĉefaj kontribuantoj de "La Kontakto" apartenas i.a. Nora Moerbeek [1930–1998]. Sed ŝia signifo en nia movado estas pli granda ol tio: de jaroj ŝi zorge administras la oficialan organon kaj la libroservon de LIBE. Al ŝia prizorgado dankendas ankaŭ la sona versio de gravaj esperantorevuoj kiel "Esperanto", "Monato" kaj lastatempe "IPR" (Internacia Pedagogia Revuo). En 1988 kadre de belartaj konkursoj de UEA ŝi (sub la nomo N. Bartels) gajnis la premion "La Esperanto-libro de la jaro), pro Esperantigo de la verko "Anne Frank vivas inter ni".

Prof. Otto Prytz (Norvegio) estas faka lingvisto, leksiisto pri la hispana lingvo ĉe la universitato de Oslo. La aktuala prezidanto de LIBE apartenas al nia movado depost 1959, la unua IKBE por li. Li estis la ĉeforganizanto de la blindulesperantista kongreso en Oslo 1977. Paralele kun sia LIBE-posteno li estas vicprezidanto de Norvega Esperantista Ligo. Li do estas konata ankaŭ en la ĝenerala movado. Dum Universalaj Kongresoj oni ofte aŭdas lin pledi por korekta uzo de Esperanto. En la ĝenerala esperantogazetaro oni povas legi plurajn liajn studojn lingvistikajn.

La posteulino de Jozefo Smietanko kiel redaktoro de la revuo "Pola Stelo" (vd. la koncernan artikolon) fariĝis Irena Varró (antaŭe Lowińska). Oni povas diri, ke dum ŝia redaktado "PS" iĝis vera forumo kaj instigilo por la komencantoj. Krom zorgi pri la riĉe varia enhavo, por la redaktorino grava principo estas kiel eble plej ekonomie utiligi la paĝojn de la revuo. Ĉio ĉi klare montriĝas en la numeroj depost la jaro 1985.

La alian parton de la Smietanko-heredaĵo, tiun de la prezidanto, alprenis Zuzanna Jankowska. Iom estas ankaŭ ŝia merito, ke ĉi tiu libro povis efektiviĝi.

Inter la sovetiaj blindaj esperantistoj nuntempe la plej agema movadano verŝajne estas Anatolij Masenko, la landa delegito ĉe LIBE kaj EL, individua membro kaj fakdelegito de UEA. La rapida disvastiĝo de Esperanto inter niaj samsortanoj en la Rusa Soveta Socialisma Respubliko okazas laŭ lia iniciato kaj helpo. Dum la jaroj 1964-68 li publikigis brajlan manskribitan esperantobultenon kun la titolo Porblindula Informilo, kiu de la sepdekaj jaroj transformiĝis je rondiranta sonbendo, titolita "Amika Rondo". Ekde 1976 s-ano Masenko redaktas esperantorubrikon en la porjunulara brajlogazeto "Soveta lerneĵano", en kies kadro unue aperis 20-leciana kurso de Esperanto. Tiu kurso en 1987 eldoniĝis ankaŭ en voluma formo.

La svislanda Giovanni Antonio Pellanda [1910–2006] apartenas al la plej aĝaj el la nun vivantaj blindaj esperantistoj. Li esperantistiĝis en la jaro 1955, kaj kune kun sia edzino ili fariĝis fervoraj adeptoj de nia afero. Li estas fondinto de Sune (Svisa Unuiĝo de Nevidantaj Esperantistoj). Dum multaj jaroj li prizorgis la presadon kaj dissendadon de Esperanta Ligilo. 16 jarojn li kompilis la unuan internacian porblindulan songazeton "Amika Voĉo", kies enhavo profitis el la esperantaj elsendoj de la svisa radio. En 1965 (Gwatt) kaj en 1979 (Luzern) li aranĝis la Internaciajn Kongresojn de Blindaj Esperantistoj.

Jen nur manpleno da figuroj, kiuj iel reprezentas la nunan staton de la blindul-esperantista movado. Kiel ni diris pli frue, la bildo certe ne estas kompleta. Estas ankoraŭ multaj inter ni, sen kies kontribuado nia afero multe malpli progresus. Dankon al ili!

R. KRCHŇÁK [1905–1996] (ĈEĤIO) KAJ
A. VARRÓ (HUNGARIO)

Kvara volumo (2016)

Historio de la Esperanto-movado inter la blinduloj 1948–2015

Redaktis: Ritva Sabelli

Superrigardo pri la blindulesperantista movado 1948–1989

En la komenco de la dudeka jarcento vojaĝantoj al Esperanto-kongresoj spertis partoprenon en kongreso kiel ekscitan travivaĵon. La internacia lingvo servis kiel komuna lingvo inter la partoprenantoj. Esperanto prezentis unikan eblecon vojaĝi, konatiĝi kun homoj kaj kulturoj el diversaj landoj. Pere de Esperanto oni vastigis la mondon kaj produktis servojn al homoj.

En la 1920-aj kaj 1930-aj jaroj Esperanto funkciis kiel komuna lingvo inter blindulorganizaĵoj. Estroj de blindulorganizaĵoj partoprenis en Esperanto-kongresoj kaj peris sciojn kaj spertojn pri porblindulaj servoj al la kongresanoj. Al Esperanto oni povas atribui la meriton pri funkciigo de la mondvasta kunlaboro inter blinduloj kaj blindul-organizaĵoj. La kunlaboro progresigis la celojn de naciaj blindulorganizaĵoj en kreado de servoj al vidhandikapitoj. Tiam oni parolis en Esperanto-kongresoj pri la samaj temoj, kiujn pritraktas nuntempe la kunvenoj de la Eŭropa Blindul-unuiĝo EBU (European Blind Union) kaj la Monda Blindul-unuiĝo WBU (World Blind Union): edukado, metioj, enlaborigo, aliro al informado, sociaj cirkonstancoj, integriĝo al la socio.

La Internaciaj Kongresoj de Blindaj Esperantistoj (IKBE) okazis kutime en la kadro de Universalaj Kongresoj de Esperanto (UK) samloke aŭ en alia urbo. Kiam UK okazis ekster Eŭropo, la blinduloj renkontiĝis en propra aparta kongreso. Post la 16-a Internacia Kongreso de Blindaj Esperantistoj en Svislando (Bern) en la jaro 1939, la internacia Esperanto-movado dormetis preskaŭ dek jarojn. En la aldono 2 de ĉi tiu libro estas listo de UK-oj kaj IKBE-oj de la jaroj 1905–2015.

Pro la Dua Mondmilito kaj pro registaraj malpermesoj la Esperanto-movado stagnis en pluraj landoj de Eŭropo kaj Orienta Azio. Persekutoj okazis en Germanio kaj en landoj sub Nazi-Germana influo. En Orienta Eŭropo Esperanto silentis ĝis la 1950-aj jaroj. En Hispanio Esperanto restis suspektata ĝis 1947, kaj post 14-jara paŭzo, en 1951 denove okazis kursoj. En Portugalio esperantistaj societoj estis fermitaj en aŭtuno 1936 kaj en aŭgusto 1948 la instruado de Esperanto en

lernejoj estis malpermesita ĝis aprilo 1951. En Soveta Unio la Esperanto-movado ekstagnis en 1937, kaj iom post iom ĝi komencis reviviĝi nur en 1956. Unuafoje post la Dua Mondmilito Soveta Unio estis reprezentita en blindula kongreso en Budapest en 1966. Nur en marto 1979 estis oficiale fondita ASE (Asocio de Sovietiaj Esperantistoj). La fondan konferencon partoprenis ankaŭ du blinduloj – la moskvano Vladimir Sedov kaj Anatolij Masenko el Kislovodsk.

La unua Universala Kongreso de Esperanto post la dua mondmilito okazis en Svislando (Bern) en 1947.

Viddifektitoj organiziĝas

Post dekjara paŭzo viddifektitaj esperantistoj organiziĝas denove. Ligo Internacia de Blindaj Esperantistoj (LIBE) estis fondita en 1951 dum IKBE en Munkeno. Ĝin antaŭis Universala Asocio de Blindaj Esperantistoj (UABE), fondita en 1923 dum la tria IKBE (Nürnbergo, Germanio), kiu en 1931 transformiĝis al UABO (Universala Asocio de Blindulorganizaĵoj). LIBE precipe celas unuigi diverslandajn blindajn kaj viddifektitajn esperantistojn por helpi al ili en studado, perfektigo kaj praktika utiligo de la internacia lingvo.

Laŭstatute, la ĉiujara ĝenerala asembleo de LIBE okazas en kadre de internaciaj kongresoj kaj renkontiĝoj. La laborperiodo de la sep-persona estraro estas kvar jaroj ekde la jaro 1995.

En 1981 LIBE aliĝas al la Universala Esperanto-Asocio (UEA) kaj rajtas nomumi reprezentanton al la komitato, la plej alta decidfara organo de UEA.

Sur la sojlo de la 1950-aj jaroj plifortiĝas la internaciaj kontaktoj de blindulorganizoj. En 1949 en Oksfordo estis fondita Tutmonda Konsilantaro por la Bono de la Blinduloj, TKBB (World Council for the Welfare of the Blind, WCWB). Almenaŭ en la komenco, Esperanto estis la komuna lingvo, samkiel en la organizo IFB (International Federation of the Blind, fondita 1964), kiu antaŭis la eŭropan organizon EBU (European Blind Union). En 1984 en Sauda Arabio (Riyadh) estiĝis tutmonda blindul-unuiĝo WBU (World Blind Union) kaj en Norvegio (Hurdal) eŭropa blindul-unuiĝo (EBU).

La internacia konferenco de nevidantoj okazinta en Oksfordo en 1949 petis, ke Unuiĝintaj Nacioj (UN) starigu ĉe si apartan sekcion por blindulrilataj aferoj. Tiu iniciato realiĝis. S-ro Ernst Jørgensen el Danio estis invitita estri la oficejon. Antaŭe li estis la komuna reprezentanto de nordlandaj blindulorganizaĵoj ĉe la Tutmonda Konsilantaro por la Bono de la Blinduloj.

En la jaro 1954 la internacia lingvo atingas prestiĝan apogon: Unesko agnoskas Esperanton kaj establas konsultajn rilatojn kun UEA laŭ la rezolucio de la Ĝenerala Konferenco de Unesko en Montevideo.

Esperanto-kongresoj daŭre progresigas disvolviĝon de porblindulaj aferoj

Ekde la 1950-aj jaroj la ĉefaj temoj de paroladoj en blindulaj Esperanto-kongresoj estas instruado de Esperanto kaj partopreno en la socio. Rezolucioj de kongresoj admonas blindulorganizaĵojn kaj ŝtatajn registarojn enkonduki Esperanton en blindullernejojn, faciligi enlaborigon de viddifektitoj kaj plibonigi porblindulajn servojn: interalie integriga edukado de viddifektitoj, ekstera informado pri blindulorganizaĵoj kaj Esperanto-movado, konteltiroj en brajlo, valideco de subskribo de viddefektito, vojaĝoj de blinduloj kaj vojaĝrabatoj.

Internaciaj Kongresoj de Blindaj Esperantistoj (IKBE) kaj aliaj internaciaj renkontiĝoj 1948–1989

La konciza superrigardo de IKBE-oj kaj aliaj internaciaj renkontiĝoj dum la periodo 1948–1989 baziĝas sur raportoj aperintaj en Esperanta Ligilo (EL) kaj materialoj en la blindulmuzeo de la Finna Ligo de Vidhandikapitoj. Bedaŭrinde mankas multaj jarkolektoj de EL. EL aperis kvaronjare, sed ekde la komenco de la jaro 1948 denove regule.

Dum la periodo 1948–1989 la Universala Kongreso de Esperanto (UK) kaj la Internacia Kongreso de Blindaj Esperantistoj (IKBE) ĝenerale okazis samloke aŭ en la sama lando, kaj blinduloj partoprenis ambaŭ kongresojn. IKBE-oj plej ofte ricevis ĉ. cent partoprenantojn, kvin IKBE-oj 130–180. La pinto okazis en Varsovio en la jubilea jaro de Esperanto 1987 pro la amaso de orient-eŭropanoj, kiuj facile ricevis enirpermeson al Pollando. La UK kolektis 5 946 esperantistojn kaj IKBE 280.

Kvin fojojn UK okazis ekster Eŭropo (Japanio 1965, Usono 1972, Brazilo 1981, Kanado 1984, Ĉinio 1986). Tiam la nombro de partoprenantoj de IKBE variis de 80 ĝis 122.

Internaciaj renkontiĝoj

La ĉi-sekva superrigardo mencias pri IKBE-oj la kongresan temon, la nombron de partoprenantoj kaj titolojn de prelegoj. La temoj spegulas, kio siatempe estis aktuala inter la nevidantoj. Kompreneble, la kongresa programo enhavis distrajn programerojn, ekskursojn, vizitojn kaj koncertojn fare de kongresanoj mem.

1948

La 33-an Universalan Kongreson de Esperanto en Svedio (Malmö) en la jaro 1948 partoprenis dudeko da blindaj esperantistoj, precipe el Danio, Finnlando, Norvegio kaj Svedio. Pro malfacilaĵoj en akiro de pasporto kaj valuto ne ĉiuj viddifektitaj aliĝintoj povis veni, ekz. el Hungario, Italio, Pollando kaj Francio.

Blinduloj havis tri laborkunvenojn, dum kiuj oni parolis pri revivigo de internacia organizo de blindaj esperantistoj kaj fondo de oficejo de korespondado. Ĉar la internaciaj cirkonstancoj post la milito ankoraŭ ne estis tiel stabilaj, ke eblus eĉ pensi pri progressa agado, oni proponis prokrasti la aferon. Oni decidis lasi la aferon al la antaŭaj funkciuloj de UABO, kaj petis ilin komenci revivigon de la organizo, tuj kiam la cirkonstancoj stabiligĝos.

La afero pri internacia informcentro jam solviĝis, ĉar Otto Backe el Norvegio memstare komencis organizi oficejon.

Okazis ekskursoj al Lund kaj Kopenhago. En Lund kongresanoj vizitis blindullernejon, kiu samtempe funkcias kiel laborejo de blinduloj. En Kopenhago ili konatiĝis kun la agado de la dana blindulligo en ties sidejo. La dana ligo komencis loki blindulojn labori en fabrikoj. En Kopenhago troviĝas teksejoj, kiuj dungas blindulojn. En serurfabriko laboras 15 blinduloj, nur la direktoro kaj oficisto estas viduloj.

En blindullernejo de Kopenhago troviĝas balosalono, kie oni instruas dancadon, ĉar estas konsiderata ke dancoj apartenas al la eduko de moderna homo.

Verŝajne pro la malgranda nombro de partoprenantoj, la kunveno ne estis taksata kiel internacia kongreso de blinduloj.

1949

La 17-a IKBE en Bournemouth, Britio

La malfermo de la antaŭkongreso en Londono okazis en la festsalono de hotelo Royal. Al Esperanto dediĉita televidprogramo estis speciala travivaĵo.

Studvizitoj okazis al blindulrilataj fabrikoj en Londono: fabriko kie preskaŭ cent vidantaj kaj blindaj homoj faras virinajn kostumojn ekde fadeno, fabriko Pelican kie pli ol cent blindaj kaj vidantaj viroj kune faras korbojn, meblojn kaj el moderna materialo, plasto, kombilojn, laborilojn por virinoj, ornamaĵojn, ludilojn ktp.

Aliaj vizitoj okazis al la nacia biblioteko, la plej granda blindulbiblioteko en la mondo kun 280 000 libroj en brajlo kaj al nacia blindulinstituto (National Institute for the Blind, NIB): edukado, esploro, blindulprizorgado; konatiĝo kun skribmaŝinoj kaj stenotipoj, skribtabeloj, sonlibroj kaj aliaj helpiloj. – La blindulinstituto, post kelkaj nomŝanĝoj nomiĝas nun Royal National Institute of Blind People (RNIB).

La blindula kongreso en Bournemouth havis partoprenantojn el 11 landoj. En laborordo estis dudeko da temoj por trakti kaj okazis sep laborkunvenoj. Kiel honoraj prezidantoj de la kongreso elektiĝis W. P. Merrick (Britio) kaj Harald Thilander (Svedio) kaj kiel honora kongresa sekretario d-ro R. Tancredi (Italio).

La kongreso sendis gratultelegramon al la samtempe en Oksfordo kunvenanta blindulkonferenco kun la deziro, ke Esperanto estu ekuzata kune kun la plej grandaj naciaj lingvoj en ĉiuj internaciaj aferoj de blinduloj. Respondo al la telegramo alvenis kvankam malfrue.

Oni decidis estonte publikigi apartan antaŭkongresan numeron de Esperanta Ligilo (EL) por ke ankaŭ tiuj, kiuj ne partoprenas en la blindula kongreso povu samtempe ricevi sciojn pri traktendaj aferoj. En EL aperos ankaŭ aparta rubriko por poemoj kaj tekstoj en mallongigita skribo. Oni decidis preni Esperantan Ligilon kiel unu el la oficialaj ĵurnaloj.

Multon por pripensi vekis la temoj pri forigo de doganaj kaj aliaj transportaj kostoj por helpiloj, kiujn blinduloj mendas el eksterlando: skribmaŝinoj, sonlibroj, metalaj presplatoj kaj similaj. S-ro H. Epstein el Francio estis komisiita prezenti la problemon al la Unesko. Estis decidite kunlabori kun la komitato, kiun la konferenco en Oksfordo eble starigos por progresigi la projekton.

Viglan diskuton vekis ”teoria mono”, iaspeca ”*clearing*-sistemo”, pli regula nacia kaj internacia interagado inter blinduloj kaj vidantoj, ekz. per korespondado, internacia tago de blinduloj, novaranĝo de la alfabeto en la brajla kaj mallongigita skribo de Esperanto.

Prelegoj traktis lingvosciencan, evoluon de blindulprizorgado en Nederlando kaj anglajn masaĝistojn.

Okazis ekskursoj diversloken, ekz. al unu insulo, al Southampton por konatiĝi kun unu el la plej grandaj oceanaj ŝipoj en la mondo (Queen Elizabeth) kaj al la domo de la loka blindul-asocio.

1950

La 18-a IKBE en Parizo, Francio; 45 blindaj partoprenantoj el 13 landoj. La plej fora partoprenanto venis el Maroko.

La malfermo kaj fermo de la kongreso okazis en la universitato Sorbonne kaj la kunvenoj en la domo de militblinduloj. La plej gravaj diskutitaj temoj estis revivigo de UABE kaj fondo de internacia porblindula Esperanto-biblioteko.

Nova okazintaĵo en blindulaj kongresoj estis la Arta Vesperkunveno. Jam dum la antaŭkongreso ĉiuvespere okazis familiaj kunvenoj en la blindula kongresejo, kiuj konigis bonegajn artistojn al la ĉeestantoj. La arta vespero ebligis al ĉiu montri sian plenan kapablon, kaj al publiko ĝui superajn distraĵojn, ĉu muzikajn, ĉu poeziajn. Ĝi okazis en la salonego de Asocio Valentin Haüy.

Raportoj kaj temoj de referaĵoj:

Normal Royal College, John Wells, Britio

Instruado de stenografio, John Wells

Kreado de internacia brajla biblioteko, Et. Bouquin, Francio

Eblecoj de blindulmetio, Meyer, Nederlando

Raporto pri la agemo de Unesko rilate al la brajla sistemo, sendita de W. Percy Merrick, Anglio

Prelego kaj demonstracio pri matplektado, Eryin Horaček, Aŭstrio

Diskutinte pri la restarigo de UABE en iom ŝanĝita formo, la kongreso elektis tripersonan komisionon – A. Baerveldt, Nederlando; Raymond Gonin, Francio kaj Oskari Lehtivaara, Finnlando – por pretigi statutproponon por la ĝenerala kunveno.

La kongreso sendis saluton al la provizora komitato elektita en Oksfordo en 1949 kaj prezentis al ĝi sian insistan peton, ke la komitato bonvole akceptu la internacian helplingvon, Esperanton, kiel la trian oficialan lingvon en la internacia porblindula laboro.

Kongresaj rezolucioj i.a. rekomendas metieblecojn por blinduloj spertitajn en Nederlando kaj Aŭstrio, varme rekomendas al naciaj blindulorgazaĵoj, ke ili akceptu alilandajn esperantistojn en siajn libertempajn hejmojn, samkondiĉe kiel la samlandanojn, kaj ke ili klopodu kun celo starigi vidulan komitaton por helpi al blindulmovado.

Unesko oficiale akceptis la reprezentantojn de la 35-a UK. La blindulkongreson reprezentis ges-roj Harald Thilander kaj s-ro Et. Bouquin. La gastoj ricevis detalajn klarigojn pri la celoj, klopodoj, rimedoj kaj esperoj de Unesko.

Estis ekskursoj al la tombo de Louis Braille en la vilaĝo Coupvray, al porblindula muzikinstituto kaj blindullernejo de Valentin Haüy, al muzeo de instruado de blinduloj kaj al produktaĵoj de parolantaj libroj ĉe la franca unuigo de militblindigitaj.

1951

Kunlabora komitato de nordlandaj blindulorganizaĵoj

Unu el plej gravaj taskoj de la kunveno de kunlaborkomitato de nordlandaj blindulorganizaĵoj okazinta en Norvegio (Oslo) 16.–17.4.1951 estis elekti komunan reprezentanton por la Tutmonda Konsilantaro por la Bono de la Blinduloj (TKBB) starigita en la internacia konferenco en Oksfordo 1949. Ĉar la unua reprezentanto s-ro Ernst Jørgensen el Danio estis invitita estri la blinduksekcion ĉe la Unuigintaj Nacioj, la kunveno elektis kiel lian posteulon ĉe la TKBB s-ron Charles Hedqvist el Svedio kaj vice s-ron Bjarne Mølleby el Norvegio. Konsiderante ke blinduloj kunlaboras internacia sur du linioj, nome inter la blindulorganizaĵoj kaj en Esperantomovado oni decidis sendi laŭvice nordlandan reprezentanton al Esperantokongresoj. Ties tasko estu influi, ke inter tiuj agadlinioj ne estiĝu konfliktoj, kaj por raporti pri Esperantokongresoj al la kunlaborkomitato.

– La nordlanda kunlaborkomitato kunvenis la unuan fojon en 1920, la duan en 1926 kaj post la milito regule, eĉ dufoje jare.

La 19-a IKBE en Munkeno, Germanio; 66 partoprenantoj el 14 landoj

Blinduloj estis gastoj de la bavaria blindulligo kaj loĝis en la domo por studentoj de la munkena universitato. Tio estis ege oportuna aranĝo, ĉar la kongresejo de la Universala Kongreso estis tute apude, en la munkena universitata domo.

La plej grava atingo de la kongreso estis, ke la statutpropono de la statutkomisiono estis aprobita kaj sekve fondita Ligo Internacia de Blindaj Esperantistoj (LIBE). Al la estraro estis elektitaj: G. Vassio (Italio), R. Gonin (Francio), J. Kreitz (Germanio), O. Lehtivaara (Finnlando) kaj A. Baerveldt (Nederlando).

Prelegoj

Nuna stato de la esperanta movado inter la blinduloj, d-ro Vincenzo Musella

La reala kunlaborado inter blinduloj kaj viduloj, d-ro Musella

Blindulmovado en Svislando, raporto sendita de d-ro E. Spahr

Nuna stato de la blindularo en Danio, Poul Glygaard.

Kunlaboro inter nordregionaj landoj, Poul Glygaard

Franca grupo de intelektuloj, d-ro Baussibere (f-ino)

Nuna situacio de la blinduloj en Hispanio, B. Zapater

Raporto pri Brita Asocio de Blindaj Esperantistoj, John Wells, Britio

Blindaj muzikistoj en Germanio, Fritz Karow.

Aliaj diskutitaj temoj estis: internacia blindulafera kunlaboro, katalogo de esperantolibroj, mallongiga brajla skribo, kompletigo de la ĵus eldonita kantareto kaj nova ĝenerala adresaro.

Kongresanoj vizitis la sidejon de la bavaria blindulligo. Tuttaga ekskurso veturigis kongresanojn al Bad Wiessee, al bavariaj alpoj por sperti i.a. ŝnurfervojon ĝis alteco de 1750 m.

1952

Esperanto deviga en jugoslava blindul-instituto

Okaze de la 15-a landa Esperanto-kongreso jugoslava en Ljubljana, la blinduloj en sia kunveno decidis disvastigi Esperanton inter la landa blindularo. Konforme al tio la blindul-unuiĝo en Beograd ekinsistis ĉe la kompetentaj instruistoj, ĝis fine la porkultura ministerio de la popola respubliko Serbio la 15-an de januaro 1952 eldonis permeson pri fakultativa instruado de Esperanto en la blindul-instituto en Zemun. Por la lernantoj, kiuj sin anoncas por lerni la internacian lingvon, ĝi fariĝas deviga kaj la noto pri sukcesa ekzameniĝo estas notata en atestilo. La lernado de Esperanto fariĝis deviga por ĉiuj lernantoj de la kvara klaso elementa ĝis la kvara

klaso de la gimnazio. Blinda samideano Vladislav Stefanoviĉ, instruisto en la blindul-lernejo, dekrete fariĝis preleganto, lektoro de Esperanto.

La 20-a IKBE (1952) en Oslo, Norvegio; ĉ. 100 partoprenantoj el 10 landoj

En la 37-a Universala Kongreso de Esperanto (UK) partoprenis 1 600 esperantistoj. Konsiderinde multaj norvegaj kaj alilandaj blinduloj asistis en la programo. Dimanĉan diservon kreis du blinduloj, pastro Ragnvald Overvoll, ĉefsekretario de la Orientlanda Ligo de Norvegaj Blinduloj, kaj la fama preleganto, orgenisto Geburg Aasland. En la programo de t.n. distra vespero en la kinoteatro Colosseum prenis grandan lokon ankaŭ blindaj norvegaj artistoj. Ankaŭ la Arta vespero en Colosseum fariĝis grandioza sukceso, manifestacio de la arta povo precipe de finna kaj norvegaj senviduloj.

En la universitato, la kongresejo de la UK, prelegis d-ro Vincenzo Musella, Italujo pri la temo "Kiasence la okulkuracisto Zamenhof, per sia Esperanto malfermas ĉiuloke kaj ĉiutempe, sennombrajn okulojn?"

En la festsalono de la Urbodomo okazis la urba akcepto kaj la balo – grandioza festo por preskaŭ dumil kongresanoj, kun manĝaĵoj, trinkaĵoj kaj dancado.

La blindula kongreso okazis en la lernejo Fjellhaug. Estis aprobitaj interna regularo de LIBE kaj kongresa regularo, verkitaj de la provizora komitato. La kongresanoj ricevis kantlibron donacitan de Harald Thilander.

Kiel honoraj membroj de LIBE elektiĝis Harald Thilander (Svedio) kaj W. P. Merrick (Anglio). Estis sendita gratulmesaĝo al reĝo Haakon pro lia 80-jariĝo kaj ricevita lia dankletero.

La temoj de prelegoj estis:

Blindullernejoj en Norvegio, Halvdan Karterud

Edukado en la blindullernejo en Lyon, Raymond Gonin

Vidmalfortuloj en Francujo, Raymond Gonin

Organizaĵo de blindulinstruistoj, Raymond Gonin

Kapabligado de invalideca blinda junularo, Konfidenti, Jugoslavio

Antaŭaj kaj nuntempaj cirkonstancoj de blinduloj en Jugoslavio, s-ro Petar Pesiĉ.

Aliaj diskutitaj temoj estis: Esperanta brajla stenografio, reforma mallongigara propono de Albert Masselier (Francio), rilatoj inter porblindulaj lernejoj

kaj lernejoj porviduloj pere de lerneja presado, surfervoja rabato al blindaj kongrespartoprenantoj.

Estis aprobitaj du rezolucioj:

1 admono sendota al ĉiuj blindullernejoj en la mondo, ke ili enkonduku Esperanton kiel devigan instrufakon. La rezolucio havas nuran celon por intensigi kaj plifaciligi ĉu la interrilatojn aŭ interŝanĝojn de spertoj inter la tutmonda blindularo, por akceli kiel eble plej taŭge la progresadon de la blindulafero. Sur tiu ĉi kampo, nur dank' al Esperanto, tutmonda neŭtrala lingvo, estas atingebla perfekta tutmonda senpera kunlaborado.

2 informo al la Tutmonda Konsilantaro por la Bono de la Blinduloj (TKBB) pri la emo de LIBE kunlabori kun TKBB kaj la deziro, ke TKBB prenu Esperanton kiel korespondan lingvon. Cetere LIBE petas apogon de TKBB por enkonduki Esperanton en porblindulajn lernejojn kaj organizaĵojn.

Ekskursoj okazis en Oslo kaj ĝia ĉirkaŭaĵo: kvaretaĝa domo de Orientlanda Ligo de Norvegaj Blinduloj, kie troviĝas butikoj, laborejoj, oficejoj, loĝejoj ktp. ; Huseby, kie troviĝas ŝtata blindullernejo por elkreskintaj knaboj kaj viroj; Bygdøy-muzeo proksime de Oslo kun ŝipo de norvega polusa ekspedicio kaj la pramo Kon-Tiki, per kiu kvin norvegoj kaj unu svedo faris en 1947 la faman navigadon tra Pacifiko; la feriohejmo Kvikne de blinduloj apud la fjordo ĉ. 40 km de la ĉefurbo.

En la ferma kunsido de la 37-a Universala Kongreso de Esperanto la prezidanto de la blindula kongreso, Halvdan Karterud donis raporton pri la 22-a. Li diris i.a.: ”La partoprenintoj de nia 22-a ricevis senpagan loĝejon kaj matenmanĝon en la Fjellhaug-lernejoj. Tie regis vere familia atmosfero. Estis la Norvega Blindulligo, kiu invitis kaj pagis la plimulton. La ŝtato kaj pluraj privatpersonoj ankaŭ kontribuis. Kiel prezidanto de la blindulkongreso mi kore dankas al UEA, kiu laŭ kutimo donis al ni senpagajn kongreskartojn. Rekomence la blinduloj donis al vi evangelian Luteran diservon kaj laŭpove kontribuis al la arta vesperoj kaj al la prelegoj pri norvega vivo – – ”.

Esperanto ĉe Unesko

”La 7-an de decembro 1952, dum semajna kunveno de la pariza Esperanto-grupo ĉe Sorbonne, s-ro Ralph Harry, delegito de Aŭstralio al la organizo de la Unuiĝintaj Nacioj, parolis perfekte en Esperanto. Jam estas du gravaj esperantistoj ĉe Unesco: s-roj Lionel Elvin kaj Gedchot.”
(Esperanta Ligilo 2/1952)

1953

La 21-a IKBE Zagrebo, Jugoslavio

La rezulto de la definitiva voĉdonado en 1953 ne grave diferencas de la Prepara Komitato: G. Vassio prezidanto, J. Kreitz vicprezidanto, O. Lehtivaara kaj R. Gonin sekretarioj, A. Baerveldt kasisto, s-ino V. Thilander kaj C. Verlinde (Nederlando) konsilantoj. Dum la oficperiodo A. Baerveldt anstataŭgis per P. Wallace (Britio).

1954

La 22- a IKBE en Amsterdam; ĉ. 100 partoprenantoj el 14 landoj

Okazis la unua ĝenerala asembleo (tiam Ĝeneral-Kunveno) de LIBE. Gravaj temoj estis la financa situacio de LIBE kaj la Internacia Esperanto-Brajla Biblioteko (IEBB) ekzistanta en Francio kaj administrata de Serge Gyors.

Okazis demonstracio de nova maŝino por brajla presado kaj jubilea kunveno de Nosobe (Nederlanda Societo de Blindaj Esperantistoj).

Ĝenerala Konferenceo de Unesko en Montevideo 10.12.1954

Unesko agnoskas Esperanton kaj establas konsultajn rilatojn kun UEA laŭ jena rezolucio:

”La Ĝenerala Konferenco, diskutinte la Raporton de la Ĝenerala Direktoro pri la Internacia Peticio favore al Esperanto;

Notas la rezultojn atingitajn per Esperanto sur la kampo de la internaciaj intelektaj interŝanĝoj kaj por la proksimigo de la popoloj de la mondo;

Rekonas, ke tiuj rezultoj respondas al la celoj kaj idealoj de Unesko;

Notas, ke pluraj Ŝtatoj-Membroj informis pri sia preteco enkonduki aŭ ampleksigi la instruadon de Esperanto en siaj lernejoj aŭ superaj edukaj institucioj, kaj petas tiujn Ŝtatojn-Membrojn informadi la Ĝeneralan Direktoron pri la rezultoj atingitaj sur tiu kampo;

Komisias la Ĝeneralan Direktoron sekvi la kurantan evoluon en la uzado de Esperanto en scienco, edukado kaj kulturo, kaj tiucele kunlabori kun Universala Esperanto-Asocio en aferoj koncernantaj ambaŭ organizaĵojn.”

La rezolucio vekis grandan intereson en amaskomunikiloj. Miloj da artikoloj en la tuta mondo informis pri Esperanto kaj Unesko.

”– la Unesko-rezolucio gravege kontribuis al la memfido de la esperantistoj en tiuj postmilitaj jaroj, kiam la movado nur pene kaj palpe renaskiĝis post tiom da detruo kaj persekuto. – ”

(Esperanto n-ro 1284 (10) Oktobro 2014. Rekreskigo de memfido kaj memkono – Montevideo 60 – jaro por festi la atingojn de Esperanto sur la kampoj de edukado, scienco kaj kulturo. Mark Fettes, Barbara Pietrzak)

Ekde novembro 2011 UEA estas konsulta partnero de Unesko.

1955

La 23-a IKBE en Bolonjo, Italio

Ĝenerala asembleo de LIBE ne okazis pro nesufiĉa nombro de ĉeestantaj estraranoj. Okazis kvar laborkunsidoj kun diskutoj pri la projekto havigi Esperanton oficiala lingvo de la Tutmonda Konsilantaro por la Bono de la Blinduloj (TKBB). La rezolucio notas, ke tio tuŝas precipe malgrandajn naciojn, ĝuste tiujn, kiuj havas lingvajn problemojn. Estis decidite admoni landajn blindulorganizaĵojn de malgrandaj landoj fari proponojn al TKBB. Estis ankaŭ rekomendite, ke reprezentantoj de blindulorganizaĵoj de grandaj landoj subtenu tiujn proponojn.

Temoj de prelegoj:

Blindaj instruistoj en porblindulaj lernejoj kaj lernejoj de vidantoj, f-ino Pitacco el Italio; realismo en reklamado de la blindulorganizaĵoj.

Okazis koncerto en la urba teatro, urba akcepto, arta vespero, festrapsodio pri disvolviĝo de Esperanto, tuttaga ekskurso.

1956

La 24-a IKBE en Kopenhago, Danio

Al la kongreso en la reĝa blindulinstituto aliĝis 133 partoprenantoj el 13 landoj.

Okazis ŝakkunveno, kunveno pri ”La parolanta libro” kaj aliaj helpiloj por blinduloj, prezentado de dana solvo, ekspozicio de helpiloj, diskutado pri rolo de Esperanto en blindulaj aferoj, vizitoj en la hejmo por laborkapablaj virinoj kaj en la ŝtata trejnejo por enlaborigo de invalidoj sur la normalan laborkampon, ekskurso al la infanlernejo por blinduloj en Kalundborg kie kongresanoj havis eblecon naĝi kaj ekskurso al la hejmo por surd-blinduloj en Nærum.

1957

La 25-a IKBE en Liono, Francio; 80 partoprenantoj el 16 landoj
La IKBE estis antaŭkongreso de la 72-a Universala Kongreso de Esperanto en
Marseille, Francio.

1958

La 26-a IKBE en Mainz, Germanio; preskaŭ cent partoprenantoj La universitato de
Mainz servis kiel kongresejo. Parto de la blinduloj eĉ loĝis tie.

Temoj de diskutadoj:

Normigo de registriĝrapidecoj de magnetofonoj kaj redaktado de Esperanta Ligilo,
kiun Harald Thilander pro alta aĝo verŝajne devas transdoni al alia redaktoro.

Referaĵoj:

Nuna stato kaj evoluo de la blindulafero en Germanujo, Hans Breitenbach;
Agado de nordlanda kunlaboranta komitato de la blinduloj, Poul Glygaard, Danio;
Memhelpaj organizaĵoj de blinduloj en Aŭstrujo, Robert Vogel; La nuna stato de la
blindulafero en Hungarlando, D-ro Bano Miklos.

Aliaj diskutitaj temoj:

Utileco de la sonbendoj por blinduloj, la sonbendaj bibliotekoj por blinduloj en
diversaj landoj, blindulhelpiloj, raportoj pri la stato de blindulafero en diversaj
landoj, diskutado kaj proponoj.

Okazis fakaj kunsidoj de blindaj oficistoj, muzikistoj kaj ŝakludantoj. Ekskurso
okazis laŭlonge de la valo Rejnaŭalo al la fama Lorelei.

1959

La 27-a en Varsovio, Pollando; 82 partoprenantoj el 15 landoj Laborkunvenoj
traktis plurajn temojn, referaĵoj i.a. pri masaĝo kiel metio de blinduloj plurlande,
muziko kiel metio kaj cirkonstancoj de blinduloj en Pollando. Pri blindulaj metioj,
la situacio en Pollando similas tiujn en aliaj landoj. En Pollando la nombro de
dungitoj en industrio ankoraŭ ne estas ege granda, sed estas kreskanta, same ankaŭ
tiu de telefonistoj. Malnovaj metioj kiel bros- kaj meblofarado kaj masaĝo estas la
plej popularaj.

Studvizitoj okazis al varsoviaj blindulinstitucioj, ekz. al nova fabriko, kiu produktas
diversajn brosojn. En trikejo laboris 19 blinduloj per maŝinoj. Vidantaj invalidoj

plenumis aliajn taskojn. Multaj blinduloj partoprenis en ekskursoj, al Bjalistoko, la naskiĝurbo de D-ro Zamenhof, kaj al la hejmmuzeo de la komponisto kaj pianisto Frédéric Chopin. En la hejmmuzeo la mondfama blinda esperantista pianisto Imre Ungar el Hungario koncertis.

1960

La 28-a IKBE en Bruselo, Belgio

La temoj estis:

La instruado de Esperanto en la blindullernejoj, referaĵo de fraŭlino E.

Woodget, Britio; proponoj kaj rezolucio sendotaj al la tutmonda kongreso de blindulinstruistoj en Hannover, 1961.

La magnetofono kaj la blinduloj

Propagando de Esperanto inter la junaj blinduloj

Okazis kunveno kun la belga societo de Intelektaj Blinduloj.

1961

La 29-a IKBE en Harrogate, Britio

La blindula kongreso okazis en Hotelo Grand kaj pri la aranĝoj respondecis f-ino E. Woodget.

Temoj de prelegoj:

Readaptiĝo de ĵus-blindiĝintoj

Blinduloj en industrio kaj komerco

Edukado de la blinda infano kun mensaj- aŭ aliaj korpaj-difektoj

Laboro kaj celoj de la Ligo de Helpantoj de la Surdblinduloj.

Krom la tradicia Gaja vespero kaj tuttaga ekskurso okazis tiftologia ekspozicio kun prezentadoj pri brajlo kaj magnetofono en la servo de blinduloj.

1962

En 1962 estis fondita Aŭstria Ligo de Blindaj Esperantistoj (ALBE).

La 30-a IKBE en Kopenhago, Danio

La kongreso okazis en la blindula instituto.

Diskutitaj temoj:

Oni parolis pri ebloj de blinduloj akiri laboron en la labormerkato. Estis konstatite, ke en multaj landoj oni sufiĉe bone atingis la celon. Blinduloj laboras ekz. kiel

telefonistoj, stenografistoj, oficistoj kaj muzikistoj. Ankaŭ kiel sendependaj komercistoj kaj negocistoj blinduloj prosperas. Diskuton vekis enlaborigo de blindaj homoj en la libera labormerkato, ekz. en fabrikoj.

Parolinte pri la sekva kongreso oni provis trovi rimedojn instigi gejunulojn partopreni la kongreson en Hago. Kiel instigi Esperanto-instruistojn por ke pere de ili Esperanto estu enkondukata en blindullernejojn?

La distra programo konsistis el ekskurso al kamparo kaj Gaja vespero.

Internacia kongreso de instruistoj de blinduloj, Hannover, Germanio Aŭgusto 1962

La internacia kongreso de instruistoj de blinduloj okazinta en Hannover en aŭgusto 1962 aprobis rezolucion. La rezolucion prezentis Halvdan Karterud el Norvegio en la nomo de LIBE. Ĉeestis 400 reprezentantoj kaj observantoj el 43 landoj.

Kongrue kun la kvina rezolucio de la kunveno de la Tutmonda Konsilantaro por la Bono de la Blinduloj en Romo 1959, kiu agnoskas la internacian lingvon Esperanto kiel efikan rimedon por disvastigi kontaktojn inter diverslandaj blinduloj, kaj rekomendas ke oni konsideru ĝiajn avantaĝojn en internaciaj kaj naciaj organizaĵoj kaj ankaŭ en blindullernejoj la internacia kongreso de instruistoj de blindaj gejunuloj okazinta en aŭgusto 1962 admonas estrarojn de tiuj organizaĵoj kaj lernejoj ĉie en la mondo:

- 1 En la komenco de nova lernojaro komuniki al lernejoj la grandan intelektan valoron de Esperanto precipe por blinduloj, kaj la avantaĝojn, kiujn la studado kunportos,
- 2 Produkti, plejeble novajn lernolibrojn, vortarojn ktp. kaj kuraĝigi studadon de la lingvo kiel gajnigan libervolan studadon, kaj
- 3 En lernejoj, kie estas instruataj fremdaj lingvoj, konsideri mallongan kurson de Esperanto kiel elementan studadon de lingvoj.

1963

La 31-a IKBE en Sofio, Bulgario; 41 partoprenantoj el 11 landoj
Estis aprobita rezolucio pri instruado de Esperanto en la lernejoj de la viddifektitaj infanoj.

1964

La 32-a IKBE en Hago (konferenceto "Overvoorde"), Nederlando;

131 partoprenantoj el 15 landoj

Okazis ŝaka turniro, vizito al blindullaborejo en Rotterdam kaj vizito de la haveno, jarkunveno de Nosobe (Nederlanda Societo de Blindaj Esperantistoj) kaj prelego.

1965

La 33-a IKBE en Gwatt, Svislando; 80 partoprenantoj el 12 landoj

La ĉeforganizanto estis Giovanni-Antonio Pellanda kunlabore kun LIBE-prezidanto Joseph Kreitz. Kun referaĵoj elpaŝis Dirk Schipper (Nederlando) kaj Poul Glygaard (Danlando).

Fakkunsido por blinduloj kaj blindulamikoj en Tokio

Esperanta Ligilo, n-ro 8/1965: Dum la 50-a UK en Tokio kunsidis la japanaj blindaj E-istoj. Ili decidis revivigi sian iaman "Japanan Asocion de Blindaj E-istoj" (JABE) kaj aliĝi al LIBE kaj aboni al EL. Ni esperas, ke baldaŭ ni povos doni pri tio oficialan komunikon kaj adreson de delegito.

El longa letero de s-ro Hideo Imai, de la 22 sept., ni eltiras la jenajn informojn koncerne la kunsidon de niaj gesamideanoj, blindaj kaj blindulamikaj, dum la 50-a UK.

La kunsido okazis la 2-an de aŭgusto matene. Ĝin partoprenis 16 personoj, el kiuj nur 7 blinduloj. Prezidis s-ro Huĉida, kursgvidanto en la rondo de Tokio-fakultato. Post silenta minuto memore al la mortintoj, i.a. al d-ro Yagi, prez. de UEA, kaj kantado de "La espero", Hideo Imai faris salutparoladon. Li bedaŭras, ke neniu alilanda blindulo povis ĉeesti la kunsidon, kaj li ankaŭ bedaŭras la foreston de s-ro Torii, la pioniro de la japana blindula E-movado, pro subita malsano de lia edzino. Iam, post la fondiĝo de JABE (Japana Asocio de Blindaj Esperantistoj), la movado estis tre vigla, kaj Esperanto estis enkondukita kiel deviga lernobjekto en du blindullernejoj en Okajama kaj Ōsaka. Bedaŭrinde, la nuna stato ne atingas la nivelon de la plej vigla periodo, kaj la klopodoj de ĉiuj estas necesaj. Kelkajn tagojn antaŭe la parolanto ricevis leteron el Vjetnamio, kie blindulesperantista movado estas ekkreskanta: tio pravas, ke la malgrandigita mondo bezonas komunan lingvon. Fine la parolanto deziras sukceson al la kunsido.

Malnova samideano Nagamina raportas pri la historio de la blindula E-movado en Japanujo. Sekvis legado de salutleteroj de f-ino Claudette Toro, s-ino Eunice Hughes, Jan Silhan, f-ino Sara Hazen, f-ino Barbara Newberry, Kordyla, Oskari

Lehtivaara, G. Vassio, P. Glygaard. LIBE sendis al la kunveno sonbendon, sed pro bedaŭrinda eraro fare de la poŝto, la bendo atingis s-ron Imai nur post lia reveno el la kongreso.

Dum la kunsido oni faris jenajn ĉefajn decidojn: restarigi JABE-n fonditan en 1914; publikigi kiel eble plej multajn artikolojn pri Esperanto; peti la enkondukon de Esperanto en la blindullernejojn kaj stimuli la aliĝon al JABE; varbi abonantojn por EL kaj membrojn por LIBE, kaj por ebligi tion aperigi informilon; serĉi la helpon de vidantaj Esperantistoj, kaj por tio rilati kun ili, instrui al ili Esperanto-brajlon kaj korespondigi ilin kun alilandaj blinduloj; plialtigi la lingvonivelon de la anoj per multa legado kaj ekzercado; utiligi mondonacon de s-ro Ŝiraki (Nagoja) por eldoni la informilon kaj funkciigi la asocion ĝis la kotizoj sufiĉos.

Oni elektis estraron: prez. Y. Kato, sekr. T. Tanaka, ktp. La kunsido finiĝis per tagmanĝo kaj kantado de "La tagiĝo". Menciinda estas la ĉeesto de tre malnova samideano K. Namba, kiu antaŭ 30 jaroj enkondukis Esperanton en la Okajama-blindullernejon, kaj kiu bone konis la rusan blindan poeton, samideanon Eroŝenko.

1966

La 34-a IKBE en Budapeŝto, Hungario; 101 partoprenantoj el 16 landoj

Unuafoje post la dua mondmilito estis reprezentita Sovetunio.

La 34-a IKBE okazis kiel parto de la 51-a Universala Kongreso de Esperanto.

Dum laborkunvenoj sekvis referaĵoj de:

Jan Kiss pri instruado de blinduloj en Hungarujo

Rudolf Krchňák (Ĉeĥoslovakio) pri la rolo de blinduloj en la muzikhistorio

Arvo Karvinen (Finnlando) pri graveco de sporto por la blinduloj

Jozef Smietanko pri la stato de blindulprotekto en Polujo.

Dum fakaj kunsidoj okazis diskutoj pri:

1 Enlaborigo de blinduloj en diversaj manlaboroj

2 Problemoj de blindaj instruistoj, masaĝistoj kaj telefonistoj.

1967

La 35-a IKBE en Rheinbreitbach, Germanio; 89 partoprenantoj el 15 landoj

Okazis diskutoj pri enregistra de brajlaj libroj en Esperanto, kiuj haveblas en porblindulaj bibliotekoj en diversaj landoj, kunlaboro de LIBE kun aliaj porblindulaj

organizaĵoj, kaj studado de Esperanto en diversaj landoj. Katalogo de brajlaj publikaĵoj en Esperanto estas en preparado.

Krome la kongresprogramo enhavis deklaman kaj oratoran konkurson, prelegojn, ekspoziciojn, ekskursojn kaj konversacian kurson, kiun gvidis franca lerta esperantisto.

1968

Internacia Esperanto-kurso en Helsingør (Danio)

Internacia kurso de Esperanto kun 93 partoprenantoj el dek landoj. Inter la partoprenantoj dudeko estis viddifektitoj el Danio, Finnlando, Norvegio kaj Svedio.

La 36-a IKBE en Madrid, Hispanio; ĉ. 100 partoprenantoj el 9 landoj

La ĉefaj diskutitaj temoj estis instrumaterialo kaj -metodoj kaj havigo de materialo por Esperanta Ligilo kaj ties elspezoj kaj cirkulado. Kongresanoj konatiĝis kun la agado de hispana blindulorganizaĵo ONCE. Okazis referaĵoj pri biblioteko kaj eldonado en Hispanio, ŝakturniro kaj diskutoj pri agado de blindulorganizaĵoj plurlande.

1969

La 37-a IKBE en Helsinko, Finnlando; 105 partoprenantoj el 14 landoj, aliĝis 130 el 17 landoj. Tiuj kiuj ne povis alveni, estis plejparte el orientaj najbaraj landoj.

Antaŭ la kongreso okazis renkontiĝo en Kuopio kaj Rautalampi kun partoprenantoj el dek landoj (394 km norden de Helsinko). Eero Häkkinen, estro de blindullernejo de Kuopio kaj prezidanto de la finna blindulligo, prelegis pri edukado al blinduloj en Finnlando.

Temoj de prelegoj:

Rekapabligo de blinduloj en Finnlando, Kaarlo Virkki, ĝenerala sekretario de Ligo de Blinduloj en Finnlando

Ĉu Esperanto havas estontecon?, Martin Meyer, Svislando

Unuiĝo eŭropa de blindaj laboruloj, s-ro Etienne Bouquin, prezentita de Jacques Charlin, Francio

Elstaraj blindaj virinoj, Rudolf Krchňák, Ĉeĥoslovakio

Feriohejmoj de blinduloj en Finnlando, Raimo Tanskanen

Debato: Esperanto – aŭ ideologia aŭ praktika instrumento?

Okazis vizito en la rekapabla centro Tyyskylä en Siuntio kaj en la kurso por surdblinduloj, ekskurso al Hämeenlinna, kie estis ŝipveturado kaj lunĉo, en Rajamäki konatiĝo kun fabriko de Hellas-Piano kaj regalita vespermanĝo.

La 50-jara jubileo de Steleto, Esperanto-asocio de blinduloj en Finnlando okazis en la blindula feria hejmo en Tuusula. Magistro Vilho Setälä, honora membro de Steleto, parolis pri Kalevala.

– D-ro Vilho Setälä (1892–1985) redaktoro, fotografisto, esploristo, scienca verkisto, multflanka kultura aganto kaj ĉefa gvidanto de Esperanto-movado en Finnlando, aŭtoro de pluraj lerniloj kaj vortaroj.

IKBE okazis en la kadro de la 54-a UK 26 julio–2 aŭgusto 1969.

1970

La 38-a IKBE en Vieno, Aŭstrio; 130 partoprenantoj el 15 landoj

Siajn referaĵojn prezentis:

- 1 Harald Rader pri la blindulafero en Aŭstrio (voĉlegis Hans Breitenbach)
- 2 Hans Breitenbach detale raportis pri la konferenco de Eŭropa Regiona Komitato de la Tutmonda Konsilantaro por la Bono de la Blinduloj, okazinta en la komenco de julio en Kopenhago
- 3 Etienne Bouquin (Francio) elpaŝis kun referaĵo pri la Unuiĝo Eŭropa de Blindaj Laboruloj (UEBLA)
- 4 Karl-Heinz Hoffmann parolis pri la spertoj de EBLOGO (Esperanto-blindulligo de Germanujo) varbanta novajn membrojn inter la blinduloj.

Al la IKBE38 estas dediĉita tuta brajla suplemento al EL, preparita de la kongressekretarioj Th. Speckmann kaj M. Meyer.

Samloke okazis la 55-a UK kun la temo ”Esperanto kiel instrumento de internacia konceptado de la mondo”.

1971

La 39-a IKBE en Londono, Britio; 111 partoprenantoj el 14 landoj, la plej foraj venis el Kanado kaj Israelo.

Dum la kongreso oni parolis pri aktualaj aferoj kaj pri integriĝo kun vidantoj kaj pri eksteraj kaj internaj malfacilaĵoj ĉirilate.

La temo de la samloke okazinta 56-a UK estis "La problemo de lingva komunikado en nuntempa mondo".

1972

La 40-a IKBE en Rimini, Italio; 122 partoprenantoj el 18 landoj

Estis prezentitaj 13 prelegoj kaj okazis diskutoj pri diversaj blindulaferaj problemoj plurlande: pri valideco de signaturo de blindulo en diversaj landoj, agado de porblindula biblioteko en Italio, situacio de viddifektitaj instruistoj en publikaj lernejoj en Italio, situacio de viddifektitaj virinoj en okcidenta Germanio, blindaj muzikistoj en Hungario, transiro al angla kaseda sistemo en Finnlando kaj instruado de informadiko al blinduloj en Finnlando.

Estis aprobitaj kvar rezolucioj al porblindulaj organizaĵoj kaj ŝtataj registaroj: la kongreso postulas pli efikajn agojn koncerne surdblindulojn, viddifektitajn virinojn, enlaborigon de viddifektitoj kaj validecon de signaturo de blindulo.

Krome la kongresa programo enhavis ŝakludon, kvizon kaj tuttagan ekskurson.

La 57-a UK okazis en Usono (Portland) kun la temo "Monda turismo kaj lingva diverseco".

1973

La 41-a IKBE en Beograd, Jugoslavio; 101 partoprenantoj el 11 landoj

La kongreso okazis en studenta hejmo "4 april" en Beograd 24–28 julio.

Prelegoj:

Didaktitaj kaj pedagogiaj valoroj de Balu-sistemo, R. Gonin, Francio

Formoj de enlaborigado de la blinduloj en Pollando, J. Smietanko, Pollando

Problemoj de la revuo "Pola stelo", J. Smietanko

Socialaj rilatoj de la blinduloj en ilia labormedio, P. Kuhtiček, Jugoslavio

Socia sekureco de blindaj intelektuloj en sociala kaj labora juro, F. Mučić, Jugoslavio

Opinioj de enlaborigitaj blinduloj pri socialaj formoj de enlaborigo de blinduloj,

V. Stančić, F. Tonković, G. Zovko, Jugoslavio

Rolo de la sensoj en la spacorientiĝo de la blinduloj, V. Stefanović, Jugoslavio.

Okazis tuttaga ekskurso kaj du artprogrameraj vesperoj: Nacia vespero kaj Arta vespero kiun preparis la familio Gonin.

(Naš Vesnik, n-ro 4.1973, organo de jugoslava blindul-asocio, esperantigis Nedeljka Loĵajiĉ)

La temo de la 58-a UK en Beograd estis "Lingva egalrajteco en teorio kaj praktiko".

1974

La 42-a IKBE en Hamburg, Germanio; 160 partoprenantoj el 20 landoj

Okazis prelegoj pri disvolviĝo de porblindulaj aferoj plurlande, pri laboro de tutmonda blindul-unuiĝo kaj enkondukoj kun diskutoj. La distra programo konsistis el tuttaga ekskurso, vizito en la kulturdomo de loka blindulasocio, teatro.

Samloke okazis la 59-a UK kun temo "Naciismo kaj internacia kunlaboro en nuntempa mondo".

1975

La 43-a IKBE en Kopenhago (Hillerød), Danlando; 64 partoprenantoj el 12 landoj

En la programo estis prezentadoj kaj diskutoj jene: blindulorganizaĵo en Danio, informado al granda publiko, diversaj eblecoj uzi brajlon, integriĝa edukado de viddifektitaj infanoj, ekskurso al la plej moderna blindullernejo de infanoj kaj gejunuloj en Refsnæs en nord-okcidenta Selando (Sjælland) 100 km de Kopenhago. La lernejo prizorgas ankaŭ haveblecon de lernomaterialoj kaj aliaj subtenaj rimedoj por viddifektitoj, kiuj vizitas en publikaj lernejoj. La rektoro alparolis Esperante.

La kongreso aprobis tri rezoluciojn:

- 1 Pri integriĝa edukado la kongreso subtenas strebojn de blindulorganizaĵoj kaj organizaĵoj de instruistoj de blinduloj celantaj al normala partopreno de viddifektitoj en la socio.
- 2 En ekstera informado la kongreso emfazas objektecon kaj proponas, ke eksteran informadon prizorgu informantoj kiel en Norvegio kaj Svedio.
- 3 Konteltiroj en brajlo: Poŝtbankoj en Nordlandoj kaj unu privata banko en Norvegio sendas konteltirojn en brajlo al viddifektitoj. La kongreso admonas blindulorganizaĵojn en aliaj landoj agi tiel, ke ankaŭ en aliaj landoj la sama servo estu havebla.

La temo de la 60-a UK en Kopenhago estis "La socia pozicio de la virino".

1976

La 44-a IKBE en Stubenberg, Aŭstrio; 97 partoprenantoj el 16 landoj

Temoj de kongresaj rezolucioj:

- 1 Instruado de Esperanto en lernejoj, precipe en blindullernejoj
- 2 Radioelsendoj
- 3 Financa subteno por eldonado de brajligitaj libroj en Esperanto
- 4 Vojaĝoj de blinduloj kaj vojaĝgrabatoj
- 5 Enlaborigo de blinduloj.

La 61-a UK okazis en Grekio (Athina) kun la temo "Internacia kunlaboro de ŝtatoj je regiona nivelo".

1977

La 45-a IKBE en Oslo, Norvegio; 40 partoprenantoj el 13 landoj

La kongreso okazis en blindullernejo en Huseby. La rektoro de la lernejo Henning Karlstad prezentis la lernejon en bona Esperanto, kvankam li ne regas la lingvon.

Temoj de la prelegoj:

Blindeco en la historio de jarcento kaj koncerne individuon, Hil Delver (Nederlando)

Kiel agas moderna organizaĵo, Birger Viggen (Svedio).

Ekskursoj konatigis la partoprenantojn kun la biblioteko de sonlibroj, surbendiga sekcio kaj parko de statuoj (Vigeland). La urba akcepto okazis en la urbodomo. Sub gvido de profesiaj gvidantoj kongresanoj konatiĝis kun la domo, kiu estis konstruita en la jaro 1950 por la 900-jara datreveno de la urbo Oslo. Jam tiam estis dirite, ke la domo estas kiel juvelskatolo.

La kongresa rezolucio estas adresita al blindulorganizaĵoj kaj al la Tutmonda Konsilantaro por la Bono de la Blinduloj. Ĝi admonas:

- 1 fari ĉian eblon por akiri internacian regulon, ke ĉiu viddifektito, kiu vojaĝas al alia lando trajne, povu tie profiti la samajn avantaĝojn kiel la enlandaj viddifektitoj. Precipe la viddifektitaj esperantistoj, kiuj havas multe da internaciaj kontaktoj, spertas mankon de tia internacia interkonsento;
- 2 rekomendas al blindulorganizaĵoj pli efike faciligi la internaciajn kontaktojn de viddifektitoj, ekzemple per interŝanĝo de feriantoj.

La 62-a UK okazis en Islando (Reykjavik) kun la temo "La rajto je komunikado".

1978

La 46-a IKBE en Varna, Bulgario; 180 partoprenantoj el 19 landoj, inkluzive de Aŭstralio kaj Kanado

Referaĵoj:

Enlaborigo de viddifektitoj en intelekta kampo, A. Masenko, Sovjetunio

Muziko en la vivo de viddifektitoj en Bulgario, M. Karamihajlov

Kontribuo de surdbinduloj en la mondan kulturon, R. Krchňák, Ĉeĥoslovakio

Paŝoj de integriĝa edukado en Britio, J. Wells.

En la kongreso estis aprobitaj tri rezolucioj. Koncerne surdbindulojn la kongreso admonas blindulorganizaĵojn kaj aliajn instituciojn en diversaj landoj daŭrigi strebojn por plibonigi la situacion de surdbinduloj.

Pri estonta agado de LIBE la kongreso petas, ke la estraro de LIBE studu eblecojn starigi apartan virinan komitaton, kaj klarigu ĉu la brajla gazeto de Unesko povu aperi ankaŭ en Esperanto.

La temo de la samloke okazinta 63-a UK estis ”Internacia lingvo – internacia edukado”.

1979

La 47-a IKBE en Lucerno, Svislando

Samloke okazis la 64-a UK kun la temo ”La lingva aspekto de internacia organizo”.

1980

La 48-a IKBE en Stokholmo, Svedio

En la kadro de la 48-a IKBE en Bosön, Lidingö, ĉ.10 kilometrojn de la Stokholma centro okazis seminario kun la temo ”Solidareco al la blinduloj en evoluaj landoj”.

La temo de la kongreso:

Sansporto, en teorio kaj praktiko, kunlabore kun la sportinstituto kaj la sveda handikapsporta asocio, altnivela kultura programo. Studvizitoj okazis al la domo de la sveda blindulorganizaĵo, feriohejmo Almåsa kaj subĉiela muzeo Skansen. Inter la kongresanoj estis multaj muzikistoj kaj ili muzikis en Skansen.

La temo de la samloke okazinta 65-a UK estis ”Diskriminacio”.

1981

Jam longe LIBE estis faka asocio kunlaboranta kun la Universala Esperanto-Asocio (UEA). En la jaro 1980 la estraro de LIBE decidis oficialigi la rilaton, kaj en la jaro 1981 LIBE aliĝis al UEA.

La 49-a IKBE en Zagrebo, Jugoslavio; 117 partoprenantoj el 14 landoj

La organizanto de la kongreso estis KUNE (Kroata Unuiĝo de Nevidantaj Esperantistoj).

Kongresreferaĵoj:

Pozicio de blinduloj en Jugoslavio, Fadil Mučić, prezidanto de Jugoslavia Blindul-Ligo);

Blinda virino en nia lando, N. Ložajić

Blinda aktoro-amatoro en Zagreb, prof. Antun Lastrić

Informado kaj komunikado de blinduloj, A. Grassini

1981, "La jaro de handikapuloj"; d-ro Suden

La Esperanto-movado hodiaŭ, problemoj kaj perspektivoj, Z. Tišljar, dir. de Internacia Kultura Servo

Esperanto inter blinduloj en Jugoslavio, Vl. Stefanović

Pri iuj aspektoj de brajlolegado, B. Topalović.

La 66-a UK okazis en Brazilo (Brasilia) kun temo "Kulturoj kaj lingvoj: pontoj kaj baroj".

1982

La 50-a IKBE en Breda, Nederlando; 112 partoprenantoj el 15 landoj

Prelegoj:

Pri birdoj, precipe strigoj, R. Bossong

La prononcado de Esperanto, T. Karlović

50 jaroj de IKBE, F. Karow

Esperantistoj Esperigas Esperantojn: Helpe kontraŭ evitebla blindiĝo, specife en Afriko, J. Tuinder, Nederlando

La 67-a UK okazis en Belgio (Antwerpen) kun la temo "Generaciaj aspektoj de la Esperanto-movado".

1983

La 51-a IKBE en Budapest, Hungario; 181 partoprenantoj el 19 landoj

Temo: Blindulo en la ĝenerala Esperanto-movado

Referaĵoj:

Cirkonstancoj de viddifektitoj en Bulgario kaj Hungario

Pri ludoj kaj specialaj metodoj en edukado de lingvo.

Okazis ekskurso al broso- kaj balailoprodukta fabriko, kies dungitoj plejparte estas viddifektitoj. Aŭtobusa rondveturo konatigis kun la urbo kaj boata krosado kun lago Balaton. En koncerto ludis hungara blinda orgenisto.

Ĉeestantoj de la 68-a UK estis invitataj al LIBE-kunveno per jena invito en la kongresa libro:

”LIBE invitas. Ĝuste inter la blindularo de pluraj landoj la nombro de fervoraj esperantistoj estas relative alta. Aliflanke, blinduloj ofte sentas diskriminacion, izoligon, ĉar interkomunikado inter handikapitaj kaj la ĝenerala movado ne estas perfekta.

En la mardo je la 14-a horo en salono Wüster, LIBE ebligis al interesatoj informiĝi kion la vide handikapitaj faras por la ĝenerala movado, sed ankaŭ kiel eblas al vidantoj kontribui al tiu agado (per voĉlegado, partoprenigo en ĝeneralaj aranĝoj, k.s.). Jen bona okazo plibonigi la internan komunikadon de nia movado profite al la komuna celo.”

La temo de la samloke okazinta 68-a UK estis ”Sociaj kaj lingvaj aspektoj de la moderna komunikado”.

1984

La 52-a IKBE en Tirrenia, Italio

Temoj: Blinda virino en nuntempa socio, prelegoj kaj spektakloj pri italaj historio, muziko, literaturo, scienco kaj socio, kursoj pri la itala kaj Esperanto por komencantoj. Okazis festivalo de itala kulturo.

La 69-a UK okazis en Kanado (Vancouver) kun la temo ”Lingvaj minoritatoj – ĉu nur nacia fenomeno?”.

1985

La 53-a IKBE en Augsburg, Germanio 27 julio–3 aŭgusto; 149 partoprenantoj el 17 landoj

Temoj:

Handikapuloj en la socio, kelkaj pensoj el la socipolitika kampo, John Wells, Britio

Pri cirkonstancoj de viddifektitoj en okcidenta Germanio

Pri evoluo de Esperanto kaj pri la agado de Akademio de Esperanto, Werner Borgmann

Esperanto kaj Eŭropo, Elsbeth Borgmann

Signifo de Fondaĵo Antoni Grabowski, Adam Goralski, Pollando

”Gastoj demandas, gastigantoj respondas”.

Pri esperantistaj gejunuloj parolis Ursula Felhölter.

La temo de la samloke tuj post IKBE okazinta 70-a UK estis ”Aktikvo kaj modernio: kion ŝanĝi, kion konservi?”

1986

La 54-a IKBE en Stubenberg, Aŭstrio; 97 partoprenantoj

La temo de publika LIBE-kunveno dum la 71-a UK en Pekino estis ”Kunlaboro kaj interhelpo”.

La temo de UK estis ”Interkompreniĝo, paco, evoluo”.

1987

La 72-a UK okazis en Varsovio, Pollando 25 julio–8 aŭgusto kun la temo ”Esperanto – 100 jaroj de internacia kulturo”.

La 55-a IKBE en Varsovio; 1–9 aŭgusto; 280 partoprenantoj el 21 landoj

Prelegoj kaj referaĵoj:

Agado de institucioj kaj organizaĵoj por blinduloj en Pola Popola Respubliko

Pri vizitotaj aktivaĵoj

100 jaroj de E-kulturo

Esperanto-movado en Pollando kaj en aliaj landoj

Varsovio Hieraaŭ

Esperanto inter antaŭjuĝoj kaj miskompreno

Signifo de radioelsendoj en Esperanta movado.

Kulturaj aranĝoj:

Monodramo: Sopiĝo Laboro Espero, en plenumo de Jerzy Formal – aktoro de la Nacia Teatro en Varsovio,

Du koncertoj de la Bulgara koruso sub gvido de S. Paskulov

Koncerto de operaj arioj kaj kantoj de St. Moniuszko en plenumo de polaj nevidantaj artistoj

Vespero de pola muziko en la sama plenumo

Koncerto de esperantlingva koruso "Muzilo"

Koncerto de la Chopina muziko en plenumo de nevidanta pola pianisto Edwin Kowalik

Folklora koncerto,

Internacia artvespero

Kvizo pri Esperanto-kulturo.

Okazis ankaŭ renkontiĝo de redaktoroj de brajla esperantlingva gazetaro kun ties legantoj.

Ekskursoj:

Tuttaga ekskurso tra mazovia regiono, duontagaj al Centro de Pola Asocio de nevidantoj kaj al la Hebrea tombejo por meti florojn ĉe la tombo de Ludoviko Zamenhof.

En la sama tago okazis vizito al la reĝa kastelo en Varsovio.

La interkona kaj adiaŭa vesperoj okazis en la kongresa salono de la Varsovia Palaco de Kulturo kaj Scienco.

Dimanĉe okazis romkatolika diservo en Esperanto.

1988

La 56-a IKBE en Vught, Nederlando; ĉ. 100 partoprenantoj el 16 landoj

Temo: Unu lingvo, unu mondo: Kion Esperanto povas signifi por vidhandikapitoj en la Tria Mondo (Abdul Salam el Hinda unio mem ne ricevis elirpermeson!)

Referaĵoj:

Pri la Delta-digaro, J. Verheule

Blindulprizorgado en Nederlando, Hil Delver

Pri Edmond Privat, Ed Borsboom

Muziko kaj humuro, D. Schipper

Prezento de adaptitaj ludoj, R. Gonin.

Okazis kunveno de redaktoroj kaj legantoj.

La 73-a UK okazis 19–26 julio 1988 en Rotterdam kun la temo ”Scienco kaj tekniko por internacia kompreniĝo”.

1989

La 57-a IKBE en Brighton, Britio; 75 partoprenantoj el 13 landoj
Ĉefa temo: La blinduloj en la teknika epoko”.

Prelegoj:

La situacio de la blinduloj en Britujo, John Wells

Imre Madách kaj La Tragedio de l’ Homo, monumento de la hungara literaturo,
Otto Reeves (Britio)

Gvidhundoj en Britujo, Tom Barbour, Britio

Voĉsintezilo ”Esparol”, Czaba Escedi, Hungario

Senpapera brajlo kaj brita elektronika notlibro ”Jotta”.

Okazis ankaŭ eta ekspozicio.

Ekskursoj okazis al la muzikmuzeo kaj al la RNIB (Royal National Institute of Blind People).

Sian laŭdon al la geamikoj Kay kaj John Wells la nova LIBE-prezidanto Otto Prytz esprimis per jena limeriko:

Ĉe Brighton ĉefrolis tekniko,
Sed ankaŭ kulturo, muziko,
Blindulproblemar’,
Kaj ĉion la par’
Preparis kun mira etiko.

Samloke 28 julio–1 aŭgusto okazis la 74-a UK kun la temo ”Lingvo kaj egaleco en internacia komunikado”.

Agado de ligo internacia de blindaj esperantistoj (LIBE) kaj internaciaj okazaĵoj 1990–2015

Sur la sojlo de nova jarmilo

En la komenco de la 1990-aj jaroj komputila komunikado iĝas konata ankaŭ inter viddidektitoj. En la februara numero de Esperanta Ligilo (EL) de la jaro 1992 aperas artikoloj pri elektronika ĵurnalo por blinduloj kaj tradukkomputilo ankaŭ por Esperanto. La numero 1/1996 sciigis pri komputila komunikado por nevidantoj. Iom post iom komputiloj kaj informadiko iĝas alireblaj por viddifektitoj. Retpoŝto rapidigas kontaktojn kaj efikigas administradon de asocioj. La preskaŭ centjara Esperanta Ligilo (EL) ricevas paralelan eldonformon. Krom en brajlo EL haveblas ankaŭ per retpoŝto ekde 1999.

Interreto ofertas ankaŭ forumon por diskutado. En Ĉeĥio, eĉ ”Unuiĝinta Organizaĵo de Nevidantoj kaj Malfortevidantoj” ekde 1998 funkcias retkonferenco, kie estas uzata nur Esperanto, kaj ĝi estas malfermita al ĉiuj landoj. LIBE-anoj vizitadas ĝin kaj sendas kontribuadojn.

LIBE sin prezentas en publika kunveno de la Universalaj Kongresoj de Esperanto (UK), escepte en 1992 (Aŭstrio) kaj 1997 (Aŭstralio).

Japana Esperanto-Asocio de Blindaj Esperantistoj membriĝas en LIBE en la jaro 1996, kaj japanaj viddifektitoj komencas regule partopreni en la Internaciaj Kongresoj de Blindaj Esperantistoj. En la kongreso en Vilno (2005) la japana delegacio eĉ estas la plej granda.

Esperanto estas unuan fojon unu el la laborlingvoj en internacia seminario (1997 en Solsana/Saenen, Svislando).

Internaciaj renkontiĝoj

Inter la periodo 1990–2014 Universala Kongreso de Esperanto (UK) kaj Internacia Kongreso de Blindaj Esperantistoj (IKBE) okazis dek fojojn samlande kaj samtempe aŭ parte samtempe. Multaj blinduloj partoprenis en ambaŭ kongresoj. En la jaro 2006 IKBE okazis en la kadro de UK kaj atingis rekordan nombron de 160 partoprenantoj.

IKBE

1992 Vieno, Aŭstrio 25/7–1/8
1995 Tuusula, Finnlando 18–22/7
1996 1996 Prago, Ĉeĥio 13–20/7
1998 Artigues-près-Bordeaux, Francio 26/7–1/8
1999 Berlino, Germanio 25–31/7
2001 Kraljevica, Kroatio 14–21/7
2003 Gotenburgo, Svedio 2– 6/8
2005 Vilnius, Litovio 30/7–6/8
2006 Florenco, Italio 29/7–5/8
2009 Muszyna, Pollando 18–24/7

UK

Vieno (paralele kun IKBE)
Tampere, Finnlando 23–29/7
Prago 20–27/7
Montpellier, Francio 1–8/8
Berlino 31/7–7/8
Zagreb 21–28/7
Gotenburgo 26/7–2/8
Vilnius 23–30/7
Florenco (paralele kun IKBE)
Bjalistoko, Pollando 25/7– 1/8

IKBE-oj allogis 60–120 partoprenintoj kiam UK okazis ekster Eŭropo – Kubo 1990 kaj 2010, Koreio 1994, Aŭstralio 1997, Israelo 2000, Brazilo 2002, Ĉinio 2004, Japanio 2007, Vjetnamio 2012 kaj Argentino 2014.

Universala Esperanto-Asocio faciligis aliĝon al UK tiel ke handikapuloj rajtas aliĝi laŭ la plej malalta tarifo ĝis la lasta limdato, por ke ili havu tempon trovi bezonatan akompananton. Iom post iom pli da nevidantoj partoprenas kongresojn ankaŭ en aliaj kontinentoj.

1990

IKBE-58

Sarajevo, Bosnio kaj Hercegovino kun pli ol cent partoprenantoj el 9 landoj

La kongreso okazis en banloko Iliĝa (Ilidža) 12 kilometrojn for de Sarajevo, ĉefurbo de jugoslavia respubliko Bosnio kaj Hercegovino.

La programo estis tre riĉa. Dum la kongreso estis traktitaj jenaj temoj:
Ĵeljko Bajiĉ: Specifeco kaj komunikaj problemoj de la vidhandikapuloj,
Nedeljka Loĵajiĉ: Komunikigo de la vidhandikapuloj kun aliuloj,
Psikaj faktoroj de la blindulkomuniko,
Djuro Ŝurlan: Orientigo kaj perceptado de la blinduloj en la montaro,
Brajlo en la moderna elektronika epoko,
Loko de la specifaj muzeoj en vidhandikapula komunikigo,
Bezonoj kaj perspektivo de la integriĝanta blindulklerigado,
Situacio de blinduloj en Jugoslavio,
Boriša Miliĉević: E-literaturo.

Okazis ankaŭ fakaj kunvenoj de telefonistoj, muzikistoj kaj instruistoj. Kunvenis ses redaktoroj de brajlaj Esperantorevuoj. Sekvis kunveno de la redaktoroj kun la belegantoj. Abundis ankaŭ arta programo: Jugoslavia vespero, teatraĵo pri Zamenhof, prezento de Brajla eldono de "El jugoslavia poezio".

Dum tagoj estis organizitaj interesaj ekskursoj.

La kongreson prezidis sociologo Branko Miljko.

La 75-a UK en Kubo (Havano)

Otto Prytz (Norvegio) partoprenis en la Internacia Kongresa universitato (43-a IKU-sesio) en Havano per prelego "Lingva komunikado kiel problemsolvado". La temo de UK estis "Esperanto, evoluo, kultura diverseco".

1991

La 76-a UK en Norvegio (Bergeno)

Dum la Universala Kongreso en Bergeno okazis LIBE-kunsido kun 25 partoprenantoj. Kunsidon gvidis Otto Prytz, prezidanto de LIBE. Vekiĝis demando kaj diskuto, ĉu aranĝi apartan kongreson por blinduloj aŭ ĉu ni havu proprajn kunvenojn en la kadro de UK. Ambaŭ opinioj havis subtenon, sed neniu decido estis farita.

Otto Prytz informis, ke li volas forlasi la taskon de LIBE-prezidanto. (Laŭ s-ino Tuovi Palomäki, sekretario de Steleto, Esperanto-Asocio de viddifektitoj en Finnlando)

La temo de UK estis "Nordio – ĉu modelo?"

1992

IKBE-59

Vieno, Aŭstrio kun 85 partoprenintoj el 15 landoj

Temo: Vieno, mezo inter Okcidento kaj Oriento. La laboro de la geblinduloj en la epoko de la elektronikaj helpiloj.

Referaĵoj:

La blindulo kaj liaj helpantoj (enkonduka prelego por la ekspozicio); prof. Erich Schmid:

Parolanta teleteksto; Czaba Ecsedi, Hungario

Pri la UK en Vieno 1924; prof. Rudolf Krachnak
Historio de Vieno, Henriette Etzenberger
Pri la kultura vivo en Sankt-Peterburgo; Tamara Andrejeva, Rusio.

Kiel prezidanto de LIBE por la nova agadperiodo estis elektita Theodor Speckmann el Germanio.

Ekskursoj konatigis gekongresanojn kun la kastelo Schönbrunn kaj monaĥejo Melk. Okazis ankaŭ granda rondveturado tra Vieno.

Samtempe kun IKBE en Vieno okazis la 77-a UK kun temo "Kiam falas muroj de jarmiloj: komuna eŭropa domo".

1993

La 78 UK en Hispanio (Valencio)

24–31 julio 1993

Dum UK en Valencio laborkunsido de 20 nevidantoj. Ĝin prezidis Nora Moerbeek, sekretario de LIBE kaj redaktoro de Esperanta Ligilo (EL). En la kunsido oni parolis pri la enhavo de EL kies presado ŝanĝiĝis el Nederlando al Ĉeĥio. Alia temo estis venontaj kongresoj. Arvo Karvinen prezentis inviton kongresi en Finnlando antaŭ la 80-a UK en 1995.

La temo de UK estis "Klerigo por la 21-a jarcento".

REAN (Rusia Esperanto-Asocio de Nevidantoj) naskiĝis somere 1993, sed estis registrita en la justicministerio nur en 1995.

1994

IKBE-60

Kislovodsk (Kaŭkazo), Rusio 14–21 julio 1994 kun 123 partoprenintoj el 13 landoj

La ĉefa temo de kongreso estis "Brajlo nuntempe kaj estontece".
Prezentitaj prelegoj emfazis la signifon de brajlo en komunikado de nevidantoj.
La kongresa rezolucio konstatas, ke surbendigaĵoj kaj komputila tekniko kun cinteza voco prezentas tre valoran kompletigon, sed absolute ne estu konsiderata kiel anstataŭigo de la brajla skribo. La rezolucio forte rekomendas, ke internaciaj blindulorganizaĵoj kaj Internacia Poŝta Unio insistu ĉe la ŝtatmembroj kaj aliaj

ŝtatoj, ke la poŝtaj reguloj estu senrezerve ĉie kaj ĉiam observataj rilate la paperajn brajlaĵojn, ke estu samrajtigataj kun brajlaĵoj: kasedaj komputildisketaĵoj kaj gazetoj por blinduloj, sen doganaj kaj aliaj impostoj kaj sen prokrastado.

Fakaj prelegoj prezentis edukadon de masaĝistoj en Kislovodsk kaj agadon de blinduloj en regiono Stavropol. Harald Rader parolis pri sia 40-jara laboro kiel stenografisto en la parlamento de Aŭstrio.

Aliaj diskutitaj temoj estis: libroservo de LIBE, membriĝo en eŭropa blindul-unuiĝo (European Blind Union, EBU) kaj tutmonda blindul-unuiĝo (World Blind Union, WBU) kaj kiel akiri pli da junuloj al Esperanto-movado, ekz. en junulara Esperanto-renkontiĝo en la kadro de festivalo "Blankaj noktoj", kiu okazas somere en Sankt-Peterburgo.

La 79-a UK okazis en Koreio (Seoul) 23–30 julio 1994 kun la temo "Azio en la mondo".

1995

IKBE-61

Tuusula, Finnlando 18–22 julio 1995 kun 81 partoprenantoj el 20 landoj

La ĉeftemoj estis "Vidhandikapitoj en la socio" kaj "Kiel trovi novan sangon?" La protektanto de la kongreso estis prezidento Martti Ahtisaari. Inter deko da alvenintaj salutmesaĝoj estis tiu de Arne Husveg, prezidanto de Eŭropa Blindul-unuiĝo.

La temoj de prelegoj estis:

Vidhandikapitoj en la socio, Otto Prytz, Norvegio

Pri sintenoj rilate al handikapo kaj handikapuloj, Arvo Karvinen, Finnlando

Konsidero al la handikapuloj en la konstrua kaj komunuma planado, s-ino Maija Könkkölä, arkitekto, Finnlando

Profesie laborantaj blinduloj, ĉu jam baldaŭ historio?, Theodor Speckmann, Germanio

Vidhandikapito kiel konsumanto, Birger Viggren, Svedio

La situacio de vidhandikapitoj en Ĉeĉenio, Pavel Rjabov, Rusio

La elektronika gazeto por vidhandikapitoj, Eero Vartio, Finnlando

Pri interkomunikiĝo, Anna Rabec, Rusio

Kiel trovi novan sangon?, Martin Meyer, Svislando.

La kongresa rezolucio enhavas rekomendojn al LIBE pri praktika pruvado de taŭgeco de Esperanto kiel komunikilo:

- 1 LIBE iniciatu konferencojn, kiuj havu Esperanton kiel ĉefan laborlingvon, sed kiuj uzu ankaŭ aliajn laborlingvojn
- 2 LIBE instigu aranĝantojn de internaciaj ferioj por vidhandikapuloj enmeti Esperanto-kursojn en la programojn de la ferioj
- 3 Vidhandikapitaj esperantistoj laŭeble iniciatu en siaj propraj landoj, regionoj aŭ lokoj Esperanto-kursojn por vidhandikapitaj gejunuloj. Por havigi lernantojn por Esperanto-kursoj konvenas proponi interesan aktivecon postkursan, eventuale aranĝatan de LIBE.

Internacia ekzameno kaj resumo de kongreso

En ekzameno de UEA/ILEI (Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj) – la unuan fojon dum IKBE – ekzameniĝis ses partoprenantoj.

Kongresa resumo enhavanta la prelegojn kaj la rezolucion estis senditaj al Universala Esperanto-Asocio (UEA) kaj Esperanto-asocio de Finnlando (EAF).

La adiaŭa vespero estis samtempe malfruiĝinta 75-a datreveno de Steleto, Esperanto-Asocio de viddifektitoj en Finnlando. La festparolanto Sakari Kauppinen, prezidanto de Esperanto-Klubo de Helsinki, en sia parolo tuŝis i.a. la lingvopolitikon de Eŭropa unio kaj konstatis, ke ankaŭ LIBE povus pli bone labori por garantii la pluvivon de nia Esperanto-komunumo. La mesaĝo de Sakari Kauppinen estis: ”Uzu vian instrumenton! Spertu miraklon de Esperanto! Tio estas miraklo, pri kio indas esti ĝojaj kaj fieraj.”

La 80-a UK en Tampere, ”Ni la popoloj – unu mondo aŭ disaj eroj?”

La sekvantan semajnon duono de la IKBE-anoj partoprenis en UK en Tampere, kie ili loĝis kune en sama hotelo.

1996

IKBE-62

Prago, Ĉeĥio, 13–20/7 kun 97 partoprenantoj el 18 landoj kaj 3 kontinentoj

Temo: Blindaj esperantistoj kaj la ĝenerala blindulmovado

La kongresanoj klopodis trovi rimedojn por fortigi la rolon de Esperanto en la landaj kaj internaciaj blindulorganizaĵoj. La temo estis pritraktita multflanke pere de prelegoj kaj kunvenoj. D-ro Rudolf Volejnik parolis pri blinduloj kaj malfortevidantoj en Ĉeĥio. Otto Prytz el Norvegio demandis en sia prelego ”Kial

Esperanto ne ludas la saman rolon inter blinduloj nun kiel dum la intermilita tempo?” kaj proponis rimedojn por aliri al saleroj en la nuna blindul-supō.

– Siatempe Fritz Karow (Germanio) ofte diris: ”Inter la du mondmilitoj la esperantistoj estis la salo en la blindul-supō”. –

Rob Moerbeek (Nederlando) rakontis pri Universala Esperanto-Asocio (UEA).

Arvo Karvinen (Finlando) parolis pri la kunlaboro de evoluantaj landoj. Diversfakaj perelegoj vekis tiel viglan diskuton, ke la kongreso ricevis la epiteton ”senpaŭza kongreso”.

Abunda kultura programo konatiĝis nin kun la gastiganta lando, precipe la muzika kaj alia aktiveco de nevidantoj. Pri muziko prelegis kaj ĝin prezentis Tadeusz Karas kaj Jiří Jelínek.

Prelegoj pri porblindulaj temoj, ekspozicio de blindulhelpiloj, ekskurso al rekapabla centro en Olomouc kaj i.a. konatiĝo kun voĉilo de butikaj enirejoj, stacidomaj lokoj k.t.p. perceptebla per enmana sentilo distanca montris la altan nivelon de blindulhelpiloj disponeblaj en Ĉeĥio.

Blinduloj ekzameniĝis

Pasintjare en Tuusula (Finnlando) eblis la unuan fojon dum IKBE-kongresoj partopreni internaciajn ekzamenojn de UEA/ILEI. La ekzameno estis grava kaj utila sperto, kiu donis al LIBE kaj ĝiaj memrosocietoj novan defion. Necesas renovigi lernolibrojn kaj produkti ankaŭ alian literaturon, por ke la lingvo de nevidantaj esperantistoj modernigu kaj restu sur la ĝenerala nivelo. En Prago ekzameniĝis sep nevidantoj.

Kiel novan membron LIBE aprobis la asocion JABE, Japana Asocio de Blindaj Esperantistoj.

Blinduloj en Esperantujo

La unua internacia IKBE-kongreso okazis antaŭ 75 jaroj ĝuste en Prago, paralele kun la 13-a Universala Kongreso. Ankaŭ nun blinduloj daŭrigis restadon en Esperantujo por partopreni la 81-an UK. Krome la blindulmovado kaj agado de ĉeĥaj esperantistaj handikapuloj videblis pere de informtabuloj ĉe la ĉefa enirejo de la kongresejo – brajle kaj platskribe.

Tuj post la IKBE samurbe komenciĝis la 81-a UK kun la temo ”Kulturo: valoro aŭ varo?”. La UK akceptis Manifeston por justa kaj efika lingva ordo. La Manifesto de Prago emfazas sep celojn: demokratia komunikado, transnacia edukado, efika lingvoinstruado, plurlingveco, lingvaj rajtoj, lingva diverseco, homa emancipiĝo. Siatempe la Manifeston subskribis 13 000 personoj.

1997

Seminario pri brajlo en Solsana/Saanen, Svislando, februaro 20–23

Internacia lingvo – bazo al interpretado

La 61-a IKBE en Finnlando (en 1995) rekomendis, ke LIBE iniciatu konferencojn kun Esperanto kiel ĉefa, sed ne sola laborlingvo. Tia seminario realiĝis februare 1997 en Svislando. Forte interesata, Martin Meyer el Svislando instigis la organizaĵon Swiss Braille Watchers (SBW), promesante mem respondi pri la interpretado, aranĝi seminarion pri la brajla skribo.

La celo estis kunvoki el diversaj landoj uzantojn, produktantojn kaj instruistojn de brajlo, por pritrakti spertojn kaj problemojn kaŭzitaĵojn de aplikado de komputiloj. La signoj ankoraŭ varias en diversaj landoj (precipe la interpunkciaj), ne ekzistas tute kongrua sistemo.

La seminarion partoprenis 60 specialistoj el 13 landoj en Eŭropo, i.a. dekduo da esperantistoj. Kiel labor- kaj preleglingvoj funkciis Esperanto (la ĉefa), la angla, franca kaj germana, en kiuj lingvoj poste aperis la dokumentoj de la seminario. La interpretado en tiu seminario montris la taŭgecon de Esperanto en praktika internacia uzado.

Rezolucioj de la seminario aperis en la novembra numero de Esperanta Ligilo. Artikoleto "Sekvu la blindulan ekzemplon" aperis en julia-aŭgusta numero de la revuo Esperanto (1094 (7–8) 1997).

IKBE-63

Irpinj, Ukrainio kun 84 partoprenantoj el 13 landoj

Temo: Esperanto, ĉu integriĝo aŭ izoliteco

La referaĵoj estis:

Giuseppe Verdi kaj liaj verkoj, Aldo Grassini (Italio)

Esperanto, ĉu integriĝo aŭ izoliteco? D.M. Bibulevskij (Ukrainio)

Dialogo en malvarmo, Carla Da Costa (Italio)

Per kelkaj ekzemploj Anna Rabec (Rusio, instruisto de internacia juro) montris gravan aspekton de Esperanto

Esperanto kiel savilo en peza krizo post subita blindiĝo, Ella Ruban (Ukrainio)

Superrigardo pri la historio de Ukrainio, Petro Ŝnypir, kaj preleg-koncerto de ukraina klasika muziko, kiun prezentis instruisto pri la hispana Vdanta Jobie.

Okazis renkontiĝo en la redakcio de brajlaj periodaĵoj. Ĉefredaktoro Taran rakontis pri la vivo kaj agado de la blinduloj en Ukrainio kaj respondis multajn demandojn.

Okazis ekzamenoj de UEA/ILEI gvidataj de ges-roj Moerbeek. Partoprenis tri kandidatoj kiuj ĉiuj sukcesis.

La 82-a UK okazis en Aŭstralio (Adelaide) 19.–26.7.1997 kun la temo ”Toleremo kaj justeco en multkultura socio”.

1998

En 1998 estis fondita Asocio de Nevidantaj Esperantistoj en Bulgario (ANEB).

IKBE-64

Artigues-près-Bordeaux, Francio; 26 julio–1 aŭgusto 1998 kun 96 partoprenantoj el 14 landoj

Temo: Nur kvar sensoj

Kongreson aranĝis vidantaj esperantistoj, inter aranĝantoj estis nur unu blindulo. La atmosfero estis bonvola kaj bonkora.

Partoprenantoj parolis kiel progresigi kaj trejni la kvar sensojn. Celita estas rekompenci la malfacilaĵojn de blindeco. Rekapabligo kaj taŭgaj helpiloj ludas gravan rolon en la memstara vivo kaj elturniĝo de viddifektitoj.

Dum ekskursoj kongresanoj konatiĝis i. a. kun brajla presejo, vitejo, prunarbaro kaj grimpis per stuparo sur dunego (Dune du Pyla) kaj kuris suben glitante nupiede. La dunego situas inter la oceano kaj pinarbarego kaj estas laŭdire la plej alta en Eŭropo. Kelkaj bravuloj eĉ naĝis en la oceano en altaj ondoj. Solenan, historian etoson kongresanoj spertis en St. Antoine de Breuilh (Dordogne). En la vilaĝo oni malfermis memorplaton sur la muro de la naskiĝdomo de Théophile Cart (1855–1931), pioniro de Esperanto, paĉjo de neviduloj.

Esperanto-ekzamenon trapasis tri blinduloj.

Tuj post la IKBE komenciĝis en Montpellier la 83-a UK kun la temo ”Mediterraneo – ponto inter kulturoj”.

1999

IKBE-65

Berlin, Germanio, 25–31/7 kun 103 partoprenantoj el 19 landoj, 4 kontinentoj
(Afriko, Ameriko, Azio, Eŭropo)

Temo: Per Esperanto al kulturo

Altnivelaj prelegoj konatiĝis kun esperantlingva literaturo kaj muziko:

El la verkaro de J. W. Goethe; Theodor Speckmann, Germanio

Germana verkisto Theodor Fontane (1819–1898); Theodor Speckmann

Johan Falkberget, norvega verkisto; Otto Prytz, Norvegio

Vivo kaj verkaro de A. Puŝkin; Nadja Ĵukova, Rusio

Malnova kaj nova taĝikia muziko; Nataŝa Kasymova, Taĝikio

Kultura servo de finnaj vidhandikapitoj; Raimo Tanskanen, Finnlando.

Du aliaj prelegoj tuŝis fakajn temojn:

Esperanto-arkivo en Stockholmo; Birger Viggen, Svedio

La ĉefa temo de lia raporto estis, kie kaj kiel konservi diversloke troviĝantan materialon por la estonteco por venonta esplorado, laboro, kiu postulas kontinuan registradon de la Esperantaĵoj.

La sociala fonduso de Eŭropa unio kaj ĝia influo sur akiro de laboro; Arvo Karvinen, Finnlando. Karvinen klarigis, ke eŭropa handikapula forumo EDF (European Disability Forum) prezentas handikapulorganizaĵojn ĉe EU. Ĝi instigis la diversajn organizaĵojn prezenti proponojn al la respektivaj ŝtatoj, tiel ke ili prientenu la bezonojn de handikapuloj en siaj planoj por enlaborigo, prezentotaj al la komisiono de EU. La nova laborplano de la sociala fonduso, kies celo estas financi la naciajn planojn por enlaborigo, koncernas la jarojn 2000–2006. Ĝi do estas nun prilaborata. Ĉar nun, pli ol antaŭe, oni emfazas la neceson ke handikapuloj havu egalajn alirebleojn al enlaboriĝo, la diversaj handikapulaj organizaĵoj povas nun agi laŭ la indikoj de EDF por influi tiun planprilaboradon.

Artaj kaj distraj vesperoj konsistis el temo "Blinduloj ridetas", koncerto de "Triopo Espero" el Krimeo kaj internacia vespero kun deklamoj kaj finnaj, francaj, germanaj, hungaraj, taĝikaj kaj ukrainaj kantoj.

Ekskursoj konvene aliĝis al la kongresa temo

Vidindaĵoj de Berlino, kastelo "Sanssouci" en Potsdam kaj regiono Spreewald iĝis konataj. Tri tipaj lignaj grandaj boatoj por 20–30 personoj, pelataj per ligna stango, kvietige veturigis la kongresanojn. Rivero Spree diviĝas en 300 branĉojn, kiuj serpentas tra herbejoj kaj raraj inundita arbaro. Tiu idilia loko estas 55 km longa kaj

15 km larĝa. Sur insulo vivas jam 1500 jaroj germana minoritato, slava popolo: la sorboj. Ili konservadas sian lingvon kaj sian kulturon. Post duhora veturado en tiu mirinda rivera labirinto kongresanoj atingis Lübbenau, kie ilin atendis bongustaj tipaj manĝaĵoj en bela restoracio.

Krom la kongresa libro, ĉiu kongresano ricevis brajlan libreton kun kelkaj poemoj originale verkitaj kaj esperantigitaj de karmemora s-ano Joseph Kreitz (1897–1977).

Tuj post la IKBE komenciĝis en Berlino la 84-a UK kun temo ”Tutmondiĝo – ŝanĉoj por paco?”.

Nova Jarmilo

En la komenco de la nova jarmilo la agadkampo de LIBE etendiĝas. Esperanto kaj la agado de LIBE iĝas konataj vaste en la mondo pere de EBU (Eŭropa Blindul-unuiĝo), WBU (Tutmonda Blindul-unuiĝo) kaj ICEVI, internacia konsilantaro por eduko de viddifektitoj (International Council for Education of People with Visual Impairment).

Kunlaboro kun ILEI (Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj) estis iniciatita. La unua konkreta rezulto estis, ke ankaŭ viddifektitoj estas bonvenaj partopreni Someran Esperanto-Studadon (SES 2010) en Slovakio (Piešťany). Tie finnaj studentoj uzis la brajligitan finnan eldonon de la lernolibro ”Esperanto per rekta metodo” de Stano Marček.

Somere 2011 LIBE brajligis la internacian version de la lernolibro ”Esperanto per rekta metodo”.

Viddifektitoj povas kontakti la Konsultejon de la Akademio de Esperanto ankaŭ brajle. En aŭtuno 2004 Otto Prytz (Norvegio) elektiĝis membro de tiu grupo, kies tasko estas gardi la kvaliton de la internacia lingvo.

Dank’ al Interreto LIBE videblas al la ekstera publiko pli vaste ol antaŭe. Ekde 2005 LIBE havas retan paĝaron. Ekde februaro 2014 la adreso de TTT-ejo estas www.LIBE.slikom.info.

Intereso al Esperanto vekiĝas inter la viddifektitoj en Sud-Ameriko, Afriko kaj Azio (Brazilo, Dominika Respubliko, Kostariko, Kubo, Tanzanio, Vjetnamio).

Esperanto estis unu el la laborlingvoj en internaciaj seminarioj (Moskvo 2003, Tokio 2007).

Eŭropa Unio informas esperante dum la jaro 2006.

En la voĉbabilejo "Ventrilo" funkcias Esperanto-rondeto ekde la jaro 2009.

Kunlaboro kun la Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj (ILEI) komenciĝas favore.

2000

IKBE-66

Plovdiv, Bulgario, 5–12/8 kun 94 partoprenantoj el 14 landoj

Temo: Komunikado sen limoj dum dudek unua jarcento

La plej gravaj diskutitaj temoj estis financoj kaj daŭrigo de redaktado de EL post subita morto de kasisto kaj redaktoro Jan Verheule (Nederlando). Kiel nova redaktoro estis nomumita Attila Varró el Hungario, kaj Olena Pošovana el Ukrainio pretas prizorgi la surbendigitan eldonon.

La 85-a UK okazis en Israelo (Tel Aviv) kun la temo "Lingvo kaj kulturo de paco".

2001

IKBE 67

Kraljevica, Kroatio, 14–21 julio 2001 kun 62 partoprenantoj el 14 landoj

Kongresanoj festis la 50-an datrevenon de LIBE. Okazis ekzameno, kiun trapasis du kandidatoj. Unu el la prelegoj prezentitaj dum la kongreso de Boris Topaloviĉ (Kroatio) aperis en numeroj 2-3/2002 de Esperanta Ligilo.

Tuj post IKBE en Zagrebo okazis la 86-a UK kun la temo "Kulturo de dialogo – dialogo inter kulturoj". Por la UK la Japana Asocio de Blindaj Esperantistoj (JABE) produktis kaj donacis flugfolion "Kiel kunvivi kun blinduloj/vidhandikapitoj". Ĝi estis distribuata al ĉiuj kongresanoj.

2002

IKBE-68

Balatonlelle, Hungario, 20–27 julio kun 93 partoprenantoj el 16 landoj

Temo: Blindeco hodiaŭ

Diskutado traktis, kiajn obstaklojn blindeco kaj viddifektoj kaŭzas al individuo en la nuntempa socio. La serion de ok prelegoj komenciĝis pri temo "Kaŭzoj de blindeco en Finnlando" prezentita de Arvo Karvinen. La prezidanto de la kongreso, muzikinstruisto Attila Varró prelegis pri la ĉiutagoj de blindulo kaj kiel instruas muziknotacion kaj la brajlon. Czaba Ecsedi parolis pri informadiko kaj la blinduloj en Hungario, kaj Antun Kovač el Kroatio asertis en sia prelego, ke blindeco ne estas la plej malfacila handikapo. Esploristo Blazio Vaha kaj doktoro Ödön Bodor konatiĝis kongresanojn kun la hungara lingvo kaj vivo.

La Ĝenerala asembleo de LIBE kunvenis por pritrakti i.a. modernan komunikadon inter blinduloj trans la limoj pere de esperanto.

Inter distra programo certe la plej eksterordinara kaj agrabla sperto estis granda akva glitejo ("tobogano"), kiu estis je la dispono de la kongresanoj.

La 87-a UK okazis en Brazilo (Fortaleza) kun temo "Diverseco: ŝanco, ne minaco".

2003

Internacia renkontiĝo en Varna (Bulgario) 7–11 julio

Renkontiĝon partoprenis 90 personoj, el kiuj 39 alilandanoj. Laŭ sia programo ĝi estis kvazaŭ la IKBE paralela al tiu oficiala okazinta en Svedio post kelkaj semajnoj.

La 88-a UK okazis 26 julio–2 aŭgusto 2003 en Gotenburgo, Svedio kun temo "Lingvaj rajtoj kaj respondecoj"

UK integriĝu blindulojn

Raporto de dimanĉa kunsido (27.7.2003)

La kunsido "Esperanto, ĉu inkluziva movado?" estis aranĝita pro la dubo, aparte pri blinduloj, kiel la titolo, kvankam Esperanto nomas sin "ĉies lingvo".

Blinda s-ro Aldo Grassini el Italio, la ĉefparolanto prezentis la longedaŭrecon de blindula Esperanto-movado, ekz. brajla organo "Esperanta Ligilo" de LIBE (Ligo Internacia de Blindaj Esperantistoj) 100-jariĝos en 2004, kaj gvidantecon de

blinduloj en la ĝenerala Esperanto-movado en diversaj landoj. Li klarigis ankaŭ pri malfacilaĵoj por blinduloj en la socio kaj en la Esperanto-movado, i.a. tamen nuntempe komputilo helpas multe kaj en reta komunikado blinduloj estas bone integritaj, kvankam tio validas ne por ĉiuj blinduloj.

Sekve s-ino KIKUSIMA Kazuko el Japanio prezentis klopodojn en diversaj Esperanto-eventoj en Japanio: aranĝi kotiz-kategorion "handikapitoj" (sumo de rabato ne gravas) por prezenti la akceptemon; en malfermo kelksekunde informi pri ĉeesto de blinduloj; meti en dokumentujon informilon pri kontakt-maniero kun blinduloj (ĉi UK faris!); organizi fakkunsidon por konigi diversaĵojn pri blinduloj.

En la kunsido ĉeestis 38, inkluzive de 11 blindaj (en UK mem partoprenas pli). Blinduloj prezentis sin kaj opiniojn/spertojn. Poste ankaŭ vidantoj demandis kaj komentis.

Post la kunsido venis voĉoj kaj de blinduloj kaj de vidantoj: Ĉi tian kunsidon UK havu ĉiujare.

(Kongresa kuriero, KIKUSIMA Kazuko (Krizantemo))

Tuj post la UK komenciĝis samurbe la 69-a IKBE.

IKBE-69

Gotenburgo, Svedio, 2–6 aŭgusto 2003 kun 44 partoprenantoj el 12 landoj; la plej foraj 12 personoj el Japanio

Temoj "Nova informadiko, sanĉo por la neŭtrala lingvo Esperanto!" kaj "Egaleco de virinoj kaj viroj"

La kongreso realiĝis per najbarlanda kunlaboro: Arvo Karvinen (Finnlando) kaj Otto Prytz (Norvegio) kune kun la svedaj geamikoj asistis en la preparlaboroj.

La vicprezidantino de la sveda blindul-organizo Tiina Nummi-Södergren parolis pri la streboj de virinoj por atingi egalecon en la socio, organizoj kaj familioj. Prezidantino Elisabeth Granath de la Gotenburga unuiĝo de viddifektitoj rakontis pri la loka agado. Otto Prytz el Norvegio montris sian lertecon instrui. Temis pri leciono bazita sur peco el libro de William Auld "Paŝoj al plena posedo".

Prelegoj temis ĉefe pri konatiĝo de partoprenantoj kun diversaj helpiloj. Japanoj prezentis komputilan Esperanto-voĉsintezilon por nevidantoj kaj parolis pri edukado kaj profesioj de japanaj viddifektitoj. Alia komputila programo ebligas ŝanĝon de Esperanto-tekstojn al brajlo. Haveblas ankaŭ poŝ-telefono kun

voĉsintezilo, al kiu eblas konekti brajlan ekranon; kostas 4 000–6 000 eŭrojn. Raimo Tanskanen rakontis pri du nevidantaj finnaj ornitologoj.

Vizito en firmao Iris Hadar AB konatiĝis kongresanojn kun komputila metodo por skribi kaj transformi brajlajn muziknotojn al vidulskribaj notoj kaj al sono.

Ĝenerala asembleo 2003

Rob Moerbeek (Nederlando) estis invitita kiel honora membro de LIBE.

La skizo por "Kongresa regularo de LIBE" prezentita de finna laborgrupo enhavas detalajn konsilojn, kiuj povas esti utilaj en la planado de kongresoj.

Ĉar la materialo estas sufiĉe vasta, oni decidis lasi ĝin al la estraro de LIBE por traktado.

Esenca ŝanĝo en la statuto de LIBE estas ke la deĵorperiodo de la estraranoj mallongiĝos de ses jaroj al kvar jaroj.

Internacia konferenco "Profesia klerigo de viddifektitoj – problemoj, spertoj, perspektivoj" en Moskvo, oktobro 2003

La rusa edukministerio, rusa blindulorganizo VOC kaj kelkaj aliaj lokaj societoj aranĝis en 7.–9.10.2003 konferencon pri profesia edukado de viddifektitoj okaze de Eŭropa jaro de handikapuloj. Prelegantoj kaj partoprenantoj estis invititaj pere de malferma invito en internaciaj angla- kaj esperantlingvaj revuoj, dume en brajla Esperanta Ligilo.

Laborlingvoj de la konferenco estis la rusa, angla kaj esperanto. Krom rusaj delegitoj al konferenco venis partoprenantoj el Bulgario 2, Moldavio 1, Romanio 1, Finnlando 1 kaj Ukrainio 3, entute 138 partoprenantoj.

Arvo Karvinen prelegis esperante pri perspektivoj de speciala profesia edukado en Finnlando. Lian paroladon interpretis Anatolij Masenko, konata personeco en Esperanto-movado de vidhandikapitoj.

2004

IKBE-70

Beograd, Serbio kaj Montenegro, 7–14 aŭgusto 2004 kun 90 partoprenantoj el 15 landoj

Temo "Profesia klerigo kaj enlaborigo de viddifektitoj"

Kongreson organizis ĵus naskiĝinta organizaĵo La Suda Stelo kun subteno de Serbia kaj Beograda blindulasocioj kaj Beograda Esperanto-societo kaj aliaj subtenantoj. Aprezo de viddifektita dungito kaj egalrajta traktado en la societo estis vaste pritraktitaj. Por venki en la konkurado profesiulo devas akiri pri da lertecoj.

La eŭropa sociala fonduso estas la plej grava ilo por helpi junajn kaj pli aĝajn dungitojn kaj labor-aspirantojn. Pri la fonduso prelegis Arvo Karvinen (Finnlando). Lia dua prelego traktis enlaborigon de handikapuloj. Pri kondiĉoj por sukcesa integriĝo parolis Nedeljka Loĵajiĉ, dipl. psikologo (Serbio kaj Montenegro).

Precipe estis parolita pri enlaborigo de masaĝistoj kaj muzikistoj. Anatoli Masenko prezentis edukadon de viddifektitaj masaĝistoj kune kun vidantaj lernantoj en Kislovodska kolegio en Kaŭkazo. S-ino Ljiljana Nikolich, instruistino de muzika altlernejo en Serbio kaj Montenegro ĝojigis aŭskultantojn per scio, ke viddifektitoj studas en lernejo integriĝe. Bedaŭrinde la biblioteko de muziknotoj estas nesufiĉa. Dum la internacia arta vespero pianludis la unua kuraĝa viddifektita ekzamenito de lernejo, Karolina Daniela Petroviĉ.

Pri klerigo trans limoj pere de Esperanto kaj interreto parolis Radojica Petroviĉ, prezidanto de ILEI (Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj).

Aliaj diskutitaj temoj estis pri memstara moviĝo kaj uzo de blanka bastono, komputilo kaj viddifektitoj.

Paroladoj estis surbendigitaj sur KD:n, kiun kongresanoj ricevis.

Dum ekskursoj kongresanoj konatiĝis kun la blindulmovado ekster Beograd en la regiono de Novi Sad. Blindulasocio en malriĉa kaj en politika senco nestabila lando provas organizi servojn de informado kaj enlaborigo al vidhandikapitoj. Muzikon oni ofte aŭdas, kampo de kulturo estas aprezata. La nacia vespero konsistis el muziko, kiun ofertis fama preĝeja koruso, lerta pianistino, juna gefrata bando kaj ludanto de etna arĉinstrumento. Laŭ spertuloj en la kulturo estas videblaj kaj aŭdeblaj spuroj de influo de la 300-jara turka regado de Serbio kaj aliaj regionoj de Balkano. La tradicia kongresa programero – la internacia arta vespero – ravis pere de talentoj kaj gajaj kontribuajoj de kongresanoj mem. Ĉifoje eĉ aŭdiĝis eĥo el la jaro 1912: letero de Harald Thilander – Esperanto-aktivulo en la blindulmovado – al prof. Théophile Cart.

La 89- a UK okazis en Ĉinio (Pekino) kun la temo ”Lingva egaleco en internaciaj rilatoj”.

Akademio de Esperanto (2004)

Otto Prytz (Norvegio) estis elektita kiel membron de Akademio de Esperanto. Tial ankaŭ brajle eblas kontakti la Konsultejon de la Akademio por certigi korektan uzon de esperanto kaj ricevi konsilojn. La fako de Otto Prytz estas gramatiko.

Esperanta Ligilo

En Esperanta Ligilo aperis valora serio "La unua jarcento de "Esperanta Ligilo", verkita de Attila Varró. La deka kaj lasta referaĵo aperis en la januara numero 2005.

2005

La 90-a UK okazis en Vilnius, Litovio 23–30 julio 2005 kun la temo "Universalaj Kongresoj: 100 jaroj de interkultura komunikado".

IKBE-71

Vilnius, Litovio, 30 julio–6 aŭgusto 2005 kun 90 partoprenantoj el 12 landoj
Temo: Modernigo de esperanta lernomaterialo

Ĉar en Litovio ne ekzistas organizita Esperanto-movado inter viddifektitoj, la Ĝenerala Asembleo de LIBE okazinta en Beogrado 2004 petis Arvo Karvinen (Finnlando) funkciigi preparlaborojn por la blindula kongreso en Vilno. Li ankaŭ starigis studgrupojn de Esperanto en blindullernejo en Vilno kaj Tarto (Estonio), kaj Steleto (Esperanto-asocio de viddifektitoj en Finnlando) helpis pri havigo de lernomaterialo.

La Litova Esperanto-Asocio kaj blindul-asocio kunhelpis, ke la blindula kongreso okazis en Vilno tuj post la Universala Kongreso de Esperanto. S-ro Nikitas, vicprezidanto de la blindul-asocio peris al la kongreso salutojn de la prezidanto Osvaldas Petrauskas. La prezidanto de Litova Esperanto-Asocio Povilas Jegorovas parolis en la inaŭguro de IKBE. D-ro Jukka Pietiläinen (Finnlando) ĉeestis la interkonan vesperon kaj prezentis sian laboron kiel speciala komisiito pri informado de la estraro de la Universala Esperanto-Asocio (UEA).

Novaj projektoj kaj fortigo de la pozicio de Esperanto

La kongresan temon enkondukis Arvo Karvinen kaj Antun Kovač (Kroatio). Por modernigi la maljuniĝantan esperantan lernomaterialon por internacia uzo la kongreso decidis starigi laborgrupon. Kiel prezidanto estis elektita instruisto de matematiko Anatolij Masenko el Kislovodsk (Rusio). Li kunvokos specialistojn pri instruado kaj komunikado partopreni en la laborgrupo.

La litova kvinkapa grupeto de dekkelkjaraj knabinoj donis fidon al la uzo de Esperanto ankaŭ estontece.

La prezidanto de UEA, Renato Corsetti konstatis en sia salutparolo sendita al la kongreso, ke la blindula kongreso pritraktas tute nuntempan problemon. ”Ni devas daŭre modernigi niajn lernomaterialojn kaj teknikojn kaj samtempe adapti ilin por homoj de ĉiuj generacioj. Mi estas aparte interesata pri la konkludoj de via kongreso.”

La plej aŭtoritata preleganto de la kongreso estis Otto Prytz, lekciisto de hispana lingvo ĉe la universitato de Oslo kaj membro de la Akademio de Esperanto. La Akademio konservas kaj protektas la lingvon Esperanto laŭ ĝia fundamento kaj kontrolas ĝian evoluon, esploras ĉiajn lingvajn demandojn, kiuj koncernas la lingvon, kritikis verkojn el lingva vidpunkto kaj defendas Esperanton kontraŭ ĉiaj konkurencoj.

Attila Varró, la ĉefredaktoro de Esperanta Ligilo ricevis laŭdojn pro la artikolserio pri la centjara historio de la Ligilo kaj de la Esperantomovado ekde la unua kongreso en 1905 en Francio, Boulogne-sur-Mer. En sia prelego Attila Varró konsilis i.a. kiel uzi komputilon en lernado de Esperanto kaj kiel trovi aliron al vortaroj en la reto.

Unu temo de diskutadoj estis ĉeesto de Esperanto en la internacia blindulmovado i.a. en Eŭropa Blindul-Unuiĝo (EBU). Dum pritraktado de ĉi tiu afero oni aŭdis la pensojn de ĝenerala sekretario Pedro Zurita, en la internacia blindulmovado merithava personeco. Naciaj organizaĵoj devus kunhelpi tiel, ke Esperanto-asocio estu membro i.a. de Eŭropa Blindul-Unuiĝo. ”La problemo de komunikado internacia ankoraŭ ekzistas. Tiurilate Esperanto povos ludi gravan solvan helpan rolon.”

La Ĝenerala Asembleo de LIBE elektis (2005) novan prezidanton kiel posteulon de s-ro Theodor Speckmann, kiu prezidis 13 jarojn. Laŭ iniciato de la nova prezidanto, bibliotekestrino Nedeljka Ložajiĉ (1956) el Belgrado oni decidis modifi la ĉiujarajn kongresojn aranĝante proprajn programerojn por la junularo.

La plej foraj partoprenantoj venis el Japanio, kaj ilia grupo de 12 membroj estis la plej granda. Post la Esperantokongresoj en Vilno la japana delegacio konatiĝis kun la servoj de blindulcentro Iris en Helsinki (Finnlando). KIKUSIMA Kazuko (Krizantemo) prezentis japanajn kimonojn en Iris kun interpretado de Arvo Karvinen. Kelkaj ĉeestantoj eĉ provis ilin.

Limerikisto, Otto Prytz (Norvegio), kiel kutime tre trafe kaptis la esencon de la kongreso jene:

En Vilno la IKBE sukcesis.
La stabo per helpemo impresis,
ĝi sperton ne havis,
sed tio ne gravis,
ĉar Arvo konsili ne ĉesis.”

2006

Eŭropa Unio informas esperante

El informilo de Esperanto- Asocio de Finnlando kaj de la EU-prezidanta lando.

Ĝis la fino de la jaro 2006 Finnlando prezidis Eŭropan Union. Dum ĉi tiu periodo la finna ministraro informis pri okazaĵoj plejparte angle kaj france, sed unu fojon semajne ankaŭ latine kaj esperante. La informilo ”*Conspectus rerum Latinus*” estas publikigata en la retpaĝoj de la prezidanta lando (<http://www.eu2006.fi>) kaj eblas mendi ĝin retroŝte. Esperanta traduko aperis kaj plu troviĝas en la ĉe adreso <http://conspectus.wordpress.com/>.

S-ro Tim Morley el Britio iniciatis publikigon de Esperant-lingva versio de la informilo. Li surpriziĝis aŭdinte pri la latinlingva versio.

- Estas bone, ke la informiloj de la EU-prezidanta lando aperas en la latina lingvo, ĝi memorigas nin eŭropanojn pri nia komuna historio kaj kultura heredaĵo. Sed kiam oni fokusas la atenton al la nuntempo kaj estonteco, la fakto estas, ke pli multaj eŭropanoj parolas Esperanton ol la latinan, diris Morley.
Brito, en la finna lingvo, helpe de svedlingva finno, akiris ĉe la oficejo de la finna ministraro la rajton publikigi Esperant-lingvan version.
- Tio estas tipa ekzemplo pri senlima internacia kunlaboro de Esperanto-parolantoj, ĝojis s-ino Anna Ritamäki, prezidanto de Esperanto-Asocio de Finnlando (EAF).
- Ankaŭ mia opinio la uzo de latina lingvo en la informado estas agrabla iniciato. Subtenantoj de la viva latina estas multaspekte niaj samideanoj. Ili volas progresigi justan internacian interkomunikiĝon samkiel ni. Tamen lerni Esperanton estas pli facile. La lingvo ŝajnas al ni fremda, ĝi estas same propra al ni ĉiuj, kaj neniu havas aŭtomate unuaecon nur pro la granda gepatra lingvo. Samtempe la prezidanto de EAF bedaŭras, ke la enlandaj lingvoj restis ekster la informiloj de la Prezidio.
- Publikigo de ĉiuj informiloj ankaŭ finne kaj svede estus indiko de bona memkono. Ambaŭ naciaj lingvoj de Finnlando estas en EU oficialaj kaj

laborlingvoj laŭ ĝia lingvostatuto. En la praktiko ”grandaj” lingvoj kaj parolantoj de ili tamen ricevas senmeritan avantaĝon. Almenaŭ indas paroli pri pli egala lingvopolitiko kaj uzo de komuna lingvo en kelkaj interrilatoj, kontaktoj. Civitanoj rajtas uzi de ili mem elektitan oficialan lingvon kaj ricevi respondon en la sama lingvo en kontaktoj kun instancoj de EU, sed ankaŭ ĉi tiu principo ne ĉiam realiĝas. Okazis tiel ankaŭ al mi, kiam mi kontaktis unu instancon de EU en mia gepatra lingvo, la sveda. Mi ricevis el Bruselo respondon en la angla. En la komunikado kun EU la propraj lingvoj de civitanoj neniel rajtas esti anstataŭigataj per la angla, latina aŭ Esperanto. La lingva egaleco estas grava principo, kaj oni devas insisti pri tio, memorigis la prezidanto de Esperanto-Asocio de Finnlando.

Nordia kunveno en Stokholmo 14.2.2006

Lige kun la 90-jariĝfesteno de Göte Linghede 14.2.2006 okazis en Stokholmo kunveno de nordlandaj esperantistoj (Norvegio, Svedio, Finnlando). La temo estis revivigo de Esperanto-movado en Nordlandoj pere de modernigo de lernomaterialoj kaj pere de alvoko al landaj blindulorganizoj por ke ili daŭre subtenu agadon de Esperanto-unuiĝoj de viddifektitoj.

IKBE-72

Florenco, Italio, 29 julio–5 aŭgusto 2006 kun 160 partoprenantoj el 25 landoj
Temo: Vidi per manoj

Paralele kun IKBE okazis la 91-a UK kun la temo ”Lingvoj, kulturoj kaj edukado al daŭrigebla evoluo”. Lokan Kongresan Komitaton (LKK) de la UK prezidis Aldo Grassini (Italio). En la Kleriga lundo pri temo ”Vidi per manoj – Kiel blinduloj ĝuas arton” prelegis Aldo Grassini, Pier Luigi Da Costa (Italio) kaj Otto Prytz (Norvegio). Vidhandikapitoj asistis ankaŭ en kulturaj programeroj. LIBE-kunvenoj estis malfermaj al UK-kongresanoj kaj eĉ allogis plurajn aktive partopreni en diskutadoj.

La rezolucio de la UK konstatas i.a. ke ”la strebado de la Esperanto-movado al lingva demokratio kongruas kun la valoroj de transnacia edukado celanta krei informitajn, aktivajn civitanojn, kiuj estu kapablaj kritike kompreni sin mem kaj la ĉirkaŭan mondon por partopreni la evoluprocedon responde kaj solidare”.

Estis avantaĝo, ke blinduloj povis favorpreze partopreni la Universalan kongreson kaj la loĝejo situis proksime al kongresejo. Malavantaĝo estis, ke malgraŭ la mendota por kvarhora tempo, por la Ĝenerala asembleo de LIBE, estis rezervita nur unu horo kaj duono.

La tuttaga ekskurso veturigis nin al la muzeo Omero en Ankona, kie ni multsense, ankaŭ palpante konatiĝis kun arkitekturo, historiaj kaj modernaj monumentoj. En la muzeo troviĝas abunda kolekto de modeloj, ekzemple de Panteono kaj preĝejo de Sankta Petro. La kongresa rezolucio alvokas la membro-asociojn de LIBE kaj la individuajn membrojn, ke ili en siaj landoj aktive progresigu uzon de Esperanto kiel internacia komunikilo kaj ke la landaj blindulorganizoj daŭre subtenu instruadon de Esperanto, produktadon de lernomaterialoj kaj partoprenon en Esperanto-okazaĵoj kaj internaciaj Esperantokongresoj.

La kongreso alvokas al EBU, ke ĝiaj membro-asocioj

- 1 favoru Esperanton samkiel aliajn lingvojn en internacia uzo,
- 2 subtenu instruadon de Esperanto, havigon de lernomaterialoj kaj partoprenon en Esperantorenkontiĝoj,
- 3 subtenu partoprenon de viddifektitoj, precipe gejunuloj, al la ĉiujaraj IKBE-kongresoj kun kultura kaj kleriga enhavo, precipe pro tio ke la laboron de EBU kaj de aliaj internaciaj organizoj povas partopreni nur limigita nombro da viddifektitoj.

Per apogo de naciaj blindul-asocioj la ĉiujara IKBE povos daŭre esti internacia renkontiĝo por gejunuloj kaj plenkreskuloj. Partoprenante Esperantokongresojn organizitajn de nacia membro-asocio de EBU kunlabore kun Ligo Internacia de Blindaj Esperantistoj, granda nombro de viddifektitoj havas aliron al kultura kaj kleriga programo de internacia renkontiĝo. Internaciaj kontaktoj per Esperanto favoras interŝanĝon de spertoj de blindul-asocioj kaj individuaj blinduloj en diversaj landoj.

2007

Seminario en Tokio pri enlaborigo de vidhandikapitoj

Japana Asocio de Blindaj Esperantistoj (JABE) kunlaboris la 4-an de aŭgusto 2007 por la seminario pri enlaborigo de vidhandikapitoj. Ĝi okazis en la sidejo de brajla biblioteko en Tokio. Ĝin organis tri japanaj gravaj organizaĵoj blindulrilataj kaj aŭspiciis i.a. la Ministerio pri Sano kaj Laboro kaj fondaĵoj pri bonfarto. Teamo de profesinivelaj interpretistoj volontule interpretis prelegojn en Esperanto de la tri eksterlandanoj japanen sinsekve kaj la japanlingvan prelegon kaj diskuton Esperanten samtempe. La seminarion ĉeestis 70 specialistoj kaj esploristoj sur la kampo de vidhandikapeco.

La invititaj prelegantoj, kiuj parolis esperante, estis Pedro Zurita el Hispanio, Aldo Grassini el Italio kaj Arvo Karvinen el Finnlando. Pedro Zurita rakontis kiel la hispana blindul-organizo ONCE enlaborigas handikapulojn kiel organizantojn kaj vendistojn de tutlandaj loterioj. La ŝtato koncesiis al ONCE rajton financi sian agadon pere de loterioj kaj tio ankaŭ devigas prizorgi organizadon de certaj servoj por handikapuloj. La enlaborigprocento de viddifektitoj en Hispanio egalas tiun de vidantoj.

Aldo Grassini klarigis al la aŭskultantoj kiel dum jardekoj vidhandikapuloj en Italio funkciis kiel instruistoj ankaŭ en ordinaraj lernejoj. La pinta nombro estis kiam pli ol unu mil vidhandikapitaj instruistoj laboris en diversaj gradoj de edukado ekde antaŭlernejo ĝis universitato. Nuntempe laboras 350 vidhandikapitaj instruistoj. Pliigo de vida instruado kaj rapida ŝanĝiĝo de lernomaterialoj kunportis novan defion, kiu malpliigis restadon de vidhandikapitaj instruistoj sur la eduka kampo.

Arvo Karvinen referencis en sia prelego ampleksan esploron de Stakes (esplora kaj evoluiga centro de socialaj kaj sanservaj aferoj en Finnlando) pri dungiteco en la jaroj 1995–2002. La esploro montras, ke el 25–64-jaraĝaj handikapuloj 20 procentoj estas dungitaj. Por plibonigi la situacion kaj por preventi retiriĝon de handikapitoj oni devus esence fortigi ilian eduknivelon. Nesufiĉa edukado enkondukas homojn ankaŭ alimaniere en pli malbonan situacion en la socio. Laŭ la jarlibro 2003 de la finna registro de vidhandikapo 22 % el la laboraĝaj vidhandikapitoj estis plene dungitaj kaj parte dungitaj same 22 %. La celo de la strategio 2006–2015 de la Finna ligo de vidhandikapitoj estas atingi 50-procentan enlaborigon en la jaro 2010 kaj 55-procentan en 2015. Ĉi tiun celon eblas alproksimiĝi i.a. per intensigo de profesia edukado kaj trejnado pri entreprenado. Antaŭjuĝojn de dungantoj eblas forigi per ĝusta kompreno pri malfacilaĵoj kaŭzitaj de handikapeco.

La kernaj vortoj por priskribi defiojn de evoluigo de profesia trejnado estas: bazo en laborvivo, flekseblo en laboro, individueco, aliro kaj ligita edukado, rekapabligo kaj enlaborigaj procesoj.

La strategio por la jaro 2015 de la finna edukministerio komenciĝas per la slogano: ”En klerigo estas estonteco”. La esprimo signifas jenajn aspektojn: egalrajtaj edukaj kaj kulturaj servoj estas la fundamento de bonfarta socio kaj certigante tiujn eblas certigi ankaŭ la mensan, fizikan kaj ekonomian bonfarton de la tuta loĝantaro. Kiel bazangulaj ŝtonoj de la evoluanta socio estas konsiderataj kompetenteco, krea agado kaj preteco al renovigo. Altnivela klerigo kreas bonfarton kaj malfermas eblojn por progreso de la socio.

S-ro SASHIDA Chuji, esploristo de la Japana Organizaĵo pri Dungado de Aĝaj kaj Maleblohavantaj Personoj prezentis la celojn de enlaborigo en Japanio. Li ankaŭ prezidis la diskuton.

La ĉeestantoj krome konatiĝis kun la japanaj porblindulaj servoj, vendejo de helpiloj kaj evolulaboro, kiun la blindulorganizo ofertas plejparte al vidhandikapuloj de aziaj landoj.

92-a UK en Jokohamo

4–11 aŭgusto 2007

Temo: Okcidento en Oriento: akcepto kaj rezisto

Dum la unua semajno de aŭgusto Esperanto videblis kaj aŭdiĝis en Jokohamo, Japanio kie kolektiĝis esperantistoj al la ĉiujara universala kongreso. Ĝi allogis 1 900 partoprenantojn el 57 landoj, el kiuj duono el 16 aziaj landoj.

El Eŭropo partoprenis sep blinduloj kaj el Japanio dudeko. Vidhandikapitoj estis observataj en ĉia informado, i.a. la brajla versio de la kongresa kuriero "Ondas Jokohamo" atendis jam frumatene sian leganton en la porda anso de vidhandikapita kogresano. Dankegon meritas la fidela volontulino HONDA Terumi.

Dum la kongreso okazis publika LIBE-kunveno, kie oni parolis pri aliro de blinduloj al informado kaj al lernado de Esperanto. Estis prezentitaj japanaj elektronikaj skribiloj kaj programo por voĉigi esperantajn tekstojn.

Ĉiuj speciale por viddifektitoj planitaj aranĝoj – brajligo de kongresmaterialo, tuttaga ekskurso, bankedo – estis nome de JABE apogataj kaj gvidataj de KIKUSIMA Kazuko (Krizantemo). Dum la tagmeza bankedo ŝi klarigis, kiuj japanaj pladoj estis servataj kaj kiel oni ilin manĝas. [La aranĝoj de JABE (loĝado, ekskurso kaj bankedo) ĉelis ĉefe ĉ. 25 blindulojn, sed ankaŭ vidantajn kongresanojn, por ke ili nature konatiĝu kun blinduloj kaj helpu blindulojn. JABE loĝigis ĉ. 250 kongresanojn, partoprenigis ekskurson kaj bankedon po ĉ. 60. Por sukcesi pri "porblindulaj" aranĝoj JABE konsiliĝis kun UEA, la organizanto de UK, sufiĉe frue kaj konkrete.]

Raporto kun la rubriko "Blinduloj en UK, 2007 en Jokohamo", inkluzive deziroj de JABE pri UK kaj IKBE, aperis en Esperanta Ligilo 7/2008.

IKBE-73

Albena, Bulgario, 21–27 aŭgusto 2007 kun 112 partoprenantoj el 12 landoj

Temo: Esperanto – taŭga rimedo por la integriĝo de la nevidantoj

Inter kongresanoj estis dek gejunuloj. Unu programero estis dediĉita al la 100-jariĝo de la bulgara Esperanto-asocio kaj Esperanto-movado inter la bulgaraj blinduloj. Krome kongresanoj ricevis speciale por la kongreso kompilitan kompaktdiskon kun bulgaraj poemoj kaj kantoj.

Prelegoj

Kongresan temon enkondukis Danĉo Danĉev, Bulgario

La bulgara nacia biblioteko de la blinduloj kaj Esperanto; Spas Karafezov

Kiel kroata literaturo prezentiĝas al aziaj nacioj per Esperanto; Antun Kovaĉ, Kroatio

Kion povas trovi la nevidantaj esperantistoj en la reto; Mariana Evlogieva, Bulgario

Esperanto – ponto inter diversaj literaturoj; Nedeljka Loĵajiĉ, Serbio

Blinduloj en Jokohamo; Pedro Zurita, Hispanio (prezentita de Otto Prytz)

Sociale integriĝo de la homoj kun mensodifektoj; Nadja Valkova, Bulgario

Veselina Stoilova prezentis en ŝia prelego titolita ”Socialaj servoj por homoj kun difektoj en Bulgario” reformon en la sistemo de la sociala helpado en Bulgario. Ĝi baziĝas sur tri ĉefaj principoj: decentriĝo, deinstiĉiigo, diferencigo inter liverantoj de socialaj servoj, laŭ individua agmaniero al ĉiu uzanto de la socialaj servoj.

Fakaj temoj

Attila Varró (Hungario) prezentis la komputilan parolprogramon por Esperanto,

Espeak. Kvankam tiu softvara voĉsintezilo teknologie ne estas la plej moderna,

sonas iom maŝinece, tamen ĝi estas tre bone komprenebla kaj tial efike uzebla.

Otto Prytz (Norvegio) montris aparaton, kiu faciligas solvodon kaj kompiladon de krucigramoj en brajlo. Oni povis eksperimentante konvinkiĝi pri la efektiva utileco de la lerta aparato.

Angel Sotirov (Bulgario) parolis pri sia ŝatata hobia ”Miaj okuloj pri surbalkona legom- kaj vitkulturado”.

La ĝenerala asembleo de LIBE diskutis organizajn malfacilaĵojn.

Limeriko de Otto Prytz:

Kongres’ en Albena estimis

kulturojn, kaj ĉiujn animis:

la kuraĝular’

sin banis en mar’

kaj eĉ la meduzojn ne timis.

LIBE aprobita kiel asocia membro de EBU (Eŭropean Blind Union) 2007

En la kongreso en Florenco 2006 oni konstatis, ke blindaj Esperantistoj ne devas koncentriĝi nur al Esperanto-movado, sed ankaŭ aktiviĝi en laboron de naciaj blindul-asocioj. Do, esti tie, kie aliaj estas kaj prezenti Esperanton kiel taŭgan komunikilon en internaciaj kontaktoj. Tial LIBE petis membrecon de Eŭropa Blindul-Unuiĝo.

Eŭropa Blindul-Unuiĝo (EBU) estas ne-ŝtata, ne-profitocela eŭropa organizo, fondita en la jaro 1984. Ĝi estas unu el la ses regionaj membroj de la Monda Blindul-Unuiĝo (World Blind Union, WBU). EBU celas protekti kaj progresigi interesojn de blinduloj kaj malfortevidantoj en Eŭropo. EBU havas 45 landajn membrojn, reprezentatajn de la landa delegacio. Laboron de EBU efektivas konstantaj komisionoj kaj laborgrupoj, kies fakoj reflektas la ĉefajn interesojn de EBU.

EBU disponas reton de specialistoj en ĉiuj landoj kaj vastan ekspertizon pri blindulrilataj aferoj. La specialistoj donas servojn kaj konsiladon kaj ankaŭ defendas la rajtojn de viddifektitoj. EBU esploras kaj progresigas publikan konscion kaj donas al vidhandikapitoj rimedojn por defendi iliajn rajtojn kaj vivi aktive.

La centra oficejo de EBU situas en Francio (Parizo). La oficejo respondecas pri komunikado ene de EBU kaj pri informado al la granda publiko. Ĝi produktas kvaronjaran revuon en la angla, franca, germana kaj hispana lingvoj. La angla versio haveblas surbendigite kaj brajle.

Somere 2007 la estraro de EBU aprobis LIBEn kiel membron. La Ĝenerala asembleo de EBU konfirmis la asocian membrecon en Antalya, Turkio en oktobro. LIBE rajtas nomumi reprezentantojn en komisionojn. La densa programo de la asembleo ne permesis prezenti la novan asocian membron LIBE. Laŭ konsento kun la prezidanto de EBU, lordo Colin Low, LIBE sin prezentis al delegitoj kaj membro-asocioj de EBU pere de naciaj revuoj. LIBE partoprenis la laboron de la Kultura kaj eduka komisiono (2007–2011).

2008

IKBE-74

Premantura, Kroatio, 11–18 julio kun 76 partoprenantoj el 14 landoj
Temo: Nevidantoj en medio – vivo en grandaj urboj

La kongreso okazis en eduk-rekapabla porblindula centro en la ĉemara vilaĝo Premantura, sur la plej suda parto de la Istria duoninsulo, situanta en la sudokcidenta angulo de Kroatio. La kongreson patronis la Ministerio pri protekto de medio, spacplanado kaj konstruado.

Enkonduke prelegis s-ro Lino Fuĉić, reprezentanto de la Ministerio. La unua leĝo de la jaro 1982 tuŝis nur rulseĝojn. La EU-regularo gvidas postulojn. La nuna leĝo ekde 2003 provas trovi ekvilibron inter kondiĉoj por diversaj handikapuloj. Temas pri elementoj de partopreno: aliro, moviĝo, restado, dume bezonataj estas helpiloj kiel sonoriloj, palptuŝiloj, palpmesaĝiloj por averti linion, kampniveleojn ktp.

S-ino Mira Kataleniĉ parolis pri la graveco de moviĝpovo por plibonigo de vivkvalito de blinduloj. Antun Kovaĉ rakontis pri siaj ĉiutagaj iradoj en zagreba medio kaj Nedeljka Lojajiĉ pri avantaĝoj kaj malavantaĝoj de la vivo de blindulo en granda urbo (Beogrado). Attila Varró (Hungario) enkondukis diskutadon pri la temo, kiel prezenti blindulajn interesojn en la nuna, vidocentra socio.

Diskuto pri memstara moviĝo rezultigis alvoki decidfarantojn de komunumoj, ŝtatoj kaj institucioj de Eŭropa Unio konsideri en siaj decidoj aliron de viddifektitoj al edukado, profesia trejnado kaj enlaborigo, kaj tiamaniere antaŭmalhelpi diskriminacion.

Strukturo kaj agado de EBU

LIBE estas membro de Eŭropa Blindul-Unuiĝo (EBU), kaj en la kultura kaj eduka komisiono reprezentanto de LIBE gvidas laborgrupon pri havigo de lernomaterialoj kaj teknikaj helpiloj. Pri la strukturo kaj agado de EBU parolis Arvo Karvinen. Pri financado estis prezentita lia dokumento "EU kiel subvencianto de projektoj". Fine li konstatis, ke en EBU-kongresoj la reprezentantoj de gejunuloj parolas ekz. pri studado, hobiaj kaj enlaborigo. Li instigas gejunulojn skribi al la membroj de junulara prepara grupo de EBU kaj rakonti pri Esperanto-hobio, kaj efektiviĝi internacian renkontiĝon surbaze de Esperanto. "Informado pri nia internacia lingvo, kaj amikaj rilatoj kun blindulorganizoj estas necesaj. Tiamaniere ni trovas aliron al tiuj, kiuj deziras internaciajn kontaktojn, sed ne havas kuraĝon kontaktiĝi. Nur malgranda nombro da gejunuloj havas kontentigajn taskojn en la okupoj de internaciaj organizaĵoj. La ĉiujaraj Esperantokongresoj kreas konkretan eblon sperti interkulturajn rilatojn kaj internaciecon pere de nia komuna lingvo."

La kongresa rezolucio alvokas Esperanto-unuiĝojn de viddifektitoj kune kun naciaj blindulorganizoj subteni per Esperanto la dum jardekoj kreitan kulturon. EBU publikigis la rezolucion en reta novaĵletero.

Gejunuloj en la kongreso

El Serbio la kongreson partoprenis grupo de gejunuloj, kaj junaj kroataj helpantoj kreis ĉarman kaj instigan atmosferon. Tena Kuzmanoviĉ, 15-jara lernantino, prizorgis apartan programon por gejunuloj kaj eĉ asistis en la preparoj de la internacia vespero. Ŝpomenka Ŝtimec kaptis la okazon kaj lerte aranĝis por gejunuloj eblon intervjui eksterlandajn partoprenantojn.

La kongresa semajno donis tempon al libertempaj aktivecoj, inter ili frumateno kaj vesperan banadon en la maro, sur ŝtona plaĝo konstruata por blinduloj. Eblis ankaŭ provi sagetludon (Darts) per parolanta tabulo. Iuj ŝatis promeni en la vilaĝa arbaro kaj pluki spicherbojn – laŭron, salvion, menton, rosmarenon, timianon ktp. – kiel bongustajn memoraĵojn de la suna sudo.

La 93-a UK okazis en Rotterdam tuj post IKBE kun temo ”Lingvoj: trezoro de la homaro”. Dudeko da blinduloj partoprenis. La Nederlanda Societo de Blindaj Esperantistoj aranĝis por ili specialan ekskurson kun vizito al ŝip-muzeo.

Ekstera informado (2008)

Arvo Karvinen partoprenis en aŭgusto la Ĝeneralan asembleon de Tutmonda Blindul-Unuiĝo WBU (World Blind Union) en Ĝenevo, Svislando. Laŭ konsento de William Rowland, prezidanto de WBU okazis personaj kontaktoj kaj diskutoj kun dekoj da estroj de delegacioj de WBU, i.a. kun pola delegacio, speciale pri Esperanto-kongresoj. ACB Radio World elsendis Esperant-lingvan intervjuon. Tuj post la kunveno en Ĝenevo la oficejo de WBU distribuis prezentaĵon pri Esperanto kaj LIBE al 119 landoj, entute al 800 membroj de delegacioj.

2009

La 200-naskiĝdatreveno de Louis Braille (4.1.1809–6.1.1852)

Internacia konferenco dediĉita al la inventinto de skribsistemo de blinduloj okazis 4–8 januaro 2009 en Parizo. La konferenco havis kvincenton da partoprenantoj el 46 landoj. Persone invititaj Otto Prytz (Norvegio), TANAKA Tetsuji (Japanio) kaj Pedro Zurita (Hispanio) prelegis dum la konferenco. Raporto de Otto Prytz aperis en numeroj 2–5/2009 de Esperanta Ligilo.

Esperanto-rondeto en la voĉbabilejo ”Ventrilo”

En majo 2009 en Rusio estis lanĉita Esperanto-rondeto, ”Esperanta salono” en la voĉbabilejo ”Ventrilo” por lerni, instrui kaj praktiki Esperanton. La voĉbabilejo

havas partoprenantojn de la Balta Maro ĝis Pacifiko, de la Arkta Oceano ĝis la Nigra Maro. En la jaro 2014 "Esperanta salono" havis 85 registritajn diverslandajn esperantistojn. Funkcias diversnivelaĵoj lernogrupoj, konversacia rondo kaj okazas komunaj festoj.

ICEVI (International Council for Education of People with Visual Impairment)

Zorgo pri ĉesigo de intereso al Esperanto en blindullernejoj vekis apelacii al la konferenco de instruistoj de blindaj infanoj kaj plenkreskuloj. La partoprenantoj de ICEVI-konferenco en Dublino, Irlando en la komenco de julio 2009 ricevis en la konferenca materialo unupaĝan informilon pri Esperanto kaj alvokon pri instruado de Esperanto en blindullernejoj. Dum la konferenco oni ne multe parolis pri Esperanto. Tamen la informilo montras, ke Esperanto vivas ankaŭ inter viddifektitoj.

IKBE-75

Muszyna, Pollando, 18–25 julio 2009 kun 94 partoprenintoj el 16 landoj

Temo: Integriĝo: Vi + mi = ni

La kongreso okazis en la rekapabla centro de viddifektitoj en Muszyna, suda parto de Pollando. La gastigantoj de la kongreso estis la Pola Asocio de Nevidantoj kaj Pola Esperanto-Asocio (PEA). La rekapabla centro Nestor provizis taŭgajn kunvenejoj kaj ĉambrojn. Multege por la kongreso laboris Halina Komar, prezidantino de PEA kaj Anatolij Masenko, dua sekretario de LIBE.

La temo de la kongreso estis integriĝo "Ni donu manon ĉiu al ĉiuj, por ne maltrafi vojon, ĉar pli kaj pli estos urĝa la reciproka bezono – –". Pri la temo preparis referaĵon s-ino Aneta Bartic (Rumanio), kiu pro grava malsano ne povis veni. La referaĵon voĉlegis Anatolij Masenko.

La kongresa programo estis kulturriĉa enhavante ĉiutage ekskursojn al historiaj kaj kulturaj vidindaĵoj. Koncerto de klasikaj kantoj en preĝejo estas memorinda. La internacia arta vespero fare de kongresanoj mem estis la kulmino de la semajno.

Vizito al "Abelreĝlando Kamianna" konatigis la kongresanojn kun abelbredado kaj produktado de mielkuraciloj – oni aŭdis, palpis, gustumis kaj eĉ ricevis salubran dozon de inhalo en abelujo.

Flosado sur la rivero Proprac proksime de la landlimo de Slovakio estis gaja, refreŝiga paŭzo en varmega tago.

En la kuraĉloko Krynica la kongresanoj gustumis mineralan akvon kaj per fingropintoj sentis kiel varmega la minerala akvo estas, kiam ĝi eliras rekte el la fonto.

Kiam la poldevena Papo Johano Paŭlo la Dua vizitis Pollandon en 1979, estis konstruataj altaroj por subĉielaj mesoj. La plej bone konservata altaro troviĝas en Stary Sacz, kie la Papo parolis al 650 000 homoj. Ĝi estas bela konstruaĵo kun florbedoj kaj fluanta roĵo.

Fakaj prelegoj

Otto Prytz el Norvegio prelegis pri Louis Braille: "La invento de jubileulo Louis Braille – daŭrigebla kaj daŭriginda". – La prelego aperis en Esperanta Ligilo 1–2/2014. – Li pruvis, ke la brajla skribo donis al blinduloj en la tuta mondo aliron al klereco kaj kulturo, kaj nun, kvankam la komputilaj teknologioj ĉiam pli disvolviĝas, ĝi daŭre estas bezonata. Aldo Grassini el Italio konatigis kongresanojn kun operoj de la mondfama itala komponisto Giacomo Puccini. Pier Luigi Da Costa el Italio rakontis pri sia laboro surdiskigi Plenan Ilustritan Vortaron (PIV) konsistantan el de li mem brajlitaj 74 volumoj. Li skanis la tutan tekston kaj adaptis ĝin por laboro kun voĉsintezilo kaj eĉ anstataŭigis bildojn per vortaj klarigoj. Attila Varró el Hungario montris kiel uzi la vortaron per komputilo.

Preskaŭ ĉiutage Rob Moerbeek (Nederlando) gvidis esperantajn instru-lecionojn kaj instigis la ĉeestanojn cerbumi gramatikon.

Unu el la antaŭkongresaj ekskursoj de la 94-a UK en Bjalistoko vizitis la distran vesperon de IKBE.

Decidoj de la Ĝenerala asembleo 2009

Defioj por la nova agadperiodo

La Ĝenerala asembleo de LIBE aprobis agadplanon por la jaroj 2009–2013. La ĉefaj kampoj de la venonta kvarjara periodo estas edukado, junularaj renkontiĝoj, informado kaj ekonomio.

La agadplano kuraĝigas naciajn esperanto-unuiĝojn kaj naciajn blindul-organizaĵojn progresigi disvastigon de Esperanto kaj konservadon de la pli ol centjara esperantokulturo ankaŭ inter viddifektitoj kiel unu komunikilo en internaciaj kontaktoj. La internacia lingvo Esperanto estas unika ilo de internacia komunikado, kaj proponas al siaj uzantoj veran egalrajtecon. Esperanto pruvis sian taŭgecon al ĉiuj komunikaj bezonoj. Universala Esperanto-Asocio emfazas la signifon de vera internacia lingvo kaj lingvaj rajtoj de ĉiuj nacioj.

Kunlaboro estas iniciatata kun organizaĵoj de instruistoj ILEI (Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj) kaj ICEVI (International Council for Education of People with Visual Impairment). La celo estas, ke ankaŭ aŭtoritatuloj pri edukado denove subtenu instruadon de Esperanto kaj ke ili tiel apogu interkulturajn rilatojn de viddifektitoj.

Lernado de Esperanto samtempe en pluraj landoj inter gejunuloj post lernejoj jaroj riĉigas vivmedion kaj ebligas partopreni en internacia agado, kaj siaparte malhelpas retiriĝon. En interreto troviĝas esperantokursoj, ekz. www.edukado.net

Pere de Esperanto ankaŭ eblas konatiĝi kun la monda literaturo, ekz. la nacia biblioteko en Britio (Stockport) havas valoran kolekton de brajlitigitaj libroj

Kiel atingi tion dum unu kvarjara periodo?

Por atingi la celon necesas precizaj planoj: plano por instruado kaj lernomaterialoj por blindullernejoj kaj junulargrupoj, najbarlanda kunlaboro por kursoj, junulara renkontiĝo dum kongresoj, gvidlinioj por delegitoj kaj funkciuloj, proksima kunlaboro kun la nacia blindulorganizo, informado pere de Esperanta Ligilo kaj naciaj blindulrevuoj.

La jaro 2009 estis elektojaro de LIBE. En la Ĝenerala asembleo en Muszyna kiel nova prezidanto por la periodo 2009–2013 estis elektita Arvo Karvinen (Finnlando), vice Nedeljka Ložajić (Serbio)

KATAOKA Tadashi, nome de Japana Asocio de Blindaj Esperantistoj donacis al ĉiu kongresano kompaktdiskon kun komputila programo, aŭtomate instaliga, per kiu oni povas voĉlegi esperantajn tekstojn (kun itala akĉento). La softvaro nomiĝas "Esptapi".

Strategio por LIBE en la jaroj 2009–2013

Progresigi kaj prizorgi haveblecon de esperantaj studmaterialoj en taŭga formo al viddifektitoj.

Kuraĝigi naciajn blindul-organizojn finance subteni Esperanto-unuiĝojn, lernadon de Esperanto, partoprenon en enlandaj kaj eksterlandaj renkontiĝoj kaj tiel vivteni la tradicion Esperanto-kulturon inter vidhandikapitoj. Tiamaniere viddifektitoj ricevas aliron al internacieco per la komuna lingvo Esperanto.

Partopreno en internacia kunlaboro plibonigas la kvaliton de vivo kaj forigas solecon kaj retiriĝon de viddifektitoj. Tiel naciaj blindul-organizoj kaj Esperanto-unuiĝoj kune plenumas la celojn de internaciaj blindul-organizoj kaj de UN pri homaj rajtoj.

Evoluigi efikan strategion pri komunikado por ke la membraro estu plene informita kaj ligita al la agado, kaj altigi la profilon de LIBE.

Esperanto-agado bezonas financon subtenon el enlandaj kaj internaciaj fontoj, same kiel aliaj kulturaj fakoj. Trovi financajn fontojn kaj krei planon por subteni preferindajn agadkampojn de LIBE.

Komunikado

Verki regule raportojn pri la agado por informi decidfarantojn kaj la publikon pri la laboro de LIBE kaj pri ĝiaj atingoj.

Doni pli altan profilon al LIBE en revuoj de naciaj blindul-organizoj.

Vivteni kaj evoluigi la TTT-paĝaron, teni ĝin aktuala.

Utiligi retroŝtajn diskutlistojn.

Teni proksimajn kontaktojn kun UEA (Universala Esperanto-Asocio) kaj kun ILEI (Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj).

Internacia Kongresa Universitato 2009

Tuj post IKBE okazis en Bjalistoko la 94-a UK kun la temo "Krei pacan ponton inter la popoloj": Zamenhof hodiaŭ". Otto Prytz prelegis dum la UK pri "La invento de la jubileulo Louis Braille –, daŭrigebla kaj daŭriginda". LIBE sin prezentis en la Movada Foiro kaj publika LIBE-kunveno.

En LIBE-kunsido dum la 94-a UK en Bjalistoko Otto Prytz i.a. parolis pri kunlaboro kun la Monda Brajla Konsilantaro, kies subkomitato por unuecigo de brajla notacio prezidas O. Prytz mem. Ekzemple por la retadresa heliko ekzistas tri diversaj punkto-signoj.

Dum la kunsido oni disdonis belan faldfolion kun polaj-Esperantaj poemoj de Helena Skoniecka kaj bildstrio kiel helpi al blindaj esperantistoj en mult-kolora preso, plus kompaktdisko kun voĉsintezila programo, donacita de la japana

asocio JABE. Laŭdon ricevis ankaŭ la senlaca Anatolij Masenko, kiu ne nur esence kontribuis al la organizado de la 75a IKBE (blindula kongreso), sed ankaŭ ŝvite alportis el Kislovodsk (ĉe Kaŭkazo) la brajlajn UK-programojn. (eltiraĵo de kongresa kuriero, R. Moerbeek)

Limeriko

Ni en Bjalistok' jubileis,
kaj bunta programo ĉieis;
sed ne mankis plendoj,
sur placoj, en tendoj,
pro kuloj ni preskaŭ pereis.
Otto Prytz, Norvegio

Regularo pri ekzamenoj por blinduloj

Blinduloj partoprenis Internaciajn Ekzamenojn en 1995 – 1997. Ekde somero 2009 haveblas regularo, kiu konsideras partoprenon de vidhandikapitoj. S-ino Mireille Grosjean, prezidantino de Internacia Ekzamena Komisiono IEK verkis regularon pri ekzamenoj por blinduloj. Ĝi priskribas kiel okazigi ekzamensesion de ses diversaj partoj por testi lingvokapablon. Nova regularo estis aprobata en Krakovo, Pollando dum ILEI-konferenco, fare de la ILEI-komitato, kaj en Bjalistoko, dum UK, fare de la UEA-komitato. La unua ekzamensesio por blinduloj laŭ la nova regularo okazos en Kopenhago dum UK en la jaro 2011.

Fortigo de organiza strukturo de LIBE

En aŭtuno 2009 LIBE-estraro starigis kvar laborgrupojn por profunde pritrakti problemojn: edukado kaj junularaj renkontiĝoj, delegita reto, ekonomio, regiona kunlaboro. Rekomendinde estas, ke laborgrupoj utiligu kontaktojn kun vidantaj esperantistoj.

2010

Literatura konkurso pri Vasilij Eroŝenko

Okaze de la 120-naskiĝdatreveno (la 12-an de januaro) de la fama rusa Esperantisto, verkisto kaj mondvojaĝanto Vasilij Eroŝenko, LIBE kaj REAN (Rusia Esperanto-Asocio de Nevidantoj) anoncis en januara Esperanta Ligilo konkurson pri la temo "Vivo kaj verkoj de Vasilij Eroŝenko: ilia signifo kaj valoro por la nuntempa blindulo". Alvenis naŭ konkursaĵoj el Bulgario, Japanio, Moldavio kaj Rusio.

Unuan lokon la ĵurio aljuĝis al s-ano Kunio TANABE el Japanio por lia verko "Edukista dimensio de Eroŝenko", kiu tre imponas per sia historia ekzakteco kaj originala, propra percepto de la personeco de Eroŝenko. Konklude la verkinto substrekis tion, kion oni lernu de Eroŝenko nuntempe. La eseo troviĝas kiel aldono 3 de ĉi tiu libro.

La duan kaj trian premiojn la ĵurio dividis inter du rusiaj ges-anoj. Nadja Ĵukova elektis temon "Kiu estas por mi Vasilij Eroŝenko", kaj per simpatie persona tono ŝi montris, kiom multe kaj profunde ŝi legis verkojn de Eroŝenko. En la "Esploragado pri Eroŝenko en Aŝĥabad" Nikolaj Osipenko detale kaj valore raportis pri ĝis nun malmulte konata vivperiodo de la fama vojaĝemulo.

27.-31.5.2010 REK 26 – Rusia Esperantista Kongreso en Sankt Peterburgo

La kongreso aprobis proponon de Arvo Karvinen, prezidanto de LIBE aldoni en la kongresan rezolucion, alvokon al naciaj Esperanto-asocioj por ke ili en sia agado atentu ankaŭ viddifektitajn esperantistojn: "Laŭ iniciato de Ligo Internacia de Blindaj Esperantistoj (LIBE) kaj Ligo Internacia de Esperantistaj Instruistoj (ILEI) ankaŭ viddifektitaj studentoj estas invitataj partopreni en julio 2010 Someran Esperanto-Studadon (SES 2010) en Slovakio, Piešt'any unuafoje. Moderna sonregistra kaj prestekniko ebligas produktadon de lernomaterialoj en formo oportuna por viddifektitoj. Tiel viddifektitaj studentoj povas partopreni ĝeneralajn lingvokursojn kune kun vidantaj kamaradoj." La rezolucio tamen ne realiĝis.

IKBE-76

Vieno, Aŭstrio, 10–15 julio 2010 kun 60 partoprenantoj el 13 landoj

Temo: Kiamaniere trovi taŭgajn rimedojn por allogi studadon de Esperanto por plifortigi nian movadon kaj kiuj helpiloj – kaj teknikaj kaj neteknikaj – povus efektivi tiun ĉi celon

Enkondukan parolon "Kiel aktivigi Esperanton inter viddifektitoj por vivteni Esperanto-kulturon?" prezentis Arvo Karvinen, prezidanto de LIBE. Li instigis i. a. partopreni en ĝeneralaj kursoj kaj regiona agado. "El kelkaj landoj dum pluraj jaroj neniu partoprenis kongresojn. Por teni tiujn landojn inter nia rondo, necesas inviti najbarlandajn reprezentantojn al zorgeme preparita regiona renkontiĝo. Indas aranĝi tiun renkontiĝon ĉe najbaro, precipe se izolado daŭris jam longe. – – Estus bone, se ni dum ĉi tiuj tagoj povus verki agadplanon por renkontiĝoj. Eble vidantaj samideanoj povus asisti. – – Ni diskutu por klarigi metodojn konservi la centjaran Esperanto-kulturon. Kunlaboro estas nia forto." Bedaŭrinde kunsidetoj en kelkaj grupoj por celkonscie trakti la temon ne povis okazi pro manko de tempo.

Prezentitaj referaĵoj temis pri la vivo kaj verkoj de Joseph Haydn kun kelkaj muzikaĵoj, kaj prelego pri la interrilato kun gvidhundoj.

Vizito al Esperanto-muzeo kaj la lasta vespero en vingastejo "Heuriger" estas neforgeseblaj. Pli ol 50 kongresanoj veturis uzante publikajn trafikilojn kaj samtempe gaje manifestis Esperanton. Por kongresanoj tio donis eblecon senti pulson de la urbo kaj ricevi kontaktojn kun enloĝantoj.

Decidoj

La kongresa rezolucio alvokas naciajn Esperanto-asociojn kaj naciajn blindulorganizojn en sia agado atenti ankaŭ viddifektitajn esperantistojn.

La Ĝenerala asembleo de LIBE aprobis agadraporton kaj finanĉan raporton pri la jaro 2009 (raporto de prezidanto pri la agadperiodo julio 2009–printempo 2010 aperis en Esperanta Ligilo 5/2010 kaj sendita brajle al delegitoj de LIBE kaj EL). Agadplano por la jaroj 2010–2011 aperinta en EL 5/2010 estis aprobita. Aprobita buĝeto por la jaro 2010 rezervas 2.000 eŭrojn por edukado.

Ekstera informado

Dum la 95-a Universala Kongreso de Esperanto (UK) en Havano, Kubo 17–24 julio 2010 LIBE sin prezentis en la Movada Foiro kaj publika LIBE-kunveno. La temo de UK estis "Intermiksiĝo de kulturoj". S-ino KIKUSIMA Kazuko (Krizantemo) el Japanio sukcesis aranĝi por 11 viddifektitoj viziton en la kulturen centron de ANCI (Asociación Nacional del Ciego de Cuba). Sub gvido de s-ro Joaquin Borges, esperanto parolanta estrarano de ANCI gastoj konatiĝis kun la agado de centro, brajla biblioteko kaj eldonejo kaj ricevis sciojn pri la stato de blinduloj en Kubo – historio, laboro, atingoj kaj malatingoj de ANCI.

Artikolo pri Somera Esperanto Studado en Slovakio kaj IKBE en Vieno aperis en la informilo de WBU (tutmonda blindul-unuiĝo) en marto kaj anonceto pri studsemajno kaj IKBE en informilo de EBU (Newsletter 72).

Internaciaj kaj eksteraj rilatoj 2010

EBU

Konferenco de Kultura kaj eduka komisiono de EBU

LIBE partoprenas laboron de Kultura kaj eduka komisiono. Konferenco pri aliro al kulturo kaj heredaĵo okazis en oktobro en Londono en Victoria kaj Albert muzeoj

kun temo "En kontakto kun arto" (In Touch with Art). La konferenca rezolucio enhavas alvokon pri egalrajta aliro de viddifektitoj al muzeoj. La rezolucio estis prezentata en decembro al la komisiono de Eŭropa Unio kaj Eŭropa Forumo de handikapuloj (European Disability Forum) dum unutaga konferenco en Bruselo, Belgio.

S-ino Carol Borowski, prezidantino de Kultura kaj eduka komisiono admonas: "Estas bezonata lobiado nacie kaj internacie por sekurigi, ke la rezolucio grimpu pli supren al EU leĝdona proceso. Ni devas sciigi pordistojn de nia kultura heredaĵo, ke ni ne volas resti ekstere. Ni estas frapantaj liajn pordojn, kaj ni volas eniri por ĝui kaj partopreni en nia kultura heredaĵo!".

Arvo Karvinen estis invitita al la kunveno de EBU-estraro en Helsinki en oktobro. Lia raporto pri agado kaj planoj de LIBE estis dankeme akceptita kaj notita en protokolon.

ILEI

La unua konkreta rezulto de kunlaboro kun ILEI estas, ke ankaŭ viddifektitoj estis bonvenaj partopreni Someran Esperanto-Studado (SES 2010) en Piešťany, Slovakio en julio. La programon de studsemajno – lernado, seminario, distra programo – partoprenis entute 190 lernantoj, eĉ familioj kun aktivaj infanoj. Kelkaj eĉ bone parolis. Nur kvar viddifektitoj partoprenis aranĝojn en Piešťany. Nedeljka Lojajic (Serbio) partoprenis seminarion pri interkultura edukado kaj instruado de Esperanto. La seminario estis altnivela, kaj lingve kaj fake. Studsemajnon partoprenis tri viddifektitoj el Finnlando. Ili sekvis la instruadon brajle. Arvo Karvinen sekvis aranĝojn kaj instruadon de studsemajno.

En la aldono 5 de ĉi tiu libro vidanta instruistino rakontas ŝiajn spertojn pri instruado de Esperanto al vidhandikapuloj.

Kostariko kaj Kubo

Intereso al Esperanto inter viddifektitoj vekiĝis en Kostariko kaj Kubo. Venis petoj pri brajla materialo.

2011

IKBE-77

Olomouc, Ĉeĥio, 14–21 julio 2011 kun 50 partoprenantoj el 12 landoj

Temo: Plibonigado de aliro al kulturaj aranĝoj por blinduloj

La kongreson aranĝis la Blindulsekcio de Ĉeĥa Esperanto-Asocio sub aŭspicio kaj kun financa apogo de Unuiĝinta organizaĵo de nevidantoj kaj malfortevidantoj de Ĉeĥa respubliko. Ankaŭ la urbo Olomouc, vendejo de blindulhelpiloj kaj privata transporta entrepreno grave subtenis efektivigon de la kongreso. La cirklo fermiĝis: la unua internacia kongreso de blindaj esperantistoj okazis en 1921 en Prago, en tiam Ĉeĥoslovakio. La 90-jara Esperanto-movado estis observata en la kongresa programo en prelegoj kaj muzeaj ekskursoj.

En kongresaj preparlaboroj la gastigantoj efike utiligis informadikon por atingi ankaŭ viddifektitojn. La unuan fojon la kongresa programo kaj prezentoj aperis en retejo, skribe kaj aŭskulteble.

Krom el kunvenoj kaj prelegoj, la programo konsistis el deko da ekskursoj, kaj la pinto estis la tradicia internacia vespero fare de kongresanoj mem.

Aŭtoritata apogo al la kongreso

S-ino Jana Melicháková, prezidantino de Ĉeĥa Esperanto-Asocio (ĈEA) konstatis en sia saluto al la kongreso, ke ŝi estas fiera pri ŝiaj aktivaj blindaj anoj de ĈEA, kiuj preparis la kongreson en Olomouc. S-ro Josef Stiborský siaparte konfirmis, ke la landa blindul-organizo (SONS) bone konscias, kiel longan kaj riĉan tradicion havas Esperanto-movado inter blinduloj ĝenerale kaj en Ĉeĥa respubliko speciale kaj kiel ĝi kontribuas al reciproka interŝanĝo de spertoj kaj ĉiuspecaj informoj inter viddifektitoj. SONS aprezas, ke Esperanto ne nur ebligas, sed unuavice daŭre realigas kontaktojn inter nevidantoj en la tuta mondo. Esperantistoj interesiĝas pri kulturaj tradicioj kaj nuntempa realo en aliaj landoj. Tial SONS daŭre apogas la esperantistojn kaj subtenas per eldonado de la revuo Aŭroro kaj per helpo aŭ organizo de iliaj renkontiĝoj, kiel apogante la kongreson en Olomouc. En la inaŭguro ni aŭdis ankaŭ saluton de la finna ambasadorino Päivi Hiltunen-Toivio.

Alirebla kulturo

La ĉeftemo de la kongreso estis ”Plibonigado de aliro al kulturaj aranĝoj por blinduloj”. La temon enkondukis Nedeljka Lojajiĉ el Serbio kaj Antun Kovaĉ el Kroatio. Dum diskutado oni konstatis, ke strebo al plibonigado de ebligo percepti kaj ĝui diversajn kulturajn aranĝojn kaj objektojn por viddifektitoj estas ĝenerala.

Alireblecon ni spertis mem dum vizitoj kaj deko da ekskursoj en Olomouc kaj en ĝia ĉirkaŭaĵo: muzeoj, fortikaĵoj, vendejo de blindulhelpilo, bestĝardeno. En Olomouc troviĝas palpebla modelo de historia parto de la urbo, ankaŭ kelkaj preĝejoj havas modelojn, kaj tekstojn brajle kaj larĝpresite. Ni konatiĝis kun ekleziaj objektoj en palpebla ekspozicio, supreniris al sonorilejo en la katedrala turo kaj

konatiĝis kun sonorilteknikoj, aŭskultis sonoradon kaj vizitis ĉefdiocezan muzeon. Promenadoj kaj senpagaj veturadoj sur la tramvojoj donis ioman konon de la ĉiutaga vivo en Olomouc, kaj enloĝantoj ricevis pruvon pri taŭgeco de Esperanto kiel komuna lingvo inter homoj el diversaj landoj.

Muziko estas esenca parto de kongresoj, do muzikon ni ĉiutage aŭdis: Sankta meso en Esperanto en la preĝejo de sankta Miĥaelo, koncerto en la katedralo de sankta Venceslao, gitarkoncerto en monaĥeja muzeo, kantanta fontano, violono ĉe la Esperanto-monumento kaj Esperanto-arbo de la jaro 1932 en la plej granda parko de la urbo, kornorkestro dum vespermanĝo en ĉasista kabano en arbaro, kaj internacia muziko en la arta vespero.

Inteligenta haltejo

En la urbo Olomouc troviĝas 60 t.n. inteligentaj haltejoj. Vidhandikapito povas per propra skatoletforma elsendilo troviĝanta en mano aŭ en tenilo de blanka bastono komuniki kun publikaj trafikiloj. La aparato havas kvar klavojn. Per la unua klavo aŭdiĝas la nomo de la haltejo, per la dua la alventempoj, linioj kaj direktoj. Per la tria klavo el aŭdigilo lokita sur trafikilo aŭdiĝas la numero kaj direkto de linio de alvenonta trafikilo kaj anonco, ĉu ĝi estas senbariera. Se blindulo volas uzi ĝin, li/ŝi premas la kvaran klavon. La ŝoforo ricevas la informon kaj malfermas pordon.

Ĉiuj trafikiloj en Olomouc estas ekipitaj per tia sistemo. Simile ekipitaj estas trafikiloj en preskaŭ tuta Ĉeĥio. Inteligentaj haltejoj estas instalitaj ĝis nun krom en Olomouc ankaŭ en kelkaj aliaj urboj. En Prago troviĝas kelkaj haltejoj en unu kvartalo. La elsendiloj estas utiligeblaj ankaŭ por trovi enirejon en gravaj lokoj (stacidomoj, oficejoj, kulturaj aranĝoj, ŝtuparoj, eskalatoroj en metroo ktp).

Muzeoj, fortikaĵoj, ekzotikaj bestoj

Tuttaga ekskurso venigis la kongresanojn suden al la urbo Brno, kie ni vizitis teknikan muzeon kun blindula kulturo. Ni aŭdis prelegon pri K. Em. Macan kaj pri la 90-a datreveno de la unua internacia kongreso de blindaj esperantistoj en Prago 1921. En la muzeo ni konatiĝis kun ekspozicio de muzikmaŝinoj kaj grandegaj gurdoj. (surbaze de la kongresa libro kaj kompletigaj scioj de Jan Přiborský)

Lernolibro en brajlo

En julio 2011 aperis la brajla versio de la lernolibro "Esperanto per rekta metodo" de Stano Marček. Ĝin pretigis Attila Varró, Hungario. Senpagaj ekzempleroj estis senditaj al Kubo, Tanzanio kaj Vjetnamio. Laŭdinda estas la projekto de Pedro Zurita, Hispanio. Li pretas ekipi la lernolibron per hispanaj prisskriboj kaj presi ĝin private. Kajereto pri konsiloj por kursgvidanto pretiĝis por presejo.

Ekstera informado 2011

En januaro la oficejo de EBU disvastigis al siaj membro-asocioj kaj estroj de komisionoj anoncon pri la Somera Esperanto-Studado (SES 2011) en Slovakio (Nitra). Surbaze de tiu anonco en Belgio vekigis intereso al Esperanto. EBU publikigis la anoncon ankaŭ en siaj informiloj (Newsletter 78-80) kaj en retejo. Same aperis anonceto pri IKBE en Olomouc. ACB Radio World sciigis pri la studsemajno kaj IKBE.

Novaj eksterlandaj kontaktoj estiĝis en aliaj kontinentoj. Petoj bri brajla materialo alvenis el Brazilo, Dominika Respubliko, Tanzanio kaj Vjetnamio.

Somera Esperanto-Studado (SES 2011)

La internacia studsemajno okazis en Slovakio (Nitra) en julio. La programon – lernado, seminario, distra programo – partoprenis entute 191 lernantoj el 28 landoj, inter ili du vidhandkapitoj el Finnlando. Malgraŭ forta varbado LIBE ne sukcesis allogi viddifektitojn el diversaj landoj partopreni la studsemajnon.

Internacia Ekzameno

Post aprobo de nova regularo fare de la Komitato de UEA kaj la Komitato de ILEI, estis planita la unua sesio por blinduloj en julio dum la 96-a UK en Danio (Kopenhago 24–30 julio 2011). Ne venis kandidatoj. Anstataŭe okazis laborkunsido kun kvin partoprenantoj. La kunsidon gvidis Mireille Grosjean, prezidanto de la Internacia Ekzamena Komisiono. Estis konstatite i.a., ke devus ekzisti retejo kun stoko da kulturaj konoj en adekvata formo. Se temas pri teksto por blinduloj, ĝi ne estu PDF-formata, oni uzu puran HTML sen kadroj, tabeloj aŭ ilustraĵoj. La formoj de tiuj dokumentoj pri kulturaj konoj povas esti brajla, grandlitera aŭ voĉa, aŭ tri tiaj formoj samtempe.

IJK

La 67-a Internacia Junulara Kongreso (IJK) okazis en Ukrainio (Kijivo) en julio 2011 kun 311 partoprenintoj el 34 landoj inter ili kvin viddifektitoj. La ĉeftemo estis ”Daŭropova evoluo – nova koncepto por la homaro”.

EBU

Arvo Karvinen estis invitita al la ĝenerala asembleo de EBU en Danio (Fredericia) en oktobro 2011. Li havis eblecon mallonge paroli pri Esperanto, pri kongresoj, speciale pri la planata kongreso en Ukrainio en la jaro 2012. Lia resumo de la asembleo aperis en Esperanta Ligilo 6/2011.

ICEVI (International Council for Education of People with Visual Impairment) Braille21 en Leipzig en septembro 2011

Inter la partoprenantoj en la monda brajloaranĝo troviĝis Otto Prytz el Norvegio, Attila Varró el Hungario ka el Japanio TANAKA Tetsuji, kiu eĉ prelegis. Informa raporto verkita de Attila Varró pri prelegoj, prezentaĵoj kaj ekspozicioj aperis en Esperanta Ligilo 8/2011.

2012

Tutmonda KER-ekzameno pri Esperanto

La KER-ekzameno pri Esperanto estas farita laŭ la Eŭropa referenckadro kaj ĝi estas kontrolata en la Budapeŝta universitato ELTE, kiu ĉiujare akceptas pli ol mil ekzamenojn. La ekzameno konsistas el skriba kaj parola partoj je la niveloj: baza, meza kaj supera. La 9-an de junio 2012 la Tutmondan skriban ekzamenon partoprenis 360 kandidatoj samtempe en pluraj eŭropaj landoj kaj en Brazilo, Japanio, Malajzio, Meksiko, entute en 17 landoj kaj 29 urboj.

En Finnlando la skriba ekzamensesio okazis en Helsinki en la kunvenejo de vidhandikapuloj. Arvo Karvinen estis honora protektanto de la ekzamensesio. La ekzamenon partoprenis je ĉiuj tri gradoj naŭ kandidatoj, inter ili unu viddifektito. La ekzameniĝintoj reprezentis kvar gepatrajn lingvojn, sed ĉiuj parolas Esperanton. Tiu grupo atestas, ke Esperanto estas lingvo inter la aliaj kaj taŭgas en internaciaj kontaktoj.

Agado de LIBE 2012

Kiel ĉefredaktoro de EL funkciis ekde januaro Olena Poŝivana, Ukrainio. Krom reta korespondado la estraro komencis uzi skajpon. Okazis du skajpkonferencoj.

LIBE eldonis Kongresan kantareton kun financa subteno de Steleto, Esperanto-asocio de viddifektitoj en Finnlando. La kantareton kompilis Anatolij Masenko (Rusio) kaj la brajlan eldonon redaktis Jiří Jelínek (Ĉeĥio). La brajla eldono aperis en Prago kaj la platskriba en Helsinki. Steleto pretigis ankaŭ modestan diskon kun du finnaj kantoj, por ke la aliĝintoj povu trejni la kantojn jam hejme kaj por inspiri kantemulojn partopreni en la kongreso en Kijivo.

LIBE sekvis la projekton de UEA "Libroj por Vjetnamio" sendinte kaj lernolibrojn en brajlo kaj kompaktdiskojn. Ankaŭ membroj de LIBE helpis per siaj donacoj.

La Somera Esperanto-Studado (SES 2012) okazis en Slovakio (Nitra). La programon de la studsemajno – lernado, seminario, distra programo – partoprenis 250 lernantoj el 23 landoj. Unu vidhandikapulo partoprenis en Nitra.

IKBE-78

Kijivo, Ukrainio, 13–20 julio 2012 kun 58 partoprenantoj el 14 landoj

Temoj: Blinduloj por digna vivo kaj homaj rajtoj” kaj ”Ni kantu kune kaj parolu pri naciaj kulturoj kaj Esperanto

La kongreso okazis en sanatorio apud Kijivo.

La homaj rajtoj fakte estas konstanta temo. Estas bone, ke ankaŭ LIBE partoprenos tiun diskuton. Eŭropa Blindul-Unuiĝo (EBU) ek de multaj jaroj klopodas influi laboron en Eŭropa Unio (EU) por ke EU adoptu direktivon kontraŭ diskriminacio. La ĝenerala asembleo de EBU okazinta en oktobro 2011 i.a. alvokas registarojn kaj instituciojn de EU ratifi la interkonsenton de UN pri rajtoj de viddifektitoj.

La prelegoj pri la ĉefa temo:

Kion donis al ni la norda bonfarta modelo, sendita de Timo Kuoppala, Finnlando
Rekapablighaj servoj en Finnlando – defioj kaj ebloj, sendita de Teuvo Ruponen. Lia prelego aperis en Esperanta Ligilo 9/2012.

La situacio de vidhandikapuloj en la labormerkato en Svedio, s-ino Gilda Stiby
Pelkonen

Novaj servoj de sociala subteno al la nevidantoj en Serbio, Nedeljka Lojajiĉ.

La prelego aperis en Esperanta Ligilo 8/2012.

La prelego ”Misteroj de palpenco” de Olena Poŝivana aperis en Esperanta Ligilo 3/2014.

LIBE subtenis naŭ novulojn partopreni en la kongreso kaj Esperantokurso en Kijivo.

La ĝenerala asembleo de LIBE nomumis s-inon Violetta De Filippo (Italio) kiel delegiton de LIBE ĉe EBU por la kvarjara periodo 2012–2016.

Estis aprobita rezolucio pri la kongresa temo jene:

”Blinduloj por digna vivo kaj homaj rajtoj”.

Al ĉiu homa unuopulo servas la samaj rajtoj kaj permesoj. La invalideco aperas kiel sekvo de interago inter la personoj kun vidaj misfunkcioj kaj sociaj baroj, sekvantaj el homaj kondutmanieroj, kiuj estas obstakloj dum plena kaj efika partopreno de

viddifektitaj personoj en la socia vivo egalrajte kun ĉiuj civitanoj.

Iu ajn formo de diskriminacio de iu ajn persono pro ties viddifekto estas krimo kontraŭ digno kaj honoro de homo.

Viddifektitaj personoj konstante konfrontas kun baroj, malebligantaj ilian partoprenon en la socia vivo. La plimulto de viddifektitaj personoj troviĝas en malfavora socia kaj ekonomia situacio.

Ĉesigo de socia eskludo de viddifektitaj homoj estas grava defio kaj signifoplena faktoro de la socia disvolviĝo je la tuthomara skalo, socia kaj ekonomia, kaj ankaŭ estas efika agadmaniero por likvido de mizereco.

Viddifektitoj havas la rajton studi, plialtigi sian kvalifikon kaj labori en egalaj kondiĉoj kun aliaj civitanoj, inkluzive la rajton vivteni sin per laboro, elektita de ili, akceptita en labormerkato kaj labormedio en maniero transparenta, nediskriminacia kaj alirebla por ĉiuj personoj.

Nepermesbla estas iu ajn formo de diskriminacio pro viddifekto rilate al ĉiuj agadsferoj koncerne diversajn formojn de enlaborigo, laborkariero kaj laborkondiĉoj respektive al laborsekureco kaj laborhigieno.

Senĉesan defendon postulas la rajtoj de viddifektitoj, traktataj laŭ principoj de egaleco kun la aliaj civitanoj, al justaj kaj konvenaj kondiĉoj de laboro, soci-agado, ripozo kaj ĉiutaga vivo.

Por assekuri tion, ni, viddifektitoj, diversmaniere (pere de amaskomunikiloj, Interreto, publikaj aranĝoj, propagandaj kunvenoj, elpaŝoj en lernejoj ktp.) kuraĝe kaj realisme informu la vastan publikon pri la eblecoj, atingoj, sukcesoj, malfacilaĵoj kaj realaj bezonoj de blinduloj.

Blindaj esperantistoj kunlabore kun la naciaj kaj internaciaj blindulaj kaj porblindulaj organizaĵoj informu internaciskale (pere de amaskomunikiloj, Interreto, publikaj aranĝoj ktp.) pri novaj atingoj de blinduloj, apero de novaj blindul-helpiloj, originalaj solvoj de specifaj blindul-problemoj ktp. cele al disvastigo de tiu sperto en aliaj landoj.

Pere de la landaj kaj lokaj organizaĵoj blindulaj kaj porblindulaj ni propagandu la progresivajn atingojn kaj sperton de solvado de specifaj blindulaj problemoj, novajn blindul-helpilojn je la nacia kaj loka nivelo.

Ni, blindaj esperantistoj, pere de informado, konkreta agado, persona viv-ekzemplo klopodu forigi la negativajn stereotipojn kaj ellabori la pozitivan bildon de blinduloj kiel egalrajtaj, dignaj, plenvoloraj civitanoj.

Akceptita unuanime kun kelkaj stilaj amendoj la 19-an de julio 2012.

LIBE-kunveno en Vjetnamio (Ha Noi)

La 97-a UK okazis en Vjetnamio (Ha Noi) 28 julio–4 aŭgusto 2012 kun la temo "Esperanto – ponto al paco, amikeco kaj disvolviĝo".

Eltiraĵo de raporto de Rob Moerbeek en la kongresa kuriero:

- LIBE-kunvenon ĉeestis 15 personoj el 8 landoj. La rolon de la ĉ. 400-membra LIBE skizis la kasisto Pier Luigi Da Costa: ne vere por sin izoli de la aliaj esperantistoj oni fondis la Ligon, sed por pli facile informi unu la aliajn pri novaj helpiloj kaj teknikoj. – La gastigan landon reprezentis s-ino Ngyuyen Thi Ngoc LAN, kiu rakontis, ke ŝiaj ĉ. 80 blindaj Esperanto-kursanoj ĝenerale post la kurso reiras al sia hejmloko: malfacilas ilin retrovi dise en la lando. Por la nuna kurso ŝi ricevis materialojn de JABE (Japana Asocio de Blindaj Esperantistoj). La sola ĉeestanta, s-ro Phan Ngoc CUNG kiel muzikisto jam partoprenis en la Solena Inaŭguro, gitare kaj en la ĥoro de junaj vjetnamoj. Tre bonvolus por lia plua studado brajlaj angla-Esperanta vortaro kaj legolibroj. Rilate la ceterajn vjetnamajn kursanojn de s-ino Lan, s-ro Da Costa rimarkigis ke eĉ senpage LIBE membrigas ilin, kondice ke ili anoncu por LIBE-aneco: tiel ili ricevos la organon brajle aŭ rete por subteni sian lingvonivelon.
- Malazia esperantisto, Chui Lai Eng venis kun la celo ekscii kiel komenci agadon por sialandaj vidhandikapuloj. Interesiĝis ankaŭ unu el la junaj vjetnamaj kongresaj helpantoj, s-ino Pham Minh Trang.

2013

La 98-a UK okazis en Islando (Reykjavik) 20–27 julio kun temo ”Insuloj sen izoliĝo: por justa komunikado inter lingvo-komunumoj”.

IKBE-79

Obzor, Bulgario, 28 aŭgusto–3 septembro 2013 kun 71 partoprenantoj el 11 landoj
Temo: La nevidantoj en la civitana socio

La jaro 2013 estis deklamita de la Unuiĝintaj Nacioj kiel jaro de la civitanoj.

La kongresa temo estis elektita lige kun tio. La ĉefan prelegon pri la temo prezentis Veselina Stoilova el Varna, Bulgario.

Aliaj referaĵoj estis i.a.

Ĉu kroataj nevidantoj estas egalrajtaj civitanoj, Antun Kovač, Kroatio

Klerigado kaj edukado de la nevidantoj en la civitana socio, Nedeljka Lojajić, Serbio
Interkultura psikiatro kaj psikoterapio, Julia Korjak, Germanio

Interreto – fonto de informoj kaj inspiroj, Mariana Evlogieva, Bulgario. La prelego aperis en n-ro 9 de Esperanta Ligilo.

Mobilan sontabuleton (MOST) prezentis Norbert Markus el Hungario. Temas pri parola aplikaĵo por poŝtelefonoj kaj tablet-komputiloj, kiu permesas uzi ilin pere de brajla sistemo.

La jaro 2013 estis elektojaro de LIBE. Anatolij Masenko el Kislovodsk, Rusio estis elektita prezidanto por la nova kvarjara periodo, vice Natalia Kasymova, Germanio.

Reprezentantino de LIBE en internaciaj blindul-organizoj Violetta de Filippo (Italio) ĉeestis la kunvenon de komisiono de Eŭropa blindul-unuiĝo (EBU) en Montenegro.

2014

IKBE-80

Harkany, Hungario, 13–19/7 kun 59 partoprenantoj el 12 landoj

Temo: Niaj kongresoj – plaĉa diverseco

Kune kun LIBE-estraro la kongreson preparis s-ino Viŝnja Brankoviĉ, la estrino de la firmao Orbis Pictus. La firmao estas registrita en Italio kaj ĝenerale okupiĝas pri organizo de diversaj turismaj aranĝoj. Kvankam ĉi-foje Hungario ne estis la organizanta lando, tre multe faris persone Attila Varro, kiu ne nur senpage pretigis la kongreslibron en brajlo, ankaŭ zorgis por renkonti kaj adiaŭi la kongresanojn, kaj por dezirantoj li aranĝis tre interesan kaj agrablan postkongresan restadon en Budapeŝt. Dankon meritas ankaŭ Pavel Rjabov (Rusio), kiu senpage printis platskriban version de la kongreslibro.

Praviĝis la kongresa ĉeftemo ”Plaĉa diverseco”. Ĉiu trovis tion, kion li/ŝi preferis: ĉu seriozajn diskutojn post la referaĵoj kaj dum la du kunsidoj de LIBE-Asembleo, ĉu E-kursojn aŭ ekskursojn, ĉu artajn programerojn aŭ kuracigajn termajn baniĝojn.

Prelegoj:

”Esperanta Ligilo” 110-jara, Anatolij Masenko, Rusio

Impresoj, travivaĵoj kaj spertoj pri IKBE-kongresoj; Antun Kovaĉ, Kroatio

IKBE-oj okazintaj en Bulgario; Vladimir Ĵelev, Bulgario

Prezento de la versaĵlibreto de T. Ŝoŝev; Vladimir Ĵelev

Jubilea jaro de ĉeĥa muziko; Jiří Jelínek, Ĉeĥio

Rilatoj inter Aŭstrio kaj Hungario dum pluraj jarcentoj; Veronika Haupt, Aŭstrio

Kvalito de la vivo de la nevidantoj en Serbio; Nedeljka Lojajiĉ, Serbio

Pri socialaj rajtoj de blinduloj en Rumanio; Livi Ciobanu, Rumanio

Subvencioj por vojaĝado de blinduloj en publikaj trafikiloj; Natalia Kasymova, Germanio

Blindulorganizaĵoj en unuopaj landoj de Aŭstrio; Christian Gierlinger, Aŭstrio

Ebloj de kleriĝo kaj profesiaj studoj de vidhandikapitoj; Veronika Haupt, Aŭstrio

Pri la plej granda speco de araneo; Walter Wagner, Aŭstrio

Anatolij Masenko en sia prelego rememorigis 100-jaran jubileon de Esperanta Ligilo kaj tiujn personecojn, kiuj kontribuis al ĝia disvolviĝo. Li substrekiĝis bazan signifon por peri diversfakajn informojn. Li parolis pri tiutempaj fervoraj blinduloj, kiuj partoprenadis unuajn ĝeneralajn E-kongresojn. Masenko akcentis meritojn de tiuj, kiuj organizis blindulmovadon kaj kongresojn de blindaj esperantistoj.

Komputilistoj havis apartan kunsidon, gvidatan de Gradimir Kragič (Bosnio-Hercegovino), kiu dense kunlaboras kun usona firmao pri voĉsintezilo JAWS (Freedom Scientific). Ili decidis plivigligi la fakajn kontaktojn, uzante la ĉeĥan E-konferencon.

Dum ekskurso al Siklos la kongresanoj konatiĝis kun la kelkcentjara, nun grandparte renovigita fortikaĵo. Eblis palpi armilojn kaj turmentilojn, destinitajn por malamiko kaj krimuloj. Tamen pli interesa montriĝis la vinmuzeo, kie oni povis aĉeti famajn vinojn el regiono Villany. La tuttaga ekskurso venigis partoprenintojn al la urbo Pecs.

La Ĝenerala asembleo de LIBE decidis ekŝiĝi el EBU pro manko de resurso por la kunlaboro kaj pro ekonomiaj kialoj.

La 99-a UK okazis en Argentino (Buenos Aires) 26 julio–2 aŭgusto 2014 kun la temo ”Ĉu la nepoj nin benos? Streboj al daŭripova estonteco”.

Eltiraĵo de kongresa kuriero (Bonaera voĉo N:ro 5, 1.8.2014):
”LIBE-kunsido (Rob Moerbeek)

En la kunsido de Ligo Internacia de Blindaj Esperantistoj – LIBE (Hess, mardon) ĉeestis 5 handikapitoj kaj 6 interesatoj. La kunsidon gvidis Otto Prytz (Norvegio), kiu petis la ĉeestatojn sin prezenti. Pri la akireblo de informoj li konstatis grandan progreson. Kompaktdisko kompilita de LIBE-kasisto Pier Luigi Da Costa faras ankaŭ la retan PIV konsultebla kun klarigo de la simboloj (z = zamenhofaĵo). Kiel membro de la AdE [Akademio de Esperanto] konsultante tiun vortaron, li multe profitas de tiu laŭdinda laboro. Sed Da Costa pretigis simile terminaron de kreskaĵoj, ”Ne-PIVajn Vortojn” (Cherpillod) kaj la ĝisdatigitan ”Enciklopedion de Esperanto” (1 933/34). – – ”

Kongresa limeriko de Otto Prytz (Norvegio):

Ni en Bonaer´ sen mirakloj,
kaj tute sen lingvaj obstakloj,
kongresis normale,
eĉ se malgrandskale;
sed mankis teatraj spektakloj!

Somera Esperanto-Studado (SES 2014)

La studsemajno okazis en Slovakio (Nitra) en julio kun 248 partoprenantoj el 28 landoj, inter ili kvar viddifektitoj: du el Finnlando kaj du el Hispanio.

LIBE-biblioteko

La biblioteko longe troviĝis en la hejmo de Rob Moerbeek en Nederlando. Fine de septembro 2014 li transdonis ĝin al urbo Herzberg (Germanio). Temas pri 25 skatoloj, tio estas 450 kilogramoj. Dume la libroj estas nur gardataj, biblioteko ne povas funkcii, ĉar mankas persono, kiu plenumus la taskon de bibliotekisto.

2015

Projekto "125 jaroj Eroŝenko"

LIBE-anoj klopodas partopreni la ĝeneralan Esperanto-movadon. Inter aliaj LIBE kunlaboras por la japana projekto "125 jaroj Eroŝenko". Nikolaj Solomencev enkomputiligis kaj Anatolij Masenko korektis du librojn de Vasilij Eroŝenko, kiuj ekzistas en brajla skribo, sed mankas en Interreto:

- 1 "El vivo de la ĉukĉoj". Ĉi tiu libro kompilita de A. Masenko kaj A. Pankov estis brajle eldonita de la Litova Blindul-Asocio en la jaro 1989.
- 2 "Originalaj verkoj en Esperanto". La libro, kompilita de A. Masenko, brajle aperis en Moskvo 1990.

100-a Universala Kongreso de Esperanto (UK)

La jubilea UK okazis en Lille (Francio) 25 julio – 1 aŭgusto 2015 kun la temo "Lingvoj, artoj kaj valoroj en la dialogo inter kulturoj". Kelkaj blinduloj partoprenis en la UK.

IKBE-81

San Benedetto del Tronto, Italio 22 – 29 aŭgusto kun 63 partoprenantoj el 13 landoj. La plej foraj venis el Brazilo kaj Japanio.

La estraro de LIBE klopodis aranĝi IKBEon en Francio, kie okazis la 100-a UK. La afero ne sukcesis. Dank'al la Itala Esperanto-Federacio la 81-a IKBE okazis enkadre de la 82-a Itala Esperantokongreso en San Benedetto del Tronto. Blinduloj rajtis kongresi ĉe favoraj kondiĉoj. La ĉefaj temoj de la itala kongreso estis "Kultura tutmondiĝo: limoj kaj perspektivoj" kaj "La originala literaturo en Esperanto". La programo estis abunda. Klerigaj kaj distraj programeroj plenigis la

tagojn. Malavantaĝo estis, ke IKBE-anoj loĝis en ok hoteloj je ege variaj distancoj, eĉ malproksime de kongresejo. Kulpas la lokala turisma agentejo, kiu reprenis la disponigitajn lokojn en unu hotelo kaj anstataŭigis ilin per la sama nombro, sed disetra la urbo. Kompense la urbaj trafikiloj estis senpagaj por kongresanoj.

La programo de la 81-a IKBE konsistis el la ĝenerala asembleo kaj tuttaga ekskurso, dum kiu la kongresanoj vizitis i.a. palpsentan muzeon Omero en Ankona (Ancona) kaj katedralon de Loreto. Malmultaj LIBE-anoj partoprenis la vesperan neformalan kunestadon post la ekskurso. S-ino KIKUSIMA Kazuko ("Krizantemo") aranĝis speciale por blinduloj prezentadon de "Sorobano", la japana formo de globkalkulilo abako. Sub gvido de s-ino MARKARIAN Kimie kvin blinduloj konatiĝis kun diversaj kalkuliloj.

Kongresa limeriko

En San Benedetto del Tronto
ekestis disig'
de l'aro en ok.
Kia honto!
Otto Prytz

Esperanto-komunumo de vidhandikapitoj

Kompare kun aliaj lingvokomunumoj la Esperanto-komunumo estas malgranda, sed je vidpunkto de individuo ĝi sufiĉas. Plia avantaĝo estas, ke oni ne bezonas esti naskita en Esperantujon. Kiu ajn povas fariĝi ĝia plenrajta membro.

Ekde la jaro 1904 "Esperanta Ligilo" (EL) estas grava informilo inter vidhandikapitoj. Ĝi aperas regule en dek numeroj brajle kaj elektronike. Ekde la somero de 2014 la revuo ne estas surbendigata pro manko de interesiĝo. Ligilo havas ĉ. 240 abonantoj en 38 landoj. Krom Eŭropo ĝi estas legata en Brazilo, Ĉinio, Ĉilio, Hindio, Irano, Japanio, Kanado, Kubo, Tanzanio kaj Usono. En EL aperas la protokoloj de la Ĝenerala asembleo, landaj raporto, prezentitaj al la asembleo, artikoloj pri blindul-esperantistaj kaj ĝeneralaj okazaĵoj. En "Esperanta Ligilo", presorgano de LIBE, popularaj legaĵoj estas Lingva forumo, artikoloj pri literaturo, kaj en la brajla eldono, "enigmoj kaj problemoj" stenografia paĝo kaj ŝako.

Vidhandikapuloj emas sekvi la ĝeneralan Esperanto-movadon. Tiucele eblas aboni internacie disvastigitajn Esperanto-revuojn en formo oportuna por vidhandikapuloj. Sonversio haveblas de la revuoj "Esperanto" kaj "Internacia

pedagogia revuo”. La revuo ”Monato” haveblas retpoŝte; surdiske ĝis la fino de la jaro 2015. Sinceran dankon meritas volontuloj en la Centra Oficejo de Universala Esperanto-Asocio, kiuj voĉlegas la revuojn.

Kelkaj membro-asocioj de LIBE interŝanĝas siajn revuojn. Bele estas disdoni Esperanto-gazetojn al blinduloj en landoj, kie mankas organizita Esperanto-movado.

La adresaro de LIBE enhavas 400 adresojn en 38 landoj (majo 2016). En 25 landoj troviĝas LIBE-delegitoj, t.e. oficialaj kontaktuloj de membro-asocioj. La plej novaj blindulesperantistaj asocioj estis fonditaj aŭ ili membriĝis en LIBE jene: REAN en Rusio 1993, JABE en Japanio 1996, ANEB en Bulgario 1998, La Suda Stelo en Serbio kaj Montenegro 2004. Blindulesperantistaj asocioj estas sendependaj societoj aŭ funkcias kiel sekcioj de la landaj Esperanto-asocioj aŭ blindulorganizoj.

La plej malnova ankoraŭ aktiva blindulesperantista societo estas la Finnlanda Steleto funkcianta ekde 1919. En la jaroj 2007, 2011 kaj 2012 malfondiĝis tri antaŭe fortaj membro-asocioj en Britio, Danio kaj Svislando, sed danaj kaj svisaj individuoj restas sufiĉe aktivaj en Esperantujo.

La membro-asocioj estas malgrandaj, plejparte havantaj kelkdekon da aktivuloj. En kelkaj landoj troviĝas unuopaj viddifektitaj Esperantistoj. Ili fidele tenas kontaktojn kaj vizitadas Esperanto-renkontiĝojn. Studgrupoj funkcias en Tanzanio, Vjetnamio kaj en kelkaj landoj en Sud-Ameriko.

Kutimaj aranĝoj de membro-asocioj estas regulaj renkontiĝoj, ekspozicioj, kursoj, aperas artikoloj en brajlaj gazetoj, ekz. tradukitaj de EL por montri ke Esperanto plu vivas kaj estas uzata nacie kaj internacie.

El landaj aranĝoj ni menciuj la ĉiujaran REAN-ĵamboreon de Rusia Esperanto-Asocio de Nevidantoj (REAN). Ĝi enhavas multflankan programon ne forgesante perfektigon en Esperanto. La ĵamboreo allogas regule dekojn da partoprenantoj, pli ol 50 en la jaro 2013. La Ĵamboreon partoprenas ankaŭ eksterlandaj gastoj.

Ekzemplo pri najbarlanda kunlaboro estas balkanlandaj komunaj okazaĵoj. La Aŭstria Ligo de Blindaj Esperantistoj (ALBE) organizas someran Esperantan semajnon, kiun kutime partoprenas gastoj el Ĉeĥio kaj Germanio.

Interese estas rimarki, ke vidhandikapitoj regule partoprenas ankaŭ en aranĝoj de la ĝenerala Esperanto-movado.

Tendencoj

Daŭripova kulturo de Esperanto inter vidhandikapitoj postulas, ke la estraro de LIBE kaj sia membraro havas regulajn kontaktojn. Agado de la estraro pli forte direktiĝas al konsilado kaj aktivigo de membro-asocioj. Grava tasko estas instigi lernadon de Esperanto kaj zorgi pri havebleco de lernomaterialoj en formo oportuna por vidhandikapitoj.

Ege gravas bonaj interrilatoj de membro-asocioj kaj landaj blindul-organizaĵoj kaj Esperanto-asocioj.

La tradicio de kulturo de Esperanto daŭras pere de kongresoj. Esperantistoj kolektiĝas en ĉiujarajn internaciajn kongresojn por renkonti unu la alian, por diskuti pri aktualaj aferoj kaj por ĝui la kulturen programon de la kongreso. Dum kongreso kunvenas Ĝenerala asembleo de LIBE por decidi pri gvidlinioj de movado. Certe estas, ke pere de Esperanto viddifektitoj ricevis enhavon al sia vivo kaj interesajn travivaĵojn povante konatiĝi kun reprezentantoj de pluraj landoj kaj kulturoj.

Kvankam en Francio kaj Hungario efektive ne plu ekzistas oficiala Esperanto-unuiĝo, en la jaroj 1998 kaj 2002 manpleno da aktivuloj sukcese realigis internacian kongreson de preskaŭ cent partoprenintoj. Same pro manko de landa Esperanto-unuiĝo de vidhandikapitoj sekvan jaron en Svedio 2003 kaj en Litovio 2005 kongresoj okazis pere de kunlaboro kun najbaraj landoj. En la jaro 2009 la Pola Esperanto-Asocio (PENA) kun la landa blindul-asocio prizorgis la organizon de IKBE. En la jaro 2014 IKBE en Hungario realiĝis eksterordinare pere de firmao Orbis Pictus, sed kunlabore kun LIBE. En 2015 blinduloj kongresis en Italio (San Benedetto del Tronto) enkadre de la 82-a itala kongreso.

Kongresorganizanto provizas kunvenlokojn, loĝadon kaj manĝojn. Programon kunportas kongresanoj. Por malaltigi kongreskoston bezonata estas financa kaj materia subteno el diversaj fontoj, plejparte el nacia blindul-organizo kaj aliaj blindulrilataj institucioj. Partoprenkotizo inkludas manĝojn, loĝadon kaj programon. Okcidentlandaj partoprenantoj siaparte subtenas partoprenon de orientlandanoj pagante iom pli altan kotizon.

Dum la periodo 1921–2014 IKBEoj okazis plej ofte en Germanio (ok fojoj), en Britio (sep fojoj) kaj en Aŭstrio (ses fojoj). En la komenco de la 2010-aj jaroj plej favore prete kongresojn ofertas orient-eŭropaj landoj. Rimarkinde estas ankaŭ la diferenco de partoprenintoj. Plej amase kongresojn vizitadas orient-eŭropanoj.

Tamen inter la nombro de reprezentitaj landoj estas eta diferenco dum la jaroj 2009–2011 kaj 2013. En 2012 kaj 2014 orient-eŭropaj landoj dominis.

La decido de la Universala Esperanto-Asocio de Esperanto (UEA) ebligi al handikapuloj aliĝon al la Universala Kongreso de Esperanto (UK) laŭ malalta tarifo ĝis la lasta limdato estas afabla manpremo.

Ankaŭ proksima kunlaboro inter Loka Kongresa Komitato de UK kaj LIBE favoras partoprenon de viddifektitoj en UK, ekz. en Italio 2006. En Finnlando 1995 kaj Japanio 2007 viddifektitoj loĝis kune en sama hotelo.

Misio de libe (2011)

La honora devo de LIBE estas siaparte gardi la kulturon akiritan pere la Internacia Lingvo Esperanto. Laboro de la Universala Esperanto-Asocio (UEA) kaj aliaj internaciaj Esperanto-organizaĵoj montras, ke Esperanto povas servi en internaciaj kontaktoj. Esperanto estas konata kaj respektata vaste ĉie en la mondo.

LIBE respektas kaj siaparte subtenas la laboron de internaciaj organizaĵoj por forigi obstaklojn de aliro al edukado, trejnado, enlaborigo kaj alia partopreno de viddifektitoj. Same ni, LIBE-anoj, kiel individuoj partoprenu en nacia agado.

Per Esperanto ni celas al vivaj internaciaj rilatoj kaj por Esperanto ni kreas rilatojn inter organizaĵoj por antaŭenigi niajn idealojn.

Defioj

La vidhandikapitoj estas scivolemaj kaj vizitadas Esperanto-renkontiĝojn, naciajn kaj internaciajn. Ĉu ankaŭ internaciaj Esperanto-kursoj allogos pli da viddifektitaj lernantoj?

Kiel vivteni Esperanton inter gejunuloj?

Interkomputilaj retoj faciligas disvastiĝon de Esperanto kaj ofertas eblecojn riĉigi la movadon ankaŭ inter viddifektitoj. Ĉu ret-lernejo fariĝos pli facile alirebla por nevidantoj?

Intereso al Esperanto pliiĝas en Afriko, Azio kaj Sud-Ameriko. Ĉu LIBE sukcesos respondi al la defioj ĉi-rilate?

Dum la jaroj 2008–2011 Esperanto kaj la agado de LIBE iĝis konata mondvaste per personaj kontaktoj, artikoloj kaj precipe per informiloj de porblindulaj internaciaj organizaĵoj.

Esperanta Ligilo sciigis pri la agado de internaciaj organizaĵoj. Ni vidos, kiel progresos la rilatoj kun internaciaj organizaĵoj kaj kiun formon de kunlaboro la kontaktoj ricevos.

Kian strategion LIBE aplikos por respondi la defiojn?

BIOGRAFIOJ (daŭrigo 2014)

BRITIO

William Phillimore (1844–1934) **bonfaranto de blinduloj**

Profesie W. Phillimore estis instruisto, ellernis Esperanton en 1905 kaj brajlon en 1910. Li brajlis multajn librojn. Gesinjoroj Phillimore estis gravaj gastigantoj kaj asistantoj por eksterlandaj gastoj, precipe dum Esperanto-kongresoj. Ili subtenis Esperanto-agadon de nevidantoj kaj multflanke partoprenis en iliaj aranĝoj.

John Wells (1930–1993)

Vicprezidanto de LIBE John Wells naskiĝis en 1930, forpasis la 2-an de februaro 1993 post longa malsano. Li ricevis porblindulan kaj pli altan edukadon. Li akiris plurajn muzikfakajn diplomojn, estinte tre talenta klavarinstrumentisto, tute hejme kaj sur la fortepiano kaj sur la orgeno. Fakte li estis profesia muzikinstruisto laborinte en vidulaj lernejoj en la nord-angla urbo Manchester.

John fariĝis Esperantisto kiel 20-jara junulo, kaj restis fidela al la lingvo kaj movado dum sia tuta vivo. Li servis Esperanton en ĉiu ebla rolo, kie li kapablis preni: li estis ne nur membro de la BABE (Brita Asocio de Blindaj Esperantistoj), sed ankaŭ aliĝis nialandan ĝeneralan Esperanto-asocion, kaj agis kiel interliga persono inter tiu kaj tiu de la blindul-Esperantistoj. Li provizis orgen-akompanion por la ekumenaj diservoj Esperanto-lingvaj en Manchester. Li partoprenis multajn Esperanto-kongresojn, fiere komunikante pri notindaj britaj rezultoj sur la movada kampo. Bedaŭrinde, per tempopaso ni perdis multe, kio ĉagrenigis nian forpasintan amikon. Alia ĉagreno por John estis la civitana milito en la iama Jugoslavio, kie li havis multajn amikojn.

- Aliaj ŝatokupoj kaj atingaĵoj de John Wells estis surmonta piedirado kaj radioamatorado. Pri tiu lastmenciita agado li ankaŭ estis diplomito.
- La vivo de John Wells estis fine detruita de t.n. Parkinson-a malsano, kontraŭ kiu li batalis heroe dum siaj lastaj kvin vivjaroj.
- La plej memorinda de la lastaj agoj de John Wells estis la organizado de la 1989-a brajtona Esperanto-kongreso por blinduloj.


Ni, iamaj amikoj de John Wells, certigu lian karan vidvinon Kay pri nia neniampasa amplena memoro de tiu noblakora angla Esperantisto.

OTTO REEVES (ESPERANTA LIGILO, N-RO 4/1993
KUN KOMPLETIGOJ DE ANATOLIJ MASENKO)

BULGARIO

Stefan Nenkov (1880–1967)

Stefan Nenkov estas la unua bulgara blinda esperantisto. Li komencis lerni esperanton dum 1901. En 1908 li estis lernanto en la instituto por blinduloj en Bukaresto, Rumanio. Ĉi tie li kontaktiĝis kun rumaniaj kaj aliaj esperantistoj. Kune kun alia bulgara esperantisto Nikola Torbov li transkribis brajle Esperanto-bulgaran vortaron kaj Esperantan gramatikon. Stefan Nenkov enmembrigiĝis en la urba Esperanto-asocio en Sofio kaj dum la tuta sia vivo vivo li estis aktiva en la bulgara Esperanto-movado. Kiel instruisto en la instituto por blinduloj en Sofio li helpis, por ke esperanto estu regula lerna objekto por ĉiuj lernantoj.



Stefan Nenkov fondis Esperanto-societon Balkana Stelo dum 1925. En tiu membras blindaj esperantistoj el la tuta lando. Li estis prezidanto de la societo ĝis 1956. Kiel prezidanto de societo de la bulgaraj blinduloj laŭ lia iniciato la societo fondis "Fonduso Esperanto", por helpi finance Esperanto-movadon inter bulgaraj blinduloj.

Stefan Nenkov aktive partoprenis maldekstran laboristan kaj socialistan Esperanto-movadon, kunlaboris iliajn revuojn. Li estis aktiva batalanto kontraŭ la fazismo. Li tradukis kaj publikigis el Esperanto bulgarlingven multajn artikolojn kaj informojn pri la vivo kaj agado de la blinduloj en la mondo. Stefan Nenkov estis la unua prezidanto de la Asocio de blinduloj en Bulgario 1946–1953.

Kun sia inteligenteco, honesteco kaj modesteco li estis tre estimata kaj inter nevidantoj kaj vidantoj. Stefan Nenkov partoprenis IKBE dum 1928 en Hungario kaj en multaj Esperanto-kongresoj en Bulgario.

VLADIMIR ĴELEV

Todor Ŝoŝev (1918–1991)

Todor Ŝoŝev ellernis Esperanton kiel lernanto en la instituto por blinduloj en Sofio. Kun helpo de sia fratino transskribis malgrandan Esperanto-bulgaran vortaron. Enmembrigis en la urba Esperanto-societo en Sofio kaj dum tuta sia vivo estis aktiva ĝia membro.



Todor Ŝoŝev estis talenta poeto, verkis en Esperanto kaj bulgarlingve. Dum 1956 li partoprenis IKBE-on en Kopenhago. Dum 1967 partoprenis literaturan konkurson en Hispanio, ricevis unuan premion kaj oran medalon. En alia konkurso en Italio li ricevis diplomon, kaj ricevis premiojn en bulgaraj konkursoj. Liaj verkoj estas eldonitaj en diversaj bulgaraj kaj esperantaj eldonaĵoj kaj revuoj. Dum 1978 ĉe la asocio de la blinduloj en Bulgario (ABB) estas fondita komisiono pri la aferoj de la blindaj esperantistoj en Bulgario, ĝia prezidanto estas Todor Ŝoŝev. Dum 1985 estas fondita sekcio de la blindaj esperantistoj ĉe ABB. Ĝia prezidanto ĝis 1990 estis T. Ŝoŝev. Li prelegis ankaŭ en la 46-a IKBE en Varna. Dum 1984 sub lia gvido en Pisa, Nizza okazis internacia Esperanto-renkontiĝo. Li estis ankaŭ en certa periodo delegito de LIBE. Dum 1985 aperis en revuo Esperanta Fajrero ĝis sia forpaso. Ĝia redaktoro sindone estis Todor Ŝoŝev. Todor estis aktiva soci-aganto, vicprezidanto, prezidanto kaj estrarano de ABB ĝis sia forpaso.

Pro sia aktiva socia ago li estis distingita per multaj premioj de ABB. Li estis la unua bulgara blinda esperantisto, honora membro de bulgara Esperanto-asocio BEA. La ŝtato honoris lin per ora ordeno.

VLADIMIR JELEV

ĈEĤIO

Vuk Echtner (1905–1994) apoganto de nevidantoj

Vuk (Wolfgang) Echtner naskiĝis la 10-an de julio 1905, forpasis la 16-an de februaro 1994. Li lernis esperanton 7-jara kaj aktivis en la movado ekde 1920. En junaj jaroj de Echtner oni nomis lin princo de la esperanta poezio pro ĝusta kaj plej perfekta prononcado. En konkurso de plej sukcesaj deklamantoj en urbo Hradec Kralove li gajnis la unuan premion kaj renomon.

Echtner estis fondinto de Ĉeĥa prunta biblioteko, junulara sekciestro de landa Esperanto, tradukinto por Ĉeĥoslovaka antologio, estro de pedagogia sekcio. Pro sia kunlaboro kun Esperanto-bahaanoj kaj kun la Universala Esperanto-Asocio (UEA) ("pro malamika agado") li estis arestita en 1956, kaj amnestiita nur en 1960.

En 1927 li kunorganizis la internacian konferencon "Paco per lernejo" en Prago. En la 1930-aj jaroj li gvidis la junularan kaj lingvan komisionon de la landa Esperanto-asocio. Post la dua mondmilito li instruis Esperanton en someraj Esperanto-tendaroj.

Post junaĝa konatiĝo kun Vasili Eroŝenko, Echtner pleje aktivis en porblindulaj organizaĵoj. De 1930 li gvidis la Internacian blindulaferan centran informojn kaj statistikejon (IBIS), redaktis la brajlan Esperanto-revuon Aŭroro dum 52 jaroj, gvidis Esperanto-kursojn, pretigis brajlan Esperanto-ĉehan vortaron kaj brajligis 52 lernolibrojn pri diversaj fremdlingvoj.

Echtner kuneditoris verkon "Historio de la E-movado en Ĉeĥoslovakio" (1983) de Stanislav Kamaryt.

Vuk Echtner estis honora membro de la Ĉeĥa Esperanto-Asocio.

"AŬRORO"-REMEMOROJ, AŬRORO 2-6/1970-1/1978

Rudolf Krchňák (1905–1996)

Denaske blinda Rudolf Krchňák tamen ĝis sia 13-a jaro vizitis ordinaran lernejon kaj poste transiris en blindulan instituton, post ekzamenoj daŭrigis unu jaron en la komerca lernejo, sed baldaŭ kristaliĝis lia amo al muziko kaj literaturo. Ĉe studado lin helpis ĉefe lia patrino.

En 1927 li fariĝis muzikinstruisto, komponisto, pian-agordisto kaj en 1935 revenis al la blindula instituto en Brno kiel muzik-instruisto, kaj dum trideko da jaroj edukis multajn blindajn muzikistojn.

Li fondis kaj redaktis gazeton de nevidantaj muzikistoj 1930–1938. Li komponis kamerajn, vokalajn kaj instrumentajn koncertaĵojn. En 1948 li verkis rakontojn pri la vivo de blinduloj. En 1992 aperis lia libro pri konataj kaj nekonataj nevidantaj artistoj el la tuta mondo.

Li iniciatis proklamon de la Tago de Nevidantoj la 13-an de novembro, ĉar la 13-an de novembro 1745 naskiĝis Valentin Haüy, kiu praktikis edukadon kaj laborigon de nevidantoj kiel la unua homo en la mondo.

Rudolf Krchňák estis entuziasma esperantisto kaj kontribuis al la blindula gazeto Aŭroro.

Stanislav Stejskal (1887–1929) **apoganto de neviduloj**

Stanislav Stejskal estis profesoro de la franca kaj germana lingvoj ĉe real-lernejoj en Prago. Li estis sindonema apoganto de blinduloj, laboregis por helpado al la blinduloj, instruis al ili Esperanton, organizis tekstojn enlande kaj internacie. En 1920 iniciate de li estis fondita brajla gazeto Aŭroro, kiun li redaktis ĝis sia morto. La kongresejo de la blindula kongreso en Prago fariĝis hejmo de regulaj ĉiusemajnaj kunvenoj, lerte preparitaj de Stejskal, kiu profitis siajn spertojn de skoltestro. En 1922 li fondis Societon de ĉeĥoslovakaj nevidantaj esperantistoj (SOĈNE) kaj organizis, gvidis kaj funkciigis la Internacian Blindulaferan Centran Statistikejon (IBIS).

Stejskal legis brajlon sur la malreliefa flanko. Duflanke presitan brajlaĵon li ne kapablis legi. Li legis plejparte leterojn. Stejskal estis forte miopa.

Lia ĉefa principo estis neniam prokrasti la respondon de demandoj. Li ne disponis je skribmaŝino. Lia manskribo estis neordinare lerta, rapida kaj tre klare legebla. Ne aperis konflikto kun la presisto de liaj artikoloj. Ili aperadis ne nur en brajl-eldonaĵoj, sed ankaŭ en vidulskribaj gazetoj kaj libroj. Kun siaj gimnazianoj li eldonis por viduloj instrufolion pri brajlo.

Kiel fakulo en brajlo li ofte kontaktis kun ministerio de instruado. Per dekreto en 1922 li ricevis ”laŭdan mencion pro fervora kaj senprofita porblindula zorgado, precipe pro plibonigado de la neviduloj per ebligo de nobla legado”.

ĈINIO

Huang Nai (1917–2004)

Huang Nai naskiĝis en Ŝanhajo en 1917. Dum someraj ferioj de mezlernejo li memlernis Esperanton, legis la Esperantan revuon "La Mondo" kaj vizitis kurson Nankino kaj tiam en sia 14-a jaro lia dekstra okulo blindiĝis pro vundo en piedpilkado.

En 1936 Huang Nai veturis al Japanio por studi kaj tie li kaj liaj kolegoj lernis Esperanton de japana Nakagaki Torajiro. En 1937 Huang Nai estis arestita pro sia aktivado en la maldekstruma Esperanto-movado. Helpate de japanaj amikoj, li estis liberigita.

Huang Nai blindiĝis en 1949 kaj lia edzino forlasis lin. Li spertis konstantan mallumon kaj pli bone komprenis la valoron de lumo. Li pensis, kiel valora estas brajlo taŭga por dekmiloj da ĉinaj blinduloj koni la eksteran mondon. Tiam en Ĉinio cirkulis du malnovaj brajloj tre malfacile lerneblaj. Huang Nai iam lernis rusan brajlon, poste trovis revuon Esperanta Ligilo kun brajla Esperanta alfabeto sur la kovrilpaĝo. Li korespondadis kun alilandaj blindul-esperantistoj kaj kolektis brajlajn alfabetojn. Li komparis kaj analizis plurajn skribsistemojn, trovis mankojn de la malnovaj ĉinaj brajloj kaj komencis renovigon de la ĉina brajla alfabeto. Post ripetfoja provado kaj reformado li finfine kreis novan ĉinan brajlon en 1952. En la sekva jaro lia projekto estis aprobita de la Eduka Ministerio de Ĉinio kaj ekpopulariĝis tra la tuta lando.

Post tio Huang Nai gvidis grupon da personoj en kompilo de brajlaj lernolibroj, eldonado de la Monata Gazeto por Blinduloj kaj funkciigo de brajla presejo. Dank' al tiuj brajlaj eldonaĵoj, okazis diversaj kursoj por blinduloj, en kiuj ili ellernis plektadon, akupunkturon, mokson, masaĝon, muzikon k.a. Kun tiuj teknikoj ili fariĝis memstaraj laborantoj.

La brajlo kreita de Huang Nai aplikiĝis 40 jarojn. En la aplikado oni trovis mankojn. Huang Nai kaj liaj kolegoj laboris 19 jarojn por la nova projekto. En 1995 la Ŝtata Lingva Komisiono decidis popularigi ĝin. Tiu projekto estas aplikata en multaj blindulaj lernejoj kaj brajlaj eldonaĵoj. En 1961 Huang Nai edĝiniĝis kun An Lin, kiu tutanime helpis lin en brajla renovigo. Huang Nai estis konsiliano de la Bonstatiga Fonduso de la Ĉinaj Kripluloj. Li donis grandan atenton al la vivo de la ĉinaj blinduloj kaj ofte helpis ilin venki malfacilaĵojn.

INTERRETA INFORMA CENTRO-ESPERANTO

HUANG NAI PENADAS EN MALLUMO DE WANG HANPING

FINNLANDO

Arvo Karvinen (7.1.1934–6.10.2013)

**Fidela esperantisto,
bonfaranto estas for**



Nia karega Arvo Karvinen forpasis trankvile dum la sunleviĝo la 6-an de oktobro 2013. La funebra festo okazis en silento inter familianoj kaj proksimaj geamikoj. Preposto Ari Suutarla, Steleto-ano trafe kristaligis la personecon de Arvo jene: Arvo estis serĉanto kaj trovanto. Por Arvo bona vivo kaj prizorgo de homoj en- kaj eksterlande estis ja granda emo. Celkonscie li trabatis vojon al handikapuloj. Arvo servis kiel ekzemplo por gejunuloj kaj plenkreskuloj, kiuj serĉis sian lokon en la socio.

En la festo kantis Steleto-anoj Aatu Moilanen kaj Raimo Tanskanen. La triopo Aatu, Arvo kaj Raimo ekde la blindullernejo kantis kune en diversaj renkontiĝoj. Juha, la plej aĝa filo de Arvo planis kanti kune kun Aatu kaj Raimo anstataŭante Arvon. Pro emocio Juha povis nek kanti nek legi sian kortuŝan prezenton pri la vivo de Arvo. Ĝin legis la edzino Saija.

Ni funebras, sed kiel bele diris Steleto-ano Börje Eriksson ”samtempe dankeme memoras lian entuziasmon fari la mondon pli facile atingebla por ĉiuj homoj pere de internacia lingvo Esperanto”.

Dudek jarojn mi havis okazon servi kiel asistantino de Arvo en diversaj projektoj, en hobiaj kaj private. Pere de pretigo de liaj prelegoj en la angla kaj en Esperanto al mi iĝis konataj i.a. edukado kaj enlaborigo de vidhandikapuloj, en- kaj eksterlanda agado de Lions Club kaj evolulanda kunlaboro. Agrable estis labori kun li. Kun peza koro mi akompanis lin ĝis lia lasta ekspiro. Arvo havis fortan senton de respondeco kaj fidon al volontula kunlaboro. Li multon instruis al mi. Mi perdis varmkoran, helpeman kaj instigan amikon. Humile, dankeme mi klopodas sekvi lian ekzemplon kaj plenumi liajn pensojn. ”Kiel ondo tiras ondon tra la oceano, tiel ankaŭ ni sukcesos subtenante unu la alian”. Honorante belan memoron de Arvo ni daŭrigu laboron. La prezidanto de Ligo Internacia de Blindaj Esperantistoj (LIBE), s-ro Anatolij Masenko admonas

”Ni klopodu realigi almenaŭ ion en tio, kion sugestis Arvo, kaj tio estu plej bona monumento por li”.

HUMILE

RITVA SABELLI

Resuma vivprotokolo

Arvo Karvinen, magistro pri filozofio, forpasis la 6-an de oktobro 2013. Li naskiĝis la 7-an de januaro 1934, blindiĝis 11-jara pro akcidento, esperantiĝis en 1955, estrarano de Steleto, la finna esperanto-asocio de viddifektitoj ekde 1960, estrarano de Ligo Internacia de Blindaj Esperantistoj (LIBE) (1963–1967) kaj prezidanto 2009–2011, vice 2012, delegito de LIBE ĉe Eŭropa Blindul-unuiĝo kaj membro de ĝia Kultura kaj eduka komisiono 2007–2011, membro de UEA-komitato 1994–2001.

Laborante longe kiel la ĝenerala sekretario de la Finna federacio de vidhandikapuloj (1972–1999) gvidis multajn internaciajn kunlaborojn kun evolulandoj. Aktivis kiel komitatano de EBU (European Blind Union/Eŭropa Blindul-unuiĝo) kaj de WBU (World Blind Union/Monda Blindul-unuiĝo). Lia celkonscia laboro por atingi la celojn kaj ideojn de EBU, liaj servoj al vidhandikapitoj kaj lia vasta kariero estas agnoskataj kaj alte aprezataj de EBU kaj ĝiaj membroj. En 2007 li estis invitita kiel honora membro de EBU.

Sur la eŭropa kampo Arvo Karvinen laboris i.a. en la EBU-komisiono pri kunlaboro kun Eŭropa unio, EBU-komisiono pri evolulandoj, en komisionoj de la sociala fonduso de Eŭropa unio. Lia internacia kariero komenciĝis en la 1960-aj jaroj inter sporto kaj lia pli vasta mondskala kariero en 1976 kiel estrarano de Tutmonda Konsilantaro por la Bono de la Blinduloj (World Council for the Welfare of the Blind). Ekde la 1960-aj jaroj li laboris en la finna ligo de vidhandikapitoj, kie li ekde 1972 ĝis sia emeritiĝo okupis la postenon de ĝenerala sekretario.

Lia agado emfazis precipe la trian mondon, i.a. li laboris plurajn fojojn en Namibio por fondi rekapabligan centron por blinduloj, por eduki personaron kaj fortigi la organizon de blinduloj. En Zambio la finna ligo de vidhandikapitoj fondis brajlan bibliotekon, evoluis profesian edukadon kaj manlaborajn kondiĉojn. En Ekvadoro estis fondita brajla presejo.

Kompreneble, liaj servoj kaj krea potenco estas konataj ankaŭ sur la nacia kampo. En 1998 li ricevis de la finna prezidento la altan titolon ”järjestöneuvos” (”organiza konsilisto”) pro sia plunjara sociala agado por handikapuloj, en Finnlando kaj eksterlande ĉefe en la tria mondo. El lia kapo ŝprucis ideoj pri projektoj, kiujn oni tiatempe taksis nerealigeblajn. Tamen li ilin kuraĝe antaŭenpuŝis kaj efektivigis. En la finna ligo de viddifektitoj li iniciatis novan laborstrukturon, interalie fondante lokajn societojn por fortigi porblindulan agadon, kaj aranĝis monkollektadon por komenci produktadon de sonlibroj en la 1960-aj jaroj. Li establis regulajn kontaktojn kun decidfarantoj kaj aliaj organizoj.

Lia krea forto daŭris eĉ post la emeritiĝo. En la blindula Iris-centro staras kiel lastaj monumentoj de lia iniciatemo rekapabla korto por infanoj "la korto de travivaĵoj" kaj kleriga centro por etaj infanoj. La korton inaŭguris la ŝtatprezidanto, s-ino Tarja Halonen en 2012. La kleriga centro funkcias ekde 2013. Li aranĝis la financadon pere de kunlaboro de internacia kaj lokaj Lions-organizoj.

La sociala aktiveco de Arvo Karvinen ampleksis multajn kampojn. Interalie li laboris por edukado kaj dungigo en sia rolo kiel estro (angle ombudsman) de fondaĵo por helpi vidhandikapulojn. En la socio li aktivis kiel membro "Lions club" (1973–2013). La kapablo utiligi volontulan kunlaboron ĉiam estis lia forto precipe en la agado de la internacia Lions-organizaĵo.

Fidela esperantisto

Ekde la jaro 1956 Arvo Karvinen partoprenis en Esperantokongresoj kaj helpis en aliaj internaciaj renkontiĝoj kiel preleganto en Esperanto. Li partoprenis en la aranĝado de la Internacia Kongreso de Blindaj Esperantistoj (IKBE) en Finnlando en 1969 kaj 1995, estis membro de la Loka Kongresa Komitato (LKK) de la Universala Kongreso de Esperanto en Tampere 1995, iniciatis IKBE-on en Litovio (Vilno) 2005 kaj aktivis en la preparlaboroj. Li estis membro de LKK de IKBE en Svedio (Gotenburgo) 2003 kaj konsilanto de IKBE en Ĉeĥio (Olomouc) en 2012.

Grava emo de Arvo Karvinen estis disvastigo kaj plibonigo de kono de Esperanto inter viddifektitoj per modernigo de lernolibroj kaj partopreno en ĝeneralaj Esperanto-kursoj. Li iniciatis en 2008 kunlaboron de LIBE kaj ILEI (Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj). La unua rezulto estis, ke ankaŭ viddifektitoj estis bonvenaj partopreni Someran Esperanto-Studadon (SES 2010) en Slovakio (Piešťany) en julio 2010. Ĝin partoprenis kvar viddifektitoj (3 el Finnlando, 1 el Serbio). Kiel prezidanto de LIBE li koncentriĝis krei strategion por fortigi la asocian strukturon por ke LIBE povu daŭre oferti al gejunuloj kaj plenkreskuloj internaciajn kontaktojn kaj novajn spertojn kaj tiel ekstersociiĝon.

En 2009 Karvinen iniciatis platskriban eldonon de "Historio de la Esperanto-movado inter la Blinduloj" kaj ties kompletigon per superrigardo de la postmilita tempo. Pere de tradukoj nacilingven de la historia verko LIBE celas disvastigi konon pri la Esperanto-kulturo inter viddifektitoj. Esperanto ludis gravan rolon en la funkciigo de internacia kunlaboro de viddifektitoj kaj en naciaj blindul-asocioj en kreado de servoj al viddifektitoj. Dum Esperanto-kongresoj oni parolis pri samaj termoj kiel nun en la kunvenoj de EBU kaj WBU: edukado, metioj, enlaborigo, aliro al informado, socialaj cirkonstancoj, integriĝo en socion.

Krom en Esperanto-kongresoj Arvo Karvinen prelegis en Esperanto i.a. en la internacia konferenco pri profesia klerigo de viddifektitoj (problemoj, spertoj, perspektivoj) okazinta en Moskvo 2003. En la konferenco pri enlaborigo de vidhandikapuloj en Tokio 2007 li estis unu el tri invititaj eksterlandaj prelegantoj (Finnlando, Hispanio, Italio).

Plej vaste Arvo Karvinen disvastigis konon pri Esperanto ĉe EBU kaj WBU. Ekzemple dum la ĝenerala asembleo de WBU en Ĝenevo en 2008 la partoprenantoj ricevis materialon pri Esperanto, kaj tuj post la kunveno la oficejo de WBU distribuis prezentaĵon pri Esperanto kaj pri agado de LIBE al 119 landoj, entute al 800 membroj de delegacioj. Krome Karvinen estis intervjuata de reta radio ACB Radio World en Esperanto.

En la kunveno de Tutmonda Konsilantaro por la Bono de la Blinduloj okazinta en Parizo en 1982 Esperanto evidentiĝis utila. Arvo Karvinen prezidis unu komisionon. Kun unu delegito ne eblis komunikiĝi. La problemo solviĝis kiam Arvo Karvinen proponis Esperanton kaj povis gvidi diskutojn uzante la anglan kaj Esperanton. Same okazis en Sauda Arabio (Riado) en 1984 en la kunveno de WBU.

Oskari Lehtivaara (4.2.1909–7.4.1995)

Oskari Lehtivaara blindiĝis kiel sepjara. Longe kaj multflanke li laboris en la porblindula kampo. Li agis kiel organizanto de blindulorganizajoj kaj kiel ĵurnalisto. Li estis ĉefredaktoro de blindulgazetoj kaj direktoro de brajla presejo.



Esperanton li lernis jam kiel 13-jara kaj agis en la estraro de Steleto, la Esperanto-asocio de viddifektitoj en Finnlando, pli ol 50 jarojn (vicprezidanto 1938–1981, prezidanto 1982–1991). Li estis ankaŭ estrarano en la Esperanto-Asocio de Finnlando (EAF, vicprez. 1968–1971, prez. 1975–1985). Dank' al li EAF ekhavis propran sidejon kaj per ŝtata subvencio reeldonis la epopeon Kalevala en Esperanto. Li estis membro de la Loka Kongresa Komitato de la Universala Kongreso de Esperanto en Helsinko 1969.

En 1986 aperis lia finnlingva membriografio "Perintö" (heredaĵo), en kiu unu ĉapitro temas pri li en la Esperanto-movado.

Li kunestis en fondo de la internacia Esperanto-organizaĵo LIBE kaj agis kiel ties sekretario 1951–1962.

Oskari Lehtivaara estis komitatano de Universala Esperanto-Asocio (UEA) 1969–1981 kaj honora membro de EAF, UEA kaj de la landa blindul- organizaĵo (Näkövammaisten Keskusliitto, ek de la jaro 2016 Näkövammaisten liitto).

FRANCIO

Raymond Gonin (1913–2002)

Raymond Gonin estis fervora esperantisto. Profesie li estis instruisto de hispana lingvo ĉe la mezgrada sekcio de la lernejo por viddifektitoj en Villeurbanne. Li gvidis multajn Esperanto-kursojn. Li estis multjara prezidanto de Franca Unuiĝo de Blindaj Esperantistoj (FUBE) kaj de Ligo Internacia de Blindaj Esperantistoj, 33 jarojn redaktoro de Esperanta Ligilo. Raymond Gonin estis delegito kaj komitatano kaj honora membro de UEA.



Jacqueline kaj Raymond Gonin

Memore al Raymond Gonin

Raymond Gonin naskiĝis la 28-an de decembro 1913, en kampara vilaĝeto Saône-et-Loire. Tuj trafis lin blindeco kaj baldaŭ eksplodis la unua mondmilito, kiu en la unuaj monatoj forrabis de li patron.

Sian fruaĝon li trapasis en farmo, en kampara vivo. Tamen kiam li iĝis dekjara, la patrino rezignis pri tiu vivo ne ĉiam facila kvankam familia, por iri al urbo Lyon, kie troviĝis blindullernejo. Sian filon ŝi ne volis restigi sen eduko kaj sen okupo en la vilaĝo, kiel tiam plej ofte okazis por handikapuloj. Dum la patrino laboris kiel dompurigistino por vivteni lin kaj sin, Raymond Gonin studis ekde 1923 en la blindullernejo de Villeurbanne (suburbo de Lyon), kiu tiam certigis instruadon ĝis ”atesto pri elementa lernado”.

Post 1931 li daŭrigis la studadon tute sola, por akiri pli altajn ŝtatajn diplomojn. Lia diligenteco kaj scivolo, lia granda ŝato al legado ebligis al li konatiĝi pri multaj fakoj kaj kleriĝi pri ili. Aparte li ŝatis lingvojn kaj muzikon.

Tiutempe li perlaboris la vivopanon per manlaboroj, i.a. brosfarado, kaj presis brajlaĵojn per tute simpla materialo. Li ankaŭ iom versfaradis kaj aŭtoris kelkajn tekstojn, kiujn similaĝaj blindaj amikoj muzikigis. Kelkaj tiaj kanzonoj estis eĉ presitaj nigre, kaj fojfoje disaŭdigitaj de la loka radio. Li regule partoprenis teatrogrupon kun vidantoj, sed tamen ĉesis dediĉi sian plej grandan tempoparton al legado kaj memklerigo.

En 1930 la 17-jara lernanto hazarde trovis brajlan broŝureton de Th. Cart pri Esperanto. Tuj li eklernis sola la lingvon, kaj jam en 1932 ĉeestis sian unuan Universalan Kongreson en Parizo. Precize tiujare la partoprenantaj blinduloj provis fondi Universalan Asocion de Blindulorganizaĵoj (UABO) kun la celo plibonigi per Esperanto la sorton de blinduloj tra la mondo. (Fakte UABO ne prosperis, kaj ĝian rolon ludas nun tutmonda blindul-unio, sed sen uzo de Esperanto.) Depost tiu kongreso Raymond Gonin neniam ĉesis korespondi per Esperanto, kaj dank' al la renkonto kun Albert Masselier li ekagis en la franca blindulmovado.

Post tre malfacilaj militjaroj li edziĝis en 1946 kun la 21-jara Jacqueline Galleras, kiun li ekkonis en la blindulmedio, kie ŝi studis muzikon. Ŝi private instruis kantadon, violonon kaj pianon. Baldaŭ ŝi esperantiĝis, kvankam unue ŝi lernis la lingvon por partopreni la okupojn de la edzo ol pro forta konvinko.

Kiel ajn, ŝi baldaŭ fariĝis nemalhavebla kunlaborantino en liaj entreprenoj, kaj multe helpis lin per ĉiutaga plurhora voĉlegado. La materia situacio nete pliboniĝis en 1945.

Post multaj klopodoj kaj dank' al speciala permeso Raymond Gonin estis rajtigita enoficiĝi en la nacia franca edukado, ĝis tiam nealirebla por blinduloj. Li ekinstruis en la lernejo de Villeurbanne, kie baldaŭ li ricevis postenon: li zorgis pri la nove alvenintaj geknaboj, kaj krom brajla skribo kaj elementa instruo li lernigis al ili la vivon en socio. Kelkajn jarojn poste, kiam la lernejo malfermis mezkurson kaj bezonis lingvoinstruiston, tute nature oni turnis sin al li por ke li instruu la hispanan lingvon kiel kromhoran taskon. Tiam lia duobla laboro iĝis pli peza, ĝis en 1964 li ricevis la gradon de mezlerneja instruisto, kaj pluinstruis nur lingvojn. En 1974, kvar jarojn antaŭ sia emeritiĝo li estis honorigita ricevante la ordenon "Palme académiques" pro sia laboro profesia kaj por Esperanta.

Kun granda miro liaj gelernantoj provis kalkuli en kiom da lingvoj li povis paroli aŭ legi. Liaj konoj tiurilate restis en la lernejo kvazaŭ proverbaj.

Ofte li gvidis Esperanto-kursojn en la blindullernejo, kaj lia edzino ankaŭ instruis la brajlan skribon tie, sed apud tiu instrukariero la paro dediĉis multan tempon al Esperanto.

En 1950 li partoprenis la fondon de Franca Unuiĝo de Blindaj Esperantistoj (FUBE) kune kun E. Bouquin, G. Pluchon, A. Masselier kaj H. Epstein kaj dum multaj jaroj prezidis la asocion. En tiu sama jaro li vizitis la Universalan Kongreson en Parizo, kaj partoprenis kun G. Vassio, J. Kreitz, H. Thilander, O. Lehtivaara k.a. la fondon de Internacia Federacio de Blindaj Esperantistoj, tamen efektive ĝi estis fondita jaron poste en la munkena kongreso sub la ĝisnuna nomo: Ligo Internacia de Blindaj Esperantistoj (LIBE).

Raymond Gonin iniciatis "pagservon", kiu ebligis al la membroj de LIBE pagi abonojn al E-revuo, aĉeti librojn aŭ adaptitan materialon eksterlande en epoko, kiam transpagoj estis malfacilaj pere de bankoj. Pagservoj funkciis kvazaŭ poŝtĉeka centro. Li mem centralizis la operaciojn por maksimume eviti la sendon de mono eksterlanden. La servo funkciis ĝis kiam rektaj pagoj pere de bankoj fariĝis pli facilaj.

De la fondo de LIBE Raymond Gonin estis ĝenerala sekretario, kaj daŭre vizitis la Universalajn Kongresojn, entute 27. En 1957 li eĉ organizis blindulan antaŭkongreson en Lyon, kaj zorgis pri blindula partopreno en la UK de Marsejlo. Samjare li pretigis brajlan perkorespondan kurson por franclingvanoj. La unuaj lernantoj eklernis tiamaniere en 1958, kaj la kurso daŭre funkcias.

En 1958 Harald Thilander, kiu seninterrompe redaktis Esperantan Ligilon de 1912 transdonis la postenon al Raymond Gonin. Dum 33 jaroj, ĝis 1992 kun la edzino li dediĉis multan forton al tiu redaktado mem tradukante aŭ verkante amason de artikoloj aŭ inventante ludojn por la rubriko "Enigmoj kaj problemoj". Grandan laboron postulis tiu redaktado. La impulso donita al la revuo devigis lin multe legi por provizi la informan fakon kaj la literaturan rubrikon, kaj devigis multe skribi por certigi kiel eble plej vastan kaj dokumentitan fakrubrikon, kiu informis pri novaj blindulhelpiloj kaj ĝenerale pri la situacio de blinduloj en la diversaj landoj, raportis pri la klopodoj kaj atingoj, do ludis motoran rolon en tiu kampo. Tial korespondado certe estis unu el la plej temporabaj kaj kreivaj aktivajtoj. Centoj da leteroj eliris ĉiujare des pli, ke pro lia multflanka kompetenteco li ricevis multajn

demandojn pri brajlo, brajlaj alfabetoj en la plej nekutimaj lingvoj, provoj de mallongigoj en la skribado ktp.

En 1969 li oficis kiel prezidanto de LIBE, kaj reprezentis dum jaroj la ligan en la komitato de UEA. Tamen ne nur organizan rolon havis la paro. Ĝis la jaroj sepdekaj ambaŭ aperis multokaze en artaj spektakloj dum kongresoj blindulaj aŭ francaj deklamante, aktorante, kantante, muzikante. Daŭre li strebis al plialtiĝo de la Esperantaj konoj trapasante triope kun la filo la pedagogian ekzamenon en franca Esperanto-instituto en 1969.

Post la emeritiĝo en 1978 certe ne malkreskis lia laborado por Esperanto. Li eĉ aldonis agadon en la franca ĝenerala movado, Unuiĝo Franca por Esperanto (UFE), kies komitatano li estis de 1975 ĝis 1983.

En 1989 li estis nomumita membro de franca Esperanto-instituto (FEI), kiu zorgas i.a. pri la Esperanto-ekzamenoj por francparolantoj. Li ekgvidis kursojn kun la edzino en la lyona regiono. Tiucele li mem verkis pedagogian komplementon por la "koordinataj kursoj", cele al perkoresponda lernado de blinduloj kaj elementa kurso surbaze de konversacio kun "Petro kaj Aneta", kiun li utiligis por la propraj kursoj.

Li ankaŭ tradukis kelkajn literaturaĵojn. Novelojn, kaj ofte kunlaboris kun la edzino kaj la filo por triopa relegado, prilaborado de tradukoj.

De 1991 la malsano tamen atakis Raymond Gonin, kaj devigis lin pasigi dufoje semajne longajn horojn en kliniko. Tio kompreneble malebligis vojaĝojn al kongreso aŭ dediĉon de tro da fortoj al laboro. Kvankam li devige bremsis siajn aktivitaĵojn, tamen li ankoraŭ dum longa tempo regule partoprenis la vivon de la grupo de Lyon, daŭre respondis leterojn aŭ telefonalkvokojn, spertajn konsilojn, gramatikajn klarigojn.

En 1994 li estis honorigita per la honora membreco de UEA.
Li forpasis la 11-an de aprilo 1992.

(SURBAZE DE KOLEKTO FARITA DE HERVE GONIN, EL DIVERSAJ FONTARTIKOLOJ)

GERMANIO

Adolf Selten (1879–1942)

Kiu estis Adolf Selten?

En la Historio de la Esperanto-movado inter la blinduloj de Joseph Kreitz la aŭtoro mencias, ke Adolf Selten jam antaŭ la fondiĝo de EBLOGO eldonis proprakoste revuon kun la nomo (La Blinda Esperantisto). Ekde 1979 nia oficiala organo denove portas tiun ĉi nomon. Poste li fariĝis la unua prezidanto de EBLOGO.

Jen kelkaj informoj pri li okaze de la 90-jara jubileo de nia organizaĵo. Adolf Selten naskiĝis en la jaro 1879 en Breslaŭ (hodiaŭ Wroclaw, Pollando) kaj forpasis tie en 1942. Pro glaŭkomo li jam kiel junulo pli kaj pli perdis sian vidpovon. Kun sia edzino li fondis en Silezio reton de t.n. (lesezikel), legorondoj. Kontraŭ kotizo abonantoj povis ricevi por certa tempo, unu semajno aŭ pli, kompilaĵon de diversaj revuoj, kiujn poste ricevis alia membro de la rondo. En germanlingvaj landoj eĉ hodiaŭ frizistoj, kuracistoj k.a. por siaj klientoj prunteprenas revuojn de tiaj entreprenoj. Kvankam Adolf Selten jam kiel junulo forlasis la Israelitan Kultkomunon, laŭ difino de la nacisocialistoj li estis judo. Tial en 1934 li devis ĉesi sian negocan agadon en Malsupra Silezio. Ĉar por Supra Silezio ekzistis kontrakto de Ligo de Nacioj kiuj protektis minoritatojn, li tie povis por certa tempo daŭrigi sian laboron. Adolf Selten edziĝis dufoje. El la unua edziĝo li havis du filinojn. Ĉiuj kvar gefiloj el la dua edziĝo lernis esperanton, tri el ili aktivas en la movado. Tiujn ĉi informojn mi dankinde ricevis de lia filo prof. D-ro Reinhard Selten, nobelpremiito de 1994 kaj patrona membro de Universala Esperanto-Asocio (UEA).

THEODOR SPECKMANN (LA BLINDA ESPERANTISTO N-RO 4/2011)

HISPANIO

Ángel Figuerola (1913–2003)

Ni memoru niajn forpasintojn

Normale, nekrologojn oni publikigas relative baldaŭ post la morto de la koncerna persono. Ju pli da tempo pasas post la morto sen apero de nekrologo, des pli oni hezitas entute aperigi ĝin. Oni iel sentas, ke perdinte la intereson de novaĵo, ĝi ne plu estas aperiginda. Sed tiel ne estu. Proverbo ja diras ”pli bone malfrue ol neniam”, kaj krome ekzistas homoj, kiujn indas rememori ĉiam.

Unu el ili estis Ángel Figuerola Auque, kiu naskiĝis la 24-an de februaro 1913 en Zaragoza, Hispanio, kaj mortis jam la 9-an de januaro 2003. Li loĝis en Zaragoza ĝis li estis 18-jara. Tiam li transloĝiĝis al Madrid, urbo, al kiu li revenis post estado en Valencia kaj evidente ankaŭ en aliaj hispanaj urboj. Relative frue li edziĝis kun Marcelina Palomo Herrero, kiu ne nur estis lia vivkunulino – ili havas 6 gefilojn – sed kiu ankaŭ donis al li grandan moralan kaj praktikan apogon en lia multflanka agado.

Eblas karakterizi Figuerola kiel ”renesancan homon”, kiu havis multajn interesojn, kaj kiu ankaŭ havis grandan kapablon enkapigi sciaĵon: li rapide trapasis la licenciigan edukadon pri humanismaj fakoj. Li ekstudis ankaŭ juron, sed tiun studon li ne finis pro transloĝiĝo kaj aliaj okupoj. Krom la hispanan lingvon kaj Esperanton Figuerola legis la lingvojn francan, anglan, germanan, italan, latinan kaj klasikan grekan.

Ángel Figuerola multflanke aktivis en la Nacia Organizaĵo de Blinduloj de Hispanio (ONCE). Li eble ne rekte partoprenis en ĝia fondiĝo en 1938, sed li almenaŭ instigis al ĝia fondiĝo, kune kun Marcelina, kiu estis la unua kasistino de unu el la loterioj, kiuj antaŭis la nunan famegan loterion de ONCE. Li direktis plurajn muzikajn grupojn de ONCE: la ”rondalla” (ensemblo de kord-instrumentoj) de Zaragoza, la ”rondalla” de Madrid, kaj la siatempe tre konatan Seksteton de ONCE. Profesie li dum multaj jaroj laboris en blindullernejo de Madrid kiel instruisto pri geografio, historio kaj aliaj lernobjektoj. Krome li plenumis administrajn kaj organizajn taskojn en ONCE.

Ankaŭ ekster ONCE Figuerola disvolvis multan aktivecon: Li faris historiajn esplorojn en diversaj hispanaj arĥivoj. Li kunlaboris en gazetoj kaj revuoj. Lia plej elstara publikaĵo estas: ”Tiflogología sobre ciegos españoles desde la Edad Media hasta el siglo XVIII” (tiflogologio pri hispanaj blinduloj ekde la Mezepoko ĝis la 18.a jarcento). Li tradukis librojn el diversaj lingvoj. Li aktivis en kulturaj asocioj hispanaj kaj internaciaj. Li instruis en privataj bazaj kaj mezaj lernejoj.

Meritas specialan atenton lia muzika agado. Li ne nur direktis muzikajn grupojn, sed ankaŭ mem traktis diversajn instrumentojn, precipe la violonon. Krome li estis privata instruisto pri muziko, kaj inter liaj lernintoj estas elstaraj koncertistoj. Sed muzikon li instruis ne nur al eminentuloj: dum mia restado en Madrid en 1973 li instruis al mi gitarludon je tre elementa nivelo. Mi ja sentis honton pro tio, ke mi, sciante la hispanan lingvon kaj amante la hispanan muzikon, ne scipovas ludi gitaron. Figuerola grandanime proponis senpage instrui al mi trifoje semajne, post la ekzerciĝo kun la supre menciita ”rondalla”! Ke mi ne fariĝis gitaristo, tio ne estas la kulpo de Figuerola, sed nur mia propra.

Sed plej elstaras, almenaŭ por ni, la agado de Figuerola sur la Esperanta kampo. La ĉi-suba listo sendube ne estas elĉerpa. Li estis Esperantisto ekde 1930. Prezidanto de Hispana Esperanto-Federacio li estis de 1970 ĝis 1977, kaj li ankaŭ prezidis la Esperanto-Liceon de Madrid. Li estis prezidanto de la LKK de la UK en Madrid 1968 kaj kun-organizanto de la samjara kaj samloka IKBE.

Unu el la abiturientaj lernintoj de Ángel Figuerola estas Pedro Zurita. Kvankam li lernis Esperanton aŭtodidakte, li konsideras, ke Figuerola Esperantigis lin, ĉar li ”infektis min per la Interna Ideo, kiun mi opinias esenca en la Esperanto-movado”.

Kaj kiu scias? Eble tiu infekto instigis Pedron engaĝiĝi en la blindula movado je internacia nivelo kaj altiĝi ĝis la posteno de ĝenerala Sekretario de la Monda Blindul-Unio.

Ĉiam, kiam Figuerola prezentis min al iu, li diris: ”Lin mi ekkonis, kiam li havis nur 16 jarojn”. Kaj tiel estas: ni unuafoje renkontiĝis dum mia unua UK, en Varsovio 1959. Por mi li estis nur unu el multaj kongresanoj, kaj tia li plu estis ankaŭ en postaj kongresaj renkontiĝoj. Sed tio ŝanĝiĝis. Kiel studento pri la hispana lingvo mi ricevis kelkmonatan stipendion por studi en Madrid en 1967–68. Tiuj, kiuj renkontis min ĉe la stacidomo de Madrid, estis gesinjoroj Figuerola, kaj ili akompanis min al la studenta domo, en kiu mi loĝos. Poste, kaj dum la unua kaj dum postaj restadoj en Madrid, ili ofte gastigis min en sia hejmo. Kaj mia impresoj tiurilata plene konformas kun tiu de Pedro: ”Ili proponis al mi sian hejmon kun la mens-malfermiteco, kiu karakterizis ilin”.

Per ĉi tiuj tro malfrue formulitaj frazoj mi esperas memori memorindan homon laŭ liaj meritoj. Li restu en nia memoro, kaj li ripozu en paco!

OTTO PRYTZ (NORVEGIO)

Ángel Figuerola en kongreso de la Hispana Esperanto-Asocio, kiam li estis ĝia prezidanto en 1971



ITALIO

Luigi Tola (1934–21.9.1993)

”LIBE ne nur perdas gvidanton (vic. prez. de LIBE), sed krome estron de la Malnovalibra Servo, kaj komitatanon ĉe UEA. Malgraŭ sia tre ĝena fizika stato Luigi Tola estis kaj restis fervora Esperantisto, kiu ne timis dediĉi tempon kaj laboron por Esperanto kaj blinduloj. Nun necesus pluraj personoj por daŭrigi lian laboron: en LIBE, kiel komitatano de UEA, kiel redaktoro de la itala gazeto ”Gennariello” kun la E-instrua rubriko, ĉe IABE, ktp.”

Luigi Tola estis municipa reprezentanto de la Verdula Partio en sia lando. En novembro 1981 li estis elektita vicprezidanto de la nacia blindulorganizaĵo. (Esperanta Ligilo 1982 kaj Novembro 1993, R. Gonin)

Okaze de sia intencata kandidatiĝo en la IKBE-elekto Luigi Tola sin prezentis jene (Esperanta Ligilo 5/1992):

”Kvankam 57-jara, mi estas pensiulo kaŭze de malsano. Nun mi laboras por la blindul-unuiĝo kaj la urba konsilantaro. Antaŭ mia emeritiĝo mi estris la de mi fonditan blindullernejon de mia hejmurbo Sassari sur insulo Sardinio. Esperantisto mi estas depost 1974 kaj ekde 1986 vicprezidanto de LIBE.”

JAPANIO

IWAHASI Takeo [iŭahaŝi takeo] (16.3.1898–28.10.1954, viro)

IWAHASI, naskita en Ôsaka, estis la unua prezidanto de JABE (Japana Asocio de Blindaj Esperantistoj, fondita en 6 aprilo 1928). Blindiĝis 20-jara en 1917, pro retina disiĝo, kiam li estis lernanto en la prepara kurso (japane ”Yoka”) por la Univ. Waseda en Tokio. 1918 li eniris en la Blindul-Surdula Lernejo de Urbo Ôsaka. Tie li renkontis KUMAGAI Tetutarô, kiu instigis studi la anglan kaj harde instruis al li la anglan kaj tajpadon prepare al la altnivela edukado. Sekve en 1919 li eniris kaj en 1923 finis la studon pri la angla lingvo en la faka lernejo Kwansei-Gakuin (japane ”Kwansei-Gakuin Kôtô-gakubu”), en la nuna Kôbe.



Foto Nippon Lighthouse, Ôsaka

Li aparte studadis pri brita blinda poeto John MILTON (1608–1674, viro) pro la instigo de KUMAGAI. En 1918, kiam en Ôsaka aktivaj esperantistoj invitis blindulojn al Esperanto-lernado, li eklernis Esperanton. Kaj en 1919, kiam KUMAGAI organizis prelegkursidon de rusa blinda esperantisto Vasilij EROŜENKO (12.1.1890–23.12.1952, viro) en Ôsaka, IWAHASI konatiĝis kun EROŜENKO gastigante lin. En 1923 li ekinstruis la anglan kaj la japanan en la Blindullernejo de Urbo Ôsaka (en la urbo Ôsaka ekzistis/-as ankaŭ la Blindullernejo de Gubernio Ôsaka), apartigita de la surdula lernejo. En 1925 li estis akceptita de la Universitato de Edinburgo, Britio, kaj en 1928 magistriĝis. Liaj vojaĝo kaj studo en Britio realiĝis dank' al helpoj de esperantistoj, ĉefe de novzelandano John Annesley BRAILSFORD (1883–18.5.1956, viro), kvakero kaj ĵurnalisto de anglalingva "Japan Chronicle" en la urbo Kôbe apud Ôsaka. En Britio helpis lin blinda esperantisto William Percy MERRICK (1868–1955, viro). Ankaŭ granda estis financa helpo de YOSIMOTO Tadasu (vd. la parton pri KUMAGAI Tetutarô). En 1926 li partoprenis en 18a UK, kun 5a IKBE, en Edinburgo. Reveninte al Japanio en 1928 li lekciis en la faklernejo pri la angla de Kwansei-Gakuin ĝis 1944. Flanke de tio li aktivegis por plibonigi la vivon de blinduloj, fondinte en 1948 kaj gvidante kiel ĝia prezidanto ĝis 1954 la tutlandan organizaĵon Japana Federacio de Blindul-organizaĵoj (japane "Nihon Môzinkai Rengô"), kiu nuntempe ligas pli ol 60 blindulaj organizaĵoj. En oktobro 1935 li fondis en Ôsaka "Nippon Lighthouse", la socibonfarta kaj kultura centro por blinduloj. Li iniciatis grandajn kampanjojn por inviti al Japanio la usonan surd-blindulinon Helen Adams KELLER (27.6.1880–1.6.1968, -ino) en 1937 kaj 1948. Ŝi faris la trian viziton en 1956 por i.a. omaĝi al IWAHASI floro al lia tombo.

*** La informo diversloke, ankaŭ en la aŭtografioj mem, prezentataj pri IWAHASI, ke li blindiĝis dum la studado en la Universitato Waseda, ke li finis la studon en la Universitato Kwansei-Gakuin, kaj ke li instruis en la Universitato Kwansei-Gakuin, estas absolutaj malveroj. (Por la libro de KIKUSIMA "Universitatumi per brajlo" 2000 Tokio, ambaŭ universitatoj bonvolis serioze esplori la dokumentojn.)

*** JABE estis fondita en 6 aprilo 1928. La unua prezidanto estis IWAHAŜI Takeo, kaj troviĝis TORII Tokuzirô kaj KUMAGAI Tetutarô inter dek komitatanoj. La tri, aparte la unuaj du, blindaj esperantistoj estis samtempe plej gravaj figuroj de la japana blindula mondo.

KUMAGAI Tetutarô [kumagai tecutaro] (28.5.1883–11.7.1979, viro)

KUMAGAI estis unu el la kernaj fondintoj de JABE (Japana Asocio de Blindaj Esperantistoj, fondita en 6.4.1928). Li naskiĝis en Hokkaidô kaj blindiĝis 3,5-jara

pro variolo. Li 13-jara eklernis akupunkturon kaj Tiam li lernis ankaŭ brajlon. Li 17-jara iris sola al Sapporo, kie li renkontis la ideon de la metodisma kristanismo kaj estis baptita en 1900. Li eklernis ankaŭ la anglan lingvon. Pro la financa helpo de kristanoj en Sapporo li povis studi dum 1902–1906 en ŝtata Blindul-Surdul-lernejo de Tôkyô (esp-e: Tokio). Tie en 1906 KUMAGAI, plej verŝajne kiel la unua japana blindulo, iom memlernis Esperanton, pri kiu li aŭdis jam en Sapporo. Li lernis per la brajla enkonduklibro de Esperanto en la angla, donacita al la lernejo de iu eksterlandano vizitinta ĝin en somero 1906. Sed li ne daŭrigis la lernadon por koncentriĝi al la angla, ĉar tiutempe ŝokegis japanan blindularon la libro "Vera Britio (japane: Sin Eikoku)" 1902,



Foto Nippon Lighthouse, Ôsaka

de YOSIMOTO Tadasu (23.1.1878–14.4.1973, viro), japana malfortevidanto studinta en la Univ. Oxford, Britio, kaj daŭre loĝinta en Oxford entreprenante internacian komercon. La verkinto rekompilis kun aldonoj ĝian ĉapitron "Blinduloj en Britio" kiel apartan libron "Blinduloj en Japanio kaj Britio", kaj ĝiajn versiojn vidulskriban kaj brajlan donacis al blindullernejoj tra la tuta Japanio. Poste en 1913 KUMAGAI 30-jara ekstudis kiel gaststudento en la teologia fakto de la faklernejo Kwanseï-Gakuin, en la nuna Kôbe, per financa helpo de tiu YOSIMOTO. Ekde 1916 KUMAGAI laboris kiel la pastro metodisma. En 1918, kiam en Ôsaka aktivaj esperantistoj invitis blindulojn al Esperanto-lernado, ankaŭ li aliĝis. Poste en ĉiu sia deĵorloko li aktivis en disvastigo de Esperanto ankaŭ al la ĝenerala publiko, ekz.: en 1919 organizis por blinduloj en Ôsaka prelegkursidon de la rusa blinda esperantisto Vasilij EROŜENKO (12.1.1890–23.12.1952, viro) ĵus reveninta de Sud-Azio; 1927 informe prelegis okaze de 15a japana Esperanto-kongreso en Hukuoka. Li funkciadis de 1919 ankaŭ kiel konsulo de EL, kaj eĉ organizis kulturajn eventojn kolekti monon por donacendi al UABE. En 1931 li iris al Novjorko kiel ano de la japana delegacio al la "congress of workers for the sightless". Poste li restis en Usono por plustudi en univesitato teologion kaj revenis hejmen post 2 jaroj. Dum la restado en Usono li en februaro 1932 vizitis Hellen Adams KELLER (27.6.1880–1.6.1968, -ino) invitite de ŝi por eĉ duontagon diskutadi pri diversaj temoj per per fingra interpretado de ŝiaj du instruistoj-interpretistoj, s-ino Anne SULLIVAN (1866–1936) kaj s-ino Polly THOMPSON (1885–1960). Kaj en 1940 li emeritiĝis. Tamen en 1943 li estis sendita de la Ministerio pri Eksteraj Aferoj de Japanio al Bangkoko por administri tiean blindullernejon, sed pro malemo de Tajlando esti gvidata de Japanio li povis instrui malmulteton kaj devis reveni en 1944.

TORII Tokuzirô [torii tokuĵiro]
(12.8.1894–11.9.1970, viro)

TORII la tutan vivon laboregadis por la edukado kaj labor-havigo de blinduloj kaj ankoraŭ nun estas kalkulata kiel "la patro de blindularo". Li naskiĝis en bonfarta familio en la regiono Tango, en la gubernio Kyôto (esp-e: Kioto), kaj li 6-jara blindiĝis rezulte de febreĝo, kiun li 3-jara suferis. Post la lernado en la Blindul-Surdul-lernejo de la urbo Kyôto, kaj de 1909 paralele eĉ 10 horojn semajne la anglan en vespera YMCA-lernejo, li studis de 1914 en la instruista fako de la ŝtata Blindullernejo de Tôkyô (Tokio) por fariĝi blindullerneja instruisto pri akupunkturo kaj masaĝo. En la lernejo preskaŭ samtempe kun li eklernis la gastlernanto, rusa blindulo Vasilij EROŜENKO (12.1.1890–23.12.1952, viro), kiu instruis al TORII Esperanton kaj ili fariĝis la plej gravaj amikoj reciproke. TORII 18-jara estis baptita en Kioto por la Kristanismo Protestanta, sed pere de Esperanto kaj EROŜENKO konatiĝinte kun usona esperantistino Agnes Baldwin ALEXANDER (21.7.1875–1.1.1971, -ino), la misiisto sendita al Japanio de la Bahaismo, li 22-jara ŝanĝis sian kredon al Bahaismo. Fininte la studadon en 1916 TORII 22-jara ekinstruis en blindullernejo en Eziri [eĵiri], gubernio Sizuoka [ŝizuoka] sed nur iom pli ol unu jaron. De 1920 li instruis en la blindullernejo en gubernio Mie, kaj de 1929 ĝis 1956 instruadis, fine kiel vic-lernejestro, en la Blindullernejo de Kyôto (de 1931 de la gubernio Kyôto). Flanke de tia edukista vivo li iniciatis tre multajn porblindulajn socialajn laborojn, ekz.: kunlaboregis kun blinda esperantisto IWAHASI Takeo (16.3.1898–28.10.1954, viro), i.a. por inviti surd-blindulinon Helen Adams KELLER (27.6.1880–1.6.1968, -ino); en 1954 kaj ĝis 1963 IWAHASI transprenis la prezidantecon de la tutlanda organizaĵo Japana Federacio de Blindul-organizaĵoj (japane "Nihon Môzinkai Rengô"); en 1961 fondis "Kyoto Lighthouse", la socibonfarta kaj kultura centro por blinduloj; funkciis en diversaj organizaĵoj kaj konferencoj kiel la reprezentanto de la tuta blindularo; honorigita en multego da okazoj, i.a. en 1961 kiel la honora civitano de la urbo Kyôto. Ankaŭ por Esperanto li laboregis. Iniciatis la fondon de JABE (Japana Asocio de Blindaj Esperantistoj, fondita en 6.4.1928) kaj fariĝis komitatano, sed post ĝia stagniĝo li en 1966 transprenis la prezidantecon, la duan, por revivigi ĝin kaj gvidadis ĝis sia forpaso. En 1954 survoje de la plurmonata ofica vojaĝo en Eŭropo por blindulrilataj internaciaj konferencoj li partoprenis en la 37a UK en Haarlem kaj 22a IKBE en Amsterdam, Nederlando. Li brajligis multajn lernilojn kaj vortarojn de Esperanto, kaj instruis Esperanton al multaj blinduloj.



*Foto Nihon Môzinkai Rengô,
(Japana Federacio de Blindul-
organizaĵoj), Tôkyô*

JUGOSLAVIO/KROATIO

Tomislav Karlovič (1924–2007)

70 jaroj kun Esperanto

Tomislav Karlovič, unu el la fondintoj kaj multjara prezidanto de Kroata Unuiĝo de Nevidantaj Esperantistoj (KUNE) ekde la 27-an de aprilo 2007 ne plu troviĝas inter ni. Li forpasis mallaŭte, preskaŭ nerimarkite, samtiel kiel dum la lasta jardeko li ŝajne ankaŭ vivis, konscie izolita de aliaj homoj, okupante sin per laboroj, kiel li mem taksis ilin, por kiuj pli frue li ne havis tempon. En kvieto de sia hejmo, profesoro Karlovič legis, verkis kaj ordigis la vivimpresojn. Kiel rezulto de tiu laboro naskiĝis kelkaj poemaroj kaj aŭtobiografia verko nacilingva "Drugi život" (La dua vivo), en kiu, krom la propran vivon, li prezentis siajn starpunktojn rilate la vivon de nevidantoj ĝenerale.

Tomislav Karlovič naskiĝis la 8-an de novembro 1924. En la aĝo de 10 jaroj li perdis la vidpovon per propra aktivigo de eksplodaĵo. La edukadon ĝis tiam ricevitan en la naskiĝurbo Sirač, de tiam li havis en la Blindulinstituto en Zagrebo. La brajla skribsistemo lin tuj ekokupis. Li rapide ellernis ĝin. Poste la legado kaj verkado fariĝis lia tutviva elekto.

Pro la dua mondmilito, en 1941 li ĉesis viziti lernejon kaj revenis al la naskiĝregiono. El libroj ĝis tiam legitaj li informiĝis pri progresemaĵoj kaj difinis sin antifaŝisto. Tiujn ideojn li propragandis inter samvilaĝanoj kiel aktivis simpatianto de la popolliberiga movado, kiu ĝuste en lia regiono havis fortajn radikojn.

Post la fondiĝo de Blindulasocio de Kroatio, en kies fondkunveno la 16-an de junio 1946 ankaŭ li ĉeestis, li agadis kiel komisiito de la Asocio en la distrikto Daruvar preparante fondojn de blindulaj societoj en tiu regiono. Al Zagrebo li revenis en 1947. Por mallonga tempo li posteniĝis en produktejo de brosoj kaj korboj, poste ankaŭ en kartonlaborejo de Blindula hejmo en 1radnička-strato, kaj ekde la 15-an de aprilo 1948 li eklaboris kiel telefonisto en Ministerio pri Agrikulturo.

Laborante, li finis verspergimnazion, poste filozofian fakulteton en Zagrebo, kaj en 1959 akiris diplomon pri historio. En 1960 li ekposteni en Metiista blindullernejo (Ŝkola učenika u privredi), kie li prelegis pri telefonteknologio, kaj ekde 1963 ĝis la emeritiĝo en 1975 li prelegis historion kaj socisciencajn objektojn en Buroteknika mezlernejo por blinduloj en Zagrebo.

Esperanton, kies idealojn li tuj akceptis, Tomislav ellernis jam kiel 13-jarulo en la Blindulinstituto, kaj ĝi restis lia plej granda amo ĝis la lasta vivmomento. La kunvivo kun Esperanto, kiel li mem diris al mi en intervjuo por "Jubilea Espero" pasintjare [2006], komenciĝis en 1938, kiam en "Esperanta Ligilo" aperis lia korespondanenco. Li korespondis kun multaj, tiam konataj blindaj esperantistoj, ekz. Thilander, Merrick, Kâsin kaj aliaj. En sia libro "La dua vivo" Tomislav Karloviĉ estis unu el la fondintoj de Kroata unuiĝo de Nevidantaj Esperantistoj komence de 1971, kaj la internacian Esperanto-movadon aktive li enpaŝis en 1974. Li estis prezidanto de KUNE kaj ĉeestanto de pluraj Internaciaj Kongresoj de Blindaj Esperantistoj. Unu periodon li deĵoris kiel vicprezidanto, alian kiel prezidanto de Ligo Internacia de Blindaj Esperantistoj.

Li akiris multajn amikojn en la mondo kaj disĉiplojn en Kroatio.

Dum deko da jaroj li redaktis la gazeton de KUNE ("Espero"), redaktis malpli ampleksan Esperanto-kroatan kaj kroata-Esperantan vortaron en brajlo, kaj propagandis eldonaktivecon por blinduloj en la Internacia Lingvo.

En 2000 li estis elektita honora kaj dumviva prezidanto de KUNE. La 4-an de novembro 2006, en la 8-a jarkunveno, KUNE festis la 35-jariĝon de sia fondo kaj laboro. Partoprenis ankaŭ nia Tomislav, kiu mallonge prezentis la historian evoluon de KUNE. Ĝi estis lia lasta publika parolado, okazinta ĝuste inter ni, esperantistoj, post preskaŭ 70-jara vivado kun la Internacia Lingvo. La nevidantaj esperantistoj de Kroatio esprimas al li grandan kaj meritan dankon!

ANTUN KOVAĈ (ESPERANTA LIGILO 6/2007)

Dušan Maruzzi (1883–1956)

Li naskiĝis la 3-an de julio 1883 en Skradin. Mezlernejon kaj Juran fakultaton li finis en Zagrebo kaj fariĝis doktoro de juro. Oficis kiel ĉefo de statistika oficejo en Zagrebo. Post emeritiĝo li translokiĝis al Ljubljana en la jaro 1946 kaj mortis samloke en la jaro 1956. Li esperantistiĝis en 1919 kaj tuj ekludis plej elstaran rolon. Organizinto de la unua landa kongreso (1923 en Zagrebo). Unu el la ĉefaj preparintoj de la tutŝtata asocio Sudslava Esperanto-Ligo (1923). Multjara prezidanto



de la Zagreba Esperantista Societo, la unua prezidanto de JEL kaj fondinto de Sudslava Esperanto-Servo (1922), kiu prizorgis Esperanto-librojn el eksterlando kaj mem eldonis. Post la unua mondmilito li entreprenis eldonadon de la unua jugoslavia Esperanto-organo "La Provo" (Zagreb, 1921–1922), kiu en la jaro 1922 ŝanĝis la nomon al "Konkordo" (Zagreb, 1922–1928). Li verkis Esperanto-gramatikon (aperis sep kroataj kaj du slovenaj eldonoj). En 1922 li akiris ĉe la Komerca fakultato en Zagreb docentecon pri Esperanto. Propagandis Esperanton ĉe radio kiel sekretario de la loka Radio-klubo inter la jaroj 1921–1930, kies kunfondinto li estis kune kun alia esperantisto, Milan Crlenjak, estro de la urba hospitalo. Li faris multnombrajn bone vizititajn paroladojn pri Esperanto tra la tuta lando (Jugoslavio), skribis multajn artikolojn en naciaj gazetoj, gvidis plurajn kursojn. Pro siaj meritoj li estas la plej elstara figuro de la landa Esperanto-movado. Li estis la unua honora membro de Kroatia Esperanto-Ligo. La unua junulara Esperanto-laborbrigado portis lian nomon. Verkis plurajn lernolibrojn. Du eldonoj de lia gramatiko estis slovenigitaj (de Peter Golobič en 1925 kaj de Ferdo Dobravec en 1928) kaj aperis ankaŭ brajle (Zemun 1925 kaj 1932). Li estis reprezentanto de Zagreba Esperantista Societo en la UK de Helsinko (1922).

ANTUN KOVAČ

NEDERLANDO

Nora Moerbeek-Bartels
(21.8.1930–17.3.1998)

Nekrologo en Esperanta Ligilo n-ro 4/1998:
Mortis nia societa sekretario,
s-ino Nora Moerbeek-Bartels,
21-a de aŭgusto 1930–17-a de
marto 1998 – neriparebla perdo!

En la fruega mateno de la 17-a de marto 1998 mortis, post malsanlito de pli ol du monatoj, nia kara sekretario kaj prizerantino de la Libroservo, s-ino Nora Moerbeek-Bartels, en la aĝo de 67 jaroj.



En la tempo de la apero de ĉi tiu artikolo la plej granda parto de nia membraro certe jam ekhavis la tristan sciigon. Multo pri ŝi estas rakontebla, pli multo estas memorebla. Kancero en ostoj kaj en la pulmoj forprenis ŝin de la edzo kaj de ni post nur – fakte kelkaj semajnoj.

Fakte mi devus dediĉi tutan numeron de EL al ŝi kaj al ŝiaj agoj. En la E-movado kaj en la blindulmovado ŝi estis rimarkinda personeco, dank' al la pionira rolo, kiun ŝi plenumis, dank' al la trafa kaj forta karaktero, kiun ŝi havis. Ĉu en aŭ ekster sia posteno, oni devis konscii, ke ŝi ĉeestis kaj ke ŝi gardis la interesojn de la blinduloj, ĉiam laŭ la vidpunkto de la blinduloj mem, ne laŭ tiu de prizorgantoj aŭ aliaj helpantoj, kvankam ties intencoj ja estis bonaj.

En la movado de la blinduloj ni povas danke memori ŝian lukton pri la pureco de la brajla skribo, kiu, kiel ŝi ĉiam diris, estas la propraĵo de la blinduloj, ne de la presejoj.

Mi vere ne devas amplekse rakonti pri ŝiaj agoj sur la Esperanto-kampo. Mi nur memorigu al la legantaro, ke antaŭ nur du jaroj, la nederlanda reĝino nomis ŝin "Kavaliro en la ordeno de Oranje-Nassau". Fiere ŝi portis la dekoracian krucon dum la IKBE en Prago, kiel multaj el vi ankoraŭ scias.

Kaj nun ni devas iri antaŭen – sen nia pionirino! Memkompreneble tio okazos, ĉar neniu estas neanstataŭebla, tamen nia movado neniam estos precize la sama, kiel ĝi estis kun ŝi dum multaj jaroj. Kaj LIBE sen Nora, ankaŭ tio devas esti, sed ĝi estos tre malfacila.

Mi kondolencis al Rob kaj ĉeestis la memorkunvenon en ŝia hejmo la 23-an de marto. La korpo jam estis for, ĉar ŝi dediĉis ĝin al la scienco, kaj oni jam forprenis ĝin.

Nia neforgesebla sekretario, ripozu en paco!

JAN VERHEULE, KASISTO DE LIBE

Noto de la administranto:

Kun afabla permeso de la aranĝanto de voĉdonado por la venontaj LIBE-elektoj, s-ano Anatolij Masenko, mi aperigas ĉi-loke la propran biografeton de Nora Moerbeek, kiun ŝi sendis al li okaze de ŝia intencata rekandidatiĝo. La biografieto rememorigu nin pri la granda laboro, kiun postlasis tiu modesta, laborema virino.

"Mi naskiĝis en 1930, blindiĝis pro tumoro unu jaron poste, edukiĝis en blindulinstituto, ricevis tie instruon pri tajpado kaj stenografio, laboris dum kelkaj jaroj tiufake en asekura oficejo. Poste dum pli ol 25 jaroj mi estis korektistino de brajlaj libroj en la blindulbiblioteko en Amsterdamo. Ekde 1986 pensiĝis.

Esperanton lernetis de miaj gepatroj jam, sed en la instituto la tajp-instruisto samtempe entuziasme instruis ankaŭ Esperanton, kaj jen la vera ĝermo por mia nuna agado por nia lingvo.

En la 70-aj jaroj mi estraniĝis en Nosobe, kaj en la 80-aj – en LIBE. Mi ege ŝatas estrarajn laborojn, do mi volonte rekandidatiĝas nun”.

En 1998 en la aprila numero de revuo ”Esperanto” aperis jena nekrologo kun portreto:

”Nora Moerbeek Bartels (1930–1998), dumviva membro de UEA, delegito pri blindulaj aferoj kaj Esperanto-instruado, mecenato de ĉinaj E-istoj, forpasis la 17-an de marto en Beverwijk, Nederlando. Tre aktiva en la blindula medio Esperantista, ŝi estis sekretario en 70-aj jaroj de Nosobe, la nederlanda societo de vidhandikapitaj Esperantistoj, kasisto (1983–1989), kaj sekretario (1992–1998) de Ligo Internacia de Blindaj Esperantistoj, redaktoro de ties revuo ”Esperanta Ligilo”. Ŝi prezidis la Tutmondan Asocion de Esperantistaj Nefumantoj kaj estis honora membro de Asocio de Esperantistaj Handikapuloj. Ŝi tradukis la popularajn ” Anne Frank ne estas de hieraŭ” (1988) kaj ”Taglibro de Anne Frank (1997), kaj en la nederlandan la romanon ”Sur kampo granita” de Istvan Nemere (1997).

En 1996 ŝi ricevis la kvinan gradon de la ordeno Oranje-Nassau por E-agado (vd. julio/aŭgustan n-ron 1996, p. 127.”

Dirk Engel Schipper (1912–1994)

(Esperanta Ligilo 6/1967; Biografietoj pri la kandidatoj en LIBE-elektoj):

Prezidanto de la Nederlanda Societo de Blindaj Esperantistoj (NOSOBE), jam en 1939 vizitis la ”okan” en Budapeŝt. Li estas tre konata en nia medio pro sia aktiva partoprenado en multaj kongresoj. S-ro Schipper estas orgenisto kaj pianisto; 1948 la registaro sendis lin al tiama Nederlanda Hindujo, kie li instruis muzikon en la blindullernejoj kaj kunlaboris pri muziko kun la tieaj gazetaro kaj radio-sendstacioj. Reveninte en sian landon, post agado kiel ĵurnalisto, orgenisto kaj instruisto, li fine akiris postenojn kiel kontrolisto de la radioprogramoj.

NORVEGIO

Alf Arnesen (1878–1962)

La 8-an de septembro 1962 forpasis la fondinto de la norvega blindulorganizo kaj ĝia multjara prezidanto Alf Arnesen pro kormalsano. Li naskiĝis la 8-an de aprilo en 1878. Ĉiuj blinduloj, kiuj konis s-ron Arnesen, aprezas lin pro lia laboro por la bono de norvegaj blinduloj. Dum tiuj 27 jaroj, inter 1921–1948 kiam li prezidis la blindulorganizon, li solvis sian plej grandan taskon, efektivigon de sociala sekureco en 1936.

Estante estro de la norvega blindulorganizo li plenumis ankaŭ alian gravan taskon, kiu temis pri registrado de blinduloj kaj malfortevidantoj en Norvegio. La materialo, kiun li kolektis kaj ordigis, restis kiel lia heredaĵo, kaj ĝi funkcias kiel bazo al studoj, kiuj baldaŭ (tiu ĉi teksto verkita en 1962) rezultos al leĝo pri registrado de blinduloj.

Alf Arnesen estis multflanka kaj naturdotita persono. Li estis prudenta kaj sperta en ampleksa taksado de aferoj. Li estis ankaŭ praktika, humoristo kaj scipovis rilati milde al homoj. Arnesen bone konis la tendencojn de pasinteco kaj de la nuntempo kaj scipovis larĝperspektive antaŭvidi okazaĵojn en la estonteco.

En la 50-a datreveno de la norvega blindulorganizo en la universitato de Oslo en 1959 Arnesen, tiam 81-jara, festparolis al la reĝa familio. La parolado estis tiel bona kaj humurplena, ke ĝi restis en la memoro de ĉiuj ĉeestantoj. Kiam Arnesen finis sian parolon, reĝo Olav V alpaŝis al li por danki lin elkore kaj akompanis lin al lia loko.

Nun Alf Arnesen ne plu ĉeestas, sed lia memoro vivas longe inter la blinduloj en Norvegio.

TRYGVE KÅSIN (FINNA BLINDULGAZETO SOKEAIN AIRUT 10/1962)

POLLANDO

Adam Goralski (1912–2005)

Adam Goralski estis polo naskita en Ukrainio, venezuelana civitano, kiu rezidis alterne en Kanariaj Insuloj, Venezuelo kaj Pollando. Li forpasis la 11-an de julio 2005 en Poznan. Profesie li estis inĝeniero pri kemio kaj entreprenisto. Goralski esperantiĝis en 1977. Li subtenis multajn valorajn iniciatojn en la Esperanto-movado; i.a. li financis belartajn konkursojn de Universala Esperanto-Asocio (UEA), la ĉiujarajn infanajn kongresetojn kaj la bibliotekon de poznana Esperanto-

asocio. En 1982 Adam kaj Krystyna Goralski kontraktis kun UEA pri starigo de Fondaĵo Antoni Grabowski, kiun ili provizis per baza kapitalo kaj daŭre prizorgis. La fonduso subtenas Esperanto-kulturon per premioj kaj subvencioj (precipe beletro) kaj per kuraĝigo al junaj verkistoj.

Mem blindiĝinte li helpis ankaŭ al nevidantoj. Dum 12 jaroj li redaktis kaj mem surbendigis sonrevuojn kaj dissendis ilin al blindaj esperantistoj. Adam Goralski estis honora membro de UEA.

SVEDIO


Göte Linghede 6.2.1916–10.6.2010

”Karaj,

Nia granda amiko Göte Linghede forpasis frumatene la 10-an de junio. Li estis fidela aktivulo en la organizaĵa movado, kaj Esperanto estis lia dumviva kara ŝatokupo. Lia kontribuo en kompilado kaj konservado de arkivo por Esperantaĵoj estas valora. Li estis transiganta la arkivon el sia hejmo en Stokholmo al la muzeo de viddifektitoj en la urbo Enskede, sidejo de la federacio de viddifektitoj.”

Tiel mesaĝis Arvo Karvinen – ankoraŭ en junio, tamen post fermo de la lasta antaŭferia numero de EL – i.a. al la redaktoro.

Göte Linghede ĉe Perkins-skribmaŝino. Li laboris kiel konsulenton pri manlaboroj ĉe la vendeja entrepreno de blindulsocieto Foto Synskadades Museum.



(Esperanta Ligilo 7/2010) Nekrologo pri Göte Linghede:

En EL -nro 1/2006, sub rubriko "Nia rondo familia", aperis artikolo mia, okaze de la 90-jariĝo de Göte Linghede, elstara figuro en la sveda blindulmovado kaj en la blindul-E-ista movado. La 10an de junio 2010, 94-jara, Göte forpasis. Amiko lia skribis: "Antaŭ kelkaj semajnoj li ekhavis pulm-inflamon, sed de ĝi li resaniĝis."

La tagon de lia morto, Tiina Nummi-Södergren, prezidantino de SRF, la sveda asocio de viddifektitoj, komunikis la funebran sciigon en spontanea mesaĝo por la estraro kaj funkciuloj de SRF. Ŝi donis al mi la afablan permeson peri al la legantaro de EL la enhavon de tiu mesaĝo. Legu ĝin, kaj konstatu, ke taŭga kombino de Esperanto kun alia agado prestiĝ-veka povas plialtigi la prestiĝon de Esperanto mem ĉe oficialuloj:

"Giganto en la blindulmovado finis longan vivon kaj sian longdaŭran agadon."

Hodiaŭ atingis min la sciigo, ke Göte Linghede forpasis ĉi-nokte. Niaj pensoj kaj niaj varmaj kondolencoj kompreneble direktiĝas al la edzino de Göte, Vera, al iliaj (ge?)filoj kaj (ge?)nepoj, kaj al la granda amikaro.

Estas malfacile kompreni, ke Göte ne plu estas inter ni, eble precipe pro tio, ke Göte estis tiom aktiva kaj daŭrigis sian partoprenadon en multaj aferoj ĝis la fino de sia vivo. Samtempe oni povas konstati, ke al malmultaj estas donata la bonŝanco vivi tiel longan kaj konstruan vivon, kun vivoverko, kiu ekhavis tiom grandan signifon por ni. Göte estis por multaj el ni kaj amiko kaj kolego kaj granda modelo.

Okaze de sia 90-jara naskiĝtago Göte vizitis la sidejon de SRF kaj rakontis pri sia eventoriĉa vivo. La edzino Vera kompreneble estis kaj restis tre granda parto de ĉi tiu. Göte rakontis ankaŭ pri sia infan-kaj jun-aĝo en Norrbotten, norda Svedio, kaj pri sia establiĝo kiel metiisto tie. Li priskribis la gravecon de tio, ke li, mem viddifektita, dungis en la blindulasocio kaj ekhavis influon sur la evoluon de brosfarado kaj ceteraj metioj. Ni sidis sorĉitaj, aŭskultante al Göte, kiu staris rekta kiel stango, rakontante al ni dum pli ol unu horo. Tiel mi memoros lin.

Kaj mi memoros, kiel li pasigis kun mi plurajn horojn montrante al mi brajlan materialon kaj sondosierojn troviĝantajn en la arĥivejo de SRF. Li priskribis, kiel la diversaj eldonoj ekestis, kaj kian signifon ili havis en nia longa historio. Kun granda estimo mi ekkonis parton de ĉi tiu granda scio kaj ĉi tiu ega engaĝiĝo, kiu donis al ni viddifektitoj tiom da ĝojo – dum tiom da tempo.

Göte ankaŭ ”vidigis” al mi sian unikan kolekton da Esperanto-literaturo stokita en lia kelo en Gotlandsgatan. Mi scias, ke lin tre afliktis la demando: kie ĉi tiuj rarajoj kaj unikaj ekzempleroj povus havi daŭran lokon, en kiu ili povus utili al viddifektitoj kaj esploristoj? Mi scias, ke ni estis en kontakto kun la Esperanto-muzeo en Vieno, sed bedaŭrinde ne sukcesis igi ĝin akcepti la kolektojn.

Mi fakte parolis kun la antaŭa prezidanto de SRF pri ĉi tio antaŭ nur kelkaj semajnoj. Je mia granda malpeziĝo respondeculino de nia ”Muzeo de la Viddifektitoj” hodiaŭ diris al mi, ke ŝi kaj Göte interkonsentis, ke la Esperanto-literaturo fariĝos parto de niaj muzeaj kolektoj. Jen bonega solvo, kaj kiel bele, ke Göte kunpartoprenis en la decidado pri ĉi tio!

La signifo de Göte por la Muzeo de la Viddifektitoj kaj por la agado nun disvolviĝanta en ĝia malfermita magazeno, ankaŭ estas malfacile priskribebla en formo mallonga kaj konciza. Multegajn horojn da idealisma laboro Göte metis en ĉi tion, kaj la rezulto: jen unika kaj brila kolekto, kiun ni nun povas ĝui kaj ankaŭ proponi por dividi ĝin kun aliaj homoj. Tiel ĉi tiu scio plu-vivos, kaj ni povos transdoni ĝin al venontaj generacioj de viddifektitoj kaj aliaj interesitoj.

Antaŭ kelkaj semajnoj, kiam instruis min pri manipulado de komputilo Bengt Eriksson [blindulo, kiu dum la IKBE en Gotenburgo 2003 prelegis kaj faris demonstron pri komputila produktado de E-brajlo. Rim. de la trad.], li diris al mi, ke li ludos ŝakon kontraŭ Göte. Bengt lamentis pri tio, ke li neniam sukcesis venki super Göte en ŝako, sed li aldonis, ke li ankoraŭ ne rezignis.

Jen nur kelkaj grajnoj el tio, pri kio mi spontanee ekpensas. Ni ĉiuj pluportas malsamajn memorojn pri vi, Göte. Vi lasas nin en granda funebro kaj manksento. Mi nun deziras al vi bone merititan ripozon kaj pacon, kaj mi sentas dankemon pro ĉio, kion vi donis al ni.

TIINA NUMMI-SÖDERGREN”
ELSVEDIGIS OTTO PRYTZ

SVISLANDO

Giovanni-Antonio Pellanda (1910–2006)



Giovanni-Antonio kaj Emmy Pellanda

Giovanni-Antonio Pellanda naskiĝis en 1910 en Tiĉino kaj estis lernanto de la blindulinstituto Sonnenberg en Friburgo. Post la lernejaj jaroj li lernis blindulmetion kutiman por la tiam tempo (brosfaradon, se mi ne eraras). Kelkajn jarojn poste li ekkonis sian estontan vivkunulinon Emmy, kiun li edzinigis. Ili fondis blindulentreprenon en Elgg, apud Winterthur, kie ili okupis blindajn laboristojn kaj vojaĝantajn reprezentantojn, kiuj vendis ilian fabrikaĵojn. La entrepreno bonege funkciis kaj donis laboron al pluraj nevidantoj.

Giovanni-Antonio estis pioniro de Esperanto inter la svisa blindularo. Kiel vigla kaj agema, li senlace klopodis varbi novajn interesiĝantojn kaj simpatiantojn pri la Lingvo Internacia. Li publikigis monatan sonbendrevuon en Esperanto kaj provizis ĉiujn interesulojn per taŭgaj lernolibroj en brajlo.

1971 estis grava jaro por Giovanni-Antonio, ĉar tiam okazis la fondo de Svisa Unuiĝo de Nevidantaj Esperantistoj, sendube dank' al sukceso de lia konstanta varbado por Esperanto inter la svisaj blinduloj. Komence la unuiĝo disvolviĝis kontentige ĝis kiam, kiel en multaj aliaj landoj, la influo de la angla fariĝis ĉiam pli intensa.

Sur internacia nivelo, Giovanni-Antonio estis tre konata Esperantisto: li vizitis multajn universalajn kongresojn de Esperanto kaj internaciajn kongresojn de blindaj Esperantistoj, ĉiam kune kun sia edzino Emmy, kiu estis bonega ŝoforino kaj kondukis la Pellanda-aŭtomobilon tra pluraj ŝtatoj de Eŭropo, en kiuj okazis Esperanto-aranĝoj. Notindas, ke Emmy estis tre bonkora kaj ĉarma virino, kiu ĉiam pretis doni helpon al ĉiuj, kiuj ĝin bezonis. Per ŝia natura helpemo, ŝi aktive kontribuis al la atingadoj de sia edzo.

En 1979 mia edzino kaj mi havis la plezuron organizi kun Giovanni-Antonio kaj Emmy la Internacian Kongreson de Blindaj Esperantistoj en Lucern, ne tre facila tasko en turisma urbo dum la ĉefa sezono. Tiu kongreso verŝajne estis la pinta evento en la Esperantista vivo de Giovanni-Antonio. Poste li retiriĝis de sia profesia aktivado kaj fermis la blindulentreprenon. Samtempe li retiriĝis de sia Esperanto-agado por la svisaj nevidantoj, definitive translokiĝante kun Emmy al sia amata devenkantonon Tiĉino, kie en propra dometo ili havis la bonŝancon ĝui la merititan ripozon kaj pasigi ankoraŭ dudekon da jaroj en perfekta harmonio kun la pura aero en la montara naturo. Pro sia pionira Esperanto-agado, Giovanni-Antonio poste estis unuanime nomita honora membro kaj honora prezidanto de SUNE.

Karaj Giovanni-Antonio kaj Emmy, la svisa Esperantista blindularo vin tutkore dankas pro via grandega laboro favore ne nur al la nevidantaj Esperantistoj, sed ankaŭ al la nevidantoj ĝenerale, vi pluvivos en niaj koroj, kiuj akompanos vin per sincera dankemo kaj profunda simpatio sur la transtera vojo. Ripozu en paco.

LUCIANO ORTELLI

LINGVA FORUMO (ESPERANTA LIGILO 6/2006)

Giovanni-Antonio Pellanda fariĝis estrarano de Ligo Internacia de Blindaj Esperantistoj en 1964 kaj estis vicprezidanto ekde 1968, eksiĝis en sept. 1975.

Li partoprenis diversajn kongresojn kaj perfekte organizis en 1965 nian renkontiĝon en Svislando (Gwatt). Al lia valora kunlaborado ni precipe ŝuldas, ke Esperanta Ligilo trovis favorkondiĉan presejon en lia lando, kie ĝi povas esti regule presata. Aliparte la sonbendrevuo "Amika Voĉo", kiun li kompilas tiel sindone, ĉefe el la tre interesaj elsendoj en Esperanto de la kurtondaj svisaj radiostacioj, ĝojigas multajn el ni. S-ro Pellanda estas industria entreprenisto, kaj donas laboron al pluraj blinduloj.

ESPERANTA LIGILO 6/1967

Aldono 1

Prezidantoj de Ligo Internacia de Blindaj Esperantistoj (LIBE)

- 1951 Guglielmo Vassio, Italio
- 1958 Rudolf Kreitz, Germanio
- 1967 Raymond Gonin, Francio
- 1974 Aldo Grassini, Italio
- 1977 Raymond Gonin, Francio
- 1980 Fritz Karow, Germanio
- 1983 Birger Vigger, Svedio
- 1986 Tomislav Karlović, Kroatio
- 1989 Otto Prytz, Norvegio
- 1992 Theodor Speckmann, Germanio
- 2005 Nedeljka Lojajić, Serbio
- 2009 Arvo Karvinen, Finnlando (vic.prez. 2012)
- 2012 Nedeljka Lojajić, Serbio
- 2013 Anatolij Masenko, Rusio

LIBE-honorigitoj

Honoraj prezidantoj

- s-ino Varma Thilander, Svedio (Finnlando)
- Joseph Kreitz, Germanio (1969)
- Theodor Speckmann, Germanio (2005)

Honoraj membroj

- Harald Thilander, Svedio (1952)
- W. P. Merrick, Britio (1952)
- Miklos Bano, Hungario
- Achilles Dyckmans, Belgio
- Poul Glygaard, Danio
- Halvdan Karterud, Norvegio
- Jan Silhan, Pollando (1969)
- Rudolf Krchňák, Ĉeĥio
- Oskari Lehtivaara, Finnlando
- Karlo Muhar, Kroatio
- Giovanni-Antonio Pellanda, Svislando

Raff Israëls, Nederlando
Rob Moerbeek, Nederlando (2003)
Jacques Tuinder, Nederlando (2004)

Redaktoroj de Esperanta Ligilo

1904 Théophile Cart, Francio
1912 Harald Thilander, Svedio
1958 Raymond Gonin, Francio
1993 Nora Moerbeek, Nederlando
(help- aŭ fakredaktoroj Raymond kaj Jacqueline Gonin)
1998 Jan Verheule, Nederlando (forpasis en junio 2000)
2000 Jiří Vychodil, Ĉeĥio
2001 Attila Varró, Hungario
2012 Olena Pošivana, Ukrainio
Attila Varró preparis EL-materialojn por brajligado 2012–2014.
Ekde la novembra numero 2014 lian taskon plenumas Jiří Jelínek (Ĉeĥio).

Administrantoj de Esperanta Ligilo

Esperanta Ligilo (EL) estis siatempe presita en Francio, Svedio, Svislando kaj Nederlando. En la jaro 1993 la presado de EL transiris el Nederlando al Ĉeĥio. Ekde tiam Jiří Vychodil plenumis la taskojn de administranto de EL. En la komenco de la jaro 2011 li rezignis pro malcertiĝinta sano. Lia posteulo estis Jiří Jelínek ĝis novembro 2014, kaj poste li transdonis la postenon al sia edzino Milena Jelinkova.

Aldono 2

INTERNACIAJ KONGRESOJ DE ESPERANTO

Universalaj Kongresoj de Esperanto
(UK)

Internaciaj Kongresoj de Blindaj
Esperantistoj (IKBE)

Jaro Kongresloko

Kongresloko

1905 Boulogne-sur-Mer, Francio

1906 Genève, Svislando

1907 Cambridge, Britio

1908 Dresden, Germanio

1909 Barcelona, Hispanio

1910 Washington, Usono

1911 Antwerpen, Belgio

1912 Kraków, Pollando

1913 Bern, Svislando

1914 (Paris, kongreso ne okazis)

1915 San Francisco, Usono

1920 Den Haag, Nederlando

1921 Praha, Ĉeĥoslovakio

Praha

1922 Helsinki, Finnlando

Helsinki

1923 Nürnberg, Germanio

Nürnberg

1924 Wien, Aŭstrio

Wien

1925 Genève, Svislando

–

1926 Edinburgh, Britio

Edinburgh

1927 Dancig

Dancig

1928 Antwerpen, Belgio

Antwerpen

1929 Budapeŝt, Hungario

Budapeŝt

1930 Oxford, Britio

Oxford

1931 Kraków, Pollando

Kraków

1932 Paris, Francio

Paris

1933 Köln, Germanio

Köln

1934 Stockholm, Svedio

Stockholm

1935 Roma, Italio

–

1936 Wien, Aŭstrio

–

1937 Warszawa, Pollando

Warszawa

1938 London, Britio

London

1939 Bern, Svislando

Bern

1947 Bern, Svislando

–

1948	Malmö, Svedio	Dudeko da blindaj esperantistoj kunvenis dum la UK
1949	Bournemouth, Britio	Bournemouth
1950	Paris, Francio	Paris
1951	München, Germanio	München
1952	Oslo, Norvegio	Oslo
1953	Zagreb, Jugoslavio	Zagreb
1954	Haarlem, Nederlando	Amsterdam, Nederlando
1955	Bologna, Italio	Bologna
1956	København, Danio	København
1957	Marseille, Francio	Lyon, Francio
1958	Mainz, Germanio	Mainz
1959	Warszawa, Pollando	Warszawa
1960	Bruxelles, Belgio	Bruxelles
1961	Harrogate, Britio	Harrogate
1962	København	København
1963	Sofia, Bulgario	Sofia
1964	Den Haag, Nederlando	Den Haag
1965	Tōkyō, Japanio	Gwatt, Svislando
1966	Budapest, Hungario	Budapest
1967	(Tel Aviv) Rotterdam, Nederlando	Rheinbreitbach, Germanio
1968	Madrid, Hispanio	Madrid
1969	Helsinki, Finnlando	Helsinki
1970	Wien, Aŭstrio	Wien
1971	London, Britio	London
1972	Portland, Usono	Rimini, Italio
1973	Beograd, Jugoslavio	Beograd
1974	Hamburg, Germanio	Hamburg
1975	København, Danio	København (Hillerød)
1976	Athina, Grekio	Stubenberg, Aŭstrio
1977	Reykjavik, Islando	Oslo, Norvegio
1978	Varna, Bulgario	Varna
1979	Luzern, Svislando	Luzern
1980	Stockholm, Svedio	Stockholm
1981	Brasilia, Brazilo	Zagreb, Jugoslavio
1982	Antwerpen, Belgio	Breda, Nederlando
1983	Budapest, Hungario	Budapest
1984	Vancouver, Kanado	Tirrenia, Italio
1985	Augsburg, Germanio	Augsburg
1986	Beijing, Ĉinio	Stubenberg, Aŭstrio

1987	Warszawa, Pollando	Warszawa
1988	Rotterdam, Nederlando	Vught, Nederlando
1989	Brighton, Britio	Brighton
1990	La Habana, Kubo	Sarajevo, Jugoslavio
1991	Bergen, Norvegio	–
1992	Wien, Aŭstrio	Wien
1993	Valencia, Hispanio	–
1994	Seoul, Koreio	Kislovodsk, Rusio
1995	Tampere, Finnlando	Tuusula, Finnlando
1996	Praha, Ĉeĥio	Praha
1997	Adelaide, Aŭstralio	Irpinj, Ukrainio
1998	Montpellier, Francio	Artigues-près-Bordeaux, Francio
1999	Berlin, Germanio	Berlin
2000	Tel Aviv, Israelo	Plovdiv, Bulgario
2001	Zagreb, Kroatio	Kraljevica, Kroatio
2002	Fortaleza, Brazilo	Balatonlelle, Hungario
2003	Göteborg, Svedio	Göteborg
2004	Beijing, Ĉinio	Beograd, Serbio kaj Montenegro
2005	Vilnius, Litovio	Vilnius
2006	Firenze, Italio	Firenze
2007	Yokohama, Japanio	Albena, Bulgario
2008	Rotterdam, Nederlando	Premantura, Kroatio
2009	Białystok, Pollando	Muszyna (Mušina), Pollando
2010	La Habana, Kubo	Wien, Aŭstrio
2011	København, Danio	Olomouc, Ĉeĥio
2012	Hà Nội, Vjetnamio	Kyiv, Ukrainio
2013	Reykjavik, Islando	Obzor, Bulgario
2014	Buenos Aires, Argentino	Harkany, Hungario
2015	Lille, Francio	San Benedetto del Tronto, Italio

Aldono 3

Premiita eseo en la konkurso pri la temo "Vivo kaj verkoj de Vasilij Eroŝenko: ilia signifo kaj valoro por la nuntempa blindulo"

Kunio TANABE (Japanio)

Novembro 2010

Edukista dimensio de Eroŝenko

Enkonduke

Antaŭ preskaŭ 50 jaroj, kiam mi, 17-jara, estis en supera mezlernejo por blinduloj en Tokio, dirante "Vi havas tian antaŭulon de nia lernejo", unu instruistino prezentis al ni unu libron titolitan "Vivo de Eroŝenko: Blinda Poeto" verkitan de Takasugi Iĉiro. Mi tuj kuris al brajla biblioteko kaj legis ĝin. Interese! La vivo de Eroŝenko kortuŝis min profunde, ĉar tiutempe mi estis ĉagrenita pri mia estonteco. Eroŝenko donis la lumon en mian koron.

Ĉi-foje releginte tri biografiojn kaj kelkajn originalojn Esperantajn de Eroŝenko, mi eksciis, ke li estis ne nur blinda verkisto sed ankaŭ instruisto, kiu praktikis edukadon kun propra ideo tra sia vivo. Mi trovis, ke kaj lia vivo kaj liaj praktikoj donas al ni, blindaj posteuloj, multajn pensindaĵojn. Ekzemple:

- I Lia vivkapablo
- II Lia ideo pri lerneja edukado.

Mi prezentu konkretajn ekzemplojn de supraj du punktoj el la biografioj.

I VIVKAPABLO

Laŭ mi el la vivkapablo de Eroŝenko jenaj kvar kapabloj estis karakterizaj: moviĝadi sendepende, kapablo uzi brajlon, kapablo akiri fremdan lingvon, kapablo praktiki arton.

1 Kapablo moviĝadi sendepende

Surprizis min la priskriboj en la biografioj pri lia povo libere iradi kie ajn. Kompreneble komence li devis esti akompanata, sed lernis la vojon tuj. Verŝajne li havis atentemon pri direkto, distanco kaj la totala mapo.

Urbo Tokio estas grandega kaj komplikega. En tia urbego Eroŝenko, kvazaŭ vidanto, ĝuis promenadi sola. En sia infaneco dank' al la kuraĝigo fare de la familio kaj la naturriĉeco de la naskiĝloko, li trejniĝis moviĝadi sendepende.

Krome li ankaŭ ĝuis naĝadon kaj rajdadon. Surbaze de tio lia kapablo libere moviĝadi evoluiĝis poste.

2 Kapablo uzi brajlon

Li ĉiam kunportadis brajlan tajpilon. En la tempo de Eroŝenko eĉ en Moskvo troviĝis nur du aŭ tri el mil blinduloj, kiuj kapablis uzi brajlon. En Londono li vizitis brajlan bibliotekon kaj ĝojegis trovinte multegon da brajlaĵoj. Li fariĝis libroamanto.

Korespondado per brajlo estis tre grava por Eroŝenko vojaĝanta de lando al lando en la tempo sen internacia telefonservo.

Registrado de popolfabeloj kaj verkado de propraj fabeloj ebligis per brajlo. Legi kaj skribi brajle konsolis lin vivanta sola fremdlande.

3 Kapablo akiri fremdan lingvon

Lerninte Esperanton, li ĝojis aparteni al Esperanto-rondo en Moskvo kaj en ĝi konatiĝis kun kaj intelektuloj kaj artistoj kaj eksterlandanoj. Uzante Esperanton, li realigis vojaĝojn al eksterlando kaj ĉie unue akiris amikojn Esperantistajn, kiuj helpis lin lerni lokajn lingvojn. Li proprigis fremdajn lingvojn sen lernolibroj sed tra ĉiutaga vivo. Ekzemple, en Tokio li ofte vizitis kun amikoj teatron kaj kinon, tra kiuj li absorbis vivantan lingvaĵon. Ju pli bone lia lingvokapablo kreskis, des pli la rilatoj kun amikoj vastiĝis.

Kial li povis akiri lingvon en tre mallonga tempo? Ĉar li havis grandajn scivolemon kaj kuraĝon. Li ŝatis diskuti pri kio ajn eĉ en fremda lingvo.

4 Kapablo praktiki arton

Escepte de brajla tajpilo li ĉiam kunportadis ankaŭ muzikinstrumenton balalajko. En la Blindullernejo de Tokio dum Esperanto-kurso, kiam lernantoj laciĝis, li ludis balalajkon kaj kantis aŭ Esperante aŭ ruse. Kiam ardiĝis diskuto, lia ludo de balalajko kvietigis la atmosferon.

Krome, de tempo al tempo, sopiranta naskiĝlokon, li ludis balalajkon por si mem. Por li vivanta sola fremdlande balajko bone efikis por forigi la streson de la vivo.

II LIA IDEO PRI LERNEJA EDUKADO

Eroŝenko funkciis kaj kiel instruisto kaj kiel konsilanto por blindaj infanoj kaj junuloj. Kiel ekzemplon ni vidu liajn laborojn en Birmo, Siberio kaj Turkmenio.

1 Moulmein, Birmo

Eroŝenko deziris starigi lernejon por blinduloj en Sudorienta Azio. En 1916 li, ankoraŭ 26-jara, ekvojaĝis el Tokio. Unue lie celis al Bankoko, Siamo (la nuna Tajlando). Tie li trovis nek rimedojn nek kunlaborantojn por starigi lernejon por blinduloj. Sekve li plu vojaĝis al Birmo (la nuna Mjanmaro). En la urbo Moulmein, li komencis praktiki edukadon laŭ sia ideo. Tia blindullernejo estis ĉefe ludejo kaj foje laborejo por fari bambukorbojn kiel vendaĵojn. Eroŝenko proponis plibonigan projekton kaj ĝi estis aprobita. Li enkondukis multe da novaj ideoj. Por infanoj eksterdoman aktivadon: sendependa moviĝado, natur-observado per la tutkorpa senso. Por mezlernejanaro, utiligante sian sperton en Londono, altnivelajn instruadojn: muziko, masaĝo kaj la angla lingvo. De tempo al tempo, li organizis prelegojn de instruistoj el altnivelaj lernejoj. Plie li invitis gepatrojn kaj najbarojn al la lerneja kultura festivalo. En ĝi li mem kantis kun balalajko. Li sukcesis eltiri monon el la lerneja administra komitato por aĉeti brajlpaperon por lernomaterialoj. Li, vokata "Fraĉjego", estis amata de lernantoj. Bedaŭrinde lia praktiko en Birmo daŭris nur unu jaron. Sed por Eroŝenko la sperto en Birmo fariĝis modelo por posta praktiko.

2 Duoninsulo Ĉukotko, Siberio en Sovetio

En 1929 Eroŝenko vojaĝis al Duoninsulo Ĉukotko en la ekstremo de Nordorienta Siberio. Pri siaj tieaj spertoj li verkis kelkajn verketojn en Esperanto, kiuj aperis en "Esperanta Ligilo" en 1933 kaj en 1947.

En la antaŭparolo de la verketo "Blindaj Ĉukĉoj" li skribis: "Unu el la taskoj, kiujn mi metis antaŭ min, vojaĝante al la lando de la ĉukĉoj, estis ekkoni la vivmanieron de la blinduloj en tiuj malproksimaj arktaj regionoj."

Li renkontis du blindajn junulojn kaj interparolis kun ili. La dialogo estas tre impresa por mi. Lia sinteno kontraŭ ili estis sincera kaj serioza. Eroŝenko diris jene.

Al Filip: "La ĉefaĵo estas ne la blindeco mem, sed la viduloj, kiuj ne donas al ni eblecon labori kaj perlabori nian ĉiutagan panon kaj vivi sendependan vivon."

Al Kejgin: "Tie, en Moskvo oni ne bezonas la dancon de rosmaro. Knabinoj ĉe ni edziniĝas al tiuj, kiuj scias kaj povas labori, sed ne danci. Tamen mi estas certa, ke se miaj moskvaj kamaradoj bezonus eklerni la dancon de rosmaro, ili sendube li lernus..."

Kia simpatio! Kia kuraĝo al junuloj! Du junuloj revigliĝis. Eroŝenko, blinda, estis bona konsilanto por samsortanoj.

3 Kuŝka, Turkmenio en Sovetio

En 1934 li venis al Turkmenio. Dum oni preparis establi blindullernejon, li lernis la lokan lingvon kaj vizitante vilaĝojn persvadis gepatrojn por sendigi blindajn infanojn al lernejo. Li ankaŭ konvinkis sian kolegon, bonegan instruiston de muziko, kunlabori en la lernejo. Ŝi venis eĉ kun edzo.

En Kuŝka Eroŝenko laboris kaj kiel administranto kaj kiel instruisto, de 1935 ĝis 1944. En lernejo "Domo de Blindaj Infanoj" li kunvivis kun infanoj kaj estis ame vokata "Paĉjo". La aktivado de la lernejo estis preskaŭ sama kiel tiu de lernejo en Birmo. En moviĝado igis infanojn iri eĉ sen bastono. Agrikulturo kaj bestobredado estis inkluzivitaj anstataŭ masaĝo. Li surprizis lokajn loĝantojn per la prezentado de infana opero.

Lia praktikado en Kuŝka daŭris naŭ jarojn, donante multe da influo kaj al lernantoj kaj al la loka komunumo.

KONKLUDE

La vivo de Eroŝenko estis vere unika kaj kuraĝa.

Li lernis en tri blindullernejoj kun malsamaj karakterizoj: en Moskvo, Londono kaj Tokio. Li vojaĝis kaj loĝis en multaj landoj de malsamaj kulturbazoj: Britio, Japanio, Tajlando, Mjanmaro, Hindio, Ĉinio, eŭropaj landoj kaj ankaŭ landoj en Sovetio. Li renkontis multajn etnojn, kaj lernis iliajn lingvojn kaj vivmanierojn. Li amikiĝis ne nur kun blinduloj sed ankaŭ kun vidantoj. Li faris disersajn agadojn: ekz. vojaĝi, lerni, diskuti, kanti, rakonti, ludi, verki, instrui, kolekti, administri ktp., ktp. Post la reveno al Moskvo, Sovetio, li ofte vojaĝis enlande al diversaj respublikoj kaj laboris ĉefe kiel instruisto.

Kio ebligis al li travivi tiel unikan kaj kuraĝan vivon? Tio estis nenio alia ol lia elstara vivkapablo kaj aparte granda scivolemo. Verŝajne li pensis, ke estas necese al blindulo ĉion en la vivo pensi per ĉiuj siaj sensoj, senti en sia koro kaj cerbumi en sia kapo. Dank' al sia riĉa vivkapablo, li realigis la vivon; la enhavoriĉa vivo plu evoluigis lian vivkapablon; la evoluiĝinta vivkapablo plu riĉigis lian vivon tra ĉiutagaj spertoj.

Surbaze de siaj spertoj li praktikis porblindulan edukadon kaj al infanoj kaj al junuloj. Kunvivante kun lernantoj en ĝojiga kaj libera etoso, li trejnigis ilin pri vivkapablo.

Mi pensas, ke la nuntempa edukado por blindaj infanoj ŝanĝiĝis multe de la tempo de Eroŝenko kaj frontas multajn problemojn. Koncernatoj de la edukado povas lerni

multon el la ideo kaj praktiko de Eroŝenko. Mi esperas, ke ankaŭ infanoj blindaj interesigu pri la vivo de Eroŝenko, kiu certe kuraĝigos ilin kaj donos la lumon al ili.

Unika kaj kuraĝa vivo de Eroŝenko kortuŝis min antaŭ preskaŭ 50 jaroj kaj nun denove kortuŝas min eĉ pli forte. Eroŝenko restas ĝuste la modelo de mia vivo.

Aldono 4

BRAJLA SKRIBO PORTAS INFORMOJN AL VIDHANDIKAPITOJ

La punktoskribo brajlo estas evoluigita de Louis Braille en la jaro 1825. Braille, filo de franca selofaristo naskiĝis 4.1.1809 kaj forpasis 6.1.1852. Li blindiĝis kiel 6-jara knabo en ludo per aleno. Li inventis sian punktoskriban sistemon en la blindullernejo en Parizo, kie li studis kaj poste instruis. Kiam li evoluigis la skribsistemon por blinduloj, eĉ ĉiuj vidantoj ne scipovis legi kaj skribi. Kvankam estis malfacile produkti kaj palpadi la tiaman reliefan skribon, la instruistoj ne akceptis la punktosistemon de Louis Braille. La unua libro en brajlo aperis en Francio en 1837.

La blinda Louis estis escepte kuraĝa, inteligenta kaj progresema. Lia genia, simpla skribsistemo estas daŭre uzata. Ĝia bazo egalas ĉie en la mondo.

Baza figuro de ses punktoj

La fingroj scipovas distingi je unu fojo maksimume ses punktojn. Do, brajla skribo baziĝas sur sesopo de etaj punktoj. El tiu bazo eblas formi alfabetajn literojn kaj interpunkciojn. Per kombinaĵo de punktosignoj eblas formi aliajn signojn, ekz. por ciferoj estas uzata propra antaŭsigno. Dank'al brajlo eblas legi kaj skribi ne nur alfabetajn literojn, sed ankaŭ muziknotojn, trikaĵ-instrukciojn, matematikajn simbolojn kaj aliajn signojn.

Pli malfacile ol skribi estas legi brajlaĵojn. La legado, palpado, postulas sentemajn fingrojn kaj paciencon.


Punktojn oni skribas sur iom dikan paperon per brajla skribmaŝino, per speciala komputilo aŭ uzante punktilon kaj tabulon (plastan aŭ metalan platon). Per punktilo oni trapikas punktojn sur paperon, kiu troviĝas inter du platoj. La sistemo de tabulo kaj punktilo postulas bonan konon de la skribo, ĉar oni skribas tra la plato de dekstre maldekstren, do spegulfigure.

Daŭre evoluanta skribsistemo

Kono de brajlo signifas por vidhandikapuloj kaj surdblinduloj la talenton legi kaj skribi. Tial la brajla sistemo estas daŭre evoluanta por respondi al novaj postuloj. Ĝi konvenas bonege al moderna informadiko. Ekzemple la eŭrosimbolo kaj la helikosigno (€ kaj @) jam havas siajn punktan prezenton. Por uzo de komputilo haveblas brajla ekrano. Per brajla printilo kaj ia ajn skriboprogramo eblas produkti diversajn dokumentojn en formo oportuna por vidhandikapitoj. Ankaŭ telefono komprenas brajlon. Per Iphone-poŝtelefono oni povas skribi kaj sendi mesaĝojn ankaŭ en brajlo. La ricevanto povas aŭ aŭskulti la mesaĝojn aŭ legi ilin platskribe.

Nuntempe brajlo videblas en publikaj lokoj kaj estas uzata por marki produktojn, ekz. pakaĵojn de medikamentoj.

Vidhandikapitaj infanoj lernas brajlon en lernejo samtempe kiam iliaj sam-aĝuloj lernas legi kaj skribi nigrablanke. Homoj, kiuj perdis vidpovon pli poste, povas lerni brajlon en kursoj. Kiu ajn, kiu interesiĝas pri brajlo, povas partopreni kurson aŭ lerni ĝin memstare uzante studmaterialon por vidantoj.



Esperanta brajlo-alfabeto



*Brajlo-ekrano
Foto Aviris*

Aldono 5

Moderna sonregistra kaj prestekniko ebligas produktadon de lernomaterialoj en formo oportuna por vidhandikapuloj. Tiel viddifektitaj studentoj povas partopreni ĝeneralajn lingvokursojn kune kun vidantaj kamaradoj. Jen spertoj pri instruado de Esperanto al vidhandikapuloj.

Vidanto instruas vidhandikapulojn

Kiam mi la unuan fojon estis petita fari Esperanto-kurson al blinduloj kaj malfortevidantoj, mi devis iom cerbumi ĉu mi kapablas. Tamen, profesie mi estas emerita instruisto de malgrandaj infanoj. Ĉiam dum la labortempo mi devis pensi pri taŭga metodo, tia ke ĉiu lernanto komprenu. Nun mi devus pripensi metodojn klarigi aferojn sen kreto kaj tabulo. Kuraĝe mi jesis.

La homo lernas aŭdante, vidante kaj skribante. En la koncerna grupo ĉiuj aŭdis, kelkaj "vidis" per siaj lertaj fingroj, kelkaj helpe de lupeo sed ili ne skribis, ĉar tio postulus tro multe da tempo. Notojn ili ne faris, tial ripetado estis grava. Mi donis kelkajn skribendajn hejmtaskojn, kiujn ni en la sekva renkonto legante kontrolis. Mi mem lernis, ke ekzistas specialaj komputiloj, kiuj ŝanĝas platskriban tekston al la brajla, kaj inverse. Tamen ĉiu devus havi porteblan tian, kaj tio estas tro postulata.

Ekzercado de ĝusta prononco tuj en la komenco estas grave. Ĉar la kursanoj ne vidas la movojn de la lipoj de la instruanto, ŝi/li devas prononci klare kaj ripeti kaj ripetigi la sonojn multfoje, ne nur apartajn sonojn, sed sonojn en vortoj kaj frazoj. Se oni lernas vortojn nur aŭdante, ne legante, la instruisto devas diri kiel skribi la malfacilajn sonojn.

Feliĉe ni nuntempe havas tri brajligitajn lernolibrojn por nialingvanoj. La malfortevidantoj kaj mi uzis platskribitajn librojn. Estus bone, se la vortaro de la libro estus en aparta brajla kajero, ĉar postulas longan tempon serĉi la tradukon ie en la fino de la ĉapitro. Por vidantoj la libro "Esperanto per rekta metodo" de Stano Marček estas bonega, ĉar la vortoj situas rande de la sama paĝo ne skribe sed bilde tradukitaj. La serĉado de la vortoj dumlecione postulas paciencon de la instruisto. Dum mia tempo la unua duono de la finna eldono de la laste menciita libro estis presita brajle laŭ miaj konsiloj, kiuj estis faritaj pensante helpi blindulojn uzi ĝin. Ĉio tamen ne estis realigita tiel pro eldonaj kaŭzoj, mi aŭdis.

Tiom ofte kiel eblis por klarigi aferojn mi klopodis havigi ilojn aŭ aĵojn, kiujn palpi. Kanto- kaj ludopaŭzoj estas nepraj. Por povi elekti instruajn kantojn pri la

gramatika aŭ la enhava temo mi lernis skribi brajle, unue per tabulo kaj punktilo, poste per prunteprenita brajla skribmaŝino. Tio ne estis nevenkebla afero, kompreneble la brajla alfabeto antaŭ miaj okuloj.

Per ĉi tia instruo tri kursanoj partopenis en Somera Esperanto-Studado (SES) en Slovakio, du el ili eĉ plurfoje.

SYLVIA HÄMÄLÄINEN (FINNLANDO)

Red.

La lernolibro "Esperanto per rekta metodo" de Stano Marček haveblas en brajlo ĉe Ligo Internacia de Blindaj Esperantistoj (LIBE).



*Fingroj legas brajlon
Foto Sylvia Hämmäläinen*

Aldono 6

FONTOJ

1 Nepresitaj fontoj

1.1 Arkivoj

Kyoto Lighthouse, Kyôto, Japanio

Nihon Môzinkai Rengô (Japana Federacio de Blindul-organizaĵoj), Tôkyô, Japanio

Nippon Lighthouse, Ôsaka, Japanio

Näkövammaismuseo (blindulmuzeo), Helsinki, Finnlando

Näkövammaisten Keskusliitto (blindulligo), Helsinki, Finnlando

Steleto, Esperanto-Asocio de viddifektitoj, Helsinki, Finnlando

Synskadades Museum; Stockholm, Svedio

TTT-ejo de Universala Esperanto-Asocio, Rotterdam, Nederlando

Österreichisches Nationalbibliothek, Esperantomuseum

1.2 Personoj kiuj provizis informojn

Barnes, Viv; Royal National Institute of Blind People (RNIB), London

Buller, Osmo; Universala Esperanto-Asocio, Rotterdam, Nederlando

Dimov, Dimo; Varna, Bulgario

Etzenberger, Henriette; Wien, Aŭstrio

Gonin, Jacqueline; Villeurbanne, Francio

Gonin, Herve; Villeurbanne, Francio

Grassini, Aldo; Ancona, Italio

Grigorjevskij, Andrej; Universala Esperanto-Asocio, Rotterdam, Nederlando

Huuskonen, Kari; Helsinki, Finnlando

Hämäläinen, Sylvia; Tampere, Finnlando

Jacobsen, Mia; Norges Blindeforbund, Oslo, Norvegio

Jelínek, Jiří; Jilemnice, Ĉeĥio

Ĵelev, Vladimir; Plovdiv, Bulgario

Juotzenaite, Audrone (Audra); Vilnius, Litovio

Karvinen, Arvo; Helsinki, Finnlando

Kikusima, Kazuko ("Krizantemo"); Tokyo, Japanio

Kovač, Antun; Zagreb, Kroatio

Laine, Harri; Espoo, Finnlando

Loĵajič, Nedeljka; Beograd-Palilula, Serbio

Masenko, Anatolij; Kislovodsk, Rusio

Meyer, Martin; Zürich, Svislando

Moerbeek, Rob; Beverwijk, Nederlando

Moilanen, Aatu; Helsinki, Finnlando
Ortelli, Luciano; Luzern, Svislando
(fotoj ricevitaj de prez. de Unitas, tiĉina sekcio de Svisa Blindulfederacio)
Příborský, Jan; Olomouc, Ĉeĥio
Prytz, Otto; Oslo, Norvegio
Sorel, Jean; St. Leonard (QC), Kanado
Speckmann, Theodor; Köln, Germanio
Stiby Pelkonen, Gilda; Stockholm, Svedio
Tanabe, Kunio; Tokyo, Japanio

Uber, Keith, Helsinki, Finnlando
Varró, Attila; Budapest, Hungario
Wilkniewski, Pawel; Poznan, Pollando
Zurita, Pedro; Madrid, Hispanio

2 Presita materialo kaj literaturo

2.1 Gazetoj

Finnaj blindulgazetoj "Kajastus" 10–11/1950 – 4–5/2004 kaj
"Näköammaisten Airut" 9/1947–18/2012
Esperanta Finnlando 4/1995, 4/1996, 5/1999, 5/2002, 6/2003, 6/2005, 5/2007,
4/2008, 1/2009, 5/2009, 4/2011
Esperanta Ligilo, jarkolektoj 8/1950–2014
Esperanto 1284 (10) Oktobro 2014

2.2 Artikoloj

New Beacon, September 15th, 1930, p. 183. National Institute for the Blind
(NIB)

VER (Vuk Echtner), "Aŭroro"-rememoroj, Aŭroro 2–6/1970– 1/1978

Antoine Theophile Cart 1855–1931, Memoriga tago, 30a de julio 1998,

Saint Antoine de Breuilh – Dordogne, Francio. Impression OBT COPY

2.3 Literaturo

Jarlibro 2014, Universala Esperanto-Asocio

Kongreslibro, Olomouc 2011, KAWA-PECH

Vestlandske Blindforbund 1904–1979 (norvega jubilea publikaĵo)

Fotoj
Ritva Sabelli



1996 Ĉeĥio (Prago)
Blindula movado kaj agado de handikapuloj videblis ĉe la ĉefa enirejo
de la 81-a UK. Jan Bemelmans el Nederlando studas informtabulon.



1999 Germanio (Berlino)
Theodor Speckmann, prezidanto de LIBE, legas sian noticon. Maldekstre sidas neder-
landano Jan Verheule (1930–2000) kasisto de LIBE kaj redaktoro de "Esperanta Ligilo"
1998–2000. Dekstre aŭskultas estrarano Raimo Tanskanen el Finnlando.



2002 Hungario (Balatonlelle)
La akva glitejo ("tobogano")



2003 Svedio (Gotenburgo)
Kvarmane ludas hungaro Attila Varró kaj japano TANAKA Teiiti (1935–2013).



Svedoj Göte Linghede (maldekstre 1916–2010), vicprezidanto Tiina Nummi-Södergren kaj norvego Otto Prytz.




*2005 Litovio (Vilnius)
Arvo Karvinen (1934–2013) prezentis grupon de litovaj junulinoj, kiuj kantas kun instruistino Audrone Maksimaitiene.*



Japaninoj YANASE Fumiko kaj Nanami kun Pavel Rjabov (maldekstre) kaj Anatolij Masenko el Rusio vestitaj en japana somera vestaĵo "Yukata".



Juna litova komencantino en "Yukata".



Martin Meyer (Svislando) ludas sian blankan bastonon. Apude aŭskultas Tadeusz Karas (Ĉeĥio).



2007 Japanio (Tokio)

Seminario pri enlaborigo de vidhandikapitoj (laborlingvoj: Esperanto, japana) La plej maldekstra estas KIKUSIMA Kazuko kaj la dua TANAKA Tetuzi, la du ĉeflaborintoj. Poste KITAGAWA Hisasi kaj YAMAKAWA Syūiti interpretas la parolon de Pedro Zurita pri la dungiteco en Hispanio. Ĉe tablo sian vicon atendas maldekstre SASHIDA Chuji, Arvo Karvinen (1934–2013 Finnlando) kaj Aldo Grassini (Italio).



Maldekstre Arvo Karvinen, Aldo Grassini, Pedro Zurita.



2007 Japanio (Jokohamo)

TANAKA Tetsuji, prezidanto de la Japana Asocio de Blindaj Esperantistoj faras notojn per portebla aparato. S-ino TANAKA Miori montras la aparaton dum LIBE-kunveno en Jokohamo.



2008 Kroatio (Premantura)

Nedeljka Lojajić (Serbio) parolas pri avantaĝoj kaj malavantaĝoj de la vivo de blindulo en granda urbo (Beogrado).




Pier Luigi Da Costa (Italio) konatiĝas kun la malnovslava teksto sur la aleo de glagolicianoj apud urbeto Hum, la plej malgranda urbo en la mondo.



Arvo Karvinen puŝas globon por faligi keglojn



2009 Pollando (Muszyna)
Kantanta japana delegacio en la internacia arta vespero.



Petro Snypir (Ukrainio) kantas kaj lin akompanas Jiří Jelínek (Ĉeĥio).



Sylvia Hämäläinen helpas kongresanojn ricevi salubran dozon de inhalo en abelujo. Baldaŭ la kapo de Riitta Ekola eniras abelujon.



*2010 Somera Esperanto-
Studado, Slovakio
(Piešťany)
Trejnado de memdefendo,
Arvo Karvinen baldaŭ
ĵetos instruiston sur la
plankon.*



2012 Blindula Iiris-centro en Helsinki

Arvo Karvinen kaj ŝtatprezidanto Tarja Halonen ĝojas, ke la rekapabla korto por infanoj, "la korto de travivaĵoj" realiĝis. Projekton iniciatis Arvo Karvinen.

Foto Lions Club Helsinki-Pakila